

ANH DUK

HON DAT

ROMANO

Sudvjetnama literatura kaj arta

Premio *Ngujen Dinh Chieu*

1960 - 1965

FREMDLINGVA ELDONEJO — HANOJO

HON DAT

ANH DUK

HON DAT

Romano

Sudvjetnama literatura kaj arta

Premio *Ngujen Dinh Chieu*

1960 - 1965

FREMDLINGVA ELDONEJO

HANOJO — 1968

Tradukis **Ngujen Minh Kinh**

kunlabore de

Ngujen Minh Tung

kaj **Ngo Quy Toan**

Kovrilo de **Van Çao**

ANTAŬPAROLO

Jam de pli ol dek-unu jaroj, en sia venkoplena lukto, la sudvjetnama popolo jam kreas nenombreblajn mirindajn heroaĵojn.

La tuta progresema homaro,—ĉiuj leviĝantaj aŭ ĵus vekiĝintaj popoloj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko,—direktas sian rigardon al nia Sud-Vjetnamio,—tiu kolonia duonlando, kiu nun alfrontas kaj venkobatas la plej grandan okcidentan potencon, estron de la monda koloniismo. Efektive, tio ne estas ordinara okazaĵo, precipe kiam tiu duonlando sin mem armas, esence, per firmdecida batalspirito.

Oni povas diri, ke en nia Sud-Vjetnamio, ĉiu rivero, ĉiu monteto, ĉiu vilaĝeto, ĉiu popolano jam plenumas unu heroaĵon,—eĉ plurajn,—kaj sufiĉas, ke oni aŭskultas nur unu el ili por povi taksi la moralan kvaliton de dek-kvar milionoj da Sudvjetnamoj.

Nuntempe, la usonaj imperiistoj klopodaŝ por kreskigi la nombron de siaj soldatoj en Sud-Vjetnamio ĝis tiu de ili antaŭkalkulita proporcio,—ili : 10 *kaj ni :* 1. *Tiu proporcio sola jam montras, kiom ridinda estas tiu fanfaronulo, kiu deklaras sin, kiel la plej potencan en la mondo! .Sed, necese estas substreki, ke tiu proporcio estas ankoraŭ tro malalta. En Hon Dat, pli ol mil malamikaj soldatoj, ekipitaj per plej bonaj armiloj, devis rezigni sian batalon, post* 10*-taga kolizio kontraŭ* 19 *el niaj homoj, inter kiuj troviĝis du knaboj deksepjara kaj dektrijara kaj tri virinoj...*

Per sia romano Hon Dat, la verkisto Anh Duk jam sukcesas pruvi la veran forton de tiuj homoj, kiuj animate de bolanta malamo kaj varma batalspirito, neniam ŝanceliĝas antaŭ bandaĉo da kanajloj, superaj per sia nombro kaj siaj armiloj sed, al kiuj mankas io ekstreme grava, la morala forto.

Ĝuste en tio kuŝaŝ la simbola karaktero de la romano. La historio okazis post la «komuna popolleviĝo» t. e. ĉirkaŭ la jaro 1961. *Ĝis nun, la personoj en Hon Dat ŝajne ankoraŭ vivas. Ili daŭrigas, en aliaj Hon Dat, pli grandskalan lukton, kun pli brilaj sukcesoj.*

Hon Dat estas bona verko, vivovera kaj kortuŝa.

Evidentiĝas, ke en ĝi vidiĝas ankoraŭ mankoj; tamen, la romano estas fidela rakonto, unu el la epopeoj prikantantaj nian lukton kontraŭ la usona imperiismo kaj ties lakeoj. Prezenti la romanon Hon Dat al la legantaro, ĝuste kiam nia tuta popolo firmdecide venkobatas la usonan agreson vere estas afero signifoplena kaj utila.

Pri tio, nia verkisto Anh Duk plene meritas nian dankon.

Sud-Vjetnamio, decembro 1965

TRAN BACH DANG

Membro de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Nacia Fronto de Liberigo de Sud-Vjetnamio
Prezidanto de la Konsilantaro de Verkistoj kaj Artistoj de Sud-Vjetnamio

Ĉapitro Î

1

KUJEN diras:

— Franjo Ba, ĉu nuntempe vi fidas al mi? Mi jam diras, ke fraĉjo Ba neniam forgesas vin. Kiom emociigaj estas liaj leteroj! Kaj li jam sendis dek-ok leterojn, ĉu tio ne sufiĉas al vi? Tamen, vi ĉiam malprave suspektas lin pri tia aŭ alia afero... Nu, ĉiuj liaj leteroj perdiĝis kaj la viaj ankaŭ ne atingis lian manon! Tio tute ĉagrenas min. Nordo estas ankaŭ parto de nia lando; tamen, dum sep jaroj, perdiĝis ĉiuj leteroj de ĝi venintaj! Vere plendinde!... Sed, sed hodiaŭ, vi ne plu maltrankviliĝas, ĉu ne? Alie, vi ĉiam diras: «Sendube, tie malproksime, li estas tiel feliĉa, ke li forgesas nin ĉiujn!» Nun, ĉu vi ne trovas, ke ĉiuj viaj suspektoj kontraŭ fraĉjo Ba estas malpravaj?

Tiel, rapidvoĉe kaj ĝojplene, Kujen diras al sia propra fratino. Ŝajnas, ke ŝi protektas sian bofraton, sed pliĝustadire, ŝi gratulas sian fratinon. Ŝi volas dividi kun tiu lasta tiun ĝojegon kaj iom kontribui al ĝi, — ĝojego, kiun havas tiu povra virino, nur post sepjara atendado. Kiam Kujen parolas, ambaŭ ŝiaj dikaj

manoj, de tempo al tempo, svingiĝas, ŝiaj okuloj trembrilas kaj, iafoje, ŝi kunpremas siajn lipojn.

Transdoninte la leteron al sia fratino, Kujen retenas unu foton. Poste, viglapaŝe ŝi iras kapti la etulinon Thuji, sidantan ĉe la ŝtuparo, premas ŝin sur sia brusto kaj montras al ŝi la foton :

— Aŭskultu tiun demandon de via onnjo Ut * : kiu estas tiu sinjoro ?

— Mia paĉjo !

Ĉe tiuj vortoj, la etulino etendas siajn manetojn por preni la foton. Algluante siajn okulojn al ĝi, ŝi murmure ripetas ;

— Jes, mia paĉjo !

— Pro kio vi scias ?

— Panjo diras... panjo diras, ke li estas mia paĉjo !

Thuji levas ambaŭ okulojn, rondajn kaj nigrajn, kiel kernoj de longano :

— Ĉu vere li estas mia paĉjo, Onnjo Ut ?

Kujen ne respondas. Ŝi tuj portas la etulinon sur la lignoliton, sidigas ŝin trankvile sur siajn krurojn, antaŭ ol kapbalancetante diri :

— Vere, li estas via paĉjo. De nun, bone memoru tion, ĉu ne ? Tiel, ambaŭ patro kaj infano sin konas reciproke.

Kujen sin turnas al sia fratino :

— Franjo Ba, en sia letero, fraĉjo Ba sciigas, ke li jam ricevas vian lastan leteron kaj ankaŭ la foton,

---

* En Sudvjetnamio, oni laŭkutime nomas la lastnaskit(in)-on, « Ut ».

kiun vi prenis kun Thuji... Ĉielo! Nur post sep jaroj, li ja konas la fizionomion de la etulino!

Poste, Kujen ameme puŝas per sia fingro la frunton de Thuji:

— Nur post sep jaroj, via paĉjo konas vian fizionomion, Thuji mia! La tagon, kiam via paĉjo foriris, vi ankoraŭ ne venis en la mondon; tiam, vi ankoraŭ ne estis naskita...

Aŭdante tiujn parolojn de sia juna fratino, Su tuj plendetale rememoras la lastajn tagojn, kiam San, ŝia edzo, revenis hejmen, antaŭ ol iri kolektiĝi en Nordo. Tiujn tagojn, en tiu sama surfosta domo kun planko el malnovaj lignotabuloj, San ĉiam babilis, ĉiam plenigis la ĉambron per siaj sinceraj ridoj, kiel kutime. Ŝi sola komprenas la kialon de lia trankvila sinteno. Li konstante ripetis: «Du jaroj ne estas longa tempospaco!»* Sed, nur la lastan nokton, li konfidencis al ŝi: «Karulino mia, mi diras tion por ne maltrankviligi panjon. Kiel kompatinda ŝi estas! Sed, al vi, mi devas konfesi, ke mi ne fidas al tiu dujara templimo. Povas esti, ke finiĝos apenaŭ unu jaro, kiam denove eksplodos la milito kaj, ke tiu disiĝo daŭros ne du jarojn sed, tri, kvar aŭ kvin jarojn. Tial, ni devas esti spirite pretaj...» San ankoraŭ diris: «Kia ajn estas la okazaĵo, se ni estas antaŭzorgemaj, ni restas ĉiam neŝanceleblaj!» Poste, en malfrua nokto, li kuntiris sian brakon por

---

* Laŭ la Ĝenevaj Interkonsentoj de 1954 pri Vjetnamio, la armeo kaj la registaro de ambaŭ partioj grupiĝis ambaŭflanke de la senarmea zono kreita ĉe la 17a paralelo. Por la patruja reunuiĝo, estis okazontaj, du jarojn poste, — t.e. en julio 1956, — la ĝeneralaj balotelektoj en la tuta lando.

apogi, ĩn momenton, ŝian kapon al sia brusto, antaŭ ol subite diri, kvazaŭ sin mem konsolante: «Mi ne scias, ĉu en Nordo estas samaj fruktoj, kiel ĉe ni? Mangoj, mangostanoj, pampelmusoj? Nepre oni trovas tie pampelmusojn. Sed, kiam floras la tieaj pampelmusoj? Eble, ne en tiuj lastaj monatoj antaŭ la Tetfesto, kiel ĉe ni...» Komence, Su kredis ke ŝia edzo eviteme alpaŝis al alia temo, sed ŝi tuj komprenis lian intencon. Ŝi sciis, pri kio li estis pensinta, antaŭ ol kvazaŭ sencele paroli. Antaŭ du jaroj, meze dum la festeno organizita de la loĝantoj de Hon Dat por akcepti niajn batalantojn, venkoplene revenintajn de la kampanjo Long Ĉaŭ Ha, Su tute ne atendis, ke San jam atentis pri ŝi, kiam ŝi alportis la manĝaĵojn al la gastoj. Li iam rakontis al ŝi, ke tiam li estis sentinta la subtilan parfumon de pampelmusaj floroj, eliĝantan el ŝia mirinde densa kaj velurece brila kaphararo. Ambaŭ interkonatiĝis en tiuvespera festo. Pli poste, denove renkontante sian amatinon, San atendis la momenton, kiam ŝi restis sola por mallaŭte demandi kun rideto: «Pro kio nun, fraŭlino Ba Su ne parfumas al si la kapharojn per tiu pampelmusa esenco?» Su kunpremante siajn lipojn ridetis, dum tute ruĝiĝis ŝia vizaĝo.

Tia estis la historio de ambaŭ homoj. Tiu amo ekaperis, kiam en la tuta lando ni gajnis pli kaj pli grandajn venkojn. Tiu amo ekfloris meze de la dekdua lunmonato, kiam la pampelmusoj en ĉiuj ĝardenoj de Hon Dat estis en plena florado. Du jarojn poste, ili organizis edziĝofeston. Ĝi estis la plej ĝoja edziĝofesto de la regiono, kiu okazis ĝuste, kiam ni glore venkis la francajn koloniistojn en Djen Bjen Fu. De tiam,

forpasis pli ol sep jaroj. Ambaŭ ankoraŭ ne ĝuis tiun komunan vivon pli ol unu monaton. Kaj nur hodiaŭ, Su ricevas sciigojn pri sia edzo, dank'al tiu maldika letero kaj renkontiĝas kun li per tiu eta foto.

Sep jaroj! Aŭdante tiujn parolojn de sia juna fratino, Su preskaŭ ne kredas, ke vere ekzistus tiu tempospaco.

— Tiel rapide! — Ŝi maldiligente diras — ... Forpasis sep jaroj de tiu tago, kiu ŝajne estus nur hieraŭ!

— Ho... franjo mia, certe fraĉjo Ba ne scias, kiel mizere ni vivas ĉi tie! Se li scias, ke la kanajloj iam kondukis vin al la distrikto por perforte devigi vin rezigni vian edzon aŭ por enfermi vin en la « tigrokaĝo », « krokodilokaĝo ». Ha, se li scias tion ...!

Su ridetas kun bonkora mieno :

— Neeble! ... Sendube, li jam aŭdas pri tio, sed li ne povas klare kompreni la aferojn!

Dum ambaŭ fratinoj babilas, la etulino Thuji delikate glitas el la brakoj de Kujen. Ŝi rampante proksimiĝas al la kudrokorbo de sia patrino kaj prenas el ĝi unu rondan spegulon. Poste, ŝi iras al domangulo, kie la lignolito tuŝas la murvandon. Ŝi sidas tie sole, senvorte. Sed baldaŭ, ŝi malrapide levas la foton per unu mano kaj la spegulon per la alia. Ŝi rigardas sin en la spegulo kaj rigardas la vizaĝon de sia patro en la foto. Ŝi ripetfoje faras tion, por vidi, ĉu ŝia patro kaj ŝi similas unu al la alia, de la okuloj ĝis la nazo, de la buŝo ĝis la orelkonkoj. Ŝi trovas, ke liaj okuloj kaj liaj brovoj ne estas samaj, kiel la ŝiaj. Ŝiaj okuloj estas rondaj, sed tiuj de ŝia patro, iom longaj kaj pintaj. Kaj liaj brovoj estas tro densaj. Tamen, ŝi tute ĝojas,

kiam ŝi rimarkas, ke liaj nazo kaj buŝo tute similas al ŝiaj. Tre kontenta, ŝi denove rigardas, denove serĉas aliajn similajn trajtojn. Ŝi deziras, ke inter ŝia patro kaj ŝi, ĉiuj vizaĝtrajtoj estu la samaj. Ĉar ŝi tre amas sian paĉjon. Tiu amo ekĝermis en tiu infana koro, de post kiam ŝi sciis, ke en tiu ĉi mondo, ŝi havas ankoraŭ unu patron. Ŝi kredas ĉiam, ke io ajn apartenanta al li estas bona, altvalora kaj, ke certe li amas ŝin, prefere ol iu ajn. Tiun matenon, kiam ŝia patrino montris al ŝi la foton dirante, ke la fotita homo estas ŝia paĉjo, la etulino tuj kredis al ŝi, unue, ĉar ŝia patrino ĉiam diras la veron ; due, kaj precipe, ĉar kiam ŝi vidas la foton, ŝajnas al ŝi, ke ŝi iam renkontis sian paĉjon. Efektive, ŝi renkontis lin nur en sia infana imago, post la rakontoj de sia patrino.

Pri tiu « foto »-afero, Su konstante sentas bedaŭron kaj ĉagrenon kontraŭ si mem. Post la foriro de San, ŝi ĉiam gardis lian foton, zorge kaŝitan en ŝia paperujo. En 1956, ŝi estis arestita. Dum pridemando en la distrikto, la malamiko malkovris kaj disŝiris la foton.

Tiun jaron, ŝi ĵus naskis la etulinon Thuji.

Babilante kun sia juna fratino, Su jam per preterfluganta rigardo vidas ĉiujn manovrojn de sia filineto. Sed ŝi ŝajnigas, kvazaŭ ŝi ne atentas pri tio. Ŝi faras okulsignon al Kujen. Tiu lasta sin turnas posten. Trovante, ke Thuji ĉiam silente kaj atenteme sin fordonas al tiu kontrolado de siaj propraj vizaĝtrajtoj, ŝi provpenas ŝtopi sian buŝon por ne ridi. Sed baldaŭ, ne povante plu sin regi, ŝi eksplode ridas. Thuji estas tute ruĝa de honto. Embarasita kaj kun ĝeneca mieno, ŝi prove kaŝas la foton kaj la spegulon sur sia brusto.

Su ne ridas. Ŝi karesvoĉe demandas :

— Etulino mia, ĉu via paĉjo kaj vi similas unu al la alia ?

La knabineto rigardas aliloken, senresponde. En palpebruma daŭro, oni jam vidas ambaŭ ŝiajn grandajn kaj nigrajn okulojn iom malsekiĝi. Su scias, ke frue malfrue ploros ŝia filineto. Ŝi estas ja plorema, jam de siaj tre infanaj jaroj. La patrino de Su ofte diras : « La etulino tute similas al vi, kiam vi estis samaĝa, kiel ŝi ! »

Su ankaŭ eksentas,—oni ne scias pro kio,—piketadon kaj varmon sub siaj propraj palpebroj, tuj kiam ŝi starigas al Thuji la suprediritan demandon. Ŝi ekstaras, sin direktas al iu angulo de la lignolito kaj ĉirkaŭbrakas sian filineton. Poste, preskaŭ samtempe, ambaŭ patrino kaj infano kune plorsingultas.

Kujen ridetas. Ŝi bone scias, ke tiuj larmoj de ŝia fratino kaj de ŝia nevino estas nur larmoj de feliĉo, post tiom da jaroj de mizero, foroferoj kaj atendado. Tial, ŝi tute ne zorgas pri tio. Iun momenton poste, kvazaŭ ne volante lasi tiujn plorsingultojn fuŝi la ĝojigan novaĵon al ŝia fratino, al la tuta familio, ŝi ekleviĝas kaj diras :

— Kia tedaĵo ! Kiam oni ricevis neniun novaĵon pri fraĉjo Ba, vi kaj Thuji nur ĝemplendis. Nun, lia letero jam troviĝas en viaj manoj kaj vi ploras. Vere, ambaŭ patrino kaj infano estas nekompreneblaj !

Ĉe tiuj vortoj, Kujen turnas sian dorson, aldonante :

— Do, ambaŭ restu tie por ĝissate plori ! Mi iras serĉi panjon por informi ŝin...

Ŝi estas jam informita! — Diras Su kun sufokita voĉo—Ŝi iras nun al la maro por kapti fiŝojn aŭ kankrojn; ŝajnas, ke ĉi vespere, ŝi preparos manĝon por gastoj.

Kujen haltas, kun vizaĝo radianta pro ĝojo:

— Ha! Oni ricevis unu leteron de fraĉjo Ba kaj la maljunulino jam preparas festenon. Do, kiam la lando reunuiĝos, kaj kiam li revenos hejmen, certe ŝi buĉos porkon...

— Ne estas festeno. Kuras la famo, ke revenos Tam Ĉan kaj Ngan; tial, panjo...

— Jes, jes... Ĉi matene, estas fermita la plilarĝigita kunveno de la distrikta partikomitato. Certe, ili revenos ĉi tien tiuvespere. Mi jam renkontis kelkajn kamaradojn el la Armita Propaganda Taĉmento de Ngan, kiu agadas en la 2a «strategia vilaĝeto»; ili diris, ke Tam Ĉan laboros ĉi tie por kelka tempo.

Su jam retrovas la kutiman trankvilon en sia voĉo:

— Mi aŭdis, ke ĉi foje oni elektas fraton Tam Ĉan, sekretario de la distrikta partikomitato, ĉu ne?

— Jes, partisekretario, respondeca ankoraŭ pri propagando ĉe la popolamasoj... Laŭ mia opinio, li estas tute inda je sia posteno de partisekretario. Ĉu vi memoras tiujn mallumajn tagojn? Kie la revolucia bazo estis sovaĝe subpremita, tie troviĝis Tam Ĉan. Kiel ajn mizera kaj danĝera estis la situacio, li restis ĉiam flegma.

— Vere, oni sentis sin malpli maltrankvila, ĉiufoje kiam oni renkontis lin. Mirinde estas, ke la revolucio jam produktis multajn talentulojn el nia kamparanaro. Tam Ĉan estas ankaŭ kamparano. Panjo diras, ke dum la franca superregado, li loĝis en Vinh

Hanh kaj, ke en ĉiu ajn rikoltsezono, oni vidis lin vektoporti sian junkan maton ĝis ĉi tie por sin dungigi, kiel rikoltiston...

— Ŝajnas, ke tiam li jam faris la revolucion.

— Jes, jam de tre longe! Kaj li estas tre sentimentala. Mi ankoraŭ memoras la tagon, kiam mi estis liberigita, post mia aresto en la distrikto. Li skribis al mi leterojn por konstante admoni kaj konsoli min. Tiujn leterojn mi iam montris al vi, ĉu ne, Kujen?

— Jes, mi jam tralegis ilin!

Su ĵetas preterflugantan rigardon sur sian junan fratinon kaj ridetante daŭrigas:

— Kaj sen la helpo de Tam Ĉan, jam preskaŭ vanigis tiu afero inter Ngan kaj vi! Kaj vi estus plorinta ankoraŭ longatempe!

Kujen duonridas kun tre kontenta mieno. En ĉiu ajn cirkonstanco, eĉ dum siaj mizeraj kaj malfacilaj tagoj, ŝi restis ĉiam gaja, donante al ĉiuj la impreson, kvazaŭ ŝi povus esti tia, la tutan vivon. Tamen, estis escepto: en 1958, ŝi jam barakte ploris unu tutan monaton. Sed baldaŭ, subite forvaporiĝis el ŝia koro ĉia ombro de malĝojo.

Tiu afero koncernas la junan viron, nomitan Ngan, pri kiu ĵus parolis franjo Su. Ngan estis tipografiisto, kiu plenumis ankaŭ la mision de interliganto en la urbo Rach Gia. Li estis arestita de la malamiko kaj sendita al Fu Loi. Tie, li partoprenis la lukton kontraŭ la senprecedence barbara amasvenenado de politikaj malliberuloj fare de la Usono-Dziema kliko. Poste, li estis unu el la postvivantoj, kiuj estus ĵetitaj en la maron, dum tiu kolektiva dronmortigo. Survoje al la

enŝipejo, li saltis de la kamiono sur la teron kaj enŝte liĝas en la stratojn. La tieaj loĝantoj fortrančis la katenojn ĉe liaj brakoj, zorge kaŝis lin, poste forkondukis lin de la loko. Ngan venis al Hon Dat, kiam li estis nur dudekdujara, sed li jam servis tri jarojn la Partion. Li partianiĝis en malliberejo. Li rakontis al Kujen, ke dum la akcepta ceremonio, li levis sian pugnon por saluti la standardon de l' Partio nur en imago. Alveninte ĉi tien, li respondecis pri la junularo. Kaj, sekve de tio, li konatiĝis kun Kujen. Tiam, tiu lasta estis nur deksepjara. Hon Dat kun multaj aliaj vilaĝoj spertis severegajn disrabajn operaciojn de la Dziemaj soldatoj. Foje, Ngan devis sin kaŝi en sekreta ŝirmejo, instalita sub la planko de la domo de Kujen, dum preskaŭ du monatoj. Tie, li skizis agadplanojn por la junulino. Kiam Kujen sukcesis memstare agadi, li devis alilokiĝi, ĉar la malamiko jam havis suspekton pri lia alestado. Lia dua sekreta ŝirmejo troviĝis sub falsa tombo meze de aro da veraj. Ĉiunokte, oni vidis unu knabinon proksimiĝi al la tombejo kaj engliti en tiun tombon. Tiu knabino estis Kujen. Preskaŭ ĉiunokte, ŝi ŝtele iris al tiu loko por provizi rizon al Ngan kaj diskuti kun li pri la ĉiutaga laboro. Plurfoje, ŝi alportis al li ankaŭ bananojn kaj mangojn. Ŝi devigis lin ŝanĝi siajn vestojn kaj kunportis hejmen liajn malpurajn tolaĵojn por ilin lavi. Kiam tro okupita, ŝi ne povis eliri el sia domo, patrino Saŭ anstataŭis ŝin. La maljunulino ploris, ĉiufoje kiam ŝi malsupreniris la subteran ŝirmejon. Iun tagon, ŝi diris al Ngan :

— Ĉu ni ĉiam rezignacie eltenas tiun kalvarion, Ngan? Ili tratrančis al ni la ventron, frakasas al ni la kapon kaj multaj el niaj aktivuloj pereis sub iliaj

manoj! Hieraŭ, Kujen kaj Su iris al la arbaro kaj trovis tie, en marĉejo, la ostarojn de niaj sep bataĥantoj, batmortigitaj antaŭ longe...

Ĉe tiuj vortoj, la maljuna patrino ploris kaŝante al si la vizaĝon post la manoj. Ngan tuj demandis:

— Kie Ba Su kaj Ut gardas tiujn ostarojn?

— Ili envolvis la tuton en peco da nilono kaj kaŝis ĝin en la Hon-kaverno!

Iufoje, ŝi premis lian manon kaj, nur post longa hezito, malrapide diris:

— Ngan, mi konsideras vin, kiel mian propran filon. Mi sincere demandas vin, ĉu vi amas mian filinon Kujen? Diru al mi la veron; se vi amas ŝin, mi edzinigas ŝin al vi.

Emociplene, Ngan tuj brakumis la patrinon. Kompreneble, antaŭ kiam patrino Saŭ diris tion, li kaj Kujen ambaŭ jam pasie amis unu la alian. Sed, lin plej kortuŝis kaj plej feliĉigis la fakto, ke la maljuna patrino direktis al li tiujn parolojn, ĝuste kiam la revoluciaj bazoj spertis plej furiozajn atakojn kaj ĝuste kiam li devis sin kaŝi en tiu malluma kaj stranga subteraĵo. Li pensis: «Patrino Saŭ volas konfidi al li la vivon de sia lastnaskita filino, ne nur pro sia aparta amo al li, sed ankaŭ pro tio, ke ŝi fidas kaj amas la Revolucion. Kuŝante en la malluma kavaĵo, li ĉiam pensis, pro kio ŝi ne timis, ke li povus baldaŭ oferi sian vivon, ke ŝia filino mizere vivus, ĉar li mem estis travivanta ekstreme mizeran vivon. Tiam, Kujen estis tre bela en sia plena seksmatureco. En la tuta regiono, multaj viroj turnis sian atenton al ŝi kaj volis peti ŝian manon. Inter ili troviĝis kelkaj oficiroj,

kiuj ĉiam afektis seriozan mienon kaj ankaŭ pluraj elegante vestitaj knabegoj, kiuj ofte venis al la plaĝo Bai Tre por marbano. Patrino Saŭ jam pli ol unufoje diris al siaj konatoj el la vilaĝo:

— Mia filino estas naskita ne por edziniĝi al tiuspecaj homoj!

Siaflanke, Kujen tute ĉagreniĝis antaŭ la flirtaĵoj de tiuj aĉuloj. Ĉiunokte, kiam ŝi estis tuj metonta siajn piedojn sur tiun senhoman tombejon, ĉiuj ŝiaj ĉagrenoj, kaŭzitaj de tiu «am-afero», forvaporiĝis kaj ŝia koro tute pleniĝis je amo kaj espero. Dum siaj infanjaroj, ŝi neniam estis aŭdacinta trapasi tiun lokon eĉ tage; sed, nun ŝi venis tien tute trankvile, nenion timante. Jes, tie loĝis neniu fantomo! Ŝi devis gardi sin nur kontraŭ la agentoj de la sekureca servo. Sed, tiun lokon, feliĉe, ili tute preteratentis. Tial, Ngan jam trankvile vivis en tiu subteraĵo preskaŭ du monatojn, antaŭ ol transloĝiĝi al la sekretaj bazoj en la ĝangalo.

Iam, ĉe tagmezo, malfeliĉo trafis lin, ĝuste kiam li forlasis sian arbaran bazon por veni al la vilaĝo. La malamiko arestis lin sur sia embuskejo. Tuj tiuvespere, nia bazo en la ĝangalo estis ĉirkaŭsieĝita. Feliĉe, tiam ĉiuj niaj aktivuloj iris kapti mitulojn kaj restis nur senhoma pajlodomo. Tiuj, kiuj troviĝis proksime de tie klare aŭdis la plendvoĉojn de la soldatoj el la «commando»-unuoj *:

— Fi! Pro kio li montras al ni tiun lokon?

---

* Specialaj atakgrupoj de la malamiko.

— Ĝuste tiun lokon ni serĉas! Sed, ili estas sendube avertitaj kaj ĉiuj jam forkuras.

Poste, la soldatoj embuske kuŝis tie preskaŭ duonhoron, antaŭ ol retiriĝi. Baldaŭ, revenis niaj aktivuloj.

— Fine, Ngan jam faras ĉiujn deklaraĵojn!

— Tute certe! Krom li, neniu povas veni ĝis ĉi tie.

— Vere tio estas nekomprenebla... Ni ĉiuj fidas al li. Kvankam informite pri lia aresto, ni tamen ne forlasas nian bazon... Kaj nun li perfidas nin?

La novaĵon pri la aresto de Ngan apenaŭ ricevis Kujen, kiam tuj sekvis ĝin alia, pli terura: Ngan jam faras ĉiujn deklaraĵojn! En unusola tago, ŝi ricevis du kruelajn novaĵojn. Komence, ŝi ne kredis tion, ŝi neniam kredis, ke Ngan povis perfidi la revolucion. La tuta familio, de ŝia patrino ĝis ŝia fratino Su, ĉiuj ankaŭ ne kredis, ke tio povis okazi. Sed, baldaŭ ĉie en Hon Dat, kuris la famo, ke Ngan estis tiu fidenuncisto, kiu jam montris nian sekretan bazon al la malamiko. Ĉiuj bonkoruloj rigardis la junan Kujen per kompatemaj okuloj. Siaflanke, Kujen vidis antaŭ si nur mallumon. Ŝi havis tian senton, kvazaŭ iu estus abrupte frapinta ŝin per bastono ĝuste meze de l' dorso. Ŝi ploris la tutan nokton kaj pensis, ke se vere Ngan tiel kondutus, inter li kaj ŝi nepre devus rompiĝi ĉiuj amligiloj! Iafoje, revokante en sian memoron la noblan karakteron de Ngan, ŝi subite volis krii: «Ne, ne tiel estas!» Ŝin teruris tiuj famdiroj kaj ŝi ne volis kredi al ili pro tio, ke ŝi estis pripensema kaj plene fidis al sia amanto. Ŝi iris serĉi kamaradon Hai Thep, — tiam sekretario de la partia ĉelo, — por peti informojn. «Kujen, — diris tiu lasta, — estu trankvila!

Pri tiu afero oni jam diskutas en la partia komitato. Pro tio, ke estas neniu konvinka pruvo, oni ankoraŭ ne povas tiri el ĝi konkludon». Kamarado Tam Ĉan ankaŭ diris en sia letero: «Ne tro frue eldiru vian juĝon pri tiu afero! Malprave estas haste konkludi el tiuj faktoj, ke nia kamarado nin perfidas. Memkompreneble, oni devas esti vigle singarda... Sed, nun la malamiko havas multajn fiintrigojn. Mi jam organizas la enketon kaj mi komunikos al vi ĝiajn rezultojn». Aŭdinte tiujn eldirojn de Hai Thep, Kujen iom ĝojis. Ŝi revenis hejmen, kun novaj ekbriloj de espero en la kapo.

— Oni estas ankoraŭ en dubo pri tiu afero. — Ŝi diris al sia fratino Su. — Ankaŭ en la Partio, la lasta vorto ankoraŭ ne estas parolita!

— Sed mi jam diras al vi, ke la membroj de l' Partio estas informitaj pri tio nur kun tiaj detaloj; oni rekomendas al ili nur singardecon. Kaj tamen, vi ĉiam ploris! Necese estas pacience konsideri la aferon... Vi estas jam plenkreska kaj ankoraŭ ne infana, ĉu ne?

— Do, mi aŭskultas la konsilojn de la Partio, mi aŭskultas la viajn. De nun, mi ne plu pensas pri tio.

— Jes, tiel faru!... Sed mi demandas vin...

Ĉe tiuj vortoj, Su hezitis iun momenton, antaŭ ol daŭrigi, fikse rigardante al Kujen en la okulojn:

— Sendube, ĉio glate iras, kiam Ngan restas ĉiam bonulo. Sed... kion vi farus, se la Partio sciigus al ni, ke Ngan vere estas fiulo?

Kujen restis longan momenton senvorte, antaŭ ol respondi kun sufokita voĉo:

— Kion mi farus?... Mi konsiderus lin neekzistanta, mi konsiderus lin mortinta! Se mi ankoraŭ renkontus lin, mi...

— Kion vi farus?

Sciiĝante, ke ŝia fratino volis ŝin inciteti, Kujen kolerete ekleviĝis:

— Vi scius tion, kiam okazus tiu renkontiĝo. Nun estas senbezone antaŭdiri tion al vi!

Feliĉe! La afero ne kondukis al tia stato, kian estis supozintaj ambaŭ fratinoj. Dek tagojn poste, reveninte de la distrikto, Tam Ĉan sendis por voki la junan Kujen al la arbara bazo. Liaj unuaj paroloj estis:

— Nu, Ut Kujen, regalu min per kokaĵo kaj mi rakontos al vi la historion...

Ĉielo! Aŭdante nur tion, Kujen tuj komprenis la intencon de kamarado Tam Ĉan. Ŝia koro brue batadis; ŝi sin ĵetis sur lin kaj forte premis lian manon. La viro ridetante rigardis ŝin per ĝojaj kaj komprenemaj okuloj. Li denove diris:

— Sed, ĉu vi konsentas buĉi kokon por min regali?

— Jes, jes...! — Urĝe respondis Kujen, kun ruĝiĝanta vizaĝo.

Tiam, Tam Ĉan leviĝis kaj kuntrenis per la mano la junulinon al iu domangulo.

— Jam de kelkaj tagoj, Ut Kujen tre malĝojis, ĉu ne?—Li basvoĉe diris—Tio sufiĉas, ne plu malĝoju! Ngan restas ĉiam brava, tre brava!

Li faris paŭzon, forĵetis teren la cindron de sia cigaredo, antaŭ ol daŭrigi:

— Freŝdate, ni ĵus arestis bandaĉon da spionoj. Dum pridemandado, ili deklaris plurajn aferojn, el

kiuj estis la lastmonate okazinta ĉirkaŭsiegо de nia bazo en la gangalo. La kaŭzo kuŝis en tio, ke la spionoj de la vilaĝeto Ĉua ĉiutage surgrimpis altajn arbojn por kaŝe observi, kio okazis en la tram-arbaro. Ili diris, ke iun vesperon, ili estis vidintaj fumon leviĝi meze de l' arbaro. Tuj la «commando»-oj de Xam estis avertitaj. Kaj tiel okazis la ĉirkaŭsiegо,..., nur kaŭze de tiu eta fumstrio...

Kujen faris longan elspiron kaj sentis sian koron tute malpezigita.

— Aliflanke,—daŭrigis Tam Ĉan,—niaj aktivuloj, agadantaj en malamikaj regionoj, ĵus sciigis al ni, ke de post sia aresto, Ngan restas ĉiam neŝancelebla, tre kuraĝa. Ĝis nun, la malamiko sukcesas eltiri neniun deklaraĵon el lia buŝo, kvankam li estas plurfoje sovaĝe torturita. La novaĵo pri la perfido de Ngan, komence, ne estis diskonigita de la malamikoj, sed baldaŭ profitante la famdirojn, ili lanĉis samokaze tiun mensogan sciigon !

Kujen ekstaris kun mieno konfuzita pro pento kaj ĝojo. Ŝi tute freneziĝis, kvazaŭ retrovinte ion pli altvaloran, ol sia perdita havaĵo. Ju pli ŝi estis kolerinta kaj malestiminta sian amanton, des pli ŝi amis kaj admiris lin. Ngan ne estis tia fihomo, kiel ŝi estis iam pensinta, sed vera bravulo, tre malofte renkontita en ŝia vivo. Ŝi ne perdis sian karulon Ngan ; male, ŝi reakiris novan Ngan, pli indan, ol la pasinta. En tiu emociiga momento, Kujen ĉiam sin alkroĉis al la brako de Tam Ĉan, ĝojplene, ĉar la ŝajne perdita feliĉo jam revenis al ŝi kaj la ŝajna malgloro jam foriĝis honoro.

Pli strange estis, ke kvin tagojn, post kiam Tam Ĉan donis informojn pri tiu afero, Ngan neatendite revenis la vilaĝon. Meze dum pluvega nokto. Kujen ekaŭdis frapojn ĉe la pordo kaj ies voĉon. Ŝi tuj saltleviĝis el la lito, kie ŝi dormis kun sia patrino. Vere Ngan vokis kaj tamen ŝi kredis sin sonĝanta. La voĉo de Ngan estis tute urĝa:

— Panjo, Panjo!... Kujen, Kujen!

Patrino Saŭ ekleviĝis. Sed Kujen levante sian brakon malhelpis ŝin. Kun vivege batanta koro, la junulino blindpalpe sin direktas al la pordo, meze de l'mallumo. Apenaŭ malfermiĝis la pordoklapoj, ŝi jam frapiĝis kontraŭ Ngan, kies vestoj estis tute malsekaj.

— Kujen, ĉu ne?—Flustre demandis la viro.

— Ĉielo! Ngan!

— Mi ĵus fuĝis... La kanajloj kondukis min al la rivero kaj intencis min ponardi. Sed mi piedbare faligis ilin, plonĝis en la akvon kaj fornaĝis ĝis ĉi tie.

— Ĉielo! — Denove kriis Kujen, sin ĵetante sur la kolon de Ngan. Tiu lasta delikate sin liberigis el ŝia ĉirkaŭpremo:

— Vi devas tuj konduki min al la arbara bazo. Ili certe provpenas nuntempe persekuti min... Mi timas, ke ili povos veni ĉi tien.

Post momenta pripenso, Kujen diris kun ordona tono:

— Vi restu ĉi tie!

Ngan estis tute surprizita:

— Ĉi tie?

— Jes, sub la domplanko! Restas ankoraŭ tiu malnova subteraĵo; vi povas sendanĝere loĝi tie. Nian novan bazon oni jam translokigas alikoken.

Poste Kujen tiris lin per la mano :

— Nu, eniru la domon, rapidu !

Ngan obeis al sia amatino. Li ne sciis, pro kio tiam li havis la impreson, kvazaŭ lia vivo estus pli sekura, se li restus apud Kujen. Tiun nokton, neniu malamika trupo venis por traserĉi ŝian logĝejon. Preskaŭ la tutan sekvantan tagon, Kujen restis kun Ngan en la subtera kaŝejo. Ŝi petis lin plendetale rakonti al ŝi, kiel li estis arestita kaj torturita. Ŝi ankoraŭ devigis lin demeti sian jakon, por ke ŝi masaĝu lian vunditan dorson per ia alkoholigita drogo, kiun estis alportinta al ŝi patrino Saŭ. Ŝi plorante faris la masaĝon. Dume, en la domo la maljunulino faris gardon kaj franjo Su preparis kokosupon por Ngan. En la subteraĵo, la juna viro rapide endormiĝis pro troa laceco. Kiam li vekiĝis, li petis informojn pri la situacio de la familio, de post kiam li estis arestita. Kujen ĉion rakontis al li. Ŝi iom hezitis, ne sciante, ĉu decis paroli pri la pasintaj famdiroj, koncerne lian areston. Fine, ŝi trovis necesa sciigi tion al Ngan. Ŝi sincere rakontis al li eĉ la tiaman staton de sia animo. Ngan iom ofendita ekleviĝis :

— Kion ? Ĉu ankoraŭ okazis tiu historio ?

Kujen tute maltrankviliĝis. Ŝi devis plendetale kaj pli klare prezenti al li la aferon. Nur tiam, li denove sterniĝis sur sia kuŝejo. Sed, li delikate forpuŝis la manon de sia karulino kaj kapbalancante murmuris :

— Tiel estis.. ! Nur nun mi komprenas... Jam de pli ol unu monato, mi nenion komprenis !

Subite, li ree ekleviĝis kaj fikse rigardis al Kujen en la okulojn :

— Kujen, vi ankaŭ malamegis min, ĉu ne?

Post tiu demando, Ngan denove kuŝiĝis. Li suprenlevis siajn okulojn al la ŝirmeja faŭko, kie troviĝis apogiloj el trunkoj de tram-arbo de li tre konataj. Kaj li kvazaŭ diris al iu alia kaj ne al Kujen :

— Se vere Ngan tiel kondutus, li meritus esti pune distrancita de vi, Kujen! Sed, li neniam pensis pri tio, li konis nur tiujn skurĝobatojn, kiuj pluvis sur lian korpon, li sciis nur kunpremi la dentojn por elteni ĉian suferon, kiel en la pasinteco aŭ li diris: «Mi scias nenion, kaj supoze, ke mi scius, mi farus nenian depozicion»! Ngan diris nur tion, Kujen mia!

Tiel parolis Ngan, kun milda samfoje riproĉa voĉo. Li ŝajne volis diri :«Mi ne miras, ke iu alia povus suspekti min. Sed Kujen, vi ankaŭ havis suspekton kontraŭ mi?» Kujen komprenis, kion volis diri ŝia amanto. Ŝi sidis senvorte, kun vere kompatinda mieno. Ja, ĝis tiam, ŝi neniam estis tiel ironie riproĉita de Ngan. Ŝi povis rebate diri nur post longa silento :

— Sed... sed Kujen ne tute kredis al tio!

Ngan abrupte interrompis:

— Ne tute!... Tio signifas, ke vi iagrade kredis..., ĉu ne?

Ĝuste tiam, super la ŝirmejo aŭdiĝis frapbruoj. Kujen puŝis supren la fermoplaton. Franjo Su alportis kokosupon al Ngan kaj ekvidis larmogutojn brili sur ambaŭ vangoj de sia juna fratino.

2

Subite, Tam Ĉan haltas dumvoje, rigardas antaŭen kaj ĝojkriante diras al Ngan:

— Ĉiufoje kiam mi revenas al Hon Dat, mi trovas ĝin iom ŝanĝita. Ĉi monate, Hon Dat aspektas tute freŝe verda. Ngan, rigardu tiujn «mang kaŭ»-arbojn, kun tiel velurece junmolaj folioj!

Ngan kaj Dat, — la korpogardisto de Tam Ĉan, — ankaŭ haltas. Starante apud tiu lasta, Ngan direktas siajn okulojn al Hon Dat. Li ankaŭ havas tre agrablan senton, tuj kiam li atingas la vojkurbiĝon kondukantan al ĝi.

Superstarante ambaŭ montetojn Hon Me kaj Hon Soc, Hon Dat etendiĝas ĝis la ekstremo de la vilaĝeto kaj aspektas tute freŝe verda, en tiu dekdua lunmonato, kiam la «Tet»*-vento jam per blovetoj traŝoviĝas tra la sunlumo. Plena de tiu vivosuko, la vegetaĵaro vigle kreskas, sur tiu monteto kaj en la najbaraj vilaĝetoj. Densaj kaj suke verdaj foliaroj plenkovras la tutan regionon kun ĉiuspecaj fruktarboj kaj meze de tiu verdaĵo kunpremiĝe staras domoj kun tegmentoj el palmoj aŭ ruĝaj tegoloj, — kio donas al la vilaĝeto aspekton de urbeto. La domoj estas ankoraŭ konstruitaj sur la malkruta montetodeklivo. De malproksime, oni prenas ilin por kolombejoj, el kiuj unuj havas murvandojn el lignotabuloj senkolorigitaj de pluvo kaj suno kaj la aliaj estas ankoraŭ tute novaj kun murvandoj el tabuloj de malhele ruĝa sao-ligno. Iom malproksime de Hon

---

* Tet aŭ Tetfesto: novjaro laŭ lunkalendaro.

Dat etendiĝas Bai Tre, — kie kreskas la «eburo»-bambuoj kun altaj kaj brile flavaj trunkoj. Jam de tre longe, tiuj bambuoj ciam kviete staras tie, spite tiom de vento kaj pluvo.

Malantaŭ tiu bambuaro, la maro, ankoraŭ pli maljuna, konstante rulas sajn lazure bluajn ondojn. Starante ĉi tie, kiam la ŝaŭmantaj marondoj karese frapiĝas kontraŭ la bordo, Ngan ŝajne vidas ĉe la piedo de Bai Tre unu frangon el punto, kiu de tempo al tempo flirtas en la aero.

Apogante sian manon sur la ŝultron de Ngan, Tam Ĉan etpaŝe antaŭeniras kaj diras :

— Vere bela pejzaĝo !... Apenaŭ finiĝas unu jaro, de post la «komuna popolleviĝo» kaj tiu pejzaĝo jam komplete ŝanĝiĝas. Dum tiu mezjara disraba operacio dank'al la energia lukto de la popolamasoj, la malamikoj kaŭzis al ni ne gravajn perdojn.

— Laŭonidire, ili disŝutis toksajn ĥemiaĵojn ie sur nian provincon, ĉu vere ?

— Jes, sed tio nur plirapidigas ilian pereon. Fakte estas, ke ricevinte de ni fortajn batojn, ili estas momente teruritaj. Nun ili jam rekonsciiĝas kaj komencas entrepreni severajn rabiradojn en certaj lokoj.

— Ĉi tie, ni jam spertas unu rabiradon...

— Ili faros ankoraŭ plurajn. Ili tute bone scias, ke nia bazloko troviĝas ĉi tie, ke ĉiuj manifestacioj kaj luktoj okazintaj en la urbo deiras de ĉi tie. Cetere, Hon Dat estas grava punkto, en zono, kie okazas militmanovroj de la agresbloko S.E.A.T.O. Niaflanke, ni ankaŭ ne volas, ke ili venu ĉi tien. Se ili starigas postenon, ni devas tuj elradiki ĝin...

Tam Ĉan faras paŭzon. Iun momenton poste, li daŭrigas kun maliceta rido :

— Por vi Hon Dat estas aparte pli grava. Tute egale, ĉu vi iras orienten aŭ okcidenten, viaj piedoj jam enradikiĝas en tiun teron...

Ngan ridetas.

— Kion ? — Demandas Tam Ĉan. — Ĉu estas planita la edziĝofesto por venonta jaro ? Nu, organizu ĝin tuj antaŭ tiu Tetfesto. Mi provpenos ludi la rolon de prezidanto en tiu edziĝa ceremonio. Post la Tetfesto, mi devos iri al politika kurso. Niaj prapatroj diris : « Kiam oni volas edziĝi, oni devas tuj organizi la edziĝofeston ! » Tiu dirajo estas dialektike prava. Fari la revolucion kaj edziĝi, ambaŭ aferoj prezentas, unuavide, kontraŭdirojn ; sed, en ia cirkonstanco, ili havas unuecon. Nature, en la vivo, estas viro, kiu maldiligentas post sia edziĝo, sed oni povas trovi novedzojn, kiuj fariĝas pli fervoraj en sia agado... Tio dependas do de « li » aŭ de « ŝi ». Pri vi, estas senbezone paroli kaj koncerne la junan Ut Kujen, mi povas diri, ke ŝi estas tre brava junulino : ŝi sin montras fervora kaj elturniĝema en siaj agadoj por la Junulara Organizaĵo kaj ŝi estas tute lerta en kamplaboro, kuirado kaj flikado. Koncerne sian belecon, ŝi superas ja multajn samvilaĝaninojn. Memkompreneble, tiu pasintjare okazinta miskompreno jam ĉagrenas vin ; sed vi devas trovi, post tiu bedaŭrinda afero, kia estas via amatino Ut Kujen. Mi opinias, ke vi devas ĝoji, ĉar ĉu vi povus aprobi ŝian konduton, se ricevinte tian sciigon pri vi, ŝi ne baraktis kaj sentis neniun suferon ? Kaj kiel sciite, tiam, ŝi estis kvazaŭ frenezulino !...

Aŭdante la parolojn de Tam Ĉan, Ngan nur ridetas. Li provpenas kaŝi sian kontentecon. Efektive, tiu afero komence tre ofendis lin. Sed, baldaŭ, ju pli li funde pripensis, des pli li sentis amon kaj fidon al Kujen. Li mem jam ĵuris al si : « Min dufoje arestis la malamiko kaj dufoje mi sukcesis fuĝi... Se triafoje min trafus ŝama malfeliĉo, mi devus resti ĉiam firma, kiel antaŭe ! »

Li ja bone komprenas, ĝis kia grado Kujen suferis, kiam ŝi ricevis tian informon.

Alveninte al la ekstremo de la vilaĝeto, Tam Ĉan demandas :

— Ngan, kie postenas la kamaradoj el via taĉmento ?

— Meze de la vilaĝeto. Ĉu vi haltos tie ?

— Jes... por vidi, ĉu Hai Thep estas tie.

Tam Ĉan sin turnas posten kaj, manbatante la ŝultron de sia korpogardisto, demandas :

— Ĉu vi volas reveni hejmen por libertempi, Dat ?

Dat ridetante kapjesas. Tam Ĉan daŭrigas :

— Mi volonte donas al vi forpermeson, por ke vi iru vizite al via familio en Linh Kujn. Vi revenas ĉi tien morgaŭ, ĉu ne ?

La juna korpogardisto, tute ĝoja, reĝustigas la rimenon de sia karabeno kaj diras : « Permesu, ke mi foriru ! », antaŭ ol grandpaŝe forlasi la lokon, kvazaŭ kurante.

De la vilaĝeto Hon Dat ĝis Linh Kujn, la vojo estas nur kvar kilometrojn longa.

La vilaĝeto Hon Dat troviĝas ĝuste ĉe la piedo de la monteto. Je centoj da metroj for de la maro etendiĝas la strando Bai Tre, kaj malantaŭ ĝi, estas ĝardeno kun foliplenaj arboj, poste la rivero Vam Rang.

Tiu rivero ne estas tre larĝa ; dufoje potage, ĝia akvaro leviĝas laŭ la mara alfluo kaj la kanto de la « bim bip »-birdo, simila al la urĝa voko de korno. En Hon Dat, la logdomoj kunpremiĝe viciĝas ambaŭflanke de la vojoj, meze de fruktĝardenoj, kie abundas jakvujoj kun malhele flavaj fruktoj, kokosujoj, arekarboj kaj aliaj fruktarboj, kiaj « mang kaŭ », « likima » kaj mangostanoj... Ĉi tie, la domoj estas konstruitaj aŭ samnivele kun la tero aŭ sur lignofostoj kun ŝtuparo. Tiu ŝtuparo troviĝas ĉe la dekstra aŭ maldekstra domflanko, laŭ la pozicio de la enirejo. La grandaj domoj kun tegolaj tegmentoj ordinare havas ŝtuparojn ĉe ambaŭ flankoj, kio faciligas la el- kaj eniron.

Oni diras, ke dum la rikoltsezono, rigardate de malproksime el Tri Ton, Ba Hon * aspektas kiel junulino, kiu ĵus vekiĝinte el profunda dormo sterniĝas per sia tuta longo sur orflava mato, kun kapo etendiĝanta al flirtanta verda silkrubando.

Tiu orflava mato estas la maturiĝanta rizkampo. Kaj tiu verda silkrubando ? Ĉu ĝi estas tiu rivero ?

Tam Ĉan kaj Ngan alvenas preskaŭ ĉe la mezo de la vilaĝeto, kiam aŭdiĝas antaŭ ili muziko kaj kanto. Baldaŭ leviĝas voĉo de sopranulino. Ngan subite ekkrias ;

— Jen nia kantistino Nam Njo komencas levi sian voĉon !

— Vere belas la vivo de viaj kamaradoj, kiuj kantonmentas ĉi tie ! — Nam Njo kantas, ĉu ne ?... Ŝi ja tre bone kantas. Krom sia melodia voĉo, ŝi posedas

---

* *Ba Hon* : « Tri montetoj » t.e. Hon Dat, Hon Me, Hon Soc.

la teknikon de l' kanto. Estas do tute nature, ke la soldatoj el la posteno pasiiĝas pri ŝia belsona kanto. Nu, oni rakontis, ke dum via atako kontraŭ la posteno Katung, la malamikaj soldatoj proponis pafhalton por povi aŭskulti ŝian kanton, ĉu vere?

Ngan kapjesas:

— Jes, tre amuza okazintaĵo! Iu soldato kriis: — Franjo Nam «tiom sopirata»* ankoraŭfoje kantu por ni sesversan strofon de «Vong Ko», ni ĉiuj, muzik-amantoj, neniam sencele pafas!

— Bone! Sufiĉas, ke ili ne sencele pafas. Sed, kia estas la enhavo de la kantaĵo? En tiu subtila afero, mi posedas nenian kompetentecon, sed mi opinias, ke la paroloj de la kantaĵo devas tuŝi rekte kaj la koron kaj la saĝon de la aŭskultantoj tiel, ke aŭskultinte la kanton, la soldatoj komplete tediĝas de sia soldata vivo, sopiras siajn edzinon kaj infanojn kaj volas dizerti. Oni ne devas uzi tiucele parolojn tro rigidajn kaj ankaŭ tro sentimentalajn... Ha, certe Nam Njo*-) ŝatas kanti tre sentimentalajn pecojn kaj kaŭze de tio la soldataraĉo jam nomas ŝin franjo Nam «tiom sopirata», ĉu ne?

— Ne tro sentimentalajn, kiel vi pensas... Ĉiu ajn soldataĉo ŝatas virinon... El dek tiuspecaj kanajloj naŭ estas dibočemaj. Nam Njo pli ol unufoje koleris kontraŭ ili. Ŝi iam diris: «Se mi ne pensas pri la revolucio, mi eble neniam kantas por tiu kanajlaro!»

— Kaj kio fariĝas al tiu noveveninta knabo Ziep, lernanto el Rach Gia?

---

*) * Njo = sopiri.

— Li estas ankaŭ bonkonduta, kaj ni ĉiuj amas lin. Sed, memkompreneble, li estas ankoraŭ sensperta en sia vivo.

— Ĉiu ajn noveveninta urbano estas sama. Provpenu helpi lin! Ni devas preni sur nin la respondecon zorgi pri la infanoj de niaj kamaradoj, kiuj jam oferis sian vivon por la Patrujo.

Pli kaj pli klare aŭdiĝas la muziko kaj la kanto. Tam Ĉan tuj rekonas la harmoniajn sonojn de la unukorda muzikilo de sinjoro Tu Deun kaj diras:

— De post kiam li estis blinda, la ludo de sinjoro Tu Deun iĝis vere pli emociiga.

Post unu vojiro, Tam Ĉan kaj Ngan jam vidas la grandan tamarindon kaj, apud tiu centjara arbego, la domon de sinjoro Tu Deun, kiu havas aspekton de restoracieto. Ambaŭ homoj apenaŭ eniras lian loĝejon, kiam unu granda flava hundo sin ĵetas sur ilin, aŭdigante obtuzajn kriojn, antaŭ ol leki Iliajn piedojn kaj ĝoje svingi sian voston. Ĝuste tiam, oni finludas la muzikaĵon «Leviĝu, kamaradoj!» laŭ la «Kim Tien»-ario. La kamaradoj el la Armita Propaganda Taĉmento sidas ĉirkaŭ franjo Nam Njo kaj sinjoro Tu Deun. Ekvidante ambaŭ homojn eniri, ili ekkrias:

— Jen alvenas kamaradoj Tam kaj Ngan!

Tam Ĉan premas al ĉiuj la manon. Li ĉirkaŭbrakas ĵun junulon, kiu mienas, kiel lernanto kaj ridante demandas:

— Ĉu oni gaje vivas ĉi tie, Ziep?

— Jes, tre gaje! — La juna Ziep respondas kaj honteme ridetas, kiel knabino.

Poste, Tam Ĉan iras manpremi franjon Nam Njo, forte skuante ŝian manon :

— Saluton, mia kantistino !

Kun ruĝiginta vizaĝo, la junulino ekkrias :

— Fraĉjo Tam !

Tam Ĉan sin turnas nun al sinjoro Tu Deun :

— Ĉu vi bonfartas, onĉjo Tu ?

— Tam Ĉan, ĉu ne ?

Post tiu abrupta demando, la maljuna blindulo etendas siajn tremetantajn manojn por palpi lian tutan korpon kaj senvorte premi lian manradikon. Nur post longa momento, li malrapide daŭrigas :

— Pro kio jam de longe vi ne revenis ? Aŭ vi revenis sed ne haltis ĉe mi ?

Tam Ĉan delikate metas siajn manojn sur ambaŭ maldikajn ŝultrojn de la maljunulo :

— Pro troa laboro, mi ne povis reveni, onĉjo ! Alie, nepre mi jam venis vizite al vi.

Poste, ĉirkaŭrigardante la lokon, li demandas :

— Kien iras la etulino Tim, onĉjo ?

— Ŝi kaptas fiŝetojn en la rivero...

Sinjoro Tu Deun diras neniun vorton plu kaj nur direktas ambaŭ siajn profundajn okulkavojn al Tam Ĉan, kvazaŭ volante lin rigardi. Sed tute vane ! Jam de naŭ jaroj, la maljunulo vidas nenion kaj neniun, inkluzive la naturon kaj la homon. Eĉ tiun tamarindon apud sia domo aŭ la supron de Hon Dat aŭ tiujn kulturejojn kaj precipe la homojn, kiujn li tiom amas, li ne povas vidi. Evidente estas, ke li jam vidis multajn aĵojn, kiam liaj okuloj estis ankoraŭ sanaj ; sed nuntempe,

tiuj aĵoj estas tute aliaj, ol ili estis. Ĝuste en tio kuŝas la kaŭzo de lia plej akra kaj konstanta animturmento. Li aŭdas nur la ŝanĝiĝojn de la lin ĉirkaŭanta naturo, sed ne povas vidi ilin; tial li devas kreskigi sian imagpovon por prove komprenigi al si tiujn ŝanĝiĝojn. Ĝuste pro tio, kiam li indignas pri io, lia indigno estas ĉiam pli forta kaj kiam li ĝojas, lia ĝojo estas ĉiam pli granda.

Ĝuste ĉe la piedo de tiu centjara tamarindo, antaŭ ne longe, la kruelegulo el la posteno Hon Dat jam streĉe katenis post ŝia dorso la brakojn de iu aktivulino al arbotrunko, antaŭ ol trabori per najloj ambaŭ ŝiajn manojn. La maljuna blindulo klare aŭdis la insultojn kaj kriojn de la virino kaj pafbruon. Fine, leviĝis kriegoj: «Geonkloj, venĝu min!», kiuj estingiĝis en la bruo de nova pafaro. Sinjoro Tu Deun palpe kuris el sia domo. La malamikoj puŝis lin retroen. Post ilia retiriĝo, li sin orientis rekte al la piedo de la tamarindo kaj rampis ĝis tiu loko. Sed la aktivulino ne estis plu tie. La kanajloj jam forportis ŝian kadavron. La maljunulo ĉirkaŭbrakis la arbopiedon kaj ploris. Larmoj plenigis liajn okulkavojn tiun nokton kaj la tutan sekvantan tagon. De tiam, ĉiunokte, li ŝajne revidis la aktivulinon, ŝajne reaŭdis ŝiajn kriojn kaj imagis al si la piedon de la tamarindo, kun pluraj profundaj postsignoj de kugloj kaj najloj. Tiel jam ŝanĝiĝis por li la piedo de tiu tamarindo! Dum lukto-tagoj, malgraŭ, ke la vojo estis glitiga kaj kotoplena pro la senĉesa aŭgusta pluvo, li ĉiam pacience atendis, tenante la manon de sia eta nepo, ke amase preterpasis la manifestaciantoj por akompani ilin al la posteno aŭ distrikto. Revenante de sia sukcesplena

lukto, li imagis al si, kiel la vojo, preterpasanta lian domon, estis plenkovrata per paŝosignoj. Li sentis sin pli feliĉa, ol aliuloj kaj tia estis lia feliĉo! Dum la «komuna popollevigo», li ĉeestis ĉiujn jugkunsidojn kontraŭ la kruelegulo j. La tagon, kiam oni jugis la grandbienulon Muu, — la plej famkonata maljuna kruelegulo de la regiono, — sinjoro Tu Deun trovigis ankaŭ ĉe la jugejo. Kiam en la nomo de la revolucia tribunalo, Hai Thep demandis la opinion de la ĉeestantaro pri la kondamno de tiu fiulo al morto, la maljuna blindulo tuj alte levis sian manon kaj kriegis: «Mortpunon! Mortpunon!» Ĉiuj havis tian senton, kvazaŭ li povus vidi. Tiun fojon li atendis, gis la maljuna kruelegulo Muu pagis sian sangŝuldon, antaŭ ol repreni sian bastonon por reveni hejmen.

La indigno, la kontenteco kaj la gojo de sinjoro Tu Deun gis nun restas senŝangaj. Nun, ili estas same profundaj, kiel ambaŭ liaj okulkavoj, per kiuj li prove vidas kamaradon Tam Ĉan.

— Sed, verdire, mi ne estas postulema. — Subite diras la maljunulo. — Venu vizite al mi, nur kiam vi havas libertempon. Mi bone scias, ke Tam Ĉan kaj liaj kamaradoj devas nun zorgi pri revoluciaj aferoj. Kaj tio tute gojigas min, kvazaŭ vi jam venas vizite al mi...

— Onĉjo Tu, — demandas Tam Ĉan, — ĉu nuntempe vi ankoraŭ multe trinkas alkoholaĵon?

La maljuna blindulo ne tuj respondas. Li restas iun momenton senvorte, poste diras:

— Mi ankoraŭ trinkas, sed ne multe...

— Tre bone, se vi malmulte trinkas, onĉjo Tu!

— Tam Ĉan, vi pravas, vi pravas... Sed, nuntempe, la situacio ne estas sama, kiel antaŭe. Nu, tiutempe, ĉu oni povis trankvile dormi, kiam ĉiunokte oni aŭdis la bruon de remilfostoj, per kiuj la malamiko frakasis la kapon al niaj kamaradoj? Kaj mi estis blinda. Kion mi povis fari, krom kolekti kaj ŝpari rizon kaj ĉiunokte strečante la orelojn, atendi niajn aktivulojn por pasigi al ili la korbon da rizo? Kaj kiam ili foriris kun la rizo, mi ne povis plu dormi kaj nur tiam mi trinkis...

Post momenta paŭzo, li daŭrigis:

— Sed de kiam okazis la «komuna popollevigo», mi ne plu multe trinkis!

Malrapide, Tam Ĉan forte premas la ostecan manon de la maljuna blindulo. Ankoraŭfoje al li ŝajnas, kvazaŭ io bolanta impete kaj urĝe levigus el lia koro.

3

Kujen portas ĉe la mano unu grandan «ĉem»-fiŝon tute freŝan, poste metas ĝin sur la kuirejan plankon. Ŝi urĝe kuspe faldas la manikojn ĝis siaj kubutoj, poste prenas el sub la planko unu tranĉilon kaj per ĝi fortranĉas la bambuligilon el la brankoj de la fiŝo. Ŝi komencas senskvamigi ĝin. Ŝia maldekstra mano jam komplete malfermiĝas kun kvin etenditaj fingroj, tamen ŝi ne povas preni en ĝi la tutan fiŝkorpon. La

« ĉem »-fiŝo estas vere granda. Patrino Saŭ diras, ke ĝi pezas proksimume kvar kilogramojn. Ŝi ja devis ofte ŝanĝi la manojn, transportante ĝin de Bai Tre ĝis ĉi tie.

Per la klingo de sia tranĉilo, Kujen brue tranĉfrapas la fiŝkorpon, tute malsekan kun violkoloraj rebriloj. Ĉe ĉiu tranĉilbato, disĵetiĝas skvamoj, preskaŭ grandaj kiel moneroj de unu cendo. Tute kontenta, ŝi ordometas ilin unu sur alian kaj ridetante rigardas la kolonon da skvamoj, antaŭ ol denove senskvamigi la fiŝon. Kvankam ĝi estas tiel granda, Kujen tamen facilmove buĉas ĝin, kvazaŭ per turno de l' mano. Per la unua tranĉfrapo, ĝi estas senkapigita kaj per la dua, ĝia vosto estas apartigita de la korpo. Tiel, post kelkaj minutoj, la fiŝo estas preskaŭ finpreparita kaj restas nur tratranĉi ĝian ventron por forigi la internaĵojn. Kujen prenas tiam la ĉerpilon kun longa tenilo el sur granda akvujo kaj ĉerpas akvon, kiun ŝi verŝas en apudan vazon el bruna argilo, antaŭ ol meti en ĝin la buĉitan fiŝon. Poste, per kelkaj ĉerpiloj da akvo, ŝi zorge tralavas la kuirejan plankon, ĝis malaperas ĉiuj malpuraĵoj.

Kiam ŝi sin pretigas por tratranĉi la ventron al la fiŝo, ŝi subite aŭdas gaje sonorajn vokojn ĉe la ŝtuparo :

— Panjo mia !

Ĝuste estas la voĉo de Tam Ĉan. Poste leviĝas nova voĉo : « Panjo » !, ĝoja kaj amoplena. Kujen tuj rekonas, ke ĝi estas la voĉo de Ngan. Senprokraste, ŝi formetas la fiŝon, lavas al si la manojn kaj per siaj fingroj karese aranĝas kelkajn distaŭzitajn harojn, kiuj falas sur ŝiajn tempiojn. Poste, ŝi viglamove

kuras eksteren, kun konfuzaj krioj :

— Ha, fraĉjo Tam... !

Ŝi tute fervoras antaŭ Tam Ĉan kaj samfoje ĵetas preterflugantan rigardon sur Ngan. Ekvidante tiun lastan vestita per ies nigra kaj tro larĝa ĉemizo, ŝi ne povas sin deteni de ridoj. Ngan ankaŭ starigas al ŝi neniun demandon. Li sidas meze de la ĉambro, larĝe etendante siajn brakojn, por atendi la etulinon Thuji, kiu kure sin ĵetas sur lian bruston. Li ŝmacas ŝin kaj post ĉiu kiso, aŭdiĝas obtuza bruo « um ! », kiu ŝajne tute plaĉas al li. Kompense, Thuji ankaŭ kisas lin. Sed li rifuzas la kison, se ĝi ne estas brua. Ngan baldaŭ liberigas la etulinon el sia ĉirkaŭpremo kaj fingremontras al ŝi kamaradon Tam Ĉan. Ŝi tuj kuras al li. Je unu paŝo antaŭ li, ŝi haltas, mallevas ambaŭ siajn manojn, antaŭ ol sin ĵeti sur lian kolon kaj kovri lin per kisoj.

Kun ĝojaj kaj amoplenaj okuloj, la tuta familio rigardas tiun spektaklon. Patrino Saŭ maĉante sian betlon grimace ridas. Starante malantaŭ ŝi, Kujen delikate puŝas per sia montrofingro la histrikan pinglon en ŝian hartuberon kaj ĝojridas, ĝis kavetiĝas ambaŭ ŝiaj vangoj. La rideto de franjo Su estas tute diskreta. Sed sur ŝia vizaĝo, vidiĝas konsterniĝo. Atente observante ĉiun geston de sia infano, ŝi ne povas kaŝi sian feliĉon miksitan kun iom da fiereco. Ŝi trovas en Thuji neelĉerpeblan fonton de konsoloj. Ja, la filineto estas samfoje la rezulto de geedza amo kaj tiu, kiu reprezentas kaj ŝin kaj « lin ». La etulino, intime ligita kun ĉiuj homoj, estas ankaŭ tre aminda kaj spirite pura.

— Thuji, ĉu vi jam iras lernejon ? — Demandas Tam Ĉan.

— Jes, mi jam iras lernejon. -- Mildvoĉe ŝi respondas.

— Vi iras sole, ĉu ne ?

— Avnjo min akompanas. — Ĉe tiuj vortoj, ŝi rigardas al sia patrinflanka avino. — Avnjo min akompanas ĉiutage ĝis mia klaso.

Sidante sur lignolito, patrino Saŭ viŝas per la fingroj siajn buŝangulojn ruĝe makulitajn de betlomaĉaĵo, poste diras :

— Ĉiutage mi kondukas ŝin al la lernejo kaj revenigas ŝin hejmen. Sed, ŝi ma!volonte obeas min. Ŝi diras : « Avnjo, lasu min iri sole, mi estas tute kapabla ... ! » Ĉu oni povas lasi ŝin iri sole ? Vidu, Tam ! La aviadiloj ĉiutage zumas super niaj kapoj kaj la marŝipoj ofte proksimiĝas al la bordo por kanonpafi. Kvankam mi akompanas ŝin ire kaj revene, tamen mi estas ĉiam maltrankvila ; ĉiufoje kiam alvenas aviadiloj, mia koro vivege batadas. Kaj nun, se ŝi iras sole kaj neatendite alvenas aviadiloj, ĉu ŝi konas ŝirmejon por sin kaŝi ?

— Niaj onkloj jam fosas tranĉeojn laŭlonge de la vojo. — Diras la etulino.

— Tam, aŭskultu, kion ŝi diras ! ... Jam fosas tranĉeojn ? Kompreneble, estas tranĉeoj. Sed, kion oni farus, se en la tranĉeo, oni renkontus serpenton ?

Patrino Saŭ metas en sian buŝon nove preparitan betlomaĉaĵon kaj, brue maĉante ĝin, daŭrigas :

— En sia paniko, la infano scias nur salti en iun ajn tranĉeon kaj tute ne atentas pri serpento. Eĉ la grandaĝulo same agas...

Tam Ĉan suprenlevas sian jakon por demeti la pistolrimenon. Li ekridas aŭdante la parolojn de patrino Saŭ. Ĉiuj ankaŭ eksplodas per ridoj. Kujen sola pli longe ridas. Apogante sian mentonon sur la ŝultron de sia patrino, ŝi diras:

— Mia panjo estas tre timema, fraĉjo Tam!

La maljunulino tuj rigardas sian filinon tra la brovoj:

— Jes, mi estas timema!...

Tam Ĉan diras al si en la pensoj: «Ne! Patrino Saŭ ne estas timema!» Ĉar en 1958, li propraokule vidis tiun maljunulinon elteni plej teruran elprovon.

Tiam, en la posteno Hon Dat, starante sur sia gardoturo, du soldatoj ekvidis, ĉeflanke de la vilaĝeto, unu knabeton rajdantan sur sia bubalo: unu el la kanajloj vete promesis al la alia unu virginian cigaredon, se tiu lasta sukcesis paffaligi tiun etan bubalgardiston. La soldato celdirektis sian pafilon. Aŭdiĝis pafo kaj la etulo renversfalis el la dorso de la bubalo. Informite pri tio, la loĝantaro de Hon Dat forte ekindignis kontraŭ la kruelegulo j. Oni amase iris al la posteno kun la kadavro de la knabeto. Hai Thep devis sendi sian edzinon kaj fratinon Su por akompani la manifestaciantaron. Li donis jenajn rekomendojn: «Ni devigas la malamikon severege puni la soldaton, kiu pafmortigis la etulon; ni ĉiapreze luktu ĝis la malamiko kontentigos ĉiujn niajn postulojn». Tam Ĉan kaj Hai Thep restis en iu domo ĉe la transa riverbordo por preme sekvi la lukton. La malamikaj soldatoj malhelpis la vilaĝanojn veni al la posteno. Kiam ni postulis punon al la murdisto, ili diris, ke la eta bubalgardisto estis bedaŭrinde trafita

de mispafita kuglo. Niaj vilaĝanoj impetis kontraŭ ili. La kanajlo Xam, — tiama postenestro,—alkuris kun sia karabeno. Li celdirektis ĝin al la brusto de patrino Saŭ, ĉar tiu lasta estis la unua en la vico de la manifestaciantoj.

— Revenu hejmen, — krias Xam, mi tuj pafos, se vi faras unu paŝon plu!

La situacio fariĝis tre kriza. En iu ajn lukto, oni venkas aŭ malvenkas ĝuste en tiu decidiga minuto. Xam estis tre kruela, li aŭdacis pafmortigi la patrinon, kvazaŭ ludante. Se tiam patrino Saŭ retropaŝis, la lukto povis esti konsiderita, kiel malsukcesinta. Sed, ŝi ne ŝanceliĝis. Ŝi diris al la postenestro ion, kion de malproksime Tam Ĉan ne povis aŭdi, sed li jam vidis la kanontubon de la karabeno de Xam ĉiam tremeti. Ĝuste en tiu momento, iu virino el malantaŭa vico traŝoviĝis tra la homamaso kaj venis stari meze inter la pafilfaŭko de Xam kaj patrino Saŭ. Tiu virino estas onklino Ka Soi, patrino de Xam. Ŝi diris al li kelkajn vortojn, poste abrupte antaŭenpaŝis kaj ekkaptis la kanontubon de lia karabeno. Profitante tiun okazon, patrino Saŭ kaj la homamaso impete kuris en la postenon.

Fine, la malamiko devis katenigi la hommortiginton kaj Xam promesis ĵeti lin en malliberejon. Post tiu komuna lukto, reveninte hejmen, Tam Ĉan demandis patrinon Saŭ pri tio, kion ŝi estis dirinta al Xam.

— Mi ja diris : « Xam, vi pafas min, kiel sinjorinon Ka Soi », kaj la paroloj de sinjorino Ka Soi tiam estis jene : « Ne pafu sinjorinon Saŭ, sed pafu min ! Jen mia brusto, pafu, Xam ! »

Xam ne aŭdacis pafi. Li estas famkonata kruelegulo, sed li ankoraŭ ne povas pafi sian patrinon.

Nun, rigardante al patrino Saŭ, Tam Ĉan ankoraŭ bone memoras tiun tagon, kiam Xam celdirektis sian pafiloṇ al la brusto de sia patrino. Li demandas ŝin:

— Vi timas la aviadilojn, panjo, sed antaŭe, kiam vi staris antaŭ la pafilfaŭko de Xam, pro kio vi ne timis?

La maljunulino restas iun momenton senvorte, antaŭ ol malrapide respondi:

— La aviadilojn mi ankaŭ ne timas. Mi timas nur por mia nepino. Mi estas jam maljuna kaj tuj ironta al mia lasta ripozejo; do, estas nenia motivo por timi, Tam.

Poste, ŝi daŭrigas:

— Malgraŭ ĉio, mi ankoraŭ ne mortas. Mi devas ankoraŭ vivi por vidi la hejmlandon reunuiĝi, por vidi Onklon Ho. Mi trankvile fermos la okulojn, nur post kiam efektiviĝos tiuj du punktoj de mia revo.

— Panjo mia, diras Tam Ĉan, frue malfrue vi vidos efektiviĝi ambaŭ punktojn de via revo.

— Ĉu certe, Tam? Ĉu vere, Tam?

Patrino Saŭ direktas sian esploreman rigardon al Tam Ĉan, kvazaŭ sekrete starigante al li plian demandon: «Kion? Ĉu okazis io nova? Kion diris la Partio? Sciigu tion al mi, por ke mi dividu kun vi la ĝojon».

Patrino Saŭ opinias, ke Tam Ĉan scias ĉion, ke li la unua komprenas la situacion... Ŝi fidas al liaj paroloj, ĉar ŝi estas konvinkita, ke ili estas pravaj, ĝustaj... Ŝi fidas al Tam Ĉan, ĉar ŝi fidas al la Partio. Ŝi firme

kredas, ke estante membro de la Partio, li gvidas kaj protektas ŝin, ŝiajn infanojn kaj la tutan vilaĝanaron, por ke ĉiuj povu vivi en paco, gajeco kaj konkordo.

— Tute certe! — Tam Ĉan diras al patrino Saŭ.— Panjo, jam ŝanĝiĝas la situacio. Antaŭe, ni volis vivi en paco, en lando reunuigita, sed Usono kaj Dziem ne permesis al ni tiel vivi. Al tiuj, kiuj postulis la patrujan reunuiĝon ili respondis per senkapigo aŭ tratranĉo de l'ventro. Ne povante plu elteni tiun sovaĝan subpremon, niaj sampatrujanoj jam organizis la «komunan popolleviĝon». Kaj post la «komuna popolleviĝo», ni maltenos niajn armilojn, nur kiam ni povos vivi indan kaj komfortan vivon.

— Do, ni seninterrompe batalas ĉu ne? — Demandas la maljuna patrino.

— Se ili ankoraŭ subpremas nin, — respondas Tam Ĉan, — ni ankoraŭ batalas kontraŭ ili; se unu el ni falas, alia tuj leviĝas por daŭrigi la batalon..., ĝis la Usonanoj komplete retiriĝos el nia lando.

— Mi trovas la Usonanojn tre obstinemaj. Do, kiam ili konsentos komplete retiriĝi?

— Ili retiriĝos, nur kiam ni batalas kontraŭ ili. Antaŭe, la Francoj estis tiaj samaj, kiel ili.

Patrino Saŭ metas ambaŭ manojn sur la ventron kaj mallaŭtigas sian voĉon:

— Tion mi jam scias...

Poste, ŝi klakas per la *l*ango:

— Mi zorgas nur pri vi, edzo kaj edzino, kiuj devas vivi unu malproksime de alia. Kaj ne pri mi, jam maljuna... Sed al vi, Tam, mi diras tiun veron: kvąnkam

mi estas maljuna, mi tamen sekvas vin ĉie, kien vi iras. Mi povas senlace partopreni ĉiujn politikajn luktojn aŭ prepari manĝaĵojn por provizumi la batalantojn...

La maljunulino subite sin turnas posten kaj ekrimarkante, ke Kujen ankoraŭ staras ĉe sia flanko, ŝi delikate puŝas sian filinon per la mano:

— Pro kio vi restas ankoraŭ ĉi tie?

Poste, ŝia voĉo fariĝas tute milda:

— Iru prepari fiŝon. Jam vesperiĝas. Preparu la manĝon por viaj «fratoj».

Kujen malrapide levas sian mentonon de sur la ŝultro de sia patrino kaj iras al la kuirejo. Ngan postsekvas ŝin, kondukante la etulinon Thuji per la mano.

... Kujen turnas supren la ventron de la fiŝo kaj metas la klingon de la tranĉilo sur ĝin. Tiam, starante malantaŭ ŝi, Ngan demetas sian pistolon kaj pendigas ĝin ĉe la murvando.

— Kies jakon vi surmetas, Ngan? — Ŝi mallaŭte demandas.

— Jakon de kamarado Tham.

— Kie estas la kostumo, kiun mi sendis al vi?

— Mi jam donacas ĝin al iu kamarado.

— Vi ankoraŭ donacas...

Kujen tratranĉas la ventron de la fiŝo kaj, tralavante ĝin, ŝi diras:

— Franjo Ba ĵus ricevis leteron de sia edzo, ĉu vi scias tion?

— Mi jam scias. Ĉu li ĉiam komforte vivas?

Kujen iom pintigas sian buŝon:

— Ĉu tie oni ne komforte vivas? Ĉiuj povas lerni, ricevi bonan edukon. Fraĉjo Ba estas tre bona homo. Legante lian leteron, mi tre kompatas lin. Li ja donas al franjo Ba multajn rekomendojn..., ke ŝi estu trankvila..., ke ŝi sendu la etulinon Thuji al lernejo...

Ĉe tiuj vortoj, Kujen faras momentan paŭzon, antaŭ ol daŭrigi kun pli mallaŭta voĉo:

— Li ankaŭ petis informojn pri nia afero...

— Pro kio li sciis tiun aferon?

— Franjo Ba parolis pri tio en siaj leteroj... He, fraĉjo Ba jam skribis al ŝi entute dek-ok leterojn..., ne kiel vi, kiu restis ĉiam sen novaĵo, ĉiufoje kiam vi foriris.

Ekaŭdante tiujn karesmildajn riproĉojn de Kujen, Ngan tuj ekkaptas la baskon de ŝia trunkvesto kaj skuetas ĝin:

— Ĉu vere, ke mi sendis neniun leteron al vi?

La junulino ridetas kaj restas ĉiam senvorte. Ŝajnigante koleron, Ngan pli forte skuas la baskon de ŝia trunkvesto. Poste, li delikate ekpikas ŝian brustoflankon per sia montrofingro, kio kaŭzas al ŝi konvulsian ektremon.

— Ngan, vi malhelpas min prepari fiŝon, ĉu ne? Fakte, vi jam sendas al mi... nur unu leteron aŭ kiom?

— Kiom? Kiom? — ripetante la demandon, Ngan plue donas al ŝi fingropikojn.

— Du, du...

La etulino Thuji ĝoje aplaŭdas por subteni sian onklon:

— Donu ankoraŭ al ŝi tiklojn, onĉjo!

Kujen sin turnas posten kaj rondigante siajn okulojn rigardas al sia nevino:

— Vi ankaŭ defendas vian onĉjon, ĉu ne? — Ŝi diras kunpremante la lipojn. — Bone, mi ne plu ludos kun vi.

La etulino sin kroĉas al la mano de Ngan, rigardante al Kujen:

— Se onnjo ne ludas kun mi, mi ludas kun onĉjo.

— Bone, vi ambaŭ, onklo kaj nevino, kune ludu! Morgaŭ, kiam via onĉjo estos foririnta, mi ne scias, kun kiu vi ludos?

Algluiĝante al la korpo de Ngan, Thuji eklevaŝ siajn okulojn:

— Onĉjo ankoraŭ ne foriras, ĉu ne? Restu ĉi tie kun mi ĝis postmorgaŭ! Ĝis postmorgaŭ, ĉu ne?

Ĝuste tiam, aŭdiĝas paŝbruoj de patrino Saŭ eniranta la kuirejon. Ngan sin metas flanken por enlasi la maljunulinon.

— Kiam finiĝos via forpermeso, Ngan?

— Eble, mi foriros postmorgaŭ, panjo.

Ngan mildvoĉe respondas al patrino Saŭ. Liaj gestoj estas nun tre seriozaj. Li eklevas sian manon por karesi siajn kapharojn, antaŭ ol delikate meti ĝin sur sian nukon. Ekvidante tion, Kujen provpenas sin deteni de rido. Ŝi ankaŭ ŝajnigas, kvazaŭ ŝi diligente laboras kaj brue trančas la fiŝon.

— Kian manĝaĵon vi volas prepari, Kujen? — demandas patrino Saŭ.

— Mi havas la intencon stufi la fiŝon en sojosaŭco.

— Jes, tiu «ĉem»-fiŝo stufita en sojosaŭco estas tre bongusta. Kaj kion vi faros kun tiuj kankroj kaj kraboj?

— Mi volas rosti kankrojn kaj friti krabojn kun vinagro. Ĉu tio konvenas, panjo?

— Faru tiel, ke viaj «fratoj» ne mallaŭdos vin, prenante la de vi preparitajn manĝaĵojn.

Poste, ridante la maljunulino eliras. Verdire, patrino Saŭ tre fidas al sia filino. Ambaŭ fratinoj Su kaj Kujen estas tre kompetentaj en sia kulinara arto. Dum siaj infanjaroj, ili jam ricevis de sia panjo kun precizaj detaloj multajn konojn rilate la preparadon de manĝaĵoj. Patrino Saŭ ofte diris: «Vere, ni estas malriĉaj, eĉ se ni havas nur sale stufitan fiŝon, kiel manĝaĵon, ni devas zorge prepari ĝin, por ke ĝi estu bongusta».

Verdire, la familio de patrino Saŭ estis malriĉa, nur en la pasinteco. Sed, post la revolucio, la registaro jam distribuis al ĝi teron tre fekundan kun ĝardeno, kiel oferdonon aparte dediĉitan al la familio de martiroj de la revolucio. Sinjoro Saŭ estis mortigita en 1940, pro tio, ke li agadis por la «komunismo kaj estis arestita kun hommortigaj armiloj». Li estis mortpafita kun kvin aliaj homoj en Hon Dat. Li mem fabrikis fusilojn kaj grenadojn en la pagodo Ong Dong aŭ Long Son Tu, kiu ankoraŭ ekzistas. La plejaĝa filo de patrino Saŭ, t. e. Hai, la frato de Kujen, oferis sian vivon en la batalo apud la irigacia kanalo de Mop Van, dum la unua rezistado. Ŝia unua bofilo, kiu estis grupiĝinta en Nordo kaj ĵus sendinta tiun leteron, estis iam batalamiko de Hai. La familio de patrino Saŭ vere

estas revolucia familio: de ŝia edzo ĝis ŝia filo, ŝia bofilo kaj ŝi mem, ĉiuj faris la revolucion. Sesdekdujara, ŝi ja spertis tiom da mizero kaj ĝojo de l' vivo. Nun, ŝiaj kapharoj estas tute blankaj. Sed, ŝi ankoraŭ ofte diras: «Dank' al Ĉielo kaj Buddo, mi havas ankoraŭ la forton por replanti la rizplantidojn kaj senherbigi la ĝardenojn. Do, certe, mi povos ĝisvivi la patrujan reunuiĝon.

Vere, la vivo de patrino Saŭ havas multajn ligilojn kun la revolucio: edzo kaj infanoj, tero kaj hejmo, sango kaj karno. Ĉiuj ŝiaj esperoj direktiĝas al la revolucio. Kaj ankaŭ el ĝi fontas ŝia ĝojo, kiu foje kvietiĝas, foje bolas en ŝia koro, simpla kaj senmezure vasta. Ne estas malfacile vidi tiun ĝojon. Ja, en tiu ĉi momento, ekzemple, kiam hejmen revenas ŝiaj karuloj, ŝia faltoplena vizaĝo denove radias pro ĝojo.

Patrino Saŭ sin direktas al la fronto de la domo kaj renkontas tie franjon Su, kiu estas ĝoje montranta la leteron al Tam Ĉan.

— Mi ankoraŭ ne atente aŭskultis,—diras la maljunulino al tiu lasta. — Vi legu, Tam, kaj ĉi vespere, Kujen pli klare voĉlegos por mi la leteron. Ba estas homo profunde pripensema, necese estas koncentriĝi sian atenton dum la legado, por povi kompreni la tutan sencon de ĉiu esprimo.

Tam Ĉan tralegas la leteron, ridetante de tempo al tempo. Franjo Su pasigas al li la foton. La viro atente rigardas ĝin, larĝe malfermante la okulojn kaj konstante turnante ĝin en siaj manoj:

— Vere pli fortika kaj pli belaspekta, ol antaŭe.

Poste, redonante la foton al Su, li daŭrigas kun rideto::

— Ne mirinde! Li ja vivas en socialisma lando!

Aŭdante tiujn vortojn, patrino Saŭ mienas pli gaje; sed Su iom maltrankviliĝas:

— Mi ankaŭ sendis al li unu foton, prenitan tuj post kiam mi revenis de la malliberejo: tute malgrasa mi aspektis tiam.

La maljuna Saŭ klakas per la lango:

— Ĉu oni povas esti grasdika, kiam oni estas enfermita en tigrokaĝo kaj krokodilokaĝo.

Tam Ĉan denove ridetas. Sed tiu rideto tuj estingiĝas sur liaj lipoj kaj li sin turnas al Su:

— La foto, pri kiu vi ĵus parolis estas tre valora... Ne ĉiuj havas tian foton. Mi estas certa, ke onklo Ba alte taksas ĝin, prefere ol ĉiuj aliaj, kiujn vi jam sendis al li.

Poste li demandas ŝin:

— Ĉu vi sciigis al Ba, ke tiu foto estis prenita post via malliberiĝo?

— Jes..., sed mi diris alie. Mi ĵdiris: «Tiun foton mi prenis post la tago, kiam mi estis spertinta gravan akcidenton...»

— Li komprenis do tiun aludon!

— Certe!...

4

Patrino Saŭ etendas sur la lignoliton unu flordesegnan maton. Ĝi estas unu el tiu paro da matoj, kiujn ŝi uzas, nur kiam okazas ritaj ceremonioj aŭ festenoj.

Ngan estas trinkadanta teon kun Tam Ĉan sur tiu lignolito, kiam aŭdiĝas sur la vojo familiara voĉo, kiu ŝajne estas tiu de Hai Thep. Ngan tuj kure eliras el la domo. Ĝuste tiam, Hai Thep jam penetras en la korton. Tiu sekretario de la partia ĉelo estas iom maldika sed fortika. Li portas ĉe la kapo turbanon el striita tolo kaj sub la akselo unu ledsimilan paperujon, ordinare uzitan de eta lernanto kaj unu transistoron de japana fabrikmarko. Li levas sian manon por soldate saluti la junan Ngan kaj kvazaŭ saltante superengrimpas la ŝtuparon. Lia maldekstra piedo kun du detranĉitaj fingroj ĉiam oblikve agitiĝas sur la lignaj ŝtupoj.

— Vi ĵus revenis, ĉu ne? Kie estas sinjoro Tam Ĉan?

— En la domo.

Enirinte en la ĉambron, Hai Thep ĵetas sian ledsimilan paperujon en iun angulon de la lignolito, poste palpebrumante rigardas al Tam Ĉan:

— Vi ĵus alvenis, ĉu ne, sinjoro?

Ĉe tiuj vortoj, li haste malbutonumas sian jakon kaj demetas sian kaptukon por forviŝi la ŝviton, kiu perlas sur lia brusto. Tam Ĉan verŝas teon en unu tason, kiun li metas antaŭ Hai Thep. Tiu lasta ridetante ekprenas ĝin:

— Ni senpacience atendis vin. Tiu afero pri rizkampo, kiun uzurpis la grandbienulo Muu kaj lia filo prezentas nun multajn komplikaĵojn. Solvi ĝin ne estas facile, sinjoro!

— Tam Ĉan ankaŭ ridetas:

— Mi ankaŭ neniam diris, ke tiu afero estas facile solvebla. — Ĝoje diras Tam Ĉan.

Hai Thep levas la tetason al siaj lipoj kaj brue prenas unu gluton da teo.

— Mi atendas vin por demandi vian opinion pri kelkaj punktoj, ekzemple pri...

Tam Ĉan tuj malaprobe skuas sian manon:

— Sufiĉe, trinku, poste restu ĉi tie por preni la manĝon kun ni. Morgaŭ, oni pridiskutos la aferon. Hodiaŭ, vi iom ripozu por repreni viajn fortojn.

Hai Thep eksidas sur la lignoliton, verŝas teon kaj trinkas sinsekve du, tri tasojn. Elirinte el la kuirejo, patrino Saŭ ekvidas lin kaj tuj demandas:

— Hai Thep, ĉu ne? Kaj kie estas nun Ba Ren kaj Nam Tan?

— Mi ne renkontis ilin, panjo. Mi venas rekte de mia domo.

— Mi jam sendis por inviti ilin al vespermanĝo, pro kio ili ankoraŭ ne alvenas?

— Ne penvaloras zorgi pri tiuj knabegoj, panjo!

Kujen jam alportas la manĝaĵojn. Ĉiuj interrompas siajn interparoladojn kaj sin metas flanken por cedi la lokon al ŝi. La junulino ordometas ĉe la mezo unu pladon da vinagre rostitaj kraboj kaj unu pladon da frititaj kankroj. Kiel apetitveka estas la odoro de fritaĵo kaj rostaĵo. Aparte agrabla por la okuloj estas la plado da frititaj kankroj: grandaj kiel piedaj dikfingroj, la senŝeligitaj rozkoloraj kankroj kuntiriĝe kuŝas sub tavolo da hele ruĝa tomatsaŭco. Poste,

franjo Su alportas ankoraŭ unu aluminian pelvon, plenan je papajotrancâjoj miksitaj kun sekaj «boi»-fiŝoj. Hai Thep klinas sian kapon por rigardi la pelvon kaj, frotante ambaŭ manojn unu sur alia, incitetas franjon Su :

— Tiuj mangâjoj aperas antaŭ miaj okuloj, kiel sufiĉe bone preparitaj. Mi baldaŭ venigos mian edzinon por lerni vian kuirarton. Sed, se vi regalus nin nur per tiuj mangâjoj, ni certe ankoraŭ ne mangus.

Kujen havas viglan langon :

— Ni mangigos al vi ankoraŭ frititan «ĉem»-fiŝon, fraĉjo Hai.

Hai Thep ĝoje donas unu klakfrapon per la manoj :

— Ankoraŭ frititan «ĉem»-fiŝon !—Sed, li tuj skuetas ilin—Ne, eĉ kun tiu fiŝajo, ni ankoraŭ ne mangus :

Kujen tute miras, largê malfermante siajn okulojn.

— Vi estas tute naiva, Kujen ! — Diras Su. — Vi ne konas do vian fraton Hai ? Li ŝatas paroli per kovritaj vortoj !

Hai Thep ridas, tre kontente :

— Vere inteligenta vi estas, Su ! Do, ĉu vi havas tion, pri kio mi volas paroli per kovritaj vortoj ? Se jes, tuj alportu tion al mi, rapidu !

Su rigardas al sia patrino kaj ridas. Tiu lasta fine ordonas :

— Vi eniru en la ĉambron... kaj prenu tion, nur unu botelon ! Alie, Hai Thep certe ne mangos !

La virino eniras en la ĉambron kaj, post momento, eliras kun unu botelo da tre klara brando en la mano.

Hai Thep tuj etendas siajn manojn por preni kaj brakumi ĝin sur la brusto, kvazaŭ timante, ke ĝi povus esti reprenita. Vibrigante siajn krurojn, li per mansigno invitas ambaŭ kamaradojn Tam Ĉan kaj Ngan al mangoposte, fikse rigardante al tiu lasta en la okulojn, li mildvoĉe diras:

— Jen vi estas reveninta! Trovante vin tiel malmultvorta kaj tiel modera, mi tre kompatos vin, Ngan!

Poste, li sin turnas al patrino Saŭ:

— Panjo, ĉi tie, en nia hejmo, li estas tiel malparolema, sed aliloke, oni estus terure teditaj de lia babilemo.

Patrino Saŭ ridetante skuas la kapon, dum Hai Thep, tute kontenta, rigardas al Ngan, suprengrimpanta la lignoliton kun ĝeneca mieno.

Hai Thep versas brandon en la glasojn. Li insiste invitas la maljunan patrinon trinki iomete, sed ŝi rifuzas. Li sin turnas al Kujen kaj Su. Ambaŭ fratinoj kapskuante ridas. Fine, Hai Thep levas sian glason kaj tostante tintigas tiujn de Tam Ĉan kaj Ngan.

La tri levitaj glasoj ĵus interfrapiĝis kun seka bruo «kop», kiam aŭdiĝas en la korto pezaj paŝbruoj. Kaj tiuj paŝbruoj baldaŭ haste kuras sur la ŝtuparo. Ĉiam tenante la glasojn da brando ĉe la mano, la tri viroj ankoraŭ ne trinkas eĉ unu gluton, kiam abrupte enpaŝas Nam Tan kaj Ba Ren. Ambaŭ premas la manon al Tam Ĉan kaj Ngan poste sidiĝas ĉe la rando de la lignolito.

— Oni ĵus sciigis al ni,— kvazaŭ flustre diras Nam Tan,— ke la malamiko koncentrigas en Tri Ton ĉirkaŭ mil soldatojn; nepre morgaŭ, ili okazigos disrabajn operaciojn, sed kie, oni ankoraŭ ne scias.

— Kiom ? Ĉirkaŭ mil soldatoj ? — Demandas Tam Ĉan.

Nam Tan kapjesas :

— Unu bataliono el la ĉefaj fortoj, unu bataliono el la polico kaj, krome, unu roto de « commando »-oj.

— La roto de « commando »-oj de la kanajlo Xam.— Aldonas Ba Ren. — Niaj kamaradoj jam donas al ni tiel precizajn informojn.

Tam Ĉan restas senvorte, kuntirante siajn brovojn. Li sin klinas antaŭen, etendas sian manon por preni la korkon kaj malrapide ŝtopfermas la botelon da brando, antaŭ ol pasigi ĝin al franjo Su.

— Sufiĉe !—Li sin turnas nun al ĉiuj kunmanĝantoj— Ni estas permesataj fari pekon, fintrinkante tiun lastan glason. Ni tuj prenu rizon. Kaj panjo, Su kaj Kujen, vi ankaŭ prenu vian bovlon por manĝi rizon kun ni. Mi estas certa, ke ili atakos nin. Kaj la atako okazos ĉe la matenkrepusko. Sed se la roto de Xam ankaŭ partoprenas la batalon, ni devas esti vigle singardaj. Ĝi povas nin surprizi pli frue.

— Pro kio, tiujn lastajn tagojn, oni ne vidis rondflugi la « maljunulaĉon » * ?

— Ne ĉiam nècesas tiu rondflugo !

Post la manĝo, patrino Saŭ forportas la pleton kun bovloj kaj teleroj... Kaj nun sur tiu lignolito mem, ĉiuj homoj kunvenas. Pli streĉe nodligante la turbanon sur sia kapo, Hai Thep diras :

— Klarvidebliĝas, ke ili volas ataki la regionon Hon Dat. Mi proponas, ke ni rapide pridiskutu la aferon

---

* helicaviadilo por skoltado.

por havi la tempon pretigi nian rezistadon. Miaopinie, Ba Ren tuj kolektu la gerilanojn por kaŝloki bambupikilojn kaj grenadojn. Siaflanke, mia edzino respondecos pri la organizado de luktogrupoj. Oni devas aparte meti gravecon sur la laŭleĝan lukton por bremsi la malamikan antaŭenpuŝon. Plej baldaŭ, mi revenos hejmen por averti mian edzinon pri tio.

Tam Ĉan metas sian manon sur apudan tablon, batante la takton per sia montrofingro :

— Pri tio mi samopinias, kiel Hai Thep. Sed ne forgesu, ke la malamika soldatkvanto estas granda. Kiel statas nun niaj «hem»-oj ! * Ĉu ni havos sufiĉe da ŝirmejoj, kiam ni batalos kontraŭ ili ?

— La bonaj «hem»-oj estas malmultaj. Ili sufiĉas nur por kelkaj grupoj. Fosi tranĉeojn en sabla tero ne estas facile ; ili ĉiam elfalegas. Oni ankoraŭ ne havas la tempon ilin ripari. Ni jam projektas posteniĝi en la ĝardenoj por bari la vojon al la malamiko. En la okazo, se ni estus minacitaj je streĉa ĉirkaŭsiego, ni retiriĝus en direkto al la kaverno.

Tam Ĉan silentas iun momenton. Ombro da timzorgo ekaperas sur lia mieno. Fine, li diras :

— Nepre, ni devas transpasi ĉiajn malhelpaĵojn por plibonigi niajn ŝirmejojn. Ĉu ni estas permesataj resti en tiel pasiva stato ?

— La Hon-kaverno estas tre taŭga rezistbazo. Tie, unu el niaj batalantoj povus rezisti kontraŭ cento da malamikoj. Lastfoje, okazis la samo...

---

* sekreta subtera kaŝejo.

— Lastfoje kaj nuntempe, la situacio ne estas la sama. Mi ankaŭ trovas, ke la Hon-kaverno estas taŭga pozicio por la rezistado, sed konsideri ĝin nur laŭ topografia vidpunkto estas nekompleta pritakso... Tial, ke nuntempe ni ne havas sekurajn ŝirmejojn ekster nia vilaĝeto, ni devas, malgraŭ ĉio, akcepti tian provizoran solvon. Sed, se ni volus trakti la aferon, serioze kaj definitive, konsideri la Hon-kavernon, kiel unikan apogpunkton estas neeble.

Sin turnante al Ngan, Tam Ĉan daŭrigas :

— Via labortaĉmento ankaŭ aliĝos al la gerilgrupoj por kune batali, ĉu ne ?

Ngan kapjesas :

— Konsentite, mia taĉmento posedas ses pafilojn : tri «Mas», tri «Thompson» kaj dek-kvin grenadoj MK3. Ni ĉiuj estas ĉiam batalpretaj.

Ba Ren, tute ĝoja, forte skuas la manon de Ngan.

— Mi opinias, — diras Hai Thep, — ke kamarado Tam Ĉan ne devas resti ĉi tie.

Post momenta pripenso, Tam Ĉan respondas :

— Ne gravas, mi povas resti...

Poste, li venas proksime al Hai Thep kaj basvoĉe aldonas :

— Mi restos ekster la vilaĝeto por gvidi la loĝantojn en ilia politika lukto. Elektu do por mi konvenan loĝejon !

Hai Thep sin montras tute ĝoja kaj tuj diras :

— Kamarado Tam, vi do restu ĉe mi. Mia edzino, kiu senpere gvidas tiujn grupojn de politika lukto estas tre feliĉa pro via helpo. La sekreta subtera

ŝirmejo en mia domo estas ankaŭ tre firma. Vi do restu tie !

Tam Ĉan faras aproban kapmovon poste proponas :

— Hai Thep, vi sendu iun al Linh Kujn por voki la knabon Dat. Lasu lin partopreni en la batalon. Tiel, ni havos unu plian karabenon. Dat estas tre lerta karabenpafanto.

Ba Ren akceptas la proponon, promesante tuj sendi interliganton al Linh Kujn. Ĝuste tiam, Nam Tan proksimiĝas al ĉiuj homoj kaj mallaŭte diras :

— Ankoraŭ tiun aferon... Se la malamikoj venus ĉitien, nepre ili servigus la lokajn spionojn kaj denuncistaĉojn. Nuntempe, la kanajlon Ba Fi, ĝis tiam preme garditan, ni ankoraŭ ne arestas. Do, kiel solvi tiun aferon ? Alie...

— Oni devas aresti lin. Tiu fiŝejestro estas tre danĝera. Kaj lia edzino ankaŭ.

— Mi ĉiam kredas, ke vi jam arestis lin. — Diras Tam Ĉan. — Do, tuj arestigu lin.

Sed, post momenta pripenso, li denove demandas :

— Ĉu vi jam rimarkas, ĝis nun, ian novan agmanieron, dum vi preme sekvados lin ?

— Nenion novan ! — Respondas Nam Tan.

Tam Ĉan frapetas la lignotabulon per siaj fingroj :

— Certe, nuntempe, li senpacience atendas niajn malamikojn. Bone estus, se ni sukcesus devigi lin tuj konfesi la malamikajn intencojn. Li certe konas ilin...

Ekaŭdante pri arestado de spionoj, Ngan sin miksas en la konversacion :

— Ĉu ĝis nun, ni jam malkaŝas ion, kio povus montri, ke ni preme sekvadas lin ?

— Tute ne !— respondas Nam Tan.

Hai Thep donas pliajn rekomendojn :

— Ni devas fari zorgajn pretigaĵojn, antaŭ ol iri aresti lin. Tie, li loĝas tre proksime de malamikaj pozicioj. Necese estas esplori la lokon, por vidi, ĉu de tiu posttagmezo, la distrikta garnizono jam sekrete sendis tien siajn soldatojn.

— Lasu nian taĉmenton veni helpe al vi ! — Diras Ngan.

Hai Thep kapbalancas :

— Do, tre bone, ni tuj ekiru ! Jam vesperiĝas. Ĝuste estas taŭga tempo por veni al tiu loko.

Ngan ekleviĝas.

Kujen viglapaŝe kuras al la malantaŭa dependaĵo por preni la pafilrimenon, kiun ŝi transdonas al Ngan. Traŝultre portante la pafilon, la juna viro rapidmove eliras el la domo kun Nam Tan.

Hai Thep faras la lastajn rekomendojn:

— Tuj post arestado, venigu lin rekte al la kaverno !

Alveninte al la granda vojo, Ngan iras tute proksime al Nam Tan kaj diras :

— Mi opinias, ke por sukcesi en tiu entrepreno ni devas uzi artifikojn, fraĉjo Nam. Per ruzo, ni devigos la kanajlon fari konfesojn, antaŭ ol aresti lin.

— Per ruzo ?—demandas Nam Tan, ankoraŭ nenion komprenanta :

Ngan tuj flustras al li en la orelon kelkajn vortojn. Nam Tan sin montras tiam tute ĝoja kaj senĉese laŭdas:

— Tre bone, tre bone!

— Ni havas uniformon de oficiro. Do, ne timu! — Aldonas Ngan!—Ĉar frue malfrue, ni arestos lin. Sed, agi iom frue aŭ iom malfrue, estas ja tre grave. Vi estas konata de li; do, vi kaj viaj homoj posteniĝu ekstere! Lasu min eniri kun mia taĉmento!

Ĉapitro II

1

Tiun vesperon, la urbeto Tri Ton subite farigas tumulta. De Rach Ĝia unuvice venas kamionoj plenŝargitaj de soldatoj. Densa polvo levigas el sur la unika ŝoseo. Ĝi penetras gis la trinkejoj, la mercerejoj kaj la stratetoj, kie ĵus estas starigitaj novaj etagaj domoj. La soldatoj saltante elveturigas, amase marŝas en kirlo da polvo. Tiuj el la regulaj trupoj estas vestitaj per usona militista kostumo, kaj la «commando»-oj per striita uniformo. Aŭdigas konfuzaj bruoj de ledŝuoj kaj tolŝuoj.

La stratanoj murmuras inter si, vidante ilin paŝadi. Oni rimarkas konatajn vizagojn el la roto de «commando»-oj; neniu aŭdacas fikse rigardi ilin. Dum la soldatoj el la regulaj trupoj, venintaj de Sajgono, direktas sian rigardon al ambaŭ vojrandoj, tiuj el la «commando»-oj restas tute flegmaj, malle-vante la kanontubojn de siaj «Thompson»-oj kaj karabenoj.

La leŭtenanto Xam, komandanto de la roto de «commando»-oj kun blanketaĉaj okuloj, peze marŝas malantaŭ siaj soldatoj. Li surhavas striitan uniformon

de marinfanterio kun marondaj desegnoj kaj, kiu streĉe algluiĝas al lia fortika korpo. Li estas kapvestita per striita kasketo kun tri tolpecoj uzitaj por ŝirmi la nukon kaj ambaŭ orelojn. Tiuspeca kasketo estas ordinare nomita « ba-rem ». Ĉe unu el la kruroj de Xam pendas unu « Colt 12 », kies ingo flavbruna havas preskaŭ la saman koloron, kiel lia vizaĝhaŭto. Krome, li traŝultre portas unu karabenon kaj unu usonan tranĉilegon. Ĉiuj « commando »-oj el lia roto sin vestas same kiel li, kun karabenoj aŭ « Thompson »-oj, ĉiuj havas ankoraŭ usonajn ponardojn kaj ĉiuj aspektas kruelegaj.

Dumvoje, la leŭtenanto Xam subite ekhaltas ĉe iu trinkejo meze de l' strateto. Li tute libere ekprenas unu botelon da biero kaj faras signojn per la okulo al la ĉina trinkejestro, antaŭ ol eliri. Li marŝas, brue elingigante sian trancilegon. Per unu mano li alte levas la botelon, kaj per la alia li turnas la trancilegon kaj donas fortan trancbaton de ĝia klingodorso al la botelkolo. Tiu lasta estas tuj fortrancita. Ŝaŭme elŝprucas la biero. Xam eklevas sian vizaĝon al la ĉielo kaj verŝas la trinkaĵon en sian buŝon. Elĉerpinte ĉirkaŭ du trionojn da biero el la botelo, li transdonas ĝin al la « commando »-o, kiu antaŭiras lin. Tute ravita, la soldato eltrinkas la restantan bieron. Ŝajnas, ke tiu lasta jam kutimiĝas al tio. Tiam, de la bataliono de sekurecaj soldatoj venas ordono :

— Haltu, ne plu antaŭeniru !

La kaŭzo kuŝas en tio, ke tiu militsektoro povas plie loĝigi nur du el la tri ĵus venintaj batalionoj : temas pri du batalionoj de la regulaj trupoj. La ceteraj,

sekurecaj soldatoj kaj « commando »-oj, laŭordone bivakas sur sekaj kaj senŝirmaj kampoj.

Iu altstatura kapitano batalionestro de la sekurecaj trupoj komunikas tiun ordonon al la sekvantaro, poste kondukas siajn rotojn al la kampoj.

Xam grumblas :

— Fi! Ĉu oni devigas min kuŝi meze de la kampoj, kiam mi troviĝas en mia hejmvilaĝo ?

Malgraŭ tio, per mansvingo, li ordonas al siaj soldatoj iri kolektiĝi sur la senarba terspaco, tuj apud la strateto.

La vesperkrepuska lumo flave kovras la tutan kamparon. Sur la jam zorge pretigita senŝirma terspaco ĉirkaŭ la militsektoro, la soldatoj kuras tien kaj reen. Ili etendas sur la teron ŝirmotukegojn, elektas lokojn por instali sian kuirejon, brue trinkas akvon aŭ alkoholaĵon el usonaj ladboteloj. Iuj sterniĝas per sia tuta longo, turnante sian vizaĝon al la ĉielo kaj fumante cigaredojn. El tiu homamaso eliĝas acida odoro de ŝvito, tiu de cigaredoj « Bastos », tiu de brando kaj eĉ tiu de malmultkostaj kosmetikoj. La kunmiksiĝo de tiuj odoroj konsistigas specialan odoron de soldatoj, naŭzan odoron, komune renkontitan ĉe ĉiuj dungosoldatoj.

Xam larĝe malbutonumas sian jakon. Ĉe ambaŭ manradikoj li portas multajn flavajn kaj ruĝajn amuletfadenojn « ka-tha » kaj sur lia larĝa brusto pendas ĉeneto, al kiu estas ligita unu terura vizaĝo de « Ĉan »-monstro el eburo kun elstaraj kaninoj. Tiun « Ĉan »-vizaĝon kaj tiujn « ka-tha »-fadenojn konsideras Xam, kiel siajn plej efikajn amulctojn. Li renverse

sterniĝas sur la grizan ŝirmotukegon. La cigaredo preskaŭ forbrulas ĉe liaj lipoj sed tion li ŝajne ne rimarkas. Subite li elŝiras la cigaredstumpon, forĵetas ĝin kaj saltleviĝas. Li malbonhumure direktas siajn blanketaĉajn okulojn al siaj homoj, kiuj estas elsakigantaj panon. Iu etstatura soldato glitas ĝis apud li:

— Vi iru manĝi, mi petas, fraĉjo Hai!

Xam malvigle leviĝas kaj postiras tiun soldaton ĝis ŝirmotukego kovrita per malnovaj ĵurnalpaperoj, sur kiuj estas ordometitaj unu duono da rostita kokino, du grandaj panoj kaj unu malfermita skatoleto da sardinoj. Post ekrigardo, Xam malmilde demandas:

— Ĉu jam elĉerpiĝas brando?

— Restas ankoraŭ ia kvanto, fraĉjo Hai!

Tiu etstatura soldato tuj viglamove metas meze de la ŝirmotukego unu pezan ladbotelon. Ekbrilas la okuloj de Xam. Li etendas siajn brakojn kaj ekkaptas la ladbotelon, kiun li agitas tre kontente. Li tuj malŝtopas ĝin kaj verŝas la brandon en sian buŝon. Post du glutoj, li pasigas la ladbotelon al la soldato kaj ekprenas la rostitan kruron de kokino, kiun li tuj enbuŝigas. Li avide mordas, ŝiras kaj brue maĉas la kokinaĵon, dum ekbrilas kelkaj oraj dentoj en lia larĝa buŝo. De tempo al tempo, li eklevas sian manon por forviŝi la grason, kiu gluiĝas aŭ liaj lipoj. La soldato mienas iom humile, sed en la fundo de sia koro li estas tre kontenta kunmanĝante kun sia estro. Xam ĉiam brue glutas la brandon kaj post ĉiu ravita elspiro, li denove ŝiras la kokinaĵon kaj manĝas...

Kiam li kaj ĥia soldato formanĝas la tutan duonkokinon kaj eltrinkas la tutan alkoholaĵon, la vesperkrepuska lumo jam estingiĝas sed la suno estas ankoraŭ malhelruĝa ĉe la fora horizonto.

Tute ebria, la « commando » - leŭtenanto ŝancele leviĝas kaj per ambaŭ manoj gratas al si la koksojn. Li levas la okulojn por rigardi la sunon, murmuras insultajn parolojn, kiujn li sola komprenas, poste montrante siajn dentojn, li senbrue ridas. Elinter la soldatoj pluraj estas same ebriaj, kiel li. Sed elĉerpiĝas la tuta brando kaj nun ili dividas inter si panon. Kelkaj jam komplete demetas sian jakon, malkovrante sian brile nigran bruston, sur kiu estas tatuitaj pluraj desegnaĵoj de drakoj kaj serpentoj. Aliaj transportas brullignon, tiun specon de tram-ligno dupece hakita, kiun ili venigas de nekonata loko.

Apenaŭ noktiĝas, kiam la soldatoj faras fajron, dise sur la kampo. Ruĝaj flamoj siblante leviĝas kaj lumigas la tutan kampadejon. Oni boligas akvon per gameloj, kaŭriĝante apud la fajrujoj. Kvankam estas malpermesite vagi en la stratetoj, tamen la soldatoj ĉiam ŝtele iras aĉeti brandon, bieron kaj manĝaĵojn. Tiu malpermeso devenas de la militoperacia komandejo, sed la estroj de la trupunuoj ne trudas al siaj soldatoj obeadon al tiu ordono. Xam ne nur lasas siajn soldatojn libere agi sed ankaŭ sin fordonas, kune kun ili, al drinkado. Ili ne ĉesas inviti lin al manĝado kaj supersŝuti lin per flataj vortoj. Ĉiuj vokas lin « fraĉjo Hai ». Ili ankaŭ ŝatas flati iun subleŭtenanton kun osteca vizaĝo kaj kaviĝintaj okuloj kaj vokas lin « fraĉjo Ba » :

Xam ŝin montras kontenta, kiam liaj soldatoj vokas lin «fraĉjo Hai», prefere ol «sinjoro leŭtenanto».

— Drinku kun mi, fraĉjo Hai!

— Neniam oni vidas «fraĉjo Hai» ebria!

Xam estas tute ravita de tiuj flataj vortoj. Li volonte drinkadas, rifuzante nenies inviton. Li ja estas «commando»-drinkemulo. Li multe drinkadas sed nur iomete ebriiĝas. Ambaŭ liaj okuloj, ordinare blanketaĉaj, fariĝas nun ruĝaj, kvazaŭ ŝprucigantaj fajron kaj sangon. Ĉirkaŭ li, sidas la «commando»-tiranoj, liaj plej fidindaj subuloj. Tiuj lastaj admiras lin tiom pro lia sovaĝa kruelegeco dum subpremaj agoj kontraŭ liaj samlandanoj, kiom pro liaj ekscesoj en drinkado. Unu el la «commando»-tiranoj subite demandas:

— Morgaŭ vi revenos al Hon Dat, ĉu vi haltos ĉe vi?

Ekaŭdante tiun demandon, Xam tuj mallevas la ladbotelon da brando, tenatan prete ĉe lia buŝo. Post momenta silento, li diras:

— Jes, mi certe revenos hejmen por viziti mian patrinon kaj mian fratinon.

— Fraŭlinon Ka My, ĉu ne? Ha, nunjare, sendube ŝi estas plenkreska!

— Ĉirkaŭ deknaŭjara, se mi ne eraras.

— Laŭdire, vi jam admonis sinjorinon kaj fraŭlinon Ka My transloĝiĝi al la bazaro. Sed, pro kio ili ankoraŭ ne venas tien?

— Ĉi foje mi starigos postenon en Hon Dat; tial decas, ke mia patrino restu tie!

Ĉe tiuj vortoj, Xam subite mallaŭtigas sian voĉon parolante pri Hon Dat:

— La vivo estas amuza, tre amuza en Hon Dat. Dum mi deĵoris tie, kiel postenestro, mi vivis vivon pli gajan, ol hodiaŭ. Tie abundas ĉiuspecaj fruktoj, sekigita bubalviando. Ankaŭ multaj junulinoj, el kiuj pluraj estas tre belaj kun mamoj ŝveldikaj, kiel kokosoj. Se via mano estas malgranda, vi ne povas plenmane palpi ilin.

La soldatoj plezurege ridaĉas. Ĉiuj estas tre kontentaj pri tio, ke morgaŭ ili alvenos tien. Nun, malmultaj timas morton, ili pensas nur pri rabado, diboĉo kaj seksatenco. Elinter ili iuj bone konas tiun regionon Hon Dat. Tie, ili tute libere faris ĉion, kion ili volis. Ili malsekretigas inter si kaj ankaŭ al aliaj, ke ekzemple, por povi manĝi bubalviandon, sufiĉas trafe celi la bubalojn paŝtiĝantajn sur tiu Hon-deklivo kaj pafi. Aliaj plendetale rakontas, kiel ili perfortis la tieajn virinojn kaj kun kontenta mieno konfesas, ke ili propramane disŝiris dek-tri silkajn pantalonojn al la viktimoj. La ceteraj sciigas, ke ili iam rompis la kranion al la Vjetkongoj per remiloj kaj, ke la cerboj ŝprucis kaj falis ĝis iliaj vestoj. Ili ankaŭ malkaŝas inter si, ke tie «Fraĉjo Hai» jam tratranĉis, lerte tratranĉis la ventron al multaj homoj. Sufiĉas, ke li enigas la tranĉilon en la abdomenon super la pelvo kaj puŝas la klingon iom supren, tiel farante breĉon ĝuste larĝan por enŝovi siajn kvar fingrojn kaj eltiri la tutan hepaton de la viktimo.

Vere, Xam jam tratranĉis la ventron al multnombraj homoj. Tial, inter la tiranoj li estas la plej

famkonata hommortiganto, kiu scias lerte eltiri homan hepaton. Sed li estas ne nur sperta pri eltirado de hepato kaj galo, li posedas ankaŭ plurajn strangajn mortigajn rimedojn. Lia koro nekontesteble portas ankoraŭ la sangon de lia patro, iama grandbienulo, kiu mastre regis sur tiu Hon-regiono. Oni diras, ke Xam ne havas plu la plej etan sangeron de sinjorino Ka Soi, lia patrino, tiu kmera virino, kiu indignoplena devas suferi la tutan vivon kaj, kiu ĝis nun estas kvazaŭ freneza.

Sinjorino Ka Soi, lia patrino, estis antaŭe kmera junulino sufiĉe ĉarma, kun alloga bistra haŭtkoloro kaj gracia irmaniero. Tian belecon havas nur la kmeraj junulinoj, kiuj profesie modlas argilajn marmitojn kaj, kiuj surkape portas kruĉon por iri ĉerpi akvon el la torento. La tieaj kmeraj junulinoj kreskas kun tiu metio de marmitmodlado ; ĉiutage, ili ĉirkaŭiras sian modlilon kaj, tiel ili piediras, meznombre, ĉirkaŭ tridek kilometrojn potage t.e. la distancon de Hon Dat ĝis la provinco Rach Gia. Dank'al tiu manlabora profesio, ili jam pretervole ekzercas sian korpon kaj donas al ĝi tiun sveltan formon. Krome, ili havas la kutimon surkape porti kruĉon por iri ĉerpi akvon el la torento. Kun tiu ĉi kruĉo sur la kapo, ili gracie paŝadas.

Dumvoje, de la torento ĝis sia domo, neniam tuŝante la kruĉon kaj delikate balancante siajn brakojn, ili viglapaŝe glitas sur la sabla vojstreko.

Tia estis sinjorino Ka Soi dum siaj junulinaj jaroj.

La grandbienulo Muu jam perforte devigis la belulinon Ka Soi edziniĝi al li. Tiam, tute malĝoja, la knabego Thach Ĥa, kiu enamiĝis al ŝi foriris al

Komponĉam por sin dungigi, kiel floshaŭlisto. Post la naskiĝo de Xam, Muu tute ne zorgis pri lia patrino kaj turnis sian atenton al aliaj pli junaj virinoj. Sed tiam, Ka Soi jam duafoje gravediĝis de la grandbienulo. Fine, tiu lasta forpelis ŝin kaj retenis la bebon Xam por lin vivteni. La malfeliĉa Ka Soi estis devigata forlasi sian infaneton kaj ŝancelpaŝe eliri el tiu moderna brikdomo. Ŝi revenis al la vilaĝeto Hon Dat, provizore starigis tie unu kabaneton por pasigi la nokton post sia ĉiutaga dungolaboro sur la rizkampoj. Iun nokton, kiam ŝi estis tuj akuŝonta, ŝi sentis akrajn ventrodolorojn tiagrade, ke ŝi rampis ĝis la rizejoj kaj baraktante elŝiris la stoplojn por ilin maĉi. Feliĉe, ŝin hazarde renkontis patrino Saŭ kaj ŝia filino, revenantaj de la pramhaltejo Vam Rang. Ili tuj venigis ŝin al sia logejo. Tiel sinjorino Ka Soi naskis la etulinon Ka My, ĉe la patrino Saŭ. Unu semajnon poste, Thach Ĥa revenis de Komponĉam. Li iris rekte al la domo de patrino Saŭ kaj surgenuiĝis antaŭ ŝi kun peto, ke li revenigu al sia hejmo sinjorinon Ka Soi kaj ŝian novnaskitinon. Ambaŭ geamantoj estis kunvivintaj apenaŭ unu jaron, kiam la grandbienulo Muu sendis siajn servistojn por embuske murdi lin per trançilego, dum li iris serĉi brullignon en la arbaro. Thach Ĥa jam per hakilo sukcesis rebate mortigi unu el la murdistoj ; sed siaflanke, li estis grave vundita. Li kure revenis kaj mortfalis antaŭ la korto de sia domo. De tiam, sinjorino Ka Soi sole vivtenis sian filineton Ka My, per tiu metio de marmitmodlado. Ju pli Ka My kreskis, des pli ŝi fariĝis aminda kaj okulfrape similis al sia patrino. Nur la kanajlo Xam, kiel plej dorlotata filo, vivis kun la grandbienulo Muu,

de siaj infanjaroj ĝis sia viriĝo. Ambaŭ patro kaj filo similis unu al alia el ĉiuj vidpunktoj. Xam koralligiĝis al tiu grandbienulo, komence per tiuj fruktĝardenoj de Hon Dat, per tiuj parceloj da tero uzita por marmitmodlado,—tero, kiun monopoligis lia patro por ĝin vendi po kuba metro. Li loĝis kaj kreskis en moderna brikdomo. Dum la rezistado kontraŭ la francaj kolonistoj, tiu domo estis detruita kaj la ĝardenoj kaj rizejoj de la grandbienulo Muu estis konfiskitaj kaj distribuitaj al la vilaĝanoj. Siaflanke, Muu devis fuĝi en la urbon Rach Gia. Nur post la pacrestariĝo, li revenis hejmen. Tiam, lia filo Xam jam estis subleŭtenanto en la armeo de Ngo Dinh Dziem. La grandbienulo reakaparis siajn iamajn terojn, rekonstruigis sian domon kaj, kune kun sia filo, faris venĝon kontraŭ la revolucio kun tiu malamego delonge akumulita en la koro. La kanajlo Xam estıs ankoraŭ pli kruela, ol sia patro, ĉar li propramane uzis usonajn pafilojn kaj mem komandis bandaĉon da plej riskemaj tiranoj, elektitaj el unuopaj postenoj en la ĉirkaŭaĵoj. La «commando»-oj de Xam, senescepte, rapide kuris kvazaŭ ĉevaloj. Ili preme persekutis la aktivulojn sur senŝirmaj kampoj, penetris ĝis la tram-arbaroj kaj tagnokte atakis la revoluciajn bazojn. Iafoje, seninterrompe kraketis iliaj pafiloj, meze de la torentpluva nokto aŭ ĉe la ektagiĝo. Ĉiufoje kiam aŭdiĝis tiuj pafbruoj sur tiu tero de Hon Dat, la tiea loĝantaro tre timis pensante pri siaj infanoj kaj amataj aktivuloj, kiuj eble estus ĵus pafmortigitaj.

Sed estis homo, kiu aŭdante tiujn pafbruojn teruriĝis kaj suferis multe pli, ol la ceteraj. Tiu homo estis sinjorino Ka Soi mem.

Baldaŭ okazis la komuna popolleviĝo. La grandbienulo Muu estis arestita kaj ekzekutita. La kanajlo Xam eskapis el la morto. De tiam, li fariĝis pli kruela.

En Hon Dat, same kiel ĉie en la mondo, ĉiu patrino havas sian propran korsuferon. Tamen, malofte estas renkonti patrinon, kiu estas tiel malfeliĉa, kiel sinjorino Ka Soi!

En la epoko, kiam Xam ankoraŭ deĵoris en Hon Dat, kiel postenestro, li ofte alportis la de li rabitajn ŝtofojn kaj juvelojn al sia patrino kaj al sia fratino Ka My. Sed tiuj lastaj kategorie rifuzis. Foje, sinjorino Ka Soi jam forĵetis tiujn rabaĵojn sur la korton kaj kaŝante sian vizaĝon malantaŭ la manoj ploregis.

2

Je tiu horo, sinjorino Ka Soi sole iras al la trinkejo de Ba U ĉe la voikruciĝo de Hon Dat. Ŝi marŝas en mallumo, tenante en la mano unu malplenan kvaronlitran boteleton. En Hon Dat, kiam nokte oni renkontas iun homsilueton sen lanterno aŭ torĉo, oni estas certa, ke tio estas sinjorino Ka Soi, ĉar krom ŝi, neniu paŝas, kiel ombro tia. Sed, kiel lerte marŝas en mallumo tiu virino, kiun la ĉitieuloj konsideras, kiel frenezulinon. Ŝiaj piedoj neniam frapiĝas kontraŭ terbulo aŭ kavaĵo. Ŝajnas, ke ŝi povas antaŭvidi kaj eviti ĉiujn obstaklojn.

Kiam sinjorino Ka Soi atingas tiun vojkruciĝon, la trinkejo estas senklienta. Enpaŝante en ĝin ŝi vidas ĉe la kontoro, apud brulanta lampo, nur onklinon Ba U, kiu estas kalkulanta sian monon gajnitan post unutaga vendado de la trinkaĵoj. Ekaŭdante paŝbruojn, la trinkejestrino eklevas sian kapon kaj mildvoĉe demandas :

— Onnjo Ka Soi, ĉu ne ? Kion vi volas aĉeti tiel malfrue ?

Sinjorino Ka Soi senresponde montras la malplenan boteleton. Onklino Ba U tuj komprenas. Finkalkulinte sian monon, ŝi elŝoviĝas el la kontoro kaj iras serĉi brandon kun ŝia boteleto. La trinkejestrino vere meritas tiun nomon Ba U. Kiel grasdika ŝi estas ! Ŝi pene traŝoviĝas tra la pordeto de la kontoro. Kiam ŝi etendas sian manon por preni la boteleton de sinjorino Ka Soi, ŝi malkovras rondan kaj graspufan manradikon kun profunda falto. Ŝi proksimiĝas al argila ujo kaj, per bambuĉerpileto ĉerpas el ĝi la brandon, kiun ŝi rekte verŝas en la boteleton, ne bezonante funelon ; neniu brandoguto falas teren.

Transdonante la brandoplenan boteleton al sinjorino Ka Soi, onklino Ba U longan momenton rigardas ŝin kaj kmerlingve demandas :

— Ĉu vi estas informita pri tio ?

Sinjorino Ka Soi skuas sian kapon kun distaŭzitaj blondaj haroj :

— Pri kio do ?

Onklino Ba U flustras al ŝi en la orelon :

— Nu, Xam ĵus revenis al Tri Ton. Hieraŭ, kiam mi iris al la distrikto por varprovizado, mi vidis lin elsalti el militveturilo...

Sinjorino Ka Soi palpebrumante redemandas :

— Xam ? Xam revenis al Tri Ton ?

Ĉe tiuj vortoj, ŝi rigardas al la tero maltrankvile, kvazaŭ serĉante ion ĵus perditan. Poste, kun tremetantaj kruroj ŝi iras al la pordo. Ĉi foje, ŝiaj piedoj ektuŝegas la sojlon kaj ŝi falas vizaĝaltere. La boteleto da brando, preme tenita sub ŝia akselo, frapiĝas ankaŭ kontraŭ la sojlo kaj rompiĝas, elverŝante la tutan alkoholaĵon sur la plankon. Sed, ŝi ne haltas, ekleviĝas kaj ĉiam iras antaŭen. Kun pezaj paŝoj, onklino Ba U kuratingas ŝin kaj per siaj graspufaj manoj prove retenas ŝin :

— Nu, onnjo Ka Soi, — ŝi haste diras, — revenu kaj mi plenigos por vi alian boteleton. Rapidu ! Eniru !

Onklino Ba U revenigas al sia trinkejo sinjorinon Ka Soi. Ŝi serĉas alian malplenan botelon, kiun ŝi plenigas per brando kaj zorge korkas, antaŭ ol transdoni ĝin al la povra virino, kun rekomendo :

— Firme tenu la botelon kaj gardu vin, ke vi ne falu duan fojon !

Kompatinda virino ! Sinjorino Ka Soi nun similas al infano, tute obeema. Ŝi preme tenas la botelon ĉe ĝia kolo kaj senvorte eliras el la trinkejo. Survoje al sia hejmo, ŝi pli ol unufoje falŝanceliĝas kaj pene sin levas en mallumo.

La loĝejo de sinjorino Ka Soi situas iom malproksime de la vojkruciĝo kaj staras sole, sennajbare.

Tiam, en tiu unufaka dometo, fraŭlino Ka My sidas sur matraco, etendita sur la planko, viglamane plektante la « karon »*-sakojn.

Apud ŝi, brilas unupieda petrollampo, kun pale flava lumo. Ekvidante sian patrinon reveni, ŝi eklevas sian kapon por preterfluge rigardi ŝin, antaŭ ol denove kliniĝi super sia laboro.

Per siaj vizaĝtrajtoj, Ka My similas al sinjorino Ka Soi pli, ol al Xam. Ŝi estas deknaŭjara kun graseta talio kaj aspektas tre fortike. Ŝia haŭtkoloro estas ankaŭ nigrebruna sed pli hela ol tiu de sinjorino Ka Soi. Ŝiaj okuloj estas grandaj kaj nigraj kun tre longaj kaj velurece brilaj okulharoj. Sub tiu malforta lumo, ŝiaj lipoj aperas ĉiam helruĝaj. Ŝi estas la vivanta bildo de sia patrino dum ŝia juneco, sed ŝi estas pli bela.

— Ka My, Xam jam revenas al Tri Ton.

La junulino eklevas siajn okulojn, maltrankvile :

— Al Tri Ton ? Kiu diras tion al vi ?

— Onklino Ba U.

Doninte tiun informon al sia filino, sinjorino Ka Soi iras al la lignolito kaj kaŭre sidiĝas tie. Iun momenton poste, ŝi verŝas brandon en tason kaj trinkas ĝin, kvazaŭ akvon. Sed ŝi prenas nur unu tason. Poste, sidante tie, ŝi senvorte rigardas sian ombron ĉe la muro. Tiel, ĉiunokte, ŝi faras al si kutimon eltrinki unu tason da brando, post kiam ŝi finplektas du aŭ tri « karon »-sakojn. Ordinare, oni ebriiĝas kaj forgesas ĉion, post drinkado. Sed la samo

---

* Sako el junko.

ne okazas al sinjorino Ka Soi : ju pli ŝi drinkas, des pli ŝi fariĝas klarpensa kaj ŝia memoro, vigle freŝa. Ŝi direktas sian rigardon al Ka My, dum tiu lasta diligente plektas siajn «karon»-sakojn, rememorante pri sia pasinteco, kiam ŝi havis la aĝon de sia filino, pri la argilaj marmitoj de ŝi mem modlitaj kaj ruĝe bakitaj en forno, pri tiuj noktaj teatroprezentadoj, en kiuj Thach Ĥa, veninta de Sok Tung, ludis la rolon de princo kaj ŝi, tiun de helikokaptistino. Poste, sinsekve aperas en ŝia cerbo la abomenindaj vizaĝtrajtoj de la grandbienulo Muu kaj la bildo de ŝia sklava vivo en la moderna brikdomo. Ŝi rememoras ankoraŭ tiujn mizerajn sed feliĉajn tagojn, kiam ŝi kunvivis kun Thach Ĥa... kaj baldaŭ lin trafis malfeliĉo; Thach Ĥa falis ventraltere antaŭ sia domo baraktante, antaŭ ol fari la lastan spiron. Ĉion ĉi ŝi bone memoras, dum ŝi rigardas sian ombron projekciitan sur la muron kaj sian filinon plektantan «karon»-sakojn.

Ŝi ne forgesas la tagon, kiam la revolucio distribuis al ŝi la teron por la rizkulturo... kaj tiun kanajlon Xam kaj ŝiajn samvilaĝanojn, al kiuj li jam tratranĉis la ventron aŭ frakasis la kapon.

«Xam ĵus revenis al Tri Ton!» tiuj vortoj de onklino Ba U kvazaŭ ankoraŭ sonas ĉe ŝiaj oreloj.

«Ĉu li revenas por denove masakri la vilaĝanojn?»

Ŝi murmuras al si en la pensoj kaj volas krii : «Dio mia, kial li revenas ĉi tien ? Prefere estas, ke li mortu!»

Kiu patrino volus, ke ŝia filo mortu ? Tamen, pli ol unufoje, sinjorino Ka Soi arde deziras al Xam la

morton. Se Xam mortus, sendube ŝi malpli suferus. Se li plue vivus kaj senĉese sin fordonus al tia hombuĉado, certe iun momenton, ŝi devus morti. Aŭ li aŭ ŝi devus morti, jen estas solvo al la problemo. Foje, Ka My diris al ŝi :

— Por kio vi naskis lin ? Li ne indas esti mia frato.

Foje, sinjorino Ka Soi ankaŭ diris al la vilaĝanaro : « Xam ne estas mia infano ! » Plurfoje, ŝi mallevas sian voĉon, kvazaŭ petegante : « Kompatu min ! Ne rigardu lin, kiel mian filon ! » Sed, tion dirinte, ŝi sentas sin suferplena, kvazaŭ freneza. Estas ja pli malpli granda sufero por ĉiu ajn patrino, kiu ne aŭdacas rekoni sian propran infanon. Siaflanke, sinjorino Ka Soi ekstreme suferas kaj tial, ke ŝi estas tre honesta kmeranino, tiu sufero pliakriĝas kaj, iafoje, kvazaŭ stultigas ŝin. Jam de sep jaroj, ŝi troviĝas en tia stato de duonfrenezeco. Ŝi havas konfuzitan mienon kun blue kadritaj okuloj. Oni malofte renkontas ŝin tage. Ŝi eliras, nur kiam noktiĝas. Sendube, ŝi kredas, ke la nokta vualo povus kaŝi ŝin al ĉies rigardoj.

Ripetfoje, per mildaj paroloj, ŝi admonis lin al bonfaro. Antaŭ ŝi, li neniam kontraŭdiris. Iafoje, li malkontente skuis sian kapon aŭ ŝajnigante koleron duonminacis : « Ha, vi sekvas la konsilojn de la Vjetkongoj por prove persvadi min, ĉu ne ? »

Sed, li tuj ekridis kaj lia rido ŝajnis tamen milda. Ĉiufoje, kiam li vizitis sian patrinon, Xam reprenis sian kvazaŭan aspekton de filo kaj ne plu gardis sian irmanieron de « commando »-o. Tial, komence, ŝi ofte trompiĝis, iom dubante, ĉu reale li estis tratranĉinta

la ventron al homoj, laŭ la famdiroj. Sed, baldaŭ ŝi tute elreviĝis. Iun tagon, Xam revenis hejmen. Ekvidante sangon ĉe liaj buŝanguloj, sinjorino Ka Soi ekkriis :

— Xam, kial via buŝo sangas ?

La kanajlo urĝe eklevis sian manon por viŝi sian buŝon, senvorte. Tuj post lia foriro, Ka My anhelante revenis de la vilaĝeto, kun vizaĝo kaŝita malantaŭ la manoj. Ŝi kriegis, sciigante ke Xam ĵus estis tratrančinta la ventron al du homoj sur la strando Tre por eltiri la hepaton, kiun li estis fritinta per aluminia kaserolo ĉe iu vilaĝano. Tion aŭdante, sinjorino Ka Soi falis svene. Rekonsciiĝinte, ŝi ekmemoris pri la sangmakuloj ĉe la buŝanguloj de Xam kaj denove ŝi svenis kaj falis teren. Alifoje, post siaj disrabaj operacioj en Vam Rang, li arestis kelkajn nekonatajn homojn. Informite, ke li estis tratrančonta la ventro al ili ĉe la vojkruciĝo, sinjorino Ka Soi urĝe kuris tien por insiste peti lian indulgon. Kiam ŝi alvenis, Xam jam profunde tratruis la anuson al ili. Poste li malkatenis ilin. Liberigitaj el siaj katenoj, la malfeliĉuloj apenaŭ eklevigis, kiam eliĝis la tuta intestaro el ilia postaĵo. Ĉi foje, sinjorino Ka Soi ankaŭ kriegis kaj svene rulfalis meze de la strateto. Xam ordonis al siaj soldatoj transporti ŝin hejmen. Ĉe la vesperiĝo, ŝi iom rekonsciiĝis. Ekvidante sian filinon Ka My stari apud ŝi, la povra patrino etendis siajn brakojn kaj kriegis :

— Ĉielo ! For de tie ĉi, Xam !

La vilaĝanaro diras, ke ekde tiam, sinjorino Ka Soi fariĝis freneza.

Tiu evento povis esti aŭ prava aŭ malprava. Ja, malfacile estas konkludi, ĉu ŝi freneziĝis aŭ ne. Ĉar ŝi

faris nenion malutilan al la vilaĝanaro; antaŭ ĝi, ŝi montris sin kompatinde timema kaj provpenis kaŝi sin de ĉies rigardoj. Cetere, iafoje ŝi havis tre klaran kapon. Ŝi havis bonan memoron pri ĉiuj kredite aĉetitaj aĵoj en la trinkejo de onklino Ba U kaj post vendo de siaj «karon»-sakoj, ŝi ne forgesis komisii sian filinon Ka My por reguligi la tutan konton. Kiel antaŭe, ŝi estis ĉiam lerta en plektado de la «karon»-sakoj, ne farante eĉ la plej etan misnodon. Sed okazis ke, kiam ŝian domon preterpasis iu homo, kiu ajn li estis, ŝi tuj eliris kaj terenkuŝiĝis antaŭ li, ĉirkaŭpremis liajn piedojn kaj plorsingultis. Ŝiaj ploroj tiam estis kvazaŭ humilaj pardonpetoj. En Hon Dat, tiuj, kiuj ofte devis suferplene sin liberigi el ŝiaj ĉirkaŭbrakoj estis Hai Thep, Nam Tan, Ba Ren, patrino Saŭ kaj ambaŭ fratinoj Su kaj Kujen. Ankaŭ ili tre ofte venis vizite al ŝi. Antaŭe, ili venis por montri, kiel ŝi devis konsili al Xam. Baldaŭ, kiam ĉiuj rimedoj por persvadi lin restas senfruktaj, ili venis por konsoli kaj helpi ŝin.

— Onnjo Ka Soi, diris iam Hai Thep, ni ĉiuj tre kompatas vin kaj vian filinon Ka My. Ne maltrankviliĝu, ni neniam forlasos vin!

Aŭdante tiujn vortojn, sinjorino Ka Soi eksplodis per larmoj. Tiam, de tempo al tempo okazis manifestacio kontraŭ la malamiko. Komence, ŝi ne aŭdacis partopreni en ĝi, opiniante sin malinda je tiu popolamasa lukto. Sed patrino Saŭ kaj aliaj vilaĝaninoj admonis ŝin:

— Onnjo Ka Soi, pretigu vin por iri kun ni!

Tiuj mildaj paroloj tute ĝojigis la povran virinon. Ŝi ŝancelpaŝe eniris en la vicojn de la

manifestaciantoj. Ekde tiam, oni vidis ŝin en iu ajn manifestacio. Tiel, foje ŝi kun aplombo staris fronte al Xam, antaŭ la kanonfaŭko de lia fusilo. Dum tiu kriza minuto, dank' al la senegala forto de l'patrino, ŝi jam sukcesis mallevi tiun fusilon, malebligante al ĝi elsputi morton, por ke la manifestaciantoj antaŭenmarŝu...

Tia estas la afero de sinjorino Ka Soi, rilate al ŝia frenezeco. Kaj plividebliĝas, ke el preskaŭ ĉiuj loĝantoj de Hon Dat neniu malamas ŝin. Ĉiuj opinias, ke ŝi estas mizera kmeranino, dum Xam kaj lia patro apartenas al la ekspluatanta klaso. Tamen, sinjorino Ka Soi sentas sin ĉiam ĝenita, ĉar malgraŭ ĉio, ŝi estas la patrino de Xam, en kies vejnoj fluas ankaŭ ŝia sango. Ĝuste en tio kuŝas ŝia tuta sufero.

Siaflanke, Ka My montriĝas pli kategoria.

Ŝi ne nur simple diras: «Li ne estas mia frato» sed ankaŭ konsideras lin, el la fundo de sia koro, kiel fremdulon. Li estas al ŝi ne nur fremda, sed ankaŭ antipatia. Ĉiufoje kiam Xam revenas hejmen, Ka My ne volas diri al li eĉ unu vorton.

Ŝi sin agitas, krie plendas kaj tute afliktiĝas, kiam oni parolas pri Xam, miksante ŝian nomon en la konversacion.

Kiel kompatinda ŝi estis, kiam ŝi memvole venis al la aktivuloj, al la Revolucio, dum la mallumaj jaroj de mizero. Tiam ŝi kvazaŭ kuris al ĝi, persekutate de l' fajro.

Nuntempe, Ka My fariĝas objekto de simpatio de l' junulara sekcio. De post sia partopreno en kelkaj junularaj kunvenoj, Ka My montras sin tre laborema. Ŝi diligente plenumas ĉiujn al ŝi komisiitajn taskojn,

nome la starigon de bambupikiloj, la fosadon de ŝirmotrancĉeoj. Ŝi ŝatas kanti kaj belvoĉe kantas.

La malnovaj arioj, iam antaŭe kantitaj de ŝia patrino, nun resonas el ŝiaj lipoj, rememorigante al la plenaĝuloj tiujn noktojn, kiam ili travadis la akvajn rizejojn por iri ĉeesti la teatrajn prezentadojn en Sok Tung kaj la bildon de Thach Ĥa kaj de ŝia patrino dum iliaj plej junaj jaroj. Siaflanke, aŭdante la kanton de sia filino, sinjorino Ka Soi malsprite mienas, kun larmoplenaj okuloj.

Sinjorino Ka Soi sin fordonis al drinkado, ek de la tago, kiam Xam fariĝis kruelegulo kaj, kiam liaj malbonaj agoj kaŭzis al ŝi tiom da doloroj.

Ankaŭ tiun nokton, ŝi denove trinkas.

Kutime, ŝi prenas nur unu tason: sed nun, eltrinkinte la unuan tason, ŝi tuj malŝtopas la botelon kaj, per tremetantaj manoj, verŝas la brandon en la duan.

La duan tason ŝi trinkas malrapide kaj ne tiel urĝe, kiel la unuan.

Ka My ĉiam klinas sin super sia laboro, grumblante:

— Vi ankoraŭ trinkas? Sufiĉe, ne plu trinku, panjo mia!

Tiam sur la vojo, subite bojadas hundo.

Poste, aŭdiĝas virina voĉo el la korto:

— Ka My, ĉu vi estas hejme?

Rekonante la voĉon de Kujen, Ka My tuj maltenas sian nefinplektitan sakon kaj ekleviĝas:

— Jes, jen mi estas!

Ŝi delikate malfermas la pordon. Atendante sian amikinon en la korto, Kujen tiras ŝian manon kaj flustras al ŝi en la orelon:

— Nu, ĉu vi ricevas ian novaĵon, Ka My?

— Ne.

— La malamikoj sin preparas por baldaŭa rabirado. Plej baldaŭ, oni diskonigos tion per voĉtubo al la logantoj. Svarmas soldatoj en Tri Ton. Siaflanke, niaj gerilanoj estas jam batalpretaj. Mi ĵus iris starigi bambupikilojn.

Ka My iom ĉagreniĝas:

— Kial vi ne prenis min kun vi?

— Ne maltrankviliĝu, oni konfidos al vi komision... Ĉi foje, oni intencas loki vin en la laŭleĝan luktogrupon. Laŭ la famdiroj, Xam troviĝas ankaŭ en Tri Ton.

— Tion mi jam scias!

Kujen mildvoĉe murmuras:

— Ka My, se la malamikoj venos ĉi tien, ni batalos kontraŭ ili, ne nur per pafiloj, grenadoj, sed ankaŭ per niaj politikaj luktoj; ni devos helpi niajn gerilanojn. Via agado ankoraŭ ne estas malsekretigita; cetere, ili domaĝas vin pro tio, ke vi estas la fratino de Xam. Do, provpenu zorgi pri la interliga kaj provizada servo...

— Ne,— insistas Ka My,— lasu min iri kaŝloki la grenadojn!

— Tiun taskon oni jam konfidas al alia kamarado.

— Konsentite! Kujen.— Diras Ka My post momenta pripenso. — Vere... mi ne volas renkonti ilin. Ili tute tedegas min!

Ĉirkaŭbrakante la kolon al sia amikino, Kujen intime klarigas:

— Neniu volas renkontiĝi kun ili. Sed la revolucio postulas, ke vi tiel faru. Nu, niaj aktivuloj jam rekomendas, ke vi estu singarda, pacienca, ke vi prove regu

vian koleron, se ili incitus vin, ke en okazo de bezono, vi uzu mildajn parolojn, eĉ kantu la amkanton «Sakeo». Tiel konduti vi devos! Sendube, vi jam bone komprenas. Mi tute fidas al vi, Ka My!

Ka My, kunpremas siajn lipojn kaj forte balancas sian kapon en la mallumo. Poste ŝi abrupte brakumas sian amikinon, superŝutante ŝin per bruaj kisoj, antaŭ ol lasi ŝin foriri.

3

Tiam, la pordo de la domo de sinjoro Tu Deŭn estas jam zorge fermita. Ngan kaj du anoj el lia grupo, Trong kaj Toi, estas surmetantaj la «commando»-uniformon. Surhavinte oficiran kostumon kun galono de subleŭtenanto, Ngan kapvestas sin per «barem»-kasketo. Siaflanke, Toi kaj Trong ankaŭ jam finas sian alivestadon.

— Vidu, ĉu ni jam similas al ili?

— Tute samaspektaj! — Diras Nam Tan — Nepre Ba Fi enfalos en la reton!

Toi kaj Trong traŝultre portas po unu «Thompson»-on. Ngan elingigas sian «Colt 12», demetas ĝian kartoĉobendon kaj ŝutas la kartoĉojn sur sian manplaton. Trovante, ke mankas neniu el ĝiaj ok kartoĉoj, li enŝovas la kartoĉobendon en la pistolon kaj remetas tiun lastan en ĝian ingon. Nam Tan ne portas pafilon,

sed ĉe lia flanko pendas unu brila spado, al kiu estas ligita unu striita skarpo.

— Ni ekiru! — Ordonas Ngan.

La kvar personoj malfermas la pordon kaj eliras el la domo. Per unu vojiro, ili forlasas la vilaĝeton Van Thanh, trapasante la rizkampojn. Alveninte proksime de la vilaĝeto Van Hiep, Nam Tan petas siajn kunirantojn halti kaj li sole iras kaŝobservi la situacion. Iun momenton poste, Nam Tan revenas kaj mallaŭte diras:

— Nenio danĝera. Ni ekiru!

La kvar homoj daŭrigas sian vojon. Nam Tan kondukas siajn kamaradojn al la riverbordo. Malproksime, antaŭ ili, jam aperas la lumo el la fiŝejo de Ba Fi. La rivero enverŝiĝas en la maron muĝante ĉe ĉiuj akvokirloj. La rapida akvofluo vibrigas la bluan lanternon, pendigitan ĉe la meza fosto de la fiŝejo. Nam Tan basvoĉe rimarkigas:

— Ĉi nokte, la fiŝejo ne estas fermita. Ordinare, kiam la fiŝejo estas fermita, ĉe iu el ĝiaj fostoj pendas ruĝa lanterno.

La blua lanterno malklare lumigas spacon da torente fluanta rivero. Iom post iom, klare aperas la fiŝejo. Oni nomas tiun lokon fiŝejo. Reale, ĝi estas nur domo, konstruita sur dikaj fostoj kaj antaŭeniĝanta en la riveron. Interne de la domo briletas lumo de petrollampo. Ju pli la kvar homoj proksimiĝas al la fiŝejo, des pli klare ili sentas la naŭzan odoron de fiŝoj kaj krustacoj, tiun de salo kaj tiun de maceritaj manioko-ŝeloj, unuvorte ĉiujn odorojn aparte proprajn al iu ajn fiŝejo. Nam Tan flustras al Ngan en la orelon:

— Li estas hejme!

— Bone, lasu nin eniri. Vi restu ĉi tie!

Ĉe tiuj vortoj, Ngan, Toi kaj Trong akcelas siajn paŝojn. Kutimiĝinte agadi en danĝeraj lokoj, Ngan senhezite direktas sin al la pordo. Lin premsekvas Toi kaj Trong. Ngan haltas ĉe la pordo kaj strečas siajn orelojn. El interne de la domo, aŭdiĝas mallaŭta zumado de konversacioj. Li provpenas aŭskulti, sed vane. Li brue frapas sur la foliokovritan pordoklapon. Tuj ĉesas ĉiuj homvoĉoj. Denove Ngan frapas sur la pordon kaj basvoĉe vokas:

— Ĉu sinjoro Ba estas hejme?

Kompleta silento! Baldaŭ, el interne de la domo subite leviĝas klara kaj trankvila voĉo:

— Kiu estas tie?

— Jen estas ni, malfermu al ni la pordon!

Ngan ekaŭdas bruojn de sandaloj, kiuj treniĝas sur la lignoplanko en direkto al la pordo. Tuj sekvas la grincado de riglilo. Duone malfermiĝas la pordo. Inter la pordoklapoj, ekaperas pufvanga virino, alte tenante unu botellampon ĉe la mano. Ŝi eklevas siajn lancoformajn okulojn por rigardi al sia petanto. Ngan ankoraŭ ne renkontis ŝin, tamen li estas certa, ke ŝi estas la edzino de la fiŝejestro.

— Ĉu sinjoro Ba estas hejme? — Li demandas.

Ekbrilas ŝiaj lancoformaj okuloj.

— Jes, jes, eniru, mi petas!

Ngan eklevas sian manon al la buŝo por fari signon al ŝi, ke ŝi mallaŭte parolu.

La virinaĉo sin metas flanken por enlasi la viron; Toi kaj Trong postiras lin. Ngan flegme fermas la pordoklapon per sia kalkanumo.

Ĝuste tiam, la kurteno de la maldekstra ĉambro ekmoviĝetas kaj el ĝi elŝoviĝas brile kalva kapo. Tio estas ĉirkaŭ kvindekjara viro, vestita per kamizolo, kun malsaneca dikkorpo kaj du okuloj, kiuj ĉe la unua ekrigardo aperas tute malviglaj, kiel tiuj de ĵus vekiĝinta homo. Ngan kapsalutas lin:

— Ĉu vi estas sinjoro Ba Fi?

— Jes, sinjoro! — Respondas la fiviro, iom kurbante sian dorson, kun ambaŭ manoj plektitaj sùr la brusto.

Rimarkante lian humilan teniĝon, Ngan antaŭvidas, ke la afero ĉe la komenco jam glate iras.

— Mi volas interparoli kun vi pri iu afero. — Li diras — Permesu, ke mi min prezentu al vi: mi estas subleŭtenanto el la roto de sinjoro Xam. Li sendas min ĉi tien por intervidiĝi kun vi...

Ngan perfingre montras en direkto al la posta flanko de la domo:

— Ni ĵus venis de la militsektoro...

— Tion mi jam scias, bone scias... Eniru ĉi tien, mi petas!

Ĉe tiuj vortoj, li levas la kurtenon. Ngan enpaŝas en lian ĉambron. Ĝi estas vasta, kun ĉe la mezo unu brile glata kanapo kaj ĉe la fundo unu granda lito, super kiu ankoraŭ malleviĝas kulovualo. La tri homoj eksidas sur la kanapon. Ngan rapide ĉirkaŭrigardas la ĉambron, poste sin turnas al Ba Fi:

— Vere vi tre komforte vivas tie ĉi! Niaflanke, ni neniel povas apetite manĝi, nek trankvile dormi, kiel

vi. Nuntempe, la Vjetkongoj grandskale semas teruron en la regiono.

La fiŝejestro respektege respondas :

— Jes, sinjoro subleŭtenanto, tion mi ankaŭ bone scias. Ĉi vespere, mi estas informita pri via alveno. Mi kaj mia edzino tre ĝojas pri tio. Ni ambaŭ senpacience vin atendis, atendadis...

Tion dirinte, li turnas sin al sia edzino:

— Nu, vi iru boligi akvon.

Poste, Ba Fi levante siajn okulojn perfingre montras eksteren :

— Viaj soldatoj tranoktas subĉiele,ĉu ne ?

— Jes.

— Dio mia ! Tion mi tute ne scias ; vi ĉiuj ja alvenis inkognite !

Poste, kunpremante siajn dentojn, li insultas :

— Fi ! Ĉi foje, ili ĉiuj revidus siajn prapatrojn ! Ĉi tie, la Vjetkongoj tute libere agadas, sinjoro subleŭtenanto. Kiu aktivulo aŭ kiu aktivulino estas influhava, mi ja tre bone konas. Mi montros al vi ilin, por ke vi paffaligu ilin, kiel tiujn « monjak » - ojn *.

Ngan kapjesas :

— Ĝuste, pro tiu afero, mi volas intervidiĝi kun vi !

— Bone, bone !

Tion dirinte, Ba Fi etpaŝe iras al la bretaro, pendigita ĉe la muro, poste revenas tenante per ambaŭ manoj unu

---

* Monjak : birdo el fam. de paseroj, kiun oni facile paffaligas.

pleton el ebone nigra «trak»-ligno, sur kiu kuśas unu teservico el porcelano, ornamita per ruĝaj drako-desegnaĵoj kaj unu paketo da virginiaj cigaredoj «Rugby». Li elpakas la cigaredojn kaj respektege invitas la tri homojn fumi poste li iras al la kuirejo por vidi, ĉu jam bolas la akvo. Ngan prenas unu cigaredon kaj frapetas ĝin sur la ungon de sia dikfingro. Lokmetinte la bolkruĉon sur la fornon, la edzino de Ba Fi iras sidi apud Ngan kaj duonfermante siajn okulojn, ŝi demandas:

— Ĉu vi restadas longatempe ĉi tie?

— Longatempe!— Respondas Ngan—Kio okazas do?

La lancoformaj okuloj de la virinaĉo flirteme palpebrumas:

— Ĉu vi volas gustumi iom da kontrabanda alkoholo?

Aŭdante ŝian demandon, Ngan ekpensas: «Ne decas rifuzi ŝian inviton». Li tuj okulumas kaj ridas al ŝi, batante la takton per sia piedo.

— Ĉu estas omaroj kaj kraboj?

— Bedaŭrinde, hodiaŭ ni ne havas freŝajn omarojn kaj krabojn, sed nur sekigitajn kankrojn. Aŭ vi manĝos anassupon? Ni havas junajn kaj tre grasajn anasojn.

Poste, ne atendante la respondon de Ngan, ŝi tuj retune iras al la kuirejo por ordoni al sia edzo:

— He, karulo mia, iru kapti anasojn, du anasojn...

— Bone! Mi tuj faros tion. — Respondas la edzo, blovekscitante la fajron en la kuirejo. — La akvo jam bolas, preparu teon por sinjoro subleŭtenanto kaj liaj kunirantoj.

Li eliras kun la bolkruĉo, verŝas la bolantan akvon en teujon kaj, post momento, plenigas la tasojn per varma teo. Frotante siajn grasdikajn manojn, unu

sur alia, li invitas siajn gastojn trinki. Li ankaŭ urĝe glutas unu tason kaj brue elspiras poste, suprenfaldinte la krurumojn de sia pantalono, li eltiras el sub la planko kelkajn arbotrunketojn kaj malsupreniras la ŝtuparon. « Koak ! Koak ! » aŭdiĝas krioj de anasoj. Sidante sur la kanapo kun la tetaso en la mano, Ngan rigardas malsupren kaj vidas la blankaĉan dorson de la fiŝejestro : tiu lasta estas blindpalpe provanta kapti la anasojn. Lia troa fervoro nur indignigas niajn gerilanojn. Ngan diras al si en la pensoj : « Tiu kanajlo vere estas servopreta lakeo de la malamiko ».

La anasoj kriegas kaj senorde diskuras sub la planko. La edzino de Ba Fi kaŭriĝas supre, tenante inter siaj lipoj kelkajn kokosligilojn. Ĉiufoje kiam la fiŝejestro sukcesas kapti unu anason, la virinaĉo tuj prenas ĝin ĉe ambaŭ plektitaj flugiloj kaj ligas ĝiajn piedojn, antaŭ ol ĵeti ĝin sur la plankon.

Finkaptinte la anasojn, Ba Fi haste iras al la rivero por sin bani. Poste, li revenas malantaŭ la domon, kaj brue tralavas sin per pura akvo. Li surmetas buntan « sa-rong » * - on, kiu susuras ĉe ĉiu paŝo kaj eliras el sia ĉambro, kombante al si la kalvan kapon, sur kiu restas nur eta hartufo, algluiĝanta al la nuko. Ngan svingante sian manon vokas lin :

— He, sinjoro Ba, por ne vane perdi la tempon, ni pridiskutu la aferon, antaŭ ol preni supon.

— Jes, sinjoro !

— Ĉu vi posedas la mapon de tiu regiono ?

---

* Sa-rong : larĝa ŝtofpeco kovranta la malsupran parton de la korpo, kiel jupo.

Senresponde, la fiŝejestro eniras sian ĉambron. Iun momenton poste, li revenas, tenante inter ambaŭ fingroj unu sekan bambutubon. Li sidiĝas sur la kanapon, metas sur siajn krurojn la bambutubon kaj eltiras el ĝi unu paperrulon kun la grandeco de bambuvergeto. Ngan ekprenas la paperon kaj tuj malvolvas ĝin sur la kanapo. Toi kaj Trong viglamove metas la tetasojn sur la kvar angulojn de la mapo por malhelpi ĝin revoliĝi. Sur la paŭspapero, vidiĝas bluaj strekoj mallerte desegnitaj per globkrajono, sed kun multaj detaloj: jen domoj, fruktoĝardenoj kaj spiralaj cirkloj, kiuj devas esti, laŭ la konjekto de Ngan, tiuj «hon»-montetoj. Krom tio, li neniel povas kompreni la enhavon de la mapo.

La fiŝejestro subite ekrigardas lin. Poste, li maltrankvile direktas siajn okulojn al la pordo jam de longe zorge fermita.

— Ne timu! — diras Ngan, — Ekstere, estas neniu alia, krom miaj soldatoj. Parolu, mi volonte aŭskultas vin. Sendube, vi jam scias, ke morgaŭ ni venos al Hon Dat...

— Tion mi bone scias.

La fiŝejestro basvoĉe respondas, poste suprenfaldas kaj firme streĉas la «sa-rong»-on sur sia ventro. Iom klinante sin antaŭen, li irigas tien kaj reen sur la mapo sian montrofingron, kies longa ungo estas brunigita de cigaredfumo.

— Jen la lokoj, markitaj per ruĝaj krucsignoj, estas loĝejoj de la Vjetkongoj. Ne forgesu, sinjoro subleŭtenanto!

— Bone!..., lokoj markitaj per ruĝaj krucsignoj, — ripetas Ngan.

La fiŝejestro denove montras sur la mapo per sia dikfingro, kies ungo estas same malpura, kiel tiu de la montrofingro.

— Ĉe tiu loko troviĝas unu konstruejo, kie ili memfabrikas fusilojn. Mi foje raportis pri tio al la superuloj. Niaj aviadiloj jam bombis kaj incendiis la arbaron. Sed ili sukcesis ĝustatempe evakui sian armilfabrikejon. Kaj tie ĉi estas la Hon-kaverno, tre danĝera! Dum la lasta disraba operacio, ili fuĝis en la kavernon, kaj ni jam perdis multajn soldatojn, atakante ĝin. Nun por venki niajn kontraŭulojn, ni devas bari la vojon al la kaverno.

Aŭskultante la fiŝejestron, Ngan diras al si en la pensoj : « Vere danĝera fidenuncisto! Bone, mi batmortigos vin, kiel hundaĉon! »

Poste, li atendas, ĝis la kanajlo finmontras ĉion necesan, antaŭ ol revolvi la mapon kaj redoni ĝin al li, manbatetante lian ŝultron:

— Sufiĉe. Bone, tre bone!... Ĉi foje, se ni sukcesus en nia batalo, vi nepre ricevus grandan rekompencon.

Sin turnante al la kuirejo, Ngan ĝoje demandas :

— Nu, sinjorino, ĉu vi jam finpreparas la manĝon?

— Jes, jes, jam estas pretaj la rostitaj tripoj!

Ĉe tiuj vortoj, la virinaĉo brue skrapas la fundon de la kaserolo per kuleregо. Kaj tuj baldaŭ, ŝi anaspaŝe alportas ĉe ambaŭ manoj unu pladon plenan de anastripoj, rostitaj kun bulboj. La fiŝejestro proksimigas sian nazon al la rostaĵo snufante poste li senbrue englitas en la ĉambron iun momenton, antaŭ ol eliri, kunportante unu grandan botelon da brando « Blua

Drako » sub sia akselo kaj kvar glasetojn inter siaj fingroj.

Li venigas la faŭkon de la botelo al sia buŝo kaj prove malkorkas ĝin per siaj dentoj. Aŭdiĝas siblo tra la korkoŝelo el ruĝa plasto. Ngan preterfluge ĵetas siajn okulojn al la plado de rostitaj anastripoj poste, fikse rigardante al la fiŝejestro en la vizaĝon, demandas :

— Nu, ĉu vi jam gustumis homkarnon ?

Iom abrupta estas la demando. Ba Fi remetas la botelon sur la kanapon kaj rigardas al Ngan, kapskuante :

— Ho, sinjoro subleŭtenanto, tian manĝaĵon mi ja neniam aŭdacis gustumi. Mi aŭdas, ke pluraj elinter vi trovas ĝin bongusta. Mi, mi iom timas...

Ngan ekridas kaj duonŝercante plue demandas :

— Ĉu tiun profesion de denuncistaĉo vi ne timas ?

— Tute ne, sinjoro subleŭtenanto ! Plej grave estas, ke oni estu prudenta : mi ne estas stultulo, mi nenion timas...

Ĉe tiuj vortoj, la fiŝejestro plektas ambaŭ manojn antaŭ sia ventro, proksimigas sian buŝon al la orelo de Ngan kaj flustre demandas :

— Sinjoro subleŭtenanto, ĉu vi jam gustumas tiun manĝaĵon ?

— Kiun manĝaĵon ?

— La karnon, la homkarnon !

— Ha...

Turnante sian rigardon al Toi kaj Trong, Ngan diras:

— Tiuj du soldatoj jam gustumas ĝin. Miaflanke, ne. Ja, ne mankas homkarno, sed mi ne manĝas... Mi

preferas nur homan hepaton... kaj ŝatas ankaŭ galon. La homa galo miksita kun alkoholo konsistigas drogon, kiu preventas la tuberkulozon.

Tion dirinte, li denove demandas la fiŝejestron :

— Ĉu viaflanke, vi aŭdacus manĝi homkarnon supoze, ke vi havus ĝin ĉi tie ?

La kanajlo silentas. Iun momenton poste, li skuas sian kalvan kapon, ridaĉante :

— Vere, ĝi naŭzas min... Sed, supoze, ke mi havus iom de tiu manĝaĵo, mi provpenus gustumi ĝin por vidi, ĉu reale ĝi estas bongusta, kiel oni diras.

— Bone, morgaŭ mi donos al vi kelkajn kilogramojn de tiu karno. Nepre, vi havos ĝin morgaŭ.

Poste, ŝajnigante kvazaŭ li ekmemoras ion, Ngan subite demandas :

— Ha, mi preskaŭ forgesas... viajn kunlaborantojn ! Kie ili troviĝas ?

— Miaj dungitoj por fiŝkaptado, ĉu ne ?

Ngan kapskuas.

Ba Fi tuj komprenas sian interparolanton kaj diras :

— A ha ! mi kunlaboras kun neniu. Mi timas kune agi kun pluraj homoj. Mi kaj mia edzino sufiĉas !

« Jam estas tempo meti finon al tiu komedio ! ». Ekpensas Ngan.

Ĝi ja plene sufiĉas por igi lian koron boli de kolero. Li tuj faras okulsignojn al Toi kaj Trong kaj manbatetas la ŝultron de la fiŝejestro, tiam sin respekte klinanta por verŝi brandon en la glasetojn :

— Sufiĉe ! Ne plu verŝu, neniu trinkas !

Ĉe tiuj vortoj, Ngan subite ekleviĝas kaj laŭtigas sian voĉon :

— Forprenu ĉion ĉi ! Mi sciigas al vi, ke mi ne estas via subleŭtenanto. Ni estas batalantoj de la revoluciaj armitaj fortoj. Ni venas por vin aresti. Komprenite ?

Tuj kiam Ngan komencas paroli, Toi jam celdirektas la kanontubon de sia « Thompson » al la brusto de la fiŝejestro. La kanajlo etendas siajn brakojn, kriante :

— He, he ! Ne ŝercu !

— Ni ne ŝercas !

Ngan tuj prenas ŝnuron kaj streĉe katenas lin, dum Trong pene trenas lian edzinon el interne de la kuirejo. Baldaŭ, la afero klariĝas ; ambaŭ geedzoj tute paliĝas de teruro. Kvankam Ba Fi ankoraŭ ne trinkas eĉ unu guton da brando, liaj okuloj tamen fariĝas ruĝaj, kiel sango, liaj brakoj konvulsie tremas sub la ŝnurligiloj, dum lia edzino larĝe malfermas siajn mirkonsternitajn kaj timoplenajn okulojn, kies pupiloj kvazaŭ komplete senmoviĝas.

4

Estas jam malfrua nokto, kiam la tri homoj eskortas la geedzojn Ba Fi ĝis la ekstremo de la vilaĝeto Van Thanh. Nam Tan komisias du gerilanojn por konduki ilin al Hon Dat. Post ŝanĝo de siaj vestoj, Ngan, Toi kaj Trong penetras kun Nam Tan en la ĝardenon, kie estas pretigita la batalpozicio.

Tiu ĝardeno estas limnajbara al vastaj rizkampoj, de Tri Ton ĝis la regiono Hon Dat. Por ataki tiun lastaŋ, la malamiko devas unue trapasi tiun lokon.

Apenaŭ penetrinte en la ĝardenon, la kvar homoj tuj renkontas sian amikon Ba Ren.

— Ĉu vi sukcesis aresti ilin? — Demandas tiu lasta.

— Oni jam kondukas ilin al Hon Dat, — respondas Nam Tan.

— Ĉiuj rakontas al Ba Ren, kiel oni arestis la fiŝejestron kaj lian edzinon. Tute ravita, Ba Ren eksplodas per ridoj.

— Rigardu tien, niaj amikoj estas fosantaj batal-tranĉeojn por la venonta batalo. — Li diras, montrante per la fingro, en direkto al la interno de la ĝardeno. — Sinjoro Tam Ĉan ĵus venis kun ordono, ke oni devas fosi bataltranĉeojn por ĉiu trihoma grupo. Oni fosas truojn individuajn, sed pogrupe kolektitajn. Li diris, ke ni ne povus batali, se ni ne havus tranĉeojn ĉe la ĝardeno. Kaj li ankaŭ minace avertis, ke se ili ne estus fositaj, li ne permesus al ni batali.

— Kie estas li?

— Li revenis hejmen kun Hai Thep kaj li ankaŭ ordonis al fraŭlino Nam Njo kaj al la knabo Ziep returne iri al la vilaĝo. Sinjoro Tam Ĉan estas ordinare bonhumura; sed kiam li estas okupita pri ia afero, mi tre timas lin!

Tion dirinte, Ba Ren ekprenas sian «botellampon» kaj kondukas la kvar homojn al la ĝardenrando.

— Sekvu min, — li rekomendas, — gardu vin, ke vi ne enfalu en foskaptilojn.

Nam Tan estas sperta vojulo, li konas ĉiujn lokojn, kie troviĝas foskaptiloj. Ngan sola ne bone konas la vojon ; tial li devos premsekvi ĉiujn paŝojn de Ba Ren. Ili trairas la ĝardenon, kie dense kreskas la «mang kaŭ»-arboj, kies maturaj fruktoj tre agrable odoras. De tempo al tempo defalas, kun obtuza bruo, unu maturiĝinta frukto, tute proksime.

— Ĉi tie, oni ne timas malsaton, batalante kontraŭ la malamiko,— diras Ngan.— En kriza momento, oni povas preni tiujn «mang kaŭ»-fruktojn, kiel nutraĵojn.

— Sed tiuj «mang kaŭ»-fruktoj ofte kaŭzas al mi misdigeston. Ilin mi ne ŝatas. Se mi malsatas, mi serĉas maturajn bananojn. Ili estas pli bonaj.

Ba Ren ekridas :

— Vere, vi trofrue zorgas pri via stomako ! Miaflanke, mi timas nur, ke al miaj «eksmodaj» fusiloj grave mankas kartoĉoj, kaj mi ne scias, ĉu tiuj «Ĉielaj Ĉevaloj» povas kraĉi kuglojn !

— Ili ja bone funkcias dum pafprovoj ; sed mi ne scias, ĉu ili estas same efikaj dum batalo.

— Nepre, ili bone funkcios... Jes, vere al vi mankas kartoĉoj. Al nia grupo restas ankaŭ tre malmulte... Tial, ni devas ŝpari ĉiun nian kuglon.

— Hai Thep kaj Tam Ĉan jam rekomendas, ke ni restu ĉi tie kaj provpenu konsumi la malamikajn fortojn. Nur en plej malbona okazo, ni retiriĝu en la kavernon.

Ngan balancas la kapon :

— Ili ja pravas. Jes, ni fuĝos en la kavernon, nur kiam ni estos tute senhelpaj. Ni povos resti en ĝi kaj

samfoje batali kontraŭ la malamikoj. Laŭ mia opinio, sufiĉas, ke ni postenigu unu kamaradon ĉe la kaverna faŭko kun unu martelo kaj ili ne povus facile penetri en nian rifuĝejon. Ni frakasos la kranion al tiu, kiu aŭdacos eniri.

— Tion mi vidis antaŭ vi kaj tiu kvarangula bastono estas por ni pli taŭga. Per unu flanka bato de tiu peza kvarangula bastono, vi povas renversi iun ajn riskemulon!

La kvin homoj babilante iras kaj, iun momenton poste, ili jam vidas fajrolumon flagreti sub la branĉoj de « mang kaŭ »-arboj.

Kiam ili alvenas, iliaj kamaradoj estas ankoraŭ absorbataj per terfosado. La nove fositaj individuaj truoj estas vicigitaj laŭlonge de la ĝardenrando. Ĉe la branĉoj de « mang kaŭ »-arboj pendas botellampoj, ŝirmataj per peco da bananfolio tiel, ke la lumo ne povas esti sendita sur la rizejojn.

Ngan iras ekzameni ĉiun truon kaj, en la fundo de sia koro, li tre dankas kamaradon Tam Ĉan, kiu jam zorge gvidas la fosadon de tiuj ŝirmejoj. En la batalo, Ngan bone komprenas la valoron de la bataltranĉeo. Ĝi estas nepre bezona por la ofensivo same kiel por malforta homo, kiu devas fronti kontraŭ la malamikon, dotitan per potencaj armiloj. Oni fosis ankaŭ por Ngan unu individuan truon. Tham, vicestro de la propaganda taĉmento, montras ĝin al li, dirante:

— Jen por vi tiu truo!

Ngan tuj saltas en ĝin por ekzameno. Li vokas la gerilanon Toi, petante tiun lastan alporti al li lian « Mas 36 ». Starante en la truo, Ngan apogas sian fusilon

sur la ŝultron kaj provas celi al iu imaga trafotaĵo. Li faras plurajn provojn, antaŭ ol mallevi sian fusilon kaj transdoni ĝin al Toi. Poste li ekprenas unu ŝovelilon kaj forigas per ĝi iom da tero ĉe la faŭko. Li ja trovas tiun lastan ankoraŭ alta kaj ne taŭga por staranta pafanto. Kiam la tertavolo ĉe la supro de la individua truo estas malaltigita, li forĵetas la ŝovelilon, reprenas sian fusilon el la manoj de Toi kaj denove provas celi... Ĉi foje, li mienas kontente, apogas siajn manojn sur la rando de la truo kaj saltas eksteren. Trovante, ke Ngan jam zorgege kontrolas sian ŝirmejon, Toi eksentas maltrankvilon. Li ankaŭ urĝe revenas al sia truo por ĝin ekzameni.

Kiam ĉiuj pretigaĵoj por la batalo estas finfaritaj, Ngan ordonas :

— La gardodeĵorantoj revenu al sia pozicio! La ceteraj ŝirkolektu foliojn por kamufli siajn bataltranĉeojn, poste iru dormi! Jam estas malfrua nokto...

Aŭdiĝas ies voĉo en la mallumo :

— Jes, mi devas dormi iun momenton. Ĉiufoje kiam okazis disrabaj operacioj, mi estis ĉiam tre dormema!

— Mi estas dormema, nur kiam mi rifuĝas en ŝirmejo, — diras Ba Ren.— Sed, en plena batalo, mi neniam emas dormi. Mi sciigas al vi, ke morgaŭ, mi nepre funkciigos tiun «Ĉielan Ĉevalon»! Jam de pluraj monatoj, Hai Ka Tren kaj mi tiom multe zorgis pri ĝi.

— Sed, kamaradoj,— rimarkas Ngan,— pretigu viajn krurojn por plejeble rapide forporti vian «Ĉielan Ĉevalon», se vi volus pafi... Kun tiuspeca fusilo, vi devas pafi tute proksime. Vi vane perdus viajn kuglojn, se vi pafus malproksime!

La gerilano kun tiu kromnomo « Hai Ka Tren » tuj levas sian voĉon :

— Mi certe atendos, ĝis la malamikoj troviĝos je du paŝoj for de mi por pafi. Fidu al miaj vortoj, kamaradoj !

Baldaŭ, oni venigas branĉojn kaj foliojn por kamufli la bataltranĉeojn. Ĉie, leviĝas konfuzaj babiladoj. Ĉiuj estas entuziasmaj, kvankam ili scias, ke morgaŭ multnombre venos iliaj kontraŭuloj. Ŝajnas, ke ili tute preteratentas tiun malamikan soldatkvanton de ĉirkaŭ mil homoj. Ili trovas, ke la batalo estas same necesa, kiel la vivo kaj ili estas firme konvinkitaj, ke ili povas mortigi la malamikojn, pli malpli multe. Kaj ĉiufoje kiam ili sukcesas ekstermi unu malamikon, ilia koro estas iagrade malpezigita, liberigita el tiu doloriga rememoro pri tiom da kamaradoj sovaĝe masakritaj dum la mallumaj jaroj de mizero. Post la « komuna popolleviĝo », klarvidebliĝas, ke ĉiuj volas vengi sin mem kaj siajn samlandanojn ; kvankam al ili mankas armiloj, ili tamen firme kredas, ke la malamiko ne povas plu subpremi ilin, kiel en la pasinteco. Nun, fakto estas, ke se la malamiko pafas kontraŭ ili, ili tuj rebatas ankaŭ per pafoj. La morto estos ambaŭflanka. Ĝuste pro tio, ĝi estas nun multe pli signifa, kompare kun antaŭe kaj la sinofero dum la batalo, laŭ ilia opinio, estas ĉiam necesa, sed ĝi estas pli malofta, ol tiu, kiun ili spertis sen ia plendo, en la laŭdire pacaj jaroj, dum kiuj la malamiko ne ĉesis ataki ilin.

La gerilanoj etendas siajn « nop »*-sakojn ĉe la piedoj de « mang kaŭ » - arboj. Hai Ka Tren jam enŝoviĝas

---

* nop : speco de junka sako, en kiun la malriĉulo enŝoviĝas nokte por dormi. Tiu « nop »-sako ŝirmas lin kontraŭ moskitoj.

en la sian, sed ĉiam babiladas. Tham preparas sian matracon kaj invitas sian amikon Ngan kuŝi kun li. Kun krucitaj kruroj, Ngan sidas sur la matraco, malŝargas la kartoĉobendon de sia « Colt 12 » kaj gardas nur tri kartoĉojn. El la rezervitaj kartoĉobendoj, li ankaŭ eltiras ĉiujn kartoĉojn. Poste, li vokas la knabegon Trong kaj montras al li la amason da 12-milimetraj kartoĉoj sur la matraco :

— Distribuu ankoraŭ tiujn kartoĉojn al la tri « Thompson »-oj. Mi gardas por mi nur tri.

Trong tute ĝojas ricevi pliajn kartoĉojn. Li demetas la ĉapelon de sia kapo kaj ŝutas ilin en ĝin. Ngan ankoraŭfoje ekzamenas la kartoĉojn de sia « Mas » kaj brue funkciigas ĝian kulason, antaŭ ol trankvile meti la fusilon apud si. Kvankam li jam disponas pri sia « Colt 12 », tamen li kutime uzas tiun « Mas » dum batalo. Li tre lerte pafas per tiu fusilo kaj ofte diras :

— La moskedoj, fabrikitaj de la Francoj, prezentas ankoraŭ neperfektaĵojn, sed iliaj « Mas 36 » sufiĉe bone funkcias. Mi pafas tre « trafe » per ĝi.

Ngan sterniĝas sur la matraco. Lia dorso tuŝas tiun de Tham. Iun momenton poste, ambaŭ dorsoj varmiĝas. Tham estas du, tri jarojn pli juna, ol Ngan, sed ambaŭ tute familiare interrilatas. Tham devenas de etburĝa familio ; li estas tiu, kiu respondecas pri la redaktado de propagandartikoloj adresitaj al la malamikaj soldatoj de la posteno. Li estas homo kulturita, sed malparolema. Liaj gepatroj partoprenis en la unua rezistado. Antaŭ la pacrestariĝo, lia patro estis mortigita de la malamiko kaj lia patrino, arestita kaj ekzilita al la

insulo Pulo Kondoro. Iufoje, li jam konfidencis al Ngan :

— Mia panjo estis tre bonkora. Ŝi estis iam instruistino. Mi foje lernis en ŝia klaso kaj rimarkis, ke ŝi sin montris al mi ĉiam pli severa, ol al aliaj lernantoj. Ŝi estis graveda, kiam la malamiko arestis ŝin. Laŭdire, la novnaskito mortis en la prizono Ĉi Hoa. Tiujn lastajn jarojn, ŝi estas ekzilita al Pulo-Kondoro. Oni ne scias, kio jam okazas al ŝi !...

Kuŝante sur la matraco, kun dorso apogita sur tiu de Tham, Ngan diras al si en la pensoj : « Sendube, ĉiunokte, Tham tre timas, ke li neniam plu renkontos sian karegan patrinon ». Tiun timzorgon Ngan ja tute ne havas.

Jam de siaj plej infanaj jaroj, Ngan estis senpatrina orfo. Tio, kion li ankoraŭ memortenas pri sia patrino, estas nur penigaj trajtoj, kiel ekzemple, tiu ŝirita jako, kiu bone malbone kovris ŝian talion, tiuj ŝvitogutoj, kiuj ĉiuvespere gluis ŝiajn kapharojn al la tempioj, tiuj korboj plenplenaj de varoj, kiujn ŝi urĝe vektoportis al la bazaro.

Subite Tham demandas :

— Ĉu hodiaŭ vi jam renkontas vian amatinon ĉe ŝia patrino ?

— Certe ! — Ngan ekridas kaj, farante momentan paŭzon, daŭrigas :

— Vidante min surmeti vian jakon, Kujen volis scii, de kiu mi jam pruntis ĝin.

— Ĉu ŝi demandis vin, al kiu vi jam donis vian kostumon ?

— Jes, mi diris, ke mi estis doninta ĝin al vi. Ŝi ridis. Antaŭmomente, ŝi insiste petis, ke oni permesu al ŝi veni ĉi tien ; sed niaj kamaradoj rifuzis...

Ngan silentas iun momenton, antaŭ ol aldoni :

— Laŭ la konfesoj de la fiŝejestro, certe morgaŭ matene, la kanajloj okazigos disrabajn operaciojn ĉi tie. Ni iru do ripozi por havi la forton rezisti kontraŭ ili.

Ĉe tiuj vortoj, li kuntiriĝe kuŝas, kvazaŭ kankro, ĉirkaŭbrakante la torson de Tham. Iun momenton poste, il jam brue ronkadas.

Tham vekas lin antaŭ la mateniĝo. Ĉiuj elsakigas sian hieraŭ vespere ne finmanĝitan rizon. Ili apenaŭ glutas kelkajn rizbulojn, kiam Ba Ren kun pezaj paŝoj alkuras, kriante :

— Tuj iru al via ŝirmejo. Nia skoltogrupo ĵus revenis kaj sciigis al ni, ke la malamikaj trupoj jam atingis Hon Sok !

Ngan saltleviĝas kun sia fusilo kaj kuras al sia ŝirmejo. Trong kaj Tham ankaŭ postkuras lin.

Starante en sia truo, Ngan maĉas rizon kaj diras :

— Finmanĝu nian rizon. Ili ankoraŭ ne alvenas.

Komplete tagiĝas, post kiam ĉiuj finmanĝas. Tiam, sur la senŝirma kampo, jam vidiĝas la malamikaj soldatoj, kiuj per transversa vico venas de Hon Sok. Ili svarmas, formante larĝajn nigrajn makulojn sur la kampo, kie brilas kelkaj unuaj sunradioj. Ngan levas sian manon por ŝirmi la okulojn kaj diras :

-- Vere multnombraj ! — Poste, sekvante la soldatojn per la okuloj, li aldonas : Kiel aroganta irmaniero !

Poste, li sin turnas al Tham:

-- Transdiru al niaj kamaradoj, ke ili restu trankvilaj... Atendu, ĝis ili penetros en la kaptilkampon meze de l'rizejoj, antaŭ ol pafi. Pafu tiel, ke ili glitfalos en foskaptilojn.

Ba Ren dorskurbe venas malantaŭ Ngan kaj demandas:

— Nu, ĉu ili povas malkovri la kaptilkampon?

— Tre lerte kamuflita! Ba Ren, ne forgesu rekomendi al niaj kamaradoj, ke spite ĉion, ili ne elsaltu el sia individua truo. Ili forlasu sian pozicion nur post ordono.

— Do, — diras Ba Ren, — via grupo retiriĝos la unua, kiam ni ricevos la ordonon.

— Ne, ni retiriĝos la lasta. Via grupo, kiu konas la vojon iru la unua. Kiam vi trovos la retiriĝon necesa, vi nur retiriĝu! Ni sekvos vin baldaŭ. Kaj nun, lasu min pafi la unua!

— Jes! sed, kiam estos ordono, vi devos retiriĝi la unua. Mi sendos homon por vojgvidi vin. Mia grupo retiriĝos la lasta por protekti la arieron.

«Protekti la arieron», tiujn vortojn, kun aplombo diras Ba Ren, kvazaŭ li havas sufiĉe da forto por bari la vojon al milo da malamikaj soldatoj. Poste, denove kun pezaj paŝoj, li foriras. Nun, li jam demetas sian jakon kaj nodligas ĝin ĉirkaŭ sia kapo. Rigardante al la larĝa kaj muskolforta dorso de Ba Ren, kiu malaperas malantaŭ la foliaro de la «mang kaŭ»-arboj, Ngan kontente ridetas. Neniam li trovas sian kamaradon tiel fervora. Eĉ kiam per martelo li forĝis la

feron en forĝejo, Ba Ren ne montris sin tiel vigle agema. Ngan memoras ankoraŭ tiun epokon, kiam rifuĝante en la veprejo, Ba Ren ĉiumomente petis, ke oni permesu al li pafi kontraŭ la vilaĝaj sekurecaj agentoj kaj memdefendaj grupoj. Li tute ne aprobis tiun politiklinion de paca lukto, pri kiu oni volis konvinki lin... Foje, li jam metis sian moskedon antaŭ Hai Thep, dirante: «Hodiaŭ, funde pripensinte, mi permesas al mi redoni mian pafilon al la Partio». Hai Thep rigardis lin, tute mirigita.

— Veron mi diras! — Trankvile daŭrigis Ba Ren. — Mi jam tute vane gardas la pafilon; tial mi volas redoni ĝin al vi. Se, malbonŝance, mi renkontus la malamikojn, mi pugno- kaj piedbatus ilin aŭ mordus la kolon al kelkaj kanajloj, poste, morton mi volonte akceptus!

Li diris tiujn lastajn vortojn «mi volonte akceptus» per tono, kiu kvazaŭ sonis tute amare.

Hai Thep ankaŭ ne estis facile timigebla:

— Redoni vian pafilon al la Partio estas oponi la politiklinion de la Partio. Tio signifas ankoraŭ, ke vi volas vin disigi de la Partio, ĉu ne?

Trovante, ke Hai Thep akcentis la vortojn «vin disigi de la Partio», Ba Ren tute maltrankviliĝis. Hai Thep bone sciis, ke lia kamarado tre timis pri tio; tial li jam martelis tiujn vortojn. Fine, li ekstaris:

— Bone, mi faros raporton al sinjoro Tam Ĉan!

Tute konfuzita, Ba Ren rebate diris:

— He, ne faru falsan raporton, mi petas! Mi redonas al vi mian pafilon kaj vi ne akceptas ĝin. Ĉu tio estas raportinda?

Hai Thep foriris senresponde. Renkontante sian kamaradon Ngan, li ridis kaj rakontis al li la okazaĵon. Li ankaŭ raportis nenion al Tam Ĉan. Finfine, Ba Ren ĉiam gardis sian pafilon « Lebel ». Du monatojn poste, la Partio ordonis la komunan armitan popolleviĝon, Ba Ren revenis la vilaĝeton kun sia pafilo « Lebel » kaj, kune kun la vilaĝanoj, atakis kaj neniigis la postenon Hon Dat.

Nun, kiam oni diskutas pri evakuado, Ba Ren ankaŭ admonas la grupon de Ngan retiriĝi la unua. En la batalo, Ngan bone komprenas, pli ol iu ajn, la situacion de tiu, kiu retiriĝos la lasta. Kaj ne ĉiuj povus retiriĝi la lastaj kaj facile diri : « Lasu min protekti la arieron ! » kiel Ba Ren.

Antaŭ la okuloj de Ngan, jam klare aperas la irmaniero de ĉiu malamika soldato. Ĉefvice, kuras kun fusilo prete tenata en la manoj la « commando »-oj vestitaj per striita kostumo. Dum la atendo, Ngan trovas, ke la tempo tre malrapide fluas kaj, ke la atmosfero ĉirkaŭ li estas premsufoka. Kvankam li jam pli ol unufoje alfrontas la morton, lia koro tamen forte batadas. Sed, li nur emociiĝas kaj tute ne timas, precipe kiam li havas pafilon en la mano. Antaŭe, kiam ambaŭ liaj manoj estis streĉe katenitaj, li ankoraŭ povis piedfrapi la malamikon kaj sukcesis forkuri ; des pli prave, li sentas sin firmdecida, nun kiam li havas pafilon kaj kunbatalantojn ĉe sia flanko.

Plie, li fidas al la kaptilkampo.

Jen la kanajloj preskaŭ atingas tiun kaptilkampon. Ili kuras en tiun senkreskaĵan rizparcelon, tute similan al la ceteraj, kiuj kviete etendiĝas sub la varmetaj

radioj de la matena suno. Sed ankoraŭ neniu el ili enfalas en la foskaptilojn. La soldatoj, vestitaj per striita kostumo, fervore antaŭenmarŝas, kvazaŭ ili ĉiuj volas penetri la unuaj en tiun fruktoplenan « mang kaŭ » - ĝardenon.

Ngan retenas sian spiradon, delikate apogante la kolbon de sia pafilo sur la ŝultron.

La soldatoj troviĝas nur ĉirkaŭ ducent metrojn malproksime de la ĝardenrando. « Nun, se mi pafas, — Ngan diras al si en la pensoj, — ili ne povas ĝustatempe reveni al sia pozicio ». Tiel pensante, li celdirelktas sian pafilon al la plej altstatura el la kanajloj kaj premas la pafrisorton.

Aŭdiĝas eksplodbruo.

De ĉiuj bataltrancĉeoj ankaŭ dense pafas niaj gerilanoj.

Ngan rigardas returne ; li ne trovas plu la altstaturan soldaton. Surprizitaj per furioza pafado, la ceteraj, kiuj troviĝas sur la kampo senorde forkuras. Subite, Ngan vidas kelkajn el ili glitfali kaj malaperi sub la tero. Sole, iliaj brakoj agitiĝas en la aero kun pafiloj.

— Ili jam enfalas en foskaptilojn. — Krias niaj gerilanoj.

— Ankoraŭ aliaj !

Vera paniko inter la soldatoj. Ju pli ili senorde forkuras, des pli ili enfalas en foskaptilojn. Ili baldaŭ sterniĝas sur la kampo, volante nek antaŭeniri nek retropaŝi. Tiuj, kiuj restas lastvice fine rekonsciiĝas. Ili direktas sian maŝinpafilon al la ĝardeno kaj furioze pafas. Kun obtuza bruo, defalas la « mang kaŭ »-fruktoj. Unu arbobranĉo, fortranĉita de la kugloj, falas sur la ŝultron de Ngan. Li tuj forĵetas ĝin kaj ekstaras.

Trovante, ke la malamikoj ankoraŭ senmove kuŝas sur la kaptilkampo, li laŭtvoĉe diras:

— Ne plu pafu, kamaradoj, atendu, ĝis ili leviĝas kaj antaŭeniras, antaŭ ol pafi!

Ja, kuŝinte senmove iun momenton, nun ili prove leviĝas kaj avancas. Ĉi foje, tiuj, kiuj iras lastvice forte kriegas, dum tiuj, kiuj devas malfermi la vojon tre malrapide paŝas. Ĉe la grupo de Ba Ren, aŭdiĝas sinsekve kelkaj pafoj de «Lebel», tute similaj al tiuj de mitralo. Malordo tuj regas inter la soldatoj. Da ili iu nombro denove enfalas en foskaptilojn kaj malaperas sub la tero. Sed ĉi foje, pluraj «commando»-oj sukcesas antaŭeniri sufiĉe longan distancon. Spite densajn pafojn, ili ĉiam dorskurbe kuras, sekvataj de aliaj kanajloj. Baldaŭ ili unuvice formas longan kolonon kaj sukcesas preterpasi la duan kaptilkampon. Ngan trovas, ke se oni lasus ilin tiel libere avanci, ili povus atingi lian batalpozicion post kelkaj minutoj. Li tuj elsaltas el sia individua truo, sagrapide kuras ĝuste antaŭ la avanco de la malamikoj kaj sterniĝas sur la tero, celdirektante sian fusilon al ili. Li atendas, ĝis tri, kvar soldatoj pogrupe kolektiĝas, antaŭ ol pafi. Du «commando»-oj estas tiel traboritaj per unu el liaj kugloj; la dua tuj renversfalas, dum la unua subite haltas, maltenas sian fusilon, iom klinas sin malantaŭen, poste ŝancelpaŝe subfleksiĝas.

Nun, la malamikoj antaŭeniras pli facile tie, kie ne instaliĝas foskaptiloj. Ili lokmetas siajn haŭbizojn meze de l' rizejoj kaj komencas pafi al la ĝardenoj. La obusoj siblas en la aero, antaŭ ol eksplodi, elradikigante plurajn «mang kaŭ» - arbojn kaj estigante amasojn da nigra fumnubo.

Ngan pafas ankoraŭ kelkajn kuglojn kaj kriegas :

— Pretigu vin por la retreto !

Poste, li sin turnas al iu gerilano :

— Gvidu la retrcton de niaj kamaradoj !

La tuta grupo de Ngan postkuras tiun gerilanon ; Ba Ren ne forgesas doni al ĝi la lastajn rekomendojn :

— Kiam vi atingos la internan ĝardenon, restu tie kaj atendu nian grupon !

— Do, vi ankoraŭ ne retiriĝu ?

— Mi ? Mi tuj baldaŭ venos tien.

Ba Ren diras tion, sed restas ĉiam sur sia pozicio. Ngan traŝoviĝas tra kelkaj « mang kaŭ »- arboj kaj, kiam li sin turnas posten, li vidas sian kamaradon Ba Ren, kun kelkaj aliaj gerilanoj, dorskurbe transporti du « Ĉielajn Ĉevalojn » kaj kuri en direkto al la malamikoj. Ngan tute maltrankviliĝas. Rigardante al la groteska « Ĉiela Ĉevalo », li tre kompatas sian amikon Ba Ren kaj aliajn gerilanojn.

Alveninte al la kanalo ĉe la interna ĝardeno, Ngan kaj liaj kamaradoj sin kaŝas tie. La malamikaj soldatoj laŭ tri direktoj invadas la ĝardenon. Fronte al la grupo de Ngan, ili spertas ok bataletojn. Neatendite, Tham estas trafita ĉe la kruro per unu obusfragmento de haŭbizo, kiam li transsaltas iun taluson. Liaj kamaradoj tuj levas lin de la tero kaj urĝe forportas lin aliloken. Dume, la soldatoj kriegante travadas la kanalon. Antaŭ ilia furioza atako kaj perdante el la vido la grupon de Ba Ren, Ngan unuflanke ordonas al unu el siaj kunbatalantoj dorsoporti la vunditon al la vojo kaj aliflanke, kune kun la ceteraj gerilanoj de sia

grupo pafas por protekti la arieron, antaŭ ol retiriĝi. Survoje al Hon Dat, li kurante vidas sur la sablo longajn postsignojn de sangogutoj. « Jen la sango de Tham ! » — Li murmuras. Kaj ĝuste antaŭ li, Toi pene kuras kun Tham sur la dorso. Ambaŭ pendantaj piedoj de tiu lasta preskaŭ tuŝas la teron. Lia maldekstra gambo jam estas vindita per striita tuko. Ngan provpenas kuratingi la vunditon, krie demandante :

— Tham, Tham, ĉu vi doloras ?

— Iom paralizita. — Respondas la vundito, ridetante.

Ngan trovas lian vizaĝon palaĉa. La sangelfluo estas vere terura : ĝi komplete malsekigas la vindon kaj konstante gutas el la kalkano de Tham. Ĉiu sangoguto, apenaŭ falinta, estas tuj sorbigita de la sablo kaj prenas malhelan koloron, kiel tiun de feroksido. Ngan iom maltrankviliĝas, sed li ĉiam ridas, dirante :

— Provpenu elteni la doloron ankoraŭ iun momenton. Kiam ni atingos la kavernon, mi diros al Nam-Njo, ke ŝi bandaĝu vian vundon. Ŝiaj karesaj manoj nepre mildigos vian doloron !

Tham ekridetas kaj restas senvorte.

Ĝis nun, Toi konstante dorsoportas sian vunditan kamaradon. Lackonsumita, li brue anhelas. Trong tuj venas por anstataŭi lin. Kun fusilo sub la brako, Ngan iras apude, turnante de tempo al tempo sian kapon en direkto al la ĝardenoj por vidi, ĉu jam retiriĝas la grupo de Ba Ren. Tie malproksime, seninterrompe kraketas pafiloj. Subite, pum ! pum ! aŭdiĝas du eksplodbruoj, malpli grandaj, ol tiuj de grenadoj aŭ obusoj de haŭbizo-61. Baldaŭ, al la ĝardenoj sinsekve kuras homsiluetoj.

— Jen forkuras Ba Ren kaj liaj kamaradoj!— Krias kelkaj batalantoj el la grupo de Ngan.

— Ha, kiel urĝe ili forkuras! Sendube, ili estas preme persekutataj de la malamikoj.

— Certe, niaj kontraŭuloj jam okupas la ĝardenojn.

— Nia grupo ankaŭ rapidu! — Ordonas Ngan. — Sole, Trong, kiu devas dorsoporti nian kamaradon Tham povas kuri malpli rapide. Lasu min akompani lin. Kiam li estos laca, mi anstataŭos lin...

Ngan kaj Trong malrapide kuras; tial, ilin baldaŭ reatingas la ceteraj gerilanoj. Ngan ekvidas la knabeton Be,— filon de onklo Tu Raŭ,— ŝancelpaŝe iri, subtenatan de siaj kunirantoj. La maldekstra maniko de lia jako, balanciĝe pendas, tute ŝirita.

— Trafita de obussplito, ĉu ne? — Ektremante demandas Ngan.

Be kapbalancas.

Intertempe, Ba Ren dorskurbe kuras en direkto al Ngan, kun la «Ĉiela Ĉevalo» sur la ŝultro.

— Ĉu vi aŭdis eksplodbruojn el mia «Ĉiela Ĉevalo»?—Li laŭtvoĉe demandas.

— Jes,— respondas Ngan.

— Hai Ka Tren kaj mi pafis po unu kuglon. Kaj tre proksime de la malamikaj soldatoj!

Poste, eklevante sian brakon, Ba Ren daŭrigas:

— Ili ĉiuj sin ĵetis ventraltere. Tuj baldaŭ, trovante, ke tio ne glate iris, Hai Ka Tren kaj mi dorsoportis la pafilojn kaj forkuris, dum ili pluvigis sur nin densajn kuglojn.

— Nun, kion ni devas fari?—Demandas Ngan.

— Ni retiriĝu en la kavernon !

Ĉiuj kuras rekte al la Hon-monteto, jam staranta ĝuste antaŭ ili. Preskaŭ atingante la kavernon, Ngan subite ekvidas, malantaŭ vico da kokosujoj, iun virinon haste kuri kontraŭdirekte al li. Li streĉas la okulojn kaj tuj rekonas, ke ŝi estas Nam Njo. Ŝi kuras, kun flirtantaj kapharoj. Alveninte antaŭ niaj gerilanoj, ŝi preskaŭ senspiriĝas kaj ŝia vizaĝo estas tute pala. Ŝi tuj proksimiĝas al Trong, tiam dorsoportanta la malfeliĉan Tham kaj urĝpaŝe postiras lin. Dumvoje, ŝi demetas sian koltukon kaj prove viŝas per ĝi la sangoplenan kruron de la vundito. Sed vane, ĉiam gute falas la sango. Tute ekscitite, Nam Njo eksplodas per larmoj.

— Nam Njo, vi estas vere plorema ! — Rimarkas Ngan.— Li ne povas morti !

Kaj Ngan rigardas la junulinon, dirante al si en la pensoj : « Nun, malaperas ĉia sekshontemo ! Jen ŝi estas tute embarasita ! Tamen, antaŭe kiam oni parolis al ŝi pri Tham, ŝi ĉiam afektis seriozan sintenadon kaj montris sin elektema. Vere, ŝi jam amas la knabegon ». Rigardante tiun zorgoplenan mienon de Nam Njo, Ngan subite sin demandas, ĉu Kujen ankaŭ plorus, se li estus vundita. Kaj li tute plezuriĝas, ekpensante, ke Kujen same embarasiĝus, se lin trafus io bedaŭrinda.

Ĉapitro III

1

Unu horon, post kiam ĉiuj gerilanoj retiriĝas en la kavernon, la malamikoj jam invadas la tutan vilaĝeton Hon Dat.

Starante kun siaj kunbatalantoj sur la Hon-deklivo, dense kovrita per jakvujoj kaj laktoarboj, Hai Thep vidas la soldatojn svarmi en la vilaĝeto. Iliaj siluetoj duone aperas malantaŭ laŭboj de jakvujoj, mangostanoj, « lekima »-arboj. Kelkaj jam haste surgrimpas kokosujojn. Aŭdiĝas iliaj konfuzaj babiladoj kaj kriegoj. En la frumatena sunlumo ruĝkolore bananta ĉiujn fruktĝardenojn, la vilaĝeto Hon Dat tute vigliĝas per tiuj malamikaj kriegoj, pafbruoj, sonoraj kokerikoj kaj lamentaj bovblekoj. La soldatoj, vestitaj per striita kostumo kaj sidantaj ĉe la piedoj de kokosujoj, strange similas al arbustotufoj. Oni povas distingi ilin, nur kiam ili moviĝas, ĉu por leviĝi, ĉu por cirkuli.

Iu grupo ŝarĝoplene transportas marmitojn kaj kaserolojn, ĵus forprenitajn al la loĝantoj, dum alia, ĉirkaŭ unu sekcio, amase iras al la torento.

Tiu ĉi torento, serpentumanta ĉirkaŭ Hon Dat, nomiĝas « Suoi Luon » aŭ « Angiltorento ». Ĝi estas tiel nomita pro tio, ke en ĝia fundo de longe vivas paro da tre grandaj blankaj angiloj, kiujn kapti ĝis nun neniu aŭdacas, precipe de post kiam la kmera maljunulo Suon venis tien por prove ĉasi tiujn bestojn. Li ne nur perdis ĉiujn siajn fiŝhokojn fortranĉitajn de ili, sed ankaŭ malsaniĝis post tiu aventuro kaj suferis dum tri, kvar monatoj.

Oni ne povus kredi al la rakonto pri la maljunulo Suon, sed la paro da angiloj reale ekzistas kaj Suoi Luon vere estas bona torento, kiu jam de generacioj provizadas la tutan vilaĝanaron de Hon Dat per pura akvo.

... La malamikoj komencas starigi fostojn kaj kvar, kvin grandajn tendojn el ŝirmotukego, laŭlonge de la torenta bordo.

Maltrankvila, Hai Thep diras al Ngan :

— Tiu kanajlaro ŝajne volas kampadi longatempe tie ĉi. Vidu, ili jam okupas la torenton !

— Hm ! Ili jam okupas la torenton ! — Grumblas Ngan.

— Tio povus kaŭzi al ni multajn malfacilaĵojn.

— Ŝajnas, ke ni havas provizon da akvo en la kaverno.

— Jes, sed mi timas, ke ĝi ne sufiĉus, se tiu situacio daŭrus ankoraŭ kelkajn tagojn.

Hai Thep ĉiam atente rigardas malsupren al la vilaĝeto :

Ju pli oni penetras profunden en la kavernon, des pli ĝi fariĝas hela. La ŝtonblokoj amasigitaj ĉe la kaverna volbo havas plurajn interspacetojn, tra kiuj filtriĝas la lumo el ekstere. Sed tiu lumo ne estas abunda; ĝi sufiĉas nur por krei tiun duonombron, en kiu oni havas tian senton, kvazaŭ preskaŭ finiĝus la nokto kaj ekmateniĝus. Ĝi estus tiu unua lumeto de la antaŭtagiĝo, dum ankoraŭ ne komplete forvaporiĝus la nokta mallumo. En la kaverno regas aparta viveco, iom mistika kun senbruaj paŝoj, varmetaj voĉoj kaj ridoj, kaj ĉiuj estaĵoj povas malklare rekoni unu la alian nur per sia silueto.

Kiam estas homo kaj spiro, voĉo kaj paŝbruo, la kaverno tuj aliiĝas; apenaŭ enirante en ĝin, Ngan tuj rekonas la voĉon de Kujen, kiu mallaŭte lin vokas, kvankam li trovas ĝin tute fremda. Li haltas, ankoraŭ ne vidas ŝin, kiam ambaŭ ŝiaj manoj, ja tre konataj kaj agrable freŝaj, streĉe premas la liajn. Ŝi konvulsie palpas lian korpon, de la nuko ĝis la dorso, kvazaŭ volante scii, ĉu vere Ngan estas ankoraŭ sendifekta.

— Ni jam sukcesplene faligas ilin en niajn foskaptilojn, ĉu ne? — Flustre demandas Kujen. — Antaŭmomente, malgraŭ mia insista peto, niaj kamaradoj ne permesis al mi iri al tiu loko. Tiel, lastatempe, mi jam vane penadis en pafekzercoj. Laŭdire, ili spertis gravajn perdojn: ĉirkaŭ kvindek mortintojn kaj vunditojn, ĉu ne? Ĉielo! Franjo Su, la etulino Thuji kaj mi tre klare vidis, starante sur la Hon-deklivo. Vera ĝuo por la okuloj!

— Kie estas nun Su kaj Thuji? — Demandas Ngan.

Kujen ne respondas kaj kuras serĉi sian fratinon. Baldaŭ, Ngan vidas etan silueton rapide sin ĵeti sur lin.

— Onĉjo Ut! Onĉjo Ut! — Ĝojkrias la etulino Thuji.

— Kial vi ankaŭ eniras ĉi tien? Estas danĝere!

Tion dirante, Ngan ambaŭmane levas la knabineton en la aeron.

— Ŝi sekvis min de la mateno! — Diras Su. — Malgraŭ miaj konsiloj, ŝi ne volis resti hejme kun sia avino... Kaj nun, kiel fari por revenigi ŝin hejmen... Ĉu vi vidas nun la danĝeron, Thuji?

— Mi ne revenas hejmen. Mi restas en la kaverno por amuziĝi kun vi.

Poste, la etulino sin turnas al Ngan:

— Mi tre ĝojas vivi ĉi tie kun vi, onĉjo Ut! Antaŭmomente, ĉu vi mortigis multajn soldatojn el la kliko Usono-Dziem? Mi jam brue aplaŭdis; sendube, vi ne aŭdis...

Thuji estas ja babilema. Ŝi ĝojas petoli inter la brakoj de Ngan. Ŝajnas, ke ŝi sentas grandan plezuron resti en la kaverno. Tie, ĉiuj ŝin dorlotas; ĉiuj rekonas kaj vokas ŝin per ŝia nomo, ĉiufoje kiam ŝi erarvagas...

— Ngan, — demandas Su, — ĉu antaŭmomente vi vidis ion en la vilaĝeto, rigardante de sur la Hondeklivo?

— Tre klare, franjo. Ili jam invadis la tutan vilaĝeton. Ili multnombre venis, kunportante marmitojn kaj kaserolojn. Ili ankaŭ okupis la Angiltorenton. Ŝajnas, ke ili intencas kampadi tie...

— Ho ve! — Pretervole krias Kujen, timzorga.

Kaj ŝi flustre diras al Ngan:

— En la kaverno, ni havas akvon, sed tre malmulte. Ĉi matene, franjo Su kaj mi jam kontrolis la disponeblajn kruĉojn kaj trovis, ke naŭ el ili havis neniun akveron.

— Kial?

— Tiuj argilaj kruĉoj estas jam tro kadukaj; tial la akvo tragutas tra ilia ĉirkaŭvando. Kune kun franjo Su kaj Nam Njo, mi kunportis ilin al la torento por ĉerpi akvon. Post trifoja akvoĉerpado, ni povis ree plenigi tiujn naŭ kruĉojn. Bedaŭrinde, Nam Njo jam lasis fali la lastan, kiu tuj disrompiĝis, ĝuste kiam nin trafis la novaĵo pri la vundiĝo de kamarado Tham.

— Do, kiom da kruĉoj restas nun al ni entute?

— Ok kruĉoj, sed ni estas multnombraj...

— Bone!... Nu, kie estas nun niaj vunditoj, Tham kaj la knabeto Be?

— Tie! — Fingremontras Kujen en direkkto al la kaverna fundo.

— Kaj la geedzoj Ba Fi?

— Katenigitaj en profunda kavaĵo. La edzino senĉese ploris.

Kune kun Kujen, Ngan iras viziti la vunditojn. Thuji ankaŭ sekvas ilin.

— Be estas vere kompatinda! — Murmuras Kujen.— Li ankaŭ estas trafita de obussplitoj, kiel Tham. Sendube, la kanajloj jam trafe pafis, ĉu ne?

Ngan kapbalancas, dum Kujen aldonas;

— Nam Njo kaj mi ĵus lavis kaj bandaĝis la vundojn al ambaŭ homoj. Mi trovas, ke la vundo ĉe la brako

de Be estas ekstreme grava, sed tiu ĉe la suro de Tham ne estas zorgiga...

— Ne zorgiga ! — Diras Ngan — Kaj tamen, iu jam ploris pro tio !

— Kiu ploris ? Nam Njo, ĉu ne ? — Post momenta paŭzo, Kujen mallaŭte daŭrigas : — Jes, ŝi ploris, ĉar ŝi amas lin !

— Ŝi amas lin ! Kial antaŭe, ŝi ne malkaŝis tion al li ? Ŝi ĉiam silentis... kaj nun...

— Ĉu oni devas malkaŝi sian amon, kiam oni amas ? Tham sola kulpis, ĉar li neniam malfermis sian koron al ŝi. Kompreneble, Nam Njo ne aŭdacis la unua malsekretigi sian amon al li.

Kun plej natura tono, Ngan rimarkas :

— Viaflanke, kial tiutempe vi aŭdacis fari al mi viajn konfidencojn ?

— Kiam ? Kiam mi faris tion ?

Kujen subite sin turnas posten, levas sian brakon kaj manbatetas la dorson de Ngan, kiu brue ridas.

Proksimiĝante al iu kaverna angulo, Kujen vokas :

— Nam Njo ! Nam Njo !

— Kujen, ĉu ne ?

Ngan sin pretigas por enpaŝi, kiam li rimarkas, ke Thuji prove eltiras sian etan manon el la lia. Li diras al si en la pensoj : « Certe, la etulino timas ! » Li antaŭenpaŝas kaj trovas sian amikon Tham sidanta sur ebena ŝtonbloko, kun dorso apogita sur la rokmuro kaj la maldekstra kruro duone etendiĝanta antaŭ li. La knabeto Be kuŝas sur mato ; lia vundita maldekstra brako estas metita sur kvaroble falditan striitan

tukon. Nam Njo sidas apud li, svingetante iun tolpecon.

— Ngan, ĉu ne? — Demandas Tham.

— Jes, jen mi! Kia estas via sanstato?

— Nenio grava!...

— Ĉu restas ankoraŭ obussplito en la vundo?

— Ne, mi estas certa, ke la vundo ne plu entenas obusspliton.— Respondas Nam Njo.— Ĝi jam forflugis!

— Jes, vi pravas...

Ngan malkroĉas el sia zono la elektran torĉon kaj direktas ĝian lumfaskon al la kruro de Tham. Nun, Thuji ankaŭ venas por vidi la vundon. Tham tuj ekprenas ŝian manon kaj sidigas ŝin apud li.

La vundo de Tham estas zorge bandaĝita. Ne plu gutas sango. Kiam Ngan klinas sin super lia kruro, Tham mallaŭte diras al *li*:

— Mi bone scias, ke ne gravas mia vundo... La obussplito nur gratvundis mian suron. Sed oni devas multe zorgi pri Be. Lia brako estas grave ŝirvundita. La knabeto estas tre brava, li neniam ĝemas!

Ngan venas al Be. Li ŝaltas la elektran torĉon. La ŝirita maniko de la eta vundito, jam zorge tondita, malkovras lian brakon bandaĝitan ĝis la akselo kaj la malhele ruĝan sangon, kiu koaguliĝas sur la pansbendoj. Lia restanta dekstra mano ĉiam streĉe sin krampas al la striita tuko. Liaj okuloj komplete fermiĝas kaj el lia buŝo eliĝas malforta spiro. Lia vizaĝhaŭto iom paliĝas, sed liaj lipoj restas ĉiam freŝruĝaj, duone malfermitaj. En tia kuŝanta pozicio, li aspektas, kiel dormanto kaj ne kiel vundito. Ŝajnas, ke sur tiu juneca

mieno povus vidiĝi ne doloro, sed nur ĝojridoj, kiuj ankoraŭ longdaŭras post tiuj tagoj, kiam li petolis kun sia frateto Ut sur la strando aŭ, kiam kun sia patro li suprentiris al lia barko fiŝplenajn retojn. Li estas ankoraŭ tro juna. Vidante tiujn fermitajn okulojn, tiujn freŝruĝajn kaj duone malfermitajn lipojn, Ngan havas tian senton, kvazaŭ lia koro estus forte premata per iu mano kaj post tiu premo, la sango ŝajne bolus en liaj arterioj. Li sentas kapturnon, tuj imagante al si la siluetojn de tiuj soldatoj, kiuj dorskurbe instalas siajn haŭbizojn sur la kampo, — de tiu artileriano, kiu mallerte manipulas aletohavajn obusojn kaj larĝan tripiedon de haŭbizo, similan al piedo de anaso... Tiuj ĉi bildoj premokupas longatempe la spiriton de Ngan. Li leviĝas, nur kiam li aŭdas la voĉon de Hai Thep, kiu vokas lin de antaŭ la kaverno. Li sin turnas al Kujen, tiam rearanĝanta la manikon kaj la vestojn de la knabeto Be :

— Jen oni vokas nin al kunveno! Ni ekiru, Kujen!

La etulino Thuji ĝis tiam kuntiriĝe sidas apud Tham.

— Thuji, — diras Kujen, — restu ĉi tie por amuziĝi kun onnjo Nam Njo kaj aliaj onĉjoj!

— Jes !

Ĉiuj membroj de la Partio estas kunvokitaj. Sed kiam ĉiuj jam venas kaj sidas ĉirkaŭ li, Hai Thep diras :

— Antaŭmomente, mi intencis kunvoki unue la partianojn. Sed, verŝajne, tio estas nenecesa. Nun, ni povas kunvenigi ĉiujn batalantojn, krom tiuj, kiuj devas gardostari aŭ prizorgi la vunditojn. Kion vi opinias pri tio ?

— Konsentite! Ni kunvenigu ĉiujn!

Ba Ren tuj kuras voki la batalantojn.

Hai Thep ekparolas:

— Vi ĉiuj scias, ke ĉi foje la malamikoj entreprenos grandskalan atakon kontraŭ ni. Oni povas diri, ke ĝi estos la plej granda disraba operacio en la provinco. Post kolizio kontraŭ ni en Van Thanh, ili invadis nian vilaĝeton. Antaŭmomente, de sur la Hon-deklivo, ni jam observis ilin kaj rimarkis, ke ili intencas ĉirkaŭsieĝi nian kavernon. Nun, ili okupas la torenton kaj iliaj soldatoj disigas nin de la vilaĝeto. Niaj gvatistoj ĉe la supro de la Hon-monteto sciigas, ke dek surterigaj ŝipoj ĵus ankradis ĉirkaŭ unu kilometron for de la bordo. Ili nepre atakos nian kavernon. Antaŭ tiu situacio, ni devas nin prepari por la defendo...

Hai Thep ankoraŭ ne finparolas, kiam subite aŭdiĝas pluraj eksplodoj, kiuj tuj interrompas lian voĉon. De la kaverna volbo, abunde falas sablopolvo. Ĉiuj eksaltas de surprizo ne sciante, kio okazas. Poste, novaj eksplodoj skuegas la rokojn, kiuj ŝajne preskaŭ disfalos.

— Mi dubas, ke ili pafas per haŭbizoj 81 sur la Hon-dek*li*von.— Diras Ngan.

— *E*ble!

Ba Ren senpolvigante siajn manojn rimarkas:

— Ho! Ĉi tie, ni tute ne timas, eĉ se ili ĵetas tunpezajn bombojn!

Seninterrompaj eksplodoj eĥe resonas tra la kaverno ĉirkaŭ dekkelkajn minutojn. Ĉiuj koleretas, ĉar ili ne

scias, kion volas fari la malamikoj. Sed baldaŭ, Dat kure venas de ekstere kaj laŭte krias :

— Ili furioze kanonpafis sur la Hon-deklivon. La obuseksplodoj faligis ĉiujn arbojn. Mi min kaŝis malantaŭ ŝtonbloko kaj klare aŭdis ilian fajfadon.

— Ĉu jam moviĝas tiuj, kiuj kampadas en la vilaĝeto ? — Demandas Hai Thep.

— Ili pli strečas sian ĉirkaŭsiegon ; densaj vicoj da soldatoj ĉirkaŭ ni, je dekoj da metroj malproksime de la piedo de nia Hon-monteto.

— Kaj proksime de la kaverna faŭko ?

— Ili ankoraŭ ne venas proksime al tiu loko.

— Ili kanonpafas sur la deklivon, certe por prepari la atakon. — Rimarkas Hai Thep. — Mi proponas, ke ni tuj organizu kvar trihomajn grupojn : unu postenigas ekster la kaverna faŭko kaj tri interne. Ni kolektu niajn grenadojn kaj « Thompson » - ojn por tiuj grupoj. Ba Ren kaj Ngan, tuj iru postenigi viajn homojn. La ceteraj, restu ĉi tie ; mi distribuos al ili la taskon.

Ba Ren kaj Ngan ekstaras. Du grupoj da gerilanoj kaj du aliaj el la armita sekcio estas tuj elektitaj. Alveninte al la kaverna faŭko, Ngan diras al Ba Ren, kiu jam prete tenas en la mano sian ĵus elingigitan sabron :

— Kamarado Ba, vi postenigu en tiu rokfendego kaj lasu nin gardostari ekster la kaverno.

— Jes, sed mi rekomendas al vi jene : se vi ne povus rezisti kontraŭ ili, vi nur retiriĝu. Ni prenos sur nin la taskon bari al ili la vojon.

— Konsentite !

Kune kun siaj du grupoj, Ngan laŭiras la koridorojn, antaŭ ol elŝoviĝi el la kaverna faŭko. Li elektas ambaŭflanke plej bone ŝirmatajn ŝtonblokojn. Li respondecas pri unu grupo kaj Toi, pri alia. Tiu lasta ricevas du « Thompson »-ojn kaj sep grenadojn MK3. Al la grupo de Ngan estas distribuitaj unu « Thompson »-o, unu fusilo « Mas » kaj ok grenadoj MK3. Kiam ĉiuj batalpozicioj estas finpretigitaj, Ngan ekvidas la junan Dat urĝpaŝe eliri el la kaverno, ĝoje dirante :

— Onklo Hai ordonas al mi veni ĉi tien kun vi.

— Bone ! Do restu ĉi tie kun ni. Kiom da kartoĉoj entenas via karabeno ?

— Kvardek-kvin !

— Laŭdire, vi tre lerte pafas par karabeno, ĉu ne ?

— Mi pafas sufiĉe bone.— Respondas Dat kun ĝeneca rideto. — Certe, malpli lerte, ol vi !

— Mi uzas nur tiun fusilon « Mas », sed tre malofte karabenon !

— Se vi lerte pafas per via « Mas », nepre vi ankaŭ povas lerte pafi per karabeno. Oni tre facile trafas la celon per karabeno. Cetere, laŭ mia opinio, kian ajn pafilon oni uzas, oni ĉiam trafe pafas, kiam oni gardas flegmon.

Rigardante al la aminda honesta mieno de la junulo, Ngan demandas kun rideto :

— Ĉu vi estas ofte flegma ?

— Ĉiam flegma !

Aŭdante tiun kategorian respondon de Dat, Ngan tuj fidas al lia parolo. Por tiu dekokjara junulo Ngan jam de longe havis simpation. Ĉiufoje kiam li

venis renkonte al kamarado Tam en la distrikto, li rimarkis, ke Dat ofte iris kapti fiŝojn aŭ birdojn. Krom sia rolo de korpogardisto, Dat ankoraŭ klopodis por plibonigi la manĝon de Tam. Li mem jam pli ol unufoje manĝigis al Ngan frititajn fiŝojn kaj rostitajn turtojn. Sed, Ngan plej amas lin precipe pro tio, ke nun li estas orfo. Lia patrino mortis, ĝuste kiam ŝi naskis lin. Lia patro, vilaĝa aktivulo dum la militrezistado, estis arestita en 1958 de la lakeoj de Ngo Dinh Dziem, kiuj rompis al li la kapon, antaŭ ol ĵeti lian kadavron en la arbaron. La ostorestaĵoj de tiu malfeliĉulo kaj de aliaj aktivuloj estas kolektitaj de ambaŭ fratinoj Su kaj Kujen kaj nun konservataj en la kaverno. Dat havas nun, kiel plej proksiman parencon nur sian pli ol sesdekjaran patrinflankan avinon, kiu loĝas en Linh Kujn. Dat faris sin korpogardisto de kamarado Tam jam de du jaroj. Laŭdire, pro neeltenebla sopiro al sia nepo, la maljunulino iam iris de loko al loko por serĉi lin.

— Hieraŭ vespere, vi revenis al Linh Kujn ; ĉu vi jam renkontis vian avinon ? — Demandas Ngan.

— Jes !... Ŝi tre ĝojis kaj ploris, ĉiam palpante mian tutan korpon. Poste, ŝi iris serĉi ĵus maturiĝintajn papajojn por prepari saŭrkraŭton. Mi tre ŝatas manĝi saŭrkraŭton el hakita papajo miksita kun salikokoj. Ĉiufoje kiam mi revenis hejmen, mia patrinflanka avino ĉiam abunde preparis por mi tiun bongustan manĝaĵon, kiun mi ĝissate manĝis...

— Tiun manĝaĵon mi ankaŭ tre ŝatas. — Diras Ngan.

— Mi alportis al vi kvin grapolojn da salikokoj, kiel donacon de mia avino...

Ngan ekmetas la manon sur la karabenon de Dat kaj demandas :

— Ĉu vi jam ŝargas vian pafilon ?

Dat kapjesas :

— Mi ankaŭ jam fermas la sekurbutonon !

— Bone ! Nun, vi iru elekti bone ŝirmatan lokon, kie vi povas facile moviĝi !

Dat atente observas sian lokon, poste diras :

— Mi povas sidi ĉi tie !

La junulo eklevas sian karabenon, direktas ĝian kanontubon al la kaverna faŭko kaj fermas sian maldekstran okulon. Li plurfoje kuntiras siajn palpebrojn poste, lekante al si la lipojn, diras :

— Tie ĉi, tre konvena loko por pafi !

Apoginte la pafilon al sia genuo, li malŝtopas sian ladbotelon kaj trinkas kelkajn glutojn da akvo, antaŭ ol pasigi ĝin al Ngan :

— Vi trinku ?

Ngan montras sian ladbotelon pendantan ĉe lia zono kaj diras :

— Mi ankaŭ havas mian porcion da akvo... — Kaj post momenta paŭzo, li daŭrigas : — Prenu nur etan kvanton, Dat. Vi trinku, nur kiam vi ne povas plu elteni soifon.

Poste, Ngan rekomendas al ĉiuj :

— Ne forgesu, ke ni devas ŝpari akvon. En la kaverno restas al ni tre malmulte da akvo. Kaj tiu seka mangaĵo, same kiel tiu premplatigita glurizo, estas ĉefa nutraĵprovizo de ĉiu. Ne faru al vi plezuron krakmangi ilin, kiam via lango vin jukas !

— Ĉu ni havas ankoraŭ rizon en la kaverno? — Demandas Toi.

— Jes, laŭdire, ni havas ankoraŭ 80 litrojn. Sed tiu kvanto sufiĉas por vivteni nin nur tri ĝis kvar tagojn maksimume.

— Post tri, kvar tagoj, ili jam retiriĝos. Do, estas nenia motivo por timi!

— Tion oni ankoraŭ ne povas aserti... Supoze, ke ili blokadus nin unu semajnon, tiam kiel elturniĝi?

Post tiu demando de Ngan, neniu plu parolas.

Ĉiuj senvorte reatingas sian lokon. Ĉiuj pafiltuboj direktiĝas al la kaverna faŭko. Ngan atente rigardas al vojstreko serpentumanta sur la herbejo, al la senmovaj kokosujoj kun sunbrilaj palmoj. Kaj tra tiu densa foliaro, duonaperas kelkaj grize vestitaj soldatoj, kiuj ire kaj revene dorsoportas neklare videblajn objektojn. Aŭdiĝas la tintado de kaseroloj, la konfuzaj kriegoj, kiuj eĥe resonas de malproksime kaj ankaŭ la obtuza bruo de defalantaj kokosoj.

2

Kujen ŝaltas la elektran torĉon, por ke ŝia fratino Su ree kontrolas la argilajn kruĉojn. Rigardante ŝian manon, kiu palpas ĉiun kruĉon, Kujen maltrankvile demandas:

— Ĉu ankoraŭ tragutas la akvo, franjo?

— Nur iomete... — Kaj Su tuj aldiras: — Vi restu ĉi tie; mi devas iri serĉi mian tukon kaj meti tiujn kruĉojn sur ĝin. Se la akvo ankoraŭ tragutas, ĝi restas sur tiu tuko.

Ĉe tiuj vortoj, Su foriras kaj, post momento, revenas tenante en sia mano larĝan tukon el nilono. Malfaldante ĝin, ŝi diras al Kujen:

— Lumigu al mi!

La elektra torĉo tuj ĵetas sian lumfaskon sur la brunruĝan tukon. Su atente rigardas ĝin, poste diras:

— Bone, neniu truo...

Ŝi etendas la tukon sur plej ebenan lokon kaj metas sur ĝin, unu post alia, ĉiujn kruĉojn sub la lumo de la elektra torĉo. Kiam la ok kruĉoj estas taŭge lokitaj, Su prenas la kvar angulojn de la tuko kaj kunligas ilin per ŝnuro. Post langoklako, ŝi diras:

— Se Nam Njo ne estis tiel malatenta, ni havas nun naŭ akvoplenajn kruĉojn!

Finliginte la tukon el nilono, ŝi leviĝas kaj sin turnas al Kujen:

— Nun, ni iru kontroli niajn rizujojn!

Ambaŭ fratinoj penetras ĝis profunda kaverna angulo ĉe la maldekstra flanko. Subite, el iu dekstra kavaĵo, aŭdiĝas la brua spirado de la fiŝejestro Ba Fi kaj la murmuroj de lia edzino. Aŭdante paŝbruojn, la virinaĉo ĝemplendas:

— Sinjoroj, donu al niaj geedzoj iom da akvo!

Kujen pinĉas la manon al sia fratino:

-- Jen ili petas akvon!

— Pri tio ni devas ankoraŭ konsulti nian kamaradon Hai !

Kujen antaŭenpaŝas kaj laŭtvoĉe demandas :

— Vi petas akvon, ĉu ne ? Atendu !

— Ho ĉielo !... Kiu estas tie ? Fraŭlino Ut Kujen, ĉu ne ? — Krias la edzino de Ba Fi.— Mi genufleksas antaŭ vi por peti vian kompaton, fraŭlino Ut ! Bonvolu interveni por savi nin ambaŭ, pri kio ni profunde dankos vin...

Kujen tute ne atendas, ke tiu virinaĉo povas rekoni ŝian voĉon. Ŝi iom miras samtempe koleretiĝas :

— Vanaj estas viaj genufleksoj. Mi neniel povas interveni. Atendu, ĝis la popolamaso juĝos vin kaj tiam vi estos libera fari iun ajn peton !

La edzino de Ba Fi ektremas de teruro :

— Oni juĝos nin !... Ho ĉielo ! Kiel do ni ambaŭ povus vivi ? Ho ĉielo !

Post tiuj ĝemkrioj, ŝi ploregas. Subite, aŭdiĝas la minaca voĉo de ŝia edzo :

— Silentu ! Mi ordonas al vi silenti !

Aŭdante tion, Kujen diras al si en la pensoj : « Ha ! Tiu kanajlo estas vere obstinega ! Oni vidos, ĝis kiam li povus daŭrigi sian obstinecon !

Ambaŭ fratinoj flankeniras kaj penetras en iun kavaĵon por kontroli la provizon da rizo. Su malfermas unu rizujon, prenas iom da rizo kaj flarante ĝoje diras :

— Ankoraŭ en bona stato ?

Direktante la elektran lumon al du rizplenaj vazoj, Kujen sentas sin iom trankvila. Ŝi murmuras :

— Ĉu ambaŭ vazoj povas enteni tri «gia»*-ojn da rizo?

— Ne tiom!

Elirante el la kavaĵo, Su ankoraŭ maltrankviliĝas:

— Evidente, ni havas rizon; sed, kiamaniere kuiri ĝin? Ni ne povas konsumi tiun provizon da trinkakvo por kuiri rizon.

— Do, kiel fari nuntempe?

— Miaopinie, hodiaŭ ni jam kunportas kuiritan rizon. Sed, morgaŭ, ni devos rosti rizon por niaj kamaradoj; ĉu eble?

— En plej kriza situacio ni devos tiel fari...

Ambaŭ fratinoj revenas al la granda kaverno kaj faras al Hai Thep raporton pri la situacio de la provizo da rizo kaj akvo.

— Tio dependas de vi ambaŭ. — Ridante diras tiu lasta. — Ni kontentiĝu uzante ĉion al ni disponeblan; ja, ni ne povas fari alie!... Sed, malgraŭ ĉio, ni devas rezervi antaŭecon al niaj vunditoj. Al ili ni devas doni rizsupon.

Su kaj Kujen komencas blindpalpe serĉi kelkajn ŝtonojn, kiujn ili transportas al iu kaverna angulo por instali la fajrujon. Tie ĉi jam troviĝas marmitoj, kaseroloj kaj eĉ prete fendita brulligno.

Su ekprenas la fajrilon kaj nur post pluraj krakbruoj de ĝia ŝaltilo, ekaperas fajro. Kujen prenas malgrandan bolpoton kaj iras serĉi rizon por prepari supon. Ŝi sidas

---

* Gia = mezurunuo por grenoj kaj ŝuteblaj materioj = 40 litroj.

apud la fajrujo, premante siajn vangojn per ambaŭ manoj kaj rigardante al la flamoj, kiuj dancas sub la bolpoto. La etulino Thuji jam forlasas la kuŝejon de Tham. Ŝi blindpalpe venas malantaŭ sia onklino kaj ĉirkaŭbrakas ŝian kolon. Kujen etendas siajn manojn posten, kvazaŭ dorsoportante la etulinon.

— Onnjo Ut kuiras rizon por mi, ĉu ne ?— Karesvoĉe demandas Thuji.

Kujen sin turnas posten kun ŝajne riproĉa tono :

— Rizon por vi? Ĉi tie, oni ne havas rizon por vi. Pro kio vi ne restas hejme kun avino. Tio estas rizsupo por onklo Tham kaj onklo Be.

Thuji kontraŭvole ridas sur la kolo de sia onklino.

—Ĉu antaŭmomente, kiam vi sidis apud onklo Tham, vi aŭdis lian ĝemon? — Demandas ŝia patrino Su.

La etulino kapskuas :

– Onklo Tham neniam ĝemis.

Malteninte la kolon de sia onklino, Thuji iras sidi apud sia patrino kaj ameme flustras al ŝi :

-- Panjo, onklo Tham ĵus rakontis al mi tre interesan anekdoton!... Li diras, ke iam antaŭe, estis etulino, filino de iu malriĉa karbisto. Iun tagon, ŝia patrino grave malsaniĝis. Aŭdinte, laŭ la famdiroj, ke en la arbaro kreskis speco de herboj, kiuj povus tre efike kuraci la malsanulinon, ŝi sola tuj iris serĉi tiujn drogherbojn. Kiam ŝi sukcesis ŝirkolekti ilin, ŝi ne plu memoris la returniran vojon. Ŝi vojeraris kaj renkontis iun domon meze de l' arbaro. La dommastrino estis tre riĉa maljunulino. Tiu lasta volis reteni

ŝin hejme, promesis preni ŝin, kiel filinon kaj doni al ŝi oran kolringon kaj multajn bongustajn mangaĵojn... Malgraŭ ĉio, la etulino ne konsentis kaj, ĉiam tenante en la mano la drogherbojn, insiste petis, ke oni montru al ŝi la vojon al ŝia gepatra domo. Baldaŭ, la maljunulino aliformiĝis en belegan feinon...

Kiam la etulino Thuji apenaŭ alvenas al tiuj lastaj vortoj de sia rakonto: «... la maljunulino aliformiĝis en belegan feinon...» kaj, kiam ambaŭ ŝiaj lipoj ankoraŭ vibras pro ĝojo kaj admiro antaŭ la nekomparebla beleco de la feino, tiam subite aŭdiĝas teruraj eksplodbruoj ekster la kaverno. Longajn pafuraganojn de mitraloj sekvas la rapidaj pafoj de «Garrand». Thuji tuj streĉe ĉirkaŭbrakas sian patrinon, dum Kujen haste leviĝas:

— Certe, ili jam atingas la kavernan faŭkon!

— Kial oni aŭdas nur iliajn pafojn kaj ne la niajn? — Rimarkas Su. Ŝin ankoraŭ trafas maltrankvilo, kiam de la kaverno leviĝas mallongaj pafaroj de «Thompson»-oj kaj la unuopaj pafoj de moskedoj kaj karabenoj.

— Jen jam pafas niaj kamaradoj! — Kujen krias kaj baldaŭ kuras eksteren.

— Kujen, Kujen!—Abrupte vokas Su.

Sed Kujen ne sin turnas posten. Ŝi renkontas kamaradon Hai Thep kaj kelkajn gerilanojn ĉe la kaverna koridoro.

— Necese estas postenigi ankoraŭ unu grupon ekster la kaverno.—Diras Hai Thep—. Nu, iru kun mi!

— Mi!

— Mi!

Kujon antaŭenpaŝas, levante sian manon por peti, ke oni permesu al ŝi eliri, sed Hai Thep tuj puŝas ŝin flanken, klo tuto elrevigas ŝin.

Du gerilanoj elpaŝas kaj postiras kamaradon Hai Thep. Montrante sian «Ĉielan Ĉevalon», onklo Tu Nghiep diras:

— Lasu min eliri por doni al ili unu pafon, sinjoro!

— Kie estas la alia fusilo?

— Ĉi tie!

— Kunportu ĝin eksteren!

La grupo de Hai Thep apenaŭ eliras el la kaverna faŭko, kiam aŭdiĝas la ĝojridoj de Ba Ren de malantaŭ iu ŝtonbloko:

— He sinjoroj, vi nur restu en la kaverno por ripozi. Ĉu jam estas via vico gardostari, kiam ankoraŭ ne venas la mia? Ĉiuj soldatoj, kiuj provas proksimiĝi al nia pozicio jam estas paffaligitaj de la grupo de Ngan. Venu ĉi tien, kiu volas vidi! Jen ili ĉiuj amase sterniĝas antaŭ la kaverno!

— Kie, kie?

Ĉiu vete provpenas atingi la ŝtonblokon. Hai Thep rigardas tra rokfendo. Ses kadavroj kuŝas antaŭ la kaverna faŭko. Preskaŭ ĉiuj jam falas dorsen kun fusiloj ĵetitaj ĉe iliaj flankoj. La malamikaj kugloj seninterrompe siblante flugas en direkto al la kaverno. Ĉirkaŭ tiuj kadavroj, ili dense enigas en la teron, estigante etajn flokojn de nigra fumo.

La sunradioj filtriĝas tra la palmoj de kokosujoj kaj la ombro de tiuj lastaj desegnas sur la kadavroj

nigrajn striojn, longajn kaj akrajn, kiel spadoj. La malamikaj kugloj ĉiam furiozas, duontuŝante la ferkaskojn de la mortintaj soldatoj. Ilia nigra kaj oleeca vizaĝhaŭto estigas en ĉies koro senton de naŭzo kaj ĉagreno pro tio, ke jam mortintaj, ili estas ankoraŭ turmentataj per tiuj kugloj, kiuj de tempo al tempo traboras ilian senvivan piedon kaj skuetas ilian kruron.

Hai Thep tute malpacienciĝas rigardante al la usonaj pafiloj, kiuj kuŝas apud la kadavroj, kun ebone nigra kolbo kaj arĝente brila pafiltubo. Al tiuj korpoj ankoraŭ algluiĝas kelkaj « Thompson » - oj kun brunruĝa kolbo kaj kelkaj novaj bluaj kartoĉzonoj. Tiujn armilojn jam de longe revis liaj kamaradoj kaj li mem. Iafoje, ili konsistigis objekton de babilado aŭ diskuto kaj alifoje, ili aperas eĉ en sonĝo. Nun, tiuj usonaj armiloj klare aperas antaŭ liaj okuloj, tiel proksime, ke sufiĉas etendi la manon por povi preni ilin.

Sed la malamikoj senĉese pafas, ĝuste por malhelpi siajn kontraŭulojn eliri el la kaverno por forpreni ilin. Hai Thep senpacience esperas, ke malpliiĝu la malamika pafado. Li pensas, ke sufiĉas momenta pafhalto por povi sin ĵeti eksteren. Sed tiu pafretaro estas ankoraŭ tre densa. Ĉirkaŭ la kaverna faŭko, la kugloj kun sekaj bruoj frapiĝas kontraŭ la rokoj. Baldaŭ, ne povante plu sin regi, li sin turnas al Ba Ren ;

— Ni devas eliri por preni tiujn pafilojn.

Ba Ren kapbalancas.

Ambaŭ homoj traŝoviĝas tra la rokfendegoj por atingi la grupon de Ngan. La kugloj penetras en la kavernon kaj frapiĝas kontraŭ la ŝtonoj, disŝprucigante fajreron. Ili devas laŭiri la ŝtonblokojn, rapide saltante

malantaŭ ili, de unu al alia. Hai Thep proksimiĝaŝ al Ngan kaj demandas :

— Ili tre dense pafas kaj vi ne povas eliri, ĉu ne ?

Ngan kapskuas. Li estas pripensema kun streĉitaj vizaĝtrajtoj. Dume, kaŭre sidiĝante ĉe liaj piedoj, Dat ĉiam grimacas kun insista peto :

— Ĉielo ! Vi nur lasu min rampi eksteren... Mi estas malgranda, iliaj kugloj ne facile trafas min... Nu, lasu min eliri ! Mi rampante eliras, ĉu ne ?

Ĉe tiuj vortoj, la junulo terenkuŝiĝas. Ngan senparole kuntiras siajn brovojn. Dat kredas, ke li konsentas kaj tuj apogas sian maldekstran kubuton sur la teron por prove rampi. Neatendite, Ngan severe alparolas lin, skandante ĉiun vorton :

— Mi ne permesas al vi eliri. Vi ne eliru ! Ĉu vi komprenas ?

Dat ne aŭdacas plu moviĝi. Li preskaŭ ploras, mordante al si la lipojn :

— Vi ne permesas al mi eliri. Sed, nepre baldaŭ, ili venos por repreni ĉiujn armilojn !

Ngan nenion diras. Antaŭmomente, aliaj kamaradoj el lia grupo ankaŭ faris saman peton kaj li jam rifuzis. Li trovis, ke la malamikaj kugloj, tre densaj, povus facile trafi iun ajn riskemulon. Evidente, grandvaloraj estas tiuj usonaj pafiloj kuŝantaj tie ekster la kaverno ; sed interŝanĝi la vivon de kelkaj kamaradoj por tiuj armiloj Ngan ja ne aŭdacis eĉ havi la ideon. Li diris al si en la pensoj : « Tiujn pafilojn oni povus iamaniere akiri, sed unu kamaradon perditan estas neeble retrovi ! » Li ankaŭ havis la intencon mem rampi

eksteren, ĉar li plene fidas al sia lerteco en rampado. Sed, fine, li ankaŭ ne aŭdacis permesi al si fari tion. Li ne timas morti, sed li timas malindan morton. Li komprenas, ke tiu batalo ankoraŭ longe daŭras kaj, ke oni ne senkonscie foroferas siajn batalantojn. Des pli prave, kiam Dat deziris eliri el la kaverno... La koro kaj la konscienco ne permesis al Ngan kontentigi la deziron de la junulo. Dat insistis, ĝis li preskaŭ ploris... Sed, ĝuste pro lia firma decido, Ngan volis lin reteni. «Li estas nur dekokjara! Ne estas permesite lasi lin morti!» Tiel pensis Ngan. Li ankaŭ vidis aperi antaŭ liaj okuloj la arĝente blankan kaphararon de la patrinflanka avino de Dat kaj trovis, ke li ne povis lasi estingiĝi la lastan esperon de tiu sesdekdujara maljunulino.

— Lasu min eliri!

Denove aŭdiĝas ies voĉo, firmdecida. Ĝi estas voĉo de onklo Tu Nghiep. Tion dirinte, tiu kvardekjara gerilano tuj senvestiĝas. Li demetas ankaŭ sian pantalonon kaj portas nur unu kalsonon. Ĉiuj liaj pretigaĵoj kvazaŭ montras, ke li jam faras decidon kaj, ke li estas tre kapabla fari tion.

— He kamaradoj, — li urĝe diras, — kiu havas paraŝutajn ligilojn aŭ aliajn ŝnurojn, pasigu ilin al mi!

— Kion do?

— Mi rampos eksteren kun la ŝnuro kaj ligos unu el ĝiaj ekstremaĵoj al tiuj pafiloj. Viaflanke, en la kaverno, vi nur tiru la alian ekstremaĵon...

Ngan skuas la kapon:

— Atendu, onklo Tu! Ne estas tempo eliri!... Baldaŭ, nepre ili atakos nin... Mi opinias, ke...

Tute malkontenta, Tu Nghiep tuj interrompas lin :

— Se ili atakus nin, ili reprenus ĉiujn siajn pafilojn. Tio signifas do, ke ni perdos ĉion !

— Ne, — respondas Ngan, — se ili atakus, ni rebatus, ĝis ili retiriĝus, kiel antaŭe, ne permesante al ili repreni kaj kadavrojn kaj pafilojn. Kaj mi proponas, ke ĉi foje, kiam ili retiriĝos, ni rapide saltos eksteren por forpreni la pafilojn. Kune kun Toi kaj Trong, mi pafos por vin subteni. Ĉu vi konsentas ?

Hai Thep kapbalancante aprobas la projekton de Ngan. Ĉiuj konsideras ĝin, kiel la plej bonan.

— Ni devos fari tion tre rapide... — Daŭrigas Ngan, — Kaj nun, lasu ilin tute libere pafi ; ni nur ripozu ! Baldaŭ, kiam ili estos repuŝitaj kaj, kiam mi saltos eksteren, vi tuj sekvos min, komprenite ?

— Konsentite !

Tiu « fulmoprojekto » jam heligas la tristan vizaĝon de Dat, dum Tu Nghiep murmuras :

— Bone ! Sed ni devas esti rapidagaj !

Tiel, ĉiuj atendas novan atakon de la malamikoj. La projekto de Ngan estas samtempe riskoplena kaj multpromesa. Tial, ĉiuj estas samfoje emociaj kaj entuziasmaj. Tiam, la malamikoj ĉiam dense pafas al la kaverno. Ngan prenas el sia bela saketo iom da tabako por rulvolvi unu cigaredon. Tiun etan tabakujon Kujen jam propramane faris por li el paraŝuta tolo de lumraketo, kiun ŝi estis trovinta sur la marbordo, post la lastjare okazintaj militmanovroj de la Sudorientazia Agresbloko (S.E.A.T.O.). Ngan rememoras la momenton, kiam Kujen donacis al li tiun tabakujon ; li ĝojkriis :

«Ha, dankon!» Sed, la junulino jam rigardis lin sub la brovoj kaj admonis: «Vi estas fumanto, sed vi havas nenion taŭgan por konservi vian tabakon; ĝuste pro kompato al vi, oni faras tiun saketon!...» Ĉe tiuj vortoj, Kujen pinĉis lian manon, antaŭ ol daŭrigi: «Kaj tio ne signifas, ke mi stimulas vin al plia fumado! Ĉu vi komprenas, sinjoro?» Nun, ĉiufoje kiam li prenas la tabakon el la saketo por rulvolvi unu cigaredon, li denove ridetas, rememorante tiun admonon de sia amatino.

Dum tiuj strečitaj minutoj, tiaj eldiraĵoj ŝajne reaperas pli klare en lia memoro. Kiel lastfoje, kiam li estis arestita: kiam la malamikoj kondukis lin al pafmortigo kaj, kiam li kaŝe preparis sian fuĝon, ĝuste tiam la silueto de Kujen ekaperis antaŭ li por lin kuraĝigi. Li havis ĉiam la impreson, kvazaŭ li ne povus morti, sen ankoraŭfoje renkonti ŝin. Nun la samo okazas. Spite, ke la tuj okazonta batalo estos akra, li ĉiam firme kredas, ke baldaŭ restariĝos la paco, ke certe li revidos la belan ovoforman vizaĝon de Kujen kaj ambaŭ ŝiajn grandajn nigrajn okulojn, ĉiam larĝe malfermitajn kvazaŭ pro surprizo kaj, ke poste, li metos sian mentonon sur tiun brile densan kaphararon ĉiam odorantan tiun parfumon de freŝaj arekfloroj. Sed ĉio ĉi tio reale ankoraŭ ne sufiĉas por revoki en lian memoron la bildon de Kujen. La junulino, kiun li amas ja kolektas en si multajn memorindajn aĵojn. Ŝajnas, ke en Kujen estas ankaŭ tiu dolĉa mangostano, tiuj bambuoj baniĝantaj en flava sunlumo, tiuj malhele verdaj «lekima»-folioj, tiuj karesemaj voĉoj de maljunaj patrinoj kaj ankaŭ tiuj naivaj balbutadoj de beboj. Vere en Kujen, kvazaŭ

estus entenata ĉio ĉi tio. Ankaŭ tiuj susuradoj de kokosarbaro, tiuj bruoj de l' marondoj plaŭdantaj kontraŭ la bordo, tiuj krioj de l' manifestaciantaj homamasoj, tiuj flagrantaj flamoj de torĉoj, tiuj ploroj kaj ĝojridoj. Kujen estas lia amatino samtempe lia kamaradino. Efektive, tiu privata amo jam ligas lin kun io komuna, grandvalora, kiu estas la revolucio, la vivo ĵus reprenita el la manoj de l' malamiko sur tiu apudmara tero.

Forpasis la tempo kaj Ngan sentas, ke ĉiam kreskas lia amo al tiuj surfostaj domoj, al tiuj honestaj kmeraj vilaĝanoj, al tiuj aroj da blankaj cikonioj, kiuj ĉiuvespere revenas al siaj nestoj, ŝvebante super la junulinoj, kiuj iras ĉerpi akvon el la Angiltorento, brue ridante kaj balancante paron da lertmovaj manoj.

Ĉiuj ĉi bildoj nun reaperas tre klaraj kaj tre intimaj en la kapo de Ngan. Sed, ne estas plu tempo perdiĝi en revado. Ngan jam vidas plurajn ferkaskojn elŝoviĝi el la kokosĝardeno. Li tuj forĵetas sian cigaredstumpon kaj enpoŝigante sian tabakujon mallaŭte krias:

— Jen aperas la kanajloj!

Ĉiuj kapbalancas kun fermitaj dentoj. Ngan sin turnas al Dat:

— Ĉu vi jam malfermas la sekurbutonon de via pafilo?

— Jam!

— Mi ripetas: post momento, kiam Toi, Trong kaj mi saltos eksteren, vi ĉiuj tuj sekvos nin, nek frue, nek malfrue, ĉu vi komprenas?

Tion dirante al siaj kamaradoj, Ngan ĉiam preme sekvas per la okuloj la malamikajn soldatojn, kiuj pafante antaŭeniras. Ili dorskurbe iras, tenante sian

pafilon sub la akselo, kaj blinde pafas al la kaverna faŭko. Ili nombras ĉirkaŭ du sekciojn. Ĉefvice estas la «commando»-oj kun arogante spitema mieno. Komence, ili marŝas, poste galope kuras, kiel ĉevaloj. Ngan vidas inter ili nudtorsan viron kun amuletfadenoj kaj iu brila objekto pendantaj sur lia brusto. Ĝuste tiam, Ba Ren ekkrias :

— La kanajlo Xam !

«Ha, ĝuste li !» Ngan jam rekonas lin kaj kuntirante siajn brovojn, li eklevas sian «Thompson»-on kaj premas la pafrisorton. « Pam ! Pam ! Pam ! » Tiu kruelega «commando »-leŭtenanto abrupte haltas, flekssante malsupren sian maldekstran ŝultron, je ĉirkaŭ dek paŝoj for de iu tranĉeo. Ĝuste tiam, du soldatoj sagrapide alkuras kaj provpenas forporti sian estron, subtenante lin sub la akseloj. La «Thompson»-o de Ngan apenaŭ silentas, kiam Toi, Trong kaj Dat direktas siajn pafojn al la sturmantaj «commando»-oj, kiuj ĝemkriante rulfalas sur la teron. Intertempe, Ngan ŝargas sian pafilon per nova kartoĉbendo kaj daŭrigas la pafadon. Kelkaj soldatoj, kiuj sin ĵetas antaŭen estas tuj trafitaj de kugloj. Ili falas dorsen kaj kuŝas tute proksime de la kaverna faŭko. Sed la malamikoj ne forkuras. La riskemuloj ĉiam sturmas. Toi tuj malstiftas unu grenadon MK3 kaj nombras unu, du, tri..., antaŭ ol ĵeti ĝin sur la kanajlojn. La usona grenado bruege eksplodas, eligante densan fumon, kiu plenkovras la tutan kavernan faŭkon.

— Ĵetu ankoraŭ alian ! — Krias Ngan.

La dua MK3, ĵetita de Trong, trafas grupon da soldatoj, kiuj ĵus leviĝis. Ĝia eksplodo jam definitive

haltigas ilian sturmon kaj devigas ilin forkuri returnen. Ngan ekvidas du soldatojn haste dorsoporti sian estron Xam. Li direktas mallongan pafuraganon al ili. Sed ili ĉiam kuras. Li tuj forlasas sian ŝirmejon, pafas ankoraŭ unu kartoĉbendon kaj kriegas :

— Ek al atako !

Poste, rapide li elsaltas el la kaverna faŭko. Tuj lin sekvas Toi kaj Trong. Baldaŭ Ba Ren, Hai Thep kaj aliaj kamaradoj ankaŭ kuras eksteren por kolekti la pafilojn, antaŭ ol haste reveni al la kaverno. Tu Nghiep kaj Dat solaj longerestas super la kadavroj, ĉar ili devas malkroĉi iliajn kartoĉzonojn. Kaj apenaŭ ili sukcesas kolekti du kartoĉzonojn kaj kelkajn kartoĉbendojn de « Thompson »-o, kiam la forkurantaj soldatoj ekhaltas kaj rebate pafas. Ambaŭ batalantoj rampas al la kaverno sub la densaj kugloj de la malamikoj kaj de siaj kamaradoj, kiuj pafas de la kaverno por protekti ilin. Dat rampas, kiel rano, alterne etendante kaj fleksante siajn muskolplenajn krurojn, dum per unusola mano, li trenas du kartoĉzonojn. Onklo Tu Nghiep rampas malrapide, sed pli zorgeme ; ambaŭ liaj longaj kaj harkovritaj kruroj ĉiam moviĝas. Ngan senĉese pafas kaj ne forgesas preme sekvi ambaŭ kamaradojn per la okuloj. Restas ankoraŭ kelkaj paŝoj kaj ili atingos la kavernan faŭkon.

— Iom klopodu ! — Stimulas Hai Thep.

...Fine, ambaŭ reatingas la kavernan faŭkon. Ilia korpo estas skrapvundita ; iliaj genuoj sangokovritaj. Sed ilin trafas neniu kuglo. La okuloj de Dat radias pro ĝojo. Li trenas en la kavernon du zonojn plene garnitajn per kartoĉoj de « Garrand » poste, apogante

sian dorson al la rokmuro, spiregas kaj duone malfermas sian buŝon por prove ridi. Siaflanke, onklo Tu Nghiep metas siajn manojn sur la genuojn kaj anhelante diras :

— Iliaj preterflugantaj kugloj jam varmigas mian dorson !

Li prenas unu kartoĉbendon de « Thompson »-o kaj eltiras el ĝi unu kartoĉon por ekzameno. Ĝi estas tute nova, helflava kun unu violkolora lakomakulo sur sia postaĵo. Li proksimigas la kartoĉon al sia nazo kaj diras :

— Diable ! Ĝi ja tre bonodoras, kamaradoj ! Ŝajnas, ke tiuj kartoĉoj ĵus estas prenitaj el municikestoj !

Li transdonas la kartoĉbendojn al la kamaradoj, kiuj pafas per « Thompson »-o kaj demandas :

— Kiom da pafiloj ni jam akiras ?

— Ses. Kvin « Garrand » kaj unu « Thompson ». — Ba Ren respondas kaj tuj distribuas al Tu Nghiep unu « Garrand » kun brilaj kartoĉoj ĉe la rimeno. Tiu pli ol kvardekjara gerilano tre ĝojas, etendante siajn tremetantajn manojn por ricevi tiun pezan pafilon, kvankam ankoraŭ dubante, ĉu li songus. Li brakumas la armilon kaj karesas ĝin, de la pafiltubo ĝis la kolbo.

— Ĉu vi trovas vian vivon gaja ? — Diras Ba Ren. — Jen antaŭmomente vi portas sur la ŝultro ankoraŭ vian «Ĉielan Ĉevalon » kaj nun, vi jam tenas en la manoj tiun belan « Garrand » !

— Tiel gaja oni devas esti !... Sentimeco kondukas al riĉeco ! Ĉu ĝi definitive apartenas al mi ?

— Definitive. Ni ankoraŭ akiros aliajn. Al ni ne mankos armiloj!

— Per tiu «Garrand» mi pafrompos al ili la kranion, kaj tio feliĉigos min, eĉ se mi devos foroferi mian vivon...

Ngan ekridas, elsakigante sian rizbulon. Estas preskaŭ tagmeze. Ĉiuj sentas malsaton, prenas sian rizporcion kaj avide manĝas. Meze dum la manĝo, Kujen eliras el la kaverno, tenante en la mano unu grapolon da kuiritaj salikokoj. Ŝi viglamove distribuas ilin al ĉiu kamarado. Poste, ŝi iras sidi kuntiriĝe ĉe la piedo de la rokmuro kaj ĝojplene palpas la militakiraĵojn. Post momento, ŝi proksimiĝas al Ngan kun ambaŭ manoj plektitaj sur la brusto, kvazaŭ ŝi devus ankoraŭ regi sian emocion:

— Lastmomente, mi vidis vin fulmrapide kuri eksteren!

— Tiam vi sidis ĉe la ŝtonbloko, malantaŭ mi, ĉu ne?

Kujen kapbalancas. Ŝi atente rigardas sian amanton, kiu rompas sian rizbulon kaj manĝas kun granda apetito. Post momento, ŝi diras per kolereta tono:

— Vi ĉiuj ne fidas al mi. Vi ne permesas al mi bataliri!

— Ne tiel estas! La simpla kaŭzo kuŝas en tio, ke ni ankoraŭ ne bezonas virinan manon! Estu pacienca! Vi batalos, kiam via partopreno en la batalo montriĝos vere nocesa.

3

Xam iom post iom malfermetas siajn okulojn...

Li sentas profundan doloron ĉe la maldekstra ŝultro sub la bandaĝoj. Antaŭmomente, du kugloj de « Thompson » fiksiĝis tie, tamen ili ankoraŭ ne mortigis lin. Nun li iom post iom rekonsciiĝas. Kuŝante en la tendo, li rememorigas al si la ĵus pasintan okazaĵon. Ŝajnas, ke li jam vidis ie la vizaĝon de tiu Vjetkongo, kiu ekaperis malantaŭ ŝtonbloko por pafi kontraŭ li. Sed li ne havas bonan memoron pri tio. Kompreneble, kiel li povas reĥemori centojn da homoj, kiujn li jam aŭ preskaŭ mortigis ? Tamen, li dubas, ke tiu pafanto estis unu el la gerilanoj, kiujn li jam renkontis kaj, kiuj sukcesis eskapi el liaj manoj. Jen estas unuafoje, ke li estas trafe pafita kaj devas forlasi la batalon. Li diras al si en la pensoj : « Mi estus preminta la pafrisorton antaŭ li ! »

— Ne estas grava via vundo, leŭtenanto ! — Diras la ĉefflegisto portanta miopajn okulvitrojn kaj kaŭre sidiĝanta apud li.

— Ne grava ?

— Ne..., sed ĝi povus daŭri...

Xam ne plu demandas. Li levas la manon al sia brusto, palpas la eburan ornampendaĵon reprezentantan la vizaĝon de monstro kun elstaraj kaninoj kaj stulte pensas, ke se ne ekzistus tiu amuleto, li eble ne povus ĝisvivi tiun momenton. Jam de longe, li ne revenis al Hon Dat, kaj ĉi foje, li estas tiel furioze rebatita. Tion vere li ne atendis. Trapasinte ĉi matene la kaptilkampon kaj dufoje repuŝite dum atako

al la kaverno, li trovas, ke nun Hon Dat ne similas al tiu Hon Dat dum la tempo, kiam li estis ankoraŭ postenestro. Li miras kaj samfoje tute koleras. « Ne eblas lasi daŭri tian situacion ! — Grumblas Xam. — Mi pafrompos la kranion al la kanajlaro ! » Li ĵetas ekrigardon sur sian vundon, poste subite demandas la ĉefflegiston :

— Ĉu ni denove atakis la kavernon ?

— Ankoraŭ ne, fraĉjo Hai !

— Kial ?

— Oni ankoraŭ ne ricevas ordonon de la Komandantaro.

Xam abrupte leviĝas kaj brue grincas per la dentoj :

— Diable ! Preskaŭ mil homoj ne povis penetri la kavernon kaj pluraj devis fali surloke sub iliaj kugloj ! Mi tute bolas... !

— Fraĉjo Hai, ili gardas favoran pozicion, sin kaŝante en la kaverno.

Xam silentas. Li trovas la ĉefflegiston tute prava. Vere, ne estas facile ataki tiun kavernon kaj tion elokvente pruvas la fakto, ke li mem estas vundita kaj devas kuŝi ĉi tie.

— Ĉirkaŭ tagmeze, venis per helikoptero kelkaj usonaj konsilantoj. Laŭdire, ili ordonis al ni plidaŭrigi la ĉirkaŭsieĝon kaj nepre la Vjetkongoj mortos pro malsato kaj soifo. Mi ankaŭ ĵus ricevis ilian ordonon veneni la torenton.

— Veneni la torenton ? — Abrupte demandas Xam, saltleviĝante.

La ĉefflegisto kapbalancas. Okulvideble maltrankvila, Xam aldiras:

— Sed, kie ni trovos trinkakvon? Kaj se la loĝantoj de Hon Dat ne estus avertitaj pri tio, ili nepre mortus, trinkinte tiun akvon!

— Oni baros la torenton kaj venenos ĝin nur en tiu parto najbara al la kaverno.

Xam klinas sian kapon. Li pensas pri sia patrino kaj Ka My. Ĉi matene, kiam li venis ĉi tien kun siaj trupoj, li jam revidis ilin hejme. Lia patrino informiĝis pri lia sano kun tono, kiu montris ne koleron sed bonhumoron. Pro tio, li tre gajis. Nun, subite, venas al li en la kapon la ideo, ke se li povus reveni al sia patrino por ripozi, li certe ĝuus pli da komforto, ol resti en tiu ĉi varma tendo.

— Mi volas reveni al la domo de mia patrino por ripozi!... — Tuj diras Xam al la ĉefflegisto.

Tiu lasta kapskuas:

— Neeble, fraĉjo Hai, ripozu ĉi tie, ĉar vi bezonas ankoraŭ prizorgojn kaj kuracilojn. Kiam via vundo estos resanigita, tiam vi povos reveni hejmen.

— Ĉu ĝi povos resaniĝi post kelkaj tagoj?

— Jes, certe pliboniĝos via sanstato!

Xam kuŝas senmove kaj ne plu parolas.

Ĉirkaŭ li, ĉiam leviĝas konfuzaj homvoĉoj. La soldatoj brue manĝas sub libera ĉielo. Ili ĉirkaŭsieĝas la gerilanojn per du vicoj, unu proksime de la kaverno kaj la alia, proksime de la vilaĝeto. En tiu momento, la soldatoj, kiuj kantonmentas en la vilaĝeto erarvagas en ĉiuj lokoj kaj tute libere eniras en ĉiujn domojn.

Grupo da policanoj venas al la trinkejo de onklino Ba U, kie ili brue babiladas. La virino ne povas formeti eĉ unu minuton sian alkoholĉerpilon. Hodiaŭ, ŝi montras sin, kiel tre bonhumoran trinkejestrinon. Ŝi nomas la soldatojn amikoj kaj intime babiladas kun ili.

— Kiom da miloj da piastroj vi ricevas ĉiumonate, farante tiun soldatan profesion?

— Miloj? Nur mil kaj okcent! Vidu, ĉu tiom da mono sufiĉas por nia buŝo sola?

Kun miraj okuloj, onklino Ba U denove demandas:

— Nur mil kaj okcent? Ĉu vi ne ŝercas? Do, via edzino kaj viaj infanoj certe devas gajni kroman salajron!

— Gajni kroman salajron! Tute ne! Por la vivtenado de nia tuta familio ni ricevas nur tion, sinjorino!

Onklino Ba U tuj lasas fali siajn manojn sur la femurojn kaj klakas per la lango:

— Tamen, jam de longe mi ĉiam kredas, ke vi gajnas almenaŭ pli ol tri mil!

La soldatoj eksplodas per rido pro la miskompreno de la trinkejestrino. Iu suboficiro, ĉirkaŭ tridekkvinjara, kun nigra vizaĝo kaj distaŭzitaj haroj, kiuj falas ĝis la oreloj, elĉerpas sian glaseton da brando poste lekante siajn lipojn rigardas al onklino Ba U:

— Vi kredas, ke la Jankioj ne domaĝas sian monon?

— Laŭdire, ili estas tre riĉaj!

— Vere riĉaj ili estas!... Tial ili povas dungi nin por servi ilin. Sed, ili ne estas malsaĝaj por pagi al ni altan salajron. Ni solaj estas malsaĝaj!...

La suboficiro subite silentas, enŝovas la manon en sian distaŭzitan kaphararon kaj aspektas tute malgaje. Onklino Ba U lin demandas:

— Pardonon! De kiu regiono vi devenas?

— De Mak Kan Zun!

— Ha! Mak Kan Zun, t.e. la vilaĝo Bin Hoa, ĉu ne? — Kvazaŭ mirigita, ekkrias la virino.

— Jes, vi ankaŭ konas tiun regionon?

— Ĉielo! Antaŭ la milito, mi venis tien por okupiĝi pri peklado de fiŝoj.

Poste, ŝi daŭrigas kun entuziasma mieno:

— Ha, ha! Kiel stranga regiono! Kiam venas la fiŝsezono, en ĉiuj riveroj abundas fiŝoj. Ja, ĉiuspecaj fiŝoj: lok, tren, limkim,... Kaj oni povas kapti tiom, kiom oni volas!... Koncerne la tieajn rizkampojn, ĉiu hektaro da tero povas produkti meznombre dudek «gia»-ojn da rizo.

La suboficiro sin klinas antaŭen kaj fikse rigardas al onklino Ba U:

— Ha! Vi ja tre bone konas mian naskiĝteron!

— Kial mi ne konas tiun vilaĝon Mak Kan Zun? De tie ĉi ĝis Mak Kan Zun, la vojo ne estas longa, amiko!

La aliaj soldatoj tute ne atentas pri tiu fora nekonata kmera vilaĝo. Ili trinkas brandon kaj post pago al la trinkejestrino, ili reprenas sian pafilon kaj ŝancelpaŝe revenas sian kampadejon. En la trinkejo restas nur la nigrehaŭta suboficiro. Liaj okuloj estas nun tute ruĝaj. Kaŭre sidiĝante sur la lignolito, meze de la domo, li ridaĉas kaj per sia mallerta mano forviŝas kelkajn

gutojn da alkoholaĵo, kiuj ankoraŭ pendas ĉe liaj nerazitaj lipharoj.

— Ĉu vi volas ankoraŭ trinki? — Demandas onklino Ba U.

Li tuj ambaŭmane etendas la glaseton:

— Unu plian glaseton, mi petas!

La trinkejestrino ĉerpas la brandon el argila vazo kaj plenigas ĝisrande la glaseton tenatan en la mano de la suboficiro, antaŭ ol demandi:

— Kiun metion vi faris, kiam vi restis ankoraŭ en Mak Kan Zun?

— Mi kulturis kampon kaj kiam venis la sezono de riverlevigo, mi fiŝkaptis.

— Ĉu jam de longe vi soldatiĝis?

— Jam de du jaroj.

Onklino Ba U delikate retenas la manikon de la suboficiro:

— Atendu min iomete! Mi iras kraderosti por vi unu sepion!

Ĉe tiuj vortoj, la virino rapidmove eklevas sian manon al la fasko da sekaj sepioj pendantaj ĉe la bretaro kaj prenas unu el ili, antaŭ ol iri al la kuirejo. La suboficiro metas la glaseton sur la liton kaj atendas. Li mienas emociplene. Kiam la bonodoro de kraderostita sepio disvastiĝas en la tuta ĉambro, li brue nazenspiras:

— Ha! Kiel bonodoras la sepio!

Onklino Ba U eliras tenante en la mano aluminian teleron, sur kiu kuŝas unu kraderostita seka sepio kaj unu eta bovlo. Ŝi fingremontras la bovlon dirante:

— Jen estas miksaĵo el vinagro kaj papriko por spici vian sepion.

— Jes, dankon!

La suboficiro prenas la sepion, elŝiras kelkajn palpilojn, kiujn li trempas en la vinagron, poste eltiras ilin per du fingroj, antaŭ ol malrapide enbuŝigi ilin.

Sidante ĉe litangulo kun krucitaj brakoj, Onklino Ba U rigardas al la suboficiro, kiu avide manĝas kaj trinkas. Subite, ŝi demandas:

— Kial vi ne restas hejme por kulturi kampon, anstataŭ soldatiĝi por esti tiel malfeliĉa?

La viro metas la glaseton sur la liton kaj ne respondas. Li gratas al si la kapon iun momenton, antaŭ ol diri:

— Ĉar mi estas stulta. Jes, mi estas stultulo! Kaj ne nur mi...

— Ĉu estas aliaj soldatoj, kiuj ankaŭ devenas de via naskiĝtero?

— Estas kvar, kvin knabegoj!... Ili ne devenas de Mak Kan Zun, sed loĝas proksime de tie. Unu en Vinh Hanh, alia en Nang Gu...

— Ha, pardonon! Ĝis nun, pro malatento, mi jam forgesas demandi vin pri via nomo kaj pri via familio.

— Mi nomiĝas Ko kaj mi estas la naŭa infano de la familio.

Onklino Ba U kapbalancas, poste diras kun timema mieno:

— De la mateno ĝis nun furiozas batalo ĉe la Honkaverno. Oni ne scias, kio okazas! Aŭdiĝas surdigaj eksplodoj.

La suboficiro Ko sciigas al ŝi:

— La «commando»-oj jam perforte eniras la kavernon, sed ili estas komplete repuŝitaj. Sendube, estas multaj gerilanoj tie; ĉar ilia rezistado estas tre akra. De la mateno ĝis nun, ili jam faligas ĉirkaŭ dudek el niaj kunbatalantoj.

— Mi trovas, ke preskaŭ ĉiuj hamakoj de la vilaĝeto estas rekviziciitaj.

— Ĝuste por transporti la vunditojn...

Tenante en la mano la glaseton da brando, la suboficiro proksimiĝas al la trinkejestrino kaj flustre demandas:

— Nu, onklino, diru al mi la veron: ĉu estas multaj sinjoroj en la kaverno?

— Kiel mi povas scii, ĉu ili estas multaj aŭ malmultaj?

La suboficiro mienas tute malĝoje:

— Vi mem ne scias?... Bonvolu diri al mi la veron, por ke mi povu eviti danĝeron. Baldaŭ venos mia vico ataki la kavernon. Terura perspektivo! Tiuj sinjoroj en la kaverno kondutas, kiel mortvolontuloj!

Onklino Ba U malforte frapas la kusenon per la mano, aŭdigante sekan langoklakon «ĉak»:

— Jes, kiel mortvolontuloj! Mi starigas al vi jenan demandon: supozu, ke iu renversus vin teren por tranĉi al vi la kolon. Do, kiel vi devus fari, se vi volus vivi? Almenaŭ vi devus kapti favoran okazon por forpreni la ponardon aŭ strangoli vian kontraŭulon, poste vi forkuŕus kaj nur tiel, vi povus vivi! Male, se vi restus senmove, nepre vi estus mortigita! Tiuj sinjoroj en la kaverno same agas, amiko!

La suboficiro kapbalancas:

— Eĉ la tervermo baraktas kontraŭ la morto, kiam ĝi estas piedpremita. Do, tiuj sinjoroj tute pravas, tiel farante!

Post momenta paŭzo, li daŭrigas:

— Mi konfesas, ke mi tute ne emas fronti kontraŭ tiujn sinjorojn. Mi volas reveni hejmen por kulturi kampon, kapti fiŝojn kaj angilojn; tio ja liberigos min el ĉia timzorgo! Certe, vi konas la kanalon Hoi Dong? Mia edzino nun restas tie por teksi matojn kaj vivteni siajn infanojn. Kompatinda virino!

— Jen, jen! — Ekkrias onklino Ba U. — Fine, la virino devas ĉiam elteni malfeliĉon, ĉu vi vidas? Ĉu vi ne pentas, kiam vi forlasas vian edzinon kaj viajn infanojn por soldatiĝi? Vere, vi havas ŝtonan koron!

La suboficiro, tute konfuzita, palpe gratas sian kolumon:

— Ho ĉielo! Onklino Ba, onklino Ba!... Mi estas tre malfeliĉa! Onklino Ba!

Post tiuj ĝemkrioj, li forlasas la glaseton, ekmetas siajn piedojn sur la teron kaj iras al domkolono, pene trenante sian paron da tolŝuoj kun najlogarnitaj plandumoj. Kaj sin apogante al la kolono, li rigardas al la regiono Vam Rang, al la brunetaj kampoj, kiuj etendiĝas ĝis la foraj ĝardenrandoj kun nebulece verdaj arboj. Kaj la violeta Ba The-monto, impone staranta antaŭ li, ŝajne elvokas en li multajn korŝirajn bildojn el lia pasinta vivo. Nur post longa momento, li reeniras la domon, surŝultrigas sian fusilon kaj elpoŝigas kelkajn monerojn:

— Kiom mi devas pagi al vi, onklino?

— Ne paginde, tio ne multe valoras! — Kapskuas onklino Ba U.

— Ne, lasu min pagi, lasu min pagi, onklino!—Balbutas la suboficiro.

— Mi diras, ke mi ne prenas... Mi ja konsideras vin, kiel samvilaĝanon.

-- Do, mi dankas vin!... Nun, permesu, ke mi revenu al mia kampadejo, onklino!

Survoje al sia trupunuo, la suboficiro Ko sentas sin iom gaja, kiam li pensas pri onklino Ba U, tiu trinkejestrino grasdika sed bonkora. Kaj precipe pro tio, ke ŝi bone konas lian naskiĝvilaĝon. Ĉielo! Kial ŝi rememorigis al li tiun fiŝsezonon kaj tiun rizkampojn, por veki en li teruran hejmveon? Li rememoras tiun tagon, kiam li kondukis bubalĉareton por transporti rizon. La ĉareto rapide glitis sur la nove prifalĉitaj kampoj. Tie kaj aliloke, leviĝis fumo el kuirejoj, kie oni preparis la vespermanĝon. Kaj ankaŭ la parfumo de novrizo kaj la brulodoro de kraderostitaj «lok»-fiŝoj. La infanoj, kiuj iris ŝtelkapti fiŝojn aŭ postrikolti rizspikojn tuj amase kuris malantaŭ lia ĉareto, ĝojkriante kun peto, ke li prenu ankaŭ ilin kun si. Vere gaja vivo! Nu, tio okazis ankaŭ en tiu ĉi decembro! Post la rikoltsezono, sekvas la fiŝsezono. Li ne povas forgesi tiun vesperkrepuskan spektaklon sur la kampo. Post bongusta vespermanĝo kun fiŝoj kuiritaj kun la «sung» floroj, oni pretigis bubalojn kaj fajron sur la rizkampojmem, por nokta draŝado. Kaj per unu forkego, tenata en la manoj, li levis kaj malkonfuzis la garbojn, sur kiuj la bubaloj trenis la ŝtonajn rulcilindrojn. Tute

proksime, la virinoj brue babilis kaj ridis, ventumante la rizon. Poste, aperis la luno. Kaj ĉiam ordigante la garbojn per sia forkego, li ŝercis kun kelkaj knabinoj laborantaj apud li. Iafoje, pli aŭdaca, li proksimiĝis al iu el ili, manbatetis ŝian sidvangon, kaj tiel li ŝercis laŭ tio, se tiu knabino plaĉis al li. Tiam, li estis ankoraŭ belaspekta knabego. Kvankam lia vizaĝkoloro ne estis pli hela, ol nuntempe, tamen li laboris forte kaj vigle. Dum la rikoltsezono, kiam vesperiĝis, li kutime sin vestis per blanka piĵamo kaj kun zorge kombitaj kapharoj promenis al la ferponto.

Tiel gajan kaj tiel agrablan momenton, fakte, li jam travivis. Dum la militrezistado, li ankaŭ faris sin gerilano por batali kontraŭ la francaj koloniistoj. Post la pacrestariĝo, li edziĝis kaj sin fordonis al monludo. Li forlasis baldaŭ sian kampon, siajn edzinon kaj infanojn, siajn fiŝretojn kaj nasojn por sin varbi en la vilaĝa milico, kaj pli poste en la sekurecaj trupoj. Komence, li deĵoris en Long Sujen, poste en Rach Gia. Kvankam enarmeiĝinte jam de longe, li tamen restas ĉiam ĉe la grado de kaporalo pro tio, ke li neniam aŭdacas mortigi homon, kiel la ceteraj soldatoj. Feliĉe, lia koralligiteco al la rizkampoj ankoraŭ retenas lin ĉe la stadio de dungosoldato. Dum disrabaj operacioj, liaj kunbatalantoj ofte surtretis la rizplantidojn por avanci; sed, siaflanke, li prove evitis ilin, flankenirante per alia vojo, ĉar li mem, iufoje, jam plantis tiujn rizplantidojn. Li ankaŭ neniam aŭdacis preni fusilon por pafi al bubalo.

Veninte al tiu vilaĝeto *Hon Dat*, li estas unu el tiuj soldatoj, kiuj nenial interesiĝas pri batalo. Ekirante

al militmanovroj, li deziras nur plej frue reveni. Lin trafas timego, kiam li trovas, ke nur en unu mateno, jam estas kvardeko da soldatoj mortigitaj aŭ vunditaj. La gerilanoj ne estas al li fremdaj. Li ofte pensas, ke se li starigus bambupikilojn sur sia rizejo, certe ili ankaŭ pikmortigus iun ajn, kiu aŭdacas ĝin travadi.

Ne estas profunda tiu foso, kiu apartigas la kaporalon Ko de tiuj homoj, kiujn la malamiko nomas «Vjetkongoj» kaj, kontraŭ kiuj li estas devigita batali. Levi lian fusilon kaj pafi al tiuj homoj, lia konscienco ja ne permesas... Lia fingro, kiu premas la pafrisorton estas tute nedecidema.

Li trovas, ke tiuj gerilanoj tre similas al li, ĉar preskaŭ ĉiuj ankaŭ kulturas kampon aŭ retkaptas fiŝojn, kiel li.

Aŭdante, ke tiu ĉirkaŭsiego povas longedaŭri, li tre maltrankviliĝas. Survoje al sia kampadejo, li konstante pensas pri sia naskiĝvilaĝo. Kaj tiuj vortoj de onklino Ba U: «...de tie ĉi ĝis Mak Kan Zun, la vojo ne estas longa, amiko!» ankoraŭ sonas ĉe liaj oreloj, kvazaŭ instigante lin al iu riskoplena entrepreno.

4

Ĉesiĝas ĉiuj bataletoj, kiam vesperiĝas. La pafbruoj ne estas plu furiozaj, kiel matene kaj tagmeze. Aŭdiĝas nur la unuopaj pafoj de la malamikaj soldatoj, kiuj paffaligas la bubalojn ĉe la kamprandoj. La malfeliĉaj brutoj, faligitaj meze de la rizejoj, longe

blekegas. Ĉiuj en Hon Dat povas aŭdi iliajn korŝirajn kriegojn. La krepuska lumo komencas estingiĝi en la ĝardenoj. Kaj kiam la mara vento blovas pli kaj pli forte al la Hon-kaverno, tiam sur la nebulece blua montoĉeno That Son arĝente brilas la blankaj flugiloj de cikonioj.

Ĉiun vesperkrepuskon, ĉirkaŭ tiu ĉi horo, post unutaga serĉado de l' nutraĵo en malproksimaj regionoj, la cikonioj revenas al Hon Dat, kie ĉe la supro de mangujoj, jam de generacio al generacio, balanciĝe pendas nenombreblaj nestoj el pajlo. La birdoj aperas pli kaj pli klare kun siaj V-formaj flugiloj. Kaj kiam malantaŭ ili, la blua koloro de la montara fono jam ŝanĝiĝas en malhele violan, oni povas nombri ilin, unu post unu, svingantajn siajn flugilojn aŭ ŝvebantajn en la aero. Sed, hodiaŭ vespere, apenaŭ reveninte al la mangoĝardeno, la unua aro da cikonioj tute konfuziĝas kaj tuj suprenflugas. De sur la tero aŭdiĝas pluraj pafoj. Kelkaj birdoj, trafitaj de kugloj, falas rekte sur la ĝardenon, larĝe etendante siajn blankajn flugilojn. La ceteraj eligas terurajn kriojn, faras plurajn cirklojn alte en la aero, antaŭ ol forflugi en direkto al Hon Me.

Starante ĉe la ŝtuparo de sia domo, patrino Saŭ suferplene rigardas al tiuj cikonioj, kiuj ne povas reveni al siaj nestoj. Ŝi falsidiĝas sur la ŝtuparon, turnante siajn okulojn al la Hon-kaverno, vualita per densfoliaj arboj. Ŝi tute maltrankviliĝas. De la mateno ĝis nun, ŝi ankoraŭ nenion faras, krom kuri tien kaj reen... Nun, restas hejme nur ŝi. Ambaŭ fratinoj Su kaj Kujen jam forkuras en la kavernon. Sed, kio plej

zorgigas ŝin estas tio, ke ankaŭ Thuji penetras en ĝin. Kion povas fari tie la etulino?

Tiun matenon, kiam la malamikoj venis al la vilaĝeto, la kanajlo Xam ankaŭ eniris ŝian domon por serĉi la junulinojn. Trovante neniun, li demandis:

— Kie estas ambaŭ viaj filinoj?

— Sendube, pro timo al vi, ili jam forkuras. — Respondis patrino Saŭ. — Mi ne scias, kie ili troviĝas nun...

— Ili ĉiuj fuĝas en la kavernon, ĉu ne? Vi kredas, ke tion mi ne scias? Mi malkaŝas al vi jene: ĉi foje, post ekstermo de ĉiuj Vjetkongoj, ni starigos postenon ĉi tie. Ĉu ili povos resti eterne en la kaverno? Ni atakos ĝin kaj tratranĉos la ventron al ĉiu kaptito.

Ĉe tiuj vortoj, Xam kaj lia bandaĉo foriris.

Iun momenton poste, de la marmezo la malamikaj ŝipoj kanonpafis al Hon Dat. La obuseksplodoj skuegis la tutan domon. Patrino Saŭ devis malsupreniri en sian subteran ŝirmejon. Post tiu kanonado, ŝi revenis al sia domo, kiam denove aŭdiĝis pafbruoj de ĉiukalibraj pafiloj ĉeflanke de la Hon-kaverno. Ŝi tuj suprengrimpis per ŝtupetaro al la malantaŭa tegmento por rigardi, kio okazis. Antaŭ la kaverno, la arboj estis falĉitaj de kugloj, kvazaŭ nevideblaj manoj estus skuegantaj ĉiujn branĉojn de mangujoj kaj «mang kaŭ»-arboj por senkompate faligi iliajn fruktojn. Poste, ŝi aŭdis el la kaverno pafbruojn kaj grenadeksplodojn. Ĝuste tiam, alkuris onklino Hai Thep kun sia bebo en la brakoj.

— Panjo Saŭ! — Ŝi krie vokis kaj abrupte eniris la domon. Ne trovante la maljunulinon, ŝi tute maltrankviliĝis kaj denove kriis:

— Panjo Saŭ! Panjo Saŭ!

— Mi estas ĉi tie! — Respondis la maljuna patrino de sur la tegmento.

Onklino Hai Thep eklevante siajn okulojn demandis:

— Vi surgrimpas la tegmenton por rigardi, ĉu ne? Ĉu vi vidas ion?

— Nenion alian, krom defalintaj branĉoj.

Patrino Saŭ malsupreniris la ŝtupetaron, firme tenante ĝin per ambaŭ manoj. Ŝi ekprenis la brakon de onklino Hai Thep kaj emociplene diris:

— Ili jam atakas la kavernon!... Ĉielo! Mi ne scias, kiel rezistas niaj kamaradoj. Ili tute maltrankviligas min. Ja, kiom da pafiloj ili disponas?

Onklino Hai Thep metis sian trimonatan bebon sur la lignoliton kaj staris senmove, streĉante siajn orelojn.

— Ĉu vi aŭdas, panjo? — Subite, ŝi demandis. — Pro kio la soldatoj tiel laŭte krias?

Patrino Saŭ ankaŭ streĉis siajn orelojn; sed ŝi ne povis aŭdi tiujn malproksimajn kriojn. Onklino Hai Thep tuj mallevis sian voĉon:

— Estu trankvila, panjo! Mia edzo jam diris al mi, ke en la kaverno, ni estas tre firme defenditaj. La malamikoj ne povas facile penetri en ĝin.

— Jes, nun ili ne povas eniri; sed, supoze, ke ili ne eniros kaj restos ĉiam ekstere por ĉirkaŭsieĝi la kavernon, kie niaj kamaradoj povos trovi rizon por manĝi?

— Ne maltrankviliĝu pri tio! Ili havas rizon!

Patrino Saŭ ne plu parolis. Ŝi prenis sian korbon da betlo kaj urĝe preparis por si unu betlomaĉaĵon. Antaŭ ol enbuŝigi ĝin, ŝi denove diris:

— Nu, Hai Thep, vi diras, ke ili havas rizon. Sed, kie ili trovas akvon por kuiri tiun rizon? Ĉu ili manĝos ĝin kruda?

Onklino Hai Thep estis forviŝanta la nazmukon de sia infaneto, kiu petole rampis sur la lito, kiam patrino Saŭ starigis al ŝi tiun demandon. La virino ankaŭ sentis maltrankvilon, ĉar ŝi sciis, ke la malamikoj jam okupis la Angiltorenton. Malgraŭ ĉio, ŝi ĉiam respondis:

— Niaj kamaradoj estas tre elturniĝemaj. Ĉu ili konsentus mangi krudan rizon?... Almenaŭ, ili manĝos ĝin rostita!

De tiu mateno, patrino Saŭ neniam ĝuis trankvilon. Onklino Hai Thep baldaŭ revenis sian hejmon kun la bebo en la brakoj. Jam de antaŭ-hieraŭvespere, kamarado Tam Ĉan estis veninta ĉe ŝi. Lian alvenon rimarkis neniu el la vilaĝanoj, eĉ patrino Saŭ. Post la foriro de onklino Hai Thep, la maljunulino iris prepari la manĝon por siaj porkoj. Kirlante la branon en la trogo, ŝi vokis la bestojn, dum ŝia tuta penso ĉiam direktiĝis al la kaverno.

Ja, en ĝi troviĝas nun ĉiuj, kiuj estas al ŝi karegaj: ambaŭ ŝiaj filinoj kaj ŝia tiom dorlotata nevino. Ĉu ili ne konsistigas fonton de ĝojo por ŝia tuta vivo? Kaj ankaŭ ŝia bofilo kaj aliaj konatoj, kvazaŭ samsangaj! Ĉiuj ja troviĝas nun en vere kriza situacio. La vivo kaj la morto kvazaŭ jam kuŝas sur ambaŭ pesiltasoj kaj ŝi estas ĝuste tiu, kiu emociplene devas rigardi al tiu pesilo. Neniam ŝi estas obsedata de tiel teruraj bildoj...

Jam komplete noktiĝas. Patrino Saŭ blindpalpe iras eklumigi la lampon. La lumo de la petrollampo pli

klare vidigas la dezertecon de la domo. Ŝi sidas iun momenton sur la lignolito, poste ne povante plu paci-enci, ŝi leviĝas, ekbruligas tri incensovergetojn, venas antaŭ la altaron de sia edzo kaj kun la incensovergetoj en la manoj murmure preĝas:

— Ho vi, kiu jam vivis saĝe kaj mortis inde, ĉi foje provpenu protekti vian idaron kontraŭ danĝero kaj malfeliĉo!...

Ŝi trifoje klinas sian kapon, poste enigas la incenso-vergetojn en la incensovazon instalitan antaŭ la altaro. Ĝuste tiam, subite aŭdiĝas konfuzaj voĉbruoj ekstere. Tute mirigita, patrino Saŭ kuras al la pordo. El laŭtparolilo lokita ie en la vilaĝeto leviĝas laŭtaj voĉoj:

«Allo! Allo! La armeo de Vjetnama Respubliko sciigas al la loĝantaro de Hon Dat, ke hodiaŭ, ĝi jam kolizias kontraŭ la Vjetkongoj kaj sukcesas ekstermi plurajn el ili. Nun, obstinemaj, ili ankoraŭ fuĝas en la kavernon por rezisti al ni. Nia armeo daŭrigos sian militoperacion por komplete neniigi ilin. Ni sciigas al vi, sampatrujanoj, ke morgaŭ matene, ekde la 9a horo, estas malpermesite al ĉiuj vilaĝanoj iri al la torento. Allo! Allo! Armeo de Vjetnama Respubliko...»

Patrino Saŭ diras al si en la pensoj: «Ili malper-mesas al la loĝantoj iri al la torento! Kion ili celas per tiu fiintrigo? Hm!... Ili diras, ke ili jam ekstermas plurajn el niaj kamaradoj. Tio estas nur fanfaronaĵo! Tiun matenon, mi aŭdis, ke ĉe nia flanko, estis nur du vunditoj: Tham kaj Be, filo de onklo Tu Raŭ... Oni ne scias, ĉu pli poste, ankoraŭ aliaj kamaradoj estas vunditaj.»

La malamika voĉo akre sonas el la laŭtparolilo ankoraŭ iun momenton, antaŭ ol komplete estingiĝi. Ĝuste tiam, subite aŭdiĝas bojado de hundo ĉe la enirejo. Patrino Saŭ eniras en la ĉambron por serĉi sian lampon kaj kiam ŝi revenas al la pordo, unu nigra hundeto petolante ĉirkaŭ ŝiaj piedoj sekvas ŝin ĝis la ŝtuparo. Malantaŭ la besto ekaperas homsilueto. La maljunulino strečas siajn okulojn kaj tuj rekonas la knabeton Ut, filon de onklo Tu Raŭ. Li surmetas nigran jakon kun longaj manikoj kaj, kies baskoj estas enŝovitaj en duonpantalonon. Li viglapaŝe sin direktas al la ŝtuparo kaj saltas supren.

— Estas vi, Ut?—Demandas patrino Saŭ.

— Jes, avino!—Anhelante respondas la knabeto.— Mia patro diras, ke ĉi nokte, avino Saŭ restas sola hejme kaj mi devas tranokti ĉi tie kun vi...

— Tiel estas!... Sendube, vi tro urĝe kuras de la strando ĝis ĉi tie por tiel forte spiregi, ĉu ne?

— Jes!

La knabeto Ut estas nur dektrijara, sed li aspektas tre fortike kun nigrebruna haŭto kaj mallonge tonditaj kaj rigide starantaj kapharoj. Li havas petolan mienon kaj lia elstara frunto elokvente montras, ke li estas tre obstinema. Li ne povas resti trankvile unu sekundon kaj kuras tien kaj reen en la ĉambro, klakante per sia lango por amuziĝi kun sia hundeto. Baldaŭ laca, li sterniĝas per sia tuta longo sur la lignolito kaj ripozinte tie iun momenton, li eklevas sian kapon kaj demandas patrinon Saŭ, ĉu en la kuirejo restas ankoraŭ malvarma rizo. La maljunulino rigardas lin kun miraj okuloj:

— Ĉu vi jam vespermanĝas?

— Mi jam manĝas antaŭ la sunsubiro!

Patrino Saŭ ekstaras, prenas la lampon kaj diras al li:

— Sekvu min!

La knabeto Ut leviĝas kaj akompanas ŝin ĝis la kuirejo. Ŝi alportas une marmiton da rizo kaj unu poton da fiŝoj kuiritaj en peklakvo kaj metas la tuton sur unu lignotabulon, apud la fajrujo. Ut iras serĉi unu bovlon, poste surgrimpas la lignotabulon. Li mem prenas la rizon kaj verŝas la fiŝosaŭcon en sian bovlon, antaŭ ol avide manĝi.

— Ĉi vespere, mi kuiris tiun rizon sed mi ankoraŭ ne prenas eĉ unu rizeron. — Diras patrino Saŭ. — Via patro jam venis ĉi tien. Mi aŭdis, ke via frato Be estis vundita sed via patro nenion diris al mi, kvankam li mienis tute maltrankvile.

— Paĉjo diris, ke estas tute normale vundiĝi, kiam oni batalas kontraŭ la malamiko.

— Viaflanke, ĉu vi timis, kiam oni sciigis al vi, ke via frato estis vundita?

— Mi tute ne timis, avnjo! Ha! Se mi povus ĵeti grenadojn sur tiujn kanajlojn por komplete ekstermi ilin!

Patrino Saŭ eksplodridas:

— Vi estas ankoraŭ infano. Kiu aŭdacus konfidi al vi grenadojn?

La knabeto rigardas al la maljunulino, movetas siajn lipojn, kvazaŭ volante diri ion, sed li tuj daŭrigas la manĝon. Finmanĝinte sian bovlon da rizo, li ŝovas ĝin

on la marmiton por ĉerpi novan kvanton, kiam admone krias patrino Saŭ :

— He, knabetaĉo ! Pro kio vi ne uzas vergetojn el la kuirejo por elpreni la rizon ?

Ut brue ridas :

— Tiamaniere, oni pli rapide ĉerpas... Mi povas jam finmangi unu plian bovlon tiam, kiam oni ankoraŭ manipulas tiujn vergetojn !

Patrino Saŭ kapskuas ne sciante, kiel rebate diri al la knabeto :

— Via patro kaj vi ja havas saman karakteron ! Ĉiam prematajn de urĝeco, eĉ dum la manĝo !

Ut restas senvorte, forglutas ankoraŭ tri bovlojn, poste leviĝas. Li iras malantaŭ la domon, ĉerpas akvon el argila vazego kaj brue trinkas. Revenante al la ĉambro, li lekas siajn lipojn, karesas sian ŝvelan ventron kaj etpaŝe sin direktas al la lignolito. Li sidiĝas ĉe ĝia ekstremo, balancante iun momenton siajn krurojn, antaŭ ol sterniĝi per sia tuta longo :

— Mi kuŝas ĉi tie, kaj vi, avnjo, ĉe la fundo, ĉu ne ?

— Kuŝu ie ajn, laŭ via plaĉo !

Ĉe tiuj vortoj, patrino Saŭ ĵetas sur lin unu kovrotukon. La knabeto disvolvas ĝin, poste komplete kovras sin per ĝi. Kaŭriĝante sur la lito, la maljunulino knedas sian betlomaĉaĵon kaj ĝemspiras :

— Hm !... Kiel dormas ĉi nokte la etulino Thuji en la kaverno ? Mi tre timas, ke la kanajloj denove atakos niajn kamaradojn !

Ut elŝovas sian kapon el la kovrotuko :

— Ili ne aŭdacas veni nokte al la kaverno !

— Kial vi scias tion ? Vi ĉiam montras vin multescia !

— Veron mi diras !... Kiom feliĉa mi estus, se mi povus loĝi en la kaverno ! Certe, oni sentas pli da varmo tranoktante tie ! Sed, mi iom timas...

— Kion vi timas ?

— En la kaverno estas ostoresta͡joj de kelkaj onkloj, iam mortigitaj de la malamiko. Terure ! Mi tre timas, ke ilia animo povus reaperi nokte por min minaci !...

Patrino Saŭ tuj severe mienas :

— Stulta͡jon vi diras ! Ĉu viaj onkloj, kiuj jam foroferis sian vivon por la revolucio ekĝuas plezuron minacante vin ? De nun, mi malpermesas al vi diri tion, komprenite ?

Admonita de la maljunulino, la knabeto Ut kuŝas senmove kaj diras nenion plu. Patrino Saŭ maĉas iun momenton sian betlon, poste iras fermi la pordon. Ŝi apenaŭ estingas la lampon kaj enlitiĝas, kiam subite Ut eklevas sian kovrotukon kaj mallaŭte demandas :

— Ĉu vi jam zorge riglofermas la pordon, avnjo ?

— Jam !

Ut denove kuŝas, sed li ĉiam turniĝadas sur la lito. Iom mirigita, patrino Saŭ diras al si en la pensoj : « Pro kio hodiaŭ, tiu knabeto estas tiel singardema ? Pasintfoje, kiam li tranoktis ĉi tie, apenaŭ enlitiĝinte, li tuj ronkadis ! »

Sed, ŝi pensas, ke eble pro malbona digestado, li ne povas facile dormi, kaj ŝi ne plu atentas pri tio. Ŝi ankaŭ turniĝadas sur sia kuŝejo, ne povante liberigi sin el siaj timzorgoj. Denove ekaperas antaŭ ŝiaj okuloj la

bildo de la Hon-kaverno, — kiu kaverno jam naskas en ŝia koro tiom da maltrankvilo kaj emocio. Pli ol unufoje, ŝi ekkonscias pri tio, ke ŝi devas fari ion por bremsi tiun atakon de la malamikoj, malstreĉi ilian ĉirkaŭsiegon, frakasi tiun kruelan baron, kiu konstante minacas ŝian propran vivon kaj tiun de ŝiaj karuloj.

En tiu malluma nokto, dum la povran patrinon turmentas maltrankvilo, la knabeto Ut ankaŭ maldormas. Li ja havas siajn proprajn zorgojn, kiujn ŝi neniel povas kompreni.

Li estas rememoriganta al si la aspekton de iu grenado, — brile nova, reala grenado MK3, kiun li jam propramane palpis kaj, kiu nun apartenas al li. Antaŭmomente, li preskaŭ malkaŝis al patrino Saŭ, ke li posedas tiun grenadon. Feliĉe, li sukcesis sin regi. Li povas malsekretigi tion al neniu. Nun, ĉiu bruo ĉe la korto, ĉiu ekbojo de hundo al la luno sufiĉas por ektremigi la knabeton. Li jam pretigas ambaŭ siajn krurojn; se aŭdiĝus bruo de soldataj ŝuoj sur apuda vojo, li tuj saltus eksteren tra la posta fenestro. Li jam atente observas la terason malantaŭ la domo: ĝi estas iom alta, sed mezurante siajn fortojn, li trovas, ke li estas kapabla *sal*ti de tiu loko sur la teron por forkuri.

Sed, pro kio la knabeto Ut konstante timas, ke la soldatoj eniros en la domon? Pro kio kuŝante ĉi tie, li ĉiam pensas pri forkuro?

Tian aferon, fakte, scias neniu alia, krom li!

Tiun vesperon, lia tuta familio frue manĝis. Lia patro diris al li: «Ut, ĉi nokte, vi iru dormi ĉe sinjorino Saŭ! Ŝi restas sola hejme!» La knabeto jesis

poste, kune kun sia nigra hundeto, li senprokraste barkoveturis. Kiam lia barko albordiĝis al kokosĝardeno, plotono da soldatoj sidantaj ĉe la piedo de kokosujo ekvidis lin kaj vokis:

— He knabeto, venu ĉi tien!

— Kion vi volas, sinjoroj? — Demandis Ut.

— Ĉu vi scias surgrimpi kokosujon?

La knabeto komence intencis respondi «ne», kvankam ŝirkolekti kokosojn sur alta arbo estas lia ĉiutaga okupo. Sed, baldaŭ, li vidis plurajn kartoĉzonojn kaj grenadojn senorde kuŝantajn sur larĝe etendita ŝirmotukego. Li tuj ŝanĝis sian ideon kaj volis fari konatecon kun la soldatoj.

— Mi scias..., — li respondis, — vi volas manĝi kokosojn, ĉu ne?

— Jes, surgrimpu la arbon kaj ŝirkolektu por ni kelkajn nuksojn! Ni volas trinki kokoslakton

— Volonte! Mi ŝirkolektos por vi!

Ĉe tiuj vortoj, Ut saltis sur la trunkon de la kokosujo, antaŭ la miraj okuloj de la soldatoj. Ĉiuj laŭdis lin dirante, ke li estis pli lertmova, ol sciuro. Efektive, en palpebruma daŭro, li jam atingis la arbosupron. Li tordŝiris entute kvar kokosojn kaj ĵetis ilin sur la teron. La soldatoj, tute kontentaj, prenis po unu nukson kaj rulis en direkto al la knabeto la kvaran. Ut kapskuis:

— Mi ne trinkas... Jam tedas al mi trinki tiun kokoslakton!

La soldatoj elingigis sian ponardon por tranĉi la kokosojn. Trovante ilin tute mallertaj, Ut tuj elŝiris ĝin

el la mano de unu el ili kaj trancîs la nuksojn. Vere, li estis tre kapabla. Ĉiuj kokosoj de li trancîtaj tre plaĉis al la okuloj : la trancĉvundoj ne estis raspaj kaj malpuraj. La knabeto kontemplis iun momenton la usonan ponardon, sencêse laŭdante ĝian akrecon, poste sin ĵetis antaŭen por ensovi ĝin en ĝian ingon ligitan ĉe kartoĉzono. Fintrinkinte la dolĉan kokoslakton, la soldatoj sterniĝis sur la herbejo kaj eklevis sian voĉon por kanti iun « Vong Ko »-arion. La knabeto Ut sin montris tute ĝoja :

— Lasu min buŝe ludi gitaron por vin akompani !

Kaj vibrigante sian langon « tang tang, tang », li ludis kelkajn mezurojn, kiel preludon. Ĝuste kiam komenciĝis la ĉeftempo, li faris sekan langoklakon, kiu tute similis al klako de kastanjeto. La soldatoj tre admiris lin kaj demandis :

— Kiu lernigis vin buŝe ludi gitaron ?

— Mi mem !

— Neeble ! Vi devis imiti iun por povi tiel ludi.

— Jes, mi imitis sinjoron Tu Deŭn... Mi aŭskultis kaj buŝe ripetis, kion li ludis...

— Vi estas vere talenta, knabeto mia !

Ut aŭskultis tiujn laŭdojn kun indiferenta mieno ; li neniam montris sin kontenta, kiel aliaj infanoj. Tia estas lia karaktero. Kaj ĝuste pro tio, la soldatoj plie estimis lin kaj volis reteni lin por babili. Siaflanke, la knabeto jam de longe turnis sian atenton al unu grenado alkroĉita al iu kartoĉzono. Li estis firme decidinta ŝtele preni ĝin ĉe la noktiĝo. Intertempe, li rakontis al la soldatoj la historion de paro da gigantaj serpentoj,

kiuj estis ofte aperintaj sur la maro inter la insuletoj Hon Tre kaj Hon Kueo.

— Ĉu vi iam propraokule vidis ilin ? — Demandis iu el ili.

— Mi vidis nur unu serpenton. — Respondis Ut. — Kaj nun, efektive, restas nur unu ! Antaŭe, kiam ili vivis ankoraŭ popare, ili ofte aperis ĉe la marsupraĵo por dronigi fiŝbarkojn kaj manĝegi homojn. Mia patro rakontis, ke tiam estis tre kuraĝa fiŝisto, nomita Kai Thoai. Iam, ambaŭ geedzoj Kai Thoai barkoveturis al Hon Tre. La edzino funkciigis la stirilon kaj la edzo sidis ĉe la pruo kun longa bambubastono. Kiam la paro da serpentoj elakviĝis, kiel kutime por puŝi la barkon, la brava fiŝisto nenion diris. Atendante, ĝis la virserpento elŝovis sian kapon por prove mordi, li tuj donis fortegan baton per sia bastono, kiu jam rompis al ĝi la kolon... De tiam, restas nur la ino... kaj tiu lasta sola ne aŭdacas plu bari la vojon al niaj barkoj...

Noktiĝis, ĝuste kiam la knabeto Ut finrakontis tiun historion de Kai Thoai, mortiginto de la serpento-monstro. Sen perdi eĉ unu minuton, li delikate etendis sian manon kaj malkroĉis la grenadon, dum li ĉiam babilis :

— Nun, la « serpentino », de tempo al tempo, ankoraŭ aperas sur la maro...

Li ankoraŭ ne finparolis tiun frazon, kiam la grenado jam peze kuŝis en lia poŝo. Li enŝovis sian manon en ĝin por reteni la grenadon kaj ekleviĝis :

— Iru ripozi, kamaradoj ! Mi devas reveni hejmen !

— He, venu ĉi tien de tempo al tempo por babili, amiketo!

— Ĉu vi ankoraŭ longatempe restos ĉi tie?

— Longatempe, ĝis ni ekstermos ĉiujn Vjetkongojn en la kaverno.

La knabeto Ut malrapide paŝis. Ĉiam sekvis lin la nigra hundeto. Nur post kiam li perdis la soldatojn el la okuloj, li sagrapide kuris. Alveninte proksime de la domo de patrino Saŭ, li flankeniris al la «lekima»-ĝardeno, fosis unu truon en la tero kaj kaŝis en ĝi la grenadon. Li faris kelkajn sekretajn signojn, zorge ebenigis la teron, antaŭ ol kuri al la domo de la maljunulino.

5

Dum la knabeto Ut turniĝadas sur la lito, ĉiam pensante pri sia grenado, lia frato Be travivas plej krizajn minutojn en la kaverno. Kutime tiel doloreltenema, Be tamen, tiun vesperon, subite ĝemante singultas. Li senĉese petas, ke oni donu al li trinki. Kujen jam anstataŭas sian amikinon Nam Njo por lin prizorgi. Ŝi trinkigas al li nur iomete da rizsupo kaj ne akvon.

— Franjo Ut, — ĝemplendante diras Be, — pro kio vi ne donas al mi akvon? Mi mortos pro soifo!...

Tenante en sia mano la ĵus ekbruligitan blankan vakskandelon, Kujen prove konsolas lin:

— Vi estas vundita, estas dangĝere trinki akvon! Prenu nur iomete da rizsupo... Kiam mildiĝos via doloro, mi trinkigos al vi akvon.

Be ĉiam ĝemplendas:

— Tuj donu trinki al mi!... Mi trinkos nur iomete...

Mordante al si la lipojn, Kujen forturnas sian kapon. La knabo sin montras malkontenta:

— Franjo Ut, pro kio vi ne donas al mi akvon? Vi ne kompatas min, ĉu ne?

Aŭdante tiujn parolojn de la knabo, dum ŝi estas verŝanta kelkajn vaksogutojn sur la ŝtonon, Kujen ne povas plu sin regi kaj preskaŭ ploras. Ŝi fiksas la vakskandelon ĉe la ŝtonbloko, poste venas al Tham, kun sufokita voĉo:

— Kamarado Tham, Be insiste petas, ke mi trinkigu al li akvon. Kion fari mi devas nun?

Tham kapskuas:

— Kiel ajn insista estas lia peto, ne donu trinki al li. Gardu vin, ke vi ne trinkigu al Be eĉ la plej etan akvoguton!

— Mi jam vane konsolas la knabon. Li diras, ke mi ne kompatas lin...

Post momenta silento, Tham diras:

— Mi trovas, ke oni ne devas lasi la brakon de Be tia, kun tiu glueca miksaĵo el ŝirita karno kaj rompita osto. Mi jam konas saman kazon; estas tre dangĝere plidaŭrigi tian staton. Laŭ mia opinio, necese estas likvidi tiun gluecan miksaĵon. Oni devas fortrancĉi ĝin!

Pretervole, Kujen ekkrias: «Ĉielo!»

— Ni nepre devos fari tion, — daŭrigas Tham. — Ĝuste per tio, ni nin montros, ke ni kompatas la knabon. Vi tuj iru fari raporton al niaj kamaradoj kaj sciigu al ili ankaŭ mian opinion por vidi, kiel ili faros!

La junulino iom skuas sian kapon:

— Mi timas, ke li ne povos elteni la doloron!...

Ŝi apenaŭ diras tion, kiam ekleviĝas la voĉo de Be:

— Iru, franjo Ut, iru demandi la onklojn! Se tio estas ebla, oni nur forigu per tranĉilo... Mi ne timas doloron. Fraĉjo Tham ja pravas! Mi certe resaniĝos post detranĉo de tiu glueca karnopeco!...

Kujen ne atendas, ke ŝian konversacion kun Tham aŭdas la knabo. Ŝi tre miras, kiam li tiel instigas ŝin. Sed ŝi restas ĉiam heziteme, ne volante ekpaŝi. Imagante al si tiun scenon de amputo, ŝi timas kaj tre kompatas lin. Jam de longe, ŝi rigardis lin, kiel sian propran frateton. De post tiu tago, kiam alportante rizon al la gerilbazo por la revoluciaj aktivuloj, lia patrino estis arestita kaj ekzekutita de la malamiko, lia patro sola perlaboris la vivrimedojn por si mem kaj por ambaŭ siaj filoj. Onklo Tu Raŭ jam firme decidis ne plu reedziĝi. Ĉiuj sentas kompaton antaŭ la situacio de lia familio, al kiu mankas la manoj de laborema virino. De tempo al tempo, Su aŭ Kujen barkoveturis al lia fiŝkaptejo por ordaranĝi la kuirejon, fliki la ŝiritajn vestojn de ambaŭ fratoj Be kaj Ut. Ĉiufoje kiam ili sukcesis kapti grasajn fiŝojn aŭ omarojn, Tu Raŭ kaj liaj filoj ne forgesis alporti ilin, kiel donacon al la familio de patrino Saŭ. La knaboj tre amis ambaŭ fratinojn Su kaj Kujen. Ili familiare nomis

la unuan, franjo Ba kaj la duan, franjo Ut. Be aparte sin montris obeema al Kujen; li plenumis iun ajn komision, kiun ŝi konfidis al li. Oni ankoraŭ memoras tiun tagon, kiam li insiste petegis ŝian intervenon, por ke li estu akceptita en la geriltaĉmento. Trovante lin aspekte fortika, kvankam li estis ankoraŭ infana kaj precipe pro tio, ke li estis malvarmsanga kaj ĉiam animata per tiu arda volo venĝi sian patrinon kaj siajn samvilaĝanojn, Kujen tuj klopodis ĉe onklo Tu Raŭ kaj Ba Ren pri lia aliĝo al la gerilorganizaĵo. Tiel, Be fariĝis trofrue gerilano, kiel tiom da aliaj junuloj en tiu Sud-Vjetnamio, devigataj preni armilojn, kiam ili estas ankoraŭ neplenaĝaj. Rekonita, kiel gerilano, li sin montris ne malsupera al iu ajn el siaj kolegoj. Kiam venis lia nokta gardodeĵoro, oni ĉiam vidis lin, spite pluvegon, fari kontroliron en la vilaĝeto, travadante kotajn rizejojn aŭ rampante en dornoplenaj ĝardenoj. Li sin montris ankaŭ zorgema kaj kompetenta en la starigo de bambupikiloj. Li ja kutimiĝis vivi tiun penigan vivon de mara fiŝisto, same kiel retkapti birdojn. Li ofte diris al Kujen:

— Franjo Ut, se okazus furioza batalo, aŭ la malamiko aŭ mi devus morti!

Kujen fidis al lia parolo. Rigardante al lia elstara frunto kaj precipe al liaj okuloj pretaj elverŝi larmojn, ĉiufoje kiam iu parolis pri lia patrino, oni estis tuj konvinkita, ke veron li diris.

Malgraŭ ĉio, la knabo Be ne mortas. Post tiu unua batalo, li ankoraŭ vivas, kun sia rompita maldekstra brako, kiu pli kaj pli doloras lin.

Kujen scias, ke li ĝemas tiel laŭte, ĉar li tre doloras. Kaj li aŭdacas konsenti, ke oni detranĉas lian brakon, ĝuste pro tio, ke li ne volas lasi tiun gluecan miksaĵon el ŝirita karno kaj rompita osto ankoraŭ turmenti lin. Sed, siaflanke, Kujen jam ŝanceliĝas. Ŝi ne povas ekpaŝi. Ŝi ne povas komuniki la ideon de Tham al Tam aŭ Hai Thep, kvankam ŝi trovas, ke Tham tute pravas. Kaj tre povas esti, ke tiuj kamaradoj ankaŭ aprobos tiun ideon... ; sed Kujen tre doloras, ŝi tre kompatas la knabon. Ŝi kompatas lin ne nur pro lia rompita brako, sed ankaŭ pro lia junaĝo kaj lia senpatrina orfeco. Ŝi ankoraŭ memoras tiun tagon, kiam kun bedaŭro li diris al ŝi :

— Mi terure sopiras manĝi fritpastaĵojn farĉitajn per kankroj. Tiam, panjo ofte preparis ilin kaj mi jam ĝissate manĝis...

Kujen tuj proponis :

— Mi ankaŭ scias friti tiujn pastaĵojn. Kiam mi libertempos, mi preparos ilin por vin regali.

Tuj, tiun vesperon, Kujen trempis la rizon en akvon kaj la sekvantan matenon, per muelŝtono, ŝi faris farunon kaj preparis tiujn fritpastaĵojn, poste ŝi invitis al si onklon Tu Raŭ kaj ambaŭ fratojn Be kaj Ut por regali ilin. Post la manĝo, la knabo Be helpis ŝin tralavi la bovlojn kaj telerojn kaj diris :

— Viaj fritpastaĵoj estas ankaŭ bongustaj... Sed mi ankoraŭ ne forgesas tiujn unuajn fritaĵojn, kiujn mia panjo prenis el la kaserolo mem por doni al mi, kiel provaĵojn !

Aŭdante tion, Kujen ekkonsciis, ke ŝi neniam povis doni al Be fritpastaĵojn similajn al tiuj, kiujn li jam

manĝis. Vere, ŝi ne povis prepari same bongustan manĝaĵon...

Krom tiu historio de fritpastaĵoj, pluraj aliaj pri la knabo subite ekaperas en ŝia memoro. Sed denove aŭdiĝas la voĉo de Tham, kiu urĝas ŝin :

— Iru, Ut Kujen, iru demandi la opinion de niaj kamaradoj ! Estas dangere plidaŭrigi tian staton !

Kaj la knabo Be ankaŭ insiste petas :

— Franjo Ut, vi nur diru al ili, ke mi povas elteni la doloron, mi estas tute kapabla !...

Kujen abrupte turnas sian rigardon al Tham kaj diras.

— Ne, mi ne...

Kaj ŝia voĉo kvazaŭ ŝtopiĝas en ŝia gorĝo.

Sub la senmova flamo de la vakskandelo, Be malrapide malfermas siajn okulojn por rigardi al Kujen :

— Franjo Ut, tuj iru, mi petas !... Mi trovas, ke tiu brako tre ĝenas min. Ĝi... ĝi kvazaŭ ne plu estas mia brako...

Kujen fikse rigardas iun momenton al la knabo, poste klinas sian kapon, fleksas unu el siaj genuoj kaj ekmetas sian manon sur lian ŝvitoplenan frunton. Subite Be demandas :

— Franjo Ut, ĉu vi ankoraŭ memoras, je kioma aĝo La Van Kaŭ * perdis sian brakon ?

---

* *La Van Kaŭ* : Soldato de la Vjetnama Popolarmeo, dum la rezistado kontraŭ la francaj koloniistoj (1946-1954). En la batalo apud Dong Ĥe (Kampanjo de la Landlimo, 1950), lia dekstra brako estis frakasita de malamika kuglo. Li tuj petis siajn kunbatalantojn detranĉi ĝin kaj daŭrigis la sturmon, tiel permesante al sia trupunuo ekstermi la malamikan pozicion. Li estis honorita per la titolo « Heroo de la Vjetnama Popolarmeo ».

La junulino tute embarasiĝas iun momenton, antaŭ ol povi respondi:

— Mi ne tre klare memoras... sed, ŝajnas, ke tiam Kaŭ havis dudek-du aŭ dudek-tri jarojn...

Poste, ŝi malrapide leviĝas kaj ekiras. Ŝi ja timas, ke Be denove petos akvon kaj ŝi devos kun ŝirita koro rifuzi al lia peto.

Alvenante al la kaverna koridoro, ŝi renkontas la kamaradojn, kiuj eniras.

— Kien vi iras, Ut Kujen? — Demandas Hai Thep.

— Mi iras serĉi vin, kamaradoj... La vundo de Be estas tre grava. Mi petas, ke vi...

Hai Thep delikate puŝas returne la junulinon:

— Revenu por vidi, kio okazas! Ni jam aŭdas pri tio. La knabo forte ĝemas, ĉu ne?

— Ne forte. Li provas ĉiumomente elteni la doloron. Nur kiam ĝi estas tro akra, li mallaŭte ĝemetas... Laŭ nia kamarado Tham, estas danĝere gardi longatempe tiun rompitan brakon...

— Bone, ni zorge ekzamenu la vundon, antaŭ ol fari decidon!

Kvar, kvin homoj, — inter kiuj troviĝas ankaŭ Ba Ren kaj Ngan, — eniras la grandan kavernon. Kujen kondukas ilin en direkto al la lumo de vakskandelo.

Be rigardas al ĉiuj, prove ridetante. Hai Thep eksidas apud li, ekzamenas lian brakon, poste delikate malvolvas la bandaĝojn. Be grimacas; ja, pro sangkoaguliĝo, la pansobendoj fikse algluiĝas unu al alia. Ĉiam atente rigardante al la eta vundito, Hai Thep firmdecide malvolvas ĉiujn pansaĵojn.

Prove eltenu la doloron, knabo mia! — Li diras. Se ni havas la kuraĝon por ekstermi la malamikon, ni ankaŭ havas la kuraĝon por elteni la doloron, ĉu ne, Be ?

La knabo denove ridetas.

Hai Thep delikate forigas la lastan vindotavolon, kiu fikse algluiĝas al la vundita brako. Be tre doloras, sed interfermante siajn dentojn, li eligas neniun krion. Lia antaŭbrako estas rompita ; proksime de la kubuto estas grizkolora kaj glueca miksaĵo el karno- kaj ostopecoj. Ŝajnas, ke jam odoras fetoro. Hai Thep rigardas ankoraŭfoje la vundon, antaŭ ol ŝovi la pansaĵon por ĝin ŝirmi. Poste, li iras al la loko, kie kuŝas Tham por informiĝi pri lia vundo.

— Ne gravas mia vundo! — Diras tiu lasta, antaŭ ol flustri al Hai Thep en la orelon. — Tiun antaŭbrakon de Be ni devas tuj likvidi. Miaopinie, plej bone estus, se ni detranĉus ĝin. Ne hezitu! Se ni plidaŭrigus tian staton, la vundito perdus sian forton kaj estos pli malfacile efektivigi la amputon...

Hai Thep restas iun momenton senvorte, poste diras :

— Mi ankaŭ samopinias, kiel vi.

Li forlasas baldaŭ la kuŝejon de Tham kaj kunvenigas la aliajn kamaradojn en iu aparta loko. Li venigas ankaŭ la junan Nam Njo :

— Gekamaradoj, kion vi opinias pri tiu afero ? Miaflanke, mi trovas, ke por savi la vivon de Be, estas nur jena solvo : detranĉi lian antaŭbrakon iom proksime de la kubuto. Tiun operacion ni devas fari kun kuraĝo ; la

knabo doloregos dum ia tempo kaj perdos unu antaŭbrakon, sed li vivos. Mi firme kredas, ke ni povos savi lin de morto. Nun, onklo Tu Raŭ, lia patro, ne estas ĉi tie; sed, se ni estas unuanimaj por fari tion, ni ĉiuj prenas sur nin la tutan respondecon antaŭ la Partio, antaŭ onklo Tu Raŭ.

— Mi havas saman opinion! — Ba Ren eklevas sian manon.

— Oni ne povas fari alie!

La dua homo, kiu aprobas tiun proponon de Hai Thep estas Ngan. Sed li aldonas:

— Necese estas demandi ankoraŭfoje la knabon, ĉu li povus elteni la elprovon.

Kujen iom mallevas sian kapon kaj kun malfacila tono intervenas:

— La knabo ĉiam urĝis min iri demandi la opiniojn de niaj kamaradoj... Li diris, ke li povas elteni...

— Ankoraŭfoje demandu lin!

— Bone, lasu min interparoli kun li.

Hai Thep ekstaras. Nam Tan tute maltrankviliĝas:

— Sed, kiu prenos sur sin la taskon fari tion? Kaj kiel fari?

— Ĉi tie ni ne havas segilon. — Diras Ngan. — Ni nur uzu nian sabron, jam zorgege steriligitan.

Hai Thep demandas:

— Kiu kamarado kapablas preni sur sin tiun taskon?

Neniu respondas.

Evidente, neniu volas detranĉi la brakon de Be. Hai Thep rigardas al Ba Ren:

— Kiel? Ĉu Ba Ren povas fari tion?

Ba Ren forturnas sian kapon. Estas unuafoje, ke li ne aŭdacas preni sur sin tiun farendan taskon por revolucia afero. Sendube, estas ankaŭ unuafoje, ke li subite fariĝas hezitema, malkuraĝa! Tiu estro de la Komunuma Komitato de Militaferoj, — kutime tiel aŭtoritata kaj decidema, — havas nun tre mizeran aspekton. Li mienas tute malvigle kaj severe pripenseme. Antaŭe, li estis ege entuziasma, kiam li povis propramane, per sia sabro, senkapigi iun ajn kruelegulon; sed nun, ekpensante pri tio, ke li devas preni la saman sabron por detranĉi la brakon al tiu eta amiko gerilano, li havas la impreson, kvazaŭ tiu afero superas lian imagan forton. Li povas fortranĉi unuspire dek kapojn al tiu kruelega kanajlaro, sentante nek lacecon, nek maltrankvilon. Sed, koncerne tiun vunditan brakon de Be, nur parolante pri ĝia amputo, li jam havas tian senton, kvazaŭ lia koro estas trapikita per pluraj pingloj kaj liaj manoj jam senenergie tremetas.

«Pro kio kamarado Hai Thep opinias, ke tion fari mi sola povas! Ĉu li kredas, ke kutimiĝinte senkapigi la kruelegulojn, miaj manoj kapablas ankaŭ plenumi tiun taskon? Mi diros al li, ke mi estas nekapabla!» Tiel pensas Ba Ren, kapskuante:

— He, konfidu tiun taskon al alia kamarado! Mi ne emas fari tion!

Hai Thep rigardas al Ba Ren, nenion dirante. Poste, li sin direktas al la knabo Be.

— Verdire, mi ankaŭ povas detranĉi tiun brakon, kiel iu ajn kamarado, kiu troviĝas ĉi tie!—Diras Ngan. — Ĉar tute klarvidebliĝas, ke ni faras tion por

savi nian amiketon Be de morto. Sed, mi opinias, ke plej bone estus, se ni komisius tiun taskon al Ba Ren: li estas pli lerta kaj povas detrančî la brakon per unusola bato, — kio malpliakrigos la doloron de Be...

Ĉiuj ĉeestantaj kamaradoj kapbalancante aprobas la ideon de Ngan. Ĝuste tiam, Hai Thep revenas:

— Mi jam interparolis kun la knabo. Li deklaris sin preta elteni la doloron, kiam oni detrančas lian vunditan brakon. Sed, li petis, ke la operacion ni rapide plenumu...

Ĉiuj ankoraŭfoje ĵetas sur kamaradon Ba Ren sian esploreman rigardon. Tiam, tiu lasta, kvazaŭ per ĉiuj siaj fortoj, provas forpuŝi nevideblan ŝtonblokon, kiu pezas sur lian bruston. Subite, li ekdiras:

— Bone, lasu min fari!

Ĉe tiuj vortoj, Ba Ren abrupte ekstaras:

— Sed, mi proponas, ke samokaze oni permesu al mi ekzekuti ambaŭ geedzojn Ba Fi. Eĉ al ni mankas rizo kaj akvo; do, ĉu ni vane vivtenos ilin?

— Pacience! — Diras Hai Thep. — Ni devas ankoraŭ fari pridemandojn kaj post kelkaj tagoj, ni likvidos ilin. Ja, tiu afero tute ne urĝas! Cetere, bone estus, se niaj samvilaĝanoj povus, en plena kompleteco, partopreni la juĝkunsidon.

— Vi pravas! Ili estas inter niaj manoj; do, la afero ne urĝas!

— Nun, ek al laboro! — Ordonas Hai Thep. — Nam Njo, vi iru serĉi merkurokromon, kotonon kaj pansobendojn! Nur Ba Ren kaj mi restos ĉi tie kun la knabo Be. La ceteraj kamaradoj revenu al via

posteno. Estu vigle atentemaj! Povas esti, ke ĉi nokte ili ankoraŭ atakos nian kavernon!

Ngan kaj la aliaj kamaradoj ekleviĝas kaj, kunportante siajn pafilojn, iras al la kaverna faŭko. Kujen ankaŭ postiras ilin. Baldaŭ revenas Nam Njo kun la sanitara sako.

— Vi iru boligi akvon, por ke Ba Ren steriligu sian sabron! — Diras al ŝi Hai Thep. — Tiu akvo servas ankaŭ, kiel trinkaĵo! He, ĉu vi havas ankoraŭ anestezilon?

— Ankoraŭ du ampolojn.

— Ĉu antaŭ la operacio, vi povas injekti al la knabo anestezilon?

— Jes, tio iom kvietigos la doloron!

— Do, vi diru al Ba Ren, ke li sin pretigu kaj sciigu al mi, kiam ĉio estas preta!

Akompanate de iu gerilano, Hai Thep iras al la kuŝejo de Be. La knabo rigardas lin, kvazaŭ volante demandi: « Pro kio tiel malfrue? »

Hai Thep eksidas apud li. Kun trankvila tono, li rakontas al la knabo, kiel hodiaŭ la malamikaj soldatoj estas forpuŝitaj el la kaverno, kiajn pafilojn ni jam kaptas. Aŭskultinte la rakonton, Be lumradias de ĝojo kaj post langoklako, li bedaŭre diras:

— Ha, se mi ne estas vundita...

— Jes, plej bone estus, se vi ne estus vundita... Tamen, malgraŭ via vundo, ne gravas via sano. Vi reakiros vian forton, post detranĉo de tiu glueca miksaĵo el karno kaj osto. Dank' al anestezilo vi ne tre doloros!

— Eĉ doloregon mi volonte eltenos kun fermitaj dentoj! Mi bedaŭras nur, ke mi jam perdas unu brakon...

— Ĉu vi malĝojas pro tiu perdo?

La knabo hezitas iun momenton, antaŭ ol respondi:

— Mi malĝojas kaj ne malĝojas!

Hai Thep iom levas sian buŝangulon por rideti. Be ankaŭ ridas, poste li daŭrigas:

— Mi malĝojas, ĉar mi timas, ke de nun mi ne povas pafi sed ne pro timo al mia kriplaĵo. Kiam mi aliĝis al la geriltaĉmento, mi jam pensis, ke por mortigi la la malamikon, oni riskas iafoje estis vundita de malamikaj kugloj. Mi opinias, ke tiuokaze, mi tute ne malĝojus, se mi malbonŝance grave vundiĝus!

Hai Thep tute miras pri tiu respondo de la knabo. Li mem, iufoje, ankaŭ samopiniis, kiel Be. « Jes, — li murmuras, — se oni klare antaŭvidas tion, por esti preta elteni sortobaton, oni ja ne konas timon. Be estas nur deksepjara, sed li havas jam indan sintenadon de vera batalanto, kiu scias manipuli sian fusilon por defendi justan aferon! »

Li sin turnas posten kaj mallaŭte diras al la gerilano:

— Vi iru vidi, ĉu Ba Ren jam finas siajn pretigaĵojn!

La knabo Be subite demandas:

— Onklo Hai, kie estas franjo Ut? Pro kio ŝi ne venas ĉi tien kun mi? Voku ŝin al mi, mi petas!

— Bone, mi sendos voki ŝin!

Kaj Hai Thep sin turnas al la gerilano:

— Vi samfoje voku fraŭlinon Ut Kujen al ni!

La vizaĝtrajtoj de la knabo restas ĉiam senŝanĝaj. Kiam Kujen eniras, li sin turnas al ŝi kaj etendas sian dekstran brakon por prove kapti ŝian manon. Lian vunditan maldekstran brakon Hai Thep jam delikate metas sur dikan tukotavolon. Li ekbruligas plian vakskandelon kaj tenas ĝin en la mano. Aŭdiĝas la grincado de segileto sur la anestezilampolo kaj ankaŭ la bruo de vitrorompado sub la fingroj de Nam Njo. Tiam, la dekstra mano de Be pli streĉe premas tiun de Kujen.

Ĉapitro IV

1

La estingiĝanta flamo kraketas. Ŝprucis lasta ekbrilo kaj la kandela meĉo dronas en la tavolo de fandiĝinta vakso. La lasta lumigita angulo malaperas samtempe kun la silueto de Kujen, kiu profilas sur la muro de la kaverno. Kun vizaĝo kaŝita post la manoj, la junulino duondormas, ĝuste kiam estingiĝas la vakskandelo kaj kiam la knabo Be ĉesas moviĝadi en sia dormo.

Tuj baldaŭ tagiĝos.

Ekstere, la ĉielo sendube heliĝas. Sed la mallumo estas totala en la kaverno. Ju pli proksimiĝas la mateno, des pli akra iĝas la malvarmo. Vekiĝinte sur sia ŝtona kuŝejo, Su eksentas froston en siaj piedoj. La etulino Thuji ĉirkaŭbrakas ŝin kaj pli kaj pli preme alkroĉiĝas al ŝi. La juna patrino palpas la piedojn de la infano; ili estas ankaŭ frostiĝintaj. Ŝi rapidas levi kaj premi ilin inter siaj femuroj. Iun momenton poste, kun multaj antaŭzorgoj, ŝi klopodas por sin liberigi el ŝia ĉirkaŭpremo. Ŝi ekstaras, prenas el la tolsako, uzata

kiel kuseno unu vakskandelon, longan je unu fingro kaj ekbruligas alumeton. La lumo traboras la maldiafanan vualon de la kaverno.

Kun vakskandelo ĉe la mano, Su rigardas sian dormantan filineton, kies manetoj senigitaj de ĉia subtenilo kuŝas sur peco da nilono, kiu servas, kiel mato. Ŝi profunde dormas, la kompatinda etulino! La mallonge tonditaj kapharoj falas sur ŝian frunton; longaj palpebroharoj ombras ŝiajn fermitajn okulojn. Ŝiaj purpuraj lipoj ŝajne movetiĝas kaj la aloj de ŝia eta nazo tremetas. Ĝuste tiu regula spirado jam de sep, ok jaroj varmigas la koron de Su, sorbigante ĝin per tiu bona odoro de lakto, de maturiĝinta frukto, odoro propra al la pura spirado de l'infano.

Jam de sep, ok jaroj, la juna virino vivas nur por sia filineto, la unika frukto de disigita amo, ĉar ŝia edzo troviĝas ankoraŭ en Nordo.

Kiom da fojoj ŝi kontemplas la etulinon silente, dum ŝia dormo. Ŝi aŭskultas ŝian spiradon, rigardas ĉiun el ŝiaj okul- kaj kapharoj, ŝian frunton kaj ŝiajn grasdikajn manetojn. Ŝi opinias sin kapabla rigardi ŝin plurajn tagojn, senlace. Estas do grava afero, kiam ŝi devas resti for de sia filineto, dum pluraj monatoj. Antaŭ du jaroj, la usono-dziemaj aŭtoritatuloj ĵetis la junan patrinon en *tigrokaĝon*, kie oni povis resti nek stare, nek side aŭ en krokodi*lokaĝon*, kie la akvo atingis ĝis la genuoj. Ŝi multe suferis, ne pro tiuj pintaj vitropecoj, kiuj ĉirkaŭbaris ŝin en la tigrokaĝo aŭ la akvo de la krokodilokaĝo, kiu froste rigidigis ŝiajn piedojn

sed ĝuste pro tio, ke disigita de sia amata filineto, ŝi ne povis aŭdi ŝian babiladon.

Tial, la tagon de ŝia liberiĝo, post venkoplena lukto de la loĝantoj de Hon Dat, oni jam vidis tiun dudekokjaran virinon plori, kiel knabino, kiam ŝi retrovis sian etulinon. Ŝi diris al si en la pensoj, ke pli poste, kiam la lando estos reunuigita kaj, kiam ŝia edzo revenos hejmen, ŝi pasigos tutajn noktojn por rakonti al li ĉion, kion ambaŭ patrino kaj infano estis pacience suferintaj dum lia foresto por komprenigi al li, kiajn malindulgaĵojn de l'sorto ili estis spertintaj kaj por pliardigi lian amon al ili.

Tiel ŝi pensis dum sia aresto kaj dum la ĝismortaj luktoj, kiuj pli poste eksplodis. Kaj ankaŭ en tiu momento, kiam en la profundaĵoj de la kaverno ŝin persekutas la eĥo de la batalo. Eksplodbruoj, krioj, hurloj de la malamikoj, timzorgo antaŭ la kruĉo da elĉerpiĝanta akvo, ĝemoj de Be, kiu perdis sian brakon... Ŝi trovas nekutima la silenton de la nokto. Tio estas minaca silento, kiu postsekvas la muĝadon de l'ondegoj, la kvieton de ĝardeno, trafita de la unua blovego de ciklono. Ne grave! Por Su, provizore regas la trankvileco kun la lumo, kiun ŝi tenas en la mano, la amata vizaĝo de ŝia filineto kaj la regula ronkado de ŝiaj kamaradoj.

Subite, ŝi ekpensas: «Li devas ankoraŭ dormi en tiu ĉi horo. Li ne povas pensi, ke Thuji kaj mi, ambaŭ pasigas la nokton en tiu ĉi kaverno. Jes, tion li ne povas imagi al si...» Ŝi ekŝovas sian manon en la poŝon: la letero, kiun ŝi ĵus ricevis de sia edzo kuŝas

ankoraŭ tie. Sereniĝinte, ŝi zorge kovras sian filineton antaŭ o l leviĝi.

Ŝi faras apenaŭ unu paŝon, kiam ŝin vokas Thuji per obtuza voĉo, ankoraŭ raŭkiĝanta pro dormemo:

— Panjo!

Ŝi senmoviĝas atendante, ke la infano plu dormas. Sed, Thuji denove insistas, kvazaŭ ŝi tuj ploros:

— Panjo! Panjo!

— Jen mi!—Rapide diras Su—Dormu, infano mia! Mi devas ankoraŭ boligi akvon por la kamaradoj.

— Ne, mi estas tedita de dormo... Lasu min iri kun vi.

Su proksimiĝas al ŝia kuŝejo.

— Venu!

Thuji rampas al sia patrino kaj metas siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon. Su foriras kun la filineto sur la dorso, subtenante ŝin ĉe la flankoj per unu mano kaj tenante per la alia la vakskandelon por lumigi la vojon. Ŝi transpaŝegas la dormantajn gerilanojn kaj direktiĝas al la antaŭvespere instalita fajrujo.

Ŝi iom fleksas la genuojn por permesi al Thuji stari sur la tero, verŝas sur la ŝtonon kelkajn vaksogutojn, sur kiujn ŝi metas la kandelon.

Dum ŝi faras fajron, Thuji proksimiĝas al ŝi kun revema mieno...

— Mi havis strangan sonĝon, panjo!

— Kia ĝi estis?

— Mi vidis en sonĝo... unu feinon... kun mirinde belaj flugiloj. Ŝi devis esti la sama, pri kiu onklo Tham jam parolis al mi ĉi matene. Sed, ŝi tre similis al onnjo Kujen. Ŝi vokis min per mia nomo; vere estis la voĉo

de onnjo Kuyen... Ŝi iom svingis la flugilojn kaj diris al mi: «Grimpu sur mian dorson, mi kondukos vin al paĉjo...» Mi ĝojkriis: «Sed atendu, mi devas voki panjon, por ke ŝi ankaŭ iru kun mi.» La feino kapjesis. Tiam, mi kuris ĉiuloken, laŭtvoĉe vokante vin. Poste, mi vekiĝis. Mi kriis, ekrimarkante, ke vi ne estis tie, apud mi.

— Kiam vi min vokis? — Demandas Su, rigardante sian filineton kun surprizo kaj scivolemo. — Ĉu la feino estis tie?

Thuji aplombe ekbalancas la kapon. Poste kun larĝe malfermitaj okuloj, ŝi fikse rigardas al la enirejo de la kaverno. Sendube, ŝi pensas, ke la feino forflugis de ŝia songo laŭ tiu direkto.

La fajro estas bruligita. Ĝoje kraketas la brulŝtipoj. Fajrobriloj dancas sur la meditema frunto de la etulino, kiu eble daŭrigas sian belan songon. La flamo lumiganta la vizaĝon de Thuji inspiras esperon al ŝia patrino, kiu sentas sin feliĉa, kvazaŭ ŝi mem ĵus havis tiun songon. Tiam, ŝi komencas revi pri la estontaj renkontiĝoj, pri la feliĉa reunuiĝo, al kiuj ŝi arde aspiris jam de multaj jaroj.

La luma cirklo senĉese plilarĝiĝas. La flagranta flamo lumigas la vizaĝon de la gerilanoj, tute junaj viroj, kiuj profunde dormas. La lumo penetras ĝis la fundo de la kaverno kaj la ombro de Kujen denove tremetas sur la rokmuro.

— Prenu tion ĉi!—Diras Su, transdonante la vakskandelon al Thuji.—Lumigu al mi, por ke mi iru serĉi akvon.

La etulino ekprenas la vakskandelon kaj lertmove leviĝas. Ŝia patrino portas la kaserolon kaj ambaŭ direktiĝas al iu angulo, kie estas ordometitaj la kruĉoj. Su zorgege verŝas la akvon en la kaserolon tiel, ke perdiĝas neniu guto, ĉar la trinkebla akvo jam fariĝas altvalora rarajo. Restas nur unu akvoplena kruĉo. La tutan tagon, patrino kaj filineto trinkas nur po unu gluto, post la vespermanĝo, kiu konsistas el plenmano da rostita rizo. La varma akvo estas preskaŭ tute rezervita al la batalantoj, la restajo servos por prepari supon al la vunditoj. Su ne povas kaŝi sian grandan timzorgon : nepre mankus akvo, se longdaŭrus la batalo.

— Etulino mia ! — Ŝi diras. — Trinku plejeble malmulte ! Prenu unu gluton el tiu pokaleto, nur kiam vi ne povus plu elteni soifon. Preskaŭ elĉerpiĝas la akvo !

— Jes, panjo ! — Thuji respondas per tute mallaŭta voĉo kaj etpaŝe iras al la fajrujo, akompanate de sia patrino. La vakskandelo estas estingita, tuj kiam la kaserolo estas metita sur la fajron. Ĉe la fundo de la kaverno, Kujen ekbruligas alian vakskandelon kaj ŝtelpaŝas al la fajrujo. Ŝi eksidas apud Thuji kaj donas al tiu lasta sonoran ŝmacon. Per trema voĉo, la etulino flustras al ŝi en la orelon :

— Onnjo Kujen, ĉu Be... tuj mortos ?

— Tute ne ! Ne diru stultajojn, karulineto mia !

Metante la infanon sur siajn genuojn, Kujen sin turnas al sia fratino Su :

— Be jam fartas pli bone ! Post la amputo de sia antaŭbrako, li fariĝis pli malforta ; sed nun, li ne plu ĝemas. Li povis iom dormi la pasintan nokton.

— Tio tute feliĉigas min... Sed, zorgu, ke li nerimarkite mortiĝu!

— Ne maltrankviliĝu! Lia spirado estas regula kaj lia koro normale batadas. Ni konstante maldormas. Li ĵus vekiĝis kaj demandis min, ĉu jam mateniĝas. Tial, ke mi informiĝis pri lia sanstato, li respondis al mi: «Mia brako nur iom rigidiĝas, ĝi ne plu doloras min. Certe, mi resaniĝos, ĉu ne?»

Su palpebrumas kaj baldaŭ el ŝiaj okuloj perlas larmoj. Thuji enŝovas la kapon en la akselon de sia onklino, kiu daŭrigas:

— Mi neniam pensis, ke la knabo Be estas tiel kuraĝa. Mi konfesas, ke mi deturnis la okulojn dum la amputo. Kaj tamen, neniu krio eliĝis el liaj lipoj. Li kontentiĝis nur pli forte premante mian manon.

— Tio devis kaŭzi al li teruran doloron. — Diras Su post longa silento — Li jam sin detenis de krio. Oni ne povas fortranĉi vian brakon sen kaŭzi al vi doloron. Ĝis nun, en okazo de plej urĝa bezono, oni uzas segilon kaj neniam tranĉilon por la amputo.

— Jes ja, ekzistas simila okazo: La Van Kaŭ, en la batalo apud Dong Ĥe.

— Vere, estis La Van Kaŭ...—Kujen sin klinas al sia fratino:

— Antaŭ la operacio, Be jam demandis min...

— Pri kio do?

— Pri la aĝo de La Van Kaŭ en tiu epoko. Tial, ke mi ne sciis ekzakte lian aĝon, mi respondis: dudek-du aŭ dudek-tri jarojn. Be diris el mi: «Bone! Kaŭ havis la kuraĝon por amputigi sian brakon, mi ankaŭ povos fari la samon».

Su lasas siajn larmojn ruliĝi sur la vangoj. Kun kvazaŭ ŝtopita gorĝo, ŝi viŝas al si la okulojn per la maniko de sia jako. Aŭdiĝas la plorsingultoj de Thuji.

— Ĉiuj ploris, krom Tam, kiu tenis la knabon Be en siaj brakoj. — Daŭrigas Kujen — Kiel granda estis nia emocio, kiam li svenis. Ni retrovis trankvilon en la penso, nur kiam li malfermis la okulojn.

Subite, Su ekleviĝas kaj diras:

— Mi iras vidi lin iun momenton. Kiam la akvo estas taŭge boligita, verŝu ĝin en la ladbotelojn, Kujen, unusolan pokaleton po ladbotelo.

Senprokraste, ŝi foriras. Thuji sin elŝiras el la brakoj de sia onklino por tuj sekvi sian patrinon.

Sola apud la fajrujo, Kujen blovekscitas la fajron, ĝis la akvo kantas, boliĝante en la kaserolo. Ŝi metas ĝin sur la teron kaj eniras en la antaŭan kavernon. Tie, ŝi vidas pli klare, ĉe ĉiu paŝo, tial, ke la ektagiĝo jam penetrigas iom da pala lumeto en la profundaĵojn de la kaverno. Post sendorma nokto, Kujen marŝas per malpezaj paŝoj kun la impreso, kvazaŭ ŝi estus nereala. Ŝia nerva tensio malaperis por cedi lokon al profunda emocio. Unu tago de batalo, sekvita de unu sendorma nokto... kaj kiom da eventoj! Timzorgo, kompato, amemo, ĝojo... ja, ĉiuj sentoj vibras tra ŝia koro.

Ŝi iras rekte al la loko, kie sidas Ngan. Malgraŭ la duonombro, ŝi tuj trovas lin, sen malfacilaĵo, kvazaŭ gvidate de l'instinkto. Kontraŭe al sia kutimo, ŝi ĉirkaŭbrakas la junan viron, kiu tute miras pri tiu neatendita korelverŝado. Sed, li tuj komprenas. Tio ne estas ordinara manifestiĝo de l'amo. La junulino volas esprimi per tiu gesto ĉion, kion ŝi trovis mirinda en

sia koro, de post la hieraŭa nokto. Ŝi ne povas gardi por si sola tiun ĝojon kaj volas dividi ĝin kun Ngan. Tial, la juna viro ne respondas per simplaj manifestiĝoj de l'amo. Li eĉ ne brakumas ŝin. En la mallumo, li kontentiĝas apogante la kapon de Kujen sur sian propran ŝultron. Post momenta silento, li ekprenas inter la manoj ŝian vizaĝon ankoraŭ varmigitan de l' fajro kaj fikse rigardas ŝin. Sed li ne distingas ŝiajn trajtojn. Li sentas nur ŝian freŝan spiradon. Sole la brilaj okuloj de Kujen malkaŝis al li sian emocion.

— Kio tiel afliktis vin, Kujen?

Kujen malretenas la junan viron kaj balbutas:

— Sed... nenio..., tion mi certigas al vi.

Verdire, tion ŝi mem ne scias. Ĉu tio estas la spektaklo de l'malamikoj hurlantaj ĉe la enirejo de la kaverno aŭ la vido de ŝia fratino Su troŝpareme dividanta la rezervon da akvo en etajn porciojn aŭ ankoraŭ la premo de la unika mano de Be dum la tuta nokto? Tio devos esti ĉiuj ĉi faktoj kune ligitaj kaj ne unu el ili aparte konsideritaj.

— Ĉu vi bone dormis? — Demandas Kujen, kvazaŭ elirante el iu revo.

— Tute certe! Oni jam organizis la gardon.

— Ni faris la samon, Nam Njo kaj mi. Nam Njo maldormis ĝis noktomezo, poste venis mia vico ĝis la mateno.

— Ĉu li fartas bone, la povra knabo?

— Jes. Sed mi estis maltrankvila, la tutan nokton. De tempo al tempo, mi palpis lian bruston kaj aŭskultis lian spiradon. Mi timis, ke li povus «foriri».

— Se li jam pasigus la nokton, la danĝero estus forigita. Mi ankaŭ tre maltrankviliĝis pri lia sanstato.

Kujen prenas la ladbotelon kroĉitan al la zono de Ngan. Ŝi ekrimarkas skuetante ĝin, ke ĝi estas malplena. Silente, ŝi leviĝas kaj komencas kolekti la ladbotelojn de la gerilanoj por kunporti ilin en la internon de la kaverno.

Dum ŝi plenumas sian taskon, subite aŭdiĝas la krioj de Ngan :

— Jen ili ! Alarmon !

Homaj siluetoj impetas en la kavernon. Kujen ne havas la tempon por algluiĝi al la rokmuro, kiam ŝi estas piedbare faligita sur la teron. Unu kartoĉbendo de « Thompson » kraketadas, tuj sekvata de densa pafado. Kontraŭlume, Kujen vidas fali la siluetojn de la atakantoj. Ŝi rampas al iu kavaĵo. Vidalvide al ŝi, Toi pafas al la kaverna faŭko per sia mitraleto. Ŝi komprenas nun, ke tiu lasta ĵus renversis ŝin teren.

Neniu malamiko vidiĝas ĉe la enirejo. Sed, jen pluraj trairas ĝin de unu flanko al alia, rapide kaj senhalte, kvazaŭ navedoj. Ĵetaĵoj same grandaj, kiel pugno, flugas en la kavernon kaj frapiĝas kontraŭ ĝiaj rokmuroj.

— Atentu ! Grenadoj !

La grenadoj ruliĝas sur la tero apud la enirejo. Antaŭ ol ili eksplodas, aliaj estas ĵetitaj pli internen, kiel saltantaj ombroj.

La mortigaj splitoj de eksplodigitaj grenadoj faras multajn truojn en la rokmuroj de la kaverno, baldaŭ invadita de densa fumo, kiu plenigas ĝian enirejon. La

ŝtonfragmentoj disflugas en la aeron. El ili pluraj same grandaj, kiel pieda dikfingro, falas sur la dorson de Kujen; ŝi palpas sian tutan korpon por trovi, ĉu ŝi estas vundita. Ŝi estas komplete surdigita de senĉesaj grenadeksplodoj kaj sufokita de la pulva fumo. Baldaŭ, ŝi aŭdas urĝajn kriojn de Ngan:

— Preparu vin por retiriĝo! Laŭ mia ordono, plej rapide atingu la fundon de la kaverno!

La eksplodoj superbruas la voĉon de Ngan. Kontraŭe al sia kutimo, la malamikoj rezignas pri sia intenco penetri en la kavernon. Ili kontentiĝas kurante antaŭ ĝia faŭko aŭ starante ĉe ĝia elirejo por lanĉi internen la grenadojn MK3, kies eksplodo interrompas vian spiron, kvazaŭ vi estus premita per grandegaj ŝtonblokoj.

Kiel fari por sendanĝere forlasi siajn poziciojn?

Plurfoje Ngan provas restariĝi, sed la MK3 ĉiam perdigas al li la okazon eksalti aliloken. La seninterrompaj kaj furiozaj grenadeksplodoj algluas lin al la tero. Li ekpensas: «Post tiu atako, se ili sturmus, ni ne povus ĝustatempe reagi». Li malstiftas unu grenadon MK3 kaj ordonas al siaj kunbatalantoj:

— Malstiftu viajn grenadojn kaj tenu ilin prete en la mano!

«Ĉio, kion oni riskas estas morti ĉi tie, ĉiuj kune!». Li diras al si en la pensoj kaj atendas tiun decidigan minuton. Sed la grenadoj ne plu penetras en la kavernon. Venas la momento aŭ neniam! Li ekstaras. Prenante sian «Thompson»-on en unu mano kaj ĵetante per la alia unu grenadon MK3 al la enirejo, li ekkrias:

— Retiriĝu, kamaradoj!

La gerilanoj forkuras internen. Ngan ŝirmas ilian retreton per pafado de sia «Thompson», antaŭ ol reatingi siajn kamaradojn. Ili haltas ĉe iu vojforko. Tie, la grenadoj ne povas facile trafi ilin. La loko estas malproksima de la enirejo kaj kovrita per rokoj. Leviĝas angoraj voĉoj:

— Kujen! Kujen! Kie vi estas?

Ngan laŭte krias:

— Kujen, kie vi estas?

Silento. Ngan grandpaŝe kuras al la loko, kiun li ĵus forlasis. Toi provas lin akompani:

— Revenu, Ngan! Lasu min iri tien!

Neniu respondo. Ngan fine falas sur la piedojn de la junulino, kiu kuŝas per sia tuta longo en iu kavaĵo, kun brakoj plektitaj antaŭ la brusto. Li restarigas ŝin, aŭskultas ŝian spiron. Neniu vundo sur ŝia korpo. Traŝultre pendiginte sian armilon, li portas la junan Kujen en siaj brakoj kaj, kun pezaj paŝoj, direktiĝas al la interno de la kaverno.

Estas plenlume, ekstere.

Iu altstatura oficiro, vestita per vinfeĉokolora kuloto kaj kun pistolo en la mano, kriaĉas al siaj soldatoj:

— Ĵetu sur ilian kapon ĉiujn ĉi grenadojn! Pretigu vin!

La soldatoj tuj sin ĵetas sur la larĝe malfermitajn grizajn kestojn. Ili distribuas inter si la brile novajn MK3. Ĉiu malstiftas du grenadojn per la dentoj, poste zorge staras en vicoj ĉe unu flanko de la enirejo, antaŭ ol eksalti al la alia, ĵetante ilin en la kavernon.

De post la ektagiĝo, kvardek kestoj da grenadoj estas transportitaj tien, por ke oni apliku la taktikon de «ripetitaj atakoj», laŭ la instrukcioj de du jankiaj konsilantoj. Po dudek por kesto, ili jam vane uzas ĉirkaŭ ducent grenadojn. La fumo estas tiel densa, ke ĝi komplete vualas la kavernan enirejon kaj oni vidas nenion en la kaverno. Sed, singardema, la oficiro ankoraŭ ne aŭdacas meti finon al tiu operacio. Pro troa kurado de unu flanko al alia, la soldatoj estas tute lackonsumitaj kaj ne povas plu malstifti la grenadojn per siaj dentoj.

La suno jam alte pendas en la ĉielo, kiam kvardek kestoj estas elĉerpitaj. Fine, dense amasiĝas la fumo. La oficiro krie ordonas la sturmon. Tial, ke ĉiuj hezitas, li tute furiozas:

— Hundaĉoj, ili ĉiuj jam mortis kaj kion vi ankoraŭ timas?

Li eklevas sian «Colt 12», trabreĉas vojon tra siaj soldatoj, dirante:

— Forflankiĝu! Lasu min eniri! Malkuraĝuloj, hm!

Kun kruela mieno, li penetras en la kavernon, tuj sekvata de siaj korpogardistoj, ankaŭ bravaĉaj.

Li apenaŭ faras kelkajn paŝojn, kiam unu kuglo trafas lin ĝuste en la mezo de la buŝo. Li renversfalas. Liaj botoj batas iun momenton la fumplenan aeron, lia «Colt 12» falas el lia mano, ne povante ĵeti eĉ unu kuglon. Poste, lia korpo konvulsie baraktas, kiel fiŝo ĵus ricevinta mortigan baton ĉe la kapo! Liaj

korpogardistoj lasas lin senhelpa kaj grandpaŝe forkuras. La sango kovras lian vizaĝon, kiu fariĝas same ruĝa, kiel lia kuloto. Lia groteska kaj grasdika korpo iom post iom malaperas sub densa fumtavolo.

2

— Kujen, Kujen!

Tiel abrupte vokas Su, portante sian junan fratinon ĉe la brakoj. Liaj vokoj estas tute urĝaj, tamen ambaŭ okuloj de Kujen restas ĉiam komplete fermitaj. La etulino Thuji ankaŭ sin ĵetas sur sian onklinon, kriante:

— Onnjo Ut! Onnjo Ut!

Poste, ŝi ploregas. Su haste palpas la tutan korpon de Kujen, sed ŝi trovas neniun vundon. Eble, kiel diris Ngan, Kujen estas premsufokita de la eksplodblovo de grenado. Ŝi forte masaĝas la bruston de sia fratino, kiel faris Nam Njo, de post kiam Ngan venigis la viktimon al la fundo de la kaverno. Sed, Kujen restas ĉiam senmove. Ŝi kuŝas per sia tuta longo sur la brakoj de Su, kun malvolvitaj kapharoj, kiuj falas ĝis la ŝtona planko.

Nun, estas la vico de aliaj kamaradoj ekbruligi vakskandelojn por Kujen, same kiel Kujen jam ekbruligis ilin por la knabo Be.

Kvar kandeloj brulas, faligante blankajn gutojn de fandiĝanta vakso ĉe sia piedo. Sub ilia flagranta lumo,

la vizaĝo de Kujen aperas tute pala, kun paro da iom kuntiriĝintaj arkformaj brovoj kaj ambaŭ lipoj duone fermitaj, kvazaŭ ŝi volus daŭrigi ian ankoraŭ ne finitan rakonton. Intertempe, zorgoplena, Su tute embarasiĝas. Ŝi havas la impreson, kvazaŭ ŝi estas brakumanta sian fratineton, kiam tiu lasta estas ankoraŭ bebo por luli ŝin al dormo per unutonaj lulkantoj, tiuj lulkantoj, kiujn ŝi mem jam aŭdis el la buŝo de sia patrino dum siaj infanjaroj. En siaj brakoj kuŝas nun ŝia plej amata fratino, — tiu etulino, kiun ŝia patro preterfluge ekvidis en la brakoj de ŝia patrino nur unufoje, ĝuste en tiu vespero, kiam la pluvego minacis fali kaj, kiam pluraj soldatoj, vestitaj per « flava mantelo », kondukis lin, preter la domo, al la ekstremo de la vilaĝeto por lin mortpafi. Tiun fratineton, Su ja ne senpene portis ĉe siaj koksoj, malsuprenirante la ŝtuparon aŭ promenante ĉe la piedo de mangujoj kaj jakvujoj. Poste, kiam Kujen estis granda, Su fordoniĝis kun ŝi al pluraj infanludoj, kun plezuro rezervis al ŝi la plej grandan parton da kuko aŭ la plej maturajn mangojn. Tiu juna fratino kuŝas nun duonsvene en ŝiaj brakoj. Su ĉiam pentas pri tio, ke antaŭmomente, ŝi estus malpermesinta al Kujen iri provizi akvon al la kamaradoj, ke plej bone estus, se ŝi mem irus.

— Onnjo Ut! Onnjo Ut!

Thuji pli laŭte krias. Ŝi mallerte brakumas la piedojn de Kujen, plorante kaj kriante. Ŝia vizaĝo estas plenkovrita per larmoj kaj nazmuko. Vere ŝi tre kompatas sian onklinon.

Su ne ĉesas masaĝi la bruston de sia fratino. Kio donas al ŝi esperon estas tio, ke la koro de Kujen

ankoraŭ batas kaj la brusto de Kujen ankoraŭ moviĝetas. Subite, la junulino ektremas kaj palpebrumetas. Kaj iun momenton poste, duone malfermiĝas ŝiaj okuloj. Tute ĝoja, Su ekkrias:

— Jam malfermiĝas la okuloj! Ŝi ja reviviĝas!

Ŝi ekploregas. Kaj ploregante, ŝi lamente krias:

— Ut Kujen, Ut Kujen! Jen estas via fratino!

— Onnjo Ut! Onnjo Ut!

Post la urĝaj vokoj de Thuji, Kujen komplete malfermas siajn okulojn. Ŝi mirkonsternite rigardas al Su kaj al ĉiuj homoj. Ŝajnas, ke ŝi ankoraŭ neniun rekonas, eĉ sian fratinon.

Poste, ŝi komplete refermas siajn okulojn, kvazaŭ ŝi volus plu dormi, post subita vekiĝo.

Timoplena, Su eklevas la vizaĝon de sia fratineto. Sed, ŝi tuj eksentas senmezuran ĝojon, kiam ŝi vidas ambaŭ lipojn de Kujen iom post iom rideti. Kun tiu rideto, ĉi foje, ŝiaj okuloj denove malfermiĝas, tute viglaj. Kaj ŝi demandas, kun ankoraŭ tute malforta voĉo:

— Kie mi troviĝas, franjo Su?

— Ĉielo! En la kaverno, kompreneble! Vi do nenion memoras, Kujen?

— Ha!

Pretervole, Kujen ekkrias kaj saltleviĝas, palpante sian tutan korpon, terurite:

— Kie estas miaj vundoj, franjo?

— Nenie.

Kujen tute ĝojas:

— Ĉu vere? Tamen, mi kredas, ke mi estas vundita. Kaj, kie troviĝas tiu grapolo da ladboteloj?

Ĉe tiuj vortoj, ŝi subite plektas siajn manojn sur la brusto kaj mallaŭte krias: «Min turmentas spirĝeneco». Poste, ŝi klinas sian kapon kaj kuŝiĝas en la brakoj de Su. Tiu lasta delikate metas sian manon sur la bruston de sia fratineto, murmurante:

— Vi ja ricevis fortan premon sur la brusto pro seninterrompa eksplodo de grenadoj... — La malamikoj jam ĵetis ĉirkaŭ mil grenadojn sur nin. Feliĉe! Vi ne mortis, Kujen!

Kujen sin turnas al Su kaj basvoĉe demandas:

— Ĉu ili troviĝas ankoraŭ tie, ekster nia kaverno?

— Jes, sed ili ne povas eniri.

— Eble, mi senkonscie kuŝis tie, ĉu ne? Ĉu mi longe mortis? Sed, kiu transportis min ĝis ĉi tie?

Su ankoraŭ ne havas la tempon respondi, kiam Nam Njo intervenas:

— Vi jam mortis dek-kvin minutojn! Kiu transportis vin ĉi tien? Neniu alia, ol sinjoro Ngan.

Kujen iom konfuziĝas:

— Tamen, mi nenion sciis...

— Ja, kiam ĉiuj kamaradoj retiriĝis, vi restis ĉiam kuŝanta en tiu kavaĵo. Alveninte ĉi tien, oni tuj rimarkis vian foreston, kaj tiam, spite ĉian danĝeron, sinjoro Ngan sin ĵetis eksteren por vin savi. Nu, sufiĉis unuminuta malfrueco, por ke vi jam «foroferu vian vivon».

Kujen ekridetas; ŝiaj vangoj iom post iom ruĝiĝas. La kadavra palo jam malaperas sur ŝia vizaĝo, el kiu

radias nun vivoĝojo. Ŝia rideto komencas elspiri petolecon, kvazaŭ ŝi volus diri : « Mi provis iomete, nur por ŝerci. Ja, ĉu mi tiel mortus ? » Poste, por montri al ĉiuj, ke ŝi estas ankoraŭ fortika, kiel ordinare, ŝi prove ekleviĝas, delikate forpuŝante la manon de Su. Sed tiu lasta ĉiam forte ĉirkaŭbrakas ŝin, ekstaras kaj iras al la ŝtonbloko, kie ŝi ĵus pasigis la nokton kaj kuŝigas tie sian fratineton. La etulino Thuji ridante kunfrapas la manojn, dum ŝia vizaĝo estas ankoraŭ plenkovrata per larmoj. Profitante momentan foreston de sia patrino, ŝi surgrimpas la ŝtonblokon, kaŭre sidiĝas apud sia onklino kaj ameme karesas ŝian manon. Kujen forviŝas al la etulino la larmojn kaj demandas :

— Eble, vi kredis, ke estis mortinta via onnjo, ĉu ne ?

La knabineto, tute sincera, balancas la kapon. Ŝi tuj sterniĝas, komplete fermas la okulojn kaj rigidigas siajn brakojn kaj krurojn :

— Antaŭmomente, onnjo Ut kuŝis en tia pozicio !

Tion dirinte, ŝi denove leviĝas, haste elpoŝigas unu preneton da pistita glurizo kaj enmanigas ĝin al Kujen :

— Mi donas al vi iom da pistita glurizo ; manĝu, onnjo !

Kujen levas sian kuntiritan manon kaj rigardas al la platigitaj rizgrenoj kun rideto :

— Nur tiom ? Sufiĉas unu « gluto » por komplete forkonsumi la tutan kvanton !

Thuji triste mienas :

— Restas al mi nur tiom. Finite !...

— Kujen etendas sian manon al la etulino :

— He, tio estas nur ŝerco! Via onnjo ne mangas. Formanĝu, karulineto! Baldaŭ via onnjo serĉos por vi novan manplenon...

Thuji ne konsentas. Ŝi insiste petas sian onklinon malfermi la buŝon kaj enmetas en ĝin unu preneton da pistita glurizo.

Kuŝanta sur la ŝtonbloko, Kujen mordetas ĉiun gluecan kaj bonodoran rizeron, trankvile rememorigante al si la ĵus okazintan aventuron. Ŝi vidis la nigrajn siluetojn de la malamikoj ĉe la kaverna enirejo kaj ĝuste tiam Toi piedbare faligis ŝin; poste, ŝi kuŝis en iu kavaĵo, dum seninterrompe kaj furioze eksplodis grenadoj. Jes, tiam ŝi ankoraŭ ne svenis: ŝi ankoraŭ aŭdis la sonoran voĉon de Ngan, kiu ordonis al siaj kamaradoj retiriĝi. Ĉu ŝi svenis baldaŭ post tiu momento? Jes, ĝuste post tiu momento... Nun, ŝi bone rememoras kaj diras al si en la pensoj: « Ja, momenta morto estas tia,... kompleta perdo de la konscio! »... Kaj ŝi estas tute feliĉa rememorigi al si la rakonton de Nam Njo; Ngan estis ĝuste tiu homo, kiu spite ĉian dangeron blindpalpe iris serĉi sian amatinon kaj portis ŝin en siaj brakoj ĝis tiu loko. « Li tre timas, ke mi povus morti. — Kujen diras al si en la pensoj.— Ĝis nun, tute okupita pri rebato kontraŭ la malamikoj, sendube, li ankoraŭ ne scias, ke mi jam rekonsciiĝas ».

Ne plu aŭdiĝas la eksplodbruoj de grenadoj. Ĉe la kaverna enirejo, de tempo al tempo, eĥe resonas intermitaj pafbruoj de « Thompson » kaj kelkaj pafuraganoj de maŝinpafilo.

Kujen eksidiĝas kaj provas meti siajn piedojn sur la teron, kiam ŝi eksentas akran doloron en la brusto. Ŝi

ne plu aŭdacas forlasi la ŝtonblokon kaj restas tie, palpante sian bruston. Ĝuste tiam, Su revenas kaj, ekvidante tion, demandas:

— Kien vi volas iri? Kaj kio okazas do al vi?

— Ne... Mia brusto iomete doloras.

— Do, kuŝiĝu, mi petas! Vi estas permesata iri nenien!

Ĉe tiuj vortoj, Su ekprenas la brakojn de sia fratineto kaj kuŝigas ŝin sur la ŝtonbloko.

— Mi ĵus revenis de la kaverna enirejo. — Ŝi daŭrigas. — Ĉiuj niaj kamaradoj ĉiam bonfartas. La kanajloj trifoje impetis en la kavernon, sed ni jam komplete forpuŝis ilin. Ngan tute ĝojis sciiĝante, ke vi jam rekonsciiĝis. Li diris, ke se li malfruus kelkajn minutojn, vi estus nepre perdita, ĉar tuj post via evakuado, ili penetris en la kavernon.

— Sed, aŭdiĝas ankoraŭ pafoj ekstere!

— Jes, ni pafas kontraŭ tiuj, kiuj venas por forporti la kadavrojn de siaj kunbatalantoj.

Post tiu mallonga rakonto de sia fratino, Kujen tute trankviliĝas; ŝi sterniĝas per sia tuta longo kaj rigardas al la duonluma kaverna volbo, strečante siajn orelojn por aŭdi, ĉu ekstere okazas ankoraŭ bataletoj. Sed nun, jam komplete ĉesiĝas la pafado. Aŭdiĝas nur la konfuzaj voĉbruoj de la babilantaj kamaradoj.

Iun momenton poste, Ngan eniras kaj staras ĉe la piedo de la ŝtonbloko. Li longatempe rigardas al Kujen sen ŝia scio. Liaj vizaĝtrajtoj aperas ankoraŭ tute strečitaj. De ambaŭ liaj tempioj, abunda ŝvito gutas sur la kolumon de lia jako. Trovante, ke Kujen ĉiam

mediteme kontemplas la kavernan volbon, li ne povas sin deteni de rido. Li eklevas siajn manojn kaj abrupte kaptas al ŝi la piedon. Tute surprizita, la junulino tuj retiras sian kruron. Ngan komplete elŝovas sian kapon. Ekvidante lin, Kujen tre ĝoja ekleviĝas, sin ĵetas sur lian kolon kaj ameme donas al li kelkajn pinĉojn sur la ŝultron :

— Vi tute teruris min !

Ngan eksplodridas, kapskuante :

— Apenaŭ reviviĝinte, vi jam ŝerce amuziĝas ! Mi ja tute « admiras » vin !

— Oni « admiras »..., tamen oni forlasis min dum la retiriĝo !

Apogante siajn manojn sur la ŝtonbloko, Ngan suprensaltas. La kolbo de lia « Thompson », kiu pendas ĉe liaj ŝultroj forte frapiĝas kontraŭ la ŝtono. Li demetas sian pafilon kaj kliniĝas sur la korpo de Thuji, spiregante. Tute kontenta, la etulino ridas ĝis sufokiĝo.

Ngan rigardas al Kujen:

— Antaŭmomente, mi kredis, ke vi estis mortinta.

— Mortinta ! Oni ne mortis tiel facile. Sen vi, mi estus povinta mem rampi ĝis ĉi tie, post momenta ripozo.

Ngan faras diklipojn :

— Vi ĉiam fanfaronas. Mi devas sciigi al vi, ke antaŭ nelonge, se mi ne eliris por vin serĉi, la kanajloj jam forportis vin, kiel unu bataton.

Kujen restas iun momenton senvorte, poste ŝajnigas sin malkontenta :

— Do, pro kio vi ne lasis tiun fanfaronulinon morti tie, anstataŭ perdi tiom da penoj por transporti ŝin aliloken ?

Ngan ridetas kaj nenion diras. La etulino Thuji ĉiam trankvile kuŝas kaj ŝia ventro servas por li, kiel kapkuseno.

— Antaŭmomente,—rakontas la viro,— transportinte vin ĉi tien, mi tuj revenis al la batalejo ; la bandaĉo ĉiam ĵetis grenadojn, nenombreblajn, poste impetis en la kavernon. Mi paffaligis unu kanajlon, kiu aspektis tute aroganta. Li portis hele ruĝan kuloton. Du aliaj soldatoj rampis internen por prove forporti lian kadavron ; tuj unu el ili estis pafmortigita de nia knabo Dat. Nun, jam regas kvieteco. Niaj kamaradoj Ba Ren kaj Hai Thep estas gardostarantaj tie, ĉe la kaverna faŭko...

Ĉe tiuj vortoj, la okuloj de Ngan duone fermiĝas ; Kujen volas aŭskulti ankoraŭ lian rakonton, sed li jam komencas ronki. Ŝi tuj levas lian kapon por liberigi la etulinon Thuji kaj volvas sian koltukon por meti ĝin sub lian nukon. Per siaj delikataj fingroj, ŝi forviŝas la ŝviton, kiu ankoraŭ perlas sur ambaŭ liaj tempioj. Poste, ŝi sidas tie, ameme rigardante al sia dormanta karulo. Nun kiam Ngan jam dormas, t.e. kiam li ne plu vidas ŝin, Kujen ja tute libere elmontras sian amon al li.

Ambaŭ ŝiaj okuloj brulas, kiam ŝi trovas, ke sur la korpo de Ngan ĉio ankoraŭ portas la postsignojn de tiu furioza mateno. Lia nigra ĉemizeto kun mallongaj manikoj prezentas longan ŝiraĵon ĉe la ŝultro. Ŝajnas, ke el lia tuta korpo ĉiam ŝvebe eliĝas la odoro de pulvo.

Ĉe liaj manradikoj kaj kubutoj vidiĝas pluraj sangokovritaj gratvundoj ; tre povas esti, ke la akrepintaj ŝtonetoj jam vundis lin, dum li blindpalpe serĉis ŝin en ĉiuj kavaĵoj de la kaverno. Kujen tuj prenas el la saketo de Su unu flakoneton da balzamoleo kaj per sia montrofingro frotŝmiras tiun oleon sur la sangokovritajn partojn de la brako de Ngan.

Subite, meze de l'silento, eĥe resonas de la kaverna enirejo la voĉo el iu radioaparato kaj tiu de Hai Thep, kiu krias :

— Kamaradoj, venu por aŭskulti nian Onklon. Jen parolas Prezidanto Ho !

En la kaverno, ĉiuj ĝojkrias. Poste, aŭdiĝas pezaj paŝbruoj. Tute konfuzita, Kujen skuas la brakon de Ngan :

— Vekiĝu ! Vekiĝu, Ngan !

— Kio okazas ? Kio okazas ? — Demandas la viro, surprizite.

— Vekiĝu ! Onklo Ho parolas ! Ĉielo ! Rapidu !

Ngan saltleviĝas etendante sian brakon por preni la pafilon. Thuji helpas lin meti ĝian rimenon sur la ŝultron. Kujen sin ĵetas de la ŝtonbloko sur la teron kaj kuras en direkto al la voĉo de la radioaparato. Grandpaŝe ŝin postsekvas Ngan, kun Thuji sur sia dorso.

Ambaŭmane portante unu « transistoron », Hai Thep sin direktas al la loko, kie kuŝas la vunditoj. Ĉiuj faras cirklon ĉirkaŭ li. Alveninte proksime de Tham kaj Be, li sidiĝas kaj turnas la butonon de la aparato por plilaŭtigi la voĉon. El la transistoro parolas Prezidanto

Ho. La tumulta kaverno fariĝas subite senbrua. Aŭdiĝas nur lia voĉo, varmeta kaj klara :

« Transpasante al la jaro 1961, Nord-Vjetnamio jam de sep jaroj faris ĉiujn siajn strecĉopenojn por restarigi la ekonomion kaj konstruis la socialismon. Sud-Vjetnamio jam spertis sep jarojn de ekstreme akra kaj heroa lukto. La usona imperiismo estas nun klopodanta por transformi la sudon de nia lando en novtipan kolonion de Usono, sed niaj sudaj sampatrujanoj nepre ne volas vivi en sklaveco. La usona imperiismo kaj ĝia lakeo Ngo Dinh Dziem okazigis tiom da funebroj kaj mizeroj... »

Onklo Ho apenaŭ alvenas al tiuj vortoj de sia novjara alvoko, kiam subite en la senbrua kaverno eksplodas plorkrioj. Tio estas la plorkrioj de Su. Ĝis tiam, Kujen jam sukcesas regi sian emocion. Sed, nun aŭdante sian fratinon plori, ŝi ankaŭ ploregas. Kaj post Kujen, ĉiuj homoj en la kaverno plorsingultas, dum ĉiam aŭdiĝas la voĉo de Prezidanto Ho. La voĉo de tiu granda Patro kaj eterne respektata Gvidanto plenigas la tutan kavernon, eĥe resonas el ĉiuj kavaĵoj kaj penetras, vorton post vorto, en la fundon de ĉies koro. Ĉiu volas reteni siajn larmojn por bone aŭskulti lin ; sed vane, liaj paroloj igas ilin plori pli laŭte.

Ja, ĉu ili povas sin deteni de ploroj ? Nur aŭdante liajn parolojn, ili jam ploras. Des pli, ke li parolas pri ili, ĝuste en la momento, kiam en tiu malproksima kaj malgranda kaverno Hon Dat, okazas ekstreme kruela batalo.

Tra la radioondoj, Prezidanto Ho ĉiam parolas :

« Dek-kvar milionoj da sudvjetnamaj sampatrujanoj bravege leviĝas kontraŭ la usona imperiismo kaj ties

lakeoj. Tiu lukto, apogita sur la firma Nordo kaj subtenita de la tutmonda progresema popolo, akiras nun pli kaj pli glorajn venkojn. Niaj nordaj sampatrujanoj konstante sin turnas al la heroa Sudo, Bronza Remparo de l'Patrujo!»

Ngan ĉiam senmove staras, kun la etulino Thuji sur la dorso. Aŭdante tiujn lastajn vortojn de Onklo Ho, li ektremetas kaj sentas premon ĉe la gorĝo. Kujen kuntiriĝas sub lia ŝultro, pli kaj pli firme premante al li la manon. Dume, ĉiuj plidensigas siajn vicojn, malvaste starante unu apud alia.

Ĉe la fundo de la kaverno, Tham klopodas stari sur la al li restanta kruro. Lia dorso sin apogas sur la rokmuro, dum ambaŭ liaj manoj provas sin krampi al la ŝtono, blindpalpante, tremetante... Siaflanke, la knabo Be ankaŭ sin apogas sur sia sola brako kaj jam leviĝas, oni ne scias de kiam. Starante malantaŭ li, Su delikate subtenas liajn ŝultrojn. Sur la vizaĝo de ambaŭ homoj, brilas abundaj larmoj.

Tiun vesperon, oni ne havas plu akvon eĉ por kuiri supon por la vunditoj. Hai Thep jam transdonas al Su sian propran ladbotelon. La akvo, entenata en ĝi, estas lia porcio, kiun oni distribuis al li, la matenon. Li konsumis nur kelkajn glutojn.

Ĉiuj aliaj kamaradoj urĝe alportas sian ladbotelon por elverŝi la lastajn akvogutojn en la etan kaserolon de Su. La lasta homo jam donas sian akvoporcion; tamen ŝia kaserolo estas nur duone plenigita. Rigardante tiun provizon da akvo, ŝi antaŭscias, ke la kuirota supo estos tre densa. Alvenante proksime de la kuirejo, ŝi subite haltas. Ŝi jam memoras pri la

duonglaso da akvo rezervita al sia filineto Thuji. « Kun tiu duonglaso da akvo, — ŝi ekpensas, — la supo estos diluita ; Tham kaj Be povos facile gluti ĝin ». Ĉe tiu penso, Su tuj alportas la kaserolon al sia kuŝejo.

Thuji ne estas tie. Su metas la kaserolon sur la ŝtonblokon kaj enŝovas sian manon en iun kavaĵon por serĉi la glason. Ŝi longatempe rigardas al tiu duone plenigita glaso tenata ĉe la mano kaj ne aŭdacas versi la akvon en la kaserolon, ĉar ŝi pensas : « Kie mi trovos akvon por Thuji, se ŝi soifos ? »

Su estas tute perpleksa. Pensante pri siaj vunditaj kamaradoj, ŝi volas tuj elversi la tutan akvon, sed pensante pri sia filino, ŝi sentas, kvazaŭ ŝian manon retenas nevidebla forto. Finfine, ŝi malrapide versas la duonglason da akvo en la kaserolon, poste senvorte alportas ĝin al la kuirejo. Ŝi maltrankviliĝas pri tio, ke mankas akvo por tralavi la rizon, antaŭ ol meti ĝin en la kaserolon por kuirado. Kaj, de tiam, sidante apud la fajrujo por kuiri la supon, ŝi pensas nur pri akvo. Evidente, pri la manko de akvo devas zorgi ĉiuj homoj rifuĝantaj en la kaverno, sed, siaflanke, Su havas ĉiam tian senton, kvazaŭ ŝi devas preni sur sin pli pezan respondecon. Ŝi ne estas gardistino de tiu bazloko sed, kiam al ĝi mankas nutraĵoj kaj trinkebla akvo, ŝi estas zorgoplena pli ol aliaj. En ŝi, tiu virineca kvalito estas kvazaŭ denaska. En sia familio, same kiel inter siaj gekamaradoj, ŝi inklinas cedi sian porcion al iu ajn petanto. Kaj tio estas por ŝi granda feliĉo. Ŝi ne apartenas al tiu kategorio de virinoj, kiuj trovas sian feliĉon nur en la plenumado de siaj propraj deziroj. Ŝi estas feliĉa, nur kiam feliĉon ĝuas ankaŭ ŝiaj

gepatroj, ŝiaj gefratoj, ŝiaj gekamaradoj, kaj kiam ŝi estas patrino, ŝi rezervas al sia infano ĉion, kion ŝi posedas. De post sia eniro en tiun kavernon, ŝi estas tiu, kiu plej malmulte trinkas akvon. Ŝi prenis nur unu gluton, jam de la hieraŭa tagmezo. Kaj tion ĉi ŝi sola scias. Aŭ ŝi ne soifis? Ne!... Ĝuste nuntempe, kiam ŝi finmaĉas kelkajn plenmanojn da rostita rizo, ŝi sentas ardan deziron trinki. Ŝi imagas al si la klaran akvofluon de la torento Luon kaj subite havas la ideon, ke profitante la noktan mallumon, oni povus rampi ĝis tie por ĉerpi kelkajn sitelojn da akvo. Tio estas tute ebla! La malamiko ne povas gardostari ĉiuloke sur la torento.

Kiam la supo bolas en la kaserolo, Su reduktas la fajron kaj atendas, ĝis la rizo estas komplete kuirita, antaŭ ol formeti la kaserolon.

Ŝi ĉerpas unu grandan bovlon, kiun ŝi alportas al Tham. Poste, ŝi manĝigas la restantan supon al Be. Hodiaŭ, la knabo jam sufiĉe bone fartas. Li povas gluti du plenajn bovlojn. Post la manĝo, Su viŝas al li la buŝon per tualetotuko, kiam neatendite li petas:

— Franjo Ba, donu al mi iom da akvo!

Su devas malkaŝe diri al li, ke tute elĉerpiĝas la akvo. La knabo silentas, palpebrumante. Ŝajnas al li, ke li ne estas permesata trinki, kvankam restas ankoraŭ akvo.

Komprenante la animstaton de Be, ŝi delikate karesas liajn kapharojn:

— Vere elĉerpiĝas la akvo, knabo mia. Via franjo Ba ne mensogas. Ĉi vespere, mi iros serĉi akvon kaj preparos por vi trinkaĵon.

— Do, kiam vi havos akvon, — diras Be, — vi tuj alportos ĝin al mi, ĉu ne?

— Jes, mi donos trinki al vi, kiam mi havos akvon.

Trovante, ke Su estas tuj forironta, li ekprenas ŝian manon kaj insiste petas:

— Franjo Ba, ne foriru; restu ĉi tie por babili kun mi. Mi tre enuas, kuŝante sole!

Tiuj paroloj de la knabo tute emocias la virinon. Ŝi ne foriras kaj sidas apud li. Rigardante al la kaverna volbo, Be diras:

— Tiun tagmezon, aŭskultante la parolojn de Onklo Ho, mi havis la impreson, kvazaŭ li scius, ke ni trovi-ĝas en tiu kaverno. Kaj eble, li scius ankaŭ, ke oni ĵus fortranĉis al mi la brakon. Vere, aŭskultante lin, mi ŝajne trovas, ke nia Onklo estas informita pri ĉio: pri nia ĝismorta batalo kontraŭ la malamiko, pri nia soifo...

Su tute miras, ke Be havas saman opinion, kiel ŝi kaj, prenante lian manon, ŝi diras:

— Jes, Onklo Ho estas informita pri ĉio, knabo mia! En Sudo, aŭ ni mizere vivas aŭ ni obstine batalas; ĉion ĉi bone scias nia Onklo. Tial, li jam diris: «Sud-Vjetnamio spertis sep jarojn de ekstreme severa kaj heroa lukto...» Ĉu vi memoras? Tio montras, ke nia Onklo estas bone informita pri ĉio!

— Franjo Ba, ĉu vi ne trovis, ke lia voĉo iom tremis? Aŭskultinte liajn parolojn, mi trovis, ke mia amputita brako ne estas grava afero. Mi bedaŭras nur, ke mi estas tro frue vundita dum tiu unua batalo; sed, se...

— Ne maltrankviliĝu pri tio! — Su provas konsoli la knabon. — Perdi unu brakon ne estas eksterordinara

afero! Ja, ne mankas unubrakuloj, kiuj ĉiam heroe batalas.

— Kiam mia brako resaniĝos, mi petos, ke oni akceptu min en la gerilgrupon. Se mi havus la ŝancon ĝisvivi la tagon de l' patruja reunuiĝo, mi skribus al Onklo Ho, ke en tiu tago, tiu monato, tiu jaro,.. restis al mi unu brako kaj mi kuŝis en tiu kaverno, mi jam aŭskultis liajn parolojn... Ĉu decas tiel skribi, franjo?

Su tute miras, ke la knabo Be povis tiel diri. Post momenta pripenso, ŝi diras al li:

— Tre bone... Sed, estas tute senbezone atendi ĝis la tago de l' patruja reunuiĝo. Kiam vi resaniĝos, vi povos jam skribi al Onklo Ho.

Be mienas samfoje gaje kaj zorgoplene:

— Neeble! Mi diris tion nur por ŝerci. Mi ne aŭdacas skribi.

— Pro kio neeble? Vi povos skribi, vi estas inda skribi al Onklo Ho.

— Ne, neeble! — Haste diras la knabo; poste li denove direktas siajn okulojn al la alta kaverna volbo. Oni ne scias, pri kio li meditas, ĉu li intencas skribi la leteron; sed klarvidebliĝas, ke li estas tute feliĉa pri tiuj paroloj de Su, kiuj alportas al li, jam nun, fonton de ĝojo.

La lumo ĉe la kaverna volbo malheliĝas. Sendube, ekstere, jam falas la vespera vualo. Iom post iom, Su ne klare vidas la vizaĝon de Be. Ŝi aŭdas nur lian malfortan spiradon kaj sentas, ke lia mano iĝas pli kaj pli varmeta en la ŝia. Ŝi blindpalpe serĉas unu vakskandelon sed Be malhelpas ŝin:

— Estas tute senbezone ekbruligi vakskandelon ; tio estas tre elspeziga !

Su kun plezuro konsentas al li la peton.

En la kompleta mallumo, ŝi sidas kunigante amb̆aŭ genuojn, dum ŝiaj manoj malligas la kaphararon, kiu torente fluas sur la ŝultrojn por plenkovri la ŝtonbloko n. Ŝi baldaŭ revenigas ĝin antaŭ sia brusto kaj perfingre ordigas la distaŭzitajn hartufojn. Ŝia kaphararo estas tre dika kaj glate brila. Ĉiufoje kiam ŝi malvolvas kaj kombas ĝin por refari novan hartuberon, ŝi ameme karesas ĝin. Kvankam ne povante paroli, ŝia freŝa « hartorento » tamen kvazaŭ havas apartan vivon, apartan animon. Al ŝi ŝajnas, ke ĝi posedas sian lingvon kaj ĉiufoje kiam ŝi delikate tenas ĝin en la manoj, ŝi havas tian senton, kvazaŭ ĝi ameme babilas kun ŝi. Ĝi rememorigas al ŝi la manojn de ŝia edzo San kaj tiujn de ŝia patrino. Antaŭe, San ofte enŝovis siajn manojn en tiun kaphararon kaj ŝia patrino havas la kutimon fari al ŝi hararanĝon, krom helpi ŝin lavi sian kapon. Ŝia patrino ŝajne sentis egan plezuron propramane plenumi siajn laborojn, kvankam iafoje ŝi krie plendis : « Ĉielo ! Jam de tre longe, mi ne vidis vin lavi vian kapon, Su ! » aŭ kiam ŝi verŝis akvon sur ŝian kaphararon, ŝi ĉiam urĝis : « Pli forte gratu, mi petas ! ». Su ridetas, ekmemorante tiujn patrinajn vortojn kaj, zorgoplena, ŝi tre kompatas la maljunulinon, kiu jam de kelkaj tagoj vivas sole en sia hejmo.

Apenaŭ finfarinte sian hararanĝon, Su subite aŭdas la voĉon de Kujen. Ŝi tuj enmanigas al Be la vakskandelon kaj la fajrilon, rekomendante :

— Kiam vi bezonas lumon, ekbruligu la vakskandelon.

Poste, ŝi eliras. Renkontante ŝin, Kujen sin ĵetas sur ŝian kolon kaj flustre diras :

— Trong kaj Ba Ren jam rampas ekster la kaverno. Ili volas kaŝobservi la malamikajn movojn...

— Tiel ? Ĉu jam de longe ?

— Ili ĵus foriris.

— Kie troviĝas Thuji ?

— Ŝi sidas kun Hai Thep tie, ĉe la kaverna enirejo.

Kujen kaj Su kune eliras. Ambaŭ fratinoj venas proksime al Hai Thep.

— Su, ĉu ne ? — Demandas tiu lasta.

— Jes.

Ekaŭdante la voĉon de sia patrino, Thuji tuj krias : «panjo»!

— Restu tie kun onklo Hai ! — Su diras al sia filineto. — Via panjo ankaŭ restas ĉi tie kaj iras nenien.

Poste, ŝi sin turnas al Hai Thep :

— Frato Hai, laŭ via konjekto, ĉu ili ankoraŭ longatempe sieĝos nin ?

— Oni ankoraŭ ne trovas antaŭsignojn, kiuj montras, ke ili retiriĝos. Tiun posttagmezon, mi petis kamaradon Dat suprengrimpi la kavernon por gvatado : li vidis la malamikajn soldatojn revenigi amasojn da pajlo el nia vilaĝeto. Mi ne scias, kion ili volas fari.

— Aŭ ili volas bruligi nian kavernon ! — Diras Kujen.

— Tio estas ebla. Konsiderante la manieron, kiel ili atakis nin jam de du tagoj, mi trovas, ke ĉi foje ili

firmdecide volas nin ekstermi. Efektive, ekstermi dudekon da homoj en tiu kaverno ne estas grava afero, sed la fiintenco de la malamiko estas subfosi nian batalspiriton aliloke. Tiel, niaflanke, ni devas klare vidi, ke se ni sukcesus fiaskigi tiun sieĝon, ni jam plenumus signifoplenan agon. Mi firme kredas, ke ni nepre frakasus la malamikan intrigon, se ni sukcesus solvi la problemon de trinkebla akvo por niaj gekamaradoj en la kaverno kaj se ni donus fortan impulson al la luktomovado, ekstere, ĉe niaj samvilaĝanoj. La malforta flanko de niaj kontraŭuloj kuŝas en tio, ke ili ne povos longatempe postenigi ĉi tie siajn trupojn. Kaj niaflanke, ni tre bedaŭras, ke ni ricevas neniun sciigon pri la situacio de niaj samvilaĝanoj, dum tiuj lastaj tagoj.

— Mi kredas, ke niaj samvilaĝanoj ne lasas ilin trankvilaj. — Diras Su, — Tie, ekstere, franjo Hai kun siaj amikinoj kaj helpate de kamarado Tam Ĉan, certe kondukas la lukton en streĉa kuneagado. Koncerne la problemon de trinkebla akvo, ni atendu la revenon de niaj kamaradoj, post ilia skoltado. Se ili sukcesus trovi iun torentan angulon, kie oni povas ĉerpi akvon, ni tuj ekirus. Ni havas la kutimon surkape transporti akvoplenan kruĉon.

— Jes, ni atendu ilian revenon, antaŭ ol fari decidon.

Ĉe tiuj vortoj, Hai Thep ŝaltas sian transistoron por aŭskulti la disaŭdigan programon de Radio-Hanojo. El la aparato aŭdiĝas la melodia voĉo de unukorda muzikilo, ludanta la muzikan verkon «*Kanto ĉe la elŝipejo Hien Luong*». La muzikisto eble estas ludanta per siaj emocie tremetantaj fingroj. Ŝajnas, ke iafoje, li retenus

sian spiradon, ĉar la muzikila voĉo jen tordiĝas, jen ŝvebas, poste longdaŭre haltas sur iu noto, por baldaŭ fariĝi pli alta kaj pli plenda. Tiel, seninterrompe, la muzikilo kvazaŭ faras siajn konfidencojn, ĝis el la aparato leviĝas la dua refreno de la kanto tra la milda voĉo de juna sopranulino.

Kujen subite trovas, ke ŝia fratino Su delikate ĉirkaŭbrakas ŝin ĉe la koksoj, poste apogas la mentonon sur ŝian ŝultron.

Su ja estas emociplena, ĉar tiu kanto temas pri la geedza fideleco, pri la animstato, en kiu ŝi troviĝas. Tiun kanton Kujen foje jam kopiis kaj invitis sian fratinon kune lerni, sed Su lernis ĝin nur por koni ĝian arion kaj neniam Kujen aŭdis ŝin kanti.

La kanto jam delonge estingiĝas en la aparato, sed Su ĉiam senvorte apogas sian mentonon sur la ŝultro de Kujen. Baldaŭ ŝi eklevas sian kapon kaj sin direktas al Thuji :

— Iru dormi, etulino mia!

Obeeme, Thuji sin ĵetas sur la kolon de sia patrino. Antaŭ ol dorsoporti sian filineton, ŝi flustre diras al Kujen :

— Vi tuj voku min, kiam revenas niaj kamaradoj ; ne forgesu, Kujen! Nun, mi revenigas la etulinon Thuji al ŝia kuŝejo.

Blindpalpe Su dorsoportas la infanon laŭ la kaverna koridoro. Dumvoje, Thuji klinas flanken sian kapon sur la ŝultron de sia patrino.

— Ĉu vi jam dormas, Thuji? — Demandas Su.

La etulino ne respondas. Ŝia varmeta spirblovo iom tiklas la nukon de la patrino. Kalkulante ĉiujn siajn

paŝojn, Su faras dion eblan por ne veki la infanon. Alveninte al la ŝtonbloko, ŝi suprengrimpas la ŝtuparon, kun piedfingroj firme krociĝantaj al la ŝtono. Poste, kiam ŝi atingas la kuŝejon, ŝi turnas sian dorson, fleksas ambaŭ genuojn kaj sidas sur la ŝtonblokon mem, antaŭ ol sin klini malantaŭen por kuŝigi la etulinon, tiel lerte, ke tiu lasta nenion scias. Tamen, kvazaŭ per natura instinkto, ambaŭ manetoj de Thuji ĉiam sin krampas al la ŝultroj de ŝia patrino iun momenton, antaŭ ol malreteni ilin.

Su prenas sian koltukon kaj per ĝi kovras la korpon de ŝia filineto. Tial, ke la vetero komencas frostiĝi, kaj timante, ke la etulino ne havas sufiĉe da varmo, ŝi tuj demetas sian nigran jakon por aldone kovri ŝin. Nun, restas al ŝi nur unu senmanika vesto el nigra silko, «Al mi tute konvenas tiu vesto, se mi iras ĉerpi akvon», ŝi diras al si en la pensoj. Kaj ankoraŭfoje, ŝi palpas sian filineton, de la kapo ĝis la piedoj, zorge arangas tiujn improvizitajn kovrilojn, antaŭ ol foriri kun sia elektra torĉo. Sed, strange! Ĉi foje, Thuji nek ektremas, nek vokas ŝin, tamen Su ĉiam hezitas, ne volante meti ŝian piedon sur la malsupran ŝtonan ŝtupon. Nevidebla forto jam retenas la patrinon malantaŭen, malhelpante ŝin fari unu paŝon plu. Fine, ŝi returne iras. Ŝi returne iras, por fari nenion alian, krom klini sin ĝis la vizaĝo de sia filineto por aŭskulti sian spiradon. Kaj nur tion, antaŭ ol denove malrapide foriri, kun pli da anima trankvileco.

Su baldaŭ atingas la onirejon; la skoltantoj ankoraŭ ne revenas.

— Thuji jam dormas, ĉu ne? — Demandas Hal Thep.

— Jes.

— Vere ŝi estas feliĉa! Batali kontraŭ la malamiko ne estas ŝia afero; ŝi nur trankvile dormas.

Jam de kelka tempo, Kujen ĉiam iras tien kaj reen ĉe la kaverna faŭko. Ŝi sin montras tute maltrankvila:

— Pro kio jam de longe ili ne revenas? Ĉu ilin trafis bedaŭrinda okazaĵo?

Ĉe tiuj vortoj, ŝi eksidas sur iun ŝtonblokon. Ĝuste tiam, aŭdiĝas la voĉo de Trong ĉe la kaverna enirejo:

— Frato Hai, kie troviĝas frato Hai?

— Ĉi tie, mi estas ĉi tie.

Hai Thep tuj ekstaras. Trong kaj Ba Ren abrupte kuras en la kavernon.

— Kiel statas la afero? — Demandas kamarado Hai.

— Senprokraste preparu nin por iri ĉerpi akvon. Ni jam esploris la lokon. La malamiko kantonmentas nur ĉe la transa bordo de la torento. Kaj en la ĝardeno, ĉe nia flanko, regas kompleta kvieteco.

— Ĉu vi povas garantii la sukceson?

— Certe, sed ni devas tuj agi; alie, la situacio povus ŝanĝiĝi.

— Do, ni ekiru!... Kujen, ĉu vi jam pretigas la kruĉojn?

La junulino rapidvoĉe respondas:

— Jes, ili estas tie, tute pretaj.

— Ut Kujen, — diras Hai Thep, — vi estas ankoraŭ malsaneta, vi ne povas foriri.

— Mi jam resaniĝas; lasu min iri!

Ba Ren energie intervenas:

— Kujen, vi restu en la kaverno!

— Do, Ut Kujen vi ne foriru !... -- Diras ankaŭ Su.— Kure revenu en la kavernon kaj diru al Nam Njo, ke ŝi akompanu min.

Kontraŭvole Kujen haste eniras la kavernon. Post momento, ŝi eliras kun Nam Njo.

Ba Ren donas zorgajn rekomendojn al Su kaj Nam Njo :

— Estas absolute malpermesate interparoli dumvoje, ĉu vi komprenas ? Ni iros antaŭe, kaj vi sekvos nin... memkompreneble, kun tre malpezaj paŝoj...

Trong surŝultrigas sian « Thompson »-on kaj ordonas : « Ni ekiru ! »

Kun pantalono kuspe faldita super la genuoj kaj kruĉo sur la kapo, Su kaj Nam Njo silente postiras ambaŭ kamaradojn Trong kaj Ba Ren. Elirinte el la kaverna faŭko, ili renkontas Ngan kaj aliajn kamaradojn, kiuj faras tie noktogardon. Ĉiuj rekomendas al ambaŭ virinoj resti ĉiam vigle singardaj.

Alvenante proksime al la kaverna faŭko, Su eksentas la iom sufokan pulvodoron de grenado. Kaj kiam ŝi troviĝas ekstere, ŝi sentas sin multe pli forta, ol kiam ŝi restas en la kaverno. Tute kontenta, ŝi faras sinsekve kelkajn profundajn enspirojn.

La kvar homoj dorse kurbiĝante trakuras senŝirman herbejon. Su estas la lasta en la vico ; ambaŭ ŝiaj manoj firme tenas la kruĉon sur la kapo. Enirinte en la kokosĝardenon, ĉiuj malakcelas siajn paŝojn, blindpalpe. Post unu vojiro, ili subite ekvidas antaŭ si preterflugantan lumon de elektra torĉo. Ĉiuj kaŭre sidiĝas, mutaj kiel karpo. Iu plotono de malamikaj soldatoj preterpasas ilin, je ĉirkaŭ dek metroj

malproksime, Subite, estingiĝas la elektra lumo. Aŭdiĝas bruoj de ledŝuoj surtretantaj la sekajn kokospalmojn. Kiam la kanajloj foriras, la kvar homoj ekleviĝas kaj daŭrigas sian vojon. Nun, ili jam atingas la bordon de la torento Luon. La loko, kiu kondukas al la akvofluo estas senŝirma ŝtonetkovrita terspaco. Trong kaj Ba Ren iras posteniĝi kun siaj pafiloj, dum Su kaj Nam Njo urĝe kuras al la torenta bordo, kun la kruĉo en la brakoj. Nam Njo alvenas la unua al la torento kaj rapide trempas sian kruĉon en la akvofluon. Su ankaŭ kursekvas ŝin. Aŭdiĝas la voĉo de la malamikaj soldatoj, kiuj konfuze babilaĉas ĉe la transa bordo. En pluraj tendoj lumigataj per acetilenlampoj, ili estas pasiege kartoludantaj kun ĝojaj voĉbruoj. Su trankvile klinas la kruĉon por plenigi ĝin per akvo. Apud ŝi, Nam Njo estas ĉerpanta per sia mankavo la torentan akvon por sin sensoifigi. Trinkinte kelkajn plengorĝojn da freŝa akvo, ŝi surkapigas sian kruĉon kaj kuras supren al la bordo. Su ankaŭ intencas trinki sed trovante, ke Nam Njo jam forlasas la torenton, ŝi haste brakumas sian kruĉon kaj postkuras sian amikinon.

Atinginte la komplete malluman kokosĝardenon, Su ekpensas: «Tiel la danĝero estas preterpasita; restas ankoraŭ al ni nur tiu vojiro de tie ĉi al la kaverno».

Trong kaj Ba Ren marŝas ĉekape; ilin sekvas Nam Njo, poste Su. En la malluma ĝardeno, tiu lasta blindpalpe etendas ambaŭ manojn antaŭen. Tamen, ŝi jam pli ol unufoje piedfrapiĝas kontraŭ la elstaraj radikoj de kokosujoj kaj la akvo, entenata en la kruĉo, ĉiam balanciĝas kaj preskaŭ elverŝiĝas. Iun momenton poste, surtretante unu defalintan kokospalmon, ŝi tuj

haltas kaj metas la kruĉon sur la teron. Ŝi delikate ŝiraś kelkajn kokosfoliojn, kiujn ŝi ĉirkaŭvolvas, antaŭ ol meti ilin en la akvon. Kiam ŝi sin pretigas por denove surkapigi la kruĉon, subite pluraj lumfaskoj de elektraj torĉoj samfoje direktiĝas al ŝia viziĝo. Iu soldato el la « commando »-unuo ekkaptas ŝian kaphararon kaj tiras ĝin tiel forte, ke ŝi renversfalas. Poste, tri, kvar kanajloj sin ĵetas sur ŝin. La subleŭtenanto Ba, vicestro de la roto de « commando »-oj alkuras, prete tenante sian karabenon en la manoj. Li fikse rigardas al la nekonata virino, kiun estas katenigantaj liaj soldatoj, antaŭ ol sin turni posten, krie ordonante :

— He knabegoj ! Kiuj elinter vi loĝas en Hon Dat, venu por rigardi kaj identigi tiun virinaĉon !

De la lasta vico venas iu soldato. Apenaŭ ekvidante la viziĝon de Su, li tuj krias :

— Ha, tiu fiulino estas Su !

— Vi konas ŝin ?

— Jes, ŝi estas grava Vjetkong-aktivulino.

La subleŭtenanto kuntirante siajn brovojn rigardas al Su. Poste, li abrupte prenas ŝian veston ĉe la brusto kaj levante sian mentonon demandas :

— Ĉu vere vi nomiĝas Su ?

Su kapjesas. La oficiro daŭrigas :

— Kun kiu vi iris ?

— Kun multaj homoj. Nun, ili jam reatingas la kavernon.

— Ĉu ili ĉerpis akvon el la torento ?

— Evidente jes !

Aŭdante tion, la subleŭtenanto Ba eksplodas per ridoj :

— Tre bone! Tre bone, se ili ĉerpis tiun torentan akvon!

Su rigardas lin per rondigitaj okuloj ne sciante, pro kio li tiel diris.

La oficiro ŝovas ambaŭ siajn manojn en la poŝojn kaj, tute kontenta, skande diras :

— Ni... jam ĵetas... venenon... en... tiun... torentan... angulon!

Su larĝe malfermas siajn okulojn kaj terurite eligas fortan krion « a ». Subite, ŝi sin ĵetas antaŭen, kun la intenco kuri al la kaverno. Sed vane. Iu soldato jam firme retenas ŝin per ŝia tiam senorde malvolvita kaphararo.

La subleŭtenanto rikanas :

— Kien vi kuras? Ĉiuj viaj gekamaradoj pereos senhelpe, ĉu vi komprenas?

Poste, li krie ordonas al siaj soldatoj :

— Konduku ŝin al nia posteno.

Su estas pene trenata de la soldatoj. Ŝiaj kapharoj falas ĝis ŝiaj kalkanoj. Ŝi plurfoje baraktante rezistas kaj rifuzas antaŭeniri. Kiom peza estas nun ĉiu paŝo, kiu malproksimigas ŝin de la kaverno. Ŝi volas kriegi tiel, ke ŝia voĉo povas penetri profunden en la kavernon, por averti ŝiajn gekamaradojn, ke ili ne trinku la akvon entenatan en la kruĉo de Nam Njo. Ŝi estas zorgoplena, ĉiufoje kiam ŝi pensas pri sia filineto, pri sia juna fratino kaj pri siaj karaj gekamaradoj. Dumvoje, ŝi sin turnas posten kaj kunpremante la dentojn krias, indignoplene :

— Kruelegulo j ! Kiel abomenindaj vi estas !

Severe riproĉita, la subleŭtenanto tre koleras kaj tuj donas al ŝi sur la dorson tiel fortan kolbobaton, ke ŝi subfleksiĝas. En la lumo de elektra torĉo, la oficiro rimarkas ŝiajn larmoplenajn okulojn.

— Tamen vi estas Vjetkong-aktivulino !—Li moke diras. — Jen, ricevinte nur unu kolbobaton, vi jam ploras !

Trovante, ke la kanajlo miskomprenas ŝian animstaton antaŭ ŝiaj larmogutoj, Su pintigas la buŝon :

— Nu, vi kredas, ke mi ploras pro via bato, ĉu ne ? Mi sciigas al vi, ke tiuj larmogutoj estas elverŝitaj nur pro miaj gekamaradoj ! Ĉu vi komprenas ?

4

Xam tute ĝojas, kiam li estas informita, ke lia subleŭtenanto Ba sukcesis aresti franjon Su. Kuŝante en sia tendo, li tuj leviĝas, iom fleksas sian vunditan brakon, brue iras tien kaj reen, antaŭ ol klinante sian kapon eliri el la tendo.

La soldatoj el la «commando»-unuo revenas al la transa bordo. Ili abrupte puŝas la kompatindan virinon en la torenton. Ŝi renversfalas kaj ŝia tuta korpo estas tramalsekigita. La akvo en tiu torentobranĉo ĝisatingas nur ŝiajn genuojn. Su travadas la torenton, trempante siajn piedojn en ĝian frostan fluejon. La

fluo kuntrenas ŝian dikan kaphararon. Alveninte al la gruzokovrita bordo, ŝi levas siajn okulojn kaj vidas du, tri soldatojn stari tie, portante ĉe la mano acetilenlampojn kun blindiga lumo. Ili baldaŭ alte levas la lampojn. Ĝuste tiam, Su ekrimarkas la vizaĝon de Xam. Li staras senmove, apogante la mentonon sur sia dekstra mano, dum lia bandaĝita maldekstra brako pendas antaŭ lia brusto. Ŝajnigante, kvazaŭ ŝi ne vidas lin, Su preterpasas la kanajlon. Kiel ŝtona statuo, Xam restas ĉiam senmove kaj senvorte, kun glacia mieno. Li atendas, ĝis ŝi apenaŭ faris du paŝojn for por krude voki:

— Haltu, tiu virinaĉo!

Su haltas sed ne turnas sin posten. Xam grandpaŝe venas tute proksime de ŝi kaj okulumante diras:

— Nu, vi jam forgesas min, ĉu ne?

La virino ĵetas sur lin flamajn okulojn poste denove forturnas la kapon, senresponde. Xam rigardas ŝin iun momenton, antaŭ ol diri:

— Fi! mi ĉiam kredis, ke via bandaĉo obstine restas en la kaverno!... Do, vi ankaŭ sentas la bezonon trinki? Mi tute ne atendis, ke estas vi kaj ne aliulo, kiun oni jam arestas. Kaj mi ankaŭ tute ne atendis, ke liberigita antaŭ la lasta jaro, vi denove sekvis la Vjetkongojn!

— Vi tute ne atendis, ke mi sekvis la Vjetkongojn kaj miaflanke, mi ankaŭ tute ne atendis, ke post tiel longa foresto, vi restas ĉiam absolute la sama...

— Absolute la sama! Kion signifas tio?

— Tio signifas, ke vi estas ĉiam malĝentilega. Eĉ vi, leŭtenanto, uzas tiel krudajn parolojn; do, oni ne

senprave riproĉas, ke via « Respublika Armeo » konsistas nur el malbonedukitaj elementoj...

Severe kaj malmilde riproĉita de la virino, Xam tre koleras. Li ekprenas la tenilon de sia ponardo, pendigita ĉe lia flanko, kaj abrupte elingigas ĝin. Li levas la longan kaj brilan klingon de tiu ponardo samnivele kun siaj okuloj por ĝin kontempli. Kaj post kelkaj sekundoj, subite li kuntiras siajn brovojn, malrapide mallevas la ponardon kaj remetas ĝin en ĝian ingon.

— Starigu por mi unu foston kaj ŝnurligu ŝin al ĝi— Krie ordonas Xam.

Tuj liaj soldatoj kuras serĉi iun arbeton kaj brue dehakas ĝin. Iun momenton poste, ili revenigas unu trunkon de tram-arbo, kiun ili starigas ĉe la torenta bordo, antaŭ ol katenigi la virinon al ĝi. La kanajlo Xam venas antaŭ ŝi, kunpremante la dentojn :

— Mi volus tuj tratranĉi vian ventron por vidi, kiom granda estas via hepato *. Sed, tion farante, mi plirapidigos vian morton. Mi lasas vin vivi ankoraŭ kelkajn tagojn por enterigi vin pli poste kune kun viaj gekamaradoj en sama tombo !

Ĉe tiuj vortoj, Xam turnas sin sur la kalkanoj kaj sin direktas al sia tendo. La soldatoj proksimigas siajn acetilenlampojn al la dorso de Su por kontroli, ĉu ŝi estas zorge katenigita. Poste, ili ankaŭ foriras kun la lampoj. Restas nur unu soldato, gardostaranta antaŭ la tendo de Xam.

La paraŝuta ŝnuro streĉe ligas ambaŭ nudajn brakojn de Su al la fosto. Ĉiumomente, ŝi havas la impreson,

---

* Organo konsiderata, kiel sidejo de la kuraĝo.

kvazaŭ tiu ŝnuro pli kaj pli streĉiĝas. Ŝi surgenuiĝas sur gruzokovrita tero kaj ŝia tute malseka kaphararo, kiu falas sur ŝian dorson komplete kovras ambaŭ ŝiajn piedojn. La nokto iom post iom heliĝas, ĉar la luno tuj leviĝos. De la loko, kie ŝi estas katenigita, ŝi povas rigardi al la vasta maro. Antaŭmomente, ŝi vidis nenion; sed, nuntempe ŝi povas jam kontempli la maron antaŭ si. Ŝi diras al si en sia koro: «Jam leviĝas la luno» kaj, larĝe malfermante siajn okulojn, rigardas emociplene al la ĵus ekaperintaj marondoj. Nun, ŝi jam preskaŭ forgesas la klingon de la ponardo de Xam, la katenon, kiu ligas ŝin al la fosto kaj ankaŭ tiun gardiston, kiu iras tien kaj reen. Nun, ŝi vidas nur tiun vastan marsupraĵon, kiu brile ondiĝas, nur tiun helan lazuron, kiu kvazaŭ eliĝas el la mara profundega ĵo ĝis tiuj ondokrestoj.

La luno de la dekoka tago jam leviĝas, flave brila. Poste, ĝi pendas alte en la ĉielo. Kaj kiam ĝia koloro plidensiĝas por fariĝi ruĝflava, Su tuj trovas, ke la luno tute similas al tiu senpedunkla matura mango de Hon Dat, pendanta meze de l' helblua firmamento.

Ĉi nokte, estas malvarme. La marondoj murmuras kvazaŭ senfine. De tempo al tempo, la vento, kiu venas de la marmezo blovas tra la strando, alportante iom da varmeto kun sala gusto. La senmanika vesto el maldika silko de Su jam sekiĝas. Ŝiaj distaŭzitaj kapharoj ankaŭ estas iom post iom sekigitaj de la mara vento. La lunlumo superverŝas la torentan bordon, plireliefigante la silueton de la genuiĝanta virino apud la lignofosto, ĉirkaŭ unu spanon pli alta, ol ŝia kapo. Iun momenton poste, ŝia kaphararo iom moviĝetas, ŝvelas kaj flirtas laŭ la vento. Malaperas la ekstremo de la

fosto kaj vidiĝas nur tiu moviĝema harondo, baniĝanta en la arĝenta lunlumo. Ju pli malfruiĝas la nokto, des pli blovas la vento. Su ne plu rigardas al la luno. Ŝi turnas nun siajn okulojn al Hon Dat, nigra maso stariĝanta tute proksime de ŝi. En ŝia koro regas maltrankvilego, ĉar ŝi ne scias, kio okazas nun en la kaverno. Povas esti, ke ĉiuj ŝiaj gekamaradoj estas venenitaj. Kiu soifanto povus sin deteni kaj ne trinki tiun akvon, entenatan en tiu kruĉo de Nam Njo? Ĉielo! Ili ne scias, ke tiu akvo enhavas venenon. « Nam Njo, la malamiko jam venenas vin! ». Su ĝemkrias en sia koro kaj ektremas rememorante, ke antaŭmomente ŝi ankaŭ volis trinki tiun akvon. Rigardante al la impete fluanta torento, ŝi rememoras, ke en tiu loko, kie ŝi ĉerpis akvon, ŝajnis, ke ĝi stagnis. Jes, tiu akvo ne fluis, kiel ĉi tie. La malamiko jam baris tiun torentobranĉon por ĝin veneni. « San, mia kara! Ĉu tie malproksime, vi scias la tutan sovaĝecon de tiu kliko Usono-Dziem? »

Tiel la povra virino vokas sian edzon, en tiu malfrua nokto, sub la arĝenta lunlumo! Tiel ŝi parolas al sia edzo, de malproksime kaj, suferplena, ŝi tute ne atendas, ke ŝi troviĝas nun apud tiu torento, kie antaŭ ok jaroj, ŝia edzo iam ĉerpis akvon por helpi ŝin lavi sian kapon kaj propramane kombis al ŝi ĉiujn distaŭzitajn hartufojn. Ĝuste ĉe la bordo de tiu torento, ŝi jam travivis plej feliĉajn tagojn. Nun, la situacio estas tute kontraŭa. Nun, la paraŝuta ŝnuro ligas ŝin tiel streĉe, ke ŝiaj brakoj, de la bicepsoj ĝis la manoj, estas kompletе paralizitaj. Ŝia dorso, de tempo al tempo, doloras pro la kolbobato, kiun antaŭmomente donis al ŝi la subleŭtenanto Ba. Sed, reale, kio plej turmentas ŝin nuntempe

estas tiu timzorgo, kiu premokupas ŝian spiriton : ne zorgante pri si mem, ŝi ja konstante kun maltrankvilo pensas pri siaj gekamaradoj en la kaverno, pri sia juna fratino Kujen kaj precipe pri sia amegata filineto.

Tiel, ŝi restas sendorme la tutan nokton. La luno jam atingas la zeniton, poste malaperas malantaŭ ŝia dorso sen tio, ke mildiĝas ŝiaj timzorgoj.

Ĉe la ektagiĝo, pro troa laceco, klinante flanken sian kapon, Su endormiĝas, dum malsupre la torento ĉiam susure fluas kaj la mara vento ĉiam blovas sur ŝian kaphararon, kiu gracie flirtas, kvazaŭ marondoj.

Su tiel dormas longan momenton. Kiam ŝi vekiĝas, jam meteniĝas. Forlasinte siajn tendojn, la soldatoj amase kolektiĝas ĉe la torenta bordo. Akompanate de du Jankioj, Xam haste venas apud Su. Per la pinto de sia ledŝuo, li levas ŝian mentonon. Ambaŭ Jankioj fikse rigardas al ŝi en la vizaĝon, poste interparolas per sia lingvo.

— Tiu Vjetkong-virino posedas paron da obstinaj sed tre belaj okuloj.

— Ĝeneraldirite, ŝi estas bela !

La ĉi tie kolektiĝantaj soldatoj jam komencas travadi la torenton por iri al la transa bordo. Kun bedaŭro, ambaŭ Jankioj forlasas la virinon kaj malsupreniras la deklivon. Du kanajloj el la « commando »-unuo estas jam servopretaj por dorsoporti ilin tra la torento. Xam ankaŭ foriras sed, apenaŭ farinte kelkajn paŝojn, li sin turnas posten kaj diras al Su :

— Vi provpenu surgenue atendi tie. Ĉi foje, ni eniros la kavernon, kaptos ĉiujn viajn kamaradojn kaj revenigos ilin al vi.

Ĉe tiuj vortoj, li kuntiras sian bandaĝitan brakon kaj malsupreniras al la torento. Iu soldato jam dorskurbe atendas lin tie por transporti lin al la transa bordo. Hodiaŭ, Xam ankaŭ partopr̥enas la operacion. Emociplene, Su rigardas la bandaĉon, kiu sin direktas al la kaverno. Restas nur kelkaj soldatoj, kiuj samfoje kuiras rizon kaj gardas ŝin. Sidante apud la fajrujo, ili de tempo al tempo ĵetas preterflugantan rigardon al Su kaj interbabilas:

— Ne estas facile trovi edzinon same ĉarman!

— Jes, bela virino sed bedaŭrinde, ŝi jam sekvas la Vjetkongojn.

— Su estas tute ŝokita de tiu ridinda babilado, sed ŝajnigante, kvazaŭ ŝi nenion aŭdas, ŝi forturnas la kapon kaj rigardas al la maro. Jam komplete tagiĝas. Lastan nokton, ŝi vidis nur la flavajn marondojn trembriĺi sub la lunlumo kaj, nuntempe, antaŭ ŝiaj okuloj etendiĝas viglamove tiuj samaj marondoj, kiujn roze koloras la unua *lumo* de l'aŭroro. La helviola koloro de la ĉielvolbo jam ŝanĝiĝas en diafanan ciklamenruĝon. La freŝa mateno malfermas nun al Su ĉion, kion ŝi ankoraŭ ne klare vidis lastan nokton. Ĝi kvazaŭ sekvas tiun lunhelan nokton, invadas ŝian koron kaj konsolas ŝin per siaj koloroj. Kaj ĝuste tiu hela mateno jam permesas al ŝi vidi la tutan pejzaĝon de Hon Dat.

Kiom pasiege Su amas tiun teron, kie ŝi aŭdigis siajn unuajn plorkriojn salute al la vivo, — kie abundaj kaj dolĉaj fruktoj jam roze koloras ŝiajn vangojn. Ĝuste sur tiu *te*ro, ŝia patrino kantante lulis ŝin al dormo kaj kiam ŝi fariĝis patrino, ŝi ankaŭ lulis sian infanon per la samaj malnovaj kantoj. Ĝuste sur tiu te̤ro, ŝi levis sian

manon por saluti la standardon de l'*Partio* kaj de tiam ŝi plie amas siajn gepatrojn, siajn edzon kaj infanon, siajn gefratojn kaj siajn gekamaradojn. Su amas do tiun teron Hon Dat per tiu amo, kiu estas kvazaŭ farita el sango kaj karno. Ŝi sopiras al tiu malnova surfosta domo kun ligna ŝtuparo, de kie ŝi povis iam ajn vidi la marondojn, la domtegmentojn dissemitajn meze de l'verdaj fruktĝardenoj, la senmezurajn rizkampojn, la altan kaj bluan monton Ba The, sur kies supro, ĉe ĉiu vesperkrepusko, ekaperas miriado da brile blankaj flugiloj de cikonioj. Sendube, neniam Su amas tiun teron Hon Dat pli pasie, ol hodiaŭ. Kiam ŝi surgenuiĝas antaŭ la morto, ĝuste tiam ŝi sentas pli da amo al la vivo kaj al tiu naskiĝtero, sur kiu kun la matenkrepusko tuj baldaŭ komenciĝos nova tago.

La suno nun atingas la dunojn kaj glitas tra la kliniĝantaj orflavaj bambutrunkoj ; ĝi blindige lumigas la maran enfluejon. Kaj la fiŝista vilaĝeto estas ankaŭ inundita de tiu sunlumo.

Su rigardas la fumstriojn, kiuj leviĝas el la tegmentoj de la kunpremiĝe starantaj domoj de la marfiŝistoj. Ŝi ankaŭ klare vidas larĝajn pecojn da fiŝretoj el brila nilono, *kiuj flirtas* apud la nigraj pecoj.

Baldaŭ tiu frumatena suno trafas ŝian korpon ; ĝi frapiĝas kontraŭ ŝiaj okuloj, banas ŝian kaphararon, superverŝas ambaŭ ŝiajn rondajn ŝultrojn.

Sed, subite, tiuj diversaj sunmakuloj kvazaŭ samfoje moviĝas. Aŭdiĝas pafuragano ĉeflanke de la kaverno. Su ektremante sin turnas posten. La pafbruoj pli kaj pli furiozas. Ŝi klare aŭdas la intermitajn kraketadojn de mitraleto kaj « Thompson » kaj la unuopajn pafojn

de muskedoj. Baldaŭ la malamikaj soldatoj senorde kuras al la torenta bordo, rigardante al la kaverno. Ekbrilas la okuloj de Su. Komence ŝi kredis, ke la malamiko pafis. Sed nun, ŝi jam klare rekonas, ke tiuj pafbruoj venas de la kaverno : ja, ŝiaj kamaradoj pafas kontraŭ la malamiko. Ŝi strecas siajn orelojn kaj distingas, meze de tiuj eksplodbruoj, homkriojn, kiuj eĥe resonas obtuze malproksime... Tute ĝoja, Su volas frakasi la katenojn kaj saltleviĝi por varme aplaŭdi siajn kamaradojn. Ŝi feliĉe diras al si en la pensoj : « Do, miaj gekamaradoj ankoraŭ vivas kaj batalas... »

Iu skeptika soldato, staranta ĉe la torenta bordo, pretervole diras :

— Pro tiu pafuragano, nepre ĉi foje oni revenigus ankoraŭ kelkajn « kaptaĵojn ».

— Nu, oni tamen diras, ke ili ĉiuj jam trinkis venenon !

— Kiu scias ? Tre povas esti, ke trinkinte venenon, ili ne mortas. Ĵeti venenon en tiel vastan kaj tiel longan torentobranĉon estas tute vana afero !

Apenaŭ finparolinte, la soldato ekmemoras, ke Su estas tie ; li tuj kolere rigardas ŝin kaj minace levas sian montrofingron :

— He, ne trofrue ĝoju pri tio, kion mi ĵus diris, « karulino » ! Vi jam similas al tiu senskvamigita fiŝo, kuŝanta sur haktabulo...

Su ĵetas sur la soldaton preterflugantan rigardon kaj volas respondi al li per kelkaj vortoj. Sed ŝi ekpensas : « Estas tute senutile paroli kun li ! » Fakte, ŝi ĝojas ne por si mem. Sed, ŝi ĝojas pro tio, ke en la kaverno ankoraŭ aŭdiĝas pafoj, ke ŝiaj gekamaradoj ankoraŭ

vivas kaj batalas, ke la malamiko ne povas eniri tien por kapti ilin, kiel diris Xam.

Dume, subite ĉesiĝas ĉiuj pafbruoj en la kaverno. Iun momenton poste, seninterrompe aŭdiĝas longaj pafuraganoj de mitralo. Su tuj scias, ke la malamiko jam rebate pafas. « Ne timinde! — Ŝi diras al si en la pensoj. — Certe, okazas la samo, kiel hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ. »

Baldaŭ, meze dum la furiozaj pafadoj, Su subite vidas grupon da soldatoj eliri el la kokosĝardeno, ĉe la transa bordo. Ili haste evakuas per brankardoj la vunditojn. La soldatoj, kiuj troviĝas ĉiflanke de la torento ankaŭ vidas tiun scenon.

— Ĉu vi vidas, knabegoj? — Diras la skeptika soldato. — Mi jam prave diris!

Poste, li rapide kuras ĝis la rando de la torenta akvofluo kaj laŭtvoĉe demandas:

— Ohe, kiuj estas tiuj vunditoj, knabegoj?

La brankardistoj ne respondas. Ili provpenas firme apogi siajn piedojn sur la tero, malsuprenirante la iom krutan deklivon. Alveninte al la torento, ili metas la vunditojn sur la sablobordon. Inter tiuj lastaj, estas unu Usonano, kiu ĉiam baraktas kaj kriegas. La brankardistoj forvišas la ŝviton per la manoj, anhelante:

— Fi! Nia leŭtenanto diris, ke ili ĉiuj mortis pro veneno... kaj ordonis al ni penetri en la kavernon... Sed, apenaŭ enirinte kelkajn paŝojn, ni jam estas akceptitaj per furiozaj barpafadoj. Elinter ni, ses estas pafmortigitaj kaj kvin vunditaj. Estas unu Usonano, kiu tuj faros la lastan spiron.

— Li ankaŭ penetris en la kavernon?

— Ne, li staras malproksime, sed trafita de erarvaganta kuglo!

Ĉe la transa bordo, la grasdika Jankio ĉiam baraktas. Ambaŭ liaj manoj konvulsie skrapas la sablan teron. Post momento, li ne plu krias, faras kelkajn fortajn piedmovojn, antaŭ ol turni flanken sian kapon. La metala kasko falas sur lian vizaĝon, dronigante ĝin en mallumo. La soldato sin klinas, metas sian manon sur la nazon de la Jankio, poste krias:

— Li jam mortis.

— Li mortis?

— Li ne plu spiras! — Diras la soldato kun la plej natura tono. Kun disstarigitaj kruroj kaj manoj ĉe la koksoj, li rigardas al la usona kadavro kuŝanta sur la tero. Aŭdiĝas voĉo ĉe la transa bordo:

— Transportu lin ĉi tien! Se vi lasus lin kuŝi tie, vi nepre ricevus punon.

— Punon! Ĉu li sola mortis? Prefere estas transporti unue niajn ankoraŭ vivantajn vunditojn al la ambulanco!

La soldatoj tuj brankardas la kvar vunditojn, travadante la torenton. La sango, kiu gutas de iliaj vundoj formas sur la akvosupraĵo ruĝajn makulojn. Kiam ili preterpasas ŝin, Su klare vidas sangogutojn vice fali sur la sablon post la paŝoj de la brankardistoj.

La kadavro de la Usonano baldaŭ estas ankaŭ transportita al alia bordo. Lia kasko elglitas el lia nuko kaj falas meze en la akvofluon, kiu ĝin forportas. Su vidas preterpasi antaŭ ŝi senorde distaŭzitan blondan hartufon kaj elstaran hokan nazon.

Maloftiĝas la pafbruoj en la kaverno.

Tiam, Su subite antaŭsentas, ke io terura tuj baldaŭ okazos al ŝi. Ŝi sin morale pretigas por elteni ĉiujn elprovojn. La parolo de San, ŝia edzo, subite kvazaŭ eksonas tute klare ĉe ŝiaj oreloj : « Kiel ajn grava estas la afero, se ni scias fari zorgajn antaŭkalkulojn, ni restas ĉiam pli firmaj, kiam ĝi okazas ».

Kaj Su komencas murmuri kvazaŭ al sia edzo : « Bone, mi agos laŭ viaj konsiloj, karulo mia ! Nun, mi estas tre firma... Certe, ĉi foje, mi ne povas plu vin renkonti. Do, kiam vi revenos hejmen, vi ne malĝoju ! Mi tre kompatas vin, ĉar mi scias, ke jam de sep jaroj, vi konstante pensas pri mi kaj pri via filino. Certe, vi tre malĝojos, kiam reveninte hejmen, vi plu neniam retrovos min. Pardonu min, karulo mia ! Sed, se restus ankoraŭ la etulino Thuji, konsideru ŝin, kiel kompenson de mia amo. Rigardu vian filinon ! Tio signifas, ke vi jam vidas min... Ĝis tiu minuto, mi ne havas sciaĵon pri ŝi, sed mi firme kredas, ke nia filino ankoraŭ vivas, ĉar niaj gekamaradoj en la kaverno ĉiam firme tenas siajn pafilojn en la mano ».

Tiel murmuras Su kaj ŝi havas tian senton, kvazaŭ vere ŝia edzo staras apud ŝi. Poste, ŝi flustras al sia patrino kaj al sia juna fratino : « Panjo, kion vi faras nun ? Vi flegas ĝardenon aŭ manĝigas porkojn ? Jam de tri tagoj, mi ne vidas vin, panjo !... Kaj eble, mi ne povas plu revidi vin... Se mi mortus, vi prenu la etulinon Thuji sub vian zorgon, ĉu ne, panjo ! Vi konsideru ŝin, kiel vian Su dum ŝiaj infanjaroj. Tiel mi restos ĉiam kun vi kaj mi ne mortos !... Kujen mia, vi tute prave edziniĝas al Ngan. Li ja estas brava junulo,

bona partiano. Certe, mi ne povas ĉeesti vian edziĝofeston. Sed tio ne gravas, mi ĝojas kaj kredas, ke via vivo estos feliĉa. Faru ĉiujn eblajn penojn por bone plenumi vian taskon ; anstataŭu min por zorgi pri Thuji. Amu ŝin kiel eble plej multe, fratineto mia !... »

Tion dirante, Su havas la impreson, kvazaŭ ŝia patrino kaj ŝia fratino estas aŭskultantaj ŝin. Ekmemorante pri Thuji, ŝi mallaŭte krias : « Thuji, ne mortu ! » Kaj en pura imago, ŝi forte premas ŝin sur sia brusto, ameme karesante ŝian kapon...

Ja, Su ne eraris en siaj antaŭkalkuloj. Tio, kion ŝi atendis, estas tuj efektiviĝonta.

Dum ŝi estas tute absorbita, en sia imago, per korelversŝado al sia filineto, kelkaj soldatoj kuras de la kaverno al la torento, haste travadas la akvofluon kaj ŝin direktas rekte al Su. Unu el ili abrupte elŝiras la ŝnurligilon el la korpo de la virino, krie ordonante :

— Leviĝu !

Su provpenas ekstari, sed vane. Post tutnokta genuflekso, ŝiaj kruroj tute paraliziĝas. La soldato tuj subtenas ŝin sub la brakoj, antaŭ ol treni ŝin sur la gruzokovrita tero. Malsuprenirinte ĝis la torenta akvofluo, ŝi forte baraktas :

— Maltenu min, lasu min mem iri !

La soldato liberigas ŝin.

Su prove fleksas iun momenton siajn krurojn, antaŭ ol povi marŝi. Ŝi malrapide travadas la saman torentobranĉon, kiun ŝi travadis lastan vesperon. Alveninte al la transa bordo, iu soldato mansigne montras en direkto al la kaverno, poste, li iras ĉekape.

— Nu, ĉu vi scias, kien oni kondukas vin? — Ŝin demandas alia soldato, kiu iras lastvice.

— Ne.

— La majoro ordonas, ke oni revenigu vin al tiu loko. Al vi ankoraŭ ridas la sorto.

Aŭdante tiujn parolojn de la soldato, Su meditas: «Kion li volas fari kontraŭ mi? Certe, li havas ian perfidan intrigon. Bone, fariĝu, kio volas!»

Ambaŭ soldatoj kondukas ŝin en kokosĝardenon kaj venigas ŝin antaŭ la majoro, komandanto de la operacio.

Tiu lasta havas ostecan vizaĝon kun brile bruna haŭto. Li estas nudkapa; eble, li volas parade montri sian kaphararon, arte tonditan kaj glate kombitan, kiu falas ĝis la nuko. Li svingetas en sia mano unu brile lakitan lignan stangeton, kies ekstremaĵo estas kovrita per arĝento (Li ja imitas kelkajn pupajn generalojn, kiuj tiam, laŭmode, iras al batalo sen pafilo, sed kun regbastono).

Apud la majoro, staras Xam kaj ia nombro da soldatoj el la «commando»-unuo.

Ekvidante la virinon, la majoro prove reprenas severan mienon. Per la ligna stangeto, li frapetas sian maldekstran manplaton kaj, post momenta observado, li malice ridetas:

— Ha, vi havas tiel inteligentan fizionomion kaj, tamen, vi sekvas la Vjetkongojn!

Su forturnas la kapon.

— Mi aŭdis, ke via edzo troviĝas nun en Nordo, ĉu ne? Mi scias ĉion; mi scias, ke oni konsilis al vi rompi ĉiujn edzecajn ligilojn kun li, sed vi rifuzis. Vi vin

montris tiel tre inda virino. Vere laŭdinda estas fidela edzino!

Su restas ĉiam senvorte. La majoro kvazaŭ ravita daŭrigas:

— Vi ne forlasas vian edzon! Pri tio mi havas neniun opinion; eble, mi ankoraŭ laŭdas vin. Sed, vi sekvas la Vjetkongojn, kio tute ne estas laŭdinda. Sekvi la Vjetkongojn estas sekvi la vojon al morto.

Su ridetas. Ŝia rideto kvazaŭ diras: «Vi ne havas alian rakonton? Jam tedas al mi aŭdadi pri tio! Do, silentu!»

Sed, la majoro ne silentas. Ŝajnas, ke antaŭ Su li volas sin montri talenta babilemulo. Li fanfarone parolas iun momenton pri «personalismo», pri «socia komuna progreso», pri la senmezura potenco de la «nacia registaro», gvidata de Prezidanto Ngo kaj, kies reprezentanto estas li mem. Fine, li konkludas:

— Ne vane perdu vian tempon por atendi vian edzon. Ne okazos landa reunuiĝo. Se nia amika lando Usono restus ankoraŭ kun ni, ne ekzistus reunuiĝo ĉi tie.

Aŭdante tion, Su ne povas plu sin regi kaj tuj rebate diras:

— Vi kaj la Jankioj tiel decidas, sed nia popolo decidas alie. La popolo decidas, ke frue malfrue ĝi ekstermos vin ĉiujn por reunuigi la landon.

La majoro rondigas siajn okulojn kaj brue ridas:

— Ekstermi nin? Kiam oni sukcesos ekstermi nin? Poste, li eklevas sian manon en direkto al la kaverno:

— Rigardu tien! Kiel ajn alta estas la kaverno, nepre morgaŭ ĉiuj viaj gekamaradoj devos eliri el tiu

rifuĝejo! Kun kelkaj kanajloj kaj kelkaj simplaj fusiloj, vi volas ekstermi nin?...

— Miaj gekamaradoj ne eliros el la kaverno!

La malica rideto subite estingiĝas sur la lipoj de la majoro. Lia vizaĝo iom post iom paliĝas. Li silentas iun momenton por regi sian koleron poste sin turnas al siaj soldatoj:

— Ĉu vi jam venigas la mikrofonon?

Post kiam oni sciigas al li, ke la aparato estas pretigita kaj, ke la elektraj fadenoj estas instalitaj, la oficiro eksvingas sian brakon:

— Forkonduku ŝin!

Tuj la soldatoj el la «commando»-unuo de Xam abrupte puŝas la virinon antaŭen. Kun urĝaj paŝoj ŝin postiras la majoro kaj Xam.

Ne malproksime de tie, staras iu infanece juna subleŭtenanto el la psikologia militfako kun vizaĝo plenkovrita per ruĝaj ŝvelaĵetoj; li tenas prete en siaj manoj unu mikrofonon.

La majoro venas tute proksime de Su:

— Komence, mi ĉiam ĝentile interparolis kun vi. Sed nun, mi devas uzi krudajn parolojn. Aŭskultu min! Ĉu vi volas vivi aŭ morti? Se vi volas vivi, mi povas garantii al vi la vivon. Male, se vi volas morti, mi estas preta helpi vin morti en palpebruma daŭro. Respondu, tuj respondu!

Su fikse rigardas al la oficiro en la okulojn iun momenton, antaŭ ol diri:

— Pro kio mi volas morti? Neniu en tiu ĉi mondo volas morti!

Denove ekaperas rideto sur la lipoj de la majoro:

— Do, vi ankaŭ volas vivi!...

Per la ligna stangeto, li montras en direkto al la kaverno:

— Tre facile! Sufiĉas, ke vi diru nur kelkajn vortojn: vi sciigu al viaj kamaradoj en la kaverno, ke vi jam kapitulacas kaj vi voku ilin al kapitulaco!... Vi diru al ili, ke ni bone traktas vin kaj, ke ni ankaŭ bone traktos iun ajn, kiu formetas sian armilon kaj eliras el la kaverno... Ĉu eble?

La majoro paŭzas kaj atendas... Dume, la subleŭtenanto el la psikologia militfako proksimiĝas al Su, metante antaŭ ŝia vizaĝo la mikrofonon kaj Xam brue elingigas sian usonan ponardon pendigitan ĉe lia kokso, antaŭ ol viglapaŝe veni apud la virino. Kun manoj plektitaj ĉe la dorso, la majoro okulsekvas ĉiujn gestojn de Su. Li kredas, ke nepre ŝi cedos antaŭ la morto,— li firme kredas tion, ĉar laŭ sia opinio, se li troviĝus en tia sama situacio, li sendube pli humile kapitulacus por savi sin de morto. Cetere, antaŭ li, Su estas virino,— kaj bela virino, — do, ĉu ŝi povus forrifuzi la vivon? Ne nur ŝi, eĉ li mem sentas egan bedaŭron.

Sed Su restas ĉiam senmove, antaŭ la mikrofono, granda kiel pugno kaj truplena, kiel abelnesto. Rigardante al la kaverno, ŝi bone scias, ke ŝiaj gekamaradoj troviĝas ĉiam en plena kompleteco en ĝi kaj, ke se ŝi parolus, ĉiuj povus klare aŭdi ŝin.

Tute senpacienca, la majoro eklevante sian mentonon demandas:

— Kiel? Ĉu vi konsentas aŭ ne? Respondu!

Su faras unu paŝon plu kaj kapbalancas:

— Jes, lasu min paroli!

5

En la kaverno, oni restas ĉiam batalpretaj. Forpasis preskaŭ unu horo, de post kiam la malamikaj soldatoj estas forpuŝitaj, ili ne plu aŭdacas lanĉi novajn atakojn. Sed, vidante ilin ankoraŭ senorde iri tien kaj reen en la kokosĝardeno, niaj kamaradoj restas ĉiam sur sia batalpozicio, kun fusilo prete tenata en la mano.

— Mi tre timas, ke Su estas arestita aŭ pafmortigita de la malamiko, — diras Ngan al Hai Thep.

— Povas esti, ke ŝi estas arestita. Lastan nokton, aŭdiĝis neniu pafbruo.

Tiel respondas Hai Thep, poste, li silentas. La tutan pasintan nokton kaj ĝis nun, tiun gvidanton de la batalo trafis pli ol unu neatendita evento. Lastan vesperon, reatinginte la kavernon kun sia kruĉo da torenta akvo, Nam Njo tuj premis sian ventron per ambaŭ manoj kaj dolorkriis iun momenton; poste, ŝia vizaĝo tute paliĝis kaj ŝia tuta korpo estis inundita per malvarma ŝvito. Hai Thep, dubema, demandis, ĉu ŝi jam trinkis akvon el la torento. Tuj post sia jesa respondo, ŝi renversĝalis. Senprokraste, li enŝovis sian montrofingron en la gorĝon de la virino, kiu baldaŭ vomis plenbuŝon da flave mukeca likvaĵo. « La torenta akvo estas venenita de la malamiko, — konkludis Hai Thep. — Kaj Nam Njo jam trinkas ĝin. » Pro akurate plenumita helpo, Nam Njo sukcesis sputi ĉiujn toksajn substancojn kaj rekonsciiĝi post momenta sveno. Ŝia kruĉo, plena je akvo, estis tuj forĵetita. Tiel, la kaverno ĉiam troviĝis en tiu kriza situacio pro manko de trinkebla

akvo. Krome, post tiu riskoplena eliro por serĉado de l' akvo, malaperis Su, — tiu ĉi evento maldormigis, lastan nokton, ĉiujn homojn en la kaverno. Ĉirkaŭ noktomeze, la etulino Thuji ekvekiĝis el sia dormo kaj krie vokis: « Panjo! Panjo! » Kaj kiam ŝi trovis, ke ŝia patrino ne respondis kaj ne brakumis ŝin, kiel ordinare, ŝi tuj eksplodis per ploroj. Kujen devis konsoli kaj luli ŝin al dormo. Sed, ĉi matene, Thuji vere ploregis, ĉar post longa serĉado en la tuta kaverno, ŝi trovis nenie sian patrinon. Kujen devis mensoge diri al la etulino, ke Su iris por misio al fora vilaĝo.

La fakto, ke Su ne revenas post la akvoĉerpado multe zorgigas la tutan okupantaron de la kaverno, des pli, ke neniu scias, kio jam okazas al ŝi. Lastan nokton, reatinginte la kavernon, Trong kaj Ba Ren trovis, ke mankis Su. Ili tuj revenis al la torento sed ne renkontis ŝin. Zorgoplene, Ngan ekprenis sian fusilon kaj, kune kun ambaŭ kamaradoj, faris novan serĉesploradon. Ili blindpalpis ĉiujn piedojn de kokosujo kredante, ke Su ankaŭ estis trinkinta tiun akvon, kiel Nam Njo kaj, ke ŝi estis kuŝanta svene apud iu arbopiedo sur la trairejo al la torenta bordo. Sed, baldaŭ, Ngan ankaŭ elreviĝis. Li jam vane traserĉis tutan angulon de la kokosĝardeno.

Pri tiu malapero de Su, ĉiuj en la kaverno havas tian senton, kvazaŭ ili estas kulpaj. Kun pentaj suferoj, ĉiuj kredas, ke ili mem devas preni sur sin la tutan respondecon pri tiu malfeliĉego. Kvankam en tiu rebato, Su ankoraŭ ne prenis fusilon por senpere batali kontraŭ la malamiko, ŝi tamen jam zorgis pri ĉio necesa por siaj gekamaradoj, de la nutroporcioj ĝis la

trinkeblaj akvogutoj. Kun ŝi, oni trovis ĉiam zorgemajn manojn, senbruajn kaj malpezajn paŝojn, dolĉajn parolojn, ĉar tuj de sia viriniĝo, ŝi jam gajnis ĉies korojn. Kiel tiu torenta akvofluo kaj tiu abunda vegetaĵaro, Su apartenas al Hon Dat, nedisigeble, kaj ŝi estas la fiero de la vilaĝeto, tiel pro sia beleco, kiel pro sia karaktero. Krom tio, Su estas ankaŭ ekzemplo de edzeca fideleco, — virino kiu intime sin ligas kun sia naskiĝtero, kun siaj samvilaĝanoj por elteni ĉiujn provojn.

Inter la kamaradoj, kiuj restas nun en la kaverno, Hai Thep estas tiu, kiu pleje suferas kaj timzorgas pri la sorto de Su. Dum la pasintaj jaroj de akra lukto, kiel aliuloj, ŝi jam spertis multajn malfeliĉojn kaj krom tio, ŝi devis elteni alian mizeron, kiun aliuloj ne konis, — mizeron de juna virino, kies edzo estis foririnta al Nordo. Antaŭ du tagoj, Su jam transdonis al Hai Thep la leteron, kiun ŝia edzo estis sendinta al ŝi de Nordo. Li ankoraŭ klare memoras, ke prezentante al li la leteron, ŝiaj fingroj forte tremis kaj li vidis ŝiajn okulojn tiam radii de espero. Li memoras ankaŭ, ke foje, post kiam ŝi estis arestita de la distriktaj aŭtoritatuloj, Su jam diris al li: «Mi ne bedaŭras mian propran vivon: se malbonŝance mi mortus, solaj la etulino Thuji kaj San mia karulo, estus kompatindaj. Post la patruja reunuiĝo, reveninte hejmen, li ne plu retrovus min kaj nepre nekonsolebla estus lia sufero.»

Tiel bravajn virinojn Hai Thep ofte renkontis, dum la revolucio spertis malfacilaĵojn. Ili volas resti eterne indaj filinoj de la Partio, de siaj gepatroj, de sia hejmtero. Kaj samtempe ili faras ĉion eblan por gardi sendifekta sian edzecan fidelecon, por ke post la

patruja reunuiĝo, ili povos rezervi al sia edzo plej kompletan feliĉon. Vere, neniu fidas al la reunuiĝo kaj pacience luktas por tiu feliĉa tago, pli ol ili.

Inter tiuj virinoj, Su pli distingiĝe aperas antaŭ liaj okuloj. Lastan nokton, li jam aŭdis la voĉon de Thuji, kiu vokis sian panjon. Kaj de tiam, li sentas, ke gravaj devoj en tiu batalo peze ŝarĝas liajn ŝultrojn. Tiun matenon, kiam li ankoraŭ ne povas sin liberigi el siaj timzorgoj, denove aŭdiĝas pafbruoj. Li kuras al la kaverna faŭko. Kiel lastajn fojojn, liaj kamaradoj ankaŭ sukcesas tuj repuŝi ĉiujn malamikajn atakojn. Sed, iom strange! Ĉi foje la soldatoj troriskeme penetras en la kavernon. Tial, ili estas pli multnombre paffaligitaj antaŭ la kaverna enirejo. La plimulto el ili kuŝas sur la dorso. Iuj ankoraŭ ne mortas, brue baraktas kaj kriegas, kiel tuj buĉotaj porkoj. Fine, ĉiuj silentas.

En la kaverno, ĉiuj pacience atendas la duan atakondon. Sed, vidiĝas neniu malamika movo. Post sia retiriĝo, la soldatoj kontentiĝas pafante per mitraloj al la kaverno kaj ne aŭdacas sturmi.

— Estu ĉiam batalpretaj! — Senĉese ripetas Hai Thep. — Povas esti, ke ili sin turnas al novaj ruzaĵoj!

Jam alte leviĝas la suno. Kun saketo da rostita rizo ĉe la mano, Kujen iras distribui surloke al ĉiu batalanto la manĝoporcion. La malamikaj soldatoj, kiuj kuŝas antaŭ la kaverna faŭko, jam mortis. Ilia kadavro restas senmove, montrante la vizaĝon al la suno. En la kokosĝardeno, kelkaj iras tien kaj reen, kun hezitemaj paŝoj. De tempo al tempo, ili direktas al la kaverno unu pafuraganon de mitralo. Poste, denove

regas silento. Oni povas aŭdi birdokantojn, paŝbruojn de sciuroj, kiuj kuras sur la kokospalmoj kaj malproksime, la murmuron de l'marondoj. Tiu kvieta momento estas vere streĉa ; ĝi ne lasas la batalantojn ripozi sed devigas ĉiujn resti ĉiam pretaj, kun fingro sur la pafrisorto. Se ekaperus nigraj homsiluetoj ĉe la kaverna faŭko, tuj rompiĝus tiu kvieteco, eksplodus pafoj kaj subfleksiĝus tiuj nigraj homsiluetoj.

Posteniĝante malantaŭ la rokfendegoj, la batalantoj plie fidas al tio, ke ĉiu ajn riskemulo neniel povus eviti iliajn kuglojn. La kaverna faŭko estas kvazaŭ fiksa celtabulo ; sufiĉas iom da flegmo, kiam ili pafas kaj ili nepre trafos la celon. Pli kaj pli, la kaverno aperas, kiel favora pozicio, samfoje prezentas sian malfortan flankon. Ĝi estas tre firma defendpozicio, sed al ĝi mankas trinkebla akvo. Ĝuste pro tiu akva problemo, Nam Njo preskaŭ mortis kaj Su ne revenas al sia posteno. Nun, ĉiuj sentas sian gorĝon tute seka. Post la batalo, ili abunde ŝvitas kaj la soifo terure turmentas ilin.

— Hundaĉoj ! — De tempo al tempo, kolere grumblas Ba Ren. — Ili venenas eĉ la torentan akvon !

Li insultas per tre krudaj paroloj spite, ke tiam staras antaŭ li Kujen ; poste, li ĵurpromesas, ke se li maltrafe pafus al iu ajn kanajlo, kiu nun aŭdacas penetri en la kavernon, li ne meritus esti homo. Li ankaŭ tre pentas, batadante sian bruston, ke lastan nokton, li ne iris lastvice por protekti siajn kamaradinojn.

— Mi ja pensis, ke nur tiuj, kiuj iras ĉefvice kolizias la unuaj kontraŭ la malamiko.

— La kulpo estas ankaŭ mia. — Diras Hai Thep .— Mi tute ne atendis, ke ili estis venenintaj la torenton. Anstataŭ prikonsideri la tutan kruelegecon de la malamiko, mi jam...

Hai Thep ankoraŭ ne finparolas, kiam li subite haltas. Ekstere, aŭdiĝas susurado de motoro kaj neatendite leviĝas voĉo el laŭtparolilo :

— Allo ! Allo ! Aŭskultu!...

Ĉiuj restas silente. La voĉo el la laŭtparolilo eĥe penetras en la kavernon :

— Ni, armeo de Vjetnama Respubliko, sciigas al la Vjetkong-elementoj, kiuj ankoraŭ fuĝas en la kaverno, ke Ngujen Thi Su, unu el viaj kunkulpuloj jam falis en niajn manojn kaj memvole revenis al la vico de tiuj, kiuj agas por la justa afero de la nacio. Post sia kapitulaco, ŝi volas nun alparoli vin...

La voĉo ĉesas, anstataŭata per la krakbruoj de la mikrofonaparato. En la kaverno, ĉiuj mirkonsternite rigardas eksteren. Sed ili vidas nenion. La malamiko jam instalas la aparaton en loko neatingebla por iliaj kugloj. Ĉiuj rigardas unu la alian, kvazaŭ sin demandante, ĉu vere ekzistas tiu voĉo el la laŭtparolilo aŭ ĉu ili misaŭdas. Neniu kredas al siaj oreloj, tamen reale ĉiu jam aŭdas. Neeble ! Tio ne estas misaŭdado. Tiam, Kujen ĵus prenis plenmanon da rostita rizo kun la intenco transdoni ĝin al Ngan, kiam denove leviĝas la voĉo. Ŝia mano tremetas, maltenante la rizon, kiu ŝutplenigas la tutan mankavon de Ngan. Ŝia vizaĝo komplete paliĝas. Ŝi restas senmove, kun pro teruro larĝe malfermitaj okuloj. Ŝia malsupra lipo konvulsie moviĝetas, kvazaŭ ŝi tuj eksplodos per larmoj.

Sed ne, ŝi forte mordas tiun lipon ; iom post iom ambaŭ ŝiaj manoj pugniĝas kaj ŝi restas ĉiam senmove. Ŝi silentas por atendi tuj okazontan teruraĵon ! Neniam Ngan trovis ŝin en tia stato. Neniam li vidis ŝian vizaĝon tiel kompatinde pala pro timego. Pretervole, li ekmemoras pri la miskompreno, kiun ŝi gardis antaŭe kontraŭ li kaj li ŝajne revidas parte ŝian pasintan suferplenan mienon...

Hai Thep kuntirante siajn brovojn rigardas al la kaverna faŭko. Li ankaŭ vidas nenion. « Eble Su estas perfortita, — li ekpensas, — sed, ĉu la malamiko povus perforte devigi ŝin obei ? Ne, neniam Su tiel agas. Sed, kiu scias ? Ŝi estas ankoraŭ juna, ŝi havas ankoraŭ sian infanon, sian panjon kaj multajn ligilojn kun la vivo. Se obeante al la malamiko, ŝi dirus perfidaĵojn, tio estus por ni vera katastrofo. Certe, tio tre malbone influos al nia nune disvolviĝanta akra batalo. Precipe, kiam Su estas virino, kiun ĉiuj amas kaj estimas. Ĉiu parolo de Su en tiu ĉi momento estas tre grava... ».

La krakbruoj de la mikrofono subite ĉesas kaj denove per obtuza voĉo, la malamiko abrupte « bojas » en la laŭtparolilo :

— Allo ! allo ! Vi, kiuj fuĝas en la kaverno, atentu, jen la voĉo de Ngujen Thi Su...

Ĉiuj en la kaverno turnas sian rigardon eksteren. Jen venas tiuj minutoj tiom streĉe atenditaj ! Sed oni ne devas longe atendi. De ekstere, eĥe resonas tre familiara voĉo, kaj ĉiuj tuj rekonas, ke ĝi estas la voĉo de Su :

— Gekamaradoj, mi estas Su...

Poste, ŝi subite parolas tre rapide :

— Gekamaradoj, ne fidu al ili. Ili mensogas. Mi neniam kapitulacas. Gekamaradoj, ne trinku tiun torentan akvon, ne formetu viajn pafilojn! Ĉu vi fartas ĉiam bone? Ĉu mia filineto ankoraŭ vivas? Se jes, aŭdigu al mi unu pafaron, por ke mi ĝoju!...

Kiel hastaj kaj insistaj estas ŝiaj lastaj paroloj! Su kvazaŭ kriegas en la aparato, urĝe, terure.

Ĉiuj en la kaverno, levante sian kapon, ekstaras. Sur ĉies vizaĝo torentas larmoj. Ba Ren tuj saltas al la mezo de la kaverna elirejo. Li disstarigas siajn krurojn, surŝultrigas sian «Garrand», celdirektas ĝian kanontubon al la kaverna faŭko kaj premas la pafrisorton. Aŭdiĝas tri sinsekvaj pafoj: «Pam! Pam! Pam!»

6

La majoro tute paliĝas aŭdante tiujn parolojn de Su. Li krie insultas ŝin, dum Xam per unu forta piedbato renversas ŝin teren, antaŭ ol ĵetiĝi sur ŝin kaj surtreti ŝian korpon. Sed, kiel mirinda estas la pafbruo! Ĝi heligas la al la tero algluiĝantan vizaĝon de la virino. Ŝajnas, ke ŝi ne estas batfaligita. Ŝi estas tre feliĉa, tre ĝoja. La pafbruo jam respondas al ŝia peto, al ŝia lasta espero, tiel pacience nutrita en ŝia koro. «Tiel, ili restas ankoraŭ tie, ili ankoraŭ vivas!». Ĉe tiu penso, Su provpenas leviĝi kaj rigardas al la kaverno per larĝe malfermitaj okuloj. Eble, ŝi rigardas pli malproksimen. El tiu okulparo ŝprucas ĝojbriloj,

flamoj de kolero... Ĉiam algluiĝante al la kaverno, tiu okulparo estas plena samfoje je amo, espero, memkontenteco, felicxo kaj ankaŭ tiu senmezura doloro pro baldaŭa disiĝo. Tial, tiu okulparo, nature jam bela, fariĝas nun pli bela.

— Pendigu ŝin ĉe la arbo! — Ordonas la majoro. — Pendigu ŝin ĉe la kokosujo apud tiu vojkurbiĝo, por ke ŝia tuta bandaĉo povu rigardi ŝin.

Tri, kvar soldatoj impete venas, starigas ŝin. Per unu longa ŝnuro, ili ligas ambaŭ ŝiajn jam katenitajn kubutojn. Dume, ĉiam kun unu fleksiĝanta brako, Xam kvazaŭfreneze kuras al loko, kie unu kokosujo oblikve klinas sian trunkon ĝuste antaŭ la kaverno.

— Pendigu ŝin ĉi tie! — Li krie ordonas, poste eklevante sian mentonon, sin turnas al la soldato, ĉe kies zono pendas unu herbotranĉilego:

— Grimpu sur la arbon kaj faru unu entranĉon en ĝia trunko, por ke ne glitu la ŝnurligilo. Rapidu!

Obeante al la ordono de sia estro, la soldato grimpas sur la kokosujon. Alveninte ĝis kvin, ses metroj da alto, li elingigas sian tranĉilegon kaj brue tranĉas la arbotrunkon. Starante sur la tero, Xam rigardas supren. Kiam ĉirkaŭ la trunko de la kokosujo aperas sufiĉe profunda entranĉo, li diras;

— Bone, malsupreniru!

La soldato ĵetas teren sian tranĉilegon kaj glitas malsupren. Liaj piedoj apenaŭ tuŝas la teron, kiam Xam ekprenas la ŝnuron, per kiu Su estas ligita kaj ordonas al li denove surgrimpi la kokosujon, por alkroĉi ĝin al tiu ĵus farita entranĉo.

Ĉe la arbopiedo, du soldatoj atendas, ke oni ĵetos al ili de sur la alta trunko la ekstremaĵon de la ŝnuro. Ili estas pretaj suprentiri la povran virinon.

— Se vi pendigas min ĉe tiu arbo, — diras Su, — miaj gekamaradoj en la kaverno povas vidi min. Ili plie malamegas kaj tute ne timas vin!

Tion aŭdante, ambaŭ soldatoj hezitas suprentiri la ŝnurligilon. Xam, tute kolera, krias:

— Suprentiru!

Ili tuj abrupte tiras la ŝnuron. Kelkaj ankoraŭ forte ĉirkaŭpremas la krurojn de Su por malpermesi al ŝi barakti, ĝis kiam ŝi estas suprentirita kaj ŝiaj piedoj ne plu tuŝas la teron. Unu el la kanajloj, neatendite, ricevas unu piedbaton de Su ĝuste en la mezo de la vizaĝo. Li ambaŭmane premas ĝin kaj krias:

— Fivirino! Vere terura ŝi estas!

Su estas, iom post iom, tiel suprentirita, balanciĝante en la aero. Ambaŭ ŝiaj nudaj kaj blankaj brakoj, streĉe ŝnurligitaj, fleksiĝas malantaŭ la dorso... Jen paro da belaj kaj mildaj manoj!... Manoj laboremaj kaj lertaj, kiuj jam pli ol unufoje, heziteme, kareseme aŭ tremetante ĉirkaŭpremis ŝian edzon, ŝian infanon, ŝian panjon, ŝian junan fratinon, ŝiajn gekamaradojn. Vere kompatindaj estas tiuj katenitaj brakoj! La kruela ŝnuro ĉiam forte tiras ilin, alten levante la ŝveltan korpon de la viktimo. Sur tiu korpo, ĉio estas milda: jen tiuj kapharoj, kiuj falas ĝis la piedoj, jen tiu vizaĝo paliĝanta pro doloro, jen tiu brusto ŝvelanta sub la senmanika vesto el maldika nigra silko! La kruela ŝnuro suprentiras en la aero tiun filinon de

Hon Dat, tiun sudvjetnaman filinon, tiun unuinfanan patrinon kaj fidelan edzinon, kiu pacience atendas la revenon de sia foririnta edzo. Tie ĉi, en tiu ĉi momento, ĉio estas kruela, de tiu ŝnurligilo ĝis tiuj kanajloj, kiuj staras ĉe la piedo de la kokosujo, krom la sunlumo kaj la ĉirkaŭa vegetaĵaro. La suno filtriĝas tra la kokos palmoj por bani la densan kaphararon kaj la tutan korpon de Su, de la kapo ĝis la piedoj... Krom ankaŭ la printempa zefiro kaj la mara blovo. Su povas distingi la freŝan venteton, kiu venas de la rizkampo kaj la varmetan brizon kun ĝia sala gusto. Dum ŝiaj distorditaj brakoj terure doloras, ŝi provpenas rigardi al la kaverno, kaŝita al ŝiaj okuloj per tiuj flirtantaj kokospalmoj. Ho ve ! Pro kio la vento ne komplete klinas tiujn larĝajn foliojn, por ke ŝi povu, en tiuj grandvaloraj minutoj, hazarde vidi la silueton de siaj karuloj ? Eble, ŝi povus vidi sian junan fratinon Kujen dorsoporti la etulinon Thuji. Ĉielo ! Se en tiu ĉi momento ŝi povus vidi la etulinon Thuji, eĉ nur en palpebruma daŭro !...

... Kaj subite, Su memoras pri la pasinta vespero, pri tiuj manetoj de sia filineto, kiuj forte alkroĉiĝis al ŝiaj ŝultroj ; ŝi memoras, kiel ŝi haltis retenata per nevidebla forto, kiam ŝi volis forlasi la ŝtonblokon ! Ŝi memoras, ke ŝi jam demetis sian jakon por kovri la etulinon. Jes, tiam estis la lasta momento, en kiu ŝi troviĝis proksime de sia filineto, tio estis la lasta « gvidsigno » de ŝia patrina amo same, kiel la vespero, antaŭ la tago, kiam San ekvojiris por kolektiĝi en Nordo, estis la lasta « gvidsigno » de ŝia edzeca amo.

Su memoras pri ĉio, kio okazis ekde ambaŭ « gvidsignoj ». « Ĉi foje, eble mi mortos ! — Ŝi diras al si en la pensoj. — Sed, mi sentas nur bedaŭron kaj ne

penton aŭ honton... Ĝis tiu minuto, antaŭ la Partio mi estas ĉiam senpeka, kiel kamaradinoj Ngujen Thi Minh Khai kaj Vo Thi Saŭ *... Tial, ek de tiu minuto, mi devas gardi min tia... »

Pendigita meze en la aero ĉe tiu kliniĝanta kokosujo, Su konstante diras al si, ke ŝi devas elteni ĉian elprovon ĝis la fino. Forpasis ĉirkaŭ dudek minutoj kaj la malamiko ankoraŭ nenion plian faras. Forlasinte iun momenton tiun lokon, Xam nun revenas. Li staras ĉe la piedo de la kokosujo kaj rigardas supren al Su tra la brovoj. Poste, li iras tien kaj reen, kun rapidaj paŝoj, kvazaŭ senpacience atendante ion. Siaflanke, la majoro duone sidas, duone kuŝas, apogante sian dorson al la piedo de iu kokosujo. Li mordetas sian piptubon el eburo kaj, kuntirante siajn okulojn, rigardas al Su, tra la fumo de cigaredo, kiu seninterrompe eliĝas el lia buŝo.

« Kion ili volas ankoraŭ fari kontraŭ mi ?» — Sin demandas Su. Kaj ŝi timas ekpensante, ke la kanajloj povus uzi perfidajn rimedojn. « Ĉielo ! Se ili venigas ĉi tien mian panjon... Ne, ne, panjo, ne venu ĉi tien ! »

Efektive, Su tute pravas. Kaptita de dubo, ŝi apenaŭ tiel diras al si en la pensoj, kiam ŝia patrino neatendite

---

* *Ngujen Thi Minh Khai* : Aktivulino de la Hindoĉina Komunista Partio (nun Vjetnama Laborulara Partio). Estante unu el la gvidantoj de la Nam Ky-Popolleviĝo (23-11-1940), ŝi estis baldaŭ arestita kaj ekzekutita de la francaj koloniistoj.

Vo Thi Saŭ : Juna interligantino de la Sajgona Rezistad-komitato dum la rezistado kontraŭ la francaj koloniistoj (1946 — 1954). Ŝi estis arestita, punekzilita al Pulo Kondoro kaj ekzekutita tie, dum ŝi estis ankoraŭ deksesjara.

ekaperas antaŭ ŝi. La maljunulino marŝas meze inter du soldatoj. Ĉiam kun tiu maldika staturo kaj tiu kutima bonkora mieno. Ĉiam kun tiu ruĝe striita koltuko, pendanta sur la ŝultro kaj tiu senkoloriĝinta kostumo el silko. Sed, ne sola venas la patrino. Malantaŭ ŝi, aŭdiĝas konfuzaj voĉbruoj de multnombraj vilaĝanoj kaj iu soldato senĉese iras tien kaj reen, kun sia karabeno prete tenata en la manoj. Poste, grupo da soldatoj staras en vicoj tra la vojo por formi barieron. La majoro premestingas sian cigaredon sur la kokosujo kaj saltleviĝas, demandante:

— Kio okazas ? Pro kio oni tiel bruas ?

— Mia majoro, oni postulas tujan liberigon de la maljunulino. Oni diras, ke ŝi estas senkulpa kaj pro kio ni arestas ŝin ?

La majoro sin turnas al la subleŭtenanto staranta apud li :

— Vi tuj ordonu al niaj soldatoj bari al ili la vojon. Ne permesu al ili fari unu paŝon plu, ĉu vi komprenas ?

Poste, li diras al Xam :

— Konduku la maljunulinon al ŝia filino, por ke ambaŭ intervidiĝu !

Xam venas antaŭ la patrino de Su kaj, levante sian manon, montras en direkto al la kokosujo, ĉe kiu Su estas pendigita :

— Via filino estas tre obstina ; tial, ŝi estas pendigita tie. Vi iru doni al ŝi konsilojn. La majoro promesas, ke se laŭ viaj konsiloj, ŝi konsentus kapitulaci kaj alvokus siajn kamaradojn en la kaverno ankaŭ kapitulaci, li tuj ordonus, ke oni malsuprentiru ŝin.

Xam ankoraŭ ne finparolas, kiam patrino Saŭ etendante siajn brakojn puŝas flanken kelkajn antaŭ ŝi starantajn soldatojn kaj kuras rekte al Su.

Su klare vidas ambaŭ longe etenditajn brakojn kaj la flirtantajn blankajn kapharojn de sia patrino kaj la ruĝe striitan koltukon, kiu falas de ŝia ŝultro sur la teron. Restas ankoraŭ kelkaj paŝoj kaj la maljunulino povos tuŝi sian filinon. Sed, ŝi ne povas iri plu, ŝiaj kruroj ŝanceliĝas, antaŭ ol subfleksiĝi. Sed baldaŭ, ŝi leviĝas kaj daŭrigas la kuradon. Fine, Su rekonas ambaŭ ŝiajn tremetantajn manojn, kiuj nun streĉe ĉirkaŭpremas ŝiajn krurojn. Poste, la kapo, la vizaĝo de la maljunulino algluiĝas al ŝiaj piedoj. Tuj, ŝi eksentas varmeton kaj malsekecon ĉe siaj suroj. Kaj la patrina voĉo eksonas tie malsupre, nur per sufokitaj plorsingultoj. Larĝe malfermante siajn okulojn, Su rigardas al la blanka hartufo kaj al ambaŭ tremetantaj ostecaj ŝultroj de sia panjo. Suferplena, ŝi forturnas la kapon. Ŝiaj okuloj subite ruĝiĝas kaj ne palpebrumas. Sed, ŝi provpenas regi sian emocion kaj reteni siajn larmojn. Ŝi ne volas, ke la malamiko ankoraŭfoje miskomprenu ŝin kaj, ke ŝia patrino plie suferu. Ŝi emocie atendas, ke ŝia patrino diras neniun vorton. En tiu ĉi momento, plej bone estus, se la maljunulino ĉiam silentus kaj tiel ĉirkaŭbrakus ŝin, kiel en la pasinteco, kiam ŝi estis ankaŭ infana. Sed, Su estas ankaŭ antaŭzorgema: se pro troa kompato al sia filino, la patrino donus al ŝi malpravajn konsilojn, Su nepre ne obeus... Kaj sekve de tio, ŝi certe tre dolorus. Ja, neniam Su estas tiel severa kontraŭ si mem kaj neniam ŝi havas tiel strangan emocion. Tiuj manoj, tiu vizaĝo

nun algluiĝas al ŝiaj piedoj kaj komunikas al ŝia tuta korpo la forton de tiu patrina amo.

Pli ol sia filino, patrino Saŭ estas zorgoplena. Forpasis dudeksep jaroj, de post kiam ŝi naskis kaj vivtenis sian filinon ĝis la matura aĝo; ŝi jam ŝparis ĉiun laktoguton kaj ĉiun vestaĵon. Ŝi estis ĝuste tiu, kiu vidis ambaŭ delikatajn piedojn, pendantajn nun sub tiu kokosujo, fari la unuajn ŝancelpaŝojn. Ŝi estis ĝuste tiu, kiu karesis tiun densan kaj brilan kaphararon, nun falantan sur ŝiajn ŝultrojn, kiam ĝi estis ankoraŭ maldensaj hartufoj gluiĝintaj sur infana kapo. Poste, tiuj balbutoj, tiuj tagoj de vidvineco... Ĝuste tiu filino komprenis kaj multe helpis ŝin en la plej mallumaj tagoj de mizero. Kaj ĉu plenkreska, tiu filino povis feliĉe vivi? Ŝi devis ankaŭ sole vivteni sian infanon. Tiel la vivo de la patrino estis sama, kiel tiu de ŝia plejaĝa filino! Do, ĉu patrino Saŭ povas ne suferi antaŭ tiu malfeliĉo de sia filino?

Sed, por savi sian filinon, la patrino ne povas diri tiujn vortojn, kiujn la malamiko devigis ŝin diri. Pli sanktaj, ol ŝia amegata filino estas ankoraŭ tiu vilaĝeto, tiu kaverno, kiu firmdecide rezistas. Pli sankta, ol ŝia filino estas ankaŭ la revolucio, al kiu, la tutan vivon, ŝi fidas kaj koralligiĝas.

— Maljunulino, tuj parolu! — Admonas la majoro, staranta apud patrino Saŭ. — Provpenu konvinki vian filinon, se vi volas, ke ŝi vivu!

La oficiro konstante piedfrapas la teron, kvazaŭ li surtretas formikejon. Subite, la maljunulino maltenas la krurojn de sia filino kaj sin turnas al la majoro. Su klare aŭdas ĉiun vorton de sia panjo:

— Mia filino estas jam plenkreska ; ŝi havas sian inteligenton... Lasu ŝin libere eldiri siąn opinion !...

Aŭdante tiujn parolojn de sia patrino, Su ne povas plu sin regi kaj ŝiaj larmoj abunde torentas el ŝiaj okuloj. Ŝi baraktante kriegas :

— Forigu miajn ŝnurligilojn, por ke mi malsupreniru ! Rapidu !

La majoro okulumante rigardas al Xam.

— Kiel ? Vi konsentas, ĉu ne ? — Prove demandas tiu lasta.

— Jes, formetu miajn ŝnurligilojn ! — Diras Su.

— He, knabegoj, formetu ŝiajn ŝnurligilojn ! Alportu la mikrofonon !

La soldatoj malnodas la ekstremaĵon de la ŝnuro, ligita al iu fosto. Iom post iom, la korpo de Su klinigante glitas malsupren. Trovante, ke ĝi ne povus resti stare, patrino Saŭ etendas ambaŭ siajn manojn por subteni sian filinon. Tial, la piedoj de Su apenaŭ tuŝas la teron, kiam ŝia kapo sin apogas sur la patrinan ŝultron.

Kaj en tia pozicio, ŝi preme ĉirkaŭbrakas sian patrinon. Ŝi kovras per kisoj ŝian faltoplenan vizaĝon, tute malsekan de ploroj. Ŝi urĝe kisas kaj fine, ŝi povas nur balbute diri, kun sufokita voĉo, kelkajn vortojn : « Panjo... panjo vivtenos por mi la etulinon Thuji, panjo !... »

La majoro alvenas, eltiras la maljunulinon el la ĉirkaŭbrako de ŝia filino kaj diras :

— Ĉesu ! Tio sufiĉas !

Poste, li levas ambaŭ manojn en direkto al la subleŭtenanto de la psikologia militfako, kiu ĉiam prete tenas la mikrofonon, kaj diras al Su :

— Parolu !

— Kion mi devas paroli ? — Demandas Su.

— Parolu, kion unuafoje mi diris al vi ! Voku vian bandaĉon al kapitulaco. Nur tion !

— Formetu miajn katenojn !

— Ne ! Parolu, kaj oni formetos ilin, tuj baldaŭ !

Su ne plu diras. Ŝi antaŭenpaŝas kaj sagrapide donas fortan piedbaton al la mikrofono, tenata ĉe la mano de la subleŭtenanto. La aparato estas forĵetita malproksimen, kuntrenante la tutan elektrofadenan rulvolvaĵon.

La majoro eligas akran krion, kvazaŭ li estus surprize strangolita. Li vive sin ĵetas antaŭen kaj furioze pugnobatas la povran virinon sur la vizaĝon. Patrino Saŭ tuj alkuras, sed la oficiro jam per forta eksvingo de l'brako renversas ŝin teren kaj krie ordonas :

— Xam, senkapigu tiun virinaĉon !

Xam tuj elingigas sian brilan trancilegon kaj impetas, kvazaŭ rabobesto. Li kuntiras sian vunditan brakon super sia ventro kaj, per la alia, donas fortan trancilbaton sur la nukon de Su. Sed, strange ! La trancilklingo estas repuŝita returne. Xam tuj per ĉiuj siaj fortoj donas ankoraŭ du sinsekvajn trancilbatojn. La kapo de Su nur klinas antaŭen. Tiel, la tri trancilbatoj ne sukcesis senkapigi ŝin. Xam hezitas, anhelante. Li ĵetas preterflugantan rigardon sur la klingon, dubeme. Ĉu tiu usona trancilego ne estas sufiĉe akra ? La kaŭzo ne kuŝas en tio. Ĝi estas tute alia : la kaphararo de Su

estas tro densa. La klingo jam tuŝas la plej abundan kaphararon, tiun de dudeksepjara virino, brile glatan kaj tre dikan kaj, kiu konsistas el multnombraj firmaj haroj, kiuj falas de tiu nefleksebla kapo ĝis tiuj neflekseblaj kalkanoj.

Patrino Saŭ jam falas svene sur apudan herbejon.

Xam sukcesas baldaŭ trafe trancî la nukon de Su, nur post kiam du soldatoj venas helpe al li, suprenlevante ŝiajn ĥapharojn. Sed, Su ankoraŭ ne mortas. La kruelegulo eksvingas sian trancîlegon kaj intencas doni al ŝi novajn batojn, kiam la majoro levas sian manon por lin malhelpi:

— Sufiĉe! Ne fortrancu ŝian kapon! Pendigu ŝin!

La soldatoj denove suprentiras la malfeliĉan virinon al la trunko de la kokosujo.

— Preferinde estas, ke ŝi tiel agonias, — kolere diras la majoro. — Ŝiaj ĝemkrioj ĝisatingos la orelojn de tiu bandaĉo, kiu fuĝas en la kaverno!

...Post la kvara trancîlbato, Xam subite forĵetas sian trancîlegon kaj, premante per ambaŭ manoj sian ŝultron, ŝancelpaŝe sin direktas al la piedo de iu kokosujo. Li apogas sian dorson sur la arbotrunkon kaj malbutonumas sian jakon. Sur lia maldekstra ŝultro, ĉe la bandaĝita loko, ruĝas sango. Neniu frapis lin. Oni scias baldaŭ, ke pro tro forta movo de l' brako por trancî la kapon de Su, malfermiĝis lia malnova vundo kaj tiel ŝprucis lia sango.

Ĉapitro V

1

Post la tri pafoj respondantaj al la peto de Su, ĉiuj en la kaverno aŭdas nenion plu. Ili ne scias, kio okazas jam al ŝi, tie ekstere. Ili restas surloke, ĉiam prete tenante sian pafilon, dum iliaj okuloj estas vualitaj de larmoj. Ba Ren kaj ia nombro da kamaradoj proponas, ke oni tuj alpaŝu al atako por savi franjon Su. Sed Hai Thep kapskuas kaj rifuzas la proponon.

Kunpremante siajn lipojn, li murmuras:

— Certe, ili jam mortigis ŝin!

Neniu kontraŭdiras. Sed ĉiuj pensas, ke Su jam foroferis sian vivon. Hodiaŭ, estas unuafoje en la batalo, ke ĉiuj havas la impreson, kvazaŭ ili perdus ion ekstreme valoran kaj samtempe ricevus ion tre grandiozan. Ĉiuj sentas, ke ilia koro estas peze ŝarĝita per doloro kaj malamo, ke ĉiam bolas en iliaj vejnoj la varma sango de l' venĝemo. Neniu havas la okazon, eĉ nur unu fojon aŭdi tiel mirinde belan voĉon, kiel tiun, per kiu Su ĵus parolis al ili. Neniu trovas, eĉ nur unu

fojon, tiel profundan amon al ŝi, tiel fortan venĝemon kaj tiel firman batalvolon.

En la kaverno, Kujen jam ploris. Sed nun, ŝi ne povas plu plori. Ŝi devas forviŝi siajn larmojn, ĉar la etulino Thuji denove alkroĉiĝas al ŝiaj brakoj por demandi, kien iras ŝia patrino kaj, kiam ŝi revenos. Ankoraŭfoje, Kujen devas mensogi dirante, ke ŝia patrino komisie iras al najbara vilaĝo kaj baldaŭ revenos. Ŝi ne povas diri la veron. « Thuji estas ankoraŭ tro eta, — opinias Kujen, — ŝi ne povas sin regi, kiel mi ! »

En la malluma kaverno, brakumante sian nevinon, Kujen suferplene pensas, ke ĉi foje, la etulino nepre perdas sian patrinon. Ŝi ne povas sin deteni de larmoj, kiam ŝi tenas en la manoj la jakon de sia fratino. Ŝi levas ĝin al sia buŝo kaj mordetas ĝin. Ŝi klare sentas la odoron de varmeta ŝvito. Kiel kara kaj dolĉa odoro, tute simila al tiu eliĝinta el la spirado de Su. Ŝia patrino jam kolektis fadenojn el kruda silko en kvanto ĝuste sufiĉa por teksi paron da nigraj jakoj, el kiuj ŝi donis unu al Kujen kaj alian al Su. Kujen portas nun tiun nigran jakon kaj Su jam lasas la sian ĉi tie por kovri la korpon de sia filineto, antaŭ ol iri al la torento. Lastan nokton, certe Su sentis neeltenebLan malvarmon. « Franjo Su, portante la jakon, kiun panjo teksis por ni ambaŭ, mi ja ne povas forgesi vin, de viaj infanjaroj ĝis la tago, kiam vi fariĝis patrino. De nun, mi devas anstataŭi vin por vivteni panjon kaj la etulinon Thuji ; mi devas esti partianino kaj baldaŭ, patrino kiel vi ! »... En tiu anima eksciteco, Kujen pretervole ŝovas sian manon en la poŝon de la jako de

Su kaj ektuŝas iun leteron. Sed, en la mallumo, ŝi ne atentas pri tio kaj tuj metas ĝin en sian propran poŝon...

Ekstere, subite aŭdiĝas konfuzaj homvoĉoj. Ŝajnas, ke denove funkcias la laŭtparolilo. Kujen prove elŝiras sin el la manoj de Thuji:

— Restu ĉi tie! Via onnjo devas iri eksteren, iun momenton!

Ĉe tiuj vortoj, Kujen kuras al la kaverna faŭko. Ne plu aŭdiĝas tiuj voĉbruoj. Ŝin renkontas Ngan. Liaj okuloj brilas, teruraspekte. Li anhelante diras:

— La kanajloj ĵus anoncis per laŭtparolilo, ke ili jam senkapigis franjon Su, antaŭ ol pendigi ŝin. Ili ankoraŭ vokis nin al kapitulaco!

Kujen ekkrias «Ĉielo!» poste prove kuras eksteren. Sed Hai Thep jam ĵetiĝas antaŭen por ŝin reteni. Dolorplena, ŝi plorsingultas sur lia ŝultro. Tiam, Ngan, Ba Ren kaj tri, kvar aliaj kamaradoj denove petas, ke oni permesu al ili ataki la malamikon. Hai Thep ĉiam kapskuas.

— Mi devas eliri,— diras Ngan,— mi ne povas plu elteni!

— Mi ankaŭ, — aldonas Ba Ren, levante sian pafilon,— mi prenus sur min la tutan respondecon, se mi mortus. Sed mi ne povas toleri, ke ili mortigas franjon Su!

Hai Thep prenas severan tonon:

— Pro tio, ke ni devas firme teni nin en la batalo, mi ankoraŭfoje ordonas, ke neniu propravole eliru el la kaverno!

Ĉiuj, inkluzive Ngan kaj Ba Ren, restas senvorte, dum Hai Thep daŭrigas :

— Revenu tuj al via pozicio !

Kaj post mallonga paŭzo, li iomete agitas sian manon :

— Por venĝi nian kamaradinon Su, ni devas resti ĉi tie, venki en tiu batalo !

La kvar, kvin homoj, kvazaŭ interkonsente, unu post alia, silente revenas al sia loko. Kujen ankaŭ malpli amare ploras. Hai Thep venas proksime al ŝi kaj metante sian manon sur ŝian ŝultron, mallaŭte diras :

— Sufiĉe, eniru en la kavernon, Kujen ! Restu tie kun la etulino Thuji. Ne plu ploru ! Kuraĝe !...

Kujen obeas *al liaj* konsiloj kaj, paŝon post paŝo, eniras en la internon de la kaverno, mordetante sian fingron. Post ŝia foriro, Hai Thep eksidas sur ŝtonblokon kaj karesante siajn ankoraŭ ne razitajn lipharojn, kiuj nun tre dense kreskas, parolas kun *plej* natura tono :

— La kanajloj jam komencas meti la laŭtparolilon ĝuste antaŭ nia kaverno por ludi tiun komedion de psikologia milito. Sed, ili tute ne atendis, ke Su jam uzis tiun laŭtparolilon por kuraĝigi nin. Tiel, ĝi efikas tute kontraŭe al iliaj antaŭkalkuloj. Vere, Su estas tre kapabla. Ŝi ja kredis, ke ni ankoraŭ ne sciis, ke la torenta akvo entenas venenon. Ŝi rekomendis al ni ne trinki tiun akvon kaj, — ĉu vi memoras ? — ŝi ankoraŭ rekomendis al ni ne mallevi niajn pafilojn, neniam mallevi niajn pafilojn !...

— Mallevi niajn pafilojn! — Ripetas Ba Ren. — Nur kiam ni ĉiuj mortos...

Tu Nghiep pintigas sian buŝon :

— Kiam ni ĉiuj mortos? Eĉ kiam al mi restos nur unu ripo, mi batalos kontraŭ ili. Kaj se mi mortus, mi forĵetus mian pafilon kaj neniam lasus ĝin fali en iliajn manojn!

— Onklo Tu, vi tute pravas! Mi ankaŭ faros, kiel vi. Sed nun, ĉu vi havas akvon? Donu al mi unu gluton, mi tre soifas!

Ĉe tiuj vortoj, la knabo Dat rigardas al Tu Nghiep kun « diplomatia » rideto.

— Vere, vi jam multe trinkas, kiel bubalo! — Diras Tu Nghiep, antaŭ ol pasigi sian ladbotelon al Dat. Tiu lasta tuj levas ĝin al sia buŝo. Sed, el la ladbotelo falas neniu akvoguto. Dat intencas krii « Vi jam lerte trompas min, onklo! » Sed li sukcesas sin regi. Li klakas per la langoŝajnigante, kvazaŭ li ĵus prenis gluton da akvo, poste transdonas la ladbotelon al Toi :

— He Toi, prenu unu gluton por refreŝigi vian gorĝon!

Trompita, Toi ekprenas la ladbotelon kaj metas ĝin sur sian buŝon. Dat ne povas sin regi kaj eksplodridas. Tute ruĝa pro honto, Toi ĵetas la ladbotelon en iun kavaĵon de la kaverno. Onklo Tu Nghiep ankaŭ ridegas poste demandas :

— Ĉu vi jam « ĝissate » trinkas?

— Vi donas al ni malplenan ladbotelon kaj vi ankoraŭ demandas...!

Tu Nghiep pli forte ridas :

— Tiun matenon, mi jam diris, ke komplete elĉerpiĝis la akvo. Kaj vi ĉiam insistas, sinjoroj...

Onklo Tu Nghiep estas jam maljuna, sed li havas la kutimon nomi la knabojn sinjoroj. Estinte adepto de la sekto Hoa Hao, li jam de du jaroj tondis al si la kapon kaj manĝis viandon. Tiu homo, kiu kredas je Buddo estas tre ŝercema. Vero estas, ke lia ladbotelo komplete sekiĝis jam de la lasta vespero. Kaj tiun lastan vesperon, li jam elverŝis la lastan akvoguton al la etulino Be.

Nun, en la kaverno restas neniu akvoguto. La soifo bruligas ĉies gorĝon.

— Se ankoraŭ daŭras tia situacio, oni devas trinki sian urinon!

— Eble ĝi similas al biero! Dum la rezistado, iu el niaj kamaradoj sukcesis fuĝi el la insulo Pulo Kondoro kaj turmentata de soifo meze de l' maro, li devis ankaŭ trinki sian urinon.

Nam Tan skuas sian kapon:

— Tian bieron mi ne emas trinki. Tiuokaze, prefere estas elteni la soifon!

— Vi estas tro elektema! — Diras Ba Ren, — Ĉu en tiu milittempo, vi povus ĉiam postuli, ke via edzino aŭ viaj infanoj preparu por vi varman teon?

Ĉiuj ekridas. Ĉirkaŭ vespere, post kiam li finmaĉas sian porcion da rostita rizo, Ba Ren ne povante plu elteni soifon, urinas en sian ladbotelon. Profitante la foreston de Hai Thep, li iomete agitas ĝin kaj invitas ĉiujn trinki. Trovante nenies respondon, li tuj enbuŝigas la botelfaŭkon. Kaj farinte tiun unuan gluton, li aŭdigas aproban ekkrion « ha! » kaj plenkontente mienas, antaŭ ol laŭtvoĉe diri:

— Bone, kamaradoj!... Trinku, trinku! Mi prenus sur min la tutan respondecon, se okazus al vi io bedaŭrinda...

Iun momenton poste, kelkaj kamaradoj ankaŭ prove trinkas. Tiam, revenas Hai Thep. Ekvidante tion, li volas malkonsili ilin; sed malfermi la buŝon por admoni ilin li ne estas kapabla. Ja, li mem terure soifas. Cetere, antaŭ liaj okuloj, tiu afero havas nenion strangan. Dum la mallumaj tagoj de mizero, kvankam li ankoraŭ ne trinkis sian urinon, li tamen, iafoje, devis krakmanĝi vivantajn krabetojn post kvar sinsekvaj tagoj de malsatego. Ĝis nun, oni ankoraŭ konsideras la branon, kiel tre malbonan nutraĵon, taŭgan nur por porkoj. Tamen ankaŭ tiun branon li jam manĝis... Verdire, sennombraj estas aliaj mizeroj, kiujn li spertis en sia vivo. Tial, pri tiu afero de urino, kiun oni trinkas pro troa soifo, li tute ne miras, kvankam ĝi iom ĉagrenas lin.

Sed, subite, li malklare ekmemoras, ke hieraŭ, li ŝajne preterfluge vidis kelkajn akvujojn sur iu ŝtonbloko en la kaverno. Li tuj diras al siaj kamaradoj:

— Ne plu trinku! Lasu min iri serĉi por vi akvon el ŝtonkavaĵoj...

Ĉe tiuj vortoj, li eniras en la internon de la kaverno kaj direktas la lumon de sia elektra torĉo al ĉiu ŝtonbloko. Post zorga traserĉado, li fine trovas sur iu ŝtonego etan kvanton da pluvakvo entenata en kavaĵo same granda, kiel du kunigitaj mankavoj. Li prove prenas per sia fingro iom de tiu akvo por ĝin flari. El ĝi eliĝas odoro de putriĝintaj folioj, iom malagrabla. Li klakas per la lango ekpensante: «Tio ne gravas!»

Poste, li forlasas la ŝtonegon kaj iras voki siajn kamaradojn :

— Sekvu min, kiuj pleje soifas !

Lin sekvas baldaŭ entute kvin homoj, inkluzive kamaradon Ba Ren kaj la knabon Ziep. Sola, Nam Tan ne iras kaj ankoraŭ diras :

— Dankon ! Vi iru, sinjoroj ! Tiun putran akvon mi ne emas trinki !

Starante sur la ŝtonego, Hai Thep etendas sian manon por helpi siajn kamaradojn, unu post alia, suprengrimpi ĝis la akvujo. Sub la lumo de elektra torĉo, li montras ĝin al ili. Ba Ren ĝoje diras : « Tre bone ! » poste manbatetas la ŝultron de la lernanto Ziep :

— Oni rezervas al vi, bela knabo, la rajton trinki la unua !

Ziep rigardas al la kafe brunkolora akvujo, heziteme.

— Trinku, knabo ! — Lin admonas Ba Ren. — Mi prenus sur min la tutan respondecon, se vi malsaniĝus post trinkado ! Mi bone scias, ke antaŭe en Sajgono, vi trinkis nur bieron de bona kvalito. Nun, en tiu mizera situacio, vi devas preni kelkajn glutojn por elteni la provon. Oni batalos ankoraŭ longatempe, knabo mia !

La juna lernanto ridetas poste, obeeme, fleksas ambaŭ siajn genuojn kaj sterniĝas sur la ventro. Sub la lumo de elektra torĉo, oni vidas lian pale blankan vizaĝon kliniĝi al la akvujo. Li elŝovas sian langon, brue trinkas du, tri glutojn, poste tuj leviĝas. Per unu mano, li frotas sian pantalonon ĉe la sidvangoj kaj per la alia li viŝas siajn lipojn, deformitajn per larĝa rideto. Ba Ren palpebrumante demandas :

— Ĉu bona akvo?

— Sufiĉe bone!

— Mi ja diris, ke ĝi estas bona akvo. Nun, mia vico...

Ba Ren tuj kuŝas sur la ventro, kiel Ziep. Li prenas du glutojn, poste leviĝas kaj mansigne diras al sia apuda kamarado:

— Trinku!

Tiu lasta faras la samajn movojn, kiel Ba Ren. Kaj tiel, laŭvice, trinkas ĉiuj niaj kamaradoj. Baldaŭ elĉerpiĝas la akvujo. Fine, kiam venas la vico al Hai Thep, restas nur maldika akvotavolo. Tial, li devas elŝovi sian langon por ĝin leki.

Kiam la akvujo estas komplete sekigita, Hai Thep leviĝas. Subite eĥe aŭdiĝas el la kaverna profundaĵo la tusado de Ba Fi.

Ba Ren eklevas sian mentonon en direkto al tiu tusado:

— Mi jam diras, ke oni nur vante disperdas sian rizon kaj sian akvon, gardante tiun kanajlon. Sufiĉe! Konfidu lin al mi, por ke ĉi nokte mi forsendu lin al liaj praavoj!

— Neeble! Por ekzekuti lin, ni devas atendi la instrukciojn de niaj superuloj. Cetere, plej bone estus, se ĉeestus en plena kompleteco ĉiuj niaj samvilaĝanoj. Vere, vi estas facile kolerema! Antaŭ ol ekzekuti iun kanajlon, — eĉ se tiu ĉi estas kruelegulo, — necese estas lasi la popolamasojn starigi al li klarajn demandojn pri liaj krimoj. Nun, mi trovas, ke estas neoportune

gardi lin en tiu kavaĵo: li aŭskultas ĉiujn niajn diskutojn kaj interkonsiliĝojn. Do, ĉi nokte, ni alilokigos lin kaj lian edzinon al pli profunda loko...

— Jes, ni devas alilokigi ilin tuj ĉi nokte!

Alveninte al la kaverna elirejo, Hai Thep interkonsiliĝas kun Ngan:

— Baldaŭ, ĉe la vesperiĝo, ni sendos eksteren iun grupon por skoltado, samtempe ni elturniĝos por ŝirkolekti kelkajn kokosojn. Ili donos al ni lakton por kvietigi nian soifon kaj karnon por manĝi.

Ngan proponas, ke li iros kune kun Toi kaj Trong.

— Ĉu ambaŭ knaboj estas lertaj grimpantoj? — Demandas Hai Thep.

— Sufiĉe lertaj!

— Bone! Sed vi devas esti vigle atentaj, palpesplori la lokon ĉe ĉiu paŝo. Nun, estas ankoraŭ lunhela nokto. Estu do zorgemaj!

— Mi restos vigle atenta, ne maltrankviliĝu! — Diras Ngan.

Poste, li sin turnas al Ba Ren, ridante:

— Nu, aresti tiun kanajlon Ba Fi estas al mi la merito! Do, estas mi, kiu ekzekutos lin kaj ne vi!

Ba Ren lipgrimacas:

— Ĉu vi kapablos fortrančî al li la kapon? Via mano tremos kaj ne estos same firma, kiel la mia!

— Ne, mia mano neniam tremos, fortrančante tiun fian kapon!

Ĉe tiuj vortoj, Ngan iras urĝi ambaŭ kamaradojn Toi kaj Trong.

La tri homoj demetas sian jakon kaj volvas ĝin ĉirkaŭ sia kapo. Ĉiu sin vestas nur per duonpantalono kaj portas ĉe la koksoj kelkajn kartoĉbendojn kaj grenadojn MK3. Kun sia « Thompson » en la manoj, ili kaŭre sidiĝas en iu rokfendego por atendi la vesperiĝon.

Ngan rigardas al la serpentumanta vojstreko, kiu iom post iom stompiĝas en la vesperkrepuska ombro, ekster la kaverna faŭko. Jam de longe estingiĝas la suno... Tie malproksime, la kokosĝardeno komencas susuri. La jam malhele verdiĝintaj kokospalmoj flirtas en la vento, dum ĉiam forte kaj brue muĝas la marondoj. La vasta kokosĝardeno kvazaŭ dronas en nebulo. Baldaŭ, ĝi komplete forviŝiĝas el la vido kun la serpentumanta vojstreko. Regas malluma nokto. La malamiko komencas pafi. Nun, Ngan pli klare aŭdas la bruon de l' marondoj. Ŝajnas al li, ke la nokta vualo havas tiun magian povon sufoki ĉiujn bruojn por lasi la maron, — nur la maron, — laŭtigi sian muĝadon. Milmiloj da ondegoj venantaj de la marmezo frapiĝas kontraŭ la bordo kun tiu seninterrompa muĝado, kiu restos eterne la plej granda kaj la plej persista voĉo de la terglobo.

Dum la pasintaj noktoj, Ngan ĉiam aŭdis tiun voĉon de la maro kaj li trovis, ke ĝi estis pli varma, ol iam. Li havis la impreson, kvazaŭ la rokmuro estis tegita per leda lameno de tamburo kaj la seninterrompa ondobruo, kiu frapiĝas kontraŭ ĝi similas al rulado de tamburo kaj ne al muĝado kaj ĝemo.

Hodiaŭ estas la dekoka de la dekdua lunmonato. Tial, la nokto ne estas tre malluma. Post momenta noktiĝo, iom heliĝas la pejzaĝo antaŭ la kaverna faŭko.

Ngan denove vidas malklare ekaperi la vojstrekon kaj la kokospalmojn, kiuj trembrile balanciĝas en la aero.

Kun fusilo en la mano, li ekleviĝas kaj mallaŭte diras tra sia spirblovo :

— Ni povas ekiri !

Toi kaj Trong ankaŭ ekstaras. La tri homoj haltas kelkajn sekundojn ĉe la kaverna faŭko, antaŭ ol rapidpaŝe iras eksteren. Tenante sian pafilon ĉe la akselo, Ngan klinas sian dorson kaj etendaŝ antaŭ si sian maldekstran brakon. Li sekvas ne la vojstrekon, sed alian vojeton, proksime de tie. La tri homoj rampas kaj baldaŭ atingas la randon de la kokosĝardeno tute glate.

Apenaŭ penetrinte ĉirkaŭ dek metrojn en la ĝardenon, subite ili aŭdas kelkajn pafojn de « Garrand » tute proksime. La malamiko komencas pafi por signali sian noktogardon. Poste, leviĝas ie la konfuzaj voĉoj de la soldatoj, kiuj interbabiladas. Ngan flustras al ambaŭ siaj kunirantoj en la orelon :

— Ne maltrankviliĝu ! Ili sencele pafas nur por sin kuraĝigi.

— Do, ni ŝirkolektu kokosojn ! — Diras Toi. — Metu ilin ĉi tie kaj baldaŭ mi transportos ilin al la kaverno !

Toi kaj Trong elektas du malaltajn kokosujojn, ĉe kies supro abundas nuksoj. Ambaŭ pasigas sian fusilon al Ngan kaj sin pretigas por grimpi sur la arbojn, kiam tiu lasta mallaŭte rekomendas :

— Vi ĵetu la kokosojn, nur kiam ili pafas. Tiel, ili ne povas aŭdi...

Toi faras aproban kapmovon.

Ambaŭ estas lertaj en grimpado sur kokosujo; tial, ili ne bezonas piedmaŝojn *. En palpebruma daŭro, ili jam malaperas ĉe la alta arbosupro. Lertmove, ili tordŝiras la pedunklojn kaj kunligas popare la nuksojn, kiujn ili portas ĉe sia kolo. Iun momenton poste, aŭdante du frapojn sur la arbotrunko, — tio estas ja signalo de Ngan, — Toi kaj Trong tuj malsupren glitas. Ngan redonas al ili la pafilojn kaj, forlasinte tie la kokosojn, la tri homoj blindpalpe penetras iom pli profunden en la ĝardenon.

Apenaŭ farinte kelkajn paŝojn, Ngan subite levas sian manon malantaŭen por bari la vojon al Toi kaj Trong. Li jam vidas antaŭ si tri, kvar fajroruĝajn punktojn same grandajn, kiel ekstremo de bambuvergeto. Ja, grupo da soldatoj sidas tie, fumante sian cigaredon. Eliĝas forta odoro de la Thu-tabako. La tri kamaradoj kuntiriĝante sin kaŝas malantaŭ la piedo de iu kokosujo. Ngan direktas la kanonfaŭkon de sia fusilo al la kanajloj. Tiuj lastaj troviĝas tiel proksime, ke ĉiufoje kiam ili fumtiras el sia cigaredo, ĝia ekstremaĵo ruĝe brilas, klare vidigante iliajn nazlobojn kaj ilian oleecan vizaĝhaŭton. Tiuj vizaĝoj jen aperas, jen malaperas, kvazaŭ fantomoj. Subite, iu el ili diras:

— Kia teruro! Lastatempe, ili pafis tiel trafe, ke nia leŭtenanto renversfalis ĝuste ĉe la kaverna faŭko! Kaj ni jam vane ĵetis proksimume mil grenadojn MK3 en tiun kavernon!

Alia aldonas:

— La sorto nepre ne ridos al ni, se ni longerestos ĉi tie! Ili fuĝas en tiun truon kaj sin montras ĉiam

---

* Ŝnuro ligita al ambaŭ piedoj por faciligi la grimpadon.

firmdecidaj en ĝismorta batalo kontraŭ ni. Forpasis nur kvar tagoj kaj ili jam forrabis de ni preskaŭ cent homojn!

— Niaflanke, ni kaptis nur unu virinon! La majoro jam uzis ĉiujn dolĉajn parolojn por persvadi ŝin, sed tute vane! Tiu virino tre agrable mienas, sed ŝi estas tre obstina. Oni pasigis al ŝi la mikrofonon, por ke ŝi voku siajn kamaradojn al kapitulaco; sed ŝi jam konsilis al ili ne formeti la armilojn. Laŭ ordono de la majoro, oni pendigis ŝin al kokosujo, poste venigis ŝian maljunan patrinon. Ekvidante sian panjon, ŝi larmis. La majoro kredis, ke ŝi jam cedis; li tuj ordonis, ke oni malsuprentiru ŝin de la arbotrunko kaj petis ŝin denove voki la bandaĉon en la kaverno al kapitulaco. Sed, tute neatendite, ŝi kuntiris sian kruron kaj per forta piedpuŝo forĵetis la mikrofonon...

Post momenta paŭzo, la soldato daŭrigas:

— Mi devas konfesi al vi, ke kiam nia leŭtenanto Xam elingigis sian trančilegon por senkapigi la virinon, mi tre hontis...

— Sed ŝi ne mortis; male, nia leŭtenanto estis tiel forte skuita, ke lia malnova vundo malfermiĝis kaj sango terure elŝprucis el ĝi!

Unu el la soldatoj klakas per la lango:

— Ĉu nun jam mortis...?

— Kiu?

— Tiu virino!

— Ŝi jam mortis! Laŭ la famdiroj, ŝi mortis, ĝuste kiam estingiĝis la suno.

Ngan subfleksiĝas sur la herbejo, kun kvazaŭ ŝtopita gorĝo. La soldato daŭrigas:

— Nia leŭtenanto donis entute kvar trancĥilbatojn; sed nur unu el ili trafis ŝian kolon. Tiam ŝi ankoraŭ ne mortis kaj la majoro ordonis, ke oni pendigis ŝin sur kokosujo, por ke la Vjetkongoj en la kaverno senkuragiĝu, vidante ŝin barakti kaj plorĝemi. Sed, ĝis la vespero, ŝi tute ne plorĝemis.

— Ne, dum sia agonio, ŝi jam kriis. Mi propraokule vidis ŝin barakti sub la ŝnurligilo, poste ŝi laŭtvoĉe kriis al la homamaso, kiu tiam ĵus estis invadinta la lokon. « Samvilaĝanoj, venĝu min ! » Ŝi tiel kriis, poste ŝi vokis Onklon Ho kaj faris ankoraŭ kelkajn barakta-dojn, antaŭ ol morti !

Ĉe tiuj vortoj, la soldato estas subite kaptita de emocio kaj li haktone daŭrigas :

— Mi povis... aŭdi nur tion..., poste neatendite, la homamaso kriegis kaj impetis kontraŭ ni. Estis nur virinoj kun maljunuloj kaj infanoj. Ili insultis, ŝirvundis, frapis nin, ne timante niajn pafilojn. Mi vidis iun mezaĝan virinon sin ĵeti kun trancĥilego sur la leŭtenanton Xam. Unu el la soldatoj, kiuj prove baris al ŝi la vojon ricevis de ŝi unu trancĥilbaton, kiu ŝiris lian jakon ĉe la ŝultro. Tute koleraj, ili sin pretigis por pafmortigi ŝin, kiam nia leŭtenanto kriis : « Ne pafu ! Ne pafu ! » Oni sciigis baldaŭ al mi, ke tiu maljunulino estas lia patrino. Miaflanke, mi estis ne malpli malfeliĉa. Mi falis dorsen antaŭ la homfluo; poste, unu grasdika virinaĉo kuris, surtretante mian korpon,—kio preskaŭ perdigis al mi la spiradon. Kiam mi sukcesis leviĝi, oni jam detrancĥis la ŝnurligilon kaj metis la kadavron de la povra virino sur la teron. Baldaŭ oni forkuris, portante sur la dorso la maljunan

patrinon kaj la kadavron de la viktimo. La majoro ordonis al ni repreni tiun lastan. « Mi tuj pafos al vi ĉiuj ! — Li minace kriis. — Vi volas protekti kaj enterigi la kadavron de tiu Vjetkong-virinaĉo, ĉu ne ? » La homamaso tuj respondis : « Ni enterigas nian filinon, kuzinon, nevinon... Kaj ni scias nenion pri Vjetkongo ». Tion dirante, oni ĉiam forportis la kadavron. La majoro devis cedi... Fakte, li ne povis ne cedi antaŭ tiu homamaso, kiu firmpaŝe kaj senhalte antaŭenmarŝis, preterate ntante ĉiujn armilojn !... Tiam, se ni estus pafintaj, certe pluraj jam estus falintaj... ; sed, ni ne pafis...

La soldato ĉesas paroli. Ĉiuj denove ekbruligas sian cigaredon. Baldaŭ, kelkaj leviĝas.

— Ankoraŭ ne venas al ni la vico gardodeĵori, — diras unu el ili, — ni iru promeni en la vilaĝeto. Tie loĝas maljuna blindulo, kiu tre lerte ludas unukordan muzikilon...

La soldatoj iras en direkto al Ngan. Tiu lasta retenas sian spiradon kaj kuntiriĝe sin kaŝas malantaŭ la piedo de kokosujo. Preterpasante, ili vomas plenbuŝon da tabaka fumo, kiu penetras ĝis lia nazo.

Kiam ili malaperas, en la sama loko restas ankoraŭ kelkaj soldatoj. Unu el ili faras longan ĝemspiron :

— Hm ! Ĉi jare, mi ne scias, kie mi pasigos la Tetfeston !

— Al mi tedas iri ankoraŭ al Kamaŭ !

— Ni ne bezonas iri tiel malproksimen al Kamaŭ ! Se ni ankoraŭ longerestas ĉi tie, tre povas esti, ke dum tiu Tetfesto, ni ne havus la ŝancon reveni hejmen kun niaj edzino kaj infanoj !

— Do, zorge evitu, ke ni ne plu eniru en tiun «funebran» kavernon, nun kiam plu neniu brankardo por ni restas; ĉu vi komprenas ?

— Kiel fari por tion eviti? Ĉu vi povas malobei, se oni devigas vin eniri? ...Ĉielo! Hieraŭ, preterpasante la lernejon, mi jam aŭdis terurajn kriojn de la tie kuŝantaj vunditoj.

— Miaopinie, nur obeante al la konsiloj de la suboficiro Ko, oni havus la ŝancon savi sin de morto!

— Ĉin Ko, ĉu ne? Kion li diris?...

Subite, ambaŭ soldatoj mallaŭtigas sian voĉon, kiu iĝas baldaŭ nur flustro. Ngan ne povas plu aŭdi, kion ili rakontas inter si. Li senmove kuŝas iun momenton poste, per unu piedmovo, faras signon al Toi kaj Trong: la tri homoj blindpalpe revenas al la loko, kie estas kolektitaj la kokosoj. En la mallumo, ili senŝeligas la nuksojn kaj provpenas popare ligi ilin. Ĉiu portas sur sia kolo unu paron, poste sekvante la malnovan vojstrekon revenas al la kaverno. Dum la tuta vojiro, Ngan suferplene pensas pri Su: «Tiel mortis franjo Su! Vere, ŝi jam mortis!» Bedaŭro kaj indigno plenigas lian koron. Dume, ambaŭ kokosoj, kiuj pendas ĉe lia kolo ŝajne pli kaj pli pezas sur lin...

2

En la ŝtonkavaĵo, kie estas katenitaj ambaŭ geedzoj Ba Fi, neniam vidiĝas lumo, eĉ tiu rara apokalipsa lumo de kaverno. En tiu kavaĵo, tage same kiel nokte,

regas nur mallumo, — tiu mallumo, kiu kvazaŭ pliden-siĝas en malvasta loko. Po unu fojo ĉiutage, aŭ Kujen, aŭ Nam Njo alportas al ambaŭ gespionoj plenmanojn da rostita rizo. Sian akvoporcion ili ricevas ankaŭ regule.

— Ĉi tie, ne abundas akvo. — Diras al ili Kujen.

Kiam ŝi foriras, Ba Fi krias en sia gorĝo :

— Ne abundas akvo ? Ŝi tute simple ne volas doni trinki al ni.

La edzino restas senvorte, timoplena kaj tute malĝoja. Ba Fi daŭrigas, kun rideto :

— Jam de kelkaj tagoj, ili estas streĉe ĉirkaŭsieĝitaj. Fi ! vana kontraŭstaro ! Frue malfrue, niaj sinjoroj perforte invados la kavernon !

Kaj li ankoraŭ karesvoĉe konsolas sian edzinon :

— Mi jam diras al vi, ke estas tute senutile plori kaj maltrankviliĝi ; ni me mortas, ne timu ! Se niaj « sinjoroj » sukcesus penetri en la kavernon, ni nepre vivus.

Poste, li grumblas :

— Fi al ili ! Tiam, ili konos mian manon, mi senka pigos ilin ĉiujn senescepte. Unue la kanajlon Hai Thep, — li estas ĉefgvidanto, — poste tiujn, kiuj arestis nin pasintan nokton, poste Ba Ren, ĉiujn senescepte.

— Dio mia, silentu ! Mi tre timas, mi timas, ke antaŭ ol tiuj « sinjor oj » sukcesus penetri en tiun lokon, ni jam forlasus tiun ĉi mondon. Nepre, antaŭ ĉio, oni mortigos nin.

Aŭdinte tiujn vortojn de sia edzino, Ba Fi silentas. Ili denove vekas en lia koro tiun timon, kiu jam de kelkaj tagoj turmentis lin. « Tre povas esti, ke tio okazos. Ili povas ekzekuti nin antaŭe ». Ĉiufoje

kiam li pensas pri tio, ambaŭ liaj streĉe katenitaj kubutoj subite tremetas. Sed, kvankam kaptita de timo, li tamen ĉiam esperas, ke baldaŭ li estos liberigita. Kaj li alkroĉiĝas al tiu espero, kun siaj kutimaj fiintencoj, kun tiuj konstante kovataj malamo kaj venĝemo. En la kapo de tiu maljuna kalva denuncistaĉo regas nun la animstato de homo, kiu senpacience atendadas ion. Foje, la espero instigas lin salti antaŭen, foje la malespero humile fleksas liajn krurojn. Li tute similas al vulpo enfalinta en reton. Sed, pli kruela, ol vulpo, li volas ne nur eltiri sin el la reto, sed ankaŭ ŝirvundi homojn post sia liberiĝo. Lia espero kaj lia malespero pli klarvidebliĝas precipe, kiam la malamiko direktas siajn atakojn kontraŭ la kaverno. Kiam aŭdiĝas furiozaj pafoj aŭ eksplodas grenadoj, tiam li saltleviĝas, ĝojplena. El liaj manoj kaj piedoj, ŝajne ekaperas pli longaj kaj pli akraj ungegoj. En la kaverna mallumo, li senĉese puŝas per sia piedo la krurojn de sia edzino, pensante pri la tuj venonta momento de sia liberiĝo. Sed, kiam li aŭdas unuopajn firmajn pafojn, li estas tuj kaptita de dubo. Poste, ĉiuj malamikaj atakoj estas repuŝitaj kaj denove en la kaverno regas tiu kutima kvieteco. Post senpacienca atendado, neniu venas por forigi liajn katenojn; tiam, li ree elreviĝas kaj ree falsidiĝas apogante sian dorson sur la rokmuron por anheli. Ĉiufoje kiam niaj kamaradoj venkoplene frakasas ĉiujn malamikajn sturmojn, tuj forvaporiĝas ĉiuj kruelaj projektoj, kovataj en lia kapo. Kaj lin trafas la sama tragedio: ĉiam tiuj katenoj, kiuj streĉe ligas liajn kubutojn, ĉiam tiu profunda ŝtonkavaĵo, ombroplena kaj, kie vidiĝas neniu lumradio.

Sed, malgraŭ tio, li ĉiam atendadas. Per siaj sentemaj oreloj, li kaŝe aŭdas ĉiun parolon, ĉiun bruon, kiu venas de ekstere. Tial, kvankam enfermita en tiu ŝtonkavaĵo, ĉe la plej profunda loko de la kaverno, li tamen scias, parte, kio okazis dum la kvar pasintaj tagoj de akra batalo. Li havas jam la kutimon saltleviĝi ĉe la unuaj seninterrompaj pafbruoj de la malamiko. Tiun matenon, kiam eksplodis ĉirkaŭ mil grenadoj en la kaverno, li konsideris, kiel la plej feliĉan en sia vivo. Li tre ĝojis tiun nokton, kiam oni detranĉis la brakon al la knabo Be kaj tiun tagon, kiam Kujen falis svene pro la eksplodo de la grenadoj MK3 kaj, kiam Nam Njo estis trafita de veneno. Li sciis ankaŭ, ke Su ne estis reveninta al la kaverno. Poste, li ankaŭ tre ĝojis, ke la malamiko estis instalinta sian laŭtparolilon kaj devigis franjon Su voki siajn kamaradojn al kapitulaco; sed li tute miris kaj kaŝe koleris, kiam li sciis, ke Su jam diris kontraŭan opinion. Sen trinkakvo, lia gorĝo estas seka kaj li ankaŭ suferas pro soifo, kiel aliuloj. Sed, dum ĉiuj suferas pro manko de akvo, li sentas ĉiam en sia koro tiun kruelan esperon: se mankas akvo, la homoj en tiu kaverno ne povas longatempe rezisti. Aparte, kiam li estas informita, ke Su povos morti, li tre maltrankviliĝas, ne pri ŝia sorto, sed pri sia propra: «Certe, oni mortigos min por venĝi ŝian morton». Iafoje, li ne volas, ke la batalo estu tro akra, ĉar laŭ liaj konjektoj, se la kaverno estus tro severe atakita, oni povus antaŭe ekzekuti lin.

Tiel, tagnokte, li konstante timzorgas pri la sorto de ambaŭ geedzoj, precipe pri sia propra sorto. Ĉiuj liaj pensoj estas nigraj, kiel la lin ĉirkaŭanta mallumo.

Ĉi nokte, dum lia edzino ĉiam ĝemspiras, Ba Fi subite ektremas vidante antaŭ si ion luman. Tio estas la lumo de vakskandelo. Tenante ĉe la mano tiun brulantan vakskandelon, iu homo sin impete direktas al li. Jam de kelkaj tagoj, antaŭ liaj okuloj regas nur mallumo. Tial, blindigita per tiu lumo, li ankoraŭ ne havas la tempon rekoni tiun entrudulon, kiam aŭdiĝas voĉo :

— Leviĝu !

Tiu homo estas Hai Thep.

Ba Fi haste ekstaras. Lia edzino, tute embarasita, ankaŭ leviĝas. Sed Hai Thep jam levas sian fingron kaj ordonas al ŝi resti surloke. Li rondigas siajn okulojn, rigardante al Ba Fi :

— Aŭskultu min ! Ĉu vi jam rekonas vian kulpon ? Do, ĉu vi meritas morton ?

La denuncistaĉo mallevas sian kalvan kapon, senvorte.

— Parolu ! — Laŭtvoĉe urĝas Hai Thep.

Nur tiam, li respondas per mallonga vorto :

— Meritite !

Hai Thep kapbalancas :

— Jes, vi meritas morton !

Post momenta paŭzo, li rigardas la kanajlon kaj daŭrigas :

— Sufiĉe, ni iru !

Ba Fi ektremas, aŭdante tiujn vortojn. Ambaŭ liaj genuoj subfleksiĝas. Sed, Ba Ren jam glitas malantaŭ li kaj lertmove ŝovas sian fortikan brakon sub lian akselon por lin starigi.

Subite, Ba Ren ekrimarkas, kvazaŭ Ba Fi ne havas plu piedojn. Tiuj ĉi, nun molaj, kiel vermiĉelo, ĉiam pendante balanciĝas.

Hai Thep alte levas la vakskandelon kaj per ĝi lumigas la vojon, por ke Ba Ren tiru la kanajlon el la kavaĵo. La edzino postiras ilin, plorsingultante.

— Vere sentaŭgulo li estas! — Grumblas Ba Ren. — Li jam trofrue malŝveliĝas.

Oni venigas lin ĝis la fundo de la kaverno. Tiu loko troviĝas proksime de terkolora vazego, entenanta la ostorestaĵojn de sep kamaradoj sovaĝe murditaj de la malamiko. Su kaj ŝia fratino jam sekrete kolektis ilin en la arbara marĉejo, lastan jaron.

La malamiko frakasis la kapon de niaj kamaradoj per siaj remiloj, poste ĵetis iliajn kadavrojn en la marĉejon. Su kaj Kujen vane serĉis ilin dum tri sinsekvaj tagoj. Tagmeze de la kvara tago, ambaŭ prove penetris en la tram-aı baron, kiam subite aŭdiĝis ie longaj hurloj de sovaĝaj hundoj. Ili blindpalpe sin direktis al tiu loko kaj vidis kvar, kvin hundojn kuri de la marĉejo al proksima arbustotufo kun ostoj kaj pendantaj karnopecoj inter siaj dentoj. Su tuj prenis unu arbobranĉon, urĝe postkuris kaj frapis la bestojn por elŝiri el ilia faŭko ĉiun oston. Siaflanke, Kujen kuspe faldis sian pantalonon kaj vadis en la marĉejo por palpe serĉadi tiujn restaĵojn. Ambaŭ fratinoj kolektis ĉiujn ostojn, kiujn ili envolvis en nilona tuko, antaŭ ol kaŝe transporti ilin al la kaverno. Nun, estas neeble rekoni, al kiu apartenas tiu aŭ alia osto. Nur post la «komuna popollevigo», tiuj karaj ostorestaĵoj estas konservitaj en argila vazego, kaŝita ĉi tie.

Ba Ren trenas la kanajlon Ba Fi preter la vazego kaj sidigas lin, kun dorso apogita sur la rokmuro. La kapo de tiu lasta ĉiam flanken kliniĝas. Ba Ren kaj Hai Thep staras ankaŭ tie, atendante longan momenton, antaŭ ol li rekonsciiĝas.

Ili baldaŭ kondukas lin ĝis la fundo de la kaverno. Reveninte eksteren, Hai Thep diras al Ba Ren:

— Mi rimarkas, ke ĉiuj kruelegulo j similas unu al la alia. Ili havas la kuraĝon por mortigi homon, sed ne por akcepti la morton. Lastmomente, li kredis, ke ni kondukis lin al morto; tial li jam perdis konscion.

— Jes, al tia homo la kuraĝo estas tute fremda. Li havas nur la talenton spioni; reale, li estas tre timema.

Ambaŭ eliras el la kaverna faŭko, ĝuste kiam Ngan estas ĵus reveninta. Li ĵetas teren la paron da kokosoj, meze de l'varmaj aplaŭdoj de ĉiuj kamaradoj. Toi kaj Trong ankaŭ reatingas lin demetante de sia kolo la pezajn nuksojn. Kujen blindpalpe venas proksime al Ngan. Nur post longa silento, li malĝoje diras:

— Franjo Ba jam foroferis sian vivon!

Ĉiuj samfoje haltas meze dum siaj movoj. Kelkaj manoj, kiuj ankoraŭ klakas en la mallumo iom post iom malleviĝas. Subite, en la kaverna enirejo regas kompleta silento. Hai Thep venas tute proksime de Ngan kaj, per suferplena voĉo, mallaŭte demandas lin:

— Vi sukcesis atingi la lokon, kie estis mortigita Su, ĉu ne?

— Ne, ŝi ne plu restis tie. Niaj samvilaĝanoj jam transportis ŝin al la vilaĝeto. Mi sciis tion, kaŝe aŭskultante la babiladon de la soldatoj.

...Ngan eksidas sur la teron mem, meze de la kaverna enirejo kaj rakontas al siaj kamaradoj ĉion, kion li aŭdis el la interparoloj de tiu grupo da soldatoj. Kiam li ripetas la lastajn vortojn, per kiuj dum sia agonio, Su vokis la vilaĝanojn kaj Onklon Ho, li estas kvazaŭ gorĝpremita kaj ne povas plu paroli. Kujen ploregas, apogante sian kapon sur la nudan kaj ŝvitoplenan ŝultron de Ngan. Neniu povas sin deteni de larmoj. Sed, ĉiuj provpenas senbrue plori ; kvankam antaŭe, ili estis certaj pri ŝia neevitebla morto, ili tamen ne sciis, kiam kaj kiel ŝi estis mortinta. Nur nun, post la rakonto de Ngan, ili sentas veran doloregon. Kaj samfoje, ĉiuj ekkonscias, ke ilia amo al Su kaj iliaj propraj konoj pri ŝi estas tute ne sufiĉaj. Ŝajnas, ke tiu virino okupas altan lokon, dum ili staras malalte ; tial, ili ankoraŭ ne povas etendante la brakon atingi ŝin. Ŝia senpeka fideleco kaj ŝia milda beleco ŝajne, nur nun, aperas pli kompletaj, pli proksimaj kaj pli familiaraj. Jen ŝi silente ridetas ! Jen sur ŝia ovala kaj malgrasa vizaĝo malfermiĝas paro da naive belaj okuloj ! Jen brilas tiu abunda kaphararo, pri kiu fieras la tuta loĝantaro de Hon Dat ! De nun, tiuj vizaĝtrajtoj neniam povos visiĝi el la memoro de ŝiaj gekamaradoj kaj ŝiaj lastaj paroloj eterne sonos en ĉies koro.

Tiel, ankoraŭfoje en sia vivo, Hai Thep sentas, kvazaŭ lia koro estas trapikita de nevideblaj ungegoj. Li malrapide leviĝas kaj tremvoĉe diras :

— Ĉu vi vidas, kamaradoj ? Vivante kun siaj gekamaradoj, Su zorgis pri ĉio, de ĉiu manĝoporcio ĝis ĉiu trinkebla akvoguto, ŝi bonkore cedis ĉion bonan al ili. Sed, fronte al la malamiko, Su sin montris tute nefleksebla ; vere, ŝi ne lasis defali eĉ unu colon de

siaj pretendoj. Ŝi rekomendis al ni ne malteni la pafilojn; ni do retenu ŝiajn parolojn. Ŝi petis nin venĝi ŝian morton; tion ni devas ankaŭ enskribi en nian memoron.

Sub la flagranta lumo de vakskandelo, ĉiuj kvazaŭ interkonsente ekstaras kaj restas senmove, iom klinante antaŭen sian kapon. Ili imagas al si franjon Su, pensas pri ŝi kun sia tuta amo. En tiuj minutoj, ili pli firme tenas sian pafilon, kun tiu pli firma decido batali ĝis la lasta sangoguto.

... De nun, neniu plu ploras. Ili forviŝas la lastajn larmogutojn, kiuj ankoraŭ pendas ĉe iliaj palpebroj. Ili senpacience atendas, ke rapide forpasu la nokto, por ke venontan matenon, kiam la malamiko denove atakos la kavernon, ili havu la okazon tuj venĝi sian kamaradinon Su.

— Ja, pura oro ne timas fajran elprovon! — Diras Ba Ren. — Su estas pura oro, kamaradoj. Ŝi tute ne similas al tiu kanajlo Ba Fi, kiu nur aŭdante pri mort-puno jam subfleksiĝis.

— Ĉu li mortis? — Demandas Ngan.

— Ne, li nur svenis.

Hai Thep sin turnas al Ngan:

— Kiom da kokosoj vi ŝirkolektis?

— Ses.

— Ĉu la laboro estis facila?

— Facila, sed, troviĝante tute proksime de la mal-amika ĉirkaŭsiego, ni devis atendi favoran momenton, kiam ili pafis por ĵeti teren la nuksojn. Ni povis aŭskulti senmanke ĉiujn parolojn de la gardostarantoj,

kiuj babiladis. Ili fumis cigaredojn, kies fajroruĝaj ekstremaĵoj klare lumigis ilian vizaĝon. Ni rimarkis, ke ili tre maltrankvile mienis. Ĉiuj timis eniri en la kavernon. Ili nomis ĝin « funebra » kaverno...

— Ili pravas donante tiun nomon al la kaverno, — diras Hai Thep, — sed ĝi estas « funebra » nur por ili, kaj antaŭ niaj okuloj, ĝi estas ĉiam la kaverno Hon Dat.

Onklo Tu Nghiep kapbalancas :

— Jes, kiel agrable sonas la vortoj Hon Dat ! Sed, kiu volas perforte preni ĝin, tiu estas punota, nepre punota.

— Nu, en tiu batalo partoprenas ankaŭ la Jankioj. Jam mortfalis unu el ili.

— Ĉu vere ?

— Laŭ la rakonto de la soldatoj, hieraŭ, ili jam forsendis per helikoptero tiun Jankion kaj kelkajn vunditajn pupajn oficirojn. La soldatoj tre koleris, ĉar la usonaj pilotoj rifuzis transporti la gravajn vunditojn.

— Hundaĉoj !

— Do, tio estas por la soldatoj instrua leciono. Ĉu oni feliĉe vivas alkroĉiĝante al la paŝoj de la Jankioj ? Nur hundoj, espereble, povus gajni ilian simpation. Koncerne tiujn dungosoldatojn, kiuj ricevas pomonate okcent ĝis mil ducent piastrojn, la Jankioj ne estas tiel stultaj por savi ilin, ĉiufoje kiam ili perdas unu kruron aŭ havas tratranĉitan ventron. Eĉ savitaj, ili fariĝos kriplaj kaj ne povos plu batali.

Ngan aldonas :

— En tia situacio, miaopinie, jam senkuraĝiĝas al soldatoj. Do, ni povas batali samtempe voki ilin al dizerto. Tio nepre subfosos ilian batalspiriton.

— Tion, espereble, — diras Ba Ren, — povos fari nur sinjoro Tam Ĉan kaj niaj samvilaĝanoj, tie ekstere. Niaflanke, ni paffaligos ĉiun ajn, kiu aŭdacos sin ĵeti en nian kavernon kaj bezonos krie voki neniun.

— Ne! Tion ni ankaŭ povas fari.—Rebate diras onklo Tu Nghiep. — Sufiĉas, ke ni havigas al ni kelkajn voĉtubojn... Unuflanke, ni batalas kaj aliflanke, ni vokas. Sekve de tio, la malamiko pli rapide diseriĝas.

— Vi pravas! Sed, kie ni povas trovi voĉtubojn? — Demandas Ngan.

Post momenta pripenso, onklo Tu Nghiep respondas:

— Se ni ne havas ferladajn voĉtubojn, ni povas fari jenon: ... Mi jam vidas plurajn petiolojn de arekujo sur la fermoplato de la argila vazego, entenanta la ostorestaĵojn de niaj martiroj. Ni povas provizore fari kelkajn voĉtubojn el tiuj petioloj. Mi estas certa, ke niaj forpasintaj kamaradoj ne malĝojos, se ni tion faras.

— Pro kio ili malĝojos? — Diras Ba Ren. — Ĉu ni portos tiujn petiolojn sur la kapo por iri peti kapitulacon al la malamiko? Male... Sed, ĉu la mortintoj ankoraŭ scias malĝoji, onklo mia?

—Ŝŝ! ne diru tion, Ba Ren! — La voĉo de Tu Nghiep iĝas vere serioza. — Niaj forpasintaj kamaradoj devas pace ripozi tie... Tial, mi timas, ke tuŝante tiujn petiolojn, ni povus ofendi ilian animon...

Ba Ren silentas iun momenton, poste mallaŭte kaj kun iom treniĝanta voĉo diras:

— Mi rimarkas, ke de kelka tempo, vi jam revenas al via superstiĉo!

— Tio ne estas superstiĉo, mi... mi... — Balbute rebatas onklo Tu Nghiep.

Hai Thep ekridas, skuante sian manon:

— Sufiĉe!... Tio, kion diris onklo Tu ne tute estas superstiĉo. Sed, se ni trovas, ke tiuj petioloj de arekujo povas esti uzataj por fari voĉtubojn, ni estas tute liberaj fari tion, kompreneble, sendomaĝe. La animo de niaj forpasintaj kamaradoj ĝojos, anstataŭ malĝoji. Vi nur prenu tiujn petiolojn por fari voĉtubojn, onklo Tu.

— Bone, mi faros... Sed, mi ne estas...

Onklo Tu Nghiep konsentas fari voĉtubojn el tiuj petioloj de arekujo, sed li ankoraŭ iom koleretas pro tiu rimarko de Ba Ren. Li tute ne konsentas, ke oni prenas lin por superstiĉulo, kvankam jam de longe li ĉiam kredas je Dio kaj Buddo. Dum iu festeno, li iafoje kolere diris: «Nu, supoze, ke sur tiu terglobo, trimil milionoj da homoj ne kredus je Dio kaj Buddo, restas ĉiam unu homo, kiu gardas sendifekta tiun kredon». Poste, li fingremontras sian bruston kaj diras skandante ĉiun vorton: «Tiu homo estas Tu Nghiep!» Nun, Tu Nghiep ne plu abstinas, ĉar, — kiel li diris, — «mi praktikas mian religion laŭ mia koro kaj ne laŭ mia buŝo. La abstinenco malbone efikas sur la sanon: oni ne havas la forton por plugi sian kampon kaj la vizaĝo estas ĉiam pale flava kun ridinda mieno».

Strange! Tiu homo, kiu kredas je Dio kaj Buddo havas tamen la ardan deziron esti membro de la Partio. Pli ol unufoje, li maltrankviliĝis kaj demandis kamaradon Hai Thep, ĉu homo, kiel li povos fariĝi partiano.

« Evidente jes, — respondis tiu lasta, — sed por esti partiano, oni devas esti praktika. La partiano respektas la kredon de ĉiuj religiuloj sed ne kredas je Jesuo, Buddo, Dio... Tion mi malkaŝe diras al vi. Ni firme kredas, ke ekzistas ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. Ni firme kredas, ke se ni unuiĝas por lukti kontraŭ la kliko Usono-Dziem, ni estos feliĉaj, la kamparanoj havos teron por rizkulturo kaj ĉia ajn religio libere praktikiĝos ».

Lukti kontraŭ la kliko Usono-Dziem estas, por onklo Tu Nghiep, afero tute ne eksterordinara. Sed, antaŭ tiu modelo de partiano, prezentita de Hai Thep, li trovas multajn malfacilaĵojn por fari sin membro de la Partio. Tial, li multe suferas... Ĉar dum li ankoraŭ ne sukcesas eltiri sin el tiu loko, li jam volas meti siajn piedojn sur alian.

La paroloj de Ba Ren neatendite vekas en li tiun suferon, sed li ne koleras kontraŭ iu ajn. Iun momenton poste, li jam blindpalpe penetras en la kavernon, ekbruligas sian vakskandelon kaj iras serĉi la petiolojn de arekujo. Baldaŭ, alveninte al la ŝtonbloko, kie ĉiunokte Su kuŝis kun sia filineto Thuji, li elektas iun lokon por fiksi sian vakskandelon kaj komencas diligente kunigi la petiolojn de arekujo por fari tiujn voĉtubojn.

... Sur tiu ŝtonbloko, Kujen ĵus sterniĝis apud la etulino Thuji. Tiu lasta jam profunde dormas. Ŝi scias ankoraŭ nenion pri la morto de sia patrino. Kuŝante apud sia nevino, Kujen direktas sian rigardon al la malluma kaverna volbo. Ambaŭ ŝiaj okuloj estas tute sekaj, brulvarmaj. Ŝi turniĝas kaj prenas sian

nevinon en la brakoj. La korpo de la etulino, ĉi nokte, sin kovras ĉiam per la jako de ŝia patrino. Sub siaj karesaj tuŝoj, Kujen eksentas, ke la hartufo, senorde falanta ĉirkaŭ la kapo de ŝia nevino, kvazaŭ jam dense kreskas, brile glata, tute simile al tiu de franjo Su, en tiu malfacile memorebla fora tago.

3

La geedzoj Hai Thep posedas unu sekretan subteran ŝirmejon. Tiu subterajo ekzistis jam de la mallumaj jaroj de la revolucio. Post la « komuna popolleviĝo », anstataŭ ŝtopoplenigi ĝin, Hai Thep ankoraŭ prov-penis plifirmigi ĝin. Tiu ŝirmejo sekrete faŭkas ĝuste meze de l' ĉambro kaj havas tri, kvar galeriojn, kiuj kondukas al la kampo. En la okazo, se la malamiko malkovras ĝian faŭkon, estas tamen ne facile penetri en ĝiajn galeriojn. Jam de kelkaj tagoj, Tam Ĉan loĝas en tiu ŝirmejo ; li elŝoviĝas el ĝi nur nokte por preni iom da saniga aero, poste li denove malsupren-iras, ekbruligas sian vakskandelon por labori. Tiun vesperon, kiam ĵus estingiĝis la suno, reveninte de fora vilaĝeto, la edzino de Hai Thep delikate frapas per sia kalkano la ŝirmejan faŭkon, poste levas ĝian fermoplaton. Tam Ĉan tuj elŝovas sian kapon, kiam kun sufokita voĉo, ŝi diras :

— Franjo Ba Su jam mortis !

Dolorplena, Tam Ĉan restas senvorte longan momenton. Li baldaŭ flustre demandas :

— Kiam ?

— Jam antaŭ preskaŭ unu horo. La kanajlo Xam trancîs al ŝi la kolon. Kune kun niaj vilaĝanoj, ni sukcesis perforte forpreni ŝian kadavron. La tuta vilaĝanaro ploris pri ŝia morto kaj amase kolektiĝis sur la vojo. Okazis miksbatalo inter ni kaj la soldatoj, dum ni prove rabis la kadavron.

— Kie ĝi troviĝas nun ?

— En la domo de patrino Saŭ. Nun, la vilaĝanoj jam multnombre venas tien.

Tam Ĉan rektiĝas kaj apogante siajn manojn sur ambaŭ randojn de la ŝirmeja faŭko, fikse rigardas al la malplena aerspaco antaŭ si. Iun momenton poste, li diras :

— Nun, vi devas tuj iri al tiu loko Starigu firmajn vicojn inter niaj vilaĝanoj por organizi la enterigon. Necese estas transformi tiun funebran procesion en manifestacion tra la tuta vilaĝo kaj tiuokaze pliprofundigi ilian malamon.

— Ni ankaŭ jam pensas pri tio, — respondas onklino Hai Thep, — lasu nin tuj iri...

Ĉe tiuj vortoj, ŝi ekstaras kaj sin pretigas por loki la fermoplaton sur la ŝirmejan faŭkon, kiam subite Tam Ĉan denove diras :

— Atendu !... Laŭ via opinio, ĉu oni povus venigi la funebran procesion proksime al la Hon-kaverno ?

Onklino Hai Thep eklevas siajn mirajn okulojn :

— Kion vi volas fari, kamarado ?

Tam Ĉan ne respondas. Tirante sian jakon, li sidiĝas kaj kvazaŭ flustre rekomendas al ŝi ion, antaŭ ol demandi :

— Ĉu tio estas ebla? Se jes, nia afero nepre sukcesos!

Post momenta silento, onklino Hai Thep diras:

— Lasu min diskuti pri tio kun miaj amikinoj! Se ni kaptus bonan okazon, ni tuj agu kunlige kun tio... Nun, oni ekiru!

— Onklino Hai, tio postulas de vi zorgan pripenson. Ne cedu, sed ne estu tro rigida. Ne okazigu batalon inter ni kaj la soldatoj. Ni devas, antaŭ ĉio, revenigi ilin al niaj vicoj... He onklino, kien iras ĉiuj etuloj?

— Mi jam konfidas ilin al la najbaroj. — Respondas la virino, kiam Tam Ĉan malsupren ŝoviĝas en la subteran ŝirmejon. Onklino Hai Thep delikate fermas la faŭkon, poste donas al ĝia fermoplato kelkajn batojn de balailo. Ŝi ankoraŭfoje rigarde kontrolas ĝin, antaŭ ol meti la balailon en iun domangulon kaj haste kuri al la domo de patrino Saŭ.

Vesperkrepuskiĝas. Ĉe la antaŭa korto kaj ĉirkaŭ la domo de patrino Saŭ, amase kolektiĝas la vilaĝanoj.

Iun momenton post la alveno de onklino Hai Thep, komenciĝas la enĉerkiga ceremonio. Kiam ŝi kaj onklino Ba Ren sin pretigas por enĉerkigi la kadavron de Su, patrino Saŭ delikate metas la kapon de la mortintino sur sian kruron kaj prenas unu kombilon por malkonfuzi ŝiajn kapharojn. Ŝi zorge kombas sian filinon, kiel kutime, ĉiam per tiu kombilo kun maldensaj dentoj el brile nigra bubalkorno. Sed, ĉi foje, ŝi kombas tre longe, kvazaŭ senfine, ordigante ĉiun distaŭzitan hartufon. Post la kombado, ŝi sin turnas al onklino Hai Thep kun tute trankvila voĉo:

— Edzino de Hai Thep, vidu, ĉu malantaŭ la altara ŝranko troviĝas flakoneto da esenco de pampelmusfloro; alportu ĝin al mi. Su tre ŝatis tiun parfumon. Antaŭ nelonge, ŝi prenis ĝin, oni ne scias de kie, kaj metis ĝin en tiun lokon, eble kun la espero sin parfumi baldaŭ per tiu esenco...

Onklino Hai Thep iras preni tiun flakoneton, kiun ŝi malkorkas, antaŭ ol pasigi ĝin al patrino Saŭ. La maljunulino verŝas kelkajn gutojn de tiu bonodora esenco sur sian mankavon kaj parfumas la kaphararon de sia filino. La milda kaj virga odoro de pampelmusfloro plenigas la ĉambron. Patrino Saŭ elĉerpas la tutan esencon de la flakoneto, poste prenas la kombilon kaj ankoraŭfoje kombas la kapon de Su. Tiam, ŝi komencas per delikataj kaj lertaj manoj aranĝi ŝian kaphararon. Ŝi ja tre kutimiĝas fari tiun artan hararanĝon.

Tiel, patrino Saŭ preparas por sia filino tre belan kaphararon. Ĝi estas pli ronda kaj pli dika, ol kiam Su ankoraŭ vivis. Sendube, ĝi estas la plej arte aranĝita, de post kiam Su ne portis plu tiun «voston de kokino» kaj sciis mem aranĝi sian jam sufiĉe densan kaphararon.

Post tiu hararanĝo, patrino Saŭ ankoraŭ ne sentas sin trankviła por forlasi sian filinon. Ŝi eltiras el la malantaŭa parto de sia kapo unu kupran harpinglon kaj pike fiksas ĝin al ŝia kaphararo. Poste, ŝi iras meti sur la altaron la hartufon, kiun Xam fortranĉis for de la nuko de Su tiun tagmezon kaj, kiun zorge kolektis kaj revenigis baldaŭ la vilaĝaninoj.

Kaj nur nun, la maljunulino komencas plori, nekonsoleble.

Kelkaj vilaĝaninoj subtenas ŝin sub la brakoj por revenigi ŝin al ŝia lito, dum onklino Hai Thep kaj onklino Ba Ren delikate enmetas la korpon de Su en interne flave kolorigitan ĉerkon. La vilaĝaninoj pasigas, de mano al mano, longajn rubandojn el pure blanka tulo, per kiuj estas baldaŭ kovrita la kadavro.

Kiam oni sin pretigas por fermi la ĉerkon, patrino Saŭ elŝiras sin el la manoj de la onklinoj kaj alkuras. Sed ŝi ne vidas plu sian filinon. Meze de l'plorsingultoj de la maljunulino, malleviĝas la fermoplato kaj, komplete fermita, la tuta ĉerko estas nun skarlata. Ĝi estas lokita sur la ligna planko, meze de la ĉambro, kie Su naskiĝis kaj kreskis, kie Su amuziĝis, kiam ŝi estis ankoraŭ infana. Ĉi tie, ŝi jam ploris, ridis, sin pasie fordonis al pluraj infanludoj. Nun, ankaŭ ĉi tie, ŝi jam trankvile dormas: ŝi dormas eternan dormon, postlasante al ni tiom da karaj bildoj el sia dudeksepjara vivo, precipe el la lasta momento de tiu vivo.

— Ekbruligu viajn torĉojn! — Kun klara kaj sonora voĉo, onklino Hai Thep ordonas al ĉiuj vilaĝaninoj, kiuj restas en la domo kaj vice staras de la alta ŝtuparo ĝis la korto.

La patrinoj kaj onklinoj tuj ekbruligas siajn torĉojn el sekaj kokosfolioj aŭ haste rulvolvita pajlo. Pluraj virinoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ fraŭlino Ka My, enpakas ion en la baskon de sia robo. Iun momenton poste, la korto estas inundita de la lumo de torĉoj.

Patrino Saŭ petas, ke Su estu enterigita apud la tombo de sia patro, kiu troviĝas ĉe la piedo de la Honmonteto. Anstataŭ sekvi mallongan vojon, kiu rekte kondudas al tiu loko, oni transportas la ĉerkon, de tiu

ĝardeno al alia, tra la tuta vilaĝo kaj la funebra procesio baldaŭ ŝanĝiĝas en manifestacion. La unua malamika patrolo renkontas tiun homamason meze de vasta ĝardeno. La soldatoj krie demandas:

— Kien vi iras tiel multnombre kaj tiel brue dum tiu malpermesita horo?

Onklino Ba U tuj paŝas antaŭen:

— Vi mortigis nian filinon kaj nun ni faras nenion, krom iri enterigi ŝin.

Aŭdante tiujn vortojn, la patrolestro etendas ambaŭ siajn brakojn antaŭ si:

— Bone, vi nur iru! Vi povas ankaŭ samtempe manifestacii.

Poste, li rigardas returne kaj, svingante sian brakon, ordonas al siaj soldatoj sin meti flanken. La homamaso, gvidata de onklinoj Hai Thep kaj Ba U, denove antaŭeniras. La torĉoj krakete brulas ĉe iliaj manoj: krom tiuj flamantaj torĉoj, ĉiuj kunportas po unu rezervan.

Sub la lumo de flagrantaj torĉoj, la kolono da homoj, kvazaŭ akvofluo, senhalte postsekvas la brile ruĝan ĉerkon, kiun supersultre portas pluraj virinoj. Dise brilas ankoraŭ kelkaj arĝente blankaj kaphararoj kaj super ĉies kapo, grapoloj da ŝveliĝantaj kaj sukoplenaj laktofruktoj, meze de densaj foliaroj.

Patrino Saŭ iras tuj post la ĉerko, inter onklino Ba Ren kaj la aliaj patrinoj de Hon Dat. Du virinoj subtenas ŝin sub la brakoj. Sed, pli ol unufoje, ŝi forpuŝas iliajn manojn por prove sin ĵeti antaŭen. Nun, ŝi ne plu ploras. Kuntrenata en tiu senhalta homfluo, ŝi ja

ne volas plu plori. Io varma bolas en ŝia jam kaviĝinta kaj ostece maldika brusto. Antaŭmomente, ŝi tre dolorìs pro tiu kruela disiĝo. Sed, nun, marŝante meze inter la homamaso, ŝi trovas, ke ne sola ŝia filino foroferis sian vivon. Tiom da ŝin akompanantaj samvilaĝaninoj havas sian edzon, sian infanon, sian fraton aŭ murditan aŭ torturitan ĝis kripliĝo. Pluraj el iliaj karuloj nun suferplene kuŝas en malliberejoj aŭ vivetas, kiel ekzilitoj en foraj insuloj perdiĝantaj meze de l'maro. Jam de sep jaroj, en Hon Dat neniu familio povas evitigi al si funebron, torturon, subpremon. Ja, kiel atestoj, restas ankoraŭ tiuj ostoj kaj sango de tiom da martiroj!

...Tiun malfeliĉegon spertas ne nur patrino Saŭ, sed ankaŭ la tuta vilaĝanaro. Ne nur ŝi luktas, sed ankaŭ centoj, miloj da kamparanoj de Hon Dat, milionoj da homoj de Sud-Vjetnamio. La marondoj, kiuj muĝas malantaŭ ŝi kvazaŭ admonas ŝin pli kuraĝe antaŭen iri, spite suferojn kaj mizerojn. La vento, kiu susure blovas tra la foliaroj kvazaŭ urĝas ŝin nepre venĝi sian filinon. La sangoŝuldo devas esti likvidita. Ne nur ŝi kaj la vilaĝaninoj, partoprenantaj en tiu funebra procesio renkontas malfacilaĵojn, sed ankaŭ ŝiaj karuloj, kiuj troviĝas nun en la kaverno ĉirkaŭsiegata de la malamikoj. Dum kvin sinsekvaj tagnoktoj, tiuj karuloj, eltenante malsaton kaj soifon, firmdecide rezistas kontraŭ ĉiuj malamikaj atakoj. El ili nur unu falis en la manojn de la malamikoj, sed tiu ĉi ne kapitulacis, — tiu ĉi estis neniu alia, ol ŝia propra filino. Nun en tiu kaverno restas ankoraŭ ŝia nepino, kiu ĵus fariĝis senpatrina orfino, ŝia bofilo kaj ankaŭ la edzoj de tiuj virinoj, kiuj marŝas ĉe ambaŭ

ŝiaj flankoj : onklino Hai Thep kaj onklino Ba Ren ; — restas ankoraŭ la knabo Be, filo de onklo Tu Raŭ kaj tiom da aliaj konatoj, kiuj inspiras al ŝi fidon kaj trankvilon, ĉiufoje kiam ŝi pensas pri ili.

La homfluo jam atingas preskaŭ la bordon de la Angiltorento. Ekvidante la torĉan lumon etendiĝi en direkto al ili, kvazaŭ granda incendio, la soldatoj, kiuj kantonmentas apud la torento tuj alkuras, kriegante. La kapitano Kao, komandanto de la bataliono de ĉefaj fortoj, haste elŝoviĝas el sia tendo. Li tuj komprenas la okazaĵon, kiam li vidas homojn surŝultre transporti la brile ruĝan ĉerkon. Li senprokraste ordonas al siaj soldatoj stari en vicoj, kun pafiloj prete tenataj en la manoj, por bari la vojon, de la ĝardenoj al la torento. Poste, kun bruaj paŝoj, li kuras al la homamaso kaj forte svingas sian brakon :

— Ne estas permesate fari unu paŝon plu !

Onklino Ba U elpaŝas kaj mildvoĉe diras :

— Sinjoro, nia nevino estas mortigita de viaj homoj. Vi devas do lasi nin enterigi ŝin.

— La majoro malpermesas ĉian noktan enterigon.

La voĉo de onklino Ba U restas ĉiam milda :

— Sinjoro, mia nevino estas tiel murdita. Ne decas prokrasti la enterigon !

— Tion mi forspitas. Jam estas al vi granda favoro, se vi estas permesitaj enterigi tiun Vjetkong-aktivulinon.

— Sinjoro, eĉ se ŝi sekvas la Vjetkongojn, ŝi estas ĉiam mia nevino. Kion vi perdos, se ni enterigos ŝin ĉe la piedo de Hon Dat ? Vere kompatinda ŝi estas ! Ŝi estas ja sovaĝe mortigita de viaj homoj !

— Ha, tiu grasdikulino estas vere troparolema! Mi jam diras, ke la majoro ne permesas al iu ajn eliri el sia domo nokte, ĉu vi komprenas?

Onklino Ba U mallevas siajn brakojn ŝajnigante, kvazaŭ ŝi elreviĝas:

— Mi tamen kredas, ke vi havas aŭtoritaton ĉi tie. Tiel, ĉio dependas de la majoro! Do, permesu al mi renkonti lin, por ke mi direktu al li mian peton.

La kapitano Kao klinas sian kapon jen dekstren, jen maldekstren, kvazaŭ li volas identigi la virinon, poste li akcentos sian voĉon:

— Vi volas renkonti la majoron por politika lukto, ĉu ne? Rigardante vian vizaĝon, mi tuj komprenas, ke vi estas la gvidantino de la lukto.

Iu soldato intervenas:

— Oj! Tiun virinon mi jam renkontis en pluraj manifestacioj en Rach Gia.

— He, ne parolu stultaĵon! Mi estas interparolanta kun sinjoro kapitano; kio jam ofendas vin, por ke vi vin enmiksu en nian konversacion?

Finriproĉinte la soldaton, onklino Ba U denove sin turnas al la kapitano, ĉiam kun la sama milda voĉo:

— Permesu, sinjoro, ke ni renkontu la majoron! Nepre, vi helpos nin, ĉu ne? Vi batalas kontraŭ la Vjetkong-oj en la kaverno, vi jam arestis kaj mortigis unu el ili. Ĉu tio ne sufiĉas, por ke nun oni malpermesu al ni enterigi la viktimon?

— Estas malpermesite!—Li minacas.— Vi estas tre obstinema.

Ne povante plu sin regi, onklino Ba U kriegas:

— Ni ekvojiru eĉ sen via permeso!

Poste, ŝi viglapaŝe preterpasas la kapitanon kaj, per rapida eksvingo de l'brako, ordonas al ĉiuj antaŭeniri. Tuj, puŝante flanken la soldatojn, la homamaso impete sin direktas al la torento.

— Haltu, alie mi pafos! — Kriegas la oficiro.

Sed, la funebrantaro ne haltas. Ĉiuj alte levas sian flamantan torĉon kaj plaŭde travadas la torenton, kiu baldaŭ brilas sub la torĉa lumo. La kapitano kure venas kaj mallaŭte diras al kelkaj soldatoj: «Trapafu la aeron!» Obeante al sia estro, tiuj lastaj direktas la kanontubon de sia fusilo al la aero kaj pafas. Aŭdiĝas pluraj sinsekvaj pafoj. Sed la kolono da homoj ĉiam travadas la torenton kaj baldaŭ atingas la transan bordon kun la skarlata ĉerko. Onklino Hai Thep sin parole turnas al tiuj, kiuj troviĝas ĉe la lastaj vicoj;

— Ili trapafas la aeron. Ne timu kaj antaŭen iru!

Tirante instruajn spertojn el la pasintaj luktoj, ĉiuj komprenas, ke en tiu kriza momento, oni devas iri antaŭen kaj ne retroen. Kaj tiujn sencelajn pafarojn ili jam pli ol unufoje aŭdis; tial ili restas ĉiam trankvilaj. Cetere, ĉiu vilaĝanino, partoprenanta en tiu funebra procesio, tute bone konscias, ke krom la sankta devo akompani la malfeliĉan Su ĝis ŝia lasta ripozejo, ia nombro da virinoj devas plenumi ankoraŭ tre gravan mision: ili profitos favoran momenton, kiam la homfluo preterpasas la kavernon, por kuri al ĝia faŭko kaj ĵeti en ĝin pakaĵojn da rizo kaj aliaj manĝaĵoj kaj botelojn da trinkebla akvo, kiujn oni jam de la ma-

tenkrepusko antaŭpretigis, firme ligis kaj zorge kaŝis sub siaj vestoj.

La kapitano Kao estas tre sperta en la subpremado de politikaj luktoj; tial, ordoni al siaj soldatoj pafi rekte al la homamaso, en kiu trovigas miloj da virinoj, estas afero, kiu postulas de li seriozan pripenson. Foje, li preskaŭ mortis sub la pugnoj, bastonoj, ŝtonoj ĵetitaj sur lin, kiam obeante al lia ordono, oni pafmortigis kelkajn homojn el la manifestaciantaro. Komence, li kredis, ke se mortfalus unu homo, tuj miloj da aliaj devus halti. Sed, strange! Ĉiufoje kiam unu homo falis, tuj miloj da aliaj furioze sin ĵetis antaŭen, pugno- aŭ piedobatis, ŝirvundis lin kaj lian bandaĉon. Tial, nun, post ses sencelaj pafoj, li ankoraŭ ne aŭdacas ordoni, ke oni pafu al la manifestaciantaro. Krome, tuj post sia alveno al Hon Dat, la majoro jam donis al li zorgajn rekomendojn: «Por ekstermi la Vjetkongojn, kiuj fuĝas en la kaverno, oni devas, antaŭ ĉio, fiaskigi ĉian politikan lukton, kiu povus eksplodi ĉi tie. Oni renkontus multajn malfacilaĵojn, incitante tiun bandaĉon da megeroj. Malgraŭ ĉio, vi devas atendi mian ordonon!»

Tiutage, Kao kaŝe admiris la majoron, kiel profunde pripenseman homon, kiu povas malkovri la bonan kaj la malbonan flankon de l'afero. Nun, tiu bandaĉo jam moviĝas, tiuj virinaĉoj jam senbride travadas la torenton, atendante neniun ordonon. Kion li devas fari? Restas nur al li telefone peti instrukciojn de la majoro.

Ĉe tiu penso, li tuj kuras al la tendo de la telefonisto, ensovigas en ĝin kaj febre turnas la krankon de

la telefonaparato. Ĉe la alia ekstremo de la telefon-linio, demandas per raŭka voĉo duondormanta soldato-telefonisto :

— Kiu vokas?

— Estas mi, kapitano Kao el la Tria Bataliono. Mi volas interparoli kun la majoro. Tre urĝa afero!

— Kun la majoro? Li jam enlitiĝas.

— Veku, tuj veku lin! La popolamaso manifestacias kaj jam trapasas la torenton. Rapide veku lin!

La kapitano Kao atendas, ĉiam tenante la aŭskultilon ĉe la orelo. Nur ĉirkaŭ kvin minutojn poste, aŭdiĝas la voĉo de la majoro, kiu demandas :

— Kion? Ili manifestacias,ĉu ne?

— Jes, ili postulis, ke ni permesu al ili transporti la kadavron de la ekzekutita virino al la piedo de Hon Dat por entombigo. Mi rifuzis, sed ili perforte trapasis la torenton...

— Minacu ilin per pafoj, por ke ili retiriĝu. Tuj pafu!

— Ni jam trapafas la aeron, sed ili ne retiriĝas. Permesu, mia majoro, ke mi pafu rekte al ili; tiel, ni povus...

— Vi pafu rekte al ili? Ne, ne, tio nur komplikas la aferon! Ili jam trapasis la torenton, ĉu ne? Tuj kursekvu ilin por bari al ili la vojon!

— Jes, jes...!

La kapitano demetas la aŭskultilon kaj kuras eksteren.

Sed, jam estas malfrue... Starante ĉe la torenta bordo, il vidas neniun homsilueton. La lastaj torĉoj

malaperas en la kokosĝardeno. Vidiĝas nur trembrilantaj torĉaj lumstrioj sur la kokospalmoj.

Kiam travadinte la torenton, la kapitano, ĉekape de unu sekcio da soldatoj, sukcesas kuratingi la lastajn vicojn de la manifestaciantaro, ĝuste tiam el tiu homamaso subite elpaŝas pluraj nigraj siluetoj, kiuj baldaŭ haste kuras en direkto al la kaverno. Ili estas tiuj virinoj, kiujn onklino Hai Thep jam komisiis por alporti rizon kaj akvon al la kaverna faŭko.

La silueto, kiu la unua forlasas la vicojn estas fraŭlino Ka My. Ŝi portas en unu mano unu botelon da akvo, zorge envolvitan en pajlo kaj en la alia, unu pakon da premplatigita glurizo. Kun urĝaj paŝoj, Ka My sin ĵetas antaŭen. Ŝin postsekvas aliaj virinoj, portantaj ankaŭ rizon kaj akvon, kiel ŝi.

Ka My kure venas tute proksime al la kaverna faŭko, kiam subite de interne eksplodas surdiga pafo. Feliĉe, la kuglo nur duontuŝas ŝian kaphararon. Terurite, ŝi haltas kaj tremvoĉe krias :

— Estas mi, Ka My, fratoj miaj ! Mi, mi... alportas al vi rizon kaj akvon.

En la kaverno, la homo, kiu ĵus pafis estas unu el la gerilanoj. Tute konsternita, li mallevas sian pafilon :

— Ĉielo ! Ka My, ĉu ne ? Ĉu vi estas vundita ?

— Ne.., ne..! — Balbutas la junulino. Poste, ŝi sagrapide sin ĵetas en la kavernan faŭkon kaj delikate ŝovas en ĝin la botelon da akvo kaj la pakon da rizo.

— Ĉu vi ĉiuj restas ankoraŭ tie ?

— Jes.

— Franjo Su jam mortis ! Ni iras nun entombigi ŝin.

Ka My havas la tempon demandi kaj diri nur tion, antaŭ ol kuri returne por lasi la lokon al aliaj. Tiel, rizo kaj akvo estas ĵetitaj en la kavernon. Ĉiu homsilueto mem sciigas sian nomon, petas informojn pri siaj konatoj en la kaverno, poste forkuras. Post ĉiu ekapero de tiu nigra silueto, el la fundo de la kaverno ĉiam eĥe resonas admonvoĉoj :

— Estu trankvilaj, samvilaĝanoj ! Elinter ni, du solaj vundiĝis. Sed, ni ĉiam batalas !

— Vi ĉiuj, kiuj troviĝas tie ekstere, daŭrigu vian lukton kontraŭ ili. Postulu de ili kompenson al viaj detruitaj havaĵoj ! Per propagando, subfosu la batalspiriton de la malamikaj soldatoj ! Tion ne forgesu ! Donu pli fortan impulson al via lukto, ĉu vi komprenas ?

— Jes, mi komprenas ; tion mi ne forgesas !

Subite, onklo Tu Nghiep ekkrias :

— Ĉielo ! Ĉu estas tie la patrino de la etulino Lua ?

— Jes, jes, kaj vi, ŝia patro, ĉu ne ? Jen mi, karulo mia ! Sed, adiaŭ !

Tiel, interŝanĝas urĝaj demandoj kaj trorapidaj respondoj inter tiuj, kiuj troviĝas ekstere kaj interne de la kaverno. Aŭdiĝas samtempe la obtuza bruo de tiuj boteloj da akvo kaj pakoj da rizo, kiuj falas sur la kavernan enirejon. Poste, la anhelo kaj la paŝbruo de virinoj, kiuj haste alkuras. Ĉe la kaverna faŭko inundita de lunlumo, baldaŭ profiliĝas, unu post alia, pluraj homsiluetoj kaj ĉiuj, senescepte, estas

kvazaŭ tre konataj, kun harpingloj kaj hartuberoj. La gerilanoj jam rekonas per tiuj siluetoj aŭ sian fratinon aŭ sian filinon aŭ sian edzinon. Male, rigardante de ekstere al la profunda kaverno, oni vidas nur mallumon kaj sentas, kvazaŭ pluraj manoj etendiĝas por prove ĉirkaŭpremi ilin. Malgraŭ tio, nur aŭdante la voĉojn, oni tuj scias, ke tiu aŭ alia estas ilia edzo, frato aŭ iu konato de la vilaĝo. Ja, familiaraj voĉoj de la karuloj ! Jam de kvin tagoj, ili ankoraŭ ne sin reciproke renkontis kaj tute zorgis unu pri alia. Tiun kvinan nokton, la luno troviĝas tie por ĉeesti ilian renkontiĝon. Mirinda kuraĝiga forto estiĝas en la koro de ĉiu homo, interne same kiel ekstere de tiu kaverno, en kiun la malamikoj ne povis penetri, post kvin tagoj kaj kvin noktoj de ĉirkaŭsiego. La gerilanoj tute emociiĝas trovante, ke ili ne sole batalas. Siaflanke, haste forkurante, la vilaĝaninoj kunportas ankaŭ la esperon, ke la kaverno estos nevenkebla. Ili havas la firman konvinkon, ke tiu renkontiĝo ne estos la lasta.

Sed, kiam malaperas ĉiuj virinoj, restas ĉiam unu malalta kaj eta homsilueto, postsekvata de unu hundo. Tiu homsilueto tuj enŝoviĝas en la kavernon kaj frapiĝas kun Ba Ren. Tiu lasta ekkaptas lin kaj demandas :

— Kiu estas ? Pro kio vi ne forkuras ?

— Mi, mi ne revenas hejmen, mi havas unu grenadon.

Ba Ren subite ekkrias :

— Ĉielo ! La knabeto Ut, la knabeto Ut, kamaradoj !

— Mi restas, mi ne revenas hejmen.

Ĉe tiuj vortoj, li elglitas el la manoj de Ba Ren kaj blindpalpe antaŭeniras; li ĉirkaŭbrakas ĉiun renkontitan homon, skuetante sian komplete elrazitan kapon kontraŭ lia ventro. Poste, li brue ridas kun kontenta mieno :

— Miaj onklinoj nepre terure maltrankviliĝos, kiam ili ne trovos min reveninta.

— Ut, Ut, vi estas tie, Ut ?

El la profunda kaverno aŭdiĝas ĝojaj vokkrioj. La knabeto Ut tuj rekonas onklon Nam Tan kaj diras :

— Onĉjo Nam Tan, ĉu ne ? Tamen, hejme, onnjo Nam estas ĉiam zorgoplena. Timante, ke vi povus morti, ŝi tagnokte bruligas incenson kaj preĝas por vi !

— Babilema vi estas !... He, via frato estas vundita kaj li kuŝas tie, en la fundo de la kaverno. Eniru por viziti lin.

— Tion mi jam scias. — Kun la plej natura tono, respondas la knabeto. — La afero ne urĝas. Mi baldaŭ venos vizite al li. Mia patro ankaŭ estas informita pri tio; li iam diris, ke esti vundita dum batalo kontraŭ la malamiko ne estas eksterordinara afero. Ha, mi preskaŭ forgesos sciigi al vi jene : mi jam ŝtele forprenis de la malamikaj soldatoj unu « brilfrukton »*, kiun mi kunportas ĉe mia zono. Morgaŭ, se ili penetrus ĉi tien, mi malstiftus mian grenadon kaj volonte mortus kun ili !

Aŭdante tiujn parolojn de la knabeto, ĉiuj en la kaverno eksplodridas :

---

* Oni kutime nomas ian specon de usona grenado « brilfrukto » pro ĝia brile kolorŝmirita eksteraĵo.

— Vere vi estas infane naiva! Oni faros tion, nur en plej kriza situacio. Se ili troviĝus ankoraŭ malproksime, oni nur ĵetu sur ilin la grenadon. Ja, oni ne vane perdus sian vivon!

Ut hezitas kelkajn sekundojn, poste rebate diras:

— Sed... mi volas ankaŭ diri, ke en plej kriza situacio...

— Bone, se tiel vi pensas! Sed, ĉi tie, certe ne okazus tiel kriza situacio por uzi tian rimedon. Se ili penetrus en nian kavernon, ni nur pafus aŭ ĵetus grenadojn.

— Do, tio estas facile farebla! — Fervore diras la knabeto. Subite, li demandas:

— Kie troviĝas franjo Ut Kujen, onkloj? Franjo Ut Kujen?

— En la kaverno.

La knabeto abrupte haltas. Li faras kelkajn sinsekvajn nazenspirojn, poste plorsingultante krias: «Onkloj miaj, franjo Ba Su jam mortis... hu, hu, hu!

Starante meze de la kaverna galerio, li ploregas. Li baraktas, grumblas, sin montras, kvazaŭ li koleras kontraŭ ĉiuj, kiam iu provpenas lin konsoli. Poste, same kiel ĉe la komenco, kiam li ekploris, Ut subite silentas, li levas sian manon por forviŝi siajn larmojn kaj brue nazenspiras. Hai Thep ektiras lian brakon kaj mildvoĉe diras al li:

— Ut, do restu ĉi tie kun ni. Sed, mi faras al vi tiun rekomendon: vi baldaŭ renkontos la etulinon Thuji; vi devos gardi sekreton pri la morto de ŝia patrino, ĉu vi komprenas? Se ŝi estus informita pri

tio, ŝi plorus nekonsoleble. Nu, vi diris, ke vi havas unu «brilfrukton», ĉu ne? Do, kie ĝi estas? Pasigu ĝin al ni, por ke oni konservu ĝin kun la aliaj municioj.

La knabeto delikate tiras el sub la zonparto de sia duonpantalono unu grenadon MK3, kiun li transdonas al Hai Thep, rekomendante:

— Bonvolu gardi tiun grenadon por mi, onklo! Se ĝi perdiĝus, mi postulus de vi kompenson.

— Jes, mi kompense donus al vi alian «brilfrukton», se la via perdiĝus. Ĉi tie, al ni ne mankas tiuj grenadoj.

La gerilanoj jam kolektas la nutraĵojn, kiujn la vilaĝaninoj provizis al ili. Post kontrolo sub la lumo de elektraj torĉoj, oni nombras dek-du botelojn da akvo, dek-du pakojn el trunkoŝeloj de bananujo, entenantajn glurizon aŭ ordinaran rizon kaj kelkajn pakojn el junmolaj floringoj de arekujo, en kiuj troviĝas ses rulvolvaĵoj de sekaj tabakfolioj kaj deko da paketoj de cigaredoj «Rugby». La trunkoŝeloj de bananujo portas ankoraŭ freŝajn tranĉsignojn, el kiuj gutas suko. Oni prove malfermas unu pakon kaj trovas en ĝi premplatigitan glurizon ankoraŭ varmetan... Kaj ĉe la mezo, abundas tranĉaĵoj de orflave rostita kokaĵo, el kiu eliĝas apetitveka odoro de ajlo kaj aliaj spicoj.

— Ĉi foje, denove belas la vivo! — Ĝojkrias pluraj homoj.

— Ĉi vespere, ni devas preni tion, kiel kompenson.— Diras Ba Ren. — Kamaradoj, manĝu kaj trinku ĝissate, antaŭ ol fari niajn kutimajn laborojn. Ni fu-

mos la cigaredojn «Rugby» kaj elĵetos tiun fumon eksteren por provi la flarsentumon de la malamikaj soldatoj !

— Tiujn cigaredojn «Rugby» ni povas fumi, kiom ni volas. — Diras Hai Thep. — Sed, ni devas moderе mangĝi kaj trinki... Ni devas esti ŝparemaj... Povas esti, ke ili ankoraŭ longatempe ĉirkaŭsiegos nin. Mi proponas, ke oni konfidu ĉion ĉi al Ut Kujen kaj, ke oni donu al ŝi la rajton distribui al ni mangaĵojn kaj trinkaĵojn !

— Jes, oni konfidu tion al Ut Kujen, sed tiujn cigaredojn kaj tabakon lasu min gardi !

Ĉiuj eksplodas per ridoj kaj aprobas tiun proponon de onklo Tu Nghiep, dum Ba Ren eligas sian langon.

Tu Nghiep tuj prenas severan tonon :

— Ne ŝercu, Ba Ren !... Mi faras tion pro respekto al la komuna havaĵo, sed ne pro individua intereso !

Ba Ren brue ridas.

4

La doloro de sinjorino Ka Soi hodiaŭ atingas sian kulminon. -Ĉi tagmeze, kiam Xam eklevis -sian trančilegon por senkapigi franjon Su, ŝi jam impete sin direktis al li. Sed liaj soldatoj puŝis kaj renversis ŝin teren ; ili ankoraŭ surtretis ŝin, tiel dolorige, ke ŝi svenis.

... Sinjorino Ka Soi rekonsciiĝas, kiam estingiĝas la lastaj lumoj de la tago. Ka My kure revenas kun distaŭzitaj kapharoj kaj plorante sciigas al sia patrino la morton de Su. Poste, ŝi denove forkuras... Restas hejme nur la maljunulino kuŝanta sur sia bambulito, meze de malŝirmata domo, tra kiu la vento blovas, brue skuante la murvandojn el plektitaj folioj. Nur post longa momento, ŝi sukcesas kaŭre sidiĝi. Ambaŭ ŝiaj okuloj malheliĝas kaj ŝiaj blondaj kapharoj, kiuj senorde falas sur ŝiajn ŝultrojn ruĝas, kiel fajro sub la vesperkrepuska lumo. Poste, kiam malaperas la suno kaj komplete noktiĝas, ŝi sidas ĉiam senmove sur la lito. La mallumo penetras en la domon kaj plenkovras la maljunulinon. Kaj kiam leviĝas la luno, denove ekaperas la silueto de sinjorino Ka Soi, ne plu sidanta sur la bambulito, sed nun staranta sur la tera planko. Tiu suferanta kmera patrino havas ankaŭ strangan starmanieron. Ŝiaj kruroj iom disstariĝas kaj ŝiaj piedfingroj sin forte krampas al la fendetoplena seka tero. Ambaŭ ŝiaj brakoj kvazaŭ algluiĝas al la akseloj kaj ŝia silueto iom kliniĝanta antaŭen plireliefiĝas kaj aspektas, kiel tuj falonta arbo.

Tiel staras sinjorino Ka Soi, tre longatempe, eble dum preskaŭ duonhoro, antaŭ ol neatendite, ŝi ekpaŝas kaj eliras el la domo, ĉiam kun tiu antaŭen kliniĝanta busto.

Ŝi blindpalpe iras sur la vojo, kondukanta al la vojkruciĝo Si Ly. Dumvoje, ŝi foje ŝanceliĝas, foje falas, sed ĉiam provpenas leviĝi por daŭrigi sian piediradon. La tagon, kiam ŝi revenis de la restoracio de onklino Ba U kun la aĉetita brando, ŝi ankaŭ falis pro mispaŝo. Sed, tiun tagon kaj ankaŭ antaŭe, ŝi ankoraŭ

ne falis tiom multfoje, kiom hodiaŭ. Hodiaŭ, ŝi ja suferas tiom, ke ŝi jam freneziĝas. Post kelktempa foresto, ŝia filo nun revenas al Hon Dat kaj jam sovaĝe senkapigas unu virinon, kiun amas la tieaj Kmer- kaj Vjetanoj. Tiu virino kaj ŝia patrino estas ankaŭ homoj, al kiuj sinjorino Ka Soi devas sin montri tre danka. Antaŭ dudek jaroj, en malfrua frosta nokto, ambaŭ patrino kaj filino jam subtenante konkukis ŝin hejmen kaj helpis ŝin naski la etulinon Ka My. Tiam, apenaŭ dekjara, Su estis jam tre bonkora knabineto. Sinjorino Ka Soi ne povas forgesi tiun nokton, kiam la etulino Su helpis sian patrinon konduki ŝin hejmen. Ambaŭ patrino kaj filino portis kaptukon, ĉar estis tre malvarme. Ŝi ja havas bonan memoron. Kiam onklo Thach Ĥa mortis, la tuta familio de patrino Saŭ tre kompatis ŝin kaj ŝian filineton Ka My kaj tutkore akceptis ambaŭ sub sian zorgon. Tiun sanktan dankŝuldon sinjorino Ka Soi ĉiam gravuras en sia koro kaj ŝi ankoraŭ ne trovas rimedon por ĝin pagi. De tempo al tempo, kun Ka My ŝi venis ĉe patrino Saŭ por helpi ŝin fosi irigaciajn kanaletojn, flegi ĝardenojn aŭ, dum la rikoltsezono, kolekti kaj draŝi rizon. Tiun dankŝuldon ŝi ankoraŭ ne sufiĉe pagas, kiam ŝia kruela filo jam sovaĝe per tranĉilbatoj mortigas tiun virinon, kiu iam antaŭe multe zorgis pri ŝia vivo.

La kanajlo Xam mortigas franjon Su! Jen estas la kaŭzo, kial ĉi nokte, tiu honesta kmera maljunulino ŝancelpaŝas. Sed, kien ŝi iras? Kien ŝi volas iri? Neniu scias. Oni vidas nur ŝian silueton, kiu penege marŝas sur tiu vojo, lunplena kaj iom glata.., tamen, kun kvazaŭ dolore pezaj paŝoj. Sed, baldaŭ, tiu silueto atingas la vojkrucigon Si Ly. Kaj, ĝi iras rekte

antaŭen. Nur tiam, malkaŝiĝas la intenco de sinjorino Ka Soi: ŝi volas iri al patrino Saŭ. Sed, ŝi blindpalpe marŝas, hezitema kaj timoplena. Alvenante al la mangoĝardeno, ŝi ne aŭdacas preni la centran aleon, flanken iras kaj traŝoviĝas tra la piedoj de mangujoj. Kiom da tempo pasis, antaŭ ol ŝi atingas la domon de patrino Saŭ? Oni scias nur, ke ĉe ŝia alveno, multnombraj homoj jam kolektiĝas tie. Ĝuste tiam, oni sin pretigas por enĉerkigi la kadavron de Su. Sinjorino Ka Soi ne vidas patrinon Saŭ ameme kombi kaj arte aranĝi la kaphararon de sia filino, tiu virino, kiu jam uzis, en sia aĝo de 10 jaroj, ĉiujn siajn fortojn por helpe revenigi sinjorinon Ka Soi, de la rizkampo al ŝia domo. Ŝi ne vidas tiun scenon, ĉar ŝi ne aŭdacas meti siajn piedojn sur tiun homplenan korton. Ŝi kaŝe kaŭriĝas malantaŭ arbustotufo, ĉe la vojrando. Tie, ŝi jam aŭdas la plorsingultojn de patrino Saŭ eĥe resoni el la domo. Ŝi ektremas kaj komplete kovras sian vizaĝon per ambaŭ manoj.

Kiam la torĉoj arde brulas meze de l'korto kaj ĵetas sian lumon ĝis ŝia kaŝejo, sinjorino Ka Soi tre timas kaj kuntiriĝe kliniĝas ĝis la tero. Iun momenton poste, kiam impete foriras la vilaĝanoj de Hon Dat kun flamantaj torĉoj ĉe la mano, ŝi vidas inter siaj fingroj kaj inter la «Nhu» - folioj kun akraj dornoj la brile ruĝan ĉerkon kaj la arĝente blankan kaphararon de patrino Saŭ. Retenante sian spiradon, ŝi rigardas al la ĉerko; en ŝia plata brusto, la koro kunpremiĝas, kvazaŭ ne povante plu batadi. Ja, ŝi tute bone scias, ke la malfeliĉa kadavro, kiu kuŝas en tiu ĉerko estas neniu alia, ol Su. La maljunulino komplete fermas siajn okulojn. Kvankam jam pli ol unufoje ŝi diris, ke tiu

kruelegulo ne estas ŝia filo, tamen fakto estas, ke ŝi estas ĝuste tiu, kiu naskis lin. Ĉielo! Kiom varma estis tiu nokto! Kiel dikaj kaj kiel komplete fermitaj estis la muroj de tiu domo kun ŝtonplate pavimita planko! En tiu loko, ŝi kuŝis, ŝvitoplena, kun terura ventrodoloro, baraktante ĝis malfrua nokto, antaŭ ol akuŝi tiun malbenitan infanon, la kanajlon Xam.

Jam foriras la funebra procesio kun flamantaj torĉoj. Ĝin partoprenas ankaŭ ŝia filino Ka My. En la arbustotufo, sinjorino Ka Soi jam plurfoje leviĝas, kun la intenco postkuri la funebrantaron. Sed ŝi ne aŭdacas... Ĉi foje, vere ŝi ne aŭdacas, kiel Ka My sekvi siajn samvilaĝaninojn. Pli ol iam, ŝi trovas sin terure kaj senpere kulpa.

Iom post iom malproksimiĝas la funebrantaro. La tremanta torĉa lumo flagretas sur la alta foliaro, poste komplete estingiĝas. La antaŭe ruĝe lumigita korto nun fariĝas duonluma sub la arĝenta lunhelo. Restas nur sinjorino Ka Soi sidanta sur la tero mem, malantaŭ la arbustotufo. Trans la alia vojrando, hirtigita de longaj herbofolioj, akrepintaj, kiel glavoj, malklare ekaperas, unu post alia, tiu kortangulo, tiu ŝtuparo kaj tiu ĉambro de surfosta domo, kun vando el lignaj tabuloj kaj, en kiu ankoraŭ pale flagretas la flamo de fiŝograsa lampeto. Sinjorino Ka Soi larĝe malfermas siajn okulojn por rigardi al tiu domo, al tiu ŝtuparo, kiun antaŭe, la ĵus mortinta virino el la Vjet-nacieco jam per ĉiuj siaj fortoj helpis ŝin suprengrimpi. Antaŭe, en tiu domo, kie brilas la flagretanta lumo de lampeto, ŝi naskis sian filinon Ka My, ĝuste kiam patrino Saŭ eltiris el ŝia buŝo la jam frakase maĉitajn pajlerojn. Poste,

ankaŭ tien, jam venis Thach Ĥa por veturigi ŝin hejmen.

« Xam, vi estas vere kruelega ! Vi semas funebron sur tiun familion, kiu jam prenis sub sian zorgon vian patrinon, kiam ŝin trafis malfeliĉo. Vi jam staras ĉe la flanko de via patro por malbone trakti ŝin. Vi estas kvazaŭ malbenita ponardo, kiu jam fortranĉas ĉiujn ligilojn inter ŝi kaj la ceteraj homoj. Ĝuste pro via kulpo, via patrino devas sin kaŝi en mallumo, ne aŭdacante renkontiĝi kun sia samvilaĝanaro».

« Pro kio A Rat * ankoraŭ ne mortigas vin ? Mi preĝas al A Rat, ke li batmortigu vin, por ke mi suferu nur unu fojon, se mi devus suferi, por ke mi ne estu tiel turmentita per konstantaj konsciencriproĉoj ».

Tiel sinjorino Ka Soi blasfemas kontraŭ sia propra filo. Poste, ŝi ŝanceliĝe ekstaras, trabrecas al si la vojon tra la arbustofolioj. Ŝi sin direktas al la korto de la domo de patrino Saŭ, dirante al si en la pensoj, ke ŝi devas supreniri al la ĉambro kaj estingi tiun lampeton por iom ŝpari la fiŝograson. Alveninte al la piedo de la ŝtuparo, ŝi etendas siajn manojn kaj blinde palpas ĝin, kvazaŭ ŝi volus serĉi ion perditan. Kaj ŝi denove faras tiun saman movon, antaŭ kiam ŝi metas sian piedon sur novan ŝtupon. Nur post longa momento, ŝi sukcesas atingi la domplankon kaj la malfermitan enirpordon. Ŝi rigardas internen. Sur la altaro, la flamo de la lampeto ĉiam flagradas. Subite, ŝi rondigas siajn okulojn kaj eligas teruran krion, kiam ŝi ekvidas brile nigran hartufon pendi malsupren apud

---

* *A Rat* : infera dio de la venĝo.

la lampeto. Etendante ambaŭ brakojn en direkto al tiu hartufo, ŝi retropaŝas poste kure malsupreniras la ŝtuparon. Ŝi havas tian senton, kvazaŭ denove ŝian korpon peze surtretus tiuj soldataj ŝuoj. Ŝia spirado subite haltas kaj ŝi tuj subfleksiĝas ĉe la lasta ŝtupo.

Ĉirkaŭ noktomeze, reveninte de la enteriga ceremonio, patrino Saŭ kaj kelkaj vilaĝaninoj tute miras vidante sinjorinon Ka Soi sterniĝi ĉe la piedo de la ŝtuparo. Oni tuj transportas ŝin en la domon, demetas ŝiajn vestojn kaj donas al ŝi la unuajn resanigajn prizorgojn. Patrino Saŭ senvorte direktas sian rigardon al ŝiaj blondaj kapharoj, poste forturnas sian kapon. Ŝi sidas iun momenton pripenseme, streĉe kunpremante la lipojn. Subite, ŝi ekleviĝas kaj iras al la kuirejo. Post kelkaj minutoj, ŝi revenas, tenante en la mano unu firman tuberon de zingibro, kiun ŝi transdonas baldaŭ al onklino Hai Thep.

Prenante la zingibron, tiu lasta ekrimarkas per preterfluganta rigardo larmogutojn, kiuj brilas ĉe ŝiaj okulanguloj. Sed, la maljuna patrino ĉiam mordas la lipon, dirante neniun vorton. Onklino Hai Thep dentopistas la tuberon de zingibro, per kiu ŝi forte frotas la dorson de sinjorino Ka Soi. Poste, per sia kombilo, ŝi brue skrapas ĝin, dum onklino Ba U tiras ŝiajn kapharojn. Baldaŭ aŭdiĝas la malfortaj ĝemoj de la maljunulino.

Tiel, ŝi estas savita.

Rekonsciiĝinte, sinjorino Ka Soi rememoras ĉiujn okazintaĵojn kaj, ekvidante patrinon Saŭ, ŝi tuj saltas de la *lito* sur la plankon kaj genufleksas ĉe ŝiaj piedoj. Tiam, ploregante, ŝi lamentas :

— Sinjorino Saŭ, mortigu min! Prenu trancĉilegon kaj fortrancu mian kapon!...

Patrino Saŭ, tute konfuzita, restas senvorte. Poste, ŝi ankaŭ ploras.

Onklino Hai Thep prove starigas sinjorinon Ka Soi kaj, subtenante ŝin sub la brakoj, diras:

— Sinjorino Saŭ ne mortigas vin... Ne plu genufleksu antaŭ ŝi kaj ne plu ploru! Sinjorino Saŭ kaj la vilaĝanaro malamas nur la kanajlon Xam, la klikon Usono-Dziem kaj ne vin.

— Mi devas mortigi la kanajlon Xam! — Kriegas sinjorino Ka Soi, saltleviĝante. Ŝiaj nigraj fingroj kuntiriĝas. Per rondigitaj okuloj, ŝi rigardas al la enirpordo. Onklino Ba U sin turnas al ŝi:

— Nun, mi revenigas vin hejmen, ĉu ne?

— Mi, mi povas mem iri!

— Ne, mi iras kun vi...

Ĉe tiuj vortoj, onklino Ba U ekprenas la manon de sinjorino Ka Soi kaj forkondukas ŝin de la domo.

Post iom da vojiro, ili renkontas la junan Ka My, kiu ankaŭ timoplene kuras serĉi sian patrinon.

— Ka My, revenigu hejmen vian panjon. — Diras onklino Ba U. — Atentu! Ŝi ĵus svene falis.

Ka My kaj ŝia patrino atingas sian hejmon, ĝuste kiam aŭdiĝas la kokerikoj en la vilaĝeto. Sed, Ka My scias, ke estas ankoraŭ malluma nokto. Ja, vekiĝante el sia dormo kaj ektrovante la lunhelon, la kokoj kredas, ke jam mateniĝas kaj pro tio, ili vete kokerikas.

Kuŝiginte sian patrinon sur la lito, Ka My eksidas sur la teron mem kun dorso apogita al la litpiedo. Ŝi

krucigas ambaŭ siajn brakojn sur la genuoj kaj malle-vante sian kapon, pensas pri Su, pri la ĵus okazinta renkontiĝo kun la gerilanoj en la kaverno. Subite, ŝi kvazaŭ sufokiĝas pro malamo kaj kolero kontraŭ sia frato Xam. Ŝia sufero ne havas saman gradon, kiel tiu de ŝia patrino. Ŝi sentas grandan koleron kontraŭ Xam kaj neesprimeblan kompaton al Su. Post la morto de tiu lasta, ŝi trovas sin pli preta fervore plenumi ian ajn taskon por helpi la batalantojn en la kaverno, por venĝi franjon Su kaj samfoje por repagi tiom da kulpoj, kiujn ŝia kruelega frato jam semis sur tiun teron.

Ka My sidas tie, trankvile, ĝis la lunsubiro. La kokoj jam anoncas la veran mateniĝon per siaj bruaj kokerikoj. Ŝi ekleviĝas kaj iras al la domo de onklino Hai Thep.

Ka My apenaŭ eliris el sia hejmo, kiam venas Xam, akompanate de etstatura korpogardisto, kun malice vigla okulparo. Estas do duafoje, ke Xam revenas hejmen por viziti sian patrinon. Li portas ĉiam ĉe la kapo unu kasketon kun tri pendantaj kontraŭsunaj ŝirmiloj. Sub la tola viziero, kiu kovras preskaŭ lian denaske malaltan frunton, klarvidebliĝas nur paro da blankaj okuloj. Li marŝas, klinante iom flanken sian senmovan maldekstran ŝultron. La etstatura soldato antaŭiras lin kaj penetras en la domon, dum lia estro haltas meze de l' korto. Ankoraŭ ne komplete mateniĝas. Xam eklevas sian kapon por rigardi al la akvovazego poste al la ĉiuflanke malfermita ĉambro. Li strecas siajn orelojn por aŭskulti la venton, kiu brue skuas la tegmenton el sekaj palmoj. Antaŭ li, verdas fazeolplantoj kun maldensaj folioj, sur kiuj ankoraŭ brilas rosgutoj kaj de tempo al tempo, senbrue falas

sur la teron la blankaj petaloj de iliaj floroj. Subite Xam eksentas la iom naŭzan ŝlimodoron, eliĝantan el ĵus senakvigita lageto, kiu troviĝas ie proksime de la domo. Ĉio ĉi tio, de la vento, kiu skuas la domtegmenton ĝis la petaloj, kiuj falas en la finiĝonta nokto kaj la kutima odoro de koto, kvazaŭ rememorigas al tiu kruelega «commando»-estro lian pasintan junaĝon. Starante sur tiu dezerta korto en la domo de sia patrino, li kvazaŭ komencas retrovi en sia koro la kutimajn sentojn de l'homo. Sed, ne povante rigardi longatempe tiun scenon, li abrupte turnas sin sur la kalkanoj kaj eniras en la domon. Sinjorino Ka Soi jam vekiĝas, ŝi sidas sur la lito kun piedoj pendantaj malsupren sur la tero. Ŝi ja estas informita de la korpogardisto pri la alveno de sia filo.

Xam iras tien kaj reen en la domo. Baldaŭ, li haltas antaŭ sinjorino Ka Soi kaj demandas:

— Ĉu ili dolorige frapis vin, panjo?

La maljuna patrino ne respondas.

Xam denove iras tien kaj reen, lia maldekstra brako restas ĉiam rigida.

— Kaj kio instigis vin sekvi tiujn virinaĉojn de Hon Dat? Se tiam vi ne troviĝus tie, mi estus ordoninta al miaj soldatoj pafi kontraŭ ili ĉiuj.

Starante meze de l'ĉambro, nun tute hela, li levas sian dekstran brakon por subteni la alian vunditan kaj kolere diras:

— Tiu aĉulino Su havis vere duran kolon. Tri tranĉilbatoj ne sufiĉis por fortranĉi ŝian kapon. Stulta virinaĉo, kiu jam sekvis la Vjetkongojn por esti tiel terure ekzekutita! Ŝia patrino, jam blankhara, estis

same obstinega... Malgraŭ mia insista peto, ŝi ne volis konsili sian filinon... Nu, ĉu vi scias, panjo, ke la tuta bandaĉo, kiu rifuĝas en la kaverno baldaŭ pereos. Sen rizo, sen trinkakvo..., ili nepre ne povus elteni! Baldaŭ, kiam sekiĝos la roso, mi ordonos al la soldatoj bruligi la kavernon per pajlo miksita kun papriko. Ili ĉiuj senescepte devus eliri.

Aŭskultante sian filon, sinjorino Ka Soi ĉiam silentas. De tempo al tempo, ŝi ĵetas sur lin preterflugantan rigardon, kiu estas, ĉi matene, aparte timiga; tra ŝiaj okulbriloj aperas samfoje flegmo kaj naiveco.

— Panjo, kie estas Ka My ? — Neatendite, demandas Xam.

— Ŝi iris al najbara vilaĝeto.

Xam eksidas sur la lignoliton ĉe la mezo de la domo, poste sterniĝas sur ĝi. Li rigardas iun momenton al la supro de la tegmento, antaŭ ol subite leviĝi :

— Ĉi foje, post ekstermo de la Vjetkongoj, mi instalas mian postenon ĉi tie. Ĉiujn rizejojn kaj ĝardenojn de paĉjo mi reprenos. Kiuj faris siajn kulturojn sur tiuj rizejoj aŭ ĝardenoj, tiuj pagos respektive rizon aŭ monon, kiel impostojn. Kiuj jam de kelkaj jaroj pruntepreniis rizon aŭ monon, tiuj devos senmanke repagi siajn ŝuldojn.

Sinjorino Ka Soi restas iun momenton senvorte, antaŭ ol demandi :

— Xam, vi diris, ke baldaŭ vi starigos vian postenon ĉi tie. Ĉu tio estas certa ?

La kanajlo kuntiras siajn krurojn, poste abrupte ekstaras :

— Tute certa! Mi nepre instalos mian postenon kaj rekonstruos pli komfortan domon. Panjo kaj Ka My povos resti senfare, ne bezonante penadi por modli kuirvazon. De tempo al tempo, mi veturigos vin ambaŭ al Rach Gia kaj tie, mia edzino aĉetos al Ka My multajn belajn vestojn. Ha, Ka My certe plaĉus al ĉies okuloj, se ŝi estus bele vestita!

— Oni vidos tion poste! — Diras sinjorino Ka Soi kun la plej natura tono.

Poste, ŝi descendas de la lito, iras al la kokejo kaj prenas el ĝi du kokinojn, kiujn ŝi ŝnurligas, antaŭ ol ĵetbilin ĉe la mezo de la domo:

— Xam, vi kaj via soldato restu ĉi tie por manĝi kun mi.

— Bone, bone!

Kun plivideble gaja mieno, Xam demetas sian kasketon kaj ĵetas ĝin sur la lignoliton. Poste, delikate frapetante ambaŭ kokinojn per sia ŝuo, li aprobe diras: «Kiel grasdikaj kokinoj!», kaj plenkontente prenas el sia monujo unu bileton de ducent piastroj, kiun li pasigas al sia korpogardisto:

— Hai Njo, iru aĉeti brandon kaj vidu, ĉu en la restoracio estas io manĝebla. Vi povas aĉeti ankoraŭ tion, laŭ via bontrovo.

Hai Njo obeeme prenas la monbileton, dum Xam demetas de sia kokso la ladbotelon, kiun li pasigas baldaŭ al la soldato, rekomendante, ke necese estas aĉeti du ladbotelojn da alkoholaĵo, ĉar unu ne sufiĉas. Hai Njo tuj foriras. Apenaŭ transpasante la sojlon de la domo, li ekmemoras pri sia pafilo kuŝanta sur la

lito kaj returne iras kun la intenco repreni la armilon. Sed Xam jam svingas sian brakon:

— Vi nur iru kaj lasu ĉi tie vian pafilon! Mi gardas ĝin por vi. Ĉu la Vjetkongoj povus elŝteliĝi el sia kaverno por veni ĝis tiu loko kaj rabi al vi la pafilon?

Post la foriro de Hai Njo, Xam restas ĉiam en sia ĝoja eksciteco. Sendube, dum tiuj lastaj tagoj, neniam li estas tiel ĝoja.

Sinjorino Ka Soi faras fajron kaj instalas unu argilan kuirpoton sur la fajrujon por boligi akvon.

— En tiu Hon Dat-regiono,—diras Xam,—ĉiu ajn ilo estas farita el tero, tre maloportuna! Oni baldaŭ aĉetos kuirilojn el aluminio por prepari la manĝaĵojn. Nun, en Rach Gia, oni ne plu uzas tiun argilan kuirpoton.

Sinjorino Ka Soi prenas sian trančilon kaj sin pretigas por buĉi la kokinon, kiam ŝi aŭdas tiun parolon de sia filo. Ŝi haltas kaj rigardas malsupren. Ŝi forigas ankoraŭ kelkajn plumetojn ĉe ĝia kolo, poste prempuŝas la trančilklingon sur ĝin. La kokino palpebrumante aŭdigas raŭkan blekon en sia gorĝo. La sango ŝprucas el ĝia kolo kaj fluas sur bovlon kuŝantan sur la tero. Kaŭre sidiĝanta apud sia patrino, Xam pretervole murmuras:

— Tio tre similas al la sango, kiu hieraŭ fluis el la kolo de Su.

Ĉi foje, sinjorino Ka Soi ektremas kaj volaŝ malteni la trančilon. Ŝia koro dolore kunpremiĝas, sed ŝi provpenas regi sian emocion kaj sukcesas buĉi la duan kokinon. Siaflanke, Xam estas ĉiam ĝoja. Li helpas la maljunan patrinon senplumigi la kokinojn. Senvorte, tiu lasta sin fordonas al sia kulinara laboro. Ŝi kuiras

unu kokinon kun kokoslakto kaj rostas la alian kun salo. Ambaŭ manĝaĵojn tre ŝatas la Kmer-anoj. Ŝi sola zorgas pri du kuirfornoj. Sur unu el ili, ŝi metas poton, ĝisrande plenan je kokoslakto kaj sur la alian, stufmarmiton el argilo, entenantan salon kaj unu bambuplektaĵon, ĉe la fundo. Kiam komplete fandiĝas la salo, ŝi metas la jam sekigitan kokinon sur la bambuplektaĵon, poste hermetike fermas la stufmarmiton per fermoplato. Ŝi atente observas ambaŭ kuirfornojn, jen rigardante al la ŝaŭme bolanta kokoslakto, jen aŭskultante la kraketadon de la salo. Eble, neniam en sia vivo, sinjorino Ka Soi tiel zorgeme preparas la manĝon, kiel ĉi matene.

Iun momenton poste, kiam Hai Njo revenas kun ambaŭ ladboteloj da brando, la kokinoj estas finpreparitaj: unu, longe kuirita, grasdike ŝvelas kaj la alia, stufe rostita, havas tute sekan haŭton.

Sinjorino Ka Soi disŝiras la kokinkarnon, kiun ŝi konservas en du teleroj, poste preparas salaton el hakitaj bananfloroj, spicitaj per salo kaj papriko. Baldaŭ, ĉiuj manĝaĵoj estas pretaj; la maljuna patrino ordometas ilin sur malnovan kaj kadukan lignopleton, antaŭ ol instali la tuton sur la liton, ĉe la mezo de la domo.

Sinjorino Ka Soi malmulte manĝas; male, ŝi prenas brandon, glason post glaso, kaj devigas la kanajlon Xam kaj lian korpogardiston ankaŭ trinki kun ŝi. Hodiaŭ, estas unuafoje, ke ŝi manĝas kune kun sia filo. Xam kaj Hai Njo brue glutas la brandon kaj avide manĝas la kokinaĵojn. Baldaŭ, elĉerpiĝas la tuta alkoholaĵo el ambaŭ ladboteloj, sed el la kokinaĵoj restas ankoraŭ pli ol duono.

— Ni rezervu tion al Ka My, — diras sinjorino Ka Soi. Tuj post la mangxo, Hai Njo, serĉas lokon por dormi. Siaflanke, Xam sidas ankoraŭ iun momenton por diri kelkajn sensencajn vortojn, antaŭ ol falsterniĝi sur la liton, surŝovante sian kasketon sur la vizaĝon. Baldaŭ, aŭdiĝas lia brua ronkado.

... Nun, sinjorino Ka Soi jam staras tuj apud la ligxolito, sur kiu dormas Xam. Ŝi tenas en sia dekstra mano la tranĉilon kaj, per la alia, konvulsie tremetanta, ŝi delikate ŝovas la kasketon sur lia vizaĝo. Liaj okuloj estas ĉiam fermitaj kaj lia vizaĝhaŭto brilas kvazaŭ ŝmirita per oleo. Iam antaŭe, tiun vizaĝon ŝi ameme premis sur sia brusto por kovri ĝin per kisoj. Tiu paro da lipoj algluiĝis al ŝia mamo por brue elsuĉi lakton. Nun, tiu vizaĝo jam komplete ŝanĝiĝas. Tiam, li estis ankoraŭ bebo. Sed nun, li estas tiu «commando»-o, kiu pli ol unufoje tratranĉis la ventron al siaj sampatrujanoj por eltiri kaj manĝi ilian hepaton. Tiam, li estis tiel naiva. Sed nun, li scias uzi ĉiujn perfidajn manovrojn por restarigi novan konstruaĵon, ĝuste sur la fundamentoj de sia patra domo, kiun la kamparanoj jam elrazis dum la agrara revolucio. Li senkompate tranĉis la kapon de tiu vilaĝanino, al kiu lia patrino ankoraŭ ne povas pagi sian dankŝuldon kaj cinike diris, ke la sango de la buĉita kokino similas al tiu, kiu *fluis el la* kolo de la martirigita virino.

Li ja bone scias, ke lia patrino devenis de familio, kiu povis vivteni sin nur per fabrikado de argilaj marmitoj, tamen nun, li malestime plendas, ke tiuj argilaj marmitoj estas senvaloraj, kompare kun la kuirpotoj el aluminio. *Li* ne bezonas scii, ke nur dank'al tiuj argilaj marmitoj, la malriĉuloj, kiel lia patrino povas

kuiri sian rizon kaj nur dank'al tiuj argilaj marmitoj, oni povas distili tiun bongustan brandon, kiun li tiom ŝatas.

Malgraŭ ĉio, iafoje, li ankoraŭ pensis pri sia patrino kaj pri sia fratino. Kvankam sensignifa, tio tamen jam hezitigis sinjorinon Ka Soi, kiu trifoje levis, poste malrapide mallevis sian trancilon.

Sed, tiu unika ŝanco, kiu ebligus evitigi al Xam la morton estas ankaŭ nefirma, ĉar liaj monstraj krimoj superas ĉion, vualas ĉion, kaj ne permesas al la malju-na patrino rekoni lin, kiel sian filon. Tial, post tiuj minutoj de ĥezito, sinjorino Ka Soi ĵetas sian tran-ĉilon en iun domangulon kaj kuras eksteren. Longan momenton poste, kiam Xam kaj lia korpogardisto an-koraŭ profunde dormas, du homsiluetoj penetras en la domon per iu malantaŭa pordo. Ili estas du gerilanoj sekrete agadantaj ekster la vilaĝeto. Unu gardostaras ĉe la enirpordo kun grenado en la mano, dum svin-gante sian larĝklingan tranĉilegon, la alia impete sin direktas al la loko, kie kuŝas Xam.

Tiel la kanajlo Xam mortas sub la abrupta kaj peza bato de tiu tranĉilego. Lia fortranĉita kapo ĵetiĝas duonspanon malproksime de la kolo, el kiu ŝprucas freŝa sango. Aŭdante bruon, Hai Njo ektremas kaj saltleviĝas. Li ankoraŭ ne havas la tempon preni sian pafilon, kiam la gerilano faligas lin sur la liton per nova tranĉilbato. Ĉi foje, la tranĉvundo iras de sub la mentono ĝis la orelkonko de tiu malfeliĉa soldato. La larĝa klingo sin kroĉas al la vundo tiel firme, ke la gerilano devas perdi iom da tempo por povi retiri ĝin el la kolo.

5

La tagmeza suno ĵetas sian brulvarmajn radiojn rekte de la zenito sur la supron de l'kokosujoj. Lumstrioj desegniĝas sur longaj vicoj da pajlamasoj, kolektitaj en la ĝardeno. Tute apude, kuŝas, unu sur alia, kelkaj tolsakoj plenaj je pulvorigita papriko kaj kalkopulvoro, kiujn la malamikaj soldatoj ĵus transportis de la torento.

Trovante, ke post longa atendado, ne revenas la leŭtenanto Xam, la subleŭtenanto Ba ordonas al siaj soldatoj porti pajlon sur la kapo kaj, per du aloj, veni al ambaŭ flankoj de la kaverna faŭko. Oni ne povas sin deteni de ridoj, vidante tiujn soldatojn transporti sur la kapo la pajloŝargĝon. Kiel ŝtelistoj, ili iras kalkulante siajn paŝojn malgraŭ, ke du plenŝargitaj maŝinpafiloj, instalitaj en la ĝardeno, havas sian faŭkon ĉiam direktitan al la kaverno. La soldatoj unuvice iras pli malproksimen. Kiam ili penetras en lokon, kie la altaj herboj atingas iliajn ŝultrojn, vidiĝas nur pajlamasoj, kiuj puŝpelante unu la alian glitas sur la herbopintoj.

Alveninte al ambaŭ flankoj de la kaverna faŭko, ili ĵetas de sia kapo la pajlon, kiu formas longajn amasojn, brile flavajn sur la tero. Tiuj, kiuj dorsoportas sakojn da pulvorigita papriko kaj kalkopulvoro, jam iras la duonon de sia vojo. Fine, la subleŭtenanto ordonas al kelkaj soldatoj sin ĵeti antaŭen kun longaj kaj helflavaj bambustangoj. (Tiujn bambuojn ili dehakis tiun matenon, en la vilaĝa bambuaro. La vilaĝanoj jam venis al la majoro por brue protesti kontraŭ tiu arbitra

ago. Nur kiam tiu lasta konsentis pagi kompensmonon, tiuj soldatoj estis permesitaj forporti la bambuon).

La subleŭtenanto Ba baldaŭ atingas la kavernan faŭkon. Unuflanke, li sendas unu el siaj soldatoj al la vilaĝeto por serĉi la leŭtenanton Xam kaj aliflanke, li ordonas al la ceteraj trancĥfendi la sakojn da pulvorigita papriko kaj kalkopulvoro kaj surŝuti per tiuj substancoj ĉiujn pajlamasojn, antaŭ ol puŝi tiujn lastajn al la kaverna faŭko per longaj bambustangoj. Tuj aŭdiĝas furiozaj pafoj de interne de la kaverno. Trafita de brulvarmaj kugloj, la seka pajlo ekflamas. Ekvidante tion, la subleŭtenanto, kiu ĝis tiam sternigas sur la herbejo eksplodas per ridoj. Li febre piedbatas la aeron, kriegante :

— Tre bone, tre bone ! Ili helpas nin ekbruligi fajron ! Puŝu, ankoraŭ puŝu la pajlon en la kavernon !

La soldatoj fervorege puŝas la pajlamasojn per siaj bambustangoj. Baldaŭ la kaverna faŭko estas preskaŭ plenŝtopita de seka pajlo, kiu tuj furioze brulas sub la arda tagmeza suno.

Tiam, en la kaverno ĉesiĝas ĉiuj pafbruoj. Ekstere, la soldatoj plue puŝas la pajlamasojn al la kaverna faŭko, dum la subleŭtenanto ĉiam sterniĝas sur la herbejo.Laŭ lia ordono, la mitralpafantoj kuŝantaj apud li kun fingro sur la pafrisorto estas pretaj pafĵeti siajn kuglojn al la kaverna faŭko, se iu troriskemulo elŝoviĝas el ĝi. Skuetante ambaŭ piedojn en la aero, li plenkontente diras :

— Fi ! Ĉu ili povas elteni tiun fumon de papriko ! Eĉ la musoj devas elrampi el siaj truoj ! Se iu kanajlo elirus, vi tuj paffaligu lin !

Kunpremante siajn lipojn, atendas la mitralpafantoj. Sed ili vidas neniun, krom la soldatoj, kiuj senorde staras apud la kaverna faŭko. Subite, tiuj lastaj kuras returne.

— Pro kio vi kuras ? — Krie demandas la subleŭtenanto.

La soldatoj ne respondas. Ĉiuj premas sian bruston per ambaŭ manoj kaj brue tusante forkuras. Griza fumnubo, eliĝanta el la brulantaj pajlamasoj kaj forblovata de la vento, kiu venas de interne de la kaverno, nun kirle disvastiĝas ambaŭflanke de la kaverna faŭko kaj la neeltenebla odoro de papriko kaj kalkopulvoro sufokas la soldatojn, kiuj staras proksime de tie. Larmoj kaj nazmuko inundas ilian vizaĝon. Kelkaj ŝanceliĝas kaj falas ; la pika fumo de papriko kaŭzas al ili akran kapdoloron. Aliaj ne povas malfermi siajn okulojn kaj palpe iras, kiel blinduloj.

Tute kolera, la subleŭtenanto Ba ekleviĝas kaj alkuras. Lian vizaĝon ankaŭ trafas tiu fumo ; li tusas kaj devas returne iri. La griza fumnubo konstante algluiĝas al ambaŭ murvandoj de la kaverna faŭko. Ŝajnas, ke en tiu profunda loko, iu estas forpuŝanta eksteren la aeron per ventolilo. Sed, reale, neniu ventolas. La malamiko, tro idiota, ne scias, ke la kaverno kun sia propra volumeno da aero ne povas plu ricevi ian ajn kvanton da fumo de ekstere.

Tiun matenon, kiam la soldatoj iris rabi la pajlon en la vilaĝeto kaj malsekretigis sian fiintencon, pluraj vilaĝanoj jam kaŝe ridis.

— Tiujn kelkajn pajlotrunketojn mi tute ne domaĝas, — diris al ili sinjoro Tu Deŭn, — sed mi opinias,

ke estus vana tempoperdo, se vi uzus pajlon por sufoki la Vjetkongojn per ĝia fumo.

— Vana tempoperdo! Pro kio?

— Estas neeble enblovi la fumon en la kavernon!

Iu soldato intervenis:

— Sufiĉe! Forportu la pajlon, knabegoj! Ni ne havas tempon por babili kun tiu maljuna blindulo. Kiel li povas kompreni tiun batalaferon?

Ili tute ne atendis, ke sinjoro Tu Deŭn antaŭsciis la malsukceson de ilia entrepreno. Estas do neeble enblovi la fumon en la kavernon.

Nun, la dirajo de tiu blindulo estas pravigita: la fumo estas forblovata ĉiam returnen. Kun duone malfermitaj okuloj, la subleŭtenanto diras al siaj soldatoj:

— Tio estas neebla! Prenu viajn bambustangojn kaj puŝu tiujn pajlamasojn ankoraŭ pli profunden en la kavernon!

Kun bambustango ĉe la manoj, tri, kvar soldatoj etpaŝe proksimiĝas al la kaverna faŭko, provpenante eviti la fumon, kiu konstante minacas frapiĝi kontraŭ ilia vizaĝo. Ili staras tie iun momenton, perpleksaj, poste riskoplene sin ĵetas en la faŭkon, seninterrompe puŝante pli internen la brulantan pajlon per siaj bambustangoj. Sed, ĉi foje, elreviĝas la subleŭtenanto kaj lia tuta bandaĉo. La griza fumo konstante kaj forte eliĝas el la kaverna faŭko per densaj nuboj. Iu soldato frotante siajn okulojn grumblas:

— Ja, tute pravas la maljuna blindulo de la vilaĝeto! La fumo ne eniras... Vana tempoperdo! Mia subleŭtenanto, tio ne glate iras. Plej bone estas, se ni

nin turnas al aliaj rimedoj. Oni ne devas longeresti ĉi tie...

— Vi pravas ! — Diras alia soldato. — Estas tute danĝere resti ĉi tie. Se ili abrupte elirus el la kaverno, ni ne havus la tempon elturniĝi !

Tre kolera, la subleŭtenanto kriegas :

— Danĝere aŭ ne, tute egale !... Se ili elirus, ni ĝismorte batalus kontraŭ ili. Ni ne retiriĝu !

Poste, li scias fari nenion, krom insulti ĉiujn. Kaj, ĝuste kiam li freneziĝas pro kolero, de la kokosĝardeno grandpaŝe venas soldato kun tute maltrankvila mieno. Li estas tiu, kiun la subleŭtenanto Ba antaŭmomente sendis por serĉi la « commando »-estron Xam en la vilaĝeto.

— La leŭ... tenanto jam... estas... murdita ! — Haktone diras la soldato, kies vizaĝo estas pala, kiel tolo.

La subleŭtenanto, tute emociita, ankoraŭ ne havas la tempon starigi demandon al la soldato, kiam tiu lasta daŭrigas anhelante :

— Ankaŭ Hai Njo estas murdita... Oni mortigis ambaŭ per trančilego. La leŭtenanto estas senkapigita. Terure ! Lia sango plenkovras la liton, kie li kuŝas...

— Kiu mortigis ilin ? Ĉu oni jam arestis la krimulon ? Kaj kie okazis tiu murdo ?

— Ĝuste ĉe la patrino de la leŭtenanto ! Mi ne scias, kiu estas la krimulo. Enirante en la domon, mi trovas neniun, krom ambaŭ kadavroj kuŝantaj sur la lito, kun kolo plenkovrita de muŝoj !

— Dio gardu ! La Vjetkongoj en la vilaĝeto komencas sin turni al murdo !

— Mi suspektas...! -- La vizaĝo de la subleŭtenanto Ba subite paliĝas. Li denove demandas :

— Ĉu vi jam raportis tion al la majoro ?

— Jam, — respondas la soldato, — mi jam kure venis al li por raporto.

— Kion li diris ?

— Tiam li estis trinkanta brandon ; la glaseto jam glitis el lia mano kaj disrompiĝis...

La subleŭtenanto Ba ne faras plian demandon. Li tuj ordonas la retiriĝon. La soldatoj forĵetas ĉiujn bambustangojn, preteratentante la ankoraŭ brue brulantajn pajlamasojn. La tuta trupo retiriĝas al senarba terspaco. Ĉiuj senescepte perdas kuraĝon, ricevante tiun teruran novaĵon. Estas unuafoje, ke tiuj «commando»-oj ektremas kaj pleje maltrankviliĝas pri sia sorto.

Jam de kelka tempo, Xam inspiris al ili tiun blindan kaj ekscesan fidon al sia kapableco. Ili ĉiam kredis, ke ili povus venki en iu ajn batalo, se ili havus la kanajlon Xam ĉe siaj flankoj. Ili kredis, ke akompananta lin en batalo, ili povus mortigi siajn kontraŭulojn kaj, ke neniam tiuj lastaj povus vundi ilin. Jam de kelka tempo, Xam estis tiu homo, kies admonvoĉoj facile puŝis ilin al krimoj. Kiam estis malkovrita unu silueto de revolucia aktivulo sur iu akva kampo, li tuj alkuris rapide, kiel ĉevalo kaj ordonis al siaj helpantoj persekuti lin ĝis la fino, eĉ se la akvo atingis ĝis la genuoj aŭ la aktivulo troviĝis tri, kvar kilometrojn malproksime. Dum specialaj surprizatakoj, li ofte vekis siajn soldatojn meze de l'pluva nokto kaj

opiniis, ke nur tiam oni povis sukcesplene batali kontraŭ la Vjetkongoj. Komence, kiam liaj subalternuloj ankoraŭ heziteme ne aŭdacis mangi homan karnon, Xam tuj prenis el gi unu pecon kaj avide maĉante gin senĉese diris, ke en tiu ĉi mondo, neniu viando estas pli bongusta, ol tiu homa karno. Escepte sian patrinon kaj sian fratinon, li povis seksatenci iun ajn virinon. Post la seksatenco, li ankoraŭ mordis sian mamon, sucis sian sangon kaj diris, ke la virina sango estas pli nutra, ol la vira.

Tia estas la kanajlo Xam! Kaj guste pro tio, Ngo Dinh Dziem, pupa prezidanto de Vjetnama Respubliko, jam honoras lin per la titolo heroo, inter la ses herooj de la IVa Divizio, kiu postenas nun en la Okcidenta Nam Bo. Lia roto de «commando»-oj estas komparebla kun venena serpento, kies kapo li estas. Nun, oni jus fortrancis la kapon de la serpento; tial, gia korpo, kompreneble, tuj baraktas.

Sur la vizago de la subleŭtenanto Ba jam estingigas ĉiuj arogantaj trajtoj kaj iom post iom aperas tiu paleco de l'timego. Irante de la senarba terspaco gis la rando de la kokosgardeno, li falsanceligas pli ol unufoje. Kelkaj soldatoj ankoraŭ rigardas returne al la kaverno. Hodiaŭ, ĉiuj sentas sin tre lacaj. La novajo pri la subita morto de Xam kaj la malsukcesoj en la atako kontraŭ la gerilanoj en la kaverno semas malkvilon kaj malesperon en ilian animon. Malantaŭ ili, la fajro jam konsumas ĉiujn pajlamasojn. Blanka fumo svebas gis la senarba terspaco. Subite disfalas la pajla cindro kaj aperas la supra parto de la kaverna faŭko.

La tuta bandaĉo retiriĝas kaj atingas nun la torentan bordon. La majoro jam troviĝas tie. Informite pri la malsukcesa bruligo de la kaverno, li grimacas kaj grumblante insultas.

De la hieraŭa vespero ĝis nun, li renkontas nur komplikajn kaj malagrablajn okazaĵojn. Antaŭe, la loĝantaro de Hon Dat ĉiam trankvile vivis. Sed, de post kiam li ordonis al siaj subalternuloj ekzekuti la virinon, tuj tiun vesperon, okazis pluraj bedaŭrindaĵoj, kiujn li devis alfronti. Komence, la loĝantoj organizis noktan manifestacion ; ili baldaŭ protestis kontraŭ la perforta dehakado de siaj bambuoj fare de liaj soldatoj kaj postulis de li kompensmonon. Poste, la kanajlo Xam estis senkapigita kaj lia plano de bruligo de la kaverno komplete bankrotis...

La majoro grumblante insultas... poste sin turnas al la subleŭtenanto Ba :

— Se ni ne sukcesas enblovi la fumon en ilian kavernon, ni ŝtopos ĝian faŭkon. Pri la murdo de la leŭtenanto Xam kaj de lia korpogardisto Hai Njo, mi tre suspektas tiun virinaĉon Dang Tho*... Laŭdire, ŝi estas freneza...

— Mia majoro, mi ankaŭ havas saman suspekton. Ja, neniu eniris tien... Tiu maljunulino havas vere teruran aspekton. Ni devas aresti ŝin.

— Ŝi jam forkuras. Ĝis nun, niaj soldatoj vane serĉadas ŝin ĉie en la vilaĝeto. Mi ordonis al ili aresti la fratinon de la leŭtenanto Xam por pridemando, sed la vilaĝanoj energie kontraŭstaris kaj retenis ŝin...

---

* Dang Tho : fivorto uzita por nomi la Kmer-anon.

— Mia majoro, la ĉitieaj loĝantoj, — ĉiuj senescepte, — ĉiam mienas, kiel malparolemaj obstineguloj. Necese estas tratranĉi la ventron al kelkaj kanajloj por teruri ilin!

La majoro ne respondas; eklevante sian brile nigran brakon por rigardi sian horloĝon, li diras:

— Estas preskaŭ la dua posttagmeze. Nun, vi sendu viajn soldatojn por enterigi la kadavrojn de ambaŭ homoj. Mi devas iri al la lernejo por vidi, kiel statas niaj vunditaj soldatoj. Oni diras al mi, ke ili terure ĝemplendas. Fi! Mi jam radiofonie vokas ĝis komplete raŭkiĝas mia voĉo; tamen neniu helikoptero venas. Ĉu ili ĉiuj estas paffaligitaj de la Vjetkongoj?...

Ĉe tiuj vortoj, la majoro turnas sin sur la kalkanoj kaj vokas kelkajn soldatojn eskorti lin al la vilaĝo.

... En tiu lernejo, kies tablojn kaj benkojn senorde ĵetis sur la korton liaj trupoj, tuj la unuan tagon, kiam ili venis ĉi tien, la majoro troviĝas antaŭ terura spektaklo. Sur ŝirmotukegoj etenditaj sur la tero mem, kunpremiĝe sterniĝas la vunditaj soldatoj kun malpure nigra kaj malbonodora korpo plenkovrita per blankaj bandaĝoj kaj, kies brakoj kaj kruroj ĉiam moviĝetas jen dekstren jen maldekstren. Ĉie, vidiĝas pecoj da kotono sorbigita de malhele ruĝa sango kaj pendantaj pansbendoj, malpure makulitaj de sango kaj koto. La vunditoj sencese insultas kaj ĝemas diversmaniere, laŭ la graveco de siaj vundoj. Unuj plorkrias, kiel infanoj, dum aliaj klakas per la lango aŭ eligas longajn ĝemspirojn. Kelkaj anhelas aŭ aŭdigas el sia gorĝo obtuzajn voĉbruojn, kvazaŭ ilin trafas terursonĝo.

Ĉi tie restas nur la gravaj vunditoj. La malgravaj, espereble ankoraŭ batalpretaj, estas jam evakuitaj, hieraŭ tagmeze, per helikopteroj kune kun la kadavro de la Jankio.

La majoro kuntiras siajn brovojn antaŭ tiuj baraktantaj korpoj, kiuj senĉese ĝemas kaj insultas. Kelkaj vunditoj, kuŝantaj en la korto, — oni ne scias, ĉu ili vidas sian majoron, kiu staras tie, — ĉiam krie nomas lin por insulti. Aŭskultinte iun momenton tiujn ofendajn parolojn, la oficiro sentas varmon ĉe la vizaĝo kaj diras al siaj eskortantoj :

— Diru al tiuj kanajloj, ke ili fermu sian buŝaĉon, alie, mi donos al ili unu pafaron !

Unu el la soldatoj impete kuras al tiuj vunditoj kaj minacas :

— Silentu ! Pro kio vi tiel kriegas ? La majoro ne hezitos pafmortigi vin ĉiujn !

— Fi al li ! Kie estas la majoro ? Kie estas la majoro ?

La vunditoj pli furioze insultas, poste rampas al la enirpordo, provpenante kapti la piedon de tiu, kiu ĵus alparolis ilin. Terurite, la soldato retiras sian piedon kaj retropaŝas. Plengorĝe kriegante, ili lame sin trenas ĝis la flanka pordo de la lernejo kaj direktas siajn insultajn parolojn al la majoro, — kiu homo jam sendis ilin al morto, for de iliaj edzino kaj infanoj. La majoro staras ĉiam senmove, rigardante tiujn vunditojn, kiuj sin ribele turnas al lia direkto.

— Silentu ! — Li krias. — Mi ordonas al vi silenti !

Sed tiuj lastaj ne ĉesas blasfemi kontraŭ li per koleraj vortoj. Ili ankoraŭ minace diras, ke se ili mortus, ili kunprenus lian animon al alia mondo!...

Unu longa kaj malgrasa mano de iu vundito jam etendiĝas ĝis la polvokovrita boto de la majoro. Tiu lasta tuj okulsigne ordonas al la soldato, kiu kun sia « Thompson » prete tenata en la mano gardostaras apud la pordo:

— Pafrompu al li la kranion!

La soldato eklevas sian pafilon. Sed li restas ĉiam senmove, kun malfermita buŝo kaj tremetanta fingro sur la pafrisorto. Li ne povas pafi. Siaflanke, tute senpacienca, la majoro elingigas sian « Colt 12 » kaj celdirektas ĝin al la kapo kovrita per sangruĝaj bandaĝoj. « Pam! » Aŭdiĝas seka pafbruo. La vundito tuj subfleksiĝas, dum ambaŭ liaj manoj iom post iom maltenas la boton de la majoro.

Post tiu cinika murdo, la oficiro turnas sian pistolon al la gardostaranta soldato kaj, kunpremante ambaŭ siajn makzelojn kun brile oraj dentoj, abrupte demandas:

— He, pro kio vi ne obeas al mia ordono?

La soldato ne respondas kaj pretervole, li ankaŭ celdirektas sian « Thompson »-on al sia estro. Ambaŭ kanontuboj tremetas. La majoro subite paliĝas. Li rimarkas, ke la soldato havas nun tute ruĝajn okulojn kaj firme premas en sia dekstra mano la ankoraŭ plenplenan kartoĉbendon de sia pafilo. Baldaŭ, la pistolo iom post iom malleviĝas; kaj ĵetante preterflugantan rigardon sur sian kontraŭulon, la majoro eningigas sian armilon. Dume, la « Thompson » ĉiam direktiĝas al

li. Nur post la foriro de la oficiro, la soldato mallevas sian pafilon kaj surŝultrigas ĝian rimenon.

Forlasante la lernejon, el kiu eĥe resonas senĉesaj ĝemoj kaj krioj, la majoro diras al si en la pensoj: «Mi nepre devas mortigi tiun kanajlon. Alie, li mortpafos min!»

Siaflanke, la soldato plurfoje kaŝe rigardas sian estron, pensante: «Nepre, li faros venĝon kontraŭ mi! Do, kiam mi kaptos favoran okazon, mi la unua paffaligos lin!»

Ĉirkaŭ la kvara posttagmeze, alvenas al Hon Dat aro da helikopteroj. Meze de l' muĝado de la marondoj, la motorbruo de la flugmaŝinoj estas ĉiam distingebla. Kiam aŭdiĝas la zumado de eksplodmotoroj, la loĝantoj de Hon Dat klare vidas entute ses helikopterojn, kiuj ŝvebante venas de la maro. Elinter ili, kvar apartenas al tiu tipo de dumotoraj helikopteroj, kiujn la kamparanoj ordinare nomas «raŭpoj» kaj la du aliaj, vulgare nomitaj «akvoĉerpiloj» havas nur po unu motoron. La formoj de tiuj flugmaŝinoj estas vere strangaj. Ili semas en la animon de la naiva kamparanaro tiun impreson de krimeco, samfoje cinika kaj fabela.

Sur la helblua ĉielvolbo, tiuj monstraj formoj ekaperas, moviĝetas poste proksimiĝas, minacante ĉiujn homojn. Apenaŭ transfluginte la marbordon, kontraŭ kiu impetas furiozaj ondegoj, tuj tiuj ses helikopteroj malsupren ŝvebas. La grandaj helicoj proksime de iliaj kapo kaj vosto rapide turniĝas kaj krakbruas, kvazaŭ tuj falos la flugmaŝinoj. Sed ne, ili ĉiam flugas. Kaj ili flugas tiel malalte, ke ĉiuj fruktĝardenoj komencas ekskuiĝi. Trafitaj de ventokirlo, la kokospalmoj jen

kliniĝas, jen elrektiĝas. Baldaŭ susuras kaj kvazaŭ dolore baraktas ĉiuj fruktarboj, kies folioj, ankoraŭ baniĝantaj en la brilo de l' suno, komplete turnas sian dorson supren malantaŭ la brancoj.

Peze ŝvebas tiuj monstroj super la fruktĝardenoj, kie la velurece milda verdo de l' foliaro najbaras kun la malhela bluo de la vespera maro. Ili preterflugas la senbruan Hon Dat tiam, kiam el la kaverna faŭko ankoraŭ spirale leviĝas etaj fumstrioj.

Post iom da vojiro, ili subite rondflugas kaj revenas al senarba kampo. Ĉi foje, ilia kapo kliniĝas malsupren. La motoro forte zumadas. Ili aspektas nun, kiel haste naĝantaj lojtoj kaj la helicoj sur ilia korpo, kiel vibrantaj naĝiloj. La flanka pordo de ĉiuj helikopteroj jam larĝe malfermiĝas kun prete pendanta ŝtupetaro. El iliaj fenestroj, kelkaj Jankioj elŝovas sian kapon por rigardi malsupren. Ĉiuj portas nigrajn okulvitrojn kaj havas purpuran vizaĝon.

Baldaŭ la ses helikopteroj, unu post alia, surteriĝas sur la rizkampon. La sekaj stoploj forte skuiĝas, kvazaŭ tuj elradikiĝontaj.

Kiam iliaj helicoj komencas krakbrue malakceli sian rapidecon, la soldatoj, starantaj en la ĝardeno, tuj alkuras. Du Jankioj descendas de la flugmaŝina ŝtupetaro kaj sin direktas al ili. Aŭdiĝas malklaraj ordonvocoj de ambaŭ fremduloj poste, kelkaj soldatoj kure revenas al la ĝardeno. La ceteraj proksimiĝas al la helikopteroj kaj surgrimpas iliajn ŝtupetarojn. Ili transportas el la flugmaŝinoj plurajn sakojn da cemento, kelkajn nigre lakitajn ladkestojn kaj fine unu tripiedon de kinoaparato kun grandaj laŭtparoliloj.

La subleŭtenanto de la psikologia militfako, alten levante sian vizaĝon, kure venas al tiu, kiu surŝultre portas la tripiedon. Palpante ĝin, li diras al la soldatoj:

— Mian proponon jam akceptas la superuloj. Tre bone! Nun alvenas kinoaparato kaj filmoj. Vi baldaŭ ĉeestos kinoprezentadon!

— Mia subleŭtenanto, kinon, ĉu ne?

— Jes, kinon! — Respondas la juna oficiro.

Subite, el malantaŭ lia dorso, iu soldato ĝemspiras:

— Kinoprezentadon en tia situacio! Ĉu ni havas ĝojan koron por ĝin ĉeesti?

Aŭdante tiun parolon, la subleŭtenanto pintigas sian buŝon:

— He, tion oni organizos ne por vi, sed por la Vjetkongoj kaj popolamasoj! Ĉu vi komprenas?

— Mia subleŭtenanto, pro kio oni projekcios filmojn por la Vjetkongoj kaj popolamasoj?

— Kiel naivaj vi estas! Batali kontraŭ la Vjetkongoj per armiloj ne sufiĉas; oni devas ankoraŭ uzi «psikologiajn rimedojn». Jen, mi sciigas al vi kelkajn detalojn: filmoj ellaboritaj de la Usonanoj kun tre interesa enhavo, — batalo inter unuflanke la Usonanoj kaj aliflanke la ĉinaj komunistoj kaj la Nordkoreanoj sur iu monto. La Usonanoj komplete ruinigis tiun monton kaj ekstermis ĝis la lasta homo ĉiujn Ĉinojn kaj Nordkoreanojn...

La subleŭtenanto faras paŭzon poste, fingremontrante sian propran bruston, daŭrigas:

— Tio estas mia iniciato! Mi jam petas la superulojn organizi tiun kinoprojekcion antaŭ la kaverno por skui

la batalspiriton de la Vjetkongoj. Oni kolektos tie ankaŭ la loĝantaron de Hon Dat por ĝin senkuraĝigi...

— Tre bona ideo! — Aprobe diras la soldatoj.

lu el ili tro fervore aldonas:

— Jes, ili ĉiuj certe senkuraĝiĝos, rigardante tiujn filmojn. Vere iniciatema estas nia subleŭtenanto! Ja, li tute indas respondeci pri tiu « psikologia militfako »!

Tre kontenta pri tiuj flataj paroloj, la oficiro prenas seriozan tonon:

— Tiel oni devas batali kontraŭ la Vjetkongoj. Nu, mi tamen rekomendas al vi silenton! Ne distrumpetadu tion, ĉu ne?

La soldatoj promesas observi lian ordonon, poste helpas unu la alian transporti pezajn ŝarĝojn al la ĝardeno. Duonvoje, ili renkontas kontraŭdirekte plurajn vunditojn, kiujn oni brankardas per hamakoj al la helikopteroj. Estas entute ĉirkaŭ kvindek soldatoj, kies korpo preskaŭ kaŝiĝas sub la bandaĝoj. Unuj kuŝas kuntiriĝe, kiel kankroj kaj aliaj, kun flanken kliniĝanta kapo. Sur la rizkampo prilumata de la lastaj briloj de l'subiranta suno, la soldatoj urĝpaŝe brankardas la vunditojn, kunportante sur sia trairejo fetoran odoron kaj ĝemkriojn. La hamakoj forte balanciĝas kaj senkompate skuegas tiujn dolore baraktantajn korpojn. Kelkaj brankardistoj avide manĝas plenbuŝon da «mang kaŭ» aŭ laktofruktoj, kiujn ili kolektis dumvoje en la ĝardeno. Ili montriĝas tre manĝemaj kaj havas ĉiam flegman mienon, kvazaŭ nenio grava okazas ĉirkaŭ ili. Irante la vojon de la dungosoldatoj, ili kvazaŭ jam forgesas tion, kion oni komune nomas humaneco.

Sed, malgraŭ ĉio, ili ĉiam klopodas braŭkardi siajn vunditajn kamaradojn. Siaflanke, la Jankioj, plejparte, sidas ĉiam en la surterigitaj helikopteroj, krom du el ili, kiuj jam de kelka tempo malsupreniras kaj staras nun sur la kamprando. Kun disstarigitaj kruroj, ili fumas longan cigaredon, kiun de tempo al tempo, ili elŝiras el siaj lipoj per unu mano, dum la alia estas metita sur la bruston.

Kiam alvenas la hamakoj, ambaŭ Jankioj malrapide demetas la nigrajn okulvitrojn de siaj okuloj por rigardi. Poste, ili samfoje flankeniĝas, svingante la manon antaŭ sia nazo. Tiel peze preterpasas, unu post alia, ĉiuj hamakoj kun ĝemkrioj kaj fetora odoro. De iuj el ili gutas, — oni ne scias, — sango aŭ puso aŭ alia flaveta fluaĵo. La du Jankioj forturnas la kapon, fumtiras el sia cigaredo kaj brue kraĉas sur la rizejon.

La unuaj brankardistoj jam malŝarĝas la vunditojn en la helikopterojn ; nun ili returne iras, trenante siajn pezajn ledŝuojn kaj la malplenajn hamakojn sur la stoploplena tero.

... La motoroj de la ses helikopteroj denove startas. Unue, ili obtuze zumadas, vibrigante la tutan flugmaŝinon. Poste, la motorbruo fariĝas pli forta. La ĝis tiam mallevitaj helicoj nun larĝe etendiĝas kaj komencas turniĝi. Iom post iom, ili akcelas sian rapidecon kaj fine vidiĝas nur la rebriloj de iliaj rapide turniĝantaj aloj kaj aŭdiĝas nur ilia regula kaj krakbrua zumado.

La majoro alvenas, kiam la helikopteroj sin pretigas por ekflugi. Li manpremas ambaŭ Jankiojn starantajn sur la kampo kaj babilas kun ili. Dum la interparolado, li kelkfoje kuntiras siajn brovojn ; sed liaj

interparolantoj ĉiam indiferente mienas. Unu el ili, portanta la ranginsignon de leŭtenanto, parolas kun nazasona voĉo, fumante siajn cigaredojn, unu post alia, seninterrompe. Baldaŭ, el la fenestro de la helikoptero «akvoĉerpilo», iu elŝovas sian brakon kaj krias :

— Quick, quick *!

Tuj, ambaŭ Jankioj kuras al la «akvoĉerpilo» kaj engrimpas ĝin. La majoro ankaŭ kursekvas ilin, ĝis la helikoptero. La jankia leŭtenanto elŝovas sian kapon kaj svingas sian manon por lin saluti. Sub la forta ventokirlo, estigita de la rapide turniĝantaj helicoj, la kapharoj de la majoro ŝvelante hirtiĝas, dum li restas ĉiam senmove, kiel statuo. Fine, li alte levas ambaŭ brakojn kaj laŭtvoĉe diras :

— If you please, if you please!**

La jankia leŭtenanto duonridetante kapbalancas. Poste, per larĝa manmovo, li kvazaŭ ordonas al li retiriĝi. La majoro tuj haste retropaŝas.

La motoro de la flugmaŝino komencas funkcii pli forte. La unua paro ekflugas, poste ĝin sekvas la dua kaj la tria... Tiel, la helikopteroj popare leviĝas de la tero.

Nun, la majoro kvazaŭ staras meze de l'kirloventego, kiu minacas elradikigi ĉiujn stoplojn ĉe liaj piedoj. Kiam ĉio denove kvietiĝas, strange estas, ke pluraj stoploj ne povas plu elrektiĝi. La pajla koloro, antaŭe helflava, nun fariĝas tute griza.

---

* Rapidu, rapidu !

** Laŭ via plaĉo, laŭ via plaĉo !

Tio ĉi okazas ne nur en loko, kie surterĝis la flugmaŝinoj kaj ankaŭ ne pro tio, ke tiuj stoploj estas premplatigitaj de la kruda ventoforto, estigita de la rapide turniĝantaj helicoj de helikoptero. La kaŭzo, fakte, kuŝas en tio, ke la naŭzaj sango kaj puso, kiuj antaŭ nelonge gutis de la hamakoj jam kunmiksiĝas sub la vesperkrepuska sunlumo por kovri tiun lokon per fetora odoro kaj kurbigi tiujn stoplojn ĝis la tero. La majoro sekvas tiun malpuran vojstrekon por reveni al la ĝardeno. Dume, la ses helikopteroj denove bruege superflugas la fruktĝardenojn de Hon Dat, antaŭ ol transporti la agoniantajn vunditojn en direkto al la maro.

La jankia leŭtenanto elŝovas sian kapon el la fenestro de la flugmaŝino. Tra siaj nigraj okulvitroj, li vidas la marondojn kuri al la bordo, poste ŝaŭmante reveni al la maro. Li vidas la strandon kun pluraj paralelaj sulketoj sur la sablo —, postsignoj de la ĉiutaga tajdo, kiu flusas kaj malflusas, — kaj tie plurajn stangojn elmergiĝantajn el la akvo kaj, kontraŭ kiuj seninterrompe impetas la ondegoj, — kaj tute proksime, unu domon, konstruitan sur dikaj fostoj, sur kiuj etendiĝas multnombraj fiŝretoj, ĉirkaŭ balanciĝantaj barkoj.

Tiu fiŝejo kun vico da surakvaj fostoj rememorigas al la jankia leŭtenanto la lumturojn kaj la buojn en iu haveno, kiun li iam preterflugis. Tio estas la lasta limo de tiu al li tute fremda verdoriĉa tero, kiu restas nun malantaŭ lia dorso.

Nun, la helikopteroj akcelas sian flugon. En la firmamento, subite ekaperas kelkaj amasoj da pluvoportaj grizaj nuboj kaj, tie malsupre, la maro ŝajne

komencas boli. En palpebruma daŭro, la malhela bluo de ĝia akvaro ŝanĝiĝas en plumban grizon.

La jankia leŭtenanto retiras sian kapon, mallevas la dikan fenestran vitron kaj grumblas :

— Malbonas la vetero !

— Eble pluvos ! — Aldonas la adjutanto, apude sidanta.

Ĉe tiuj vortoj, li ekstaras el sia ledseĝo, rigardas malsupren al la ŝveliĝanta maro kaj kun tremetanta voĉo murmuras :

— Mia leŭtenanto, ni ekagu !

— Ankoraŭ tre proksime de la bordo ! — Respondas la leŭtenanto kaj, rigardante sian brakhorloĝon, li diras :

— Ankoraŭ kvin minutojn.

Poste, li peze metas sian horloĝportantan brakon sur la fenestran vitron kaj senpacience palpas ĝian surfacon per siaj grasdikaj fingroj, plenkovritaj per krispaj flavaj haretoj.

De post kiam la helikopteroj forlasas la teron, ilia korpo seninterrompe skuiĝas, tiel pliakrigante la doloron de la grave vunditaj soldatoj, kuŝantaj sur ilia planko. La forta motorzumado superbruas ĉiujn ĝemkriojn. La krudaj skuoj de la flugmaŝinoj igas la sangon abunde elflui el la vundoj. Tiu kazo de «vundoskuiĝo» estas aparte terura. Ĝi estas ne forta, sed iompostioma, regula kaj seninterrompa. Ĝi devenas de maŝina forto ; tial ĝi estas kruele longdaŭra. El la vundoj la sango komence gutetas poste abunde elfluas. La helikoptera planko el ruĝa raspa plasto estas

baldaŭ inundita de sango, kaj tiu sango nun serĉas vojon por forflui. Tra la interspacetoj ĉe la ŝtuparo, ĝi trafluetas, miksiĝas kun la pluvo, kiu komencas vuali la tutan ĉielvolbon kaj oblikve falas sur la maron blanke kovratan de nebulo.

La jankia leŭtenanto ekstaras, transpaŝegas la korpojn de la vunditoj kaj eniras en la radiofonian kajuton. Iun momenton poste, li eliras kaj diras al la adjutanto :

— Ek al laboro!

La adjutanto demetas sian jakon poste, kun delikataj paŝoj, venas proksime al la flanka murvando, kie troviĝas unu fera rado, ĉirkaŭvolvita per longaj kabloj. Kuntirante siajn krurojn, li ekprenas ĝin en la mano kaj ĵetas ankoraŭfoje flugan rigardon sur la vunditajn soldatojn kuŝantajn sur la plasta planko. Poste, kunpremante la dentojn, li forte turnas la radon. Tuj rapide malvolviĝas la kabloj. La planko subite subfleksiĝas, kaj tiel malfermiĝas sub la flugmaŝino kvadrata truego kun ĉirkaŭ dumetra latero. Sep, ok vunditoj nereteneble glitas sur la kliniĝanta planko kaj falas tra la truego en la malplenon. Restas ankoraŭ kelkaj, kiu kuŝas iom malproksime de la subfleksiĝanta planko. La leŭtenanto tuj forpuŝas ilin per la piedo. Iu el ili havas nur la tempon por krii « Ĉielo! », antaŭ ol glitfali kaj malaperi sub la planko. La lasta vundito ankaŭ jam glitas tra la truego, sed liaj manoj sukcesas sin krampi al la planka rando. La leŭtenanto kuntiras sian piedon kun la intenco forpuŝi ilin. Sed, — oni ne scias pro kio, — li klinas sin antaŭen kaj rigardas al tiuj manoj, kiuj faras ĉiujn fortostreĉojn por firme

alkroĉiĝi al la planka rando. Tuj baldaŭ, ambaŭ manoj de la malfeliĉa vundito tremetas. Ĉiuj fingroj laciĝas kaj elglitas, centimetron post centimetro, el la plasta planko. Fine, ne povante rezisti kontraŭ la forto de l' vento, tiuj fingroj definitive... maltenas!

Kiel ajn gravaj estas iliaj vundoj, tiuj soldatoj certe rekonsciiĝas, tuj kiam ili falas en la maron. Ĉar ĝia varmeta akvo, post tiu posttagmeza pluvo, jam vekas la lastan vivoforton en tiuj suferplenaj korpoj. Ĝuste tiu marakvo jam helpas ilin kompreni la plej mizerajn minutojn de sia vivo. Konsciaj pri sia baldaŭa morto, ili senespere baraktas meze de l' ondegoj. Ilia sango miksiĝas kun la marakvo kaj la sala marakvo penetras en iliajn vundojn. Baldaŭ la povraj vunditoj lackonsumiĝas kaj, unu post alia, malaperas sub la plumbaj marondoj. Eĉ la plej rezistaj ne povas evitigi al si tiun teruran morton. Tiel dronas entute kvardek-ses vunditaj soldatoj en tiu malhele griza maro triste muĝanta sub la vesperkrepuska pluvego.

6

La kaporalo Ko levas sian glaseton kaj per unu tiro eltrinkas la brandon. Tri milicanoj, samaĝaj kiel li, ankaŭ levas la sian por trinki. Poste, ili metas la malplenajn glasetojn sur la lignoliton kaj etendas sian manon por delikate preni el telero po unu ŝirpeceto da kraderostita seka sepio.

Pli kaj pli dense pluvas sur la tegmenton de la trinkejo de onklino Ba U. Ĝis nun, ŝi restas ĉiam stare ĉe la pordo por rigardi la ĉielon. Ŝi tre ĝojas, ke baldaŭ pluvegos. Tuj kiam rapide flugis nigraj nuboj kaj la vento ree fariĝis iom malvarma, ŝi jam diris al si en la pensoj: «Kiel benita pluvo! Falu ankoraŭ pli dense, por ke niaj gekamaradoj en la kaverno ĝuu vian dolĉan akvon!»

Ĉiufoje kiam ŝi finrostas la sepion por tiuj «simpatiaj» soldatoj, ŝi tuj iras al la pordo. Kun manoj sur la koksoj, ŝi kontemplas la nigrajn nubojn, kiuj amase venas de la horizonto. Neniam ŝi tiel senpacience atendas la pluvon. Kaj kiam la pluvgutoj komencas fali sur la tegmenton, ŝi tute ĝojas esperante, ke ili fariĝu pli kaj pli dikaj.

— Dio jam benas nin, knabegoj! — Ŝi gajmiene diras al la kvar soldatoj, enirante la domon

La kaporalo Ko opinias:

— Oni ne scias, ĉu niaj «sinjoroj» en la kaverno povus kolekti tiun pluvakvon por trinki?

— Tute certe! — Flustras onklino Ba U.

— Do, ili ne plu soifas!

— Jes. Ili ne povas soifi. Ĉiufoje kiam pluvas, la pluvakvo ĉiam trafluetas tra la rokfendoj por penetri en la kavernon. Do, al ili ne mankas trinkakvo!

— Ordinare, dum tiu monato, tre malofte pluvegas!— Aldonas la kaporalo Ko.

Onklino Ba U ridetas kaj duonŝerce diras:

— Vere, la samo ne okazis en la pasinteco!... Mi pensas, ke Dio jam subtenas la Vjetkongojn, knabegoj!

Iu soldato, sidanta en profunda angulo, mediteme rigardas al la pluvgutoj, kiuj falas de la tegmentrando sur la defluilon ĉe la pordo, kie nun torente fluas la pluvakvo kun multaj aerveziketoj.

— Miaflanke, — li malĝoje konfidencas, — ĉiufoje kiam pluvas, mi estas tre maltrankvila. Ĝuste tiun jaron, kiam mi estis perforte varbita en la armeon, la tegmento de mia domo jam komplete kadukiĝis. Kovrita per « kan dop »-folioj, ĝi ne povas daŭri pli ol unu jaron. Sed jam forpasis du jaroj ! Ĉu ĝi ankoraŭ tenas sin firme ? Plej teda estas nokta pluvo. Dum la infanoj ploras, la patrino lamentas kaj kunportante sian maton kuras al ĉiuj anguloj. Ĉie la pluvakvo tragutas tra la tegmento. Oni estas do trafitaj de pluvo, interne de la domo same kiel ekstere, sur la korto. Tial, se pluvas, mi estas zorgoplena. Nun, mi komforte sidas ĉi tie, sed hejme miaj edzino kaj infanoj povus esti tramalsekigitaj...

Li faras paŭzon. Ambaŭ liaj fingroj palpas la ŝirpeceton da sepio, poste li daŭrigas :

— En mia vilaĝo, la palmofolioj uzataj por kovri la domtegmentojn estas tre karaj. Antaŭe, en paca tempo, la komercistoj el la Thu-regiono ofte transportis ilin ĝis tie ; tial, ni povis facile aĉeti ilin. Sed, nun, pro milito, tiu komerco ne plu regule praktikiĝas. Cetere, se oni povas venigi tiujn palmofoliojn ĝis tie, oni devas vendi ilin al la vilaĝa deponejo, kies mastroj estas la komunumaj konsilistoj. Tiuj lastaj aĉetas ilin po dumil piastroj por milo kaj revendas ilin po dumil okcent ĝis trimil piastroj. Kie mia edzino povus trovi monon por aĉeti ilin ?... Vere, en mia vilaĝo grave mankas palmofolioj !

— Pardonu min, kie trovigas do via vilaĝo? — Demandas onklino Ba U.

— En Ĉak Ka Dao, en la «Prospera Zono»!

La virino ĵetas flugan rigardon sur la soldaton:

— Ĉak Ka Dao? Mi konas... Sed.., sed...

Ĉe tiuj vortoj, ŝi mallaŭtigas sian voĉon:

— Vi... Vi intencas forkuri; sed vi volas ankoraŭ reveni al la «Prospera Zono», ĉu ne?

— Ne, ne! Jam disfalis tiu «Prospera Zono», lastan septembron!

— Tiel estas!... — Diras onklino Ba U kun malpezigita koro.

Ekstere, senĉese falas densa pluvo, dum en la trinkejo, la mastrino estas aferplena, jen surgrimpante la lignoliton, jen descendante sur la terplankon. Ŝi mezuras kaj enverŝas la brandon en botelojn; ŝi ekbruligas la alkoholon en telero kaj rostas la sekan sepion super violbluaj flagrantaj flamoj. Ŝi ankaŭ ne forgesas aldone verŝi iom da vinagro en la saŭcon. Tiel, diligente kaj bonorde, ŝi zorgas pri ĉio. La kvar soldatoj estas tute kontentaj pri ŝia gastameco; tamen ili mienas iom ĝenece. Ili senĉese spirblovas, premas la manojn unu per alia aŭ palpante ŝovas ilin tien kaj reen sur la kruroj. Ili aspektas tre feliĉe, kvazaŭ en ilia hontinda vivo de dungosoldato, ne estas facile trovi tiel hejmecan atmosferon kaj libere manĝi kaj trinki dum tiu pluva kaj malvarma posttagmezo. Krome, ne ĉiuj trinkejestrinoj tiel afable akceptas siajn gastojn, kiel onklino Ba U. Tial, sur ilia kontenta kaj ĝeneca mieno montriĝas ankaŭ emocio. Jam preskaŭ unu semajnon, de post kiam ili kantonmentis

ĉi tie, ili jam venis kvin aŭ ses fojojn al ŝia trinkejo. Komence, estis nur la suboficiro Ko ; poste, tiu lasta kuntrenis siajn amikojn... Kaj antaŭhieraŭ, Ko malkaŝis al onklino Ba U la intencon de sia grupo forlasi la pupan armeon. Li petis de ŝi helpon por trairigi ilin tra Vam Rang. De tie, ili povos nepre reveni hejmen en Mak Kan Zung, Ba Zaŭ, Vinh Hanh kaj Ĉak Ka Dao. Tial, ĉi posttagmeze, ili denove venas al tiu trinkejo.

La soldatoj plue trinkas brandon. Onklino Ba U restas ĉiam stare, palpante la randon de la telero, sur kiu ankoraŭ kuŝas kelkaj pecetoj da seka sepio. Post momenta silento, ŝi diras :

— Mi trovas, ke vere vi estas malfeliĉaj, kiam vi devas forlasi viajn edzinon kaj infanojn. Mi ankaŭ havas maltrankvilan koron. Tial, mi volonte promesas vin helpi... Tion, kion mi promesas al vi mi nepre plenumos sed la sukceso precipe dependas de vi... Mi ne scias, ĉu vi jam faras decidon ; mi iom maltrankviliĝas...

La kaporalo Ko tuj interrompas ŝin :

— Ne maltrankviliĝu, onnjo ! Ni jam decidas... Helpu nin kiel eble plej frue. Ĉu antaŭmomente vi ne vidis la helikopterojn, kiuj venis por forporti la vunditojn ? Se vere vi volas evitigi al ni tiun malfeliĉegan staton, vi devas helpi nin !

— Mi nepre helpos... Sed, viaflanke, vi devas esti firmdecidaj, neŝanceliĝemaj...

— Memkompreneble, firmdecidaj ! — Diras la soldato el Ĉak Ka Dao. — Vi do ne fidas al ni ?

Onklino Ba U ekridas. Iun momenton poste, ŝi retiras ambaŭ siajn fingrojn el la rando de la telero

kaj, sin klinante flanken, flustras al la kaporalo Ko en la orelon :

— Bone, morgaŭ ĉe la noktiĝo, vi venigu viajn amikojn al tiu vojkruciĝo, mi atendos vin tie...

— Jes !

— Ne forgesu kaj venu akurate ! Se vi preterlasus tiun bonan okazon, vi ne povus retrovi ĝin. Mi jam...

— Bone, bone ! — La kaporalo Ko faras du, tri sinsekvajn aprobajn kapmovojn.

Onklino Ba U ankoraŭ flustre diras al li :

— Rekomendu al viaj amikoj, ke ili gardu absolutan sekreton. Mi fidas al vi...

— Ne maltrankviliĝu pri tio, onnjo !

La kaporalo Ko glutas unu plian glaseton da brando, poste descendas de la lignolito kaj sin direktas al la pordo. Trovante, ke jam preskaŭ ĉesas la pluvo, li diras al siaj amikoj :

— Elĉerpu vian glaseton, poste revenu al nia trupunuo, knabegoj !

La tri soldatoj eltrinkas per unu tiro la brandon, poste iras kolektiĝi ĉe la pordo de la trinkejo. Ili ĵetas flugan rigardon eksteren, antaŭ ol rapidpaŝe kuri unu post alia al la vojo. Ekmemorante pri la instrukcioj, kiujn ŝi ĵus ricevis de onklino Hai Thep, Ba U tuj retenas la kaporalon Ko per lia jako por fari kromajn rekomendojn :

— Koncerne tiun pafilaferon, faru ĉion eblan por forpreni ankoraŭ kelkajn... Sed, se tio postulas tro da penoj kaj riskoj, ne persistu ! Vi ne devas longeresti tie ; tio facile malsekretigos vian aferon. Kvar knabegoj

kun kvar bonaj fusiloj, laŭ mia opinio, tio sufiĉas!... Do, ne forgesu veni akurate al la vojkrucigo, ĉe la noktigo. Mi atendos vin tie... La vilaganoj jam kotizas monon por viaj elspezoj dum la vojago. Do, estu trankvilaj!

Tion aŭdante, la kaporalo Ko mallevas sian kapon; li iomete palpebrumas poste mallaŭte diras:

— Ĝis revido, onnjo!

Li urge sin direktas al la pordo kaj, premante la pinton de siaj botoj sur la glitigan vojon, li ŝancelpaŝe kursekvas siajn amikojn. Baldaŭ li reatingas ilin. Sub la pluveto, la kvar homoj urgas siajn paŝojn. Dumvoje, la kaporalo Ko rakontas al siaj kunirantoj, kion ĵus rekomendis al li onklino Ba U.

La pluvo, kiu preskaŭ ĉesigis nun torente falas. La kvar soldatoj denove kuras, agitante siajn alte levigantajn brakojn. Ekvidante la malklaran silueton de iu tamarindo malantaŭ la pluvovualo, la kaporalo Ko fingremontras en direkto al tiu arbo kaj diras:

— Tie trovigas la logejo de la maljuna Tu Deŭn. Provpenu kuri ĝis tie por nin ŝirmi kontraŭ la pluvo.

Ĉe tiuj vortoj, ili unuspire kuras ĝis la tamarindo. Ili skuas iun momenton siajn malsekajn vestojn poste eniras en la dometon de la maljuna blindulo.

Tu Deŭn estas sidanta sur sia lito por fliki sian bambuan korbon. Ekaŭdante la sonorajn bruojn de botoj, li tuj scias, ke la entruduloj estas soldatoj. Li povas ankaŭ rekoni per tiuj paŝbruoj, ke ili estas milicanoj. Lia nepino, ĉirkaŭ dektrijara, kure venas de la kuirejo kaj palpante la krurumon de iu soldato demandas:

— Kion vi serĉas ĉi tie?

— Ne, ni volas simple nin ŝirmi kontraŭ pluvo, knabineto! — Respondas unu el la soldatoj, antaŭ ol sin turni al sinjoro Tu Deŭn:

— Bonvole enlasu nin, onklo! Ekstere pluvas.

Ĉiam flikante la randaĵon de sia korbo, la maljuna blindulo afable respondas;

— Vi estas tute liberaj, ĉi tie!

La knabineto ĵetas preterflugantan rigardon sur la soldatojn poste eniras la kuirejon. Tiuj lastaj kaŭre sidiĝas sur la tero mem kaj, ĉirkaŭbrakante siajn genuojn, rigardas al la maljunulo, tute absorbata per sia laboro. Unu el ili laŭdas lin:

— Vere, vi tre lerte plektas tiun korbon!

— Mi ne havas tiel lertajn manojn, kiel vi pensas!

Sinjoro Tu Deŭn ŝajne ne akceptas tiujn flatajn parolojn, kio iom konfuzas la soldaton. Sed tiu lasta provpenas starigi plian demandon:

— Kiom da korboj vi povas plekti potage?

— Du, se oni havas antaŭpreparitajn bambulamenetojn. — Lakone respondas la maljuna blindulo.

— Ĉu vi gajnas sufiĉe da vivrimedoj plektante tiujn korbojn?

Sinjoro Tu Deŭn malrapide levas ambaŭ siajn profunde kaviĝintajn okulojn:

— Malgraŭ ĉio, oni faras ĉion eblan por gajni sian vivopanon. Blinda kiel mi, oni nur laŭtage vivas. Estas do neeble havi same komfortan vivon, kiel aliuloj...

— Ni ankaŭ ne estas pli feliĉaj, ol vi, onklo!

Tion aŭdante, la maljunulo subite maltenas la rotangan nodon el siaj manoj:

— Mi ne kredas al viaj paroloj. Maljuna kaj kripla, mi ja ne povas kompari min kun vi. Vi estas ankoraŭ tute sanaj. Kun fusilo en la mano, vi tute libere iras ien ajn kaj ĉiumonate vi ricevas salajron... Iafoje, vi ankoraŭ forrabas de la vilaĝanoj kokojn kaj anasojn... Kaj tamen, vi diras, ke vi ne estas feliĉaj! Mi ja ne kredas al viaj paroloj...

— Vi ne kredas al miaj paroloj! Sed, vere ni estas tre malfeliĉaj!

— Mi scias, ke vi estas malfeliĉaj, — tiel malfeliĉaj, ke ĉie, kie vi trapasas, vi havas bubalviandon kaj kokaĵon por via manĝo!

La kaporalo Ko malĝoje klakas per sia lango:

— Onklo, ne plu moku nin! Vere kompatindaj ni estas! Ni ne estas tiuj kanajloj, kiuj paffaligis bubalojn kaj kaptis kokinojn de la vilaĝanoj.

Sinjoro Tu Deŭn serĉas kelkajn rotangajn fibrojn kaj plue nodligas la randaĵon de la korbo:

— Mi ne aŭdacas moki vin, sinjoroj! Cetere, mi ne scias, kiu soldato kaptis kokinojn kaj, kiu soldato ne faris tion... Mi scias nur, ke viaj kolegoj havas la kutimon paffaligi bubalojn kaj kapti kokinojn. Ĝuste hieraŭ, ili kaptis mian kokinon ankoraŭ kuŝantan sur siaj ovoj kaj mia nepino jam kursekvis ilin, farante vanajn klopodojn por repreni ĝin.

— Tiuj kanajloj ne apartenas al nia trupunuo. Antaŭe, ni estis ankaŭ terkulturistoj, kiel vi. Tial, eĉ se pro malsato, ni devus morti, neniam ni aŭdacus rabi la havaĵojn de viaj vilaĝanoj.

— Tion ni scias nur per viaj dirajĵoj, sed ĉu vi diras la veron ?...

— Jes, veron ni diras !

— Do, supozu, ke veron vi diras kaj nun vi povas dece konduti. Sed se vi sekvas ĉiam tiun vojon, vi nepre iun tagon malbone agos ! Mi ja ne kredas, ke la « Nacia Armeo » ne iras prirabi la loĝantojn.

La kvar soldatoj rigardas unu la alian ne sciante, kion diri al sinjoro Tu Deŭn.

Ekstere, la pluvo ĉiam dense falas, la nokto estas inke nigra. Subite, la maljuna blindulo mildigas sian voĉon :

— Pluvegas, sed ĉu jam noktiĝas, knabegoj !

— Estas jam kompleta nokto !

Sinjoro Tu Deŭn tuj krie vokas sian nepinon :

— Ohe Tim, ekbruligu lampon !

En la kuirejo, la etulino brue blovekscitas la fajron. Iun momenton poste, ŝi etpaŝe alportas unu fiŝolean lampon kaj metas ĝin sur la bambuliton, antaŭ ol prepari la manĝilaron. Aŭdante la bruon de bambuvergetoj, sinjoro Tu Deŭn demetas sian korbon kaj demandas la soldatojn :

— Ĉu vi jam manĝas ?

— Jam.

— Se vi ankoraŭ ne prenas rizon, restu ĉi tie kun ni. Mia nepino preparos por vi la manĝon.

— Dankon, kara onklo ! Ni jam manĝas.

Sinjoro Tu Deŭn ekstaras, mem manbatetante sian dorson. Poste etendante sian brakon antaŭen, li palpe serĉas la bambuliton kaj eksidas. La etulino Tim

pasigas al li paron da bambuvergetoj kaj unu bovlon da varma rizo.

La maljunulo enigas la bambuvergetojn en la blankan rizon kaj restas iun momenton senvorte, antaŭ ol sin turni al la soldatoj :

— Do, antaŭe, vi estis ankaŭ terkulturisto ?

— Jes, onklo mia ! — Respondas la kaporalo Ko.

— Pro kio vi ne restas hejme por prilabori viajn rizejojn ?

Post tiu demando, sinjoro Tu Deŭn malrapide manĝas sian rizon. Per siaj bambuvergetoj, Tim prenas el la bovlego da buljono unu fiŝpecon, kiun ŝi metas en la bovlon de sia avo. La bovlego da buljono troviĝas ĉeflanke de la maljunulo. Ŝajnas, ke la nepino jam preparas tiun manĝaĵon ekskluzive por sia avo, ĉar oni vidas ŝin manĝi sian rizon nur kun peklita fiŝo. Dum ambaŭ avo kaj nepino manĝas, unu el la soldatoj ekvidas ĉe la muro la « unukordon » de la maljuna blindulo. Li proksimiĝas kaj, per sia fingro, pinĉas la metalan kordon, kiu aŭdigas melodian sonon.

— Tiu muzikilo tre agrable sonas ! — Kvazaŭ mirigita, diras la soldato.

Sinjoro Tu Deŭn ĉiam silente manĝas. Subite, ambaŭ liaj nigraj okulkavoj sin turnas al la muzikilo, kies metala kordo ankoraŭ vibras. Severvoĉe, li admonas :

— Kiu scipovas ludi tiun « unukordon », malkroĉu ĝin por ludi ; sed ne tiel pinĉu ĝian kordon !

Profitante favoran okazon, la soldato tuj malkroĉas de la muro la muzikilon kaj sidas ĉe la pordo de la domo por bone malbone ludi kelkajn notojn el la

« Vong Ko »-ario. Sub la mallerta mano de la soldato, la metala kordo de la muzikilo vibras, aŭdigante malharmoniajn sonojn, jen tede treniĝantajn, jen akre hakitajn, kvazaŭ singultojn.

Sinjoro Tu Deŭn jam finas sian mangon, sed la pluvo ankoraŭ ne ĉesas. Li descendas de la lito, palpe serĉas unu bambueron, poste kaŭre sidiĝas sur peco da matraco por purigi siajn dentojn. Li konstante direktas siajn profundajn okulkavojn al la malluma pluva nokto, kvazaŭ li atente aŭskultas nur la bruon de la defalanta pluvo kaj ne la voĉon de la « unukordo ».

Kvazaŭ konscia pri sia mallerteco, la soldato sentas sin tute ĝenita ; poste, li hazarde diras :

— Mi scias, laŭ la famdiroj, ke vi tre lerte ludas tiun « unukordon ». Kara onklo, regalu nin per iu ario, mi petas !

La maljuna blindulo ŝajne vekiĝas el sia dormo kaj eklevas sian mentonon por demandi :

— Kion ? Vi volas, ke mi ludu tiun « unukordon », ĉu ne ?

— Jes, vi ludu, onklo ! Vi ludu ! — Insiste petas la kaporalo Ko.

— Mi ne estas tiel kapabla, kiel vi pensas ! — Respondas sinjoro Tu Deŭn, nur post longa silento.

— Mi jam konas vian virtuozecon. Ludu vian « unukordon », mi petas, por ke via nepino kantu la de ŝi ordinare ŝatatan arion ! Ankoraŭ pluvegas kaj ni ankoraŭ ne povas reveni al nia trupunuo.

Sinjoro Tu Deŭn ĉiam rifuzas :

— Vere... mi ne kaŝas al vi, ke mia mizerega vivo jam multe influas sur la voĉo de la muzikilo, kiam mi ludas. Oni riproĉas min pro tio, ke ĝi estas tro plenda!

— Malgraŭ la rifuzo de la maljunulo, la kaporalo Ko ĉiam prenas el la manoj de la soldato la « unukordon » kaj transdonas ĝin al sinjoro Tu Deŭn.

Timante, ke ĝi povus fali teren, tiu lasta tuj premas ĝin al sia sino. Per siaj tremetantaj fingroj, li palpas iun momenton la keston de la muzikilo poste malĝoje diras:

— Lastan vesperon, kelkaj soldatoj ankaŭ venis ĉi tien kaj petis min ludi. Trovante, ke ili sin montris ĝentilaj, kiel vi kaj precipe pro ilia insista peto, mi konsente ludis mian « unukordon »... Baldaŭ, la soldatoj multnombre venis ĉe mi, forlasante sian postenon kaj sian patroladon. Informite pri tio, la kapitano ankaŭ venis ĉe mi. Li kolere insultis kaj forregalis ĉiujn soldatojn, antaŭ ol minace diri al mi: « He maljunulaĉo, mi malpermesas al vi delogi kaj grupigi miajn soldatojn ĉi tie por muziki. Ĉu vi komprenas? » Mi tuj respondis: « Sinjoro, mi neniam aŭdacas delogi kaj grupigi viajn soldatojn. Ili mem venis ĉe mi kaj perforte devigis min ludi. Tial, mi devis obei. » La kapitano ĉiam kolere mienis: « De nun, vi ne plu ludu tiun « unukordon »; alie, mi frakasos ĝin! » « Do, de nun, — mi diris, — malgraŭ ilia insista peto, mi ne plu ludos ».

Sinjoro Tu Deŭn ĉesas rakonti, sed liaj ostecaj manoj ĉiam ameme karesas la muzikilon. Ŝajnas, ke li estas feliĉa gardi ankoraŭ ĝin en sia sino.

— Nun, vi estas libera ludi, sen ia timo! La kapitano jam « krevis » antaŭhieraŭ!

— Mi ankaŭ aŭdis pri tio! Laŭonidire, li estas paſmortigita ĝuste antaŭ la kaverna faŭko, ĉu vere?

— Jes, antaŭ la kaverna faŭko!

— Kaj, kiel kondutas nun lia anstataŭanto? Ĉu li ankaŭ volus frakasi mian «unukordon»?

En la voĉo de la maljunulo ŝajne aŭdiĝas ridbruo.

— Certe ne! La noveveninta leŭtenanto tute ne atentas pri tio!

— Tiuokaze, mi povas kontentigi vin!

Ĉe tiuj vortoj, sinjoro Tu Deŭn turnas la muzikilan streĉilon, kiu forte grincas sub lia mano. Poste, li prenas la bambustangeton, alpinglitan al la ekstremo de la «unukordo» kaj vokas sian nepinon:

— Tim, ĉu vi jam lavas la tetasojn?

— Atendu min iun momenton, avĉjo!

— Venu ĉi tien, tuj post lavado!

La maljuna blindulo delikate tenas en siaj kvin fingroj la bambustangeton kaj atendas. La kvar soldatoj eksidas pli proksime de li.

Iun momenton poste, Tim viglapaŝe eniras la ĉambron. Ekaŭdante ŝiajn paŝbruojn, sinjoro Tu Deŭn tuj levas sian manon:

— Sidiĝu ĉi tie, etulino mia, kaj kantu la «Nam Ai»-arion por regali tiujn knabegojn! Mi akompanas vin per mia «unukordo».

Tim sin montras tute ne ĝoja. Ŝi levas sian manon al sia kapo kaj venigas antaŭ la bruston sian etan hartufon, kiu similas al vosto de kato:

— Mi ne kantas! — grumblas la etulino.

Sinjoro Tu Deŭn ekridas, sin turnante al la soldatoj :

— Ĉu vi vidas, knabegoj ! Ŝi ankoraŭ indignas pro tiu afero de prirabita kokino.

Poste, li mildvoĉe diras al sia nepino :

— Kantu, etulino mia ! Tiuj soldatoj estas bonkoraj kaj tute ne similas al la kanajloj, kiuj venis ĉe ni hieraŭ. Cetere, ili estas same povraj, kiel ni...

Tim restas ĉiam senvorte. Ŝi ekprenas la tualetotukon el la ŝultro de sia avo por viŝi siajn malsekajn manetojn. Sub la flagranta lumo de la fiŝolea lampo, ŝi larĝe malfermas siajn okulojn, fikse rigardante al la lito kaj, de tempo al tempo, preterfluge al la soldatoj. Kaj iom post iom kvazaŭ mildiĝas la koleraj ekbriloj de ŝiaj okuloj. Ŝia vizaĝo pliheliĝas, malgraŭ abundaj cikatretoj postlasitaj de terura variolo.

Tute certa, ke nepre kantos lia nepino, la maljunulo tuj pretigas sian muzikilon kaj preludas. Sub liaj ostecaj fingroj svingiĝas la bambustangeto kaj la metala kordo vibras, aŭdigante harmonian modulon. Tim estas kvazaŭ ekscitita. Ŝi iom post iom alten levas siajn brilajn okulojn. Ŝi rigardas eksteren al la falanta pluvo, dum ŝiaj manetoj forte premas la baskon de sia avo. La lasta muziknoto de la preludo subite interrompiĝas. Sinjoro Tu Deŭn abrupte kuntiras sian maldekstran manon sur la muzikila tigo, dum lia dekstra kun la bambustangeto leviĝas super la metala kordo, kiu tiam eligas plej akutan modulon.

La atmosfero de la ĉambro kvazaŭ plipeziĝas. Tim subite ekkantas :

« *Kiam... laŭ reĝa ordono...*

La maljuna blindulo pli vigle svingas sian bambu-stangeton. Kaj la muzika voĉo akceliĝas, kuntrenante tiun de la etulino:

«*Vi ĵoriras, karulo mia! Neniu novaĵo!*
«*Kiel ruĝa hirundo, vi ĵorflugas*
«*Nun sur la Hon-rivero, dezerta...*
«*Aŭdiĝas nur ĝemplendoj*
«*Paliĝas... rozaj vangoj!*
«*Tiel, senpacience atendas mi*
«*La ĉambron ja kovras malpura mondpolvo...*

La tro juna voĉo de la etulino, kiu akordiĝas kun tiu de la «unukordo», — voĉo formita de sesdekjara mizera vivo, — konsistigas strangan kontraston...

«*...Jen malproksime eĥas tamburado*
«*Aŭ edzon mian la reĝo vokas*
«*Ĉu en ĵora landlimo tion li scias?*

La voĉo de Tim fariĝas flirtema:

«*De post kiam vi al batalkampo iris*
«*Kvazaŭ ĵiŝo rigardas stelojn, mi novaĵojn viajn atendis...*

Nun, la metala kordo ne estas plu soleca. Ŝajnas, ke sur la muzikilo ĝi jam multobliĝas. Kaj ĝia voĉo milda aŭ malmilda, ĝoja aŭ malĝoja, havas nun tiun magian povon, kiu devigas la edzon sopiri al sia edzino, la patron al sia infano. Ja, la metala voĉo jam vekas la nostalgion al la hejmvilaĝo, al la kampoj kaj riveroj, al la prapatraj tomboj!

La kvar soldatoj mallevas sian kapon; iliaj kapharoj dense falas ĝis la genuoj.

Kaj dum la «unukordo» ĉiam ĝemplendas, ekstere, senĉese pluvas kaj sub la pala lumo de la fiŝolea lampo, brilas la pluvgutoj, kiuj oblikve falas antaŭ la pordo.

Ĉapitro VI

1

— Jen akvo! Jen akvo!

Tiu ĝojkrio « Jen akvo! » aŭdiĝas ĉie en la kaverno. Ankaŭ Tham kaj la knabo Be ekleviĝas el sia kuŝejo kaj sin turnas en direkto al la lumo de vakskandeloj. Iun momenton poste, aŭdiĝas la voĉo de niaj kamaradoj, kiuj sciigas unu al alia, ke la pluvakvo jam fluas per etaj gutoj. En la interna kaverno, Nam Njo tenas sian vakskandelon en la mano por lumigi al Kujen, kiu kaŭre sidiĝas apud sia kruĉo, lokita sub maldika akvostrieto, kiu gutas de iu rokfendo. La pluvgutoj, iom malklaraj, malrapide falas kaj tintante frapiĝas kontraŭ la fundo de la ujo. Pli kaj pli rapide fluas la akvo. Kiam el la fundo de la kruĉo aŭdiĝas sekaj bruoj « toong toong », la pluvgutoj jam transformiĝas en flueton kaj la akvo fariĝas pli klara. Kujen zorge subtenas la kruĉon, ĉiam fikse rigardante al la akvostrio. Ĉe la apuda rokmuro, brilas ankaŭ pluraj akvofluetoj.

Baldaŭ, la kruĉo pezas ĉe la manoj de Kujen. Ŝi ĵetas rigardon en ĝian internon, kaj trovas, ke ĝi estas

jam preskaŭ duone plenigita. Ŝi faras malpezigan elspiron:

— Fine, oni ne plu timas soifon.

Nam Njo mallevas sian vakskandelon kaj diras:

— Metu vian kruĉon sur la teron. Ne vane perdu vian forton por teni ĝin en viaj manoj.

Kujen obeas kaj delikate metas la kruĉon sur la teron. Ŝi sidas ĉiam tie kun brilaj okuloj, direktitaj al la pluvakvo, kiu nun fluas per longa kaj abunda strio.

— Hodiaŭ, ni jam gajnas du venkojn, ne bezonante multe ŝviti. — Ŝi diras. — Unue, ni jam fiaskigas la fiintencon de la malamikoj sufoki nin per fumo. Due, ni estas favoritaj per abunda pluvo. Sendube, ekstere pluvegas.

— Jes, dank' al tiu pluvego, la akvo tiel abunde fluas en nian kavernon.

— Vere, Dio favoras nin! Nun, ni estas liberigitaj de ĉia timzorgo. Kun tiu provizo da rizo kaj akvo, ni povas forspiti la malamikojn kaj resti longatempe en tiu kaverno!

— Kamarado Tam diris, ke la malamikoj povus ataki nin per eksplodaĵoj.

— Ne timindaj tiuj eksplodaĵoj! Sufiĉas, ke ni penetru ankoraŭ pli profunden, kaj ni reeliros post la eksplodoj. Kaj tiuj eksplodaĵoj miaopinie efikas same kiel mil grenadoj MK3 maksimume.

La akvo en la kruĉo preskaŭ superbordiĝas kaj disŝprucas ĉiuflanken. Nam Njo tuj fiksas la vakskandelon ĉe la ŝtonbloko kaj, kune kun Kujen, etendas unu tukon el nilono por enkolekti la pluvakvon.

Ĵun momenton poste, la tuko, akvoplena, estas tute peza. Tordinte ĝin ĉe la randaĵo, Kujen diras al Nam Njo:

— Vi transportu ĉi tien ĉiujn marmitojn...

Nam Njo tuj forkuras. Ŝi revenas baldaŭ por sciigi, ke ĉiuj marmitoj kaj kaldronoj estas uzitaj por konservi akvon.

Kaŭre sidiĝante sur la tero, Kujen kun bedaŭro rigardas al la torente fluanta akvo. Subite, ŝi elpaŝas kaj surgenuiĝas, turnante la buŝon supren por kapti la akvofluon. Ŝi brue trinkas, gluton post gluto, poste, forvišante al si la lipojn, sin metas flanken kaj diras al Nam Njo:

— Trinku, trinku por kvietigi vian soifon! Mi iras voki kelkajn kamaradojn, por ke ili venigu ujojn por enkolekti akvon.

Ĉe tiuj vortoj, ŝi forkuras. Kiel Kujen, Nam Njo ankaŭ surgenuiĝas, turnas supren sian vizaĝon kaj lasas la akvon enfali en ŝian buŝon. Plensate trinkinte, ŝi tuj kaŭre sidiĝas sub la akvofluo por sin bani. La freŝa akvo inundas ŝian kaphararon kaj ŝian tutan vizaĝon. Ĝi algluas ŝiajn vestojn al ŝia iom grasdika korpo.

Baldaŭ Kujen revenas. Ŝi tute ĝojas, vidante sian amikinon meze de l' bano.

— Vi vin banas, ĉu ne, Nam Njo? Mi ankaŭ volas preni banon... Ha, niaj kamaradoj jam plenigas ĉiujn siajn ujojn per akvo.

Nam Njo ekstaras, lasante la akvon flui ankoraŭfoje sur ŝian kapon, antaŭ ol sin meti flanken por cedi la lokon al sia amikino.

Kujen eksidas. Ŝi levas sian manon malantaŭ la kapon kaj eltiras el sia hartubero la harpinglon, kiun ŝi

prenas inter la lipoj. La akvostrio verŝiĝas sur ŝian brile nigran kaphararon kaj baldaŭ sur ŝian tutan ovalan vizaĝon, kiu brilas sub la flagranta lumo de vakskandelo. Poste, de la kolo ĝis la ŝultroj kaj la brusto, Kujen estas tramalsekigita. Ŝia nigra kostumo, sorbigita de akvo kaj algluita al ŝia korpo, montras, ke ŝia talio estas svelta kaj malpli dika, ol tiu de Nam Njo. Ŝi iom klinas malantaŭen sian kapon, dum per ambaŭ manoj, ŝi delikate karesas ĉiun hartufon.

Kiam ŝi komencas lavi al si la piedojn, la akvo iom post iom malforte fluas.

— Sendube, tuj ĉesiĝos la pluvo. Iru do ŝanĝi viajn vestojn!

Ĉe tiuj vortoj, Nam Njo sin turnas sur la kalkanoj. Kujen klopodas supren levi sian vizaĝon por ricevi la lastajn akvogutojn, antaŭ ol preni la vakskandelon kaj etpaŝe reveni al sia ŝtonbloko. Starante ĉe ĝia bazo, ŝi vidas sian amanton Ngan kuŝi apud la etulino Thuji, kies kapo sin apogas sur lia brako.

— Ngan! — Mallaŭte vokas Kujen — Pasigu al mi miajn silkajn vestojn.

— Vi jam prenas banon, ĉu ne? Ĉu estas malvarme?

— Tre freŝe!

Ngan blindpalpe serĉas unu jakon kaj unu pantalonon el nigra silko kaj unu koltukon, kiujn li transdonas baldaŭ al sia amatino.

— Urĝu vin preni sekajn vestojn; alie, vi malvarmumos!

Kujen senvorte ŝanĝas siajn vestojn. Ŝi tordas siajn malsekajn jakon kaj pantalonon, antaŭ ol etendi ilin

ĉe iu angulo de la ŝtonbloko. Poste, kun etenditaj kruroj, ŝi sidas tuj apud sia amanto kaj senbrue frotviŝas per tualetotuko sian kaphararon. Ngan ĵetas preterflugantan rigardon sur ŝin kaj, retirante sian brakon el la kapo de Thuji, ekleviĝas. Li delikate forprenas de ŝia mano la kombilon kaj per karesmildaj manoj kombas ŝiajn distaŭzitajn harojn. Kujen restas senmove kun ambaŭ okuloj direktataj al la malluma profundaĵo de la kaverno. Ordinare, ŝi estus ridetanta. Sed nun, ŝiaj lipoj ĉiam fermiĝas. Ngan ankaŭ silentas. Li kombas la kapharojn al Kujen, kiel al sia fratineto. Ŝajnas, ke de post la morto de Su, li multe pli zorgas pri ŝi. Li volas per ĉiuj ebiaj karesaj agoj konsoli sian amatinon, mildigi ŝian doloron.

Lastan nokton, post sia gardodeĵoro, li eniris en la kavernon kaj kuŝis apud Kujen, karesante ŝian grasrondan dorson ĝis ŝi endormiĝis, antaŭ ol reveni al la kaverna faŭko.

Nun, li kombas al ŝi la kapharojn, kvankam malsekajn, tamen tute varmetajn pro amoplena parfumo.

— Kie estas via harpinglo, karulino mia?

Kujen obeeme pasigas ĝin al li. La juna viro ĵus pinglis siajn kapharojn, kiam ŝi sin turnas posten, enŝovas sian kapon el lian sinon kaj ploregas kun ambaŭ konvulsie tremetantaj ŝultroj. Ngan lasas sian amatinon tiel plori iun momenton, antaŭ ol diri al ŝi:

— Ne plu ploru Kujen, mi jam diras, ke...

Sed Kujen senĉese plorsingultas:

— Mi tre kompatas... franjon Su, kiu senpacience... atendis sian edzon. Nun... kiel li povus renkontiĝi kun ŝi? Ĉi matene, mi trovis en ŝia poŝo iun paperpecon...

Ĝi estas letero, kiun li ĵus sendis al ŝi. Kun tiu ĉi letero estas ankoraŭ alia, en kiu mi legis nur kelkajn liniojn: «Al mia karega San, plej amata de Su kaj de Thuji, mi ĵus ricevis vian leteron...»

— Ĉu vi ankoraŭ gardas tiun leteron? — Malĝoje demandas Ngan. Kaj, ekde tiu minuto, li ankaŭ pensas pri San, kiu vivas nun en Nordo. Certe, tiu lasta, lia amiko kaj bofrato, ne povus resti trankvile, se li estus informita pri tiu okazaĵo. Tiu landa divido jam metas tiom da junaj edzinoj en tiun mizeregan situacion. Tiom da junulinoj jam forvelkas en atendado kaj lukto. La tempo elprovas ilin, jaron post jaro. Tiu elprovo estas eltenebla dum du unuaj jaroj, sed ekde la tria, ĝi fariĝas tute akra. Ngan jam vidas plurajn virinojn glore transpasi tiujn elprovojn. Kvankam pro mizero kaj tempo, ili maljuniĝas, tamen ili estas pli flegmaj kaj pli harditaj. Kompreneble, estas ankaŭ ia nombro da virinoj, al kiuj mankas pacienco kaj, kiuj jam «kapitulacas», sed Su apartenis al la unua kategorio. Ŝi ja sukcesis elteni la elprovon ĝis la sepa jaro, kiu estas ankaŭ la lasta jaro de ŝia vivo.

— Vere franjo Su jam heroe foroferis sian vivon! — Rimarkas Ngan.

— Sed mi tre kompatas ŝin... — Diras Kujen.

— Mi komprenas... Ĉiuj malĝojas. Kaj nature estas, ke via malĝojo estas multe pli granda. Nun, antaŭ mi, vi povas plori, sed tiun matenon...

— Tiun matenon, mi ne ploris.

— Bone! Ĝuste kiam la malamikoj povas sin ĵeti sur nin, necese estas forviŝi la larmojn kaj resti batalpreta!

— Mi timas nur, ke Thuji tion scias.

— Tute certe, sed plej bone estos, se ŝi tion scios, post tiu batalo.

Kujen silentas, mordetante la borderaĵon de la jako de Ngan. Iun momenton poste, oni ne scias pro kio, ŝi abrupte diras :

— Vi tre ofte malmilde riproĉis min !

— Kiam ? — Ekmemorante pri tio, kion li ĵus diris al ŝi, Ngan eksplodas per rido :

— Kiel lastnaskitino, vi estas ordinare dorlotata de panjo ; tial, mi jam uzas tiajn parolojn. Kaj vi trovas ilin malmildaj ?

— Do, vi jam milde parolis!

Ngan denove ridas :

— Sufiĉe pri tio ! Nun vi iru dormi. Morgaŭ, sendube ankoraŭ ne retiriĝos la malamikoj. Kaj morgaŭ, nia rezistado jam daŭros ĝuste unu semajnon !

— Unu semajnon ! Tamen, mi trovas ĝin tiel longa !

— Ĉar vi konstante pensas pri la malamika retiriĝo Kiu senpacience atendas ion, trovas la tempon ĉiam longa.

— Ne ! Ĉar mi trovas, ke forpasis nur sep tagoj kaj tamen nin trafis multaj okazaĵoj.

Ngan balancas sian kapon :

— Jes, multaj okazaĵoj !

Post momenta paŭzo, li daŭrigas :

— Nur dum sep tagoj ! Do, oni tute ne miras, ke dum sep lastaj jaroj, en nia Sudo okazis tiom da aferoj. Sinofero, malamo, heroeco... ja nenio mankis.

— Tiujn lastajn noktojn mi neniel povis fermi la okulojn...

— Vi iru dormi, mi petas; mi devas reatingi mian postenon ĉe la kaverna faŭko. Eble, jam ĉesas la pluvo!

Kujen strečas siajn orelojn. Ŝi ne plu aŭdas la pluvakvon, kiu susurante fluas tra la rokfendoj. La flagranta flamo de la vakskandelo, plantita sur la ŝtonbloko, preskaŭ estingiĝas. Antaŭ ol foriri, Ngan sin klinas sur la vizaĝon de Kujen kaj premas unu kison sur ŝian vangon, ĝuste kiam la lumo de kandelo ĵetas sian lastan ekbrilon kaj abrupte estingiĝas.

Kujen kuŝas iun momenton sur sia ŝtonbloko, kiam alvenas la knabeto Ut. Starante ĉe ĝia bazo, li levas supren sian vizaĝon kaj demandas:

— Ĉu vi dormaș aŭ ne, franjo Kujen?

— Mi ne dormas. Ut, ĉu ne?

— Jes...

Kujen ekleviĝas, etendas sian brakon kaj supren tiras la knabeton. Lia mano estas tute malvarma. Ŝi palpas lian tutan korpon kaj trovas liajn vestojn kaj kapharojn ankoraŭ tute malsekaj.

— Vi ĵus prenis banon, ĉu ne?

— Jes!

Poste, Ut flustras al ŝi en la orelon: « Franjo Kujen, ĉu vi estas informita, ke niaj vilaĝaj gerilanoj jam senkapigis la kanajlon Xam?

— Kiu komunikas al vi tiun novaĵon? — Demandas Kujen, tute surprizita.

— Franjo Ka My ĵus venis al la kaverna faŭko, alportante al ni rizon. Ĉu tion vi scias?

— Ka My ! Kie troviĝas nun Ka My ?

— Ŝi jam revenis hejmen. Ŝi venis ĉi tien, ĝuste kiam pluvegis. Ŝi sciigis al ni, ke niaj gerilanoj estis mortigintaj la kanajlon Xam kaj lian korpogardiston. Ŝia patrino jam fuĝis aliloken... Kaj pro kio Ka My tiel amare ploris ? Ŝajnis, ke la malamikaj soldatoj jam faris ion kontraŭ ŝi...

— Ĉu vi propraokule vidis ŝin ?

— Jes, antaŭ nelonge, mi restis tie, ĉe la kaverna faŭko... Torente pluvis, kiam aŭdiĝis krioj : « Kamaradoj, jen venas via Ka My ! » Mi tuj kuris eksteren kun kelkaj onkloj. Ka My pasigis al ni rizon kaj mangaĵojn, rakontis al ni tiun okazaĵon, poste ploregis. Kiam ŝi kure revenis hejmen, dank'al ekbrilo de l' fulmo, mi vidis, ke ŝiaj vestoj estis komplete ŝiritaj.

Tiel anhelante rakontas la knabeto Ut. Li firme asertas, ke veron li diras kaj, ekprenante la manon de Kujen, li daŭrigas :

— Se vi ne kredas al mi, vi iru kun mi peti pliajn klarigojn al niaj onkloj !

Kujen etendas siajn krurojn al la rando de la ŝtonbloko kaj lasas sin gliti malsupren. Ŝi sekvas la knabeton Ut ĝis la kaverna faŭko kaj renkontas tie kamaradon Hai Thep. Ŝi tuj demandas :

— Ka My ĵus venis ĉi tien, ĉu ne, fraĉjo Hai ?

— Jes. Ŝi alportis al ni rizon kaj tabakon. Oni ja ne atendis, ke niaj vilaĝaj gerilanoj jam sukcesis likvidi tiun kanajlon Xam. Tre bone !

— Ut ankaŭ sciigis tion al mi, sed mi ne kredas al li. Do, vere, Xam estas mortigita ?

Jes, mortigita! Kaj sinjorino Ka Soi jam forkuris, oni ne scias kien.

La knabeto Ut sin enmiksas en la konversacion:

— Eble ŝi rifuĝas nun en nian «no»*-kabanon.

— Pro kio vi scias tion?

— Tie estas tre sekura loko!

Hai Thep ne plu atentas tion, kion diris Ut kaj sin turnas al Kujen:

— Mi tre kompatas vian amikinon Ka My. Vere, ŝi estas tre brava. Antaŭmomente, vidante ŝin plori, mi suspektis, ke jam okazis al ŝi io bedaŭrinda. Post mia insista peto, ŝi nur diris: «Mi malsekretigos tion al vi nur post kiam vi sukcesos eliri el la kaverno». Ĉe tiuj vortoj, ŝi forkuris. Strange! Ŝiaj vestoj estis tute ŝiritaj!

— Ĉielo! — Subite ekkrias Kujen.

Ŝi enŝovas en la buŝon sian fingron, mordetas ĝin kaj restas tiel senparole. En la nokta mallumo, kvazaŭ ekaperas antaŭ ŝi Ka My, kun ŝia sunbrunigita vizaĝo, kiu ĉiam leviĝas supren kaj ŝiaj ordinare humidaj okulanguloj, kiuj fariĝas nun pli malsekaj. Ambaŭ okuloj de la junulino ankaŭ ekaperas ĉiam honestaj kaj ĉiam kompatinde naivaj. Kujen rememoras tiun momenton, kiam Ka My brue ridis ĉe la torentobordo, vektoportante la marmitojn al Tri Ton, kun ŝvitoplena frunto, sur kiu algluiĝis kelkaj fasketoj da frizitaj haroj. Kaj ankaŭ tiun momenton, kiam Ka My teksis la «karon»-sakojn, ĉiam kantante la kanton «La

---

* *No* = surfosta fiŝista kabano, starigita sur la rivero mem.

Princo senkapigas la monstro-serpenton ». En ĉiu sunplena posttagmezo Ka My iris al la torento, metis la kruĉojn sur ĝian bordon kaj per lertmovaj manoj dancis iun dancon de ŝi kreitan. Tiel, en palpebruma daŭro, Kujen rememoras ĉiujn vizaĝtrajtojn kaj ĉiujn gestojn de Ka My, eĉ tiun bruan kaj varman kison, kiun Ka My jam premis sur ŝian vangon.

Ekaŭdante pri tio, ke Ka My povis esti seksatencita de la malamikaj soldatoj, Kujen tre doloras kaj tre kompatas sian amikinon. Tamen ŝi volas ne kredi al tio.

— Kiu scias, ĉu vere Ka My estas seksatencita? — Diras Kujen al Hai Thep. — Frato mia, mi ankoraŭ dubas pri tio!

Malgraŭ, ke ŝi tion diras, Kujen havas ĉiam tian antaŭsenton, kvazaŭ tiu afero povus okazi.

2

La pluvo ĉesis ĉirkaŭ noktomeze. La sekvantan tagon, la ĉielvolbo super Hon Dat denove sereniĝas. La vegetaĵaro, tralavita per tiu nokta pluvo, fariĝas nun pure verda.

La malamikoj okazigas neniun novan atakon. Sidantaj en dezerta bubalejo uzita kiel kampadejo, la kaporalo Ko kaj la tri soldatoj de la sama plotono emociplene atendas, horon post horo, la finon de la tago. Ili esperas,

ke ĉio glate iros ĝis la noktiĝo, por ke ili povu akurate veni al la rendevuejo, kie atendos ilin onklino Ba U. Sed, kia malbonŝanco ! Ĝuste kiam vesperiĝas, la kaporalo Ko estas neatendite kunvokita de la leŭtenanto-rotestro.

— Vi revenu al via trupunuo kaj konduku vian plotonon al la komandejo de la roto.

La kaporalo ektremas kaj, retenante sian spiradon, aŭskultas sian ĉefon.

— Ĉi vespere, — daŭrigas tiu lasta, — ni organizos kinoprezentadon por la Vjetkongoj kaj la vilaĝanoj... Viaj soldatoj respondecos pri transporto de materialoj kaj instalado de la ekrano.

— Jes...

Ko faras malpezigan elspiron, poste demandas :

— Ĉu ni devas ekiri nun ?

— Jes, tuj !

La kaporalo diras al si en la pensoj : « Kia malfeliĉo ! Kiel fari por renkontiĝi kun onklino Ba U ? »

Alvenante al la bubalejo, li krie ordonas al sia plotono fari ĉiujn pretigaĵojn kaj vokas aparte unu el la tri soldatoj, kiuj dizertos kun li, por flustri en lian orelon :

— Rapidu al la trinkejo por sciigi al onklino Ba U, ke ĉi vespere, ni estos okupitaj. Demandu ŝin, ĉu ni povos veni iom malfrue, ĉirkaŭ la oka aŭ naŭa. Poste, tuj revenu por doni al mi sciigon pri tio.

La kaporalo Ko kondukas baldaŭ sian plotonon al la komandejo de la roto.

Ekvidante la kaporalon Ko veni kun sia plotono, la rotestro diras :

— Vi ĉiuj venas por prepari la kinoprezentadon, ĉu ne?

— Jes.

— Do, sekvu min!

Tion dirinte, li kondukas la plotonon al la ĝardeno de «mang-kaŭ»-oj. Tie, aro da homoj, virinoj kaj maljunuloj, jam kaŭre sidiĝas sub la gardo de kelkaj sekurecaj soldatoj.

Inter tiuj maljunuloj estas ankaŭ onklo Tu Raŭ, patro de la knabeto Ut. Li estis arestita, dum li alportis fiŝojn al la vilaĝo por ilin vendi. Li senĉese grumblas:

— Vi devigas min labori ĉi tie; do, kiu restas hejme por zorgi pri miaj fiŝretoj? Cetere, tiun ĉi laboron mi ne scias fari.

— Oni montros al vi, kiamaniere fari. Ĉu decas, ke vi senĉese tiel grumblas, forlasante nur unu seancon de fiŝkaptado? Vi ja estas tro monavida. Ĉu vi ne vidas, ke ni batalas kontraŭ la Vjetkongoj por via propra feliĉo?

— Tian feliĉon mi ne volas ĝui! — Flegme respondas onklo Tu Raŭ.

La subleŭtenanto-vicrotestro bolas de kolero. Li proksimiĝas al la maljunulo kaj zorge rigardas lian vizaĝon jen dekstre, jen maldekstre.

— He, kiel vi nomiĝas?

— Mi estas Tu.

— Mi demandas vin, kiel vi nomiĝas.

— Mi jam respondas, ke mi estas Tu.

La vicrotestro tuj eklevas sian brakon por prove doni fortan pugnobaton al la vizaĝo de onklo Tu Raŭ. Sed tiu lasta jam lertmove retenas lian manon. Ekvidante tion, la virinoj grandpaŝe alkuras:

— Ĉielo! Pro kio vi frapas lin? Vi demandas lin pri lia nomo kaj li jam respondas al vi. Do, pro kio vi ankoraŭ frapas lin?

Iu maljunulo sin turnas al la subleŭtenanto:

— Sinjoro, vi malpravas! Li vere nomiĝas Tu. Ni estas liaj samvilaĝanoj, ni kutime nomas lin onklo Tu Raŭ.

— Fi! Ĉu Tu Raŭ, ĉu Tu Ria, tute egale! Ek al laboro!

Aŭdiĝas konfuzaj voĉoj el la virina grupo:

— Nenien ni iras! Fariĝu, kio volas!

Por ne trogravigi la situacion, onklo Tu Raŭ mildvoĉe admonas:

— Nu ni ekiru, onklinoj!

Ĉe tiuj vortoj, li subite ekpaŝas kaj, preterpasante la subleŭtenanton, li parolas sufiĉe klare por esti aŭdebla de li:

— Vi estas Vjet-ano, tial mi nur retenas vian manon. Sed se la Jankio tiel frapus min, mi jam tordus al li la kolon!

La subleŭtenanto ĵetas flugan rigardon sur la la maljunulon, ankoraŭ tute fortikan, kun densa barbo kaj grasrondaj ŝultroj. Poste, li ankaŭ ekiras, peze kaj komplete senvorte,

La virinoj obeeme postiras onklon Tu Raŭ. Laŭ ordono de la vicrotestro, la soldatoj kondukas ĉiujn homojn en direkto al la kaverno kun bambuoj, segiloj, tranĉilegoj... Ili devas starigi unu grandan kadron el bambuo antaŭ la kaverna faŭko.

Dum la vilaĝanoj fosas teron kaj starigas fostojn sub lia gardo, la kaporalo Ko konstante ĵetas rigardon sur la kavernon. « Restas ankoraŭ kelkaj horoj kaj mi min forsavos de tiu loko! — Li diras al si en la pensoj. — Do, mi devas resti vigle singarda. La soldato, kiu revenas de la trinkejo de onklino Ba U sciigas al li, ke en iu ajn cirkonstanco, ŝi atendos ilin ĉe la vojkruciĝo Si Ly por forkonduki ilin; frue aŭ malfrue, ili devas foriri tiun nokton mem kaj estas neeble prokrasti tiun foriron.

Nur post multaj sencelaj diskutoj kaj kiam vesperiĝas, la bambua kadro estas starigita por pendigi la kinoekranon.

La kaporalo Ko reatingas kun sia plotono la bubalejon, kiam falas la nokto. Kun siaj tri soldatoj, li provizore manĝas kelkajn bovlojn da rizo, poste surŝultrigas sian fusilon kaj elŝteliĝas.

Alvenante al la vojkruciĝo Si Ly, il vidas neniun. Unu flustre demandas la alian :

— Strange! Pro kio ni ne vidas onklinon Ba U?

— Ĉu vi bone aŭdas ŝiajn rekomendojn? — Demandas la kaporalo Ko.

Ĝuste tiam, leviĝas virina voĉo el la vojrando :

— Vi estas tie, ĉu ne?

Vere, estas la voĉo de onklino Ba U; sed ŝi estas ankoraŭ nevidebla. Iun momenton poste, aŭdiĝas susurado de folioj kaj branĉoj ĉe la vojrando:

— Jen mi!

Kaj tuj el iu apuda arbustotufo ekaperas la grasdika silueto de onklino Ba U, flustre demandante:

— Ĉu vi ĉiuj alvenas?

— Ĉiuj senescepte!

— Pasigu al mi ĉiujn viajn fusilojn kaj kartoĉojn!

La kvar soldatoj demetas siajn armilojn kaj tremetante transdonas ilin al onklino Ba U. Ŝi rapidmove ekprenas la fusilojn, du por ĉiu mano, kaj malaperas en la arbustotufo. Iun momenton poste, ŝi elŝoviĝas el la densejo kaj transdonas al ĉiu soldato unu paketon el petiolo de arekujo, kiu ankoraŭ eligas varmetan vaporon:

— Jen rizporcio por vi, amikoj! Estas ankaŭ kokaĵo en ĝi.

La kvar soldatoj iom klinante sian kapon ricevas la paketon, poste sin pretigas por sekvi la virinon, kiu jam urĝpaŝe antaŭeniras. Preterpasinte ĉirkaŭ tricent metrojn for de la vojkruciĝo, ŝi flankeniĝas por preni vojon tra la rizejoj. La soldatoj kvazaŭ kurante postiras ŝin. Post unu vojiro, alvenante meze de l'rizkampo, ili subite aŭdas obtuzan voĉon el laŭtparolilo instalita en la vilaĝeto.

— Kio okazas? — Demandas onklino Ba U, iom maltrankvila.

— Oni kolektas la vilaĝanojn por kinoprezentado,

Baldaŭ, la rivero Vam Rang ekaperas antaŭ iliaj okuloj, kvazaŭ fendo, kiu verŝas al la maro sian iom post iom elĉerpitan akvon. De tempo al tempo, el ĵa akvofluo leviĝas muĝado, kvazaŭ raŭkiĝinta homa voĉo, ĩneze de dezerta kaj seka kampo.

Onklino Ba U sin direktas rekte al la riverbordo. Kaj tuj post kelkaj klakfrapoj de ŝiaj manoj, ĉe la transa bordo, neatendite, vidiĝas kelkaj virinaj siluetoj kun elstara hartubero.

— Franjo Ba U, ĉu ne ?

— Jes.

— Lasu ilin trapasi la riveron ! Ili nur travadu, la akvo ne estas profunda !

Onklino Ba U sin turnas al la kvar soldatoj :

— Nun, vi povas mem foriri. Mia tasko finiĝas ĉi tie !

Poste, ŝi elpoŝigas iun paketon, kiun ŝi transdonas al la kaporalo Ko :

— Jen tricent piastroj, kiujn la onklinoj de la vilaĝo donas al vi.

Ko retiras sian manon. Sed la virino jam enmanigas la monon al li, dirante :

— Gardu tiun monon por viaj elspezoj dum la vojaĝo. Ĝi estas donaco de la vilaĝaj onklinoj ; vi povas preni ĝin sen ia timo.

La kaporalo estas devigita akcepti la monon. Li restas iun momenton tute konfuzita, balbutante kelkajn neklare aŭdeblajn parolojn. Baldaŭ, adiaŭinte onklinon Ba U, la kvar soldatoj demetas siajn ŝuojn kaj, unu post alia, vadas en la ŝlima riverbordo.

De la transa bordo, iu virino alparolas la soldatojn, kiuj penege travadas la riveron:

— Portu nur duonpantalonon; kaj vian soldatan uniformon demetu kaj forĵetu en la riveron! Ĉi tie, oni jam pretigas novajn vestojn por vi!

La kvar soldatoj obeeme demetas siajn vestojn meze de la senakva fluejo. Ili buligas tiun kostumon de sekureca soldato kaj forĵetas ĝin sur la ŝlimejon, antaŭ ol per piedpremo enŝovi ĝin profunde en la koton.

En la nokta duonlumo, onklino Ba U ankoraŭ vidas la silueton de tiuj soldatoj, kiuj ĵus demetis sian uniformon preskaŭ atingi travadante la transan riverbordon. Nur nun ŝi estas vere kontenta pri sia plenumita tasko. «Tiel, — ŝi diras al si en sia koro, — ni jam «gajnas» kvar homojn, kvar kontraŭulojn malplie!». Kaj ŝi revenas hejmen, nur kiam la kvar soldatoj metas siajn piedojn sur la transan bordon.

Alvenante al la vilaĝa enirpordo, onklino Ba U aŭdas teruran tumulton, kiel zumadon de abelsvarmo kaj la kolerkriegojn de la soldatoj en la vilaĝeto. Ŝi hezitas iun momenton, antaŭ ol eniri. Apenaŭ atinginte la ĉefan vojkrucigon, ŝi estas tuj arestita de iu soldato, kiu laŭtvoĉe krias:

— Jen plia kaptita virino!

Onklino Ba U terurite volas repuŝi la kanajlon por forkuri. Sed, subite alvenas alia soldato, grumblante:

— Fi! Kiel idiotaj estas la ĉitieaj loĝantoj. Oni kolektas ilin por kinoprezentado, kiel kokinojn en birdokorto.

— La virino komprenas nun la kialon de tiu konfuzego. Ŝi ne plu forkuras kaj forte baraktas por sin liberigi el la mano de la soldato :

— Malretenu min kaj lasu min mem iri. Por kio taŭgas tiom da furiozeco ?

La kanajlo tuj maltenas la manon de onklino Ba U kaj diras :

— Sinjorino, vi iras aŭ ne, tio ne estas mia afero ! Se mi sukcesas venigi vin al kinoprezentado, mi ankaŭ gajnas neniun plian cendon. Tion mi faras, nur laŭ ordono de la majoro.

— Do ni ekiru !.. Sed, kian filmon oni prezentas hodiaŭ, knabego ? Kaj kie ?

— Eble, vi jam tro frue enlitiĝas por ne aŭdi, kion oni plurfoje disaŭdigis per laŭtparolilo. Oni prezentos usonan filmon kaj antaŭ la kaverno.

Tion ja tute bone komprenas onklino Ba U, kaj trovante necesa veni tien, ŝi volonte iras sen fari plian proteston. Dumvoje, ŝi renkontas grupon da ankaŭ perforte kolektitaj vilaĝanoj ; ili estas la lastaj homoj, kiujn la soldatoj ĵus arestis.

Kiam alvenas onklino Ba U, la senkultura terspaco antaŭ la kaverno jam estas homplena. El la laŭtparoliloj pendigitaj ĉe la supro de bambustangoj, senĉese eliĝas laŭtaj krioj, admonantaj la spektantojn al ordo. Malgraŭ tio, sur la placo regas ĉiam terura tumulto. Ĉi vespere, la subleŭtenanto de la psikologia militfako ludas vere elstaran rolon. Liaj kriegoj el la laŭtparoliloj montras ne koleron, sed entuziasmon. Ĉar fine, lia iniciato estas nun realigita : la eksplodmotoro jam

startas, la ekrano el blanka tolo estas pendigita kaj almenaŭ mil homoj estas kolektitaj sur tiu terspaco.

Spite, ke ankoraŭ tumultas la homamaso, perforte devigita veni ĉi tien, la subleŭtenanto ĉiam firmdecide komencas la kinoprezentadon. Li solene deklaras:

— Respektindaj sampatrujanoj, hodiaŭ mi havas la honoron prezenti al vi plej interesan filmon, kiun ni ĵus ricevis de niaj superuloj. Mi turnas vian atenton sur tion, ke tiu filmo temas pri tre fama batalo en Koreio: la usona armeo atakas kaj eksplodigas unu monton, nomitan Ŝan Kam Lin.

La elektra lumo subite estingiĝas. La kinoaparato komencas surure turniĝadi. Sur la ekrano, ekaperas aro da aviadiloj. Poste, impetas la infanterio. Kapvestitaj per ferkaskoj, la usonaj soldatoj kuras malantaŭ tankoj kun tre longaj kanonoj.

Tiuj unuaj bildoj vere havas sian logpovon. La tumulto iom post iom kvietiĝas.

Ĉe la kaverna faŭko, la gardostarantoj ankaŭ klare vidas tiun kinoprezentadon.

— Ne povante nin venkobati per armiloj, — rimarkas Hai Thep, — tiu kanajlaro elpensas nun tiun animskuan kinoprojekcion. Oni vidos...

Mallevante sian fusilon, Ngan atente okulsekvas la scenon. Kvankam la ekrano troviĝas iom malproksime de la kaverno, li tamen klare vidas sur ĝi la obusojn eksplodi kun densa fumo, eĉ la brilajn ferkaskojn kaj la vindgamaŝojn de la ĉini-koreaj batalantoj, kiuj haste forkuras en profundan kavernon. «Certe,—Ngan diras al si en la pensoj, — oni jam devigis la soldataĉojn de

Singman Ri kaj Ĉiang Kajŝek ludi la rolon de tiuj batalantoj !... ».

Sur la ekrano, aperas la ĉini-koreaj trupoj, disbatitaj de la usonaj aviadiloj, tankoj kaj infanterianoj, poste puŝpelitaj, unu post alia, en la kavernon. Ne povante plu sin regi, Ngan sputas insultojn :

— Hundaĉoj ! Ili distordas la veron pri la batalo sur Ŝan Kam Lin ! Tiun filmon jam turnis niaj ĉinaj kamaradoj, kaj mi vidis ĝin antaŭ la pacrestariĝo.

— Jes, mi ankaŭ... — Diras Trong.

Ngan tuj daŭrigas :

— Kiu iras serĉi por mi voĉtubon ?

— Lasu min iri !

La ekrano komencas prezenti scenojn de akraj sturmoj. La usonaj soldatoj per pluraj atakondoj invadas la kavernon. Ili estas ankaŭ repuŝitaj malantaŭen. Poste, la putoj, kiuj troviĝas ĉirkaŭ la monto estas okupitaj de la Usonanoj. En la kaverno, la ĉini-koreaj batalantoj tute konsumiĝas pro malsato kaj soifo. La usonaj soldatoj denove sturmas kun ekstrema furiozeco. Jen la ĉini-koreaj batalantoj subfleksiĝas ĉe la kaverna faŭko, kun balanciĝantaj manoj, el kiuj jam falas iliaj mitraletoj kun truhava kanontubo.

La laŭtparoliloj ne ĉesas fanfaroni kaj komentarii. Fine, la voĉo iĝas pli urĝa kaj konfuza :

— La ĉinaj komunistoj kaj la Nordkoreanoj estas tre obstinemaj. Kvankam preme ĉirkaŭsieĝitaj, ili tamen ne kapitulacas. La usonaj trupoj estas devigitaj eksplodigi la kavernon. Jen estas la momento, kiam ili enŝovas la eksplodaĵojn en ĝin.

Ĝuste tiam, sur la ekrano, ekaperas grupo da usonaj soldatoj, impete kurantaj en la kavernon kun eksplodkesto sur la ŝultro, sub la protektaj pafadoj de ĉiukalibraj pafiloj. Fine, la tuta monto eksplodas, disĵetante ĉielen sennombrajn ŝtonblokojn kaj terbulojn.

La subleŭtenanto de la psikologia militfako emfaze konkludas :

— Karaj sampatrujanoj, sendube vi jam klare vidas, ke tiel granda monto devas ankaŭ disrompiĝi. Do, ĉu tiu kaverno Hon Dat povas longe rezisti ?

Ĉe tiuj vortoj, la laŭtparoliloj subite sin direktas al la kaverno. Ĉiam sonas tiu entuziasma voĉo de la subleŭtenanto :

— Allo, allo ! Vjetkong-elementoj rifuĝantaj en la kaverno, aŭskultu niajn konsilojn : tuj kapitulacu ! Alie, la Respublika Armeo estas devigota eksplodigi vian kavernon, kiel vi vidas sur tiu ekrano...

Senprokraste, Ngan eklevas sian voĉtubon kaj kriegas :

— Samvilaĝanoj, aŭskultu nin ! La malamiko ĵus prezentis al vi tromperarigajn filmojn, kiuj komplete distordas la veron. Ne fidu al ili ! Tiun historion ni tre bone konas : la ĉinaj batalvolontuloj kaj la koreaj soldatoj estis ĝuste tiuj, kiuj jam enterigis la usonajn piratojn ĉe tiu monto.

Apenaŭ dirinte tion, Ngan estas interrompita per tondro da aplaŭdoj de la ĉeestantaro.

Li tuj daŭrigas :

— Samvilaĝanoj, ni batalos ĝis la lasta homo, ĝis la lasta spiro. Ni ĉiuj ankoraŭ vivas kaj ni ĉiuj ankoraŭ

batalas! He, tiuj bandaĉoj, kiuj blinde sekvas la Usono-Dzieman klikon, eniru ĉi-tien, se vi estas kapablaj,... se vi ne timas, ke ni pafrompos al vi la kranion!... He, larĝe malfermu viajn okulojn por rigardi...

Ngan forĵetas la voĉtubon, ekprenas sian «Thompson» - on, celdirektas ĝin al la ekrano kaj premas la pafrisorton. «Pam, pam, pam!» Aŭdiĝas tri sinsekvaj pafoj. Sur la blanka ekrano ekaperas tri nigraj truoj, unu tuj apud alia. La spektantoj denove aplaŭdas kaj furioze kriegas.

— Sufiĉe! — malkonsilas Hai Thep. — Ne plu pafu! Ni devas ŝpari niajn kuglojn.

Kiam la malamiko komencas kontraŭagi, pafante per mitraloj al la kaverno, Ngan kaj liaj kamaradoj jam sin kaŝas malantaŭ la ŝtonblokoj. Apenaŭ ĉesiĝas la pafuraganoj, Ngan tuj reprenas sian voĉtubon kaj diras:

— Karaj soldatoj, ni konsilas al vi ne plu ataki nian kavernon, ĉar vi vane perdos vian vivon. Plej bone estus, se vi postulus vian rehejmiĝon aŭ se vi dizertus. Se vi obeus al viaj estroj por ĵetiĝi sur nin, ni devus pafi. Kaj kiam ni pafos, vi nepre pereos sub niaj kugloj. Memoru, ke ĉi tie, ni neniam maltrafas la celon.

Dua pafuragano denove direktiĝas al la kaverno. Ŝajnas, ke la mitralpafanto ĵus faris novan ŝargon. Sed, intertempe, Ngan jam sukcesas en sia entrepreno.

Tiel bankrotas la seanco de kinoprezentado. La spektantoj ekbruligas sian torĉon kaj revenas hejmen. Voĉoj kaj rideksplodoj aŭdiĝas ĉie en la ĝardenoj. La

subleŭtenanto de la psikologia militfako anhelante blasfemas kontraŭ la majoro :

— Mi jam diris, ke ne estas oportune partoprenigi la vilaĝanojn al tiu kinoprezentado. Oni ne aŭskultis min kaj jen la rezulto de tiu troprofitemo !... Supoze, ke tiu sendisciplina amaso ne venus ĉi tien, estus tute egale, ĉu la Vjetkongoj senkuraĝiĝus aŭ ne post la kinoprojekcio... Sed, ho ve !...

Dume, la majoro ĉiam komforte sidas en sia domo manĝante kaj trinkante. Neatendite, alkuras iu soldato por raporti al li la novaĵon. La militestro tuj ĵetas teren sian glason, kiu brue disrompiĝas, poste li eksplodas per ridoj :

— Do, ĉio fiaskas ? Vere sensperta li estas, tiu subleŭtenanto Sanh. Tuj kiam li proponis al mi tiun projekton, mi jam dubis pri ĝia sukceso. Sed, pro lia insista peto, mi fine konsentis lasi lin libere agi. Se vi volas kompreni la Vjetkongojn, turnu vin al mi. Kiam mi estis ankoraŭ distriktestro en Xeo Ro, mi katenis ilin kaj frapis ilian kapon per martelo, tamen ili ne timis. Apenaŭ la unua subfleksiĝis, tuj la dua ekstaris, ĉiam kun la plej natura flegmo. La Vjetkong-aktivulinoj same kondutis. Dum niaj disrabaj operacioj, ni sukcesis aresti kelkajn el ili. Ni enigis pinglojn en iliajn fingroekstremojn. Ni ankoraŭ ne havis la tempon preni martelon por penetrigi profunden la pinglojn, kiam unu el ili diris : « Rigardu ! », poste forte frapis siajn dek fingrojn sur la muron, ĝis la pingloj komplete eniĝis en la karnon. Tiaj estas la Vjetkongoj ! Ĉu vi ne vidis, lastan tagon, tiun virinon, kiu ĉiam insultis nin, kvankam ŝia kolo estis preskaŭ fortranĉita ? Do,

kredi al tio, ke oni povus uzi kinoprezentadon por skui ilian batalspiriton estas nur iluzio!

La majoro parolas, insultas kaj denove plenigas per brando alian glason, antaŭ ol meti la botelon sur la tablon tiel forte, ke la alkoholaĵo elversiĝas super la glasrando. Li eklevas sian pugnon, kvazaŭ premplatigante ion en la aero:

— Sufiĉe!... Preterlasu tion...

Poste, li abrupte sin turnas flanken:

— Leŭtenanto Tu!

— Jen mi!

Urĝpaŝe alkuras ĉirkaŭ kvardekjara viro, staranta kun dorso apogita al la muro. La majoro tuj diras al li:

— Ordonu, al viaj soldatoj, ke ili preparu cementon kaj transportu brikojn al la kaverno, laŭ nia antaŭfiksita plano.

— Tuj hodiaŭ, mia majoro?

— Jes, tuj hodiaŭ! Rapidu! Morgaŭ matene, oni plenŝtopos la kavernan faŭkon kaj ĉio glate finiĝos!

3

— Ka My, mia penado ne estis do vana, kiam mi devis plenumi mian servuton al la malamiko. tiun posttagmezon. — Diras onklo Tu Raŭ. — Min tute ravis tio, kion diris niaj kamaradoj en la kaverno.

. . Survoje al la strando, Ka My postsekvas onklon Tu Raŭ. La knabeto Ut estis ja prava en sia konjekto. Vere, sinjorino Ka Soi trovi̯gas nun en la « no »-kabano. Antaŭ kelkaj tagoj, la vila̯ganoj sendis ŝin al la fiŝista vila̯eto. Sed, pro tio, ke ŝi estis severe persekutata de la malamikoj, onklo Tu Raŭ jam kaŝis ŝin hieraŭ en la « no »-kabano.

Kiam estas neniu homa ombro sur la vojo, Ka My demandas :

— Onĉjo, kiel fartas nun mia patrino ?

— Ĉiam bonfarta.

— Ĉu ŝi estas ankoraŭ malg̑oja ?

— Ne,... male, mi trovas ŝin iom ŝang̑ita...

— Kiel ? Ŝang̑ita ?

— Mi ne scias, pro kio nun ŝi montras sin tre vigla en sia laboro.

— Kia laboro ?

— Ŝi kuiras rizon kaj flikas fiŝretojn por mi. Kompatinde ! Verdire, ŝi ankoraŭ ne sukcesas forigi sian malg̑ojon...

Ka My ne plu demandas. Premante sian bruston per ambaŭ manoj, ŝi etpaŝe iras. Antaŭ ŝi, la marondoj trembrilas sub la lunhelo kaj plaŭdante lekas la sablobordon. Tiel, meze de l' lunlumo kaj ondobruo, ŝi antaŭenpaŝas, dum el ŝia naiva koro konstante levi̯gas tiom da indigno kontraŭ la malamikoj.

Hieraŭ, ŝian domon incendiis tiuj lastaj. Kaj nun, ŝi ankoraŭ timtremas, aŭdante la krakbruon de sekaj palmoj de kokosujo, ĉar g̑uste sur tiuj laȓgaj folioj,

kelkaj malamikaj soldatoj jam laŭvice seksatencis ŝin, dum ŝi alportis rizon al la kaverno.

La barko de onklo Tu Raŭ ankoraŭ kuŝas sur la strando. La marondoj seninterrompe plaŭdas kontraŭ ĝia poŭpo. La maljuna fiŝisto proksimiĝas al sia barko kaj, helpate de Ka My, puŝas ĝin al la maro. Ĝia pruo malsupren glitas kaj fendas la ondojn, postlasante sur la sablobordo longan kaj larĝan vojsulkon.

Onklo Tu Raŭ remas samfoje direktas la barkon per unusola remilo. Li uzas ĉiujn siajn fortojn por remi, sed ĝi antaŭen glitas kun granda peno pro kontraŭdirekta vento. Baldaŭ ĝi tangas laŭlonge de vico da malklare aperantaj bambustangoj, kiuj kuras foren sur la maro. Tie malproksime, antaŭ la barko flagras, kvazaŭ flosante sur la ondokrestoj, la pala lumo de lampo en la «no»-kabano.

La maljuna fiŝisto, fingremontrante en direkto al tiu lumo, ĝoje diras:

— Via patrino ne forgesas ekbruligi la lampon por min gvidi, kio montras, ke ŝi estas ankoraŭ klarvida kaj bonfarta. Estas nenia motivo por timi.

Ka My rigardas al tiu direkto. Komence, ŝi vidas nur tiun palan lumon de lampo, sed baldaŭ, kiam la barko jam faras sufiĉe longan vojiron, la «no»-kabano de onklo Tu Raŭ iom post iom klare siluetiĝas kontraŭ la ĉielfono.

Sub la arĝenta lunhelo, ĝi aperas, kiel kolombejo, sole flosanta meze de l' marondoj.

Subite, de la strando aŭdiĝas la treniĝanta kaj urĝa krio de «bim bip», anoncanta la ĉiutagan tajdon.

La krio de tiu birdo kun bruna plumaro similas al sono de korno kaj pli kaj pli malfortiĝas ĉe la fino.

— Jam flusas la tajdo. — Diras onklo Tu Raŭ.

— Ĉu vi iras nun viziti la fiŝretojn? Lasu min akompani vin!

— Ne,... nun mi ne havas tempon, Ka My. Atendu, ĝis morgaŭ matene, kiam malflusos la tajdo.

La barko preterpasas la lastajn bambustangojn, poste albordiĝas al la surfosta planko de la «no»-kabano. Ka My rampas ĝis la ŝtuparo kaj, suprenirante ĝin, laŭte krias:

— Panjo, panjo!

Sinjorino Ka Soi saltleviĝas el sia kuŝejo. Ŝi ŝancelpaŝe alkuras. Ambaŭ patrino kaj filino renkontas unu la alian ĉe la surfosta planko. Ĉar ŝia piedo frapiĝas kontraŭ iu ligna elstaraĵo, Ka My subfleksiĝas, ĉirkaŭbrakante la talion de sia patrino. Sub la lunhelo, brilas kelkaj larmogutoj sur ŝiaj leviĝantaj okuloj. Intertempe, onklo Tu Raŭ volvas la barkoĉenon ĉirkaŭ la piedo de la ŝtuparo. La fera ĉeno ĉiam tintas, dum la barko, kvankam zorge ligita al bambua fosto, furioze oscilas jen supren, jen malsupren, ritme kun la ondoj.

La maljuna fiŝisto eniras en la kabanon, prenas unu maton kaj etendas ĝin meze de la planko, antaŭ ol diri:

— Onnjo Ka Soi kaj Ka My, vi ambaŭ kuŝu ĉi tie!

Li iras sidiĝi apud amaseto da ankoraŭ fumantaj rizŝeloj kaj brue blovekscitas la fajron. Poste, li elpoŝigas sian tabakujon kaj, rulvolvante unu cigaredon, daŭrigas:

— Forpasis nur kelkaj tagoj, de post kiam ili venis ĉi tien, tamen ili jam kaŭzis funebrojn kaj suferojn al ĉiuj familioj. Onnjo Ka Soi kaj Ka My, vi ambaŭ ne timu, restu ĉi tie. Vi revenos hejmen, post ilia retiriĝo. Tiam, ni rekonstruos por vi la domon. Kaj ĉe venonta replantado, se al vi mankos rizplantidoj, la najbaroj venos helpe al vi. Do, ne timu...

— Mi havas ankoraŭ ambaŭ manojn kaj la geonklojn. Estas nenia motivo por maltrankviliĝi. Sed...

Sinjorino Ka Soi hezitas iun momenton, antaŭ ol daŭrigi kun plenda voĉo:

— Evidente estas, ke mi suferus, se Xam ankoraŭ vivus. Sed nun, li jam mortis kaj tamen mi suferas...

Onklo Tu Raŭ rigardas al la maljunulino. Li funde komprenas ŝian koron. Sed li diras:

— Ne tiel pensu! Ne pensu plu pri tio! Vi konsideru, kvazaŭ vi ne estus naskinta tiun kanajlon Xam. Ja, antaŭe, la grandbienulo Muu vivtenis kaj edukis lin, poste la Usono-Dziema kliko, per zorga trejnado, jam transformis lin en tiranon. Do, li ne estas plu via filo. Miaflanke, se mi havus tian filon, mi jam de longe senkapigus lin.

Sinjorino Ka Soi restas senvorte. La maljuna fiŝisto daŭrigas:

— Onnjo Ka Soi, ĉi foje, ili venas ĉi tien kun la intenco starigi postenon, poste reakapari niajn terojn kaj nian maron.

— Tion mi komprenas...

— Tio estas por ni vera plago!

— Xam jam malsekretigis tion al mi la tagon, kiam oni punmortigis lin...

— Kion li diris?

— Li sciigis, ke post ekstermo de niaj gerilanoj en la kaverno, li starigos sian postenon ĉi tie.

— Kia teruraĵo! Li estus restinta ĉi tie por akapari rizkampojn kaj kolekti terimpostojn, ĉu ne? Li estus restinta ĉi tie por perforte revenigi niajn samvilaĝanojn al tiu fora tempo, kiam ni devis aĉeti ĉiun kuban metron da tero por fabriki niajn marmitojn, ĉu ne?

Tion dirinte, onklo Tu Raŭ eklevas sian brakon en direkto al la maro:

— Tiel antaŭkalkulis la malamiko! Sed, onnjo, ĉu ankoraŭfoje ni restos kun krucitaj brakoj? Laŭdire, mia filo Be jam perdas unu brakon. Mi ankaŭ tute ne senkuraĝiĝas pro tio. Mi promesas al vi, ke se oni devigas la vilaĝanojn transporti brikojn por konstrui tiun postenon, mi tuj forlasos mian «no»-kabanon kaj aliĝos al la vilaĝa geriltaĉmento. Supozu, ke la malamiko sukcesus okupi la kavernon kaj, ke ĉiuj niaj gekamaradoj foroferus sian vivon, la loĝantoj de tiu Hon Dat nepre daŭrigus la batalon. Tia estas nur supozo! Efektive, niaj gekamaradoj en la kaverno ne estas tiel facile venkobatotaj, ĉu ne?

Ka My aldonas:

— Forpasis jam ok tagoj kaj la kanailoj ankoraŭ ne povas penetri en la kavernon. Ĉiuj hamakoj en la vilaĝeto estas konfiskitaj por evakui la kadavrojn.

— En tia situacio, ili nepre devos retiriĝi. La soldatoj tute senkuraĝiĝas. Jam de kelka tempo, supersutitaj

per minacoj, ĉiufoje kiam ili renkontas niajn vilaĝanojn, ili tre timas. Morgaŭ, mi ankaŭ eniros en la vilaĝeton por vidi...

Ka My proksimiĝas kaj mallaŭte diras al la maljuna fiŝisto :

— Onĉjo, kiam vi trovas necesa alporti rizon al la kaverno, lasu min iri...

Tion aŭdante, onklo Tu Raŭ ektremas. Hieraŭ, patrino Saŭ jam rakontis al li, kiel Ka My estis seksatencita. La knabino plorante diris al la maljunulino: «Mi jam riskis mian vivon, ĉar mi volis alportis rizon al la kaverno por miaj geonkloj».

La maljuna fiŝisto eksentas grandan kompaton al Ka My. Tial, kiam ŝi direktas al li tiun peton, li tuj rifuzas :

— Ne, ne...

Li ekĵetas la tabakcindron tra iu fendo de la planko kaj kun krucitaj brakoj sidas senmove longan momenton, antaŭ ol ekstari, dirante :

— Via panjo jam dormas. Kion vi atendas ankoraŭ ? Mi ankaŭ iras enlitiĝi.

Ĉe tiuj vortoj, li sin direktas al iu angulo de sia «no»-kabano kaj sin enŝovas en sian «nop»-sakon.

— Onĉjo, — diras Ka My, — se morgaŭ frumatene, vi iros viziti la fiŝretojn, veku min kaj prenu min kun vi, ĉu ne ?

— Jes, mi vekos vin !

Iun momenton poste, brue ronkadas la maljuna fiŝisto. Siaflanke, Ka My fermas siajn okulojn nur tre malfrue.

Kiam la «bim bip» per siaj plendaj krioj anoncas la forfluon, onklo Tu Raŭ jam vekiĝas. Li iras al la kuirejo, blovekscitas la fajron kaj fumas sian tabakon. Poste, li blindpalpe serĉas sian retkaptilon, antaŭ ol dorskurbe eliri. Preterpasante la kuŝejon de Ka My, li vidas ŝin ankoraŭ profunde dormi; tial li ne vekas la knabinon, sin direktas rekte al la ŝtuparo kaj malligas la barkoĉenon.

Estas ankoraŭ mallume. La ondoj ĉiam plaŭdas sub dikaj nebultavoloj, plenkovrantaj la marsupraĵon.

Onklo Tu Raŭ barkoremas de la fosto «ong Bon» ĝis la ekstremo de la «no»-kaptejo *. Remante, li diras al si en la pensoj: «Mi jam preterlasas unu fluson, nun nepre abundas fiŝoj en la «no»-kaptejo».

Ŝnurliginte sian barkon al iu bambufosto, li tuj saltas sur la pruon kun la retkaptilo ĉe la mano. En la «no»-kaptejo, kie la akvo jam malaltiĝas, aro da fiŝoj naĝas tien kaj reen, elŝprucigante brilajn akverojn, dum la kankroj klakante per sia vosto saltas ĉiuflanken. Kun disstarigitaj kruroj, onklo Tu Raŭ sin tenas firme sur la pruo, enigante sian retkaptilon en la akvon. Poste, li suprentiras ĝin peze ŝarĝitan per fiŝoj kaj kankroj kaj ŝutas ilin en la barkokelon. Vive baraktas «giong», «goc» kaj «ĉem»-fiŝoj. La maljuna fiŝisto tute lac-konsumiĝas, konstante levante kaj mallevante sian brakon. Restas ankoraŭ kelkaj fiŝegoj freneze naĝantaj

---

* *«no»-kaptejo*: loko ĉirkaŭita de bambuplektaĵoj, ĉe la mara enfluejo. Fiŝoj kaj kankroj penetras en ĝin dum la fluso. Kiam la maro malleviĝas, ili restas enfermitaj en ĝi, ne povante eliri. La ĉefa fosto de la «no»-kaptejo portas la nomon «ong Bon» aŭ «sinjoro Bon», protektanta genio de la fiŝistoj.

ĉirkaŭ la «no»-kaptejo. Li tuj enigas pli profunden sian retkaptilon, kun la intenco fari la lastan kaptadon. Neatendite, la marondoj puŝpelas ion kontraŭ la ekste-ran flankon de la bambuplektaĵo. Kredante, ke iu foce-no erarvagas en tiu ĉi loko, onklo Tu Raŭ tuj elakvigas sian retkaptilon por lasi la «fiŝegon» libere penetri en la «no»-kaptejon. Sed, strange estas, ke flosante ĝis ĝia enirejo, tiu laŭŝajna fiŝego haltas kaj turniĝas perpen-dikle. La maljuna fiŝisto ne scias, ĉu vere ĝi estas fiŝego. Li denove provas preni ĝin per la retkaptilo. Sed, pro kio tio ĉi ĉiam glitas sur ĝi kaj ŝajnas, ke io pezas sub lia mano. Li tuj surgenuiĝas kaj, nur post longa manovro, sukcesas elakvigi parton de tiu stranga «fiŝego». Ektagiĝas. Li strečas siajn okulojn kaj preter-vole eligas fortan krion «Aj!»

Sur la retkaptilo flosas unu distaŭzita hartufo.

Tio estas nur homa kadavro!

Onklo Tu Raŭ reprenas sian flegmon kaj per sia retkaptilo puŝas la kadavron en la «no»-kaptejon. Ne sentante malbonodoron, li ekpensas: «Mi devas elakvigi tiun kadavron». Li tuj ĵetas la retkaptilon en la barkon kaj urĝe remas ĝis la mezo de la «no»-kaptejo.

Post momenta traserĉado, li retrovas la kadavron. Kiam li ekprenas ambaŭ piedojn vestitajn per tolŝuoj, li tuj rekonas, ke la malfeliĉulo estas soldato. Tiam, li volas retiri siajn manojn, dirante al si en la pensoj: «Hm! Ne valoras la penon zorgi pri tiu kanajlo! Lasu lin kuŝi tie, kiel logaĵo por fiŝoj...» Sed, tuj baldaŭ, nova ideo eklumas en lia kapo: «Mi prove elakvigas lin por trovi, ĉu restas ankoraŭ pafilo aŭ grenadoj».

Fine, per la tuta forto, li sukcesas suprentiri la kadavron al la barko. Vere, la malfeliĉulo estas soldato, kun tiu paro da tolŝuoj kaj tiu nigra uniformo, peze sorbigita de akvo. Meze dum la ektagiĝo, kiam la aero estas ankoraŭ nebulplena, la kadavro etendiĝas sur la dorso, tute rigide. Ĉirkaŭ ĝi, baraktas fiŝoj kaj kankroj, ĵus elakvigitaj el la « no »-kaptejo. Onklo Tu Raŭ lavas al si la manojn, poste klinas sin antaŭen. Li ankoraŭ ne sentas malbonodoron. Sed la vizaĝo de la soldato estas tute nigra kaj larĝe fendita. Ambaŭ liaj manoj kun kuntiriĝintaj fingroj leviĝas, kvazaŭ pretaj premi ion al lia sino. La maljuna fiŝisto ne volas longe rigardi tiun vizaĝon, ĉar ĝi donas al li la impreson, kvazaŭ li jam vidis ie tiun mienon. Turmentatan kaj honestan mienon, kiu montras, ke la soldato estis aŭ terkulturisto aŭ fiŝisto aŭ dungita ĉerpisto de lageto aŭ ĵonkoremisto, kiu jam penege laboris sub arda suno kaj batanta pluvo. Ambaŭ liaj okuloj estas aparte strangaj ; ili duone malfermiĝas, vidigante sian okulblankon, kvazaŭ sursemitan per cindro kaj, kiu jam malheliĝas, eble pro nekvietigitaj kolero kaj pento.

Onklo Tu Raŭ estas tute ŝokita, kiam li vidas ambaŭ kuntiriĝintajn manojn de la mortinta soldato ĉiam alten leviĝi. La maljunulo kliniĝas kaj prempuŝas ilin sur la bruston. Sed ili ĉiam rigide leviĝas, kvazaŭ volante ĉirkaŭbraki ion. Sed, inter tiuj mortintaj brakoj estas nenio alia, krom la forfandiĝanta nebulo, la akva vaporo leviĝanta el la maro kaj la matena lumo, kiu iom post iom pliheliĝas.

Ankoraŭfoje onklo Tu Raŭ provpenas prempuŝi la manojn de la soldato. Ĉi foje, li neatendite ektuŝas la dikan kaj malmolan kalon ĉe liaj manplatoj. Li tuj

retiras sian manon, kvazaŭ brulvundita. Iun momenton poste, li delikate reprenas tiun kalan manon de la soldato por ĝin ekzameni. « Ĉielo ! » — Li pretervole krietas. Tiu mano estas kaloplena, krom la mankavo. Ĝi estas iom raspa kaj blanketa, pro longa subakviĝo. Onklo Tu Raŭ iom post iom maltenas ĝin, dirante al si en la pensoj : « Mi ja ne eraras en miaj konjektoj... Tiu soldato certe jam almenaŭ dek jarojn manipulis la plugilon... Jen tiu kalo... ».

Nur post longa hezito, li decidas palpi la tutan korpon de la malfeliĉulo. Neniu armilo. Li trovas en la poŝo de lia jako unu ŝiritan paperujon el bruna artefarita ledo, entenantan kelkajn malsekajn paperojn kaj monbiletojn kun la portreto de Ngo Dinh Dziem. En ambaŭ poŝoj de lia pantalono estas ankaŭ nenio alia, krom unu rizbulo jam moligita.

Onklo Tu Raŭ sidas senparole antaŭ la kadavro. Tute malĝoja, li ne plu atentas pri la kaptado de tiuj fiŝoj, kiuj ankoraŭ abundas en la « no »-kaptejo, nek pri la marondoj, kiuj konstante skuas lian barkon. Nun, lia koro dolore kunpremiĝas, kvazaŭ trapikita per multaj pingloj.

En lia kapo staras samfoje pluraj demandoj : « De kie flose venis tiu kadavro por penetri en mian « no »-kaptejon ? Kiam mortis tiu soldato ? En kiu batalo ? Vere stranga morto ! Sed per tiuj eksteraj signoj, ŝajnas, ke li mortis ne longatempe, antaŭ maksimume du tagoj... La kadavro estus ŝvelinta,... sed, eble pro sala marakvo !... » Onklo Tu Raŭ estas tute perpleksa, ne sciante, ĉu li devas transporti tiun kadavron al la bordo aŭ forlasi ĝin ĉi tie sur la maro.

Subite li ekmemoras pri la soldatoj, kiuj kantonmentas nun en la vilaĝeto : « Ne, mi ne devas forĵeti tiun kadavron en la maron. Necese estas averti onklinon Hai Thep aŭ... konfidi tiun mision al Ka My... ».

Li tuj definitive forlasas la fiŝkaptadon, ekprenas la remilon, turnas la pruon de la barko en direkto al sia « no »-kabano kaj urĝe remas. Dum la barko fendas la ondojn, li senĉese murmuras : « Ho, soldatoj, kiuj jam forlasas kampojn kaj rizejojn, viaj teroj en via hejmvilaĝo estas nun akaparataj de tiuj « bestaĉoj kun homa kapo ». Anstataŭ zorgi pri viaj havaĵoj, vi obeeme sekvas ilin por disrabi viajn sampatrujanojn kaj fine morti tiel mizere !... Vere stultaj vi estas ! Mi devas transporti tiun kadavron al la vilaĝeto por montri al vi la tutan veron ».

4

Aŭdiĝas bruo de kalkano sur la fermoplato de la subtera ŝirmejo. Ĝuste tri batoj ! Tam Ĉan tuj delikate puŝas la fermoplaton kaj ekstaras. Kaŭre sidiĝante ĉe la ŝirmeja faŭko, onklino Hai Thep sin klinas antaŭen kaj murmuras :

— Kamarado, ĵus okazis grava afero...

— Kia afero ?

— Ka My, kiu ĵus revenis de la « no »-kabano de onklo Tu Raŭ sciigas al mi, ke tiu lasta jam elakvigis

unu kadavron de soldato, kiu flosis ĝis lia «no»-kaptejo.

— Kia soldato? El la regula armeo aŭ sekureca armeo?

— Soldato el la regulaj trupoj kun kakia kostumo kaj vundita ĉe la ventro. Mi suspektas, ke li estas ĵetita de la helikoptero en la maron.

Tion aŭdante, Tam Ĉan elŝovas sian kapon el la ŝirmeja faŭko kaj plu demandas:

— Ĉu oni ankoraŭ gardas tiun kadavron ĉe la «no»-kabano de Tu Raŭ?

— Jes.

Post momenta silento, la revolucia aktivulo aldonas:

— Antaŭ hieraŭ, la helikopteroj jam venis ĉi tien por forporti la vunditajn soldatojn. Nun, se oni elakvigas tiun kadavron en la «no»-kaptejo, evidente estas, ke la malamiko jam forĵetis tiujn vunditojn en la maron. Por esti pli certa pri tio, vi iru kun la vilaĝanoj peti pliajn informojn ĉe la soldatoj. Demandu precipe tiujn el la regulaj trupoj. Se ili rekonas tion, vi tuj mobilizu la amason por transporti la kadavron al la vilaĝeto kaj, per tiu ago, veki kortuŝon kaj indignegon inter la soldatoj, poste vi provpenu kuntreni ilin en nia komuna lukto por denunci la krimojn de la kliko Usono-Dziem, energie kontraŭstari al la komandantaro de la militoperacio, tiel ŝanceli la batalspiriton de la soldatoj, kiuj kantonmetas nun en Hon Dat kaj puŝpeli ilin al kompleta senkuraĝiĝo...

— Jes, — diras onklino Hai Thep, — oni devas vidigi al la soldatoj la vizaĝon de tiu mortinto.

— Estu prudenta en via agado! Faru tiel, ke ili ne povas rabi al ni la kadavron.

— Ne timu, mi sa̍ge kondukos la aferon. Antaŭmomente, kiam mi venis ĉi tien, mi jam renkontis dumvoje plurajn soldatojn, ḱiuj fervore iris ŝtopi la kavernon. Laŭonidire, la majoro persone komandas tiun entreprenon :

— Bone! Sed antaŭ ĉio, zorgu vian mision. Ne estas facile ŝtopi la kavernon. Se vi sukcesas akurate organizi la lukton, la majoro certe devas rezigni sian fian programon.

Antaŭ ol foriri, onklino Hai Thep ne forgesas ordigi la kuirejon kaj alporti la marmiton da rizo al Tam Ĉan :

— Jen via rizporcio por matenmanĝo. Gardu ĝin por la tuta tago, ĉar hodiaŭ, sendube, mi estas aferplena kaj ne povos reveni antaŭ la vespero.

— Ĉu vi jam manĝas, onnjo?

— Mi ne havas tempon. Ĝis revido, kamarado! Restu vigle singarda kaj atentu, ke vi ne misaŭdu la pasvorton.

Ja, kiel ĵus diris onklino Hai Thep, de frumatene la majoro Sang persone komandas la operacion. Li sidas iom malproksime en sekura loko, dum liaj soldatoj kuras tien kaj reen antaŭ la kaverna faŭko por ĵeti grenadojn en ĝin. Malfeliĉe, du el la unuaj sturmantoj tuj renversfalas sub la kugloj pafitaj de interne de la kaverno. Kaj kvar grenadoj MK3 eksplodas en iliaj manoj, faligante ankoraŭ kvar aliajn soldatojn, kiuj staras tute apude. La majoro, sidanta ĉirkaŭ dek metrojn for de tie, ricevas ankaŭ unu grenadfragmenton, kiu fortranĉas la supron de lia kasketo

«barem», tiel malkovrante parton de lia kapo. La ceteraj soldatoj heziteme sterniĝas malantaŭ sakoj da cemento, ne aŭdacante plu kuri trans la kaverna faŭko.

La majoro Sang eklevas sian manon por prove palpi sian verton. Rekonsciiĝinte, li svingas sian bastonon por urĝi siajn soldatojn daŭrigi la atakon. Poste, li denove kuŝas sur la herbejo. Ĉi foje, ili sukcesas ĵeti en la kavernon kvin, ses grenadojn, kies eksplodoj tremigas la rokvandojn kaj plenigas la aeron per densa fumo. Profitante tiun situacion de forto, la soldatoj ree kuras, kiel navedoj antaŭ la kaverno kaj seninterrompe ĵetas en ĝin pliajn grenadojn. Ĉi foje, silentas ĉiuj pafiloj de la gerilanoj, aŭdiĝas nur grenadeksplodoj dum kvar, kvin minutoj.

La majoro ekleviĝas kaj svingante sian bastonon krias:

— Ek al atako!

La soldatoj riskoplene impetas en la kavernan faŭkon, plenan je densa fumo. Ili baldaŭ estas nevideblaj. Aŭdiĝas nur la pafuraganoj de iliaj «Thompson» - oj.

Kiel lastafoje, niaj gerilanoj jam forlasas la kavernan enirejon por eviti la sinsekvajn eksplodojn de grenadoj. Ses malamikaj soldatoj sukcesas okupi tiun enirejon. De tie, ili pafas en la internon de la kaverno, nek antaŭenirante, nek retropaŝante. Ja, de ambaŭ flankoj oni malpermesas al ili tiel agi.

Kompreneble, mortigaj pafoj regule venas de interne, sed de ekstere, la kruelegulo j ankaŭ celdirektas sian kanonfaŭkon al ilia dorso. Laŭ ordono de la majoro,

la soldatoj, kiuj troviĝas ekstere urĝe fosas fundamentojn kaj transportas brikojn por ŝtopi la kavernan faŭkon. Meze de l'pafbruoj, minuton post minuto, plialtiĝas masonita muro kun tri briktavoloj. Subite, la soldatoj en la kaverna enirejo, vete kuras eksteren, renversante la ĵus konstruitan muron. Tute kolera, la majoro sendistinge bastonas ilin kaj ordonas, ke unuflanke, oni ĵetu grenadojn en la kavernon kaj aliflanke, oni ree ordometu la brikojn.

Trovante, ke la grenadoj ankoraŭ eksplodas, niaj gerilanoj restas senmove en siaj profundaj rokanguloj. Fine, la kaverna faŭko estas komplete ŝtopita. La soldatoj tuj ŝmiras la brikmuron per cemento. Sed plenigi la interspacojn ĉe ambaŭ flankoj ne estas facile. Ekvidante sur la tero amasetojn da ankoraŭ ne bruligita pajlo, ili tute ĝojas. Ili tuj kolektas tiun pajlon, transformas ĝin en rulvolvaĵojn, per kiuj ili zorge ŝtopas la interspacojn, poste ŝmiras tiujn lastajn ankaŭ per cemento. Por plifirmigi tiun muron, ili masonas ankoraŭ kelkajn briktavolojn kunige kun ĝi. Ĝuste tiam, subite alkuras Sanh, la subleŭtenanto de la psikologia militfako.

— Mia majoro, — li anhelante diras, — jam ribelas niaj soldatoj... Tre grave!

— Kio okazas? — Abrupte demandas la majoro. — Kion faras la soldatoj? Kion? Kion?

— Jen... Jen...

— Tuj diru, pro kio jen... jen?

— Jen, mia majoro, oni ĵus elakvigis el la maro unu kadavron de soldato.

La majoro ektremas:

— Kadavron de soldato ?

— Jes, soldato... soldato el la regulaj trupoj. Oni... jam revenigis tiun kadavron al la vilaĝeto, transportante ĝin, de loko al loko. Niaj soldatoj multnombre venis por vidi... Tiuj el la 3a roto rekonis, ke la mortinto estas Saŭ Hon. Ili diris, ke antaŭhieraŭ posttagmeze, la vundita Saŭ Hon estis evakuita per helikoptero. Pro kio, nun, oni trovas lin mortinta kaj forportita de la marondoj ? Ili kolerkriegis asertante, ke la vunditaj soldatoj, veturigitaj per helikopteroj antaŭhieraŭ, estis ĵetitaj en la maron...

La majoro tute paliĝas :

— Ĉu vi vidis la kadavron ? Ĉu vere estas tiu Saŭ Hon el la 3a roto ?

— Mi propraokule vidis... Ĝuste la kadavron de Saŭ Hon el la 3a roto. Strange !

La majoro ĵetas kaŝmalican ekrigardon aliloken :

— Poste, kio okazis ankoraŭ ?

— La soldatoj el aliaj rotoj ankaŭ kriegis kaj insultis... Ili insultis dirante, ke la tri Jankioj jam ĵetis iliajn amikojn en la maron ; alie, pro kio tiu kadavro de Saŭ Hon povis flosi ĝis la « no » - kaptejo ?

— Flosi ĝis la « no » - kaptejo ?

— Jes, ĝis la « no » - kaptejo ! La gardisto de tiu « no » - kaptejo jam elakvigis ĝin... Nu, ĉu vi aŭdas, ke hieraŭ nokte, jam fuĝis kvar soldatoj el la sekurecaj trupoj ?

— Ne ! Ankoraŭ tiu okazaĵo ?

— Jes, fuĝis kvar kanajloj, oni ne scias, kien !

— Hundaĉoj !

— Mia majoro, pri tiu afero de Saŭ Hon, niaj soldatoj forte indignis. Unuj bruligis sian tendon, aliaj forĵetis sian pafilon en la torenton kaj kune kun la amasoj partoprenis en la manifestacio.

Subite, la subleŭtenanto klinas flanken sian aknoplenan vizaĝon, streĉas sian orelon, antaŭ ol daŭrigi :

— Jen... tiu konfuzkriado, ĉu vi aŭdas ĝin ?

La majoro Sang ne respondas. Li alparolas la leŭtenanton de la pioniraro :

— Sinjoro Tu, restu ĉi tie kaj ordonu al niaj soldatoj alporti pliajn brikojn por plifirmigi la muron.

Poste li sin turnas al la subleŭtenanto, svinganto sian bastonon :

— He, vi kaj mi, ni eniru la vilaĝeton por vidi, kio okazas !

La subleŭtenanto viglamove ekiras. Lin sekvas la majoro, zorgoplena :

— Tiun kadavron transportis al la vilaĝeto la gardisto de la « no »-kaptejo, ĉu ne ?

— Ne nur li, sed ankaŭ pluraj homoj...

— Kie vi troviĝis tiam por ne malhelpi ilin fari tion ?

— Mia majoro, kiam ili revenigis tiun kadavron, mi tute ne sciis. Kaj, kiam mi estis informita pri tio, la afero estis jam vaste diskonigita.

— Ĉu la kadavro kaj ĝia vizaĝo estas ankoraŭ sendifektaj ?

— Ili estas parte senhaŭtigitaj, sed ekrigardante tiun vizaĝon, oni povas tuj rekoni la soldaton Saŭ Hon. La kadavro nur komencas ŝveliĝi. La sala marakvo jam malrapidigas tiun ŝveliĝon.

La majoro restas senvorte. Iun momenton poste, li eklevas sian bastonon, batfaligas kelkajn herbotrunkojn kaj insultas :

— Fi! kun tiu batalmaniero, eĉ prezidanto Ngo malvenkus kaj ne nur mi... Ĉu oni povas venki sur la batalfronto, kiam ĉe la ariero okazas ribelo ? Kiam mi estis ĵus veninta ĉi tien, mi jam diris, ke necese estis malhelpi la popolamasojn ribele leviĝi. Fine, oni ne sukcesas bremsi la movadon...

— Nun, eĉ la soldatoj ekribelas...

La majoro, tute kolera, kriegas :

— Mi pafrompos la kranion al tiuj, kiuj forĵetis sian pafilon en la riveron.

La subleŭtenanto Sanh ne aŭdacas plu paroli. Baldaŭ, preterpasante duone falintan kokosujon, li ekvidas, ĉe la supro de ĝia trunko, ankoraŭ flirti la ŝnuron, per kiu oni pendigis franjon Su :

— Mia majoro, nur de post tiu tago, kiam ni senkapigis tiun longharan aktivulinon, la loĝantaro komencis furioze kontraŭstari... Miaopinie, oni estus juĝinta...

— Kiel ?

— Oni estus juĝinta la aferon pli delikate kaj ne tro urĝe, ĉar tiu virino ĝuas grandan estimon inter la ĉitiea loĝantaro. Laŭdire, ĉiuj en Hon Dat amas ŝin. Se tiam la leŭtenanto Xam ne estus senkapiginta ŝin, li certe ankoraŭ ne mortus...

La majoro kapskuas :

— Mi ne kredas al viaj paroloj. Tiu maljunulaĉo Dang Tho estas freneza.

— Ŝi ne estas freneza, mia majoro. Pro kio ŝi ne senkapigus siajn samvilaĝanojn aŭ la Vjetkongojn?

— Senkapigi sian propran filon, tio montras, ke ŝi estas vere frenezega.

Kvankam dirante tion, la majoro Sang tamen estas ekstreme maltrankvila. Li kredas, ke sinjorino Ka Soi propramane mortigis la leŭtenanton Xam kaj esperas, ke tiu kmera virino mortigis sian filon nur pro frenezeco kaj ne pro malamo. Li ne volas pensi, ke tiu hommortigo estas revenĝa ago, kvankam li havas la impreson, kvazaŭ tiel estas. Ĉar se ĉiuj kulpoj estas tiel pagitaj, li mem ne povas evitigi al si la morton. Li ne tro zorgas pri siaj malnovaj kulpoj, ĉar li jam de longe forlasis la regionojn, kie liaj manoj ĉiutage dronis en sango. Lin zorgigas precipe la krimoj, kiujn li plenumis ĉi tie, nome la pafmortigon de la soldato en la vilaĝa lernejo aŭ la likvidon de tiuj vunditoj, kiun li antaŭsciis kaj pri kiu li sekrete interkonsentis kun la Usonanoj. Li trenas sian bastonon sur la herbejo, preparante en sia kapo plurajn intrigojn: «La pafmortigon de la soldato en la vilaĝa lernejo scias ĉiuj miaj trupoj, sed mia koluzio kun la Usonanoj por forĵeti la vunditojn en la maron estas ankoraŭ tenata en sekreto. Se oni demandus min pri tio, mi devus kategorie nei mian kulpon dirante, ke mi nenion scias. Kaj ŝajnigante koleron kaj indignon, mi diros al miaj soldatoj: «Mi luktas kun vi ĝis la fino kontraŭ tiu malhumana ago...» Mi devas fari tion, alie...»

Li kaj la subleŭtenanto Sanh travadas la torenton kaj atingas la transan bordon. La «commando»-oj restas ankoraŭ en siaj tendoj, sed en tiuj de la bataliono

de la regula armeo vidiĝas neniu homa ombro. Kelkaj « commando » - oj estas starigantaj sur la herbejo dekojn da tramalsekigitaj pafiloj « Garrand » :

— Mia majoro, la 3a roto forĵetis siajn pafilojn en la torenton. Jen ilin ni ĵus elakvigis.

La majoro ĵetas preterflugantan rigardon sur kelkajn pafilojn. Nun, li ankaŭ klare aŭdas la konfuzkriadon. Trovante, ke estas danĝere iri al la vilaĝeto nur kun la subleŭtenanto Sanh, li diras al la « commando » - oj :

— Kelkaj elinter vi prenu *fusilojn* kaj akompanu nin ! Kunportu ankaŭ vian « F.M. » - on * !

La « commando » - oj eniras en siajn tendojn por preni siajn fusilojn, poste kune kun la majoro sin direktas al la vilaĝeto.

Tiam, la suno jam lumigas la duonon de la trunkoj de kokosujo. La homamaso, transportanta la kadavron de Saŭ *Hon*, ĵus preterpasis la vojkruciĝon Si Ly. Apenaŭ atinginte la vilaĝan vojon, la majoro kaj la « commando »-oj aŭdas ĉe la transa vojkurbiĝo la akrajn kriojn de la virinoj :

— Pereu la kliko Usono-Dziem, kiu jam forĵetis niajn vunditajn soldatojn en la maron.!

— Pereu, pereu !

Eĥe resonas pluraj sinsekvaj krioj « Pereu ». Poste, aŭdiĝas aliaj krioj :

— La kliko Usono-Dziem kompensu la morton kaŭzitan al niaj soldatoj !

— Kompensu la morton ! Kompensu la morton !

---

* F.M. : (mallongige) fusil-mitrailleuse, mitralo.

Aŭdante tiujn terurajn kriojn kaj vidante densan polvon leviĝi el la vojkurbiĝo, la majoro Sang tuj retropaŝas kaj revenas al la apuda ĝardeno. Li balbute sin turnas al la subleŭtenanto :

— Mi revenas al mia posteno, sed vi restu ĉi tie kaj ordonu al la vilaĝanoj disiri kaj al la soldatoj tuj reveni al sia kampadejo. Se ili havas ian peton, ili sin turnas al mi kaj mi transsendos ĝin al la superuloj, por ke ili finarangu la aferon. La « commando »-oj okupu tiun lokon ! Ne lasu ilin libere iri ien ajn... Se ili malobeus, vi povus pafi kelkajn kartoĉbendojn de « F.M. » por disirigi ilin. Ĝis revido !

Ĉe tiuj vortoj, la majoro sin turnas sur la kalkanoj kaj malaperas en la ĝardeno.

La « commando »-oj jus starigis siajn vicojn tra la vojo, kiam alvenas la manifestaciantoj. La subleŭtenanto de la psikologia militfako staras meze inter la homamaso kaj la « commando »-oj, kun ambaŭ brakoj leviĝantaj al la ĉielo :

— Geonkloj kaj gefratoj, haltu, haltu, por ke mi diru al vi kelkajn vortojn !

— Kion vi diras ? Metu vin flanken !—Minace diras iu soldato.

— La majoro jam petas min diri al vi...

— Kion ?

La unuaj vicoj de la manifestaciantoj haltas. La subleŭtenanto mallevas sian voĉon :

— La majoro jam petas min diri al vi, geonkloj kaj gefratoj, ke tute ne utilas tiu manifestacio kun tiom da krioj. La Vjetkongoj profitos la okazon por « kapti

fiŝojn en malklara akvo». Se vi havas ian peton, turnu vin al la majoro; li promesas transsendi ĝin al la superuloj, por ke ili finarangu la aferon. Kaj vi, kamaradoj soldatoj, revenu al viaj respektivaj postenoj; la majoro ne respondecas pri viaj agoj.

— Ni ne interparolas kun vi. Kie estas la majoro?

Kelkaj soldatoj sin ĵetas antaŭen, furiozaj. La subleŭtenanto retropaŝante respondas:

— La majoro... li loĝas... en tiu brikdomo.

— Ni antaŭen iru al la loĝejo de la majoro, geonkloj kaj gefratoj!

Tiel kriegas antaŭenkurante kelkaj soldatoj. Ilin tuj sekvas aliaj, ĉirkaŭ cent, poste la gevilaĝanoj. La «commando»-oj starantaj sur la vojo celdirektas siajn pafilojn al la homamaso. Jam de longe nutritaj per malamo al tiuj kanajloj, la soldatoj bolas de kolero:

— Fiuloj, prove pafu, se vi aŭdacas?

Pluraj el la 3a roto, kiuj ankoraŭ gardas siajn fusilojn brue funkciigas la kulason kaj alkuras. Ili ankaŭ celdirektas al la «commando»-oj siajn armilojn, tute pretajn elsputi kuglojn. Kiel veraj kontraŭuloj, ambaŭ partioj rigardas unu la alian, retenante sian spiradon. Ĝuste tiam, subite onklino Ba U trabreĉas la vojon tra la homamaso kaj flegme venas antaŭ la kanontuboj de la «commando»-oj. Ŝi svingetas la brakon super sia kapo poste mildvoĉe diras al ambaŭ partioj:

— Sufiĉe! Inter vi ekzistas nenia malamo; do, pro kio vi volas pafi unu al alia? Ĉu al vi utilas tiu sangelverŝo? Aŭskultu min, mallevu viajn pafilojn!

La soldatoj el ambaŭ partioj sin tenas ĉiam firme sur sia pozicio. Onklino Ba U tuj delikate mallevas la fusilojn de ambaŭ soldatoj de la regulaj trupoj, starantaj apud ŝi kaj diras al la «commando»-oj:

— He knabegoj, niaj gevilaĝanoj kaj tiuj ĉi faras nenion malutilan al vi. Ni luktas nur pro tio, ke la Jankioj jam forĵetis niajn soldatojn en la maron. Iom pripensu! Oni forĵetis niajn vunditojn, ĉar oni trovis ilin batalsenkapablaj. Ĉu vi toleras, ke oni tiel same traktas vin?

La «commando»-oj restas senvorte. Onklino Ba U daŭrigas:

— Eĉ la sovaĝaj bestoj scias ami unu la alian... Vere, la Jankioj ne valoras la bestojn; ili tute ne kompatas vin. Se ili kompatas vin, ili certe ne forĵetis viajn vunditajn amikojn en la maron. Ni sukcesis elakvigi nur unu kadavron. Sed, restas ankoraŭ pluraj aliaj, nun forpelataj de la vento kaj ondegoj, ĝis oni ne scias kie aŭ, eble, kuŝantaj en la ventro de ŝarkoj, focenoj.

Dum ŝi parolas, ŝiaj manoj senĉese svingetas, mallevante la fusilojn de niaj soldatoj de la regulaj trupoj. Ŝia voĉo jen laŭta, jen mallaŭta, jen milda, jen kolera, fine estas tiel efika, ke ĉiuj kanonfaŭkoj, unu post alia, direktiĝas al la tero. La sekciestro de «commando»-oj, kuntirante siajn brovojn, rigardas al onklino Ba U:

— Sufiĉe, sinjorino! Ni ne estas tiel stultaj! Vi ja kutimas doni lecionojn...

La virino, tute ĝoja, eksplodas per ridoj:

— Kiel malklera virino, mi diras, kion mi pensas kaj neniam aŭdacas doni lecionon. Vi komprenas la vivon multe pli, ol mi...

Ĉe tiuj vortoj, ŝi sin ĵetas antaŭen. La soldatoj de la regul aj trupoj kaj la gevilaĝanoj amase kursekvas ŝin. Inter ili estas ankaŭ patrino Saŭ, kun sia ruĝe striita tuko ĉe la mano. Ŝia arĝente blanka kaphararo ŝveliĝas dum la kurado. La «commando»-oj fine metas sin flanken kaj onklino Ba U klare malklare aŭdas, kvazaŭ ili diras inter si :

— Tiu grasdikulino estas tre rapidmova kaj tre parolema !

La virino ŝajnigas, kvazaŭ ŝi nenion aŭdas kaj kun pezaj paŝoj antaŭen iras. La «commando»-oj sidiĝas baldaŭ ĉe ambaŭ randoj de la ĝardeno, lasante la manifestaciantojn libere preterpasi. La kadavro de la malfeliĉulo, kovrita per tuko, kuŝas sur brankardo, kiun surŝultre transportas du soldatoj kaj du vilaĝanoj. Onklo Tu Raŭ troviĝas ankaŭ inter tiuj portistoj. Ĵus anstataŭita de alia viro, li marŝas anhelante malantaŭ la brankardo. La kadavro de la soldato nun sterniĝas sammaniere, kiel antaŭe kiam elakvigita de onklo Tu Raŭ, li kuŝis sur la barko, ĉiam kun kuntiriĝintaj brakoj kaj duone malfermitaj okuloj. Sole, lia vizaĝkoloro iĝas komplete griza kaj lia malantaŭen ĵetita hartufo, rigide seka, hirta kaj sursemita per ruĝeta polvo.

Nun, denove aŭdiĝas akraj virinaj krioj :

— Pereu la kliko Usono-Dziem, kiu jam forĵetis niajn vunditajn soldatojn en la maron !

El la homamaso responde levi̯gas surdigaj krioj: « Pereu ».

— La kliko Usono-Dziem kompensu la morton kaŭzitan al niaj soldatoj!

— Kompensu la morton! Kompensu la morton!

Siaflanke, la soldatoj krias, skandante ĉiun vorton:

— Ni ne iru al disrabaj operacioj!

— Ni ne iru al disrabaj operacioj!

Baldaŭ, la manifestaciantoj alvenas antaŭ la brikdomo, kie lo̯gas la majoro Sang. La soldatoj de la regulaj trupoj diras al la gardistoj, starantaj laŭlonge de la barilo el ŝtonaj kolonoj:

— Vi iru voki la majoron, ke li venu ĉi tien por interparoli kun ni!

Unu el la gardistoj respondas:

— La majoro trovi̯gas nun antaŭ la kaverno por komandi la atakon kontraŭ la Vjetkongoj. Li ankoraŭ ne revenas hejmen.

— Fimensogulo, ni bone scias, ke li estas hejme. Ĉu vi volas voki lin aŭ ne?

Tion dirante, la soldatoj de la regulaj trupoj eklevas sian kanonfaŭkon kaj antaŭenpaŝas.

— Ne estu tiel malpaciencaj, — diras la gardisto, — vi kaj ni estas fratoj. Pro kio vi tiel furiozas?

— Se vi volus, ke ni traktu vin, kiel fratojn, vi tuj iru voki la majoron; alie, ni ne tolerus...

La gardistoj faras signojn per la okuloj, rigardante internen en la brikdomon kaj mallaŭtigas sian voĉon:

— Li jus revenis kaj trovigas nun en tiu loko... Sed, li rekomencis al ni diri, ke li ankoraŭ ne revenas...

— Vi nur eniru por voki lin!

Unu el la gardistoj basvoĉa diras:

— Ilo knabegoj, paŝu kolkajn kuglojn, por ke ni havu pretekston por iri voki lin... Tiel, baldaŭ li ne povos riproĉi nin...

Unu el la soldatoj tuj coldiroktas ĉielen sian «Garrand» kaj promas la patrisorton. «Pam, pam!» Aŭdigas du paŝoj. Kolkaj gardistoj ridante ensovigas en la domon. La manifestaciantoj ĉesas tumulti kaj atendas la majoron. Forpasis iom longa tempo, sed tiu lasta estas ĉiam navidebla. Tuto senpaciencaj, la soldatoj denove paŝas kvin, ses kuglojn en la ĉielon. Nur tiam, la majoro elŝovas sian kapon el la verando. Poste, skuotante la bastonon ĉe sia mano, li otpaŝe sin direktas al la pordo. Li afektas majestan irmanieron kun ĉiam balancigantaj ŝultroj. Alveninte antaŭ la soldatoj, li minace rondigas siajn okulojn.

Ekvidante tion, onklino Hai Thep, staranta meze de la homamaso, tuj krias batalsloganojn.

Denove levigas konfuzkriadoj. La majoro iom senkoligas kaj ne aŭdacas direkti sian minacan rigardon al la manifestaciantoj. Tuj oni impete transportas la brankardon de la mortinta vundito al la oficiro.

— Sufiĉe, sufiĉe! — Urĝe diras la majoro, svingante sian manon. — Tion mi bone scias, mi jam aŭdas pri tio...

Kun manoj ĉe la koksoj, onklino Ba U mokridas:

— Jes, certe vi devas antaŭscii tion! Ne eblas, ke la Jankioj faris tion, sen anticipe interkonsiliĝi kun vi.

La kanajlo Sang timoplene neas:

— Ne, ne... mi ĵus sciis tion, nur antaŭ kelkaj minutoj. La Jankioj malsekretigis al neniu, kion ili intencis fari... Mi, mi ankaŭ forte indignas kontraŭ ili .. Mi luktos kune kun vi, geonkloj kaj gefratoj. Ja, miajn soldatojn mi tre kompatas.

En la soldataj vicoj, aŭdiĝas konfuzaj murmuroj. Iu soldato subite ekdiras:

— Nepre, pri tiu afero vi jam diskutis kun la Jankioj... Vi estas kompatema? Pri tio ni tre dubas! Ĉu antaŭ kiam la Jankioj ĵetis niajn amikojn en la maron, vi ne pafmortigis iun soldaton? Tial, ni ne povas plu sekvi vin. Ni ne volas fariĝi, iun tagon, dronintoj, kiel ili. Ni firme decidas redoni al vi ĉiujn armilojn por reveni hejmen...

— Ne permesite! – Krias la majoro. — Ne faru tion, amikoj, mi, mi ankaŭ subskribos kun vi la peticion, adresotan al la superuloj.

— Ni subskribas kun vi, sed ni ne plu restos ĉi tie.

— Ĉielo! Ne fidu al la mensogema lango de tiuj virinaĉoj! Ni batalas kontraŭ la Vjetkongoj, ni preskaŭ ekstermos ilin...

Tuj la soldatoj unuvoĉe kriegas:

— Ni ne bezonas batali... Se vi volas ekstermi ilin, vi sola restu ĉi tie por daŭrigi la batalon...

La majoro Sang subite eklevas ambaŭ siajn manojn, kvazaŭ provpenante reteni ion ĵus elglitintan el ili:

— La Vjetkongoj mortas nun sufokitaj en sia kavorno. Mi jam ordonas al miaj soldatoj plenŝtopi la kavernan faŭkon!

Iun momenton post la grenadeksplodo, niaj gerilanoj iras al la kaverna faŭko, blindpalpante la rokmuron. Neniu lumstrio venas de ekstere.

— Strange! — Ekkrias Dat. — Estas tiel mallume!

Kujen kaj Ngan ankaŭ krie demandas:

— Jes, pro kio tiu strangaĵo?

Dat eksvingas sian brakon por bari la vojon al ĉiuj siaj kamaradoj:

— Vi restu ĉi tie, iun momenton; lasu min iri esplori la lokon.

Ĉiuj ekhaltas. Dat sin klinas antaŭen kaj prenante sian prete ŝargitan karabenon per unu mano kaj blindpalpante la teron per la alia, antaŭen rampas. Li rampas tre malrapide. Ĉiam regas mallumo. Nur post longa rampado, subite lia mano ektuŝas la brikmuron, starigitan de la malamikoj. Dat zorge palpas ĝian tutan surfacon kaj tuj rekonas la formon de la brikoj kaj la ankoraŭ malsekan cementon ĉe iliaj interspacoj. Li etendas ambaŭ manojn kaj prove puŝas la brikmuron, sed ĝi ne ŝanceliĝas. Timoplena, li murmuras:

— Kia danĝero! Ili jam ŝtopas la kavernan faŭkon!

Kaj li haste returne iras, kriante :

— Ohe, kamaradoj !

— Kio okazas ?

— Ili komplete ŝtopis la kavernan faŭkon !

— Kio ? La kaverna faŭko ŝtopita ?

— Jes, ili ŝtopis ĝin per brikoj. Mi jam propramane tuŝas ilin.

Alkuras Hai Thep :

— Kio okazas ? Ili ŝtopis la kavernan faŭkon, ĉu ne ? Hm ! Antaŭmomente, ili ĵetis grenadojn sur nin por povi tion fari. Do, la muro estas tute freŝe finkonstruita. Lasu min iri vidi. Ni devas plej frue malkonstrui ĝin ; alie, ni renkontus malfacilaĵojn...

— Restu ĉi tie, kamarado, — diras Ngan. — Lasu nin iri !

Ĉe tiuj vortoj, kune kun Kujen kaj Ba Ren, Ngan blindpalpe sekvas la junan Dat. Alveninte al la kaverna faŭko, ĉiuj etendas siajn manojn. Vere, kiel diris Dat, antaŭ ili staras brikmuro.

— Ni devas tuj malkonstrui tiun muron. — Diras Ba Ren.—Se ni malfruas, la cemento malmoliĝos kaj estos por ni katastrofo !

— Jes, ankaŭ mankos aero por nia spirado, kaj ni mortos, sufokitaj. Sed, mi trovas, ke estas senbezone malkonstrui la tutan muron. Sufiĉas, ke ni eltiras kelkajn brikojn por fari truojn tra ĝi. El tio ni tiras duoblan profiton : ni havos samtempe remparon por nin defendi kaj embrazurojn, tra kiuj ni pafos.

— Tre bona ideo !

Dat tute ĝojas :

— Lasu min eltiri la brikojn.

Ĉe tiuj vortoj, li komencas per siaj fingroj forigi la cementon, poste eltiri la brikojn. Li faras tion, kvazaŭ ludante, ĉar la cemento estas ankoraŭ malseka. Ngan palpas la lokon, kie Dat prove eltiras la brikojn, poste ankaŭ faras alian truon tute proksime. Dat komencis sian laboron antaŭ Ngan ; tial, iun momenton poste, li jam sukcesas eltiri la lastan brikon. Tuj la lumo penetras internen.

— Mi jam atingas...! — Murmuras Dat.

Ĝuste tiam, subite aŭdiĝas unu pafuragano. Dat eligas teruran krion « aj » kaj lia korpo iom post iom glitas sur la muro kaj falas ĉe la piedo de Ngan. Tiu lasta tuj retiras sian manon, klinas sin antaŭen kaj brakumas la junulon. Delikate palpante lian vizaĝon, li trovas, ke ĝi estas plenkovrata per sango.

— Dat! Dat! — Krie vokas Ngan.

Sed Dat ne respondas. Ngan ŝovas sian manon sur lian bruston. Lia koro ne plu batadas. Suferplena, Ngan restas senvorte. La malamikoj plue pafas al la ĵus traborita truo. Meze dum tiu pafado, Ngan ekmemoras pri tiuj vortoj, kiujn Dat diris al li hieraŭ : « Mi tre ŝatas manĝi saŭrkraŭton el hakita papajo, miksita kun salikokoj. Ĉiufoje kiam mi revenis hejmen, mia patrinflanka avino ĉiam abunde preparis por mi tiun bongustan mangaĵon, kiun mi ĝissate manĝis ».

... Kujen, ankaŭ muta pro sufero, kuntiriĝe staras apud la truo. Ŝi palpe serĉas la karabenon de Dat kaj esplore rigardas ĝian kartoĉbendon. Ŝi restas senmove, retenante sian spiradon. Kiam ĵus ĉesiĝis la malamikaj pafoj, ŝi sin ŝovas iom flanken kaj trarigardas la truon.

Ŝi klare vidas unu soldaton, kiu ankoraŭ tenas prete sian ŝargitan « Thompson » - on. Senprokraste, ŝi celdirektas la kanontubon tra la truo de la brikmuro kaj premas la pafrisorton. « Pam ! » Aŭdiĝas eksplodbruo tuj sekvata de terura krio « Ĉielo ! » ekster la kaverno. Kujen rapide mallevas sian pafilon kaj denove kunpremiĝe retiriĝas al sia malnova loko. Ne aŭdante plu pafojn el ekstere, ŝi diras al si en la pensoj : « Certe, jam mortis la kanajlo ! Sed lin anstataŭos alia ». Kujen ja pravas. Iun momenton poste, denove aŭdiĝas furiozaj pafoj de « Garrand ». La brikrompaĵoj disflugas ĉiuflanken. « Atendu, ĝis li elĉerpos la tutan kartoĉbendon, — Kujen ekpensas, — nur tiam mi pafos kaj nepre li pereos ». Ŝi nombras ĉiun pafon, ĝis la oka, antaŭ ol sin meti flanken. Kiel antaŭmomente, ŝi celdirektas sian karabenon tra la truo de la brikmuro kaj pafas unu kuglon. Tuj leviĝas konfuzaj krioj ekstere. Poste, aŭdiĝas neniu bruo ; eĉ silentas la maŝinpafilo.

— Ut Kujen, vi estas vere kapabla ! — Diras Ba Ren. — Certe, tiu pafanto de aŭtomata pafilo jam falis sub via kuglo.

Kujen ne respondas. Senvorte, ŝi traŝultrigas la karabenon, delikate forpuŝas la manon de Ngan kaj premas al sia sino la kadavron de Dat, ankoraŭ tute varman. Ŝi karesas iun momenton liajn kapharojn kaj lian sangoplenan vizaĝon. Poste, portante lin sur siaj brakoj, ŝi malrapide ekstaras kaj eniras en la fundon de la kaverno.

Mirkonsternita, Ba Ren diras al Ngan :

— Nu, hodiaŭ, Ut Kujen jam pafis du mirinde trafajn kuglojn. Mi ja tute ne atendis. Vere neatendite !...

— Ĉu ili povis trafi la kanajlojn? — Demandas Ngan.

— Jes, ambaŭ kugloj certe jam kaŭzis la morton al ili. Kun tia pafmaniero, neniu povus eviti...

Ngan ĝemspiras:

— Vere al ni mankis singardemo! Ni tute ne pensis, ke ili sin kaŝis ankoraŭ ekstere.

— Jes, ni estas riproĉindaj!

— Kiel fari nuntempe, kamarado?

— Ni ne plu parolu pri tio... Miaopinie, unusola truo sufiĉas... Ne timu, ke ni povas morti pro sufokiĝo. Kun tia brikmuro, ili povas nenion fari kontraŭ ni.

— Sed ni ne povos eliri el tiu kaverno...

— Atendu, ĝis ili retiriĝos al la ĝardenoj, antaŭ ol frakasi la muron. Ni faros truon ĝuste grandan, por ke unu homo povu traŝoviĝi.

— Jes... Nun, ni eniru!...

Ambaŭ homoj blindpalpe eniras en la kavernon. Ĉiuj kamaradoj jam sidas tie ĉirkaŭ la kadavro de Dat, kuŝanta sur peco da laktolo etendita sur la tero. Nam Njo tenas sin sur unu el siaj genuoj, kun vakskandelo ĉe la mano. Apud ŝi, la knabeto Ut ĉirkaŭbrakas la kolon de la etulino Thuji, staranta kun timemaj okuloj. Hai Thep sidas kun krucitaj kruroj tute proksime de la kadavro de la malfeliĉulo, direktante siajn larĝe malfermitajn okulojn al lia vizaĝo, kies sangmakuloj estas komplete forviŝitaj. Meze de lia frunto vidiĝas tri truoj, sangohavaj, tute proksimaj unu de la aliaj, — postsignoj de «Thompson»-kugloj. Ĝis tiam, Kujen sidas sur la tero mem, senĉese karesante ambaŭ nigre malpurajn piedojn de Dat.

— Morti dum batalo estas ja ordinara afero!—Diras Hai Thep, mordante siajn lipojn. — Sed, kiel diri pli poste al lia patrinflanka avino, por kvietigi ŝian doloron? La maljunulino havas nur lin, kiel nepon, tre dorlotatan nepon!

Onklo Tu Nghiep langoklakas kaj aldonas:

— Bedaŭrinde! Mi ankoraŭ ne renkontas tiel bravan knabegon. De post lia alveno al la kaverno, ni jam propraokule vidis lin propramane paffaligi ses kanajlojn. Kaj tiun tagon, kiam ĉiuj terure soifis, li ĉiam ŝercis kaj neniam plendis...

— La ostorestaĵoj de lia patro nun troviĝas ankaŭ en tiu kaverno. — Mallaŭte diras Hai Thep — Ambaŭ patro kaj infano jam oferis sian vivon...

Onklo Tu Nghiep tuj prenas seriozan tonon:

— Lasu min preĝi, ĉi vespere, por la paco al lia animo, por ke ĝi libere vagflugu, kiel en la momento, kiam li estis ankoraŭ vivanta.

— Estas tute senbezone! — Rebate diras Ba Ren. — Ni devas vesti lin per plej bela kostumo, poste elekti unu larĝan kaj sendifektan nilontukon por volvekovri lian kadavron, kaj tio sufiĉas.

Kun sufokita voĉo, Kujen urĝe petas:

— Lasu min... zorgi pri tio.

Hai Thep fingremontras al la rokmuro:

— La tornistro de Dat estas pendigita tie. Ut Kujen, malfermu ĝin kaj elektu unu novan kostumon por vesti lin.

Nam Njo ekprenas la vakskandelon kaj leviĝas:

— He kamaradoj, okupu vin pri viaj aferoj ĉe la kaverna elirejo. Lasu nin zorgi pri la entukigo de lia kadavro.

Kujen ankaŭ ekstaras. Ambaŭ virinoj sin direktas al la rokmuro. Nam Njo lumigas la vojon per sia vaks-kandelo, dum Kujen serĉas la tornistron. Tiu lasta baldaŭ eltiras el iu kavaĵo ĉe la rokmuro unu etan sakon el blue tinkturita kruda silko. Kujen emocie palpas la silkfadenojn, dirante al si en la pensoj: «Eble, tiu silkaĵo estas teksita de lia patrinflanka avino». Poste, ŝi malfermas la sakon kaj eltiras el ĝi unu paketon, zorge envolvitan en peco da laktolo. En tiu paketo, krom unu cindrokolora militista uniformo estas unu jam flikita nigra «ba ba»-kostumo kaj unu malgranda notkajero. Kujen foliumas ĝin; ĉe la unua paĝo, al la papero estas algluita la portreto de Prezidanto Ho, kun la vortoj «Bac Ho» (Onklo Ho) zorge skribitaj malsupre.

Kujen prenas la militistan uniformon, poste ŝnurligas la paketon, antaŭ ol enŝovi tiun lastan en la sakon. Subite, ŝi ektuŝas iun malmolan objekton ĉe ĝia fundo. Ŝi tuj eltiras ĝin. Ĝi estas ŝtonĵetilo el gagate nigra ligno. Rigardinte iun momenton tiun infanludilon, ŝi reveme remetas ĝin en la sakon.

Ambaŭ virinoj forlasas la rokmuron kaj revenas al la kadavro de Dat. Ĉiuj kamaradoj jam reatingas la kavernan faŭkon. Restas nur la knabeto Ut, silente staranta kun la etulino Thuji en siaj brakoj. Kujen tuj diras al ili;

— Eniru por vin amuzi kun Tham kaj Be.

La knabeto Ut jesas, dum Thuji tute malgaje mienas:

— Frato Ut, dorsoportu min!...

Ut havas la kutimon dorloti la etulinon; tial, li tuj kurbigas sian dorson, por ke Thuji grimpu sur ĝin, antaŭ ol dorsoporti ŝin aliloken. Svingante sian voston, ilin kursekvas la nigra hundo «Muc». Nam Njo transdonas al Kujen la vakskandelon kaj diras:

— Lasu min iri serĉi tualettukon por purigi lian korpon, antaŭ ol vesti lin.

Kujen kapbalancas. Dum Nam Njo foriras, ŝi proksimigas la vakskandelon al la vizaĝo de Dat kaj, klinante sin antaŭen, fikse rigardas al la tri postsignoj de kugloj meze de lia frunto. Poste, ŝi delikate metas siajn fingrojn sur ilin. Ekpensante pri la du kugloj de karabeno, kiujn ŝi pafis antaŭmomente, ŝi sentas, kvazaŭ ŝia koro estas iom malpezigita. Ŝi ja klare aŭdis la malamikojn, kiuj terurite kriis: «Ĉielo». Ĝuste la kuglo jam trafis la kanajlon, kiu estis pafmortiginta la junan Dat.

... Nam Njo revenas kun unu nigre striita tualettuko, sorbigita de akvo. Kune kun Kujen, ŝi malbutonumas kaj demetas ĉiujn vestojn de Dat. Sen la plej eta sekshontemo, ili zorge kaj kareseme viŝas lian tutan korpon, kvazaŭ ili banas sian propran frateton. Iliaj mildaj manoj forigas sangmakulojn, polvon kaj ŝviton, kiu jam de sep tagoj senĉese fluis sur lia korpo. Iafoje, iliaj fingroj tremetas super tiu sunbrunigita korpo.

Post tiu «lavado», ambaŭ junulinoj vestas la kadavron per tiu modesta cindrokolora uniformo, kiun Dat tre ŝatis, kiam li estis ankoraŭ vivanta. Kujen senĉese gladas per la mano la faldojn sur ĝiaj manikoj kaj kolumo. La korpo de Dat estas tute preta por esti envolvita en larĝa peco da nilono, kiam Ngan subite

revenas de la kaverna faŭko. Li sin ĵetas sur la kadavron, ĉirkaŭbrakas kaj longe rigardas ĝin... Poste, li malrapide surgenuiĝas kaj delikate metas ĝin sur la mortotukon el diafane helroza nilono.

Kujen kaj Nam Njo zorgege envolvas la kadavron por malebligi la penetradon de l'aero.

Kiam ĉio estas finfarita, Ngan sin klinas, levprenas la entukigitan korpon de Dat kaj sin direktas internen. Lin sekvas Kujen kaj Nam Njo ĝis ŝtonbloko kun glata supro ; tie, li haltas kaj metas la kadavron sur ĝin. Li staras iun momenton senmove poste, levante siajn tute ruĝajn okulojn, diras al Kujen kaj Nam Njo :

— Nun, ni kune iru al la kaverna elirejo.

La tri homoj atingas la kavernan faŭkon, kiam iliaj kamaradoj ankoraŭ penege malkonstruas la brikmuron. Ĉiuj interkonsentas, ke oni traboros truon, sufiĉe larĝan por ebligi nur individuan fuĝon.

Tial, ke la cemento estas ankoraŭ malseka, ne estas malfacile eltiri la brikojn. Ĉi foje, pli spertaj, ili tuj haltas por gvati la malamikan manovron, post kiam disfalas la lasta briktavolo. Ba Ren demetas sian jakon kaj transdonas ĝin al Ngan kun peto :

— Metu vin flanken, kamaradoj ! Oni ne plu bezonas pioĉojn. Lasu min prempuŝi la masonaĵon per piedfrapo por ĝin renversi.

— Gardu nin, ke la malamikaj soldatoj ne kaŝobservu nin, kiel antaŭmomente.

— Ne grave !

Ĉe tiuj vortoj, Ba Ren kurbigas sian dorson kaj enŝoviĝas en la ĵus malfermitan breĉon. Li blindpalpe

agitiĝas iun momenton en ĝi, poste per la tuta forto de sia kruro, li abrupte donas fortan piedpuŝon al la brikmuro. Tuj disfalas parto el ĝi. Tiam, rapida, kiel sciuro, li rampas returnen al la kaverno kaj petas ĉiujn siajn kamaradojn urĝe algluiĝi al la rokmuro. Efektive, post kiam ĉiuj jam sin kaŝas en sia ŝtonkavaĵo, la malamikaj soldatoj furioze pafas al la rokmuro tie, kie estas malfermita larĝa breĉo. Ba Ren eksplodas per ridoj. Aŭdiĝas ankoraŭ kelkaj pafuraganoj, poste komplete ĉesiĝas ĉiu pafo.

— Jen, — diras Ba Ren kun kontenta mieno, — neniun profiton ili povas tiri el tio.

— Antaŭmomente, — rimarkas Hai Thep, — pro nia nesingardemo, Dat jam foroferis sian vivon. Fakte, tiu brikmuro tute malutilas al niaj malamikoj.

— Nun, niaj gardodeĵorantoj nur sidas ĉi tie, ne plu bezonante pafi ; ili frakasu la kranion al tiu, kiu aŭdacos traŝoviĝi tra tiu breĉo.

— Tre bona ideo! Cetere, preskaŭ elĉerpiĝos niaj kugloj.

Tiam, leviĝas la raŭka voĉo de onklo Tu Nghiep :

— Mi ne estas superstiĉa ; sed, al mi ŝajnas, ke Buddo jam pli ol unufoje favoris nin. Alie, kiu donis al ni tiun pluvegon, kiam elĉerpiĝis la tuta trinkakvo kaj nia gorĝo brulis de soifo ? Kaj nun, kiu instigas la malamikojn konstrui tiun brikmuron, por ke ĝi servu al ni, kiel defendilo, kiam al ni mankas kugloj ?

Tiuj paroloj de onklo Tu Nghiep estigas ĝeneralan ekridon. Trovante, ke preskaŭ ĉiuj liaj kamaradoj troviĝas ĉi tie, Hai Thep serioze diras :

— Ni devas resti pli vigle singardaj. Forpasis sep tagoj kaj niaj malamikoj jam uzis ĉiujn perfidajn manovrojn: ili koncentrigis siajn fortojn por nin ataki per siaj grenadoj, ili ĵetis venenon en la torenton, ili provis sufoki nin per tiu fumo de papriko, ŝanceli nian kuraĝon per kinoprezentado, poste ŝtopi la kavernan faŭkon. Plej baldaŭ, ili povos havi novajn intrigojn, pli kruelajn. Tre povas esti, ke ili uzos aŭ toksajn ĥemiaĵojn aŭ dinamitojn aŭ aliajn mortigajn rimedojn kontraŭ ni...

Li faras momentan paŭzon, antaŭ ol daŭrigi:

— Tion mi diras, nur por pretigi nin al ĉia eventualaĵo. Ne estas facile trafi nin per toksaj ĥemiaĵoj, ĉar ni povus retiriĝi pli profunden, kaj nin ataki per dinamitoj samvaloras kiel ĵeti en nian kavernon mil grenadojn MK3. Ĝis nun, jam forpasis sep, ok tagoj; el niaj kamaradoj, du oferis sian vivon kaj du estis vunditaj, dum oni nombris almenaŭ cent mortintojn kaj vunditojn inter niaj kontraŭuloj.

Ni estas ankaŭ lacaj, sed nia batalspirito estas ĉiam neŝancelebla. Siaflanke, la malamikoj jam perdas sian kuraĝon. Nun, ĝuste estas tempo, kiam ni devas gardi paciencon. Kiel ajn obstinaj ili estas, niaj kontraŭuloj ne povas restadi ĉi tie ankoraŭ pli ol kvin tagojn. Ili nepre devas retiriĝi. La nuntempa luktomovado en la tuta provinco ne permesas al ili kampadi en iu loko pli ol duonmonaton, precipe kiam ilia soldatkvanto jam atingas la ciferon 1500 homoj. Tiun vesperon, mi aŭdis el la radio, laŭ la malamikaj informoj, ke niaj batalantoj nun atakas ĉiujn postenojn en la regiono Thu.

Onklo Tu Nghiep kapbalancas :

— Tre bone ! Do nepre, en aliaj lokoj, ni ne lasas ilin trankvilaj.

Dum ĉiuj atente aŭskultas kamaradon Hai Thep, Kujen subite diras :

– Mi devas raporti al vi ĉiuj, ke jam elĉerpiĝas la tuta rezervita rizkvanto. Restas nur dudek litroj, kiujn Ka My alportis al ni lastatempe. Mi proponas, ke de nun, ĉiu kamarado prenu nur unu bovlon da rizo potage.

— Dudek litroj por dek naŭ homoj. — Murmuras Hai Thep. — Se ni manĝus nur unu bovlon, nia rizprovizo daŭrus ankoraŭ tri tagojn. Tio estas vere peniga. Sed ni provizore efektivigu tiun projekton, samtempe ni sendu kelkajn lertajn grimpantojn por ŝirkolekti kokosojn, jakvojn :

— Kokosojn, jes ! Sed jakvojn,.. estas tre malfacile ŝirkolekti. — Intervenas Ngan — Antaŭ kelkaj tagoj, ni ankaŭ volis serĉi maturajn jakvojn. Sed, apenaŭ penetrinte en la fruktĝardenon, ni jam renkontis a soldatojn. Ili multnombre kampadas tie, — vere nealirebla loko !

— Tiun aferon ni pristudos baldaŭ.—Diras Hai Thep, post momenta pripenso—Nepre ni elturniĝos por havigi al ni tiujn jakvojn. Ĉu ni devas krucigi niajn brakojn por malsate morti ?

Ĉe tiuj vortoj, li ridas, brue enflarante :

— Mi ne scias, ĉu vi flaras tiun penetran bonodoron de maturiĝantaj jakvoj. Sed, por mi, ĝi estas vere loga!

Ba Ren tuj donas al Hai Thep unu pugnon :

— Kia blago! Ne eblas, ke tiu odoro de maturiĝantaj jakvoj penetras ĝis ĉi tie.

Hai Thep denove ridas kaj plue demandas siajn kamaradojn:

— Ĉu okazis ankoraŭ io grava? Ĉu la sanstato de niaj vunditoj povas nin maltrankviligi?

— La vundoj de la knabo Be kaj de Tham iom post iom resaniĝas. — Respondas Nam Njo — Sed mi tre malĝojas...

Ngan tute maltrankviliĝas kaj tuj demandas:

— Kial vi malĝojas, Nam Njo?

— Tham senĉese plendas pri tio, ke li estas tro frue vundita, kio faras lin batalsenkapabla. Ĉiufoje kiam la malamikoj atakis nin, li estis tute senpacienca kaj postulis, ke mi helpu lin veni ĝis ĉi tie por partopreni la batalon. Mi rifuzis, kaj li koleris kontraŭ mi, la tutan tagon...

Ngan ekridas:

— Tiel estas! Do, tio ne gravas. Cetere, kun tiu vundo, Tham estas ĉiam batalkapabla. Sed, ni ankoraŭ ne bezonas lian helpon. Al ni ne mankas batalantoj. Mi komprenigos baldaŭ al Tham...

Tion dirinte, Ngan subite turnas sian rigardon al Kujen kaj demandas:

— Kiel statas nun la geedzoj Ba Fi?

— Mi regule venis tien por distribui al ili rostitan rizon kaj akvon. Mi trovis la virinaĉon ĉiam ploranta. Hieraŭ, ŝi aparte ploregis, poste surgenuiĝis kaj klinis sian kapon ĝis miaj piedoj, ĝemplendante: « Ne punmortigu nin! Ni multe pentas pri niaj pasintaj faroj. De

nun, ni ne plu aŭdacas fari malbonon...» Ŝi ĵurpromesis pentofari kaj aldonis: «Se mia edzo kaj mi ankoraŭ malbone agus, nin ambaŭ vi tuj punmortigus kaj ni volonte akceptus la morton !... » Poste, ŝi insiste petegis, ke mi formetu iliajn katenojn ; sed mi rifuzis.

— Ne estas tempo senkatenigi ilin.— Diras Hai Thep — Sufiĉe! Ni pridiskutos baldaŭ ĉiujn ankoraŭ ne solvitajn aferojn. Nun, restu ĉi tie la gardantaro, kaj la ceteraj iru ripozi por repreni sian forton...

Ba Ren klarvoĉe ordonas :

— La grupo de Ba Ren restu ĉi tie !

Kiam Ngan sin pretigas por eniri en la kavernan fundon, Ba Ren subite ekprenas lian manon kaj metas ĝin sur la kvarangulan bastonon, kiun li firme tenas en sia mano :

— Vidu, ĉu taŭgas tiu bastono ? Ĝi senkompate falos sur la kapon de tiu, kiu aŭdacos enŝoviĝi en nian kavernon.

Ngan prenas la lignan bastonon kun kvar akraj anguloj, karesetas ĝin, poste kapbalancante diras :

— Frakasi la kranion al la malamiko per tiu bastono, kiu iom pezas ĉe la mano estas vera ĝuo ! Kie vi sukcesis havigi ĝin al vi ?

Ba Ren kontente bruridas, senresponde.

6

— Hodiaŭ estas la dudeka tago de la dek-dua lunmonato... La Tetfesto okazos post dek tagoj !... —

Murmuras la majoro Sang, kuŝanta sur sia hamako el paraŝutaj ŝnurligiloj. Vesperiĝas. Post unutaga lukto, el la tuta Hon Dat kvazaŭ ankoraŭ eĥe resonas kriegoj. Super la vojo, ankoraŭ leviĝas polvo. Dise, aŭdiĝas la krioj de bubalidoj, kiuj vokas unu la alian, la unuopaj pafbruoj kaj la konfuza muĝado de l' mar-ondegoj.

Tiun vesperon, Sang estas lackonsumita kaj mal-trankvila. Antaŭ la sunsubiro, li devis subskribi komunan peticion kun siaj soldatoj por peti tujan enketon pri la malfeliĉa sorto de ĉirkaŭ kvindek vunditoj, laŭdire dronigitaj en la maron. Post la subskribo, li tute elreviĝis kaj perdis multan fidon al sia kapableco. Tiu kaverno Hon Dat kun dek-naŭ necedemaj rezistantoj aperas nun antaŭ liaj okuloj, kiel plej firma kaj plej mistera defendpozicio. Kuŝante ĉi tie, li rigardas al la verda supro de la senmova kaj tede impona Hon-monteto. Ĉi tagmeze, kiam li ankoraŭ montris sin diskutema, ne volante subskribi la peticion, subite la leŭtenanto Tu revenis kaj sciigis al li, ke la Vjetkongoj jam sukcesis fari breĉon en la kaverna brikmuro. Li tute konfuziĝis kaj tuj elpoŝigis sian fontoplumon por doni sian subskribon. Sen tiu okazaĵo, li ja ne tiel facile cedis. Hodiaŭ, li ne havas plu la saman esperon, kiel hieraŭ, kvankam hieraŭ, li ankaŭ ne havis la saman esperon, kiel la unuajn tagojn, kiam li estis nove veninta ĉi tien. Tagon post tago, forvaporiĝas lia profunda kredo je tio, ke li povos ekstermi siajn kontraŭulojn en la kaverno Hon Dat.

Tiun vesperon, jam tedas al li pensi pri tio. Li ne volas plu instigi siajn soldatojn ĵetegiĝi en la kaver-non. Li ne volas plu rigardi tiun teron kun abundegaj

fruktoj. Eĉ tiun Tre-strandon, kiun li senĉese laŭdis, kiel pitoreskan pejzaĝon, dum la unuaj tagoj post sia alveno al Hon Dat; li projektis ankaŭ preni marbanon almenaŭ unu fojon ĉiutage, dum li ankoraŭ restadis ĉi tie. Sed, nun, antaŭ liaj okuloj, la Tre-strando havas plu nenion belan.

Ĝuste kiam kuŝante sur sia hamako, li elreviĝe rigardas al la supro de la impona kaj spitema Hon-monteto, aŭdiĝas malantaŭ la domo la naza voĉo de la radiotelefonisto:

— Allo!... Jes, jes... ĉi tie Bravulo*... jes, la majoro?... Atendu iun momenton!...

Sang ekleviĝas. Li demandas la radiotelefoniston, kiu ĵus elŝovis sian kapon el la fenestro:

— De kie oni vokas min?

— Mia majoro, Gloro ** vin vokas.

Sang tuj forpuŝas la hamakon kaj kuras en la domon. Li urĝe alkroĉas la aŭskultilon al sia orelo kaj ekprenas la mikrofonon:

— Allo! Kie estas Gloro? Ha, Gloro, ĉu ne? Jes... jes... jen mi...

La voĉo de Sang nun fariĝas grava: — Jes, mi aŭskultas vin... Jes, mi ĵus raportis al vi tiun aferon... Jes, tio ne glate iras... Tre malfacile!— Ĉe tiuj vortoj, lia vizaĝo subite malheliĝas por fariĝi tuj baldaŭ radianta pro ĝojo: — Jes, jes... antaŭ la mateno...

---

* *Bravulo*: komandantaro de la militoperacio kontraŭ Hon Dat.

** *Gloro*: stabo de la 4a taktika regiono sub la tiama Dziem-reĝimo.

Jes, mi tuj ordonas la batalon... Jes, jes, tuj al batalo!...

Kun gaja mieno, Sang demetas la mikrofonon kaj malkroĉas la aŭskultilon el sia orelo, antaŭ ol ekstari.

— Mia majoro, — tuj demandas la radiotelefonisto, scivolema,— ĉu Gloro ordonas al ni daŭrigi la atakon?

La oficiro, tute ĝoja, eksvingas sian pugnon:

— Certe, ni devas plue ataki la Vjetkongojn.

Subite, li ekmetas sian montrofingron sur la lipojn, klinas sian kapon al la orelo de la radiotelefonisto kaj mallaŭtigas sian voĉon:

— Nu, mi malsekretigas nur al vi tion ĉi: jam estas ordono retiriĝi!

La radiotelefonisto iomete balancas sian kapon.

La majoro sin turnas eksteren kaj diras al iu subleŭtenanto:

— Vi sciigu al la komandantaro de bataliono kaj roto, ke oni sendu siajn respektivajn reprezentantojn por tuja kunveno.

La subleŭtenanto tuj venas al apuda tablo, turnas la krankon de la telefonaparato, vokas ĉiujn trupunuojn kaj disdonas la ordonon de la majoro.

Poste, li ekbruligas du acetilenlampojn kaj metas ilin sur tablon, meze de la domo. La majoro Sang revenas al sia hamako, fumante cigaredon. Estas jam preskaŭ nokte. Tiam, antaŭ liaj okuloj, la supro de la Hon-monteto pli kaj pli malheliĝas. Kaj, kiam la nokta vualo jam komplete falas sur la teron, tiu montosupro restas ĉiam videbla, iom kurba kiel nigra

testuda karapaco, kiu reliefe siluetiĝas kontraŭ la helblua fono de la vesperkrepuska ĉielo.

Iun momenton poste, alvenas la oficiroj. La majoro Sang ekleviĝas el sia hamako :

— Kiel statas viaj soldatoj ?

— Ĉiam normale !

— En mia roto, ili senĉese agitiĝas kaj pasigas sian tempon por insulti la superulojn.

— Fi! Tia konduto de viaj soldatoj tre malbone influas sur la batalspiriton de la miaj. Ili konstante diskutas inter si pri tiu afero.

— Bone! — Interrompas la majoro Sang, komplete ekstarante.

Li iras sidiĝi sur seĝo, instalita ĉe la ekstremo de la tablo, frapetas per siaj fingroj ĝian supron, poste komunikas al la oficiroj la sciigon pri retiriĝo. Ĉiuj senescepte ne povas kaŝi sian ĝojon, provpenante regi sian emocion por ne tro brue fari malpezigan elspiron.

La majoro Sang aldonas, kun mallaŭta voĉo :

— Laŭ ordono de niaj superuloj, morgaŭ tagmeze plej malfrue, ni devos atingi la distriktan urbon Tri Ton. Tial, necese estas retiriĝi el ĉi tiu loko antaŭ la sesa matene. Kaj plej silente ! Ne forgesu, ke ni devas gardi sekreton kaj ne antaŭsciigi tion al niaj soldatoj.

Li faras paŭzon, forigante per la fingro la cindrojn de sia cigaredo :

— Tio estas la ĉefa afero. Sed, estas ankoraŭ alia, tre grava : antaŭ nia retiriĝo, ni devas ĉi nokte eksplodigi la kavernon...

Tion aŭdante, la oficiroj preterfluge rigardas unu la alian. Sang komprenas ilian timzorgon kaj tuj klarigas:

—Ĉu vi kredas, ke ni eksplodigos la tutan kavernon? Ne! Por efektivigi tiun grandiozan entreprenon, necese estas havigi al ni atombombon! Nun, al ni restas ankoraŭ ne uzita stoko da dinamitoj. Do, ĉi nokte, ni uzos la tutan kvanton. Kie estas la leŭtenanto Tu?

— Jen mi!

— Ĉi nokte, vi sendu viajn soldatojn por transporti tiujn eksplodaĵojn en la kavernon. Kaj vi, la subleŭtenanto Sanh, preparu viajn laŭtparolilojn. Tuj kiam ni atakas la kavernan faŭkon, vi diskonigu tiun novaĵon al la tuta vilaĝanaro.

— Mia majoro, ĉu mi diskonigos tion, kia ajn estos la rezulto?

Sang tuj opinias:

— Ĉu eblas, ke tiom da eksplodaĵoj povos doni nenian rezulton?

— La kavernan faŭkon ni povos facile disfrakasi,— respondas la pionira leŭtenanto Tu,—sed la Vjetkongoj estas tre inteligentaj. Mi estas certa, ke ili retiriĝos pli profunden, kiel lastfoje kaj nia atako restos tute vana.

La majoro, incitita, frapas la tablon per sia mano:

— Vi nur ataku, laŭ mia ordono!

Kaj li abrupte ekstaras:

— Mi bezonas unu «eĥon», antaŭ ol retiriĝi el tiu loko.

— Vi pravas, mia majoro! Necese estas komprenigi al niaj kontraŭuloj, ke ni ne estas malfortaj.

Kelkaj pupaj oficiroj sin montras blinde obeemaj. Ili leviĝas, diras ankoraŭ kelkajn vortojn al la majoro, poste ĉiuj senorde eliras el la brikdomo, krom la leŭtenanto Tu kaj la subleŭtenanto Sanh.

— Mia majoro, — demandas Tu, — kiam ni komencos la atakon ?

— Laŭ via bontrovo, iam ajn! Sed, plej bone estus, se ni atendus malfruan nokton tiam, kiam lackonsumitaj, ili emas al dormo.

— Mi ankaŭ faras saman kalkulon... sed necese estas transporti pli frue la eksplodaĵojn en la kavernon.

— Jes, nun estas tempo transporti senprokraste tiun provizon da dinamitoj en la kavernon. Ni eksplodigos ilin nek frue, nek malfrue. Faru tiel, ke ĝuste la kvinan matene, ni povos retiriĝi. Prefere estas komenci la atakon ĉirkaŭ noktomeze. Dum tiu horo, inter la Vjetkongoj-gardistoj, nepre estos dormemuloj.

— Do, ĝuste noktomeze, mi ordonos la atakon! — Diras la leŭtenanto Tu.

La majoro jesas poste sin turnas al la subleŭtenanto Sanh kun rekomendo :

— Viaflanke, ne dormu en tiu momento.

— Jes, mi ne dormos kaj miaj laŭtparoliloj funkcios ĝuste noktomeze. La vilaĝanoj certe tremos pro timo, kiam ili estos informitaj pri la detruo de la Honkaverno. Funde pripensinte, mi trovas, ke la hieraŭ vespere prezentitaj filmoj ne estas senutilaj, mia majoro!

Sang eklevante sian buŝangulon ridetas:

— Viaj filmoj taŭgas por nenio!

— Mia majoro, inter tiuj filmoj kaj la teruraj eksplodbruoj, kiuj skuos la teron ĉi nokte ekzistas malvasta ligiteco.

— Vi estas ankoraŭ tro naiva! — Diras Sang, ĉiam ridetante. — Sur mia kapo jam aperas grizaj haroj. Mi komprenas la Vjetkongojn kaj la vilaĝanojn multe pli, ol vi. Ili estas tre malfacile ŝanceleblaj. Ĉu vi kredas, ke ĉi nokte ili fidus viajn vortojn, se vi dirus, ke ni jam ekstermas ĉiujn Vjetkongojn en la kaverno? Ne estas tiel facile. Mi jam diras, ke antaŭ ol retiriĝi el tie ĉi, ni bezonas unu «eĥon». Nur tion!

La subleŭtenanto ankoraŭ prove demandas:

— Unu sensignifan «eĥon»?

— Kial sensignifan? Vere vi estas idiota!...

Tiel diras la majoro kaj tuj poste, li ekpensas pri tio, kion li jam preparas por esti raportota al la superuloj. Pri tio li havas la tempon nur por pensi, sed ne por paroli.

...La leŭtenanto Tu iras plenumi sian taskon.

Li renkontas neniun malfacilaĵon, mobilizante siajn soldatojn por transporti la eksplodaĵojn al la kaverna faŭko. Feliĉe estas, ke lia trupunuo ankoraŭ ne estas kuntrenita en la kirlo de la lukto, okazinta tiun matenon. Okazas nur unu bedaŭrindaĵo: kiam ili sukcesas ĝisatingi la kavernan faŭkon, unu el la soldatoj pro mispaŝo renversfalas kun la ŝarĝo da eksplodaĵoj.

Tiun falbruon ekaŭdas la tuta grupo de gardistoj ĉe la kaverna faŭko: Trong, Len kaj Hai Ka Tren. Ili ĉiuj ektremas pro surprizo.

— Ŝajnas al mi, ke iu renversfalas.— Diras Trong.

— Jes, atentu! La kanajloj povus nin surprizi!

Trong ŝaltas sian elektran torĉon, malfermante unu manon por ŝirmi siajn okulojn kontraŭ la blindiga lumo. Vidiĝas nenio eksterordinara ĉe la breĉo, krom la grenadrompaĵoj dissemitaj sur la tero, kiel ekskrementoj de vermoj.

— Antaŭmomente, — murmuras Len, — kiam la grupo de Toi gardodeĵoris, okazis nenio grava.

— Antaŭmomente kaj nun, la situacio ne estas la sama. — Diras Trong. — Ĝi povus ŝanĝiĝi ĉe ĉiu minuto. Ni restu singardaj! Mi ja klare aŭdis, kvazaŭ iu renversfalis ekster nia kaverno.

Ĉe tiuj vortoj, li ekmetas la kanonfaŭkon de sia «Thompson» tute proksime de la breĉo kaj rekomendas:

— Al mi restas nur, rondcifere, dek kartoĉoj. Se okazus malamika atako, vi eksvingu vian trančilegon, tuj post kiam silentas mia pafilo. Fortranču la kapon al tiu, kiu aŭdacus enŝovi sin en tiun lokon!

Ambaŭ gerilanoj Len kaj Hai Ka Tren prete tenas sian trančilegon.

— Jes, metu vin flanken, kiam elĉerpiĝas ĉiuj viaj kugloj, kaj lasu nin finfari!...

Tiel interkonsiliĝas la tri homoj, tute batalpretaj por atendi la malamikojn. Kuntirante siajn piedojn, ili staras senmove en la mallumo.

Forpasis kelkaj minutoj. Ili trovas nenion suspektindan. Poste, dek minutoj, ankaŭ nenio grava okazas. Tute lacaj pro longa starado, ili nun sidiĝas. Unu horon poste, ĉiam regas kvieteco.

— Mi estas certa, ke antaŭmomente estis paŝbruo de kuranta vulpo! — Diras Hai Ka Tren.

— Ĉu ĉi tie vivas vulpo? — Sin demandas Trong, dubema.

Hai Ka Tren ekridas, kun mieno de vera spertulo:

— Sur tiu Hon Dat ne mankas tiuj rabobestoj... Vi ankoraŭ ne longatempe loĝas ĉi tie; tial, vi ne scias, ke abundas ĉiuspecaj vulpoj, simioj, sonserpentoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj... Oni trovas ankoraŭ la «vich»-testudojn, el kiuj la plej aĝa estas same granda, kiel ventolkorbo kaj la plej juna, kiel rizkorbo.

— Do, post tiu batalo, ni provpenos kapti kelkajn sonserpentojn por prepari supon.

— Ha, tiuj sonserpentoj nun fariĝas «maloftaĵo»! Ja, la frandemuloj fervorege ĉasas ilin kaj eĉ iliajn idojn. Ĉu vi volas manĝi boaon? Ĝia karno estas malpli serĉata, ol tiu de sonserpento, sed se oni gardas ĝian haŭton, kiun oni ofte vendas je alta prezo, oni povas prepari sufiĉe bongustan «kareon».

Trovante, ke Trong kun granda plezuro aŭskultas lin, Hai Ka Tren fariĝas parolema:

— Ĉu vi scias, kiel naskas la «vich»-testudoj?

Sen atendi la respondon de Trong, li daŭrigas:

— Tre strange! Dum sunplenaj monatoj, ili iras serĉi nutraĵojn malproksime en la maro kaj, kiam komenciĝas la pluvsezono, la inoj revenas al nia Hon Dat por ovonaski. Iliaj ovoj estas same grandajn, kiel papajoj. Ili fosas truojn en la sablo kaj demetas siajn ovojn en ilin, antaŭ ol sterniĝi sur sia karapaco kaj, per tiu lasta, ebenbati la sablon. Poste, ili denove forlasas la

teron por iri al la maro. Kiam pluvas, la ovoj malfermiĝas, fendante la teron. La « vich »-idoj traŝoviĝas tra la sablo kaj ŝanceliĝante rampas al la maro, kie ili mem serĉas sian nutraĵon.

— Vere strange ! — Ekkrias Trong.

Hai Ka Tren kapbalancas, indiferente :

— Estas ankoraŭ pluraj strangaĵoj ! Ekzemple, la erinaco. Ĉi tie en Hon Dat, ankaŭ abundas tiuspecaj bestoj. Sendube, ĝi estas la plej stranga besto sur nia tero. Ĝi estas hermafrodita besto :

— Kiel ?

— Tio signifas, ke ĝi havas samtempe la naskorganojn de ambaŭ seksoj, — kio permesas al ĝi mem gravediĝi, poste naski...

— Ĉa, ĉa !...

Hai Ka Tren daŭrigas :

— En tiu Hon Dat, oni renkontas ankoraŭ multajn altvalorajn bestojn. Mi faras al mi jenan projekton : post la liberiĝo de nia Sudo mi invitos kelkajn intimajn amikojn veni ĉi tien por ĉasi tiujn bestojn. Tio sufiĉos por fari nin riĉuloj !

Len sin enmiksas en la konversacion :

— Ĉu tiam vi invitos ankaŭ min ?

— Ne, vi estas tro vagema. Via alestado nur fuŝos nian entreprenon. La ĉasisto devas esti spritvigla, kviete serioza...

Len malice ridas kaj sin turnas al Trong :

— Vi tre malofte venas ĉi tien ; tial, vi ne konas la renomon de tiu Hai Ka Tren. Trovante vin fremda, li trompe imponas vin per fanfaronado... De post kiam

miaj gepatroj naskis min en Hon Dat, mi neniam vidis lin kapti vulpon, simion, testudon, serpenton, eĉ la plej etan sciuron.

Hai Ka Tren restas senvorte iun momenton, poste diras:

— He Len, ĉu vi aŭ iu kanajlo jam venis ĉe mi la dekkvinan tagon de la sepa lunmonato por manĝi tiun serpentosupon?

— Tiun serpenton mortfrapis por vi la knabeto Ut kaj tamen, vi aŭdacis fanfaroni, ke vi estis propramane kaptinta ĝin. Tiun tagon, antaŭ via edzino, mi ne volis hontigi vin, malsekretigante tion.

— Kiu knabeto Ut mortfrapis ĝin? — Rebate demandas Hai Ka Tren.

— Li estas neniu alia, ol la knabeto Ut, filo de onklo Tu Raŭ. Li estas ankoraŭ tie. Ne malpacienciĝu, mi vokos lin baldaŭ por konfrontado!

Hai Ka Tren silentas. Por prove eltiri lin el lia ĝenateco, Trong ridante diras:

— Mi estas certa, ke sur tiu Hon Dat vivas multaj sovaĝaj bestoj.

— Jes, multaj sovaĝaj bestoj!— Ripetas Len.

Ĝuste tiam aŭdiĝas paŝbruoj en la kaverno. Hai Ka Tren ekstaras, senpolvigante sian pantalonon ĉe la sidvangoj:

— Jen la grupo de Ngan por deĵorŝanĝo. Ni eniru por ripozi! Mi estas terure dormema!

Ngan alvenas, akompanate de onklo Tu Nghiep kaj Kujen.

— Estas tempo por iri ripozi, kamaradoj! — Diras Ngan.

— Jam estas la oka? — Demandas Len. — Ja, aŭskultante tiun babiladon de Hai Ka Tren, oni ne rimarkis, ke tiel rapide forpasis la tempo!

Antaŭ ol retiriĝi, Trong diras al Ngan':

— Nenio grava okazis ĝis nun, Sed, antaŭ ĉirkaŭ unu horo kaj duono, mi jam aŭdis nekutiman bruon ekster la kaverno, kvazaŭ iu estus renversfalinta...

— Tiel!

— Sed, de tiam, regas kvieteco kaj okazas nenio grava.

— Kvazaŭ iu estus renversfalinta?

— Jes, sed tre povas esti, ke vulpo kurus!

— Bone! Pasigu al mi la elektran torĉon.

Ngan ŝaltas la elektran torĉon kaj eksidas je ĉirkaŭ unu metro for de la breĉo. Malantaŭ li, kaŭriĝas Kujen kaj onklo Tu Nghiep. Ngan ĉiam prete tenas sian «Thompson»-on, dum Kujen gardas nun la karabenon de Dat kaj onklo Tu Nghiep, la kvarangulan bastonon, kiun Ba Ren ĵus transdonis al li. Trankvile sidanta sur sia loko, onklo Tu Nghiep rulvolvas unu cigaredon:

— Dank'al niaj onklinoj, kiuj lastatempe alportis al ni tiun provizon da tabako, mi ja havas nun ankoraŭ kelkajn cigaredojn. Mi jam rimarkas, ke ĉe la kaverna rokmuro pendkreskas grapoloj da «ran baj»*. Kiam elĉerpiĝos mia tuta tabako, mi ŝirkolektos tiun likenon kaj post ĝia sekiĝo super la fajro, mi povos provizore fumi ĝin.

---

* Speco de likeno kreskanta sur ŝtonegoj.

— Ĝuste dank'al la spiritpreteco de niaj onklinoj,— aldonas Ngan, — ni povas ĝisvivi tiun tagon. Ni havas ne nur tabakon por fumi, sed ankaŭ rizon por manĝi... Pri la afero de Ka My, mi estas tute...

Ngan subite haltas. La tri homoj restas senparole. Ŝajnas, ke ekstere, la vento komencas blovi, ĉar ĉiuj eksentas freŝan trablovon ĉe siaj piedoj. Kiam ekstere klare aŭdiĝas la susurado de l' foliaro, tiam ĉiuj estas konvinkitaj, ke vere jam leviĝas la vento. Kujen havas tian senton, kvazaŭ la maro venas pli kaj pli proksime. Ĝia murmurado iom post iom plifortiĝas. Poste, la bruo de ĝiaj ondegoj komencas penetri en la kavernon, kvazaŭ tiu de akvofalo.

— Denove la maro furioze agitiĝas.—Kujen mallaŭte krias kaj post langoklako diras al Ngan :

— Ĉielo !... Mi ne scias, kio okazis ekstere, tiujn lastajn tagojn, mi tre maltrankviliĝas. Mi tute zorgas pri panjo. Franjo Su jam mortis... Ĉu panjo sukcesas elteni tiun suferegon ?

— Certe, ŝi eltenos... Sed, kiel kompatinda ŝi estas ! Evidente, franjon Su kaj vin dorlotas panjo. Sed ne kun sama grado. Al vi ŝia amo estas arda, sed al franjo Su, ĝi estas tute profunda. Iafoje, panjo diris : « Eĉ se la disiĝo daŭrus dek jarojn, Su volonte atendus... Mi timas nur, ke ĝis tiam, ili ĉiuj estos jam maljunaj...».

Post momenta silento, Kujen ekdiras :

— Vere, mi estas tro naiva knabino kaj ne same matura, kiel franjo Su...

Onklo Tu Nghiep subite ekridas kaj sin enmiksas en la konversacion :

— Nu, Ut Kujen, mi sincere demandas vin pri tio ĉi kaj prove respondu al mi, ĉu ne?

— Pri kio vi volas demandi min, onĉjo?

La viro enspiras ankoraŭ plenbuŝon da fumo, poste premestingas sian cigaredon:

— Ke Su havas la paciencon atendi, tion mi volonte kredas... Nun, supozu, ke la Partio konfidos al Ngan ian mision malproksime por dek aŭ dudek jaroj. Ĉu vi povos atendi lin, Ut Kujen?

— Ne eblas, ke li tiel longe forestas! — Rebate diras la junulino.

— Sed, mi jam diras, ke tio estas nur supozo!

Kujen silentas.

Onklo Tu Nghiep tuj urĝas ŝin:

— Kiel? Parolu!

Kujen restas tute konfuzita en mallumo. «Pri tia afero, — ŝi diras al si en la pensoj, — mi ja tre malofte pensis». Baldaŭ, ŝi rapidvoĉe respondas:

— Mi ne atendas!

Poste, ŝi prove sufokas sian ridon malantaŭ la mano.

— Jen vidu, Ngan! — Diras onklo Tu Nghiep. — Ĉu vi aŭdas, kion diris Kujen?

— Jes, mi bone aŭdas! — Kaj Ngan provas paroli kun pika ironio:

— Tion mi bone scias, onĉjo! Mi ja ne estas inda je ŝia atendemo...

Li ankoraŭ ne finparolas, kiam Kujen etendas sian manon por pinĉi lian kruron. Ŝi denove donas al li duan pinĉon. Ĉi foje, ambaŭ ŝiaj fingroj premas pli longe,

antaŭ ol iom post iom malstreĉiĝi. Sed, baldaŭ, — oni ne scias, pri kio ŝi pensas, — ŝi apogas sian mentonon sur la ŝultron de Ngan kaj mordetas ĝin. Tiun geston de Kujen tute ne rimarkas onklo Tu Nghiep.

Ngan restas senmove, lasante sian amatinon mordeti lian ŝultron. Li sentas ne doloron, sed nur ĝojon kaj feliĉon. Li subite ekrimarkas, ke meze dum la batalo, ĝui tiun manifestiĝon de l'amo vere estas malofta feliĉego. Ordinare, ambaŭ geamantoj renkontis unu la alian, ne en favoraj kaj agrablaj cirkonstancoj, sed en subteraj ŝirmejoj, en gerilbazoj, meze de l' ĝangalo kaj nun, en tiu kaverno, kie ĉiu minuto fariĝas pli streĉa, pli sankta! Nun pli ol iam, li sentas sin ĉirkaŭata de ĉiuj siaj kamaradoj kunbatalantoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ Kujen.

Subite, li ekmovas sian ŝultron, delikate forpuŝante la kapon de Kujen; li ĵus ekaŭdis malfortan susuradon, kvazaŭ bruon de sekaj arbofolioj, kiujn la vento forblovas tra la breĉo. Tuj, li ŝaltas sian elektran torĉon. La lumfasko, direktata al la larĝa tratruo de la brikmuro, permesas al la tri homoj vidi unu longan kvadratan pakaĵon el griza ŝtofo kaj ĉirkaŭvolvitan per ŝnuroj. Ĝi iom post iom enŝoviĝas en la kavernon, tra la breĉo, puŝate ĉe sia postaĵo per unu bambustango. Kaj ĉe unu el ĝiaj flankoj, moviĝetas unu fumanta meĉo. Ĉiuj terurite rigardas al tiu ŝnurmeĉo, kiu rapide forbrulas. Apenaŭ la griza pakaĵo komplete penetras en la kavernon, la bambustango tuj retiriĝas. Tenante en sia mano la elektran torĉon kaj la pafilon, Ngan ankoraŭ ne scias, kiel fari, kiam Kujen rapidmove metas sian karabenon sur la teron kaj sin ĵetas antaŭen. Ŝi ekkaptas la eksplodaĵon kaj abrupte lanĉas

ĝin eksteren tra la breĉo. Kiam Kujen retropaŝas kaj sternigas ventraltere, Ngan tuj etendas sian brakon por subteni ŝian bruston. Aŭdiĝas terura eksplodbruo. La terplanko kaj la rokmuroj de la kaverno forte skuiĝas. La tri homoj estas suprenĵetitaj el la tero, poste renversfalas. Dank' al la protekta brako de Ngan, Kujen ne sentas spirĝenecon kaj restas ĉiam vigla. Ŝi prove prenas sian karabenon, kiam Ngan ekkrias:

— Rapide eniru pli profunden!

Li ŝaltas la elektran torĉon por lumigi al Kujen kaj onklo Tu Nghiep kaj postkuras ilin. Alveninte al la interna vojforko de la kaverno, la tri homoj haltas. Onklo Tu Nghiep kaŭre sidiĝas spiregante:

— Sufiĉis, ke ni malfruis kelkajn sekundojn por esti pulvorigitaj! Nu, tiu brulanta meĉo jam teruris min!

Alkuras ĉiuj kamaradoj el la fundo de la kaverno.

— Kie estas Ngan? — Demandas Hai Thep. — Kiel statas niaj kamaradoj?

— Jen mi! Ni estas sendifektaj. La kanajloj ensŝovis eksplodaĵon en nian kavernon, sed ni ĝustatempe malkovris tion. Kujen jam rapide ekkaptis la mortigan pakaĵon kaj ĵetis ĝin eksteren.

— Mi ja antaŭsciis, ke ili nepre uzas dinamitojn kontraŭ ni.

Hai Thep direktas la lumfaskon de la elektra torĉo al la kaverna faŭko. Trovante nenion eksterordinaran, li diras:

— Restu ĉi tie kaj ŝirmu vin!... Pretigu vin por fronti kontraŭ la riskemulojn, kiuj invados la kavernon. Kie estas Ba Ren?

— Ĵen mi!

— Via grupo ankaŭ gardostaru ĉi tie.

— Konsentite!

Ba Ren elpaŝas. Li prove serĉas onklon Tu Nghiep kaj palpas lian tutan korpon, antaŭ ol eksplodi per rido:

— Kia feliĉo! Nia onĉjo estas ankoraŭ tute sana!

Poste li ekprenas la kvarangulan bastonon el lia mano;

— Pasigu al mi la bastonon kaj iru ripozi!

Ĝuste tiam, ĉe la kaverna faŭko, denove aŭdiĝas eksplodbruo. La tero forte skuiĝas sub ĉies piedoj. Ŝtonetoj kaj polvo brue disĵetiĝas en la aeron. La malamiko jam eksplodigas duan dinamiton. La ekbrilo de l' eksplodo permesas al ĉiuj vidi densan amason da nigra fumo. La tuta kaverno vibras longan momenton kaj tra la rokmuroj kuras krakbruoj, kvazaŭ tiuj de fendiĝantaj ŝtonegoj.

— Mi lumigas al vi, kamaradoj.—Diras Hai Thep.—Ĉiu tenu prete sian pafilon kaj pafrompu la kranion al tiu, kiu aŭdacas traŝoviĝi tra la breĉo!

Ngan lokas sian «Thompson»-on sur iun ŝtonegon kaj montras al Kujen alian, tute proksime. La junulino eklevas sian karabenon kaj malrapide apogas ĝian kolbon sur sian ŝultron. La aliaj kamaradoj ankaŭ tenas sian pafilon en atenda pozicio. La elektra torĉo, tenata en la mano de Hai Thep, ĉiam direktas sian lumfaskon al la kaverna faŭko. Kujen vidas antaŭ la kanonfaŭko de sia karabeno la forvaporiĝantan fum-amason kaj la brikmuron, kiu duone malaperas. La alia duono konsistas nur el amaso da brikrompaĵoj.

La lumo de la elektra torĉo subite estingiĝas. Unu sekundon poste, kiam Hai Thep denove ŝaltas ĝin, en la blindiga luma cirklo neatendite ekaperas homsilueto, transsaltante la brikamason, kun griza pakaĵo en la brakoj. Aŭdiĝas samtempe tri, kvar pafoj. La malfeliĉulo abrupte haltas, lasas fali la eksplodaĵon. Li subfleksiĝas surloke, klinante flanken sian kapon, dum ambaŭ manoj ĉiam ĉirkaŭpremas la grizan pakaĵon, ĉe kies flanko fumante brulas unu meĉo. Kujen apenaŭ eligas unu teruran krion « Aj » kaj algluiĝas al iu kaverna murfendo, kiam bruege eksplodas la dinamito.

El ambaŭ rokmuroj lavange falas ŝtonfragmentoj. Ĉi foje, la kaverna elirejo estas ankaŭ plenkovrata per densa nigra fumo. Kiam ĝi forvaporiĝas, ne plu vidiĝas la malamiko. La supro de la kaverna faŭko plilarĝiĝas kaj malsupre de ĝi, pli dense amasiĝas brik- kaj ŝtonrompaĵoj.

Ĉiam blindige brilas la lumo de la elektra torĉo, tenata en la mano de Hai Thep. Ĉiuj restas ĉiam batalpretaj, esperante refoje okazigi tiun interesan scenon. Sed, forpasis unu, du, tri, poste kvin minutoj kaj pli poste, ĝis kiam preskaŭ paliĝas la elektra lumo, oni vidas plu neniun malamikon fari la saman manovron, saltante en la kavernon kun la eksplodaĵo.

Fine, senpacienca pro tro longa atendado, Hai Thep estingas sian lampon. Sed, maltrankvila, li denove ŝaltas la lumon. Kaj tiel, post intermitaj ekbriloj de elektra torĉo, li trovas, ke nenio eksterordinara okazas.

— Sendube, ili jam retiriĝas. — Diras Ba Ren.

Sed onklo Tu Nghiep intervenas :

— Atendu, ni plue direktu la elektran lumon al la kaverna faŭko. Tuj baldaŭ leviĝos la luno.

Ekstere, ĉiam susuras la vento tra la arbofolioj. Iafoje, ĝi zumante trablovas la disrompitan breĉon. Kaj, malproksime, la marondegoj ĉiam seninterrompe aŭdigas sian muĝadon, kvazaŭ ruladon de tamburo.

La pafantoj konstante gardas sian batalpretecon. Sola, Kujen tre malpacienciĝas, precipe pro tiu elektra lumo, kiu sinsekve ekbrilas kaj estingiĝas. Ŝia montrofingro, algluita al la pafrisorto, jam pli ol unufoje kuntiriĝas kaj malstreĉiĝas. Sed ŝiaj okuloj ĉiam fikse direktiĝas al tiu kaverna faŭko, jen luma, jen malluma. Baldaŭ, post kiam sufiĉe longe estingiĝas la elektra lumo, Kujen ankoraŭ rekonas ĝin. Ĝuste, kiel diris onklo Tu Nghiep, jam leviĝas la luno. La kaverna faŭko ne estas plu malluma, kiel antaŭe. Tie, la mallumo jam cedas al la malhela bluo, kiu iom post iom paliĝas por fariĝi pli poste tute hela.

Nun, Kujen povas jam distingi la nigran amason da brikrompaĵoj dis de la kaverna faŭko, superverŝita per la arĝenta lunlumo.

Hai Thep ne plu ŝaltas sian elektran torĉon. Li ordonas al la grupo de Ba Ren daŭrigi sian gardodeĵoron kaj al la ceteraj kamaradoj eniri en la kavernon por ripozo. De tiam, fariĝas tute kviete. Ne plu aŭdiĝas eksplodo de dinamito, eĉ la unuopaj pafbruoj, tie malproksime en la vilaĝo, kiel dum la pasintaj noktoj.

La grupo de gerilanoj, respondecaj pri la gardo de la kaverna faŭko, jam kolektiĝas malantaŭ la amaso da brikrompaĵoj. La estro de tiu lasta gardodeĵoro

estas Hai Thep. Estas unuafoje, de post tiom da tagoj de akra lukto, ke li vidas la matenkrepuskan lumon pli abunde enversiĝi en la kavernon tra tiu faŭko, plilargigita per la lastnokta eksplodo de dinamitoj. Kiam li ekkrias: « Ektagiĝas! », la nokta mallumo jam forvaporiĝas, la maro ankaŭ jam kvietiĝas, kaj ĉie triladas birdoj. Li komencas klare vidi, ekster la kaverno, la iom malsekajn de roso herbofoliojn, kiujn milde karesas la senĉese heliĝanta freŝa lumo de l' mateno. Nun, li ankaŭ rimarkas, ke tiu herbejo estas plurloke premplatigita de ledŝuoj kaj li ektremas, vidante antaŭ si unu sangoplenan stumpon de homa kruro. Li diras al ambaŭ gerilanoj de sia grupo:

— Certe, ĝi apartenas al tiu kanajlo, dispecigita lastan nokton per eksplodo de dinamito.

Ĝuste tiam, li ekaŭdas malantaŭ si ridbruon. Li tuj sin turnas posten. Apenaŭ vekiĝinte, Ut jam elŝteliĝas el la kaverno kaj kuras al li. Per eksvingo de l'fingro, la knabeto forvišas sian okulmukon poste, apogante siajn manojn sur la genuoj, li iom kurbe staras kaj fikse rigardas al la krurstumpo.

— Terure grasdika, onĉjo Hai! — Diras Ut, elŝovante la langon.

— Jes, li ja sola senpene transportis tiun pezan pakaĵon da dinamito. Feliĉe, ke restas ankoraŭ tiu krurpeco!...

— Ĉu vi scias, ke lastan nokton, la malamiko atakis nian kavernon? — Demandas Hai Thep.

La knabeto Ut ne respondas, Lia kapo iom alten leviĝas. Šajnas, ke li estas absorbata per la rigardo al io malproksima.

— Ŝendube, tiam vi profunde dormis, ĉu ne, Ŭt ?

Ut ĉiam atente direktas siajn okulojn for antaŭen. Subite, li konfuze ekkrias :

— Ĉielo !... *ili*... ili alvenas !...

Poste, li fingremontras en direkto al la fora ĝardenrando.

— Tie, tie, ili estas multnombraj, onĉjo Hai !

— Kie ? Kie ? — Urĝe demandas Hai Thep, prove rigardante laŭ la montrofingro de la knabeto. Vere, tie malproksime, svarmas homamasoj. Ili ŝajne kuras al la kaverno.

— Kaŝu nin kaj estu batalpretaj !— Tuj krie ordonas Hai Thep.

La tri gerilanoj kaj Ut senprokraste sin kaŝas en iu rokfendego. Hai Thep brue ŝargas sian pafilon « Garrand » kaj strečas siajn okulojn. La homamasoj iom post iom forlasas la ĝardenrandon. Subite, la knabeto Ut palpebrumante laŭte krias :

— Ha !... Ne estas soldatoj !

Ĝuste tiam, ambaŭ gerilanoj ankaŭ krias :

— Ha ! Ŝajnas, ke ili estas niaj samvilaĝanoj !... Tiu, kiu kuras ĉekape tute similas al patrino Saŭ, kun kotone blankaj kapharoj !... Jes, ĝuste ŝi !

La tri viroj, ankoraŭ dubemaj, tute konfuziĝas, kiam Ut montrante per la fingro ĝojkrias :

— Jen mia paĉjo, kiu kuras !

— Strange ! — Murmuras Hai Thep.— Aŭ la malamikoj perforte devigas niajn vilaĝanojn iri ĉefvice por ŝirmi ilin kontraŭ niaj kugloj ?

— Ne ! Vidiĝas neniu soldato !

— Malgraŭ ĉio, ĉiam zorge kaŝu niĥ!

Minuton post minuto, la homamasoj venas pli proksime. Ili jam preterkuras pli ol duonon de la senarba kampo. Malantaŭ ili, vere vidiĝas neniu soldato. Hai Thep komencas rekoni ĉiun homon. Jen patrino Saŭ, la edzino de Ba Ren, onklo Tu Raŭ, kamarado Tam Ĉan, onklino Ba U... Ĉielo! En plena kompleteco! Inter ili, estas ankaŭ lia edzino, onklino Tu Nghiep, la edzino de Len... Ja, mankas neniu el tiu loĝantaro de Hon Dat. Viroj kaj virinoj, grandaĝuloj kaj infanoj, ĉiuj vete alkuras. Kelkaj puŝiĝas je ŝtonoj, falrenversiĝas, prove ekstaras kaj denove kuras. Je dek paŝoj malproksime de la kaverna faŭko, la unuaj venintoj haltas; ili metas ambaŭ manojn ĉirkaŭ la buŝo kaj anhelante kriegas:

— Kamaradoj, ili jam retiriĝas!

En la kaverno ĉiam regas silento. Subite, meze de l' homamasoj, iu eksplodas per ploroj. Dorskurbe onklo Tu Raŭ alkuras kaj laŭtvoĉe demandas:

— He, kamaradoj, ĉu vi ankoraŭ vivas?

Klare aŭdante tiun familiaran voĉon, Hai Thep tuj elŝoviĝas el la rokfendego kaj, kun sia pafilo en la mano, transsaltas la amasojn da brik- kaj ŝtonrompaĵoj. Lin viglamove postkuras la knabeto Ut kaj ambaŭ gerilanoj.

Hai Thep sin direktas rekte al la vilaĝanoj. Onklo Tu Raŭ tuj sin ĵetas sur lian kolon, dum Tam Ĉan ekprenas kaj forte skuas ambaŭ liajn ŝultrojn, ridante:

— Ha, ha! Mi jam kredas, ke vi ne plu revenos hejmen por revidi viajn edzinon kaj infanojn!

Ĉiuj faras cirklon ĉirkaŭ Hai Thep kaj Ut, brakumas ambaŭ gerilanojn; unuj manbatetas ilian dorson, la aliaj tiras ilian brakon. Kaj meze de tiu korelverŝado, aŭdiĝas jen plorsingultoj, jen ridoj. Onklino Hai Thep ne ridas; ŝi rigardas sian edzon tra larmovualo. Ŝi trovas, ke nun lia vizaĝo estas tute pala kun profunde kaviĝintaj okuloj. Hai Thep sciigas al ĉiuj, ke mankas neniu el liaj gekamaradoj, krom Su kaj Dat. Poste, li venas proksime al sia edzino kaj flustre demandas:

— Kie estas nia bebo?

— Mi jam konfidas lin al iu parenco en la vilaĝo.

Ĝuste tiam, la knabeto Ut sukcesas elgliti el la ĉirkaŭpremo de kelkaj vilaĝanoj kaj kure revenas al la kaverno. Hai Thep serĉas per la rigardo patrinon Saŭ kaj baldaŭ trovas ŝin staranta tute proksime, kun ambaŭ sekaj okuloj direktitaj antaŭen sen palpebrumi. Kiam li kuras al ŝi, la maljunulino nenion diras kaj etpaŝe iras al la kaverno, levante al sia buŝo la ruĝe striitan tukon, firme tenatan en ŝia dekstra mano.

La knabeto Ut jam revenas al la kaverno por informi siajn geonklojn pri la alveno de la vilaĝanoj. Nun, ĉiuj urĝpaŝe eliras kaj renkontas tiujn lastajn antaŭ la kaverna faŭko. Intermiksiĝas krioj, ploroj kaj rideksplodoj. Dum la nigra hundeto de Ut ĝoje bojante kuras tien kaj reen, ĉiuj impete ĉirkaŭbrakas unu la alian sur tiu terparcelo plugita de kugloj. La gerilano Hai Ka Tren, dorsoportanta la knabeton Be, ŝancelpaŝe eliras el la kaverno. Lin postsekvas Kujen kun la etulino Thuji sur la dorso. Alveninte al la brikamasoj, ŝi eklevas la kanonfaŭkon de sia karabeno, pendanta ĉe ŝia ŝultro kaj urĝas siajn paŝojn. Patrino Saŭ pene

alkuras kaj etendante ambaŭ siajn tremantajn manojn ĉirkaŭbrakas samfoje sian filinon Kujen kaj sian nepinon Thuji, antaŭ ol ekplori. Vidante sian avinon plori, Thuji ankaŭ ploras, poste maltrankvila, ŝi rigarde esploras la ĉirkaŭantajn homamasojn. Ĉiuj okuloj koncentriĝas al ŝi. Subite, la etulino ekkrias :

— Avnjo, avnjo, kie estas mia panjo ? Mia panjo ?

Patrino Saŭ ne respondas. Thuji tuj baraktante elglitas el la brakoj de sia avino kaj pli laŭte vokas :

— Panjo, panjo !

La etulino kriante kuras serĉi sian patrinon. Ŝi kuras de tiu homgrupo al alia. Ĉiuj senescepte rigardas ŝin kun timo kaj doloro. Kaj meze de tiuj korŝiraj krioj de Thuji, la gekamaradoj el la kaverno plue eliras.

Nam Njo subtenas fraton Tham sub la brakoj. Lia vundita kruro restas rigida ; tial li ankoraŭ lamas.

La deksepa homo kaj ankaŭ la lasta, kiu eliras el la kaverno estas Ngan. Li portas sur siaj brakoj la pakaĵon el rozkolora nilono. Tiu diafana nilontuko malklare vidigas la formon de la vizaĝo de Dat. Kamarado Tam Ĉan sin ĵetas antaŭen. Li abrupte haltas kaj staras iun momenton antaŭ Ngan, poste silente antaŭenpaŝas etendante ambaŭ manojn por transpreni la kadavron de Dat. Nun, tra tiu maldika nilontuko, li rigardas sen palpebrumi la rozkoloran vizaĝon de la malfeliĉulo. Ambaŭ liaj okuloj, larĝe malfermitaj kun senmova pupilo, fariĝas baldaŭ tute ruĝaj kaj iom malsekaj.

Kiel la ceteraj kamaradoj, Ngan ankaŭ estas videble lackonsumita, kun kuntiriĝinta malgrasa kaj polvokovrita vizaĝo. Ĉiuj senescepte portas vestojn ŝiritajn aŭ ĉe la krurumoj aŭ ĉe la ŝultroj aŭ ĉe la dorso.

Ili ŝancelpaŝe iras sub la matenkrepuska lumo. Jen estas la unuaj sunradioj, kiujn ili renkontas, — sunradioj, kiuj briligas miriadon da rosgutoj dissemitaj sur la herbofolioj,—sunradioj, kiuj ore lumigas ĉiujn ĝardenrandojn kaj altajn arbosuprojn. Kaj meze de tiu sunlumo blovetas la printempa vento, tiel karesmilda! Tie malproksime, malantaŭ la balanciĝantaj brilflavaj bambutrunkoj, la marondoj, superverŝitaj de tiu sunlumo, trembrile agitiĝas kaj obeeme, senbrue ruliĝas al la strando...

Majo 1965

Paĝo	*Linio*	*Eraro*	*Korekto*
29	6	sajn	siajn
68	4	« fraĉjo Hai »	fraĉjon Hai
73	16	voikruciĝo	vojkruciĝo
89	23	retune iras	returne iras
96	23	ondonis	ordonis
224	15	katenigi	kateni
—	25	katenigita	katenita
262	9	etulino	knabo
277	26	iru	ekiru
314	18	instalas	instalos
387	11	alportis	alporti

Nekonataj vortoj

Longano (Dimocarpus) – 10,
mangostano –
pampelmuso –

PRESITA EN VJETNAMA DEMOKRATIA RESPUBLIKO